Kiel ne endas fari revolucion

Kompilaĵo: anarkiistaj vikdpunktoj pri la Sovetia Rusujo

Ángel PESTAÑA:
70 tagojn en Rusujo.
Kion mi vidis

Gaston LEVAL: Lenino,
entombiginto de la rusa revolucio

Vicente Pérez (COMBINA):
Aktivulo de NKL en Rusujo

Camillo BERNERI:
La ŝtato kaj la klasoj

Esperantigis Jesús GONZÁLEZ

Biblioteko Mateo Morral

Ĝenerala Konfederacio de la Laboro

KIEL NE ENDAS FARI REVOLUCION

Kompilaĵo: anarkiistaj vidpunktoj pri la Sovetia Rusujo

ÁNGEL PESTAÑA. Sepdek tagojn en Rusujo. Kion mi vidis.

Eldonita de Biblioteca Virtual Omegalfa (2013) por ĝia disvastigo per interreto. Kopio de la originalo eldonita de Tipografia Cosmos, San Pablo, 95 Barcelono.

GASTON LEVAL. Lenino, entombiginto de la rusa revolucio.

Eldonita de La Turba Ediciones. Anarkiistoj, Montevideo, decembron 2007.

VICENTE PÉREZ (Combina). Aktivulo de NKL en Rusujo.

Eldonita de Ediciones Rojo y Negro, Gavá 38, Barcelono. 2a eldono 1933

CAMILLO BERNERI: La ŝtato kaj la klasoj.

Eldonita de NKL en Barcelono, en la ĵurnalo por la italaj volontuloj Guerra di clase (itale, Milito de klaso), num. 2, 17-an de oktobro 1936.
Traduko (de 2016, kun multaj korektoj) de Carlos M. Rama, en sia antologio de tekstoj de Camillo Berneri en 1977.

Esperantigitaj de Jesús González, 2017

2017 Biblioteko Mateo Morral
Ĝenerala Konfederacio de la Laboro
Urba Federacio de Viladekans'
Sant Maria, 72
ES-08840 Viladecans

Enkonduko de la tradukinto

En 1923, publikiĝis en Santiago de Ĉilio libreto titolita: “La laborista kaj kamparana Rusujo. Io de tio vidita dum vizito al Moksvo”, verkita de Luis E. Recabarren S., komunista deputito. Li rakontas sian viziton el kvardek tri tagoj, kiel delegito por la 4a kongreso de la Komunista Internacio kaj la 2a kongreso de la Internacio de la Ruĝaj Sindikatoj. En la kvara paĝo, li klarigas kial li iris al Rusujo:

Mi iris vidi ĉu la laborista klaso efektive havis enmane la politikan povon per kiu ĝi garantios la konservadon en siaj manoj de la ekonomia povo.

Mi iris vidi ĉu la laborista klaso jam definitive neniigis la tutan ŝtaton de kapitalisma ekspluatado kaj de tiraneco.

Mi iris vidi ĉu la ekspropigo de la ekspluatantoj estis ja tute plenumita en Rusujo.

Mi iris vidi ĉu estus eblo de restarigo de la kapitalisma sistemo.

Kaj en la sekva paĝo, li resumas siajn impresojn:

Kaj mi povis vidi ĝoje, ke la laboristoj de Rusujo efektive havis en siaj manoj la tutan forton de la politika kaj ekonomia povo kaj, ke ŝajnis neeble, ke estu en la mondo forto kapabla senigi al la proletaro de Rusujo je tiu jam konkerita povo.

Krome mi povis konstati, ke la ekspropriigo de la ekspluatantoj estas kompleta, tiel ke neniam revenos en Rusujon reĝimo de ekspluatado kaj tiraneco, kiel kiun ni ankoraŭ eltenas en Ĉilio.

Mi povis konvinki min, ke mi ne trompis min antaŭe, kiam mi predikis en ĉi tiu lando, ke la proletaro de Rusujo havas en siaj manoj la tutan povon por realigi sian estontan feliĉon kaj kunigas la elementojn por konstrui la

komunisman socion, kiel veran regnon de la sociala justeco.

Mi esperas, ke la nuntempa leganto, bone informita, povas kompreni, ke tiu kompatindulo aŭ trompiĝis aŭ komprenis nenion aŭ ne volis vidi la realon aŭ estis trompita de la bolŝevikoj aŭ... cinike mensogis. Bedaŭrinde multaj aliaj homoj ankaŭ trompiĝis aŭ konscie trompis siajn samtempulojn ade mensogante pri tio okazinta kaj okazanta en la Sovetia Rusujo.

Tri el kvar tradukitoj en ĉi tiu kompilaĵo ankaŭ estis en Rusujo aŭ loĝis en ĝi. Kaj surprize!: ili ne spertis la samon, kiel la komunista deputito. Kaj ili denuncis ĝin per siaj verkoj samkiel faris multaj aliaj rusaj aŭ alilandaj anarkiistoj de post la unuaj momentoj de la revolucia fakto, kiuj kritikadis la subpremadon, la krimojn kaj la devojiĝojn de la “diktatorado de la proletaro” kaj ties bolŝevikaj gvidantoj.

Mallonga historia klarigo: Ángel Pestaña, historia gravulo de la hispana anarkisindikatista NKL (Nacia Konfederacio de la Laboro), rakontas detale siajn spertojn dum sepdek tagoj en Rusujo, kien li iris kiel delegito de NKL por la dua Kongreso de la Komunista Internacio (KI). Lia celo estis akiri informojn por ke NKL definitive povu konfirmi aŭ ne sian aliĝon al la KI.

Reveninte de Rusujo, Pestaña eĉ ne povis kontakti kun siaj kolegoj ĉar estis enprizonigita en senkomunika reĝimo. Ĉar NKL ne konis la opinion de Pestaña, organizis kaŝan delegitkunvenon en kiu ĉeestis malmultaj aktivuloj, ĉar la organizo suferadis fortan subpremon fare de la diktatora registaro. Tie, serio de pormarksistaj uloj, aliĝantoj al NKL kaj okupantaj postenojn de respondeco en la kataluna regiona sindikato, sin mennomumis kiel membroj de la dua delegitaro, kiu iros al Sovetio por partopreni en la fondo de la Internacio Sindikata Ruĝa kaj en la 3a Kongreso de la

Tria Internacio. Eksciitaj la anarkiistaj grupoj pri tio, kio okazis, sukcesis enmeti en la delegitaron Gaston Leval, anarkiisto de franca origino loĝinta en Hispanujo kaj ankaŭ aliĝinta al NKL. Fine kaj konsiderante la konkludojn de la kongreso, la anarkisindikatista konfederacio decidis ne aliĝi al la Komunista Internacio kaj male fari tion al la ĵus refondita, en Berlino, IAL (Internacia Asocio de la Laboristoj). El tiu vojaĝo estiĝas broŝuro, kie la aŭtoro elmetas sian nelaŭdantan opinion pri Lenino.

Aliflanke, Vicente Pérez aktivulo de la barcelona NKL loĝis en Rusujo, kiel politika enmigrinto, kaj rakontas siajn spertojn kaj opiniojn en la tria tradukita verketo.

Finfine de Camillo Berneri, la sola aŭtoro el tiu kompilaĵo kiu ne vizitis Rusujon kaj ankaŭ ne apartenis al NKL, mi tradukis artikolon verkita kiam li loĝis en Barcelono partoprenante en la organizo de kontraŭfaŝistaj italaj volontuloj kaj en la propagando en la itala per la radiostacio kaj gazetaro.

Eble iu pensos, ke ĉi tiun tradukon ne estas necesa hodiaŭ aŭ, ke estas aliaj aferoj pli gravaj ol repiki en la vundon de la fiasko de la komunista rusa revolucio.

Eble aŭ eble ne. Estas tempo, kiam multaj historiistoj de diversaj tendencoj publikigas siajn pli-malpli dikajn volumojn pri la revolucia fakto kaj donas sian pli-malpli senpartian version pri la afero. Tio estas, la rusa revolucio ankoraŭ vivas, almenaŭ en la libroj. Kaj subite oni povas legi maloportunaĵojn diritajn de politikistaĉo, kiel Pablo Iglesias -supera gvidanto de la hispana maldekstra (?) partio *Podemos*-, kiu senhonte kuraĝis dum debato[1] pri la centjariĝo de la sovetia revolucio laŭdi la “bolŝevikan

1 Noto el tradukintto: vidu la artikolon hispane en la retadreso: https://politica.elpais.com/politica/2017/07/26/actualidad/1501059673_006149.html

genion”, dirante, ke la rusa revolucio “konstruis politikan teorion por venki”, ke Lenino pruvis, ke “la politiko povas venki la historion” ellaborante “politikan sciencon por tiuj de malsupre pli potencan ol tiu de tiuj de supre” aŭ, ke “Lenino estas genio pri la konkero de la politika povo”. Krome li etendis tiun kvaliton esti “la ŝlosilo, kiu malfermas pordon” kaj “produktas ordon” al la hispanaj komunistoj, kiuj dum la enlanda milito formis “disciplinitan armeon por venki la militon”, serĉis internaciajn interligojn, ktp.

Estas malfacile por mi klarigi kiel kaj kial tiu profesoro de politika scienco kapablas hodiaŭ mensogi samkiel faris la porbolŝevikoj de antaŭ cent jaroj. Ĉu eble ni lernis nenion? Ĉu nekredeble hodiaŭ, 2017, necesas klarigi kaj reklarigi al la homoj, kiu estis la agado de la bolŝevikoj, la aŭtentikaj perfiduloj al la rusa revolucio?

Sed ne gravas, jen estas por la esperantaj legantoj eta kontribuo de kelkaj anarkiistoj al la kompreno de tio okazinta dum la unuaj jaroj de la rusa revolucio, sendube la plej grava okazintaĵo de la historio de la tutmonda proletaro.

Ĉiu deduktu, kion konsideros oportuna.

Fine mi devas klarigi, ke enmetis en ĉi tiun kompilaĵon malgrandan artikolon de Camillo Berneri, kiel eta omaĝo al la malmulte konata itala anarkiisto forpasinta antaŭ ĝuste okdek jaroj dum la enlanda hispana milito, fie mortigita… de la disciplinitaj komunistoj, kiuj tiom plaĉas al la sinjoro Iglesias.

Jesús González
Oktobro 2017

SEPDEK TAGOJN EN RUSUJO. KION MI VIDIS.

ÁNGEL PESTAÑA

Al SACHA KROPOTKIN
Kiel pruvo de amikeco kaj kolegeco,
al ŝi dediĉas ĉi tiun libron
Ángel Pestaña

1a Survoje al Rusujo kaj unuaj impresoj

Dum la subpremo komencita de la civila guberniestro, grafo de Salvatierra, ruinigis la barcelonan laboristan organizon, plenigante la malliberejon per sindikatistoj, la Komitato de la Nacia Konfederacio de la Laboro kaj pli rekte tiu de la Regiona Konfederacio de Katalunujo klopodis plenumi la interkonsenton de la Nacia Kongreso, okazinta en Madrido, sendi la aliĝon de la laborista konfederacia institucio al la Komunista Internacio de Moskvo.

Ĉar kun la interkonsento de aliĝo estis kunigita la devo sendi, se eblis, unu aŭ plurajn delegitojn al Rusujo por ke post sia reveno ili informu pri ĉio, kion ili tie observos, la tasko de la Komitato estis multe pli malfacila. La aliĝon skribe sendube estis pli facile alvenigi al ĝi, malgraŭ la

blokado, ol kiun ajn delegitaron. Kaj la intereso de la organizo estis, ke alvenos la delegitaro; do pli ol simbola aliĝo, ĉar ĉi tio signifis la interkonsenton de la Kongreso, oni aspiris atingi la plej ĝustan konon pri la vera situacio de Rusujo.

Memkompreneble la tasko ne estis malgranda. La blokado enfermis Rusujon ene de ferzono kaj la intereso de la registaroj kompromisintaj en tiu blokado estis neebligi, ke penetris en Rusujon iu, kiu povis kunporti ne jam materialajn helpojn, sed voĉon de stimulo kaj simpatio al la popolo, kiu faris sian revolucion.

La malfacilaĵoj trovitaj de la Komitato, kiam ĝi volis organizi la irvojon de Barcelono, ĉiam ŝajnis nesupereblaj kaj ni devas diri, ke de Hispanujo tiel reale ili estis.

Kiam oni havis la konvinkon, ke la sukceso de la entrepreno ne dependis de la kvanto da antaŭvidoj, oni konfidis la vojaĝon al la hazardo, al la ebloj de tio neatendita; oni do riskis kelkcentojn da pesetoj kaj sendis tri membrojn de la laborista organizo al la centro de Eŭropo.

Estante mi unu el la tri delegitoj[2] kaj certe la plej bonsanĉa pri la vojaĝo, post multnombraj aventuroj kaj sukcesi eviti grandajn malfacilaĵojn (iu el ili sufiĉe neordinara), la 25-an de junio 1920, mi surpiedis rusan teron, eniris en la landon de la revolucia ĉarmo. Pasis preskaŭ tri monatoj de la tago, kiam mi forlasis Barcelonon.

Kiu estis la unua impreso ricevita? De entuziasmo, admiro, intensa ĝojo. Kial? Estus tro malsimple klarigi ĝin.

* * *

2 Noto el tradukinto: la aliaj du delegitoj estis Eusebi Carbó kaj Salvador Quemades.

Jam trairita Narva (Estonujo) —kien mi alvenis— la rusa landlimo troviĝas trans la rivero, kiu ankaŭ nomiĝas Narva kaj malmulte distancas de la estona ĉefurbo.

De Narva antaŭen, la trajno konsistas el sola vagono, per kiu ni[3] veturas, unu el la vagonoj-litoj konfiskitaj de la Sovetoj al la Internacia Kompanio de Wagons-lits. Krome ĝi estas la vagono de la diplomatia poŝto, kaj per kiu tiutempe veturas la komisiito de la diplomatia valizo de la rusa Imperiestro en Estonujo, kamarado Gukosky, kaj tiuj de la komercaj delegitoj de Londono kaj Berlino.

La rusan landlimon al ni anoncas la ĉeesto de granda disko el blankfarbita ligno kun strio de intensa ruĝo lokita sur alta fosto.

Sekcio de soldatoj kun ties majoro ĉekape, kiuj envagoniĝas por informiĝi pri kiu kaj kial vojaĝas, konfirmas nian eniron en Rusujon kaj nian feliĉan alvenon.

Post mallonga inspekto kaj pridemandado fare de la majoro, rekomencas la trajno sian vojon kaj jam ne haltas ĝis Yamburgo, unua rusa grava stacidomo post la landlimo.

Atendante la kunmetadon de trajno da varoj, kiu devis aldoniĝi al la vagono per kiu ni veturis, ni pasigas ĉirkaŭ ses horojn en la stacidomo. Ĉi tiu atendo al ni donas okazon miksiĝi kun la veraj kaj aŭtentikaj kamparanoj, kun la eltenemaj *mujik*-oj[4] kaj observi ilin dum iliaj ĉiutagaj okupiĝoj.

Sur la lintelo de la ĉefa pordo de la stacidomo oni vidas la portretojn de Markso, Lenino kaj Trockij. Multnombraj ruĝaj flagoj flagras pro la vento, kun la falĉileto

3 NeT: iuj el la aŭtoroj tradukitaj kutimas uzi la “pluralon de modesteco” (“ni”) en siaj verkoj; sed iufoje ankaŭ uzas la normalan “mi”. La traduko estas farita tute respektante la pronomon uzatan de la verkisto.

4 NeT: rusa kamparano sen terpropraĵoj.

kaj la martelo sur la centro, emblemo de la Respubliko de la Sovetoj.

Ĉar vojaĝas kun ni Abramovich, aŭ Abbrecht, aŭ "La Okulo de Moskvo" —per ĉi tiuj tri nomoj oni konas ĉi tiun gravan rusan funkciulon, unu el kiuj ĝuas pli grandan konfidon de la Komunista Partio, ĉar li estas el la plej prestiĝaj sekretaj reprezentantoj de la Registaro—, oni ĉie ricevas nin per regaladoj kaj respekto.

La stacidomestro al ni invitas, ke ni eniru en lian oficejon, se ne volas atendi en la atendejo por vojaĝantoj. Ni rifuzas la inviton kaj atendas kune kun trideko da vojaĝantoj ĝis oni konsistigos la trajnon da varoj.

Gramofono ripetis unu el la paroladoj, kiun Trockij ĵus eldiris en la batalfronto. La ne konado de la rusa lingvo al ni malhelpis kompreni lian sendube rimarkindan paroladon. La kamparanoj ne donis sian atenton al la voĉoj el la gramofono. Eble tiom ĝin ripeti ĝi al ili ne kaŭzis impreson. Ajna meza observanto rimarkintus sur tiuj vizaĝoj la nekonfuzeblan esprimon de la tedo.

Lacaj pro la atendo kaj la gramofono, ni decidis iri al la ĉirkaŭaĵoj kaj alproksimiĝi al la vilaĝo, kiu staras iom malproksime de la stacidomo.

Ni alvenas ĝis la unuaj domoj de Yamburgo kaj antaŭ ol internigi nin en ĝiajn stratojn —kaprica nomo por nomi vojojn tiel malmulte urbajn, kiel tiujn— ni vidis fiksitan sur du fostoj grandan tabulon kun du ekzempleroj de "*Izvestia*" kaj aliaj du de "*Pravda*", informaj organoj de la Registaro de Moskvo.

Ni demandis al membro de la loka Soveto, elprovita komunisto, pere de Abramovich, kiu al ni servis kiel interpretisto, kial oni tiel fiksis la ĵurnalojn kaj ĉu oni vendis aŭ disdonis ilin senpage.

Li diris al ni, ke oni ne vendis nek disdonis ilin, ĉar la malabundeco de papero limigis la kvanton de tiuj, kiujn oni povis eldoni. Kaj por ke ĉiuj povu legi ilin, oni ilin fiksis sur tiuj tabuloj. Ĉi tion oni faris en la tuta Rusujo dum la malabundeco de papero ne permesas fari pli grandan eldonon.

—Ĉu oni legas multe?—Ni demandis.

—Sufiĉe —li nin respondis—. Tamen ne tiom, kiom ni volas; ĉar la rusa kamparano, regita de etburĝaj ideoj, montriĝas tre ribelema al la komunismo.

—En Eŭropo —ni diris— oni al ni rakontis, ke ĉi tiun lastan vintron mortis multaj personoj pro malvarmo. Ni nun komprenas, ke tio estas falsaĵo. Pro tiom da arbaroj ĉi tie ne eblas, ke la homoj mortas pro malvarmo.

—Ĉi tie mortis neniu pro malvarmo, sed en Moskvo kaj Petrogrado, jes. Ni suferis multegan malvarmon. Rigardu kiel mi ankoraŭ havas la fingrojn. Ĉu vi vidas ĉi tiujn vundojn? —Kaj li al ni montris cikatrojn similajn al tiuj faritaj okaze de brulvundoj—. Estas ulceroj, kiuj fariĝis al mi pro la malvarmo.

—Mi ne komprenas tion—mi kontestis—, ĉar vi disponas multajn rimedojn por hejtado.

—Nu, oni ne povas toleri, ke ĉiu faru tion, kio al li konvenu kaj prenu la brullignon, kiun li volu. Por tio estas la disdonservo, kiu al ĉiu distribuas, kion li bezonas. Kompreneble oni ne povis fari tion ĉi tiun jaron; sed estontece, kiam ĉio estos bone organizita kaj la disdonservo normale funkcios, ĉiuj havos la brullignon, kiun li bezonos. Dume oni devas suferi.

Ĉar ni malproksimiĝis de la stacidomo, decidis reveni sur niaj paŝoj.

Kiam ni alvenis en la stacidomo, la trajno estis jam preskaŭ konsistigita; nur mankis kunigi al ĝi unu aŭ du vagonojn.

Ĉar mi vidis neniun vagonon por vojaĝantoj, diris al Abramovich:

—Ni nun vojaĝos kunpremataj en la vagono.

—Kial?

—Se mi ne kalkulas malbone, ni estas ĉirkaŭ kvindek.

—En la vagono per kiu ni veturas, veturos neniu plia —li respondis min.

—Tiam, per kiu veturos la aliaj se ne estas pli da vagonoj da vojaĝantoj ol kiu veturigis nin?

—Ĉiuj tiuj homoj veturos per vagono da varoj.

—Kaj kial ne en ĉi tiu? —mi respondis lin, aludante la vagono-liton.

—Ĉar ili difektus kaj malpurigus ĝin.

Tiam mi vidis, ke la tuta grupo, kiel grego da ŝafoj, kiu ĵetis sin en la ŝafejon, iris al unu el la kovritaj vagonoj da varoj, baraktante por ĉiuj samtempe envagoniĝi.

Virinoj, infanoj, maljunuloj, ĉiuj envagoniĝis kaj lokis sin, kiel povis. Sidantaj sur la planko aŭ sur la pakaĵoj, kiujn ili portis, malorde kunigitaj, amasigitaj, ili ŝajnis kontentaj. Iuj, laŭ mi eksciis, atendis de la antaŭa nokto.

La stacidomestro, kiu alproksimiĝis al ni dum ni observis tiun kadron, tre afable diris al ni, ke la trajno tuj foriros, ke ni jam povis envagoniĝi.

Tiel ni faris tion kaj kiam mi jam sidiĝis sur la komforta kaj mola sidejo, la imago al mi redonis la spektaklon, kiun mi ĵus vidis.

Ni prenis preskaŭ unu tagon por alveni en Petrogrado.

La distancon, en normala tempo, trairis la trajno en la daŭro de horoj; sed tiam ne eblis tiom da rapideco.

Aliflanke tio estis utila al ni por ke ni povu konstati la difektojn, kiujn la enlanda milito kaŭzis.

De Narva deiris Judeniĉ kun lia blanka armeo por konkeri Petrogradon kaj disfali la komunistojn.

Dum lia marŝo ĉio estis detruita. De la fenestreto de la vagono ni povis observi la truojn faritajn de la eksplodintaj grenadoj. Tute frakasitaj arboj, disfalintaj kabanoj, neveturebla vojoj detruitaj de la grenadoj. Alveninte proksime al Petrogrado ni povis vidi la ŝirmajn fosaĵojn, kiujn la revoluciuloj konstruis por defendi la urbon, ĉar la ruĝa Armeo sola estintus nekapabla defendi ĝin, ĉar ĝi estis malforta por haltigi la progreson de Judeniĉ. Veras, ke la Armeo tiam estis organiziĝanta.

La angoro kaj la deziro alveni en Petrogrado forte kontrastis kun la malrapideco de la trajno. Jam en normala tempo, antaŭ la milito, maloftaj estis la trajnoj en Rusujo, kiuj veturis pli ol 40 kilometrojn hore. Se oni esceptas la grandajn eksprestrajnojn Berlino-Varsovio-Moskvo-Petrogrado, neniu superis tiun rapidecon kaj multaj ne ĝin atingis. Pro la stato de la reloj post tri jaroj de milito kaj preskaŭ kvar de revolucio, la tre malbonaj kondiĉoj de la materialo kaj per trajno da varoj, oni komprenos, ke ni tre malrapide veturis.

La haltoj en la stacidomoj iĝis senfinaj. Kaj la spektaklo, kiun ni vidis en Yamburgo, senĉese repetiĝis. Kiam ne sufiĉis vagono da brutaro por enteni la vojaĝantojn, oni al ili permesis okupi alian, kio ne fariĝis sen ia malfacilo, ĉar oni devis konsulti la eksterordinaran Komisionon, kiu veturis per la sama trajno.

Kiel la kvanto da vojaĝantoj pliiĝis kaj la diskuto por loki ilin pliiĝis ankoraŭ pli ol la vojaĝantoj, ĉio kontribuis plilongigi nian restadon en ĉiu stacidomo.

Veras, ke la tri portretojn, tiujn de Lenino, Markso kaj Trockij, kiujn ni vidis lokitaj sur la lintelo de la stacidomo de Yamburgo, ni senescepte vidis en ĉiuj aliaj stacidomoj. La tri portretojn kaj la ruĝajn flagojn.

Nekapablaj fari ion niaflanke por rapidigi la iradon de la trajno per kiu ni veturis, ni pacience rezignaciis atendi kaj transdonis nin en brakojn de la fatalo.

La tutan ceteron de la tago, la nokton kaj parton de la sekva mateno ĝis la alveno al Petrogrado, ni pasigis farante konjektojn kaj kalkulojn pri tio, kion ni vidis.

De la naŭa matene, kiam ni alvenis en la stacidomo de Petrogrado, ĝis la dekdua, kiam aŭto de la Tria Internacio venis por veturigi nin, ni devis resti en la vagono. La spektaklo, kiun ni vidis dum tiuj tri horoj, al ni donis la impreson pri kiom la rusan popolon suferigis la blokado, pri la ofero, kiun ĝi altrudis al si por la revolucio kaj pri la stoikeco per kiu ĝi eltenis ĉion.

Pli ol duona dekduo da trajnoj alvenis dum tiu intertempo; trajnoj en kiuj oni apenaŭ vidis solan vagonon por vojaĝantoj. Ĉiuj estis vagonoj de tiuj, kiujn oni kutime destinas por la brutaro.

El ĉi tiuj vagonoj, apenaŭ haltis la trajno, superfluis grandega ĉiuaĝa homamaso, spegulante sur iliaj vizaĝoj la grandegan martirecon, kiun ili eltenis. Preskaŭ ĉiuj venis ŝarĝitaj per pli aŭ malpli spacokupaj pakaĵoj, en kiuj ili portis la provizojn.

Estis loĝantoj de Petrogrado, kiuj disetendiĝis tra la kamparo serĉante porvivaĵojn. Ili alvenis al la plej apartaj kampodomoj aĉetante tion nepran por la vivtenado kaj, kion

akiris kontraŭ vesto, ŝuoj aŭ mebloj. La monon ili malakceptis.

Multaj el ĉi tiuj personoj, kiuj tiel trairis la provincon de Petrogrado serĉante nutraĵojn, poste, en la ĉefurbo, spekulaciis per ili. Ili vendis aŭ interŝanĝis ilin; kaj ĉi tio al ili sufiĉis por pluvivi. La spekulacio ĉi-aspekte atingis grandegajn kvantojn. Kaj ju pli subpremajn disponojn oni faris kontraŭ ĝi, des malpli ili servis, aparte por plimalbonigi la situacion. Ju pli da danĝeroj riskis la spekulaciisto, des pli li pagigis la komercaĵojn, kiujn li sukcesis enkonduki en la urbon.

Multe altiris la atenton la malsamdevenaj kaj strangegaj vestmanieroj. Estis kiel grandega bazaro en kiu amasiĝis vestaĵoj de ĉiuj klasoj kaj koloroj, uzitaj, duonuzitaj kaj novaj.

Ne maloftis vidi junulinon vestitan per ĉapeto de nova lano, aŭ preskaŭ nova, bluzo el silko tre uzita kaj jupo el pli ordinara kruda ŝtofo kaj eĉ kun flikaĵoj el alia malsama teksaĵo.

Oni vidis aliajn virinojn kun altaj ŝuoj, preskaŭ novaj kaj kun ŝtrumpetoj anstataŭ ŝtrumpoj. Ankaŭ ne maloftis vidi virinon vestitan per virjako kaj ŝuoj sen ŝtrumpoj kaj ŝtrumpetoj.

La plimulto havis la hararon tre mallonga. Ni poste demandis, dum nia estado en Moskvo, la kialon de ĉi tiu modo kaj oni diris al ni, ke la bezono devigis adopti ĝin.

Mankis kombiloj, harpingloj, speguloj, sapoj, ĉio nemalhavebla por la plej elementa tualeto de la virino. Tial multaj devis oferi siajn harplektojn.

Per tiu unua kontakto, kiun ni havis kun la revolucia realo, sen prismoj, kiuj ĝin mildigis, kaj vualoj, kiuj ĝin kovris, ni ekduonvidis la rusan tragedion.

Kio pli nin impresis estis la seriozeco, la malgajo spegulataj de ĉiuj vizaĝoj.

Nek rideto, nek fulmo de gajeco, nek la plej neperceptebla elmontro de ĝojeco. Nenio. Grimaco de malgajo, de profunda malgajo, tio sola, kion ni povis vidi. Kaj nepenetreblan silenton. Ŝajnis, ke tiuj buŝoj neniam parolintus nek ridintus.

Ni vidis la doloron kaj volis scii la kialon, kiu ĝin kaŭzis; sed ni troviĝis antaŭ tio nekonata, kaj tio nekonata neniam lasas penetri siajn misterojn ĝis la racio penetris en ĝiajn sanktejojn.

Iu nin vokas. Estas la kamarado komisiita de la estona diplomatia valizo, kiu nin avizas pri la alveno de la aŭto, kiu nin veturigos al la "Internacia Hotelo", luksa kaj alloga loĝejo por la turistoj antaŭ 1914, superita jam de "Astoria", konstruita je kelkaj paŝoj de distanco kaj, kiu post la revolucio iĝis la loĝejo de ĉiuj eksterlandanoj enirantaj en Rusujon, kvankam prefere por ni, kiuj plenumas oficialan komision.

La stacidomo, kie ni haltis, lokiĝas fine de la fama avenuo Nevsky.

La stacidomo de la Avenuo Nevsky estis unu el la plej vizitaditaj kaj la ĉefa kaj plej bone aranĝita, antaŭ la milito. De tie deiras ĉiuj trajnoj, kiuj iras internen de Rusujo kaj kien alvenadis en Petrogrado la eksprestrajnoj de lukso de la linio Varsovio-Berlino-Parizo. Tiutempe ni vidis ĝin laŭ bedaŭrinda stato.

La pordoj sen vitroj, multaj rompitaj kaj preskaŭ falintaj, ĉar eĉ al ili mankas la ĉarniroj; la planko plena de kavoj, kun la pavimo el asfalto preskaŭ levita; pontetoj, kiuj devis servi por enhavi kaj gvidi la amasojn de vojaĝantoj al ĉiu el la kajoj, estas rompitaj kaj renversitaj la muroj; la

planko kaj la pordoj de la vestiblo, kiu donas aliron al granda placo, estas kovritaj de malpureco kaj neglektado, kiuj kaŭzas doloron kaj malĝojon; kaj kontraste kun tiu bildo, kiel enkadrigitaj en ĝi, ĉiuj soldatoj kaj dungitoj de la stacidomo, malpuraj, rompitaj, ĉifonaj, cirkulas de flanko al alia apenaŭ pronocante vorton kun mieno de profunda malvigliĝo.

Ni eliras por enaŭtiĝi kaj, kiel la publiko scias, ke estas aŭto serve de la Tria Internacio, la senlabora kaj malsata homamaso, kiu vagadas ĉirkaŭ la stacidomo kaj la placo, alproksimiĝas kaj faras rondon. Sed nek unu vorto, nek unu gesto. Ili similas statuojn aŭ estaĵojn, kiuj perdintus la paroluzon. Estis por la loĝantoj de Petrogrado spektaklo, kiun ili de longe ne povis spekti: ĉeesti en la alveno de eksterlandanoj.

Post nia sidiĝo, la aŭto rapide veturis tra la Avenuo Nevsky, sed antaŭ ol alveni en la stratfino turnis maldekstren kaj, trairinte plurajn stratojn, haltis antaŭ la pordo de la hotelo.

En la vestiblo gardostaris du virinoj kun fusilo ŝultre, al kiuj oni devis prezenti ordonon, kiun portis sekretario de la Tria Internacio nin akompananta.

Oni kondukis nin al la unua etaĝo kaj prezentis la saman ordonon al la majoro de la hotelo kaj, avizita la komisiito de la servo, post longa atendo, oni al ni indikis la ĉambrojn, kiujn ni devis okupi.

Lavinte nin kaj elpakinte la kostumojn, ni atendis la alvenon de altranga funkciulo de la Tria Internacio, kiu devis revizii niajn rajtigilojn, kiam aperis unu el la virinoj de la hotelo serĉante la kamaradon Pestaña.

Oni komprenos mian konfuzon kaj mirigon, kiam mi aŭskultis la servistinon de la hotelo, ke persono de Petrogrado deziris intervidiĝi kun mi.

—Diru al li, ke post minutoj mi estos je lia dispono.

Tia estis mia senpacienco por scii, kiu povus esti la persono deziranta vidi min, ke mi min ĵetis tra koridoroj kaj ŝtuparoj al la supera etaĝo.

Mi frapis sur la pordo de la ĉambro, kiun oni al mi indikis kaj, malfermita ĝi, mi renkontis fronte al fronte Víctor-on Serge (Kibalchiche), pri kiu de post lia malapero de Barcelono mi resciis nenion. Mi havis nenian suspekton pri tio, ke li estis en Rusujo.

Ni salutis nin per forta kaj frata manpremo kaj, en la hispana, kiun li malfacile parolis, li al mi petis novaĵojn pri ĉiuj anarkiistaj kamaradoj de Barcelono, la organizo, la ĵurnalo "*Tierra y Libertad*", en kiu tiel belegajn artikolojn li publikigis kaj serio da aferoj, pri kiuj li ne povis scii pro la blokado.

Mi rapide klarigis al li ĉion kaj miavice mi lin demandis pri lia vivo kaj, kiu estis lia opinio pri la revolucio.

—Venu ĉi-nokte —li al mi diris— en la hotelo "*Astoria*"-on. Petu pri la numero de mia ĉambro, kiun mi nun notos al vi, kaj ni longe babilos pri ĉio. Krome vi povos vidi Berkman-on kaj Emma-on Goldman, kiuj okupas apudan ĉambron kaj, kiujn vi havos okazon persone koni. La konversacio sendube estos interesa por vi kaj por ni.

—Kaj kiel vi sciis mian alvenon ?—mi demandis lin.

—Mi okupas altrangan postenon en la Tria Internacio. Pro mia posteno mi tuj ekscias tiujn, kiuj venas de Eŭropo kaj vidante vian nomon, mi rapidis saluti vin.

Kiam akompanante Kibalchiche-on ni malsupreniris al la unua etaĝo, jam nin atendis la kamarado Tom Rech, delegito de la usonaj komunistoj en la Tria Internacio de post la unua Kongreso okazinta la antaŭan jaron, al kiu ni transdonis niajn ordonojn kaj kiu al ni donis instrukciojn.

—Morgaŭ —li al ni diris— vi foriros al Moskvo je la dua posttagmeze. Komenciĝos la kunsidoj de la Plenuma Komitato de la Tria Internacio por doni la respondon al Cachin kaj Frossard pri ĉu oni devas aŭ ne akcepti la francan Socialistan Partion en la Tria Internacio. Vi rajtos partopreni en la diskutoj. Nun vi povas manĝi, ĉar oni jam donis la ordonon kaj vi poste povos viziti iun sovetian institucion.

Mi devas averti, ke la vojaĝon de Berlino al Petrogrado kaj poste ĝis Moskvo ni faris akompanita de Rosmer, delegito de la Komitato de la Tria Internacio de Parizo, de ties parulino kaj de Abramovich, jam citita, kvankam ĉi tiu en Petrogrado disiĝis de ni kaj kuniĝis al ni Murphi kaj iu alia.

Ni rapide manĝis, ĉar ni brulis pro deziroj trairi la ĉefurbon fonditan de Petro la Granda kaj povi taksi de apude la detruojn de la milito, de la revolucio kaj, ĉefe, miksi nin kun la popolo, do neeblis paroli, ĉar neniu el ni sciis la rusan.

Unue ni vizitis la Katedralon de Sankta Isaako, kiu ĝuste estas lokita fronte al la Hotelo Internacional. Ties grandaj pordoj estis tute malfermitaj.

Interne estis kompleta skafaldo, muntita por realigi rekonstrulaborojn, sed oni konstatis, ke ili estis antaŭ longe paralizitaj. La militdeklaro interrompis, kiel multajn aliajn, tiujn laborojn.

Interne de la baziliko kaj ĉirkaŭ ortodoksa pastro kaj altaro plena de ikonoj, kunvenis ĉirkaŭ tricent personoj, la

plimulto, virinoj. Ni ankaŭ rimarkis la ĉeeston de kelkaj soldatoj de la ruĝa armeo.

La ortodoksa pastro ilin alparolis per profeta kaj kompatinda tono; lia palorado, en la rusa, estis ekscesa kaj laŭtege esprimata. Li ŝajnis riproĉi ion al siaj afliktoplenaj aŭskultantoj.

Ni eliris, admirinte la grandiozecon de la konstruaĵo. Ni iris al la rivero Neva, kiu, kiel sciate, dividas Petrogradon kaj kunigas ĝin kun la militŝipa haveno de Kronŝtadt.

Ni alvenis ĝis la ponto Trockij, kiu staras inter la Palaco de Vintro, kutima restadejo de la Caro en Petrogrado kaj la Admiralitato.

La panoramo estis alloga. Dekstre la Palaco de Vintro, kiun la bolŝevikoj volis iĝi Muzeo kaj tiam fermita; maldekstre la Admiralitato. La ponto Trockij antaŭe kaj fronte al, sed trans Neva, la Borso, ankaŭ fermita. Iom pli for minaca kaj malluma pro la tragedioj, kiujn ĝi elvokis, la fama malliberejo-fortikaĵon de Petro kaj Paŭlo.

Ni apoge kliniĝis sur la ponto, elkliniĝis super la rivero sen intenco transpasi ĝin. Ni estis vizitontaj la Palacon de la Laboro, pompa titolo, kiun oni donis al la ejo, kie registris sin la laboristoj.

Ni vizitis la plurajn cambrojn de la Palaco de la Laboro, kies organizo ankoraŭ ne estis tute finita.

La malfacilaĵoj, kiuj ĉiutage al ili intermetis sin por la provizo de materialoj kaj la malrapideco plenumi la formalaĵojn pro la burokrataro, kaŭzis, ke la tuta organizo ne estis finita.

Ni ne bezonas ripeti, ke en ĉiuj oficialaj ĉambroj kaj konstruaĵoj de la regno, kiuj estis multnombraj, la bustoj de Karolo Markso ofte vidiĝis per fetiĉa abundo. Oni ne eniris

en ĉambron aŭ oficejon, nek pasis antaŭ konstruaĵo de la regno sen tio, ke la busto de la fondinto de la historia materiismo ne faris la silentajn honorojn de la akcepto.

Tamen oni povas diri, ke estis nenio la tiel abunde distribuitaj bustoj se ni komparas ilin kun la kvanto da portretoj de Markso mem, Lenino, Trockij kaj Zinovjev, kiujn oni ĉie vidis.

La lokado estis po tri por grupo, kaj rimarkiĝis, ke du el ili, tiu de Markso kaj tiu de Lenino, preskaŭ neniam mankis kaj, ĉiuokaze, se mankis unu el la du, estis tiu de Markso. Por tiu de Lenino ni trovis neniun escepton. Kiuj ofte variis, estis tiuj de Trockij kaj Zinovjev. Laŭ la influo, kiun ĝuis ĉiu el ili en la organizo aŭ sekcio menciita, aperis la portreto de la preferato.

Pri ruĝaj flagoj ni ne parolu. Estis miloj. Interne kaj ekstere, en ĉiuj anguloj, oni ne vidis alian aĵon ol ruĝajn flagojn. Dum la muroj estis tegitaj de ruĝa tolo la rusoj promenis sur la stratoj duonnudaj.

Plejparte vizitita la Palaco de la Laboro, ni iris al la tiama Placo de Ourizstky, antaŭe de Vintro, al kiu frontas la ĉefa pordo de la tiel nomita Palaco. Estas cirkla placo de ne malgranda amplekso, en kies enirejo, de la flanko de la Admiralitato, okazis la famaj okazaĵoj de 1905. Tie estis, kien Gapon, la provokista agento pagita de la polico, kondukis la laboristajn amasojn. De la Admiralitato kaj de la Palaco de Vintro, oni senpune mitralis la sendefendan homamason, kiu nur petis panon al la paĉjo de ĉiuj rusoj.

Ni sencele promenis sur pluraj stratoj por ekhavi ideon pri la loĝloko kaj la difektoj kaj sekva malutilo, kiujn la milito kaj la revolucio kaŭzis.

La spektaklo ne povis esti pli bedaŭrinda.

Tie, kie staris elegantaj kaj grandiozaj komercejoj, kafejoj aŭ restoracioj, restis nenio. Ĉio estis fermita kaj sigelita de la Sovetoj de la urbo. La internaĵojn oni vidis de la strato, tra brecoj, sengarnigitaj kaj deŝiritaj fenestroj, malpuraj kaj polvokovritaj pordoj. La bretaroj kaj bretoj de kelkaj vendejoj minacis proksiman disfalon; la vendotabloj kaj uzaĵoj, kovritaj de densa tavolo el malpureco, estis tute neuzeblaj.

Kaj tiuj malĝojaj restaĵoj, kiuj al nia konsidero prezentiĝis, estis ĉio, kio restis de la pompo kaj preskaŭ azia lukso amasigita de la brutala kaj kruela nobelaro de cara Rusujo!

La stratoj prezentis la saman bedaŭrindan aspekton. Sur kelkaj neeblis la trafiko.

Per la tramoj estis malfacile veturi. La manko de materialo devigis malpliigi la servon. Aliflanke, la transporto estis senpaga, aŭ preskaŭ senpaga, kaj ili ĉiam veturis plenplenaj. Pro ĉi tiu amasigo de pasaĝeroj, la komikaj kaj amuzaj okazaĵoj sinsekvis sin, kiel mi rememoras atesti en Madrido dum la bonaj tempoj de Romanones[5].

La ĝenerala aspekto de la homoj ni jam diris, kiu estis. Tamen eblas fari escepton. Tiu de la maristoj.

La maristoj estis la aristokrataro de la mono kaj honoroj. Al ili ŝuldas la bolŝevikoj sian altigon en la Potencon, ĉar tiuj de Kronŝtadt estis, kiuj komencis kaj preskaŭ realigis la ŝtatrenverson, kiu forpelis Kerensky-on kaj detenis la atakagon de Brousiloff, kiam li de la militfronto direktis sin al Petrogrado por batali la bolŝevikojn. La maristoj de Kronŝtadt kaj Petrogrado estis la forto sur kiu

5 NeT. Álvaro Figueroa y Torres Mendieta, grafo de Romanones (1863-1950). Hispana politikisto. Prezidanto de la Senato kaj de la Kongreso de Deputitoj. Kelkfoje ministro kaj trifoje prezidanto de la registaro dum la reĝado de Alfonso la dektria.

apogis sin la bolŝevikoj kaj, kiel justan kompenson, ili ĝuis ĉiujn privilegiojn, kiujn la Sovetia Respubliko povis koncedi al siaj meritoplenaj defendantoj.

Jam malfrue, post la naŭa nokte, elĉerpitaj kaj lacegaj pro tiom da promenado, ni revenis al la hotelo. Ni rimarkis la horon, kiu estis, danke al nia granda laco, ĉar malgraŭ la malfrua horo estis klara tago, blanka nokto kaj ne estis la plej malgranda signo pri tio, ke mallumiĝos. Ĉi tiu fenomeno, jam konita de ni, ĉar de nia eniro en la golfo de Finnlando ni observadis ĝin, sed al kiu ni ne estis kutimiĝintaj, al ni perdigis la koncepton pri la temppaso.

Post la vespermanĝo, kvankam ankoraŭ estis taglume, ni translokiĝis al la hotelo "Astoria", kie nin atendis Kibalchiche kaj ceteraj amikoj.

Ni eniris en la oficejon de la Gardistaro kaj petis, ke oni al ni permesu eniri, ĉar ni deziris paroli kun Kibalchiche. Post la konfirmo de nia identeco oni al ni rajtigas la eniron.

Kibalchiche, kiel Berkman kaj Emma Goldman, okupis ĉambrojn de la superaj etaĝoj – kvara aŭ kvina— kaj, kiel la liftoj ne funkciis, ni devis supreniri per la ŝtuparo.

Ni havis iun malfacilaĵon por trovi la ĉambron, ĉar en la grandega labirinto de koridoroj kaj ŝtuparoj ne sciis facile orienti nin.

Post la alveno al ni komunikis Kibalchiche, ke Berkman kaj Emma ne ĉeestos, ke ili foriris, li ne sciis se hodiaŭ aŭ hieraŭ, pro oficiala komisio ekster Petrogradon kaj sekve ni ne povos paroli kun ili. Ni bedaŭris ĉi tiun foreston kaj ektraktis la kialon de la vizito.

Ni volis donitaĵojn; sed fidindajn donitaĵojn, donitaĵoj, kiuj ne havus tiun dubindan kaj ĉiam trompan karakteron de la oficialaj donitaĵoj. Ĉu mi devas diri al vi, ke al Kibalchiche

ŝuldas la plej bonajn informojn kaj plej malmolajn kritikojn kontraŭ la centralizismo kaj la diktatorado de la proletaro?

Kiam mi rememoras la vortojn kaj konsilojn de Kibalchiche por ne min lasi trompi per la troigitaj kaj teatraj informoj, kiujn al ni povus havigi la oficialaj organoj, kaj la informojn, kiujn personoj fremdaj al la bolŝevikismo al mi havigis danke al li, min ridigas tiu grandega batalo, kiun li hodiaŭ subtenas por aligi la anarkiistojn kaj sindikatistojn al la ĉaro kaj akompanado de la venkinto!

Ne gvidas mian plumon la malamo nek la sektismo: sed kiam mi vidas la rolon, kiun hodiaŭ plenumas la unua individuo, kiu min instruis pri la artifikoj kaj trompaĵoj de la bolŝevikoj por kredigi, ke la faritaĵon ili ne povis alimaniere fari kaj, ke oni devas imiti ilin, se ne volas fali en la revolucian fiaskon, mi vere opinias, ke ĉu Kibalchiche ne estas nun sincera aŭ li perdis la kritikan kaj raciigan spiriton, kiu lin karakterizis.

Imagu —li al mi diris— ĝis kiuj ekstremoj povas konduki nin, kaj ni devas atenti kien jam nin kondukis, la centralizismo. Mi estas unu el la altrangaj oficistoj de la Registaro. Vi jam tion vidas; mi loĝas en privilegia loko. Mi havas porciumon de intelektulo kaj enspezas unu el la plej altaj salajroj. Krome mia situacio de prefero, ĉar mia laboro estas nepra por la revolucio kaj la partio, faras, ke ni estas respektataj kaj havas serion de privilegioj, kiujn ne havas la sovetiaj dungitoj de la sama kategorio plenumantaj servon en aliaj sekcioj. Tiel do; atentu pri tio, kion mi al vi tuj diros.

Kiam mi alvenis ĉi tien el Francujo, piedvestis paron da bonstataj botoj. Per iom da zorgo kaj kelkaj riparoj ili daŭris ĝis la pasinta vintro. Sed venis tago, kiam jam ne eblis enmeti en ilin la piedojn. Tute neeble. Antaŭ tri monatoj, komence de vintro, mi petis al Zinovjev botparojn; li promesis al mi, ke ili al mi estus transdonitaj; kaj li faris al

mi la ateston por ke la magazeno ilin liveru. Pasis tri monatoj kaj mi ne povis akiri la botojn. Laca kaj ĉagrenita de tiom da ĝeno, mi pensis: "Mi jam faras ne unu paŝon plian. La tago kiam mi ne havos ŝuojn, mi restos hejme aŭ senŝue iros al la oficejo".

Kelkajn tagojn mi atendis. Sed la malvarmo kaj la pluvo premis min kaj mi ege suferis pro la manko de ŝuoj.

Mi duafoje parolis kun Zinovjev kaj al li elmontris la bedaŭrindan staton en kiu mi estis.

Li faris al mi novan ateston kaj krome definitivan ordonon por ke oni al mi transdonu la botojn.

Mi devis trapasi sep malsamajn oficejojn. En ĉiu el ili, oni devis fari formalaĵojn kaj registri la donotajn botojn. Mi bezonis tri tagojn sukcesi, ke oni al mi malfermis la magazenon, kie estis la ŝuaro. Kaj imagu mian mirigon, amiko Ángel, kiam mi vidas, ke ne estis pli ol dudek kvin paroj da botoj deponitaj! Kaj ne nur kaŭzas mirigon, ke ne estis pli ol dudek kvin paroj da botoj deponitaj, sed ke por distribui ilin mi bezonis trapasi sep malsamajn oficejojn servitajn de pli ol kvindek oficistoj. La burokratismo, kiun la centralizismo devigis krei, paralizas kaj detruas ĉiun agon de plibonigo kaj renovigo.

Ni ĝeneraligis la babiladon pri multaj aliaj aferoj; pri iuj mi ne parolos nun, ĉar ili havas taŭgan lokon en alia parto; sed mi ja rakontos tiujn, kiuj konvenas.

Ni absorbiĝis en interesa konversacio, analizante la agadon de la anarkiistoj en la revolucio kaj mi eksciis faktojn, kiujn mi klopodos resumi kiel eble plej konkrete.

—La verko de la anarkiistoj en la revolucio—komencis dirante Kibalchiche— estas ege interesa kaj meritas, ke la anarkiistoj de Eŭropo kaj la tuta mondo al ĝi donu la plej grandan atenton. Atentu se ili meritas tion, ke ili povis esti

decida faktoro por la disvolviĝo de la revolucio, sed restis (atentu, ke mi diras ili restis, kaj ne ni restis, ĉar mi apartenas al la Partio kaj oficiale estas komunista, tial ne volas konsideri min antaŭ vi, kiel anarkiiston puran de konscienco) limigitaj rondiri ĉirkaŭ la bolŝevika Povo kaj akcepti la diktatoradon de la proletaro aŭ esti sendataj al la malliberejo. Vi jam konstatas, ke la diferenco estas konsiderinda.

Vi bone scias ke, en Rusujo, antaŭ la revolucio, en la plimulto de la anarkiistaj grupoj, pro la mizero de la lando, kiu ne permesis destini monrimedojn por la propagando, ĝeneraliĝis la lukto per arm-en-mana rabo de bankoj aŭ personoj portantaj grandajn monkvantojn, parto de kiuj oni poste destinis al la propagando.

Ĉi tiu sistemo, kiu havas la avantaĝon ne devigi realigi tre konsiderindajn ekonomiajn penadojn favore de la ideoj, kaŭzas tute negativajn kaj malutilajn rezultojn por la moralo de la individuoj. Ja veras, ke la funkcio kreas la organon, kaj ĉi-okaze tio tute konfirmas sin, la funkcio ataki kaj prirabi estigis, en ĉiuj individuoj ĝin realigantaj, kutimojn de persista ekspropriganto. Kaj se la risko, kiun ĉiumomente havas la individuo dediĉata al tiaj taskoj, disvolvigas en li la kuraĝon kaj levas ĝin al la maksimuma potenco, ankaŭ veras, ke ĝi detruas en li ĉiun senton de organizo kaj interligo por ajna verko, kiu ne estas kiu iom post iom formis lian temperamenton.

Kaj tiel oni vidis en Rusujo, dum la unuaj momentoj de la Revolucio, ke la anarkiistaj grupoj estis la unuaj lukti kaj alfronti la malamikon; ke poste, en la ŝtatrenverso, kiu eksigis Kerensky-on kaj donis la Povon al Lenino, el ili eliris la plimulto de la iniciatoj, kaj ĉiam ili luktis en la plej danĝeraj lokoj. Dum la defendo de Petrogrado mem, kiam Judeniĉ alvenis kun siajn armeojn ĉe la antaŭurboj de la

urbo, kies ŝirmajn fosaĵojn vi mem vidis de la vagono, ili estis en la unuaj frontlinioj kaj okupis la lokojn de plej danĝero kaj devontigo. Ili trenis la popolon en la ŝirmajn fosaĵojn kaj en ili estis ĝis la lasta momento, dum Lenino, Trockij, Zinovjev kaj ceteraj prudente foriris al Moskvo. Sed post ĉi tio, post la heroa defendo de la ŝirmaj fosaĵoj kaj kuraĝe luktadi, oni jam nenie ilin vidis. Ili enfermis sin en siaj domoj aŭ kluboj kaj foje kaj refoje paroladis, ne energie penetrante en la vulgarecon de realo, kiu tiam estis multe pli supera ol ĉiu abstrakta koncepto de la ideoj.

Estis iuj voĉoj de kolegoj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ daŭre ripetas, kiuj klopodis al ili komprenigi la danĝeron, kiu minacis la revolucion; sed la plimulto daŭrigis sian vojon kaj ne volis aŭ ne sciis aŭskulti ilin.

Sed eĉ fari paroladojn kaj eldiri sinsekvajn sofismojn, plenajn de ornamitaj kaj enigmaj frazoj, al ili ne farintus la malutilon, kiu al ili faris agojn, kiujn fundamente la anarkiistoj devas malakcepti se oni ilin uzas, kiel sistemon.

Mi antaŭe diris al vi, ke la eksproprigoj individuaj aŭ de grupo senĉese efektiviĝis inter la rusaj anarkiistoj, konsilitaj kaj propaganditaj, kiel neceso. Tiel do; tiu praktiko kaŭzis abomenindajn efikojn sur la moralo kaj la kutimoj.

Dum la unua revolucio ĉefe pro la malmulta rezisto, kiun la burĝaro mem kontraŭstaris al la disfalo de la cara reĝimo, la kolektivaj kaj tumultaj eksproprigoj ne havis grandan amplekson, tamen estis tre multnombraj dum la dua periodo.

Apenaŭ ĵetita la krio de “la tuta Povo al la Sovetoj”, pli ĝuste, apenaŭ efektivigita, ĉar ĝi estis ĵetita la unuan tagon de la revolucio de marto, la kolektivaj kaj tumultaj eksproprigoj estis tre multnombraj kaj oni tiam vidis ĉiujn tiujn anarkiistojn, kiuj efektivigadis la eksproprigon, kiel

sistemon de propagando, eniri en la bankojn, dediĉi sin al la prirabo, forpreni milionojn da rubloj aŭ da juveloj kaj akcioj, iri en la domojn, kiuj al ili ŝajnis pli luksaj kaj komfortaj, forpeli ties loĝantojn surstraten kaj komforte loĝi en ili, ne volante zorgi pri io plia.

La maliculo, laŭ la senco, kiun la kapitalismaj reĝimoj kaj la literaturo donas al ĉi tiu vorto, vekiĝis en tiuj individuoj, eklipsante kaj detruante la idealiston, la viron de konscienco kaj de anarkiisma etiko.

Ĉiuj admonoj faritaj al ili por ke ili ne daŭrigu sian ruinigan agadon, estis ignoritaj; ĉiuj avertoj, rekomendoj kaj alvokoj al ili faritaj de iliaj propraj samideanoj, por ke ili ne detruu per siaj ekzemploj la transforman sencon de la individua propraĵo en kolektiva, kiun la revolucio stampis en ĉio, frakasis sin kontraŭ la kutimo akirita post iuj provoj, la eksproprigo realigita malutile de la kapitalistoj de la carismo.

Sed eĉ ĉi tio ne kaŭzintus kontraŭ ili la kolektivan malinklinon se, pro nekomprenebla paradokso, ili eĉ rifuzis iĝi laboristoj kaj okupi sian postenon en la fabriko kaj la manlaborejo. Nome de la libereco, interpretita laŭ la senco, ke ĉiu farus kion volus, ne estis rimedo prudentigi ilin. La praktiko de la eksproprigo profite de la propagando dum la estinteco ellaboris en ili kontraŭanarkiisman koncepton (oni tiel devas diri ĝin) pri iliaj propraj ideoj.

Tial, kiam la bolŝevikoj ilin admonis por ke ili submetiĝu al iliaj ordonoj, la popolo, kiu ilin vidis ignori la danĝeron kaj kuraĝe lukti kaj poste vidis ilin, kiuj ne volis partopreni en la kolektivaj problemoj por enfermi sin en pozicio pli proksima al la detruita realo ol al la kreado de novaj realoj, ne helpis ilin kaj la bolŝevikoj atingis la venkon.

Se la anarkiismaj grupoj, krom iuj esceptoj, ne estintus trempitaj de tiu degenera sento, kiu havas nenion komunan

kun la anarkiisma filozofio, sed pro nekomprenebla paradokso, tiel tolerata inter la anarkiistoj de preskaŭ ĉiuj landoj, ne dubu kara amiko, la bolŝevikoj ne ilin venkis en Moksvo; plie, ili eĉ ne aŭdacis alfronti ilin. La popolo, kiu ilin bone konis, ĉar ilin vidis heroe lukti kontraŭ la carismo, metintus sin iliaflanke kaj defendintus ilin.

Neniam kiel nun, per la kompara studo de la praktiko kun la ideo, mi konstatas la pravon, kiun havas vi, la hispanaj anarkiistoj, sisteme malakceptante la individuan eksproprigon en viaj grupoj.

Persistu en via konduto kaj ne permesu, ke tiu teorio de la individua eksproprigo, per la preteksto kolekti rimedojn por la propagando, penetri en viajn grupojn... Se iutage ĝi penetras, la malutiloj, kiujn vi ricevos de ĝi, estos nekalkuleblaj.

Tiam Kibalchiche pravis. Ĉu oni povus diri ion similan nun?

Koncerne ĉi tiun aspekton, la rusaj bolŝevikoj havas pli ol sufiĉan pravon antaŭ la lamentoj de la anarkiistoj.

Kaj kiel pruvo de la influo, kiun la anarkiistoj plenumintus pri la posta disvolviĝo de la revolucio, se ne okazintus tio, kion mi al vi ĵus rakontis, vi povas juĝi konsiderante, ke multaj el kiuj estis kaj hodiaŭ ankoraŭ daŭre estas anarkiistoj, sed tiam kaj poste deklaris sin kontraŭ siaj propraj kolegoj, ili kaj ni okupas lokojn kaj postenojn de prefero en la sovetia reĝimo. Ke multfoje gravegaj aferoj estas sub nia arbitro solvi ilin laŭ senco aŭ alia. Pri ĉi tio vi povos konvinkiĝi laŭ vi pasigos tempon inter ni.

La krueleco, kiun al la bolŝevikoj oni atribuis en Eŭropo, ankaŭ estis motivo de nia konversacio.

—Veras —li al mi diris—. Mi ne dubas, ke en tre multaj okazoj ĝi estis nebezona; sed ne ĉiam estis. La eksterordinara Komisiono, tiu tribunalo prezidata de Djerzinsky, la Robespiero de la bolŝevikismo, estas terura afero. Oni arestas, enprizonigas, juĝas kaj mortpafas ne donante al la akuzato tempon por ke li pledu sin; ankaŭ ne li povas ekscii la verajn kialojn, kiuj kaŭzas lian morton. Estas aferoj vere monstraj. Mi al vi rakontos kelkajn.

Arestita inĝeniero kaj akuzita vendi dektri funtojn da sukero kontraŭ 36.000 rubloj, kiuj fakte ne havas, kiel vi scias, sed relativan valoron, li estis prezentita al la eksterordinara Komisiono. La eksterordinara Komisiono lin kondamnis al mortpuno.

La kialo de ĉi tiu kondamno baziĝis sur tio ke, antaŭ la revolucio li apartenis al la menĉevika partio.

Avizitaj de lia edzino iuj amikoj de la inĝeniero, ili venis vidi min kaj ni iniciatis klopodojn en lia favoro. Oni promesis al ni, ke oni lin pardonus, kiam tri tagojn poste ni legas en "*Izvestia*", ke li estis mortpafita tiun matenon. Pri tiaj aferoj mi povus rakonti al vi centojn.

—Kaj pri la spekulacio, kion vi al mi diras?

—Pri tio eĉ ne eblas doni palan bildon de kio okazas. La spekulacio kaj la ŝtelo okazas ĉiun tagon. En la ĉeesto de gardostarantoj oni forprenas kaj prirabas la magazenojn de la regno.

Kiel tipan okazaĵon aŭskultu la jenan:

Mankis butero en Petrogrado. La urba Soveto ne trovis rimedon povi havigi al si eĉ ne unu kilogramon. La malabundo estis tiel granda, ke eĉ la hospitaloj jam malhavis tiun nutraĵon. La spekulaciistoj, timante, ke oni kondamnis ilin al severa puno, ne kuraĝis cirkuligi la stokaĵojn, kiujn ili havis kaŝitaj, nek ke alvenis en

Petrogrado la akaparitaj en provincoj. Sed estis bona momento por akiri grandajn profitojn. Kion fari?

En unu el la kunvenoj de la Soveto, en kiu oni devis trakti ĉi tiun aferon, prezentiĝas civitano kaj diras, ke li povis havigi vagonon da butero kontraŭ 100.000 rubloj (kiun, oni poste sciis, li aĉetis kontraŭ 8.000), sed oni devis doni al li rajtigilon por la transporto, ĉar la vagono de butero estis en provinco.

Akceptas la Soveto la proponon kaj permesas la transporton. Du tagojn poste la vagono da butero alvenis en la ĉefurbo.

Prezentiĝas delegito de la Soveto por kontroli la varon, preni sur sin ĝin kaj efektivigi la pagon.

Post la plenumado de ĉiuj kondiĉoj, oni sigelis la vagonon kaj metis kvar vigladajn gardostarantojn, kiuj anstataŭis sin ĉiun du horojn.

Sekvatage, venas du militistaj kamionoj por ŝarĝi la buteron. Oni demetas la sigelojn, malfermas la pordojn, kaj... en la vagono estis nenio! Ĝi estis tute malplena! Oni ne povis scii kiam nek kiel oni forportis la buteron.

Oni procesis la soldatojn; sed ĉiu kvaropa grupo kulpigis tiun, kiu ĝin anstataŭis aŭ al ĝi antaŭis. La veraĵo estas, ke la buteron oni ne trovis.

Certe vi vidis en la stacidomo, ĉi-matene— li plu al mi diris—multnombrajn homojn kun ĉiaj pakaĵoj; kun boteloj de dek aŭ dek kvin litroj de enhavo, plenaj de lakto, do preskaŭ ĉiuj tiuj manĝaĵoj estas por la spekulacio. Kaj ne kredu, ke kiuj aĉetas nur estas la senposedigitaj burĝoj aŭ laboristoj; aĉetas ĉiuj, eĉ ni, se ne ni mortus pro malsato. La porciumoj, kiujn oni al ni donas, nur estas tre eta procento el tio, kion oni por pluvivi bezonas; la ceteron oni devas serĉi kaj aĉeti inter la spekulaciistoj.

En Moksvo vi vidos scivolaĵojn koncerne ĉi tion. Promenu tra Sujarefka kaj vi vidos.

-Kaj tio, kio estas? —Mi diris al li.

-Estas merkato, kiun la Soveto ne volis malpermesi, ĉar estis la merkato de la malnovaĵoj. Io simila al viaj *Encantes* de Barcelono aŭ *Rastro* de Madrido.

Jam estis malfrue. Ĵus sonis la dua matene. La intereso pri tio, kion oni al ni diris farintus al ni ĉeesti tie ĝis la deirhoro al Moksvo; sed ni ne volis trouzi la bonvolon de la amiko kaj tial ni finis la konversacion.

Ni adiaŭis nin, promesante renkonti nin en Moksvo kaj paroli pri multaj aliaj aferoj.

Ni iris al nia hotelo ravitaj de la beleco de la nokto; sed iom zorgitaj pro tio, kion ni ĵus aŭskultis.

La gardistaro de la hotelo, samkiel tiun matenon, kiam ni alvenis, konsistis el du belegaj amazonoj de blondaj kaj brilaj longaj haroj, al ni kaŭzis certan miron, kiam ni vidis ilin kun ilia responda cigaro en la buŝo.

La iom vira uniformo, la fusilo ŝultre kaj la cigaro buŝe, al ni memorigis tiun alian feminismon, kiu cirkulas tra Hispanujo.

Ili ĝisfunde reviziis la papereton, kiun ni al ili montris kaj per signo ili al ni indikis, ke ni rajtis pasi.

Ni supreniris. La nokta gardisto al ni transdonas la ŝlosilojn de niaj ĉambroj kaj ni eniris por ripozi. La laco de la tago kaj la spertitaj emocioj postulis iom da ripozo, tial ni rapide endormiĝis apenaŭ enlitiĝinte.

2a. Survoje. Du tagojn en Moksvo

Ni vekiĝis iom malfrue. Niaj intencoj ellitiĝi je la sepa horo cele promenadi antaŭ ol foriri al Moksvo malsukcesis.

Ni konis neniun, ni ne sciis paroli la lingvon de la lando, sed al ni interesis kontakti kun la popolo. Kiel? Oni komprenos, ke tio ne estis facila, ĉar tute mankis al ni la plej nepraj rimedoj. Sed la strebo nin impulsanta estis pli potenca aŭ almenaŭ pretendis venki ĉiujn obstaklojn.

Mankaj je la ĉefa veturilo de inteligenteco, la lingvo, ni volis anstataŭigi ĝin kiel eble plej avantaĝe, kaj neniu pli bona rimedo por atingi tion ol cirkuli ĉiudirekten kaj miksi nin kun la popolo. Vidi, senti, ricevi sensaĵojn.

Kiam ni vekiĝis kaj vidis, ke la ĉambro estis plena de lumo, ni rimarkis, ke dormis pli ol tio, kion ni deziris. Kaj efektive tiel estis. La naŭan batis jam la horloĝoj.

Ni ellitiĝis deciditaj utiligi kion ni povis, por ke la kontraŭaĵo estigita de la prokrasto vekiĝi povu esti kompensata de pli granda aktiveco.

Vestitaj, ni malsupreniris por matenmanĝi kaj, kiam ni estis tuj elirontaj al la strato, venas avizo de la Komitato de la Tria Internacio por ke ni atendu ordonon.

Iom ĉagrenitaj, ni rezignacias atendi. Kion alian fari! Povus esti io interesa, kaj tio unua rangu unua. "Ni utiligos la restantan tempon, kiel ni povos", ni diris al ni.

Atendante, ni perdis la tutan matenon. Ĝis la dekdua iu ne venis doni al ni la ordonon, kiu finfine havis neniun gravecon. Ĝi simple diris al ni, ke sekvatage okazos

kunveno de la Plenuma Komitato kaj, ke ni devos ĉeesti en ĝi, kion cetere ni jam sciis.

Ni babilis momenton kun Tom Rech, kiu estis la portanto de la mesaĝo, atendante la tagmanĝon kaj la deiron, ĉar je la dua posttagmeze ni foriros al Moksvo. Ni stulte perdis la matenon.

La tagmanĝo, kiun al ni oni donis en la Internacia Hotelo, samkiel tiu, kiun poste al ni oni donis en la “Dielavoy Dvor” de Moksvo, estis eksterordinarega porciumo. La delegitoj, koncerne ĉi tiun aspekton, kiel ĉiujn aliajn, estis la vera aristokrataro de la lando. La mizero kaj la malsato de la homoj kontrastis kun la traktado, kiun oni al ni donis. Kaj kiel trouzis iuj delegitoj ĉi tiun avantaĝon!

Je la unua oni diris al ni, ke la aŭto nin atendis por kiam ni volos foriri. Por ne troe reteni ĝin, ni elektis rekte iri al la stacidomo, atendante tie la elirhoron de la trajno.

En la stacidomo ni revidis la spektaklon de la antaŭa mateno, kiam ni alvenis en Petrogrado.

Ĉiuj trajnoj, tiel alvenante, kiel forirante, veturis plenplenaj de ĉifonaj kaj mizeraj homoj, kiuj per sakoj, grandaj tukoj, pecoj de tolo, korboj, boteloj kaj aliaj uzaĵoj, venis en Petrogradon aŭ eliris el ĝi, serĉante la nutraĵojn, kiujn en la urbo ili ne povis trovi. La sola diferenco estis ke, la elirantoj ne estis ŝarĝitaj per pakaĵoj tiel grandaj, kiel la enirantoj. La vestoj kaj ŝuaro, kiujn ili uzis en siaj komercaj interkonsentoj kun la kamparanoj, ne havis la volumon de la interŝanĝitaj produktaĵoj kaj tial la pakaĵoj estis pli malgrandaj. Oni al ni indikis la trajnon, kiu nin veturigos al Moksvo kaj ni povis konstati, ke ĉiuj ĝiaj vagonoj estis por vojaĝantoj, en bedaŭrinda stato, veras, sed estis por vojaĝantoj.

La lito-vagono, kiu nin veturigis de Reval, jam estis kroĉita kaj preta.

Ni iomete promenis sur la kajoj, sed la varmego, kiu jam ekpremis nin je tiu horo, envagonigis nin. Konsideru, ke ni antaŭigis je tri horoj la horloĝojn por ŝparo en la lumo kaj ne estis pli ol la dekunua matene, horo de Eŭropo; tial ni diras, ke nin ekpremis la varmego.

La rusa pejzaĝo estis monotona kaj malĝoja vidaĵo. Arbaroj kaj pli da arbaroj; ebenaĵoj kaj pli da ebenaĵoj; ĉiam same. Interspacige iu lago, iu rivereto kaj nenio pli. La abio estas la arbo, kiu multege abundas. Kelkfoje oni trairas fervojajn kilometrojn kaj kilometrojn ne vidante en flanko nek en alia ion pli ol la suproj de la arboj. Oni diris al ni, ke somere la brulegoj tre oftas en tiuj arbaroj trairatas de la trajno. Nutrataj la lokomotivoj per brulligno, kvankam sur la supro de la kameno estas krado el fortaj ferstangoj, kutimas eliri multnombraj fajreroj kaj brulantaj pecoj de brulligno, kiujn la pulsobatoj perforte eltiras el la fajrujo de la maŝino. La varmego kaj la pecoj de brulligno kaj sekaj folioj faras ĉion ceteran. Miloj kaj miloj da arboj brulas ĉi-okaze sen tio, ke oni povas fari ion por eviti ĝin, ĉar oni preskaŭ ĉiam bezonas tranĉi la fajron tre malproksime de la loko, kie ĝi komenciĝis.

Ni ankaŭ vidas tra la fenestretoj de la trajno malĝojajn kaj mizeraj domojn de la rusaj kamparanoj.

La grandaj urboj de Rusujo estas tre malmultaj, se oni konsideras, ke ĝi nombras ĉirkaŭ cent tridek milionojn da loĝantoj.

De pli ol miliono, eble en Rusujo estas ne pli ol du ĉefurboj: Moksvo kaj Petrogrado. De malpli ol miliono kaj pli ol cent mil loĝantoj eble ne estas pli ol kvardek. Kaj de dudek mil loĝantoj ĝis cent mil, ne estas multaj pliaj. La tuta

cetero ĝis la 130 milionoj da loĝantoj konsistas el malgrandaj urboj kaj vilaĝetoj. De la trajno oni senĉese vidas grupigojn de domoj, kiuj konsistigas vilaĝojn aŭ vilaĝetojn.

En ĉiu stacidomo bandoj da infanoj alproksimiĝis al la trajno petante almozon aŭ ofertante al ni varojn; lakton, pomojn kaj aliajn fruktojn, kontraŭ kiuj ili ne volis akcepti monon. Se oni al ili donis rublojn, ili diris, ke ne ilin volis; oni devis doni al ili, kontraŭ tio, kion ili ofertis, tukon, sukeron aŭ salon. Ĉefe salon. La gajeco de tiuj improvizitaj vendistoj, kiam ili ricevis salon kontraŭ sia varo, ne havis limojn. Ni ankaŭ vidis multnombrajn virinojn laborantajn en la riparo de la fervojo. Estis la plimulto. Oni vidis multajn, malkombitajn kaj malpurajn, kiuj estis sur la vagonoj aŭ malŝarĝis la balaston.

En iuj stacidomoj ni povis rimarki la kaŭzon de la malfacilaĵoj en la fervojaj linioj en Rusujo. Sur la seneliraj relvojoj de kelkaj stacidomoj, oni vidis centojn da vagonoj kaj dekduojn da lokomotivoj neutilaj por la servo, kiuj ne povis esti riparitaj kaj devis esti formetitaj. Estas tie, kie oni vidis la kriman kaj malhumanan verkon de la blokado.

Preskaŭ la tuta riparmaterialo de la rusaj fervojoj venis de la eksterlando antaŭ la revolucio. Dekretita la blokado, ne eblis improvizi tiun materialon kaj oni devis malpliigi la servon de fervojaj linioj, ĉar oni ne disponis la necesan materialon.

Ankaŭ ni povis observi la influon de la religiaj ideoj sur la rusa popolo.

En multaj stacidomoj estis altaroj aŭ kapeletoj kun ikonoj kaj la plimulto de la homoj krucosignis sin la ritajn tri fojojn pasante antaŭ la ikono. Ĉi tion ni povis tre ofte vidi

poste en Moksvo kaj interne de Rusujo; sed kiel en Petrogrado ni apenaŭ vidis ĝin, tio multe altiris nian atenton.

Alia eksterordinareco de la rusaj kutimoj estas, ke en ĉiu stacidomo, eĉ en la plej etaj, estas kaldrono de varma, preskaŭ bolanta akvo kiun dungito priatentas per granda zorgo. El ĉi tiuj kaldronoj prenas la vojaĝantoj la akvon por fari sian teon.

Ĉar la centraj provincoj de Rusujo ne estas montoriĉaj, la akvoj ne estas tre trinkeblaj somere, kaj vintre la malvarmo tute ilin frostigas; tial la granda tekonsumo, kiun oni faras. Kaj por ke la vojaĝanto povu komforte prepari ĝin, estas en ĉiu stacidomo la varma akvo, kiun oni laŭvole prenas.

Je duona posttagmezo, al ni avertis la kamarado komisiita de la diplomatia poŝto, kiu estis la sama kun kiu ni venis de Reval, ke Zinovjev volis paroli kun ni.

Ni restis surprizitaj. Ni ignoris, ke Zinovjev vojaĝis en la sama trajno.

Ni ja rimarkis, ke je la fino de la trajno estis aldonita speciala vagono, en kiun neniu eniĝis kaj el kiu neniu eliĝis, krom kvar soldatoj kiuj, kun bajoneto preta, lokiĝis je paŝo de distanco de la kvar eliroj de la vagono, kiam la trajno haltis en ĉiu stacidomo kaj, ke ili permesis alproksimiĝi al neniu. Sed, ni supozis, ke estus la servo de eskorto de la trajno. Ni poste vidis, ke estis la speciala vagono de Zinovjev.

Dezirantaj koni kaj manpremi lin, ni rapide ekmovis nin. Ni tuj translokiĝis al lia vagono kaj restis mirigitaj enirante.

Pli ol vagono de fervojo ĝi ŝajnis luksa saloneto de monhava persono.

Estis tri kupeoj: unu, kiu servis de vestiblo kaj manĝoĉambro, aranĝita per ĉiu lukso, kun sobraj mebloj, sed bonegaj; alia, kiu servis, kiel oficejo, kun sia skribotablo, ŝranko-biblioteko kaj komforta lito; kaj tria, kiu estis la kuirejo.

—Estas unu el la konfiskoj faritaj de la sovetia Registaro —al ni diris Zinovjev vidante, ke ni atente rimarkis ĉi tiujn detalojn—. En Rusujo, dum la carismo, kutimis, ke la grandaj dukoj, princoj kaj grandaj propruloj veturis per vagonoj de sia posedo. Egalajn komfortojn ili ĝuis, kiam faris rivervojaĝojn tra la ŝipireblaj riveroj. Sur Volgo, kiun mi ŝatus, ke vi vizitos, oni nombris je dekduoj la vaporŝipetojn de lukso.

Ĉi tiu vagono estis metita je mia dispono de la Registaro, kiel nuntempa prezidanto de la Tria Internacio kaj membro de la politika Komitato de la Komunista Partio. Ĝi apartenis al Granda Duko, kiu vane depostulis ĝin plurfoje. Nek ĉi tiu, nek iu alia estos redonita. Ili estas posedaĵo de la regno kaj la regno ilin uzas por sia servo.

Kaj li plu parolis, ŝanĝante la temon:

—Mi vokis vin por iomete konversacii kaj por inviti vin vespermanĝi kun mi. Oni jam donis ordonon al la kuiristo por ke li preparu la vespermanĝon por ĉiuj. Unue, oni al ni servos la teon.

Ĉar la interŝanĝon de ideoj, kiun ni havis kun Zinovjev, ni devas vaste trakti aliloke, ni limigos nin tie nur fari mallongan resumon.

Zinovjev al ni petis informojn pri la socia kaj politika movado de la respektivaj landoj tie reprezentitaj de la delegitaroj. Ni eldiris kion ni opiniis ĝusta kaj trafa, kaj li nin alparolis pri Rusujo, pri sia persona entuziasmo por la Revolucio, pri kio la Partio faris por ĝi kaj pri la verko, kiun

oni pretendis realigi. Kaj, fine, li al ni laŭdis la superajn kvalitojn de la "diktatorado de la proletaro" sen kiu la revolucio neeblus en ajna lando.

La komunismo, ĉefe la bolŝevikema, laŭ Zinovjev, estis la magia talismano, la magia rimedo, la universala kuracilo, kiu devas doni al la homo la feliĉon.

Mi kuraĝis kontraŭargumenti al li, ke mi ne komprenis kian komunismon estis tiu starigita en Rusujo, ĉar, laŭ mia opinio, la komunismo nur eblis laŭ la formulo de "al ĉiu laŭ liaj necesoj, kaj de ĉiu laŭ liaj fortoj", kaj krome mi opiniis, ke en komunisma reĝimo, la salajro kaj malpli la salajro kun kategorioj ne konformiĝis kun tio, kion mi nomis komunismo.

—Ke estu tridek kvar kategorioj de salajroj kaj, ke la ŝtatfunkciuloj laboru ses horojn, dum la leĝa labordaŭro de la fabrikoj estas ok, ne ŝajnas al mi praktikoj de komunismo —mi aldonis.

—Mi jam scias, ke vi estas anarkiisto —li diris ridetanta— kaj, ke tial vi estas iom influita de etburĝaj ideoj; sed vi vidos, vi vidos apenaŭ ekkontaktos niajn mediojn, kiel vi identiĝos kun la praktiko de la vera komunismo.

Krome, la praktiko de la komunismo — li plu parolis— ne povas fariĝi laŭ granda skalo. Nur favore de la ŝtato, ne favore de la individuo. La ŝtato konfiskas ĉion, forprenas ĉion kaj disponas ĉion favore de la komunumo, kiu ĉi-okaze estas la tuta lando. La lando, aŭ pli ĝuste, ĉiu individuo devas blinde kaj discipline kunlabori favore de la ŝtato kaj laŭ la formo kaj maniero, kiujn la ŝtato al li ordonas. Kiel ĉiuj profitoj de ĉi tiu kunlaborado turniĝas en profiton de la ŝtato, ĉi tiu poste ilin disdonas laŭ la servo aŭ la graveco de la servo, kiujn ĉiu al ĝi faris. Ĉi tiu estas la vera komunismo kaj ne tiu, kiun diskonigas vi, la anarkiistoj.

—Mi ne komprenas ĝin—mi malkonsentis—. Miaopinie tio enhavas nenion de komunismo. Maksimume estas la kolektivismo, kiun la belga socialisto Vanderbelde defendas en unu el siaj verkoj. Ĉi tie estas mastro: la ŝtato; kaj proletaro: la popolo. Kaj se la laboristo devas perlabori ajnan salajron, kaj la kromaĵon, kiun li produktas, li ne povas distribui, kiel al li plaĉas, nek disponi ĝin laŭ interkonsentoj, kiujn li libere povas akordigi, kaj li nur devas akcepti ĝin laŭ la maniero, per kiu la ŝtato volas transdoni ĝin al ili, ne estas komunismo; ne estas pli ol kolektivismo pli aŭ malpli radikala. Ĉi tio estas ĉio. Dum estos klasoj, sociaj diferencoj aŭ kategorioj, la komunismo ne eblas. Kaj ĉi tie estas, se ne klasoj, almenaŭ kategorioj, de la momento, kiam la salajroj ne estas egalaj kaj ĉiu laboristo okupas la kategorion, kiun la Komitato de Fabriko al li koncedas.

—Vi jam konvinkos vin—li min respondis—, ke vi eraras. — Kaj la konversacio ŝanĝis la temon.

Jam estis preskaŭ nokte kaj oni al ni servis la vespermanĝon.

Finita ĉi tiu, ni iom plu parolis kvankam pri banalaĵoj kaj poste retiriĝis en nian vagonon por ripozi.

Ni enlitiĝis kaj dormis ĝis ni estis proksime de Moksvo. En la stacidomo nin atendis kvar aŭtoj, per kiuj oni nin veturigis al la hotelo "Dielavoy Dvor", kiu ĵus estis renovigita por ricevi la delegitojn al la dua Kongreso de la Tria Internacio.

De tie, iom poste, ni deiris al la malnova germana Ambasadejo en Moksvo, oficiala sidejo de la Komunista Internacio, kie la kunveno de la Plenuma Komitato devis okazi.

Mi ne parolos pri la okazaĵoj nek la disvolviĝo de la Kongreso, ĉar mi jam rakontis ilin en la broŝuro, kiu pri mia

klopodo, kiel delegito en la Kongreso estas publikigita, ampleksigita poste en tiu titolita "Konsideroj kaj juĝoj pri la Tria Internacio".

Sed antaŭe, mi volas doni la resumon de intervidiĝo, kiun mi havis kun Drizzo aŭ Lozovski, ĉar li estas konata per ambaŭ nomoj.

Sekvatage al nia alveno al Moksvo, t. e., la 30-an de junio, kiel ni akordiĝis la antaŭan tagon, post finita la kunveno de la Plenuma Komitato de la Komunista Internacio ni intervidiĝis kun Lozovski kaj okazigis kun li ian intervjuon, kiu estis tre utila al ni por tuta nia posta klopodo.

Estas fakto jam rekonita de la Historio, ke la organizo de Sindikatoj en Rusujo aperas post la movado de 1905. Sufokita de sango tiu movado, kiu preskaŭ finis kun la cara reĝimo, la nobelaro kaj la burĝaro mem komprenis la neceson koncedi iom da libero al la aspiroj de la popolo, kaj ene de ĉi tiu koncedita libero, naskiĝis la unuaj sindikataj organizoj.

Kiam ni diras, ke oni al ili koncedis iom da libero, ni ne volas diri, ke ili povus disvolviĝi, ne jam per tuta libero, sed eĉ ne per almenaŭ duona libero; kion ni pretendas estas sintezi la komencon de koncedo, kiun la verŝita sango eldevigis de la jam mortvundita carismo, kaj la avantaĝojn, kiujn eltiris la popolo el la subprema paŭzo.

La reago, kiu sekvis al la sangaj okazaĵoj de 1905 estis kruelega; sed se malfortaj restis la politikaj partioj intervenantaj en la movado pro la subpremo, kiu ilin ruinigis, same aŭ pli malforta restis la reĝimo, kiu ĝin efektivigis.

Konvinkitaj la burĝaro kaj la nobelaro, ke estis multe pli praktike malfermi breĉon de ellaso por la kreskanta ĉagreno kaj protesto de la laborista klaso ol kontraŭstari per la sistema perforto la malkontenton, kiu nediskuteble

ekzistis en la popolo, ili toleris, ke la laboristoj povus interasocii sin por ekonomiaj depostuloj de klaso.

La kresko de la Sindikatoj estis tiel rapida kaj sekura, ke la Registaro, jam ne kuraĝante retiri tion konceditan, semis en la organizon informantojn kaj provokistajn agentojn, kiuj al ĝi permesis, pretekste de falsaj movadoj kaj ĉiam anonimaj denuncoj, realigi amasajn arestojn, per kio ĝi atingis du celojn: liberigi sin de la plej energiaj kaj kompetentaj laboristoj, sendante ilin al Siberio aŭ la eŝafodo kaj rompi la organizon dum la bezona tempo por ke la burĝaro spiru kaj reakiru fortojn.

La rusaj politikaj partioj tiam volis aliĝi kaj utiligi la sindikatan organizon por siaj propagandoj, kredante, ke la Registaro al ili faciligus ĉi tiun taskon; sed ili tuj konvinkis, ke ne eblis. Ili komprenis, ke ne nur ne povis utiligi la marĝenon de tolero sen grava risko por ili, sed ke la plej bonaj el iliaj aktivuloj restis en danĝero pro la koleroj de tiu povo tiel barbara, kiel diboĉema. De post ĉi tiu momento, la politikaj partioj daŭrigis sian propran vojon kaj la Sindikatoj restis liberaj de ili. Inter unuj kaj aliaj daŭre estis rilatoj; kvankam ĉiu agadis en tute malsama kampo.

Tamen ĉi tiu disigo, kiun la cirkonstancoj altrudis per neeltenebla forto, la Sindikatoj ne malaperis kaj kvankam tre iom post iom etendis sian influon kaj sian agadkampon.

La deklaro de la eŭropa milito metis la rusajn Sindikatojn samkiel tiujn de aliaj landoj intervenantaj en la milito, en danĝeregan situacion; sed poste male al kio okazis en la ceteraj militantaj nacioj, la rusaj Sindikatoj sukcesis reagi kaj krei potencan forton. La politika kaj ekonomia malordo de la lando, kiun kaŭzis la absoluta malforteco de la carismo, faris, ke la Sindikatoj atingis grandan superecon.

Kaj en ĉi tiu situacio de la Sindikatoj estas kiam Lozovski al ni parolas pri ili.

Ni ne volus misprezenti la penson de la prezidanto de la rusa Ĝenerala Konfederacio de la Laboro kaj sekvos kiel eble plej ĝuste la notojn, kiujn ni konservas de tiu konversacio.

Post la revolucio de marto, la unua —li al ni diras—, la Sindikatoj mirinde kreskis kaj, kvankam de malsama agadkampo, ne ĉesis instigi la registaron de Kerensky por ke ĉi tiu donu plenan kontentigon al la popolaj deziroj.

Estis momento kiam ŝajnis, ke Kerensky estis cedonta pro la kreskanta impulso de la organizitaj homamasoj; sed premata de la fremdaj ambasadoj, anstataŭ inklini sin por la popolo, li kuniĝis al la liberala burĝaro kaj la "kadetoj", kiuj ĝin reprezentis.

Tiam la Sindikatoj, per ilia propra iniciato, estigis atakeman movadon kontraŭ la registaro kaj burĝaro, postulante la finon de la milito kaj pli bonan aranĝon de la vivrimedoj.

En ĉi tiu movado, kiu komenciĝis post la unua revolucio kaj daŭris ĝis komencoj de majo, okazis de post ĉi tiu dato malfortigo, reago laŭ kontraŭa senco, kaj la burĝaro, kiu deziris venĝi, komencis senfinan serion de entreprenaj fermoj kaj arbitraj disponoj, kiuj kaŭzas per si mem, ke la laborista klaso reagas pli perforte ol antaŭe.

Oni povis vidi neordinaraĵojn dum tiu grandega lukto.

La laboristoj, antaŭiĝante je la okazaĵoj, kiuj malmultajn monatojn poste ĝeneraliĝos, ekprenis posedon de la fabrikoj, efektivigante procedon, kiu kaŭzis multajn jarojn de malliberejo kaj multajn ekzilojn en Siberion dum la carismo.

Kiam la laboristoj de fabriko ne estis kontentaj kun ties submastro, direktisto aŭ mastro kaj volis seniĝi je li, procedis laŭ la sekva maniero, kiu, mi ripetas, estis jam malnova kutimo en Rusujo:

Ĉiu laboristo okupis sian laborpostenon kvazaŭ nenio okazos kaj nur unu restis viglade ĉe la pordo. Apenaŭ oni ekvidis la personon, kiun volis forpeli, donis la voĉon de alarmo, kaj ĉiuj tenis sin garde, sed ne forlasante sian laboron kaj ne movante sin de sia loko.

Kiam la viktimo transpasis la sojlon de la fabriko, laŭ akordigita signalo ĉiuj laboristoj iris al li kaj ĉirkaŭis lin, formante rondon el kiu li ne povis eliri. Tiam laboristo al li eldiris la intencojn de la laboristaro kaj se li propra-vole akceptis ilin, nenio okazis; sed se estis rezisto, se li ne plenumis la postulon, unu el la ĉeestantoj tuj serĉis manĉareton, en kiu ili metis la personon, eltiris lin el la fabriko kaj, kiam estis mezstrate, renversis la manĉareton kaj tien iris nia homo ruliĝanta sur la plankon, akompanita de la ridadoj, mokoj kaj ŝercoj de la ĉeestantoj. Malpura, humiligita kaj hontigita, li devis foriri, ĉar se li pretendus reveni en la fabrikon estus plej malbone. Al li povus okazi io pli grava.

Scenojn, kiel ĉi tiujn, oni ĉiutage vidis sur la stratoj de Petrogrado kaj ĉe la pordoj de la fabrikoj.

La agitado kreskis; la disponoj de Kerensky kontraŭ la popolo kaj la ordonoj de malliberejo al la laboristoj, kiuj elpelis el la fabrikoj la mastrojn, ekscitis la animojn kaj la Sindikatoj de Petrogrado kaj Moskvo, oni povas diri, ke estis, kiuj pli rekte stimulis la movadon de la dua revolucio.

—Laŭ ĉi tio, la partopreno de la Sindikatoj en la dua revolucio estis tre videbla —mi al li kontraŭargumentis.

—Sen ajna dubo. Kaj mi povas al vi aserti, ke la Sindikatoj estis la nervo de la revolucio.

—Kaj poste, kiel ili kondutis?

—Ĝenerale bone, se ni faras la kutimajn esceptojn.

La Sindikatoj tuj eklaboris por organizi la laboron kaj la produktadon, kvankam oni baldaŭ konstatis, ke ili ne sukcesos. La korporaciema spirito pli pezis sur iliaj decidoj ol la interesoj de la komunumo.

Tiel, ekz-e, okazis, ke la laboristoj de la manufakturo Provownik abunde havis nafton (karbonido de hidrogeno). Kaj, kiel mankis nafto por funkciigi la maŝinojn produktantajn elektran povon por la tramoj, oni petis al laboristoj de la manufakturo Provownik, ke ili cedu parton kaj ili firme rifuzis sin.

—Kaj kion faris la cetero de la laboristoj pro ĉi tiu rifuzo?—mi demandis.

—Ili kunvokis ĉiujn laboristojn de la manufakturo al kunveno en la Borso de la Laboro, kaj tie ili al ili diris, ke se ili ne cedus parton de nafto por ke la tramoj veturu, oni al ili deklarus la bojkoton kaj ne al ili permesus vojaĝi per la tramoj.

—Ĉu ili cedis?

—Kion alian fari?. Kiu rezistas trudadon de tia karaktero, la minacon de tuta popolo?

—Tiel estas, ke la morala trudado de la aliaj laboristoj al ili cedigis la nafton.

Ne estis alia procedo por devigi ilin. Hodiaŭ ne okazintus tiel.

—Tio interesa —mi respondis— estas la konfirmo, kiun vi al mi faras pri tio, ke la interveno de la Sindikatoj en la revolucia movado gravis.

—Pri tio vi povas certi. Samkiel nun, post la revolucio, la harmonio inter la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro kaj la Komunista Partio estas absoluta. Ni laboras laŭ komuna interkonsento kaj sekvante la platformon de la partio por la efektivigo de la komunismo kaj la plifirmigo de la diktatorado de la proletaro. Ni kuniras laŭ absoluta interkonsento pri ĉi tiuj aspektoj. La disciplino de la Partio tiel tion trudas kaj oni devas submeti al ĝi.

La konversacio devis fini, ĉar la sennombraj okupoj de Lozovski postulis al li la tempon, kiun ni al li forprenis.

—Cetere —li al mi diris—. Ĉu vi volas partopreni en ekskurso, kiun oni organizas por la delegitoj sur la rivero Volgo? Ĝi estos tre interesa! Kiel la Kongreso ne komencos ĝis la 15-a de la venonta monato, ni havos tempon internigi nin en la koron de Rusujo, kie vi povos daŭre kontakti kun la revolucio. Jam estas pli ol dudek la personoj enskribitaj. Ĉiuj estas delegitoj. Krome, ni ankaŭ invitas vin partopreni en politika amaskunveno morgaŭ okazonta en unu el la tendaroj de soldatoj de la ĉirkaŭaĵoj de Moskvo. Ni esperas, ke vi ĉeestu.

—Kalkulu je mi.

Mi sekvatage partoprenis en la politika amaskunveno de la tendaro de soldatoj. Ne entuziasmigis min, persistan kontraŭmilitiston, kontribui al militisma propagando, sed mi havis okazon vidi de apude la organizon de militista tendaro kaj mi jesis.

Ni estis akceptitaj per ĉiuj honoroj.

Formis sin la diversaj divizioj, kiuj estis en la tendaro, kaj inter vicoj de soldatoj ni iris al la konstruaĵo okupata de la kamarado majoro.

Oni al ni servis la teon kaj ni konversaciis. La eksterordinara Komisiono de la tendaro, konsistigita de viroj inklinaj al la Partio kaj, kiu havis la komision fari komunisman propagandon inter la soldatoj, metis sin je nia dispono por kiom da informoj ni volis akiri.

Ni demandadis.

—Ĉu ....?

—La disciplino estas tre rigora. Se ĝi ne ekzistintus oni ne povintus organizi la Armeon. Necesis restarigi la mortpunon kaj la plej severajn punojn por eviti la amasajn armefuĝojn. Kaj oni ne nur punas la soldaton fuĝantan el la armeo, sed ke la vilaĝeto aŭ vilaĝo, kie li rifuĝas, kaj ne lin denuncas, devas pagi fortan kontribucion pro kaŝado.

—Ĉu ....?

—Oni tre legas en la Armeo. Estas libro, kiu preskaŭ kaŭzas naŭzon pro tiel eluzita, kiel ĝi estas kaj, tamen tiu ĝin havanta, ĝin konservas kvazaŭ estus grandvalora juvelo, objekto de nekalkulebla valoro.

—Ĉu ....?

—Oni preferas la literaturon. Ankaŭ la komunisma literaturo de la Partio sufiĉe cirkulas; sed la literaturo estas la preferata.

—Ĉu ....?

—Inter la sciencoj, la astronomio havas, laŭ niaj kalkuloj, ĉirkaŭ kvardek kvin procenton de la legantoj, kvanto, kiun atingas neniu alia branĉo de la scienco.

—Ĉu ....?

—Inter la studo de fremdaj lingvoj ni ne povas ellabori komparon. Esperanto havas ĉirkaŭ sesdek procenton de lernantoj. Ni povas diri, ke ĝis nun, ĉi tiu estas la preferata.

—Ĉu ....?.

—La kvanto da analfabetoj konsiderinde malpliiĝas kaj ni ĉi tie faras ĉion, kion ni povas por malpliigi ĝis nulo la nombron. Komence, kiam venas soldato, kiu ne scias legi nek skribi, tio unua, kion ni faras estas sendi lin al la lernejo de la tendaro. Se li montras diligentecon kaj lernodezirojn, oni tuj metas lin en egalaj kondiĉoj; se ne, oni dediĉas lin al la plej penigaj laboroj por veki en li la deziron instrui sin. Ne kiel puno, sed kiel korektomaniero. Kaj ĉi tiu proceduro donas bonajn rezultojn. Ni ankaŭ diras, ke ne estas multnombraj la okazoj en kiuj ĝi devas apliki sin.

—Ĉu ....?

—Ni senĉese faras prelegojn. Almenaŭ du aŭ tri semajne. Nun, kiam ni iros al la loko, kie vi devas paroli, vi vidos la tribunon sur kiu ĝenerale oni kutimas alparoli ilin. Ni hodiaŭ ne uzos ĝin por ke vi parolu.

Kiu ŝajnis esti la "respondeculo", ĉar ĉiu Komisiono havas respondecan individuon, invitis nin, ke ni deklaradu ie ajn, kie ni povus publike paroli, ke la ruĝa Armeo organizis kaj preparis sin por porti la revolucion ĉiulanden. Ke lia deziro estis iutage povi brakumi en urbo de la centro de Eŭropo delegiton de ĉiu el la ruĝaj Armeoj kreitaj en ĉiu lando, ĉar ne eblus doni ĉi tiun brakumon al ĉiu soldato.

Oficiro avizis la majoron kaj la Komisionon, ke la trupoj estis atende formitaj.

Ni iris al la loko, kie devis okazi la amaskunveno.

Survoje ni preterpasis la ordinaran tribunon sur kiu la oratoroj parolis al la soldatoj.

Estis platformo de ĉirkaŭ du kvadrataj metroj, lokita sur kvar fostoj, proksimume tri metrojn de alteco, kun ŝtuparo ĉe flanko por la aliro. La kvar fostoj estis siavice lokitaj sur framo el ligno kun kvar radoj, kio permesis la translokon.

La loko de la amaskunveno estis ampleksa ebenaĵo sur kiu, formante vastan rondon, estis formitaj ĉiuj fortoj de la tendaro. Ni okupis la centron. Kaj de tie, ni ilin alparolis en la franca kaj poste tradukis al la rusa la kamarado Lozovski.

3a. Ekskurso sur Volgo

La unuan tagon de la monato de julio ni veturis per speciala trajno direkte al Niĵni Novgorod.

En la ekskurso estis dudek sep eksterlandaj delegitoj, plus la rusoj, kiujn la Komitato de la Tria Internacio aldonis por ke ili akompanu nin kaj servu kiel interpretistoj kaj perantoj. La “respondeca” estro estis Lozovski.

Inter la ekskursanoj estis la tuta itala delegitaro, kun ties respektinda D'Aragona, la ŝnurdancisto Serrati kaj la simpatia kaj malvigla Bombacci pli zorgita elstarigi sian belecon ol studi tion okazantan en Rusujo. Ankaŭ estis Cachín, Frossard, Rosmer kaj ties parulino, el Francujo.

Ni sekvatage alvenis en Niĵni Novgorod je la dekunua matene kaj sur la kajoj estis akceptitaj de la loka Sovetia Komitato kaj ĉiuj oficialaj reprezentantoj de la Registaro.

La trupoj de la loĝloko, formitaj interne kaj ekstere de la stacidomo, al ni faris militistajn honorojn. Kiam ekeniris la trajno en la stacidomon bando de muziko ekludis la unuajn taktojn de "La Internacio", oficiala himno de la Registaro.

Kiam la trajno haltis, la muziko ĉesis. Sed apenaŭ ni elvagoniĝis kaj salutis la oficialajn reprezentantojn, la bando ree ludis la himnon; kaj ĉiuj ĉeestantoj, escepte de la delegitoj, tenis sin laŭ rigida militista sinteno kaj kun la mano je la alteco de la kaskedo.

La militista seriozeco de tiuj homoj nin lasis mirfrapitaj.

Mi iluziiĝis, ke venus akcepti nin la Soveto, sed sen iaj pompoj; kion mi vidis eĉ ne mi sonĝintus; neniam mi kredintus ĝin.

Dume, la popolo, la homamaso, restis fora kaj malproksima de ni, ĉar la starigita kontinua vico de trupoj neebligis, ke ĝi povus alproksimiĝi. Mi opinias, ke kvankam ĝi povintus ankaŭ ne alproksimiĝintus; sed ni detenu nin opinii; nur raportu.

Finitaj la salutoj, okazis apenaŭa interŝanĝo de opinioj kaj neeviteblaĵoj, kaj ni eniris en la aŭtojn, kiuj nin atendis, kaj ni deiris al la rivero Volgo, kiun verkisto nomis la "dorsa spino de Rusujo".

La vaporŝipo estis ornamita kaj tegita de ruĝaj flagoj kaj afiŝoj koncerne la Trian Internacion. Ankaŭ ne mankis la konata “Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu".

Kiam ni alvenis en la vaporŝipeto, surdiga bruo sonis samtempe disde ĉiuj lokoj. Okazis, ke pro ordono de la Soveto ĉiuj sirenoj de la ŝipoj kaj fabrikoj nin salutis.

Kvin minutojn daŭris la serenado. Poste la ĵus alveninta bando de muziko regalis nin denove per "La Internacio". Ĝi nun atingis majeston, ĉar kun la akordoj de la muziko leviĝis la voĉoj de la homamaso kantanta la himnon.

Ni translokiĝis al la manĝoĉambro, kie oni al ni servis grandiozan festenon.

La vaporŝipo disponis ĉiajn komfortojn, kiujn oni povas postuli.

Kiel la privataj vagonoj, kiuj trairis la rusajn fervojajn liniojn dum la carismo, tiu estis unu el la privataj vaporŝipetoj, kiujn ĝiaj mastroj uzis por ekskursoj kaj skandalaj orgioj sur Volgo.

Tiu, kiun ni uzis, apartenis al fama gravulo el la nobelaro.

Post la festeno, la aŭto nin veturigis al la ĉefa teatro de la urbo, kie devis okazi politika amaskunveno.

La teatro estis plenplena de homoj. Estis loko por neniu. Krom la kuriozeco, kiu povus esti por aŭdi la delegitojn, la loka Soveto dekretis, ke la tago de nia alveno estos ferio, por ke la popolo iru akcepti nin.

Finiĝis la amaskunveno kaj ni revenis en la ŝipon. Ni akordigis, ke sekvatage iros kontraŭ la riverfluo por viziti la grandajn metalurgiajn manlaborejojn de Soromovo; ke post la vizito al Soromovo ni revenos al Niĵni Novgorod por, definitive, iri al Kazano, borde de la rivero, veturante ĝis Astraĥano laŭ la riverfluo, kien proponis Serrati, ke ni alvenus, se ni havus tempon por iri.

La vizito al la metalurgiaj manlaborejoj de Soromovo, kiuj kun tiuj de Putilof en Petrogrado, mi opinias, ke estas la plej gravaj de Rusujo, permesis al ni kontakti pere de la oficialaj interpretistoj kaj delegitoj nin akompanantaj kun rusaj laboristoj.

Kiel supozendas, nia vizito estis ĉiam antaŭinta de avizo fare de la Komitato de la Tria Internacio kaj la Soveto de la loĝloko, kiun ni forlasis, tiel do en ĉiu vizitita loĝloko ne mankis akcepto.

Kiel Soromovo ne estas vera loĝloko, sed grandaj manlaborejoj iom malproksimaj de la veraj urboj, ĉiuj tie loĝantaj nur vivas por la fabriko.

Kiam oni ne laboras, devas forlasi la lokon kaj la solaj aŭtoritatoj kutimas esti la direktistoj.

Ni estis akceptitaj de la direktisto de la manlaborejoj, fervora komunisto, kiu loĝis multajn jarojn en Parizo, kiel enmigrinto kaj, kiu, kiam eksplodis la revolucio, revenis en sian landon.

Ni vizitis ĉiujn ĉambrojn, la plimulto en bedaŭrinda stato, ĉar la manko de krudmaterialoj neebligis intense

labori kaj ripari la difektojn, kiujn la tempo kaj la eluziĝo kaŭzis.

Ĉi tiuj manlaborejoj estis kreitaj por konkurenci kun tiuj de Putilof pri la konstruado de militmaterialo dum la cara epoko. Ne povante atingi sian celon, ili poste kaj prefere dediĉis sin al la konstruo de lokomotivoj kaj terkultura maŝinaro.

Dum la eŭropa milito ili nur konstruis militmaterialon, samkiel en la momento de nia vizito.

La ĉambroj estis imponaj. Tiuj, kiuj plej bone konserviĝis estis tiuj de fandado kaj lamenigado kaj tiuj de tornado kaj elfaritado de malpezaj kanonoj kaj maŝinpafiloj. Tiam ili estis konstruantaj la unuan milittankon. Kiel modelon ili uzis unu, kiun la angloj forlasis kiam la Ruĝa Armeo eniris en Bakuon.

Ili havis ĝin duone malmuntitan kaj apud ĝi estis tiu, kiun ili konstruis.

Post la vizito de la manlaborejoj okazis politika amaskunveno, kiun la sirenoj de la fabrikoj anoncis por ke la laboro ĉesu.

Kiel la domoj kaj loĝejoj de la laboristoj estas ene de la zono okupita de la manlaborejoj, ĉiuj homoj venis por aŭdi la oratorojn.

La aspekto de la plimulto de la ĉeestantoj estis de tuta indiferenteco. Vidante ilin, oni kredintus, ke ili nur deziris, ke finu la kunveno kiel eble plej baldaŭ por iri manĝi, ĉar jam alproksimiĝis la horo.

Sur la plimulto de la vizaĝoj de la ĉeestantaj virinoj aperis rideto mokema kaj de nekredemo pro tio, kion oni diris.

Mi povis rimarki, ke la fumantoj ne havis fumpaperon; sed la lerteco ĝin anstataŭis.

El peco de ĵurnalpapero aŭ de kiu ajn alia -tiu de silko de la skribmaŝinoj estis tre serĉata- ili faris tre maldikan kaj elegantan korneton; poste, je la plej larĝa parto de la konuso ili faldis, laŭ formo de ortilo, pecon ĉirkaŭ unu aŭ du centimetroj. Tiel ili improvizis pipon, kiun plenigis per tabako aŭ per io, kio ĝin similis. La pintan parton de la korneto ili iom tranĉis kaj jam havis farita la cigaron. Alumeto kaj ekfumi. Pro tio eltrovema de la procedo kaj, ĉar ĝi elmontris kiel la bezono stimulas la menson, mi volis rakonti ĝin.

Ree enŝipiĝinte, ni faris vojon malantaŭen ĝis Niĵnij Novgorod, kie haltis la ŝipo kaj oni al ni servis la manĝon. Finita ĉi tiu, ĝi direktiĝis laŭ riverfluo al Kazano, kien ni devis alveni sekvatage.

Kiam la vaporŝipo pretis foriri, rekomenciĝis la serenado el fajfoj kaj sirenoj de la antaŭa tago, kiu daŭris ĝis ni jam ne ekvidis la loĝlokon.

La navigacio sur Volgo estas io el pli alloga, kion mi vidis en mia vivo, kaj se mi scius fari ĝin, se mia plumo havus la priskriban facilecon porti sur la paperon la belecon de ekskurso sur tiu grandioza rivero, mi priskribus ĝin por ĝuo de la leganto. Ĉar mi ne disponas tiujn kapablojn, permesu min, ke mi ne makulu la ĉarmon, limigante min nur al la memtrudita tasko.

La akcepto, kiun oni al ni faris en Kazano, ne estis tiel grava, nek tiel pompa, kiel tiu de Niĵnij Novgorod, eble ĉar ĝi estas pli malĉefa urbo.

Sur la elŝipejo de la rivero staris la Soveto de la urbo kaj ĉiuj komunistaj reprezentantoj. Alifoje la bando de muziko, la "Internacio" kaj la militistaj sintenoj.

Oni promenigis nin tra la loĝloko per oficialaj aŭtoj kaj postagmeze oni okazigis amaskunvenon.

Partopreni en ĉi tiuj publikaj ceremonioj estis tute malagrabla.

Apenaŭ ekaperis sur la tribuno la Soveto de la urbo, antaŭinta de la oratoroj nomumitaj por partopreni kaj de ĉiuj delegitoj, ĉar ĉiuj ĉeestis, la bando de muziko ekludis "La Internacion".

Kiam la prezidanto de la loka Soveto, kiu estis, kiu prezidis la amaskunvenon, konsideris komencita la ceremonion, kaj kiam post la deviga prezento li donis la parolon al la unua oratoro, pli da muziko kaj pli da "Internacio".

Dum parolis la eksterlandaj oratoroj ne estis aplaŭdoj, ĉar ili al ni ne komprenis; sed post la traduko de la paroladoj al la rusa, same kiam parolis oratoro de la lando, ĉiu alineo estis substrekita de la aplaŭdo de la publiko; la bando ekludis "La Internacion", kiun ĉiuj devis stare aŭskulti kaj la plej fervoraj komunistoj salutis laŭ militista maniero.

Estis vera fiksa ideo. Ĝi finfine kaŭzis al ni tian ĉagrenon, ke pli-malpli ĉiuj forglitis tuj kiam ni konstatis, ke estis amaskunveno aŭ oficiala akcepto.

Tiun saman vesperon, jam mallume, ni deiris direkte al Simbirsk.

La akcepto, kiun oni al ni faris en Simbirsk, egalis tiun de Niĵni Novgorod.

La loko, kie staris la elŝipejo de la rivero, distancas je unu kilometro al la loĝloko, kies ŝoseo estis neveturebla.

La aŭtoj apenaŭ povis veturi, sed la Soveto ne havis rimedojn ordoni ĝian riparon.

Unue oni portis nin al la socia sidejo de la Soveto, kie oni nin regalis per tagmezmanĝo.

Finita ĉi tiu ni iris al granda placo lokita en la centro de la loĝloko sur kiu estis formitaj ĉiuj trupoj de la garnizono por ĉeesti en alia amaskunveno kun muziko.

En la centro de la kadro, kiuj formis la trupojn, oni starigis tribunon laŭ formo de katafalko, ĉirkaŭ kvar metroj de alteco, por de tie paroladi.

Vidinte la paradon de la trupoj, unuj iris al la teatro kaj aliaj al la Akademio de oficiroj de la ruĝa Armeo, kie ankaŭ oni okazigis alian politikan amaskuvenon.

Ni rigardis la pason de enterigo, kiu interesis nin pro io tipa kaj propra de la lando. La ĉerko estis portita surŝultre kaj malkovrita. La kovrilon surportis kvar individuoj, kiuj iris malantaŭe.

Estas kutimo, ke oni ne fermu la ĉerkon de la mortinto ĝis la momento malsupreniri ĝin en la tombofoson. Ŝajne oni ne volas senigi la forpasinton je la saturado per suna lumo ĝis la lasta momento.

Oni komprenos, ke ĉar ni troviĝis en Simbirsk kaj pro oficiala kaj deviga komisio, ne mankis aludoj al tio plej grava. Kaj kiu alia plej grava afero por Simbirsk kaj por la komunistoj, ke memorigi nin, ke ni troviĝis en la naskiĝloko de Lenino?

Vladimiro Ilich Ulianov—Lenino, pri kiu diras Zinovjev, ke lia patro "estis de kamparana origino" kaj, ke "laboris en la regiono de Volgo, kiel direktisto de la popolaj lernejoj", estis filo de la ĉefurbo, kie ni tiumomente troviĝis.

Ĉiuj paroladoj faritaj tiun tagon en Simbirsk estis aliaj laŭdegoj al la persono de la komunistestro, al la "revoluciulo

sen precedencoj, al la viro, kiu scipovis konduki la proletaron al la plej granda epopeo, kiun la homaro konas".

Mi, kiel ne estis nomumita por partopreni en iu politika amaskunveno el la du okazontaj, ĉar mi jam parolis en tiu de la Placo, elektis ĉeesti en tiu de la teatro kaj kontakti kun la civilularo.

La ĉeestantaro estis multnombra kaj estis malfacile alproksimiĝi al la teatro. Kiam mi jam sidis sur unu el la seĝoj de la scenejo, alvokis min Lozovski, por diri min ĉu mi volus partopreni en la amaskunveno de la militista Akademio, ĉar Serrati-on, kiu kune kun alia estis nomumita, oni nenie trovis.

Mi akceptis kaj tuj iris tien. Oni al ni servis teon kaj sandviĉon laŭ la rusa stilo kaj poste paroladis Sadul kaj mi.

Jam malfrue ni reenŝipiĝis, intence deiri tiun saman nokton al Samara.

Sub krudaj ŝirmejoj de la kajoj, inter la amasoj de varoj kaj restoj de ĉiuj aĵoj tie forlasitaj, troviĝis cento da familioj disetenditaj sur la planko kaj en la plej absoluta forlaso. La intermiksado, malpureco kaj mizero malkaŝis profundan suferadon. Mi demandis kial ili estis tie, kaj oni respondis al mi, ke estis familioj, kiuj elmigris interne de Rusujo la antaŭan jaron pro la invado de la blanka generalo Denikine kaj, ke nun revenis sialanden.

Antaŭ tagoj ili atendis ŝipon kaj dum ĝi venis, ili devis kampadi sub la libera ĉielo kaj meze la malpureco sen tio, ke iu zorgas pri ilia malĝojega situacio.

Tiun nokton, ni deiris al Samara, kie ripetiĝis la oficialaj akceptoj, la politikaj amaskunvenoj kaj "La Internacio".

Ni pasigis la tagon en Samara. De tie ni iris al Saratov haltante antaŭe en Marx-Stad (urbo de Karolo Markso), kiu

estis malnova kolonio el germanoj, devenantaj de tiuj, kiujn la reĝino Katerina altiris al sia lando koncedante al ili privilegiojn respektitajn ĝis la eksplodo de la revolucio.

En Saratov ni forlasis la riveron por reveni per trajno al Moskvo, trairinte Tula-on kaj Ivanovo-Vosnosiensky-on.

Sed antaŭ ol konsideri finita la ekskurson sur Volgo kaj reveni al Moskvo, ni devas klarigi ion, kio verŝajne interesos tiun, kiu nin legas.

Antaŭ ol alveni en Samara, ni vizitis minojn, kiuj tiam ekestis ekspluatataj.

Ĝi estas minojn riĉegajn de *Gips*, bitumohava ŝtono, kiu havas nenian forĵetaĵon.

Ĝi povas esti uzata kiel brulaĵo en fornoj, kie oni bezonas multan varmegon; fandejoj de fero kaj metaloj, ekzemple.

Se oni volas submeti ĝin al kemiaj reagoj, povas atingi el la Gips anstataŭantojn de la benzino kaj la petrolo. La restaĵoj de la kemiaĵoj ankaŭ povas esti uzataj, kiel brulaĵo en la fornoj por fandi mineralojn. La cindroj de ĉi tiu brulaĵo estas tute uzeblaj, kiel anstataŭanto de la cemento, ĉar havas la samajn kvalitojn, ke ĉi tiu.

El la sondadoj efektivigitaj ĝis tiam, oni certigis, ke la minoj posedis ĉirkaŭ 24 milionojn da "*pound*-oj" da mineralo. Se oni konsideras, ke la rusa "*pound*" egalvaloras ĉirkaŭ 16 kilogramojn de la niaj, oni komprenos la grandegan riĉecon de la mino.

En kelkaj islamaj vilaĝoj antaŭ jarcentoj kreitaj de elmigrintoj el Turkujo kaj, kiuj ankoraŭ konservas sian religion kaj morojn, ni volis koni la juĝon, kiun al ili meritis la Revolucio.

Por tiuj homoj, nenion signifis la Revolucio. Male ili ege plendis pri la Registaro, ĉar ĝi ne toleris, ke la junuloj lernis la Koranon en la lernejo. Ili volis, ke liaj filoj lernu legi; sed nur la Koranon, ĉio cetera ilin ne interesis.

Ni ilin demandis se ilin kontentigis la terdivido farita de la Registaro.

—Ĉi tie —ili al ni diris— la tero estas samkiel antaŭe. Ĉiuj havas kion oni bezonas kaj ne ambicias pli.

La mizero de tiuj homoj loĝantaj sur la plej fruktodona tereno el la tuta centra Rusujo, ĉar estas lokitaj iliaj vilaĝoj sur la limoj konataj, kiel "nigraj teroj", kiuj produktas la plej grandan parton de la tritiko konsumata en Rusujo, estis io, kio malĝojigis nin.

Materiala mizero kaj spirita mizero.

La aspekto de iliaj domoj, kiel tiu de la personoj, estis malriĉega, praa, kruda. Ili ne havis alian deziron ol scipovi legi la Koranon kaj vegeti ene de la mizero.

Ni ankaŭ vizitis ĝardenoj-lernejojn, kiuj staris proksime de Samara, kie oni nin akceptis per la sama pompo, ke oni kutime nin akceptis ĉie.

Oni regalis nin per festeno kaj la geknaboj eldiris paroladojn rilataj al la ceremonio.

Mi demandis kiujn normojn ili sekvis por la akcepto de la infanoj. En tiuj ĝardenoj-lernejoj por ĉiuj estis logike pensi, ke oni ne faris elektadon. Ili diris al mi, ke ĉiuj tiuj infanoj estis filoj de komunistoj, ĉar kiel ĉi tiuj estis, kiuj faris la revolucion, estis iliaj filoj la elektitaj por unue profiti. Kaj, ke tiel en tiu, kiel en la aliaj institucioj de la Registaro, oni nur aniĝis, dum la okupotaj lokoj estus malmultaj, se oni estis aktiva komunisto, membro de la partio. Kiam ili malmankis oni akceptis tiujn, kiuj ne estis komunistoj.

Ni ankaŭ vizitis la Respublikon Chuvasky, unu el la multaj Respublikoj entenitaj en la Socialisma Federacia Respubliko de la Rusaj Sovetoj.

Post kiam oni klarigis al ni la karakterizaĵojn de la lando, nin interesis scii sur kio baziĝis la aŭtonomeco, kiun ili ĝuis ene de la rusa centraliza reĝimo.

Ili al ni vaste ĝin klarigis. Ili estis aŭtonomaj, sed estis devigitaj obei ĉiujn ordonojn, leĝojn kaj dekretojn, kiujn la Sovetoj diktos, kaj ili neniel povis modifi ilin.

Ĝustigi al la karakterizaĵo de la leĝoj kaj dekretoj de Moskvo la ekonomiajn, socialajn kaj politikajn kondiĉojn de la lando; pagi la impostojn, egale kaj laŭ la samaj kondiĉoj, ke la aliaj provincoj; doni al la Ruĝa Armeo la homojn, kiujn ĉi tiu petus kaj obei la disciplinon de la Komunista Partio kaj la diktatorado de la proletaro.

Ĉar per ĉiuj ĉi deklaroj, ni ne vidis la konceditan aŭtonomecon kaj, kiun ili mem diris ĝui, ni insistis pri niaj demandoj kaj klarigoj kaj fine konkludis, ke tiu tuta aŭtonomeco estis reduktita enoficigi el inter la indiĝenoj el la lando siajn proprajn funkciulojn kaj aŭtoritatojn, kvankam la nombro da ĉi tiuj kaj ties atribuoj estis en Moskvo, kie estis deciditaj. Resume, ke ne estis tia aŭtonomeco.

Nin interesis scii, kiujn efikojn kaŭzis la Revolucio, kaj pli ol la Revolucio laŭ ĝia politika aspekto, ĉar ĝi estis rimarkinde terkultura regiono, nin interesis scii, kiel oni akceptis la terdisdonon.

Kiel ni parolis kun filoj de la lando, ili respondis al ni, ke la decidoj de la Registaro de Moksvo, koncerne la teron, kaŭzis tre malbonan efikon kaj pli malbonajn vivkondiĉojn ol tiuj, kiujn ili ĝuis dum la carismo.

Ĉi tie —ili al ni diris— en ĉi tiu lando, ekde niaj prapatroj ĝin okupis, ekzistis la kutimo de perioda disdono

de ĉiuj kultiveblaj teroj. Ĉiu tri jaroj efektiviĝis, antaŭa diskutado en estraroj kaj kunvenoj de najbaroj, la disdono de la teroj, kaj por eviti, ke tiu, kiu ricevus maltaŭgan teron aŭ for de la vilaĝo, ĉiam estus en malsupereco rilate tiun, kiu ricevus bonan teron aŭ proksiman al la loĝloko, oni tiel procedis por ke neniu ricevu la terojn, kiujn li kultivis en la antaŭa disdono. Per la procedo ĉi tie plenumita, ĉiu kamparano alternative laboris malbonajn aŭ bonajn terojn, proksimaj aŭ malproksimaj al la urbo, laŭ tiuj, kiujn li ricevis per la disdono. Nun, ĉio ĉi malaperis. Kiu ricevis aŭ forprenis bonan teron aŭ proksiman al la vilaĝo per la disdono, pli bone vivas, malpli laboras kaj akiras pli da profiton ol kiu ricevis malbonan teron aŭ for de la loĝloko.

Okazas, ke teroj antaŭe kultivitaj, restas hodiaŭ nekultivataj, ĉar estas for de la loĝantaro aŭ havas malabundan produktokapablon kaj, ĉar tiu, kiu ilin kultivas, ne havas esperon plibonigi sian kondiĉon per posta disdono, forlasas ilin kaj foriras. Kaj ni ne parolu pri la multaj terkulturistoj ĉagrenataj de la starigita sistemo.

—Kial vi ne depostulas al Moksvo? —Ni al ili diris—. Helpu vin per la rajto de aŭtonomeco. Eble vi atingos, ke oni vin respektos.

—Ni jam depostulis —ili al ni diris—; sed faris neniun progreson. Kaj krome, pasas tiom da tempo antaŭ ol atingi la plej mallongan respondon, ke estas preferinde lasi la aferojn tiel, kiel ili estas. Krome la disciplino de la partio kaj eviti, ke la kontraŭrevolucio levu la kapon, devigas cedi kaj prisilenti multajn aferojn.

En Saratov ni vizitis komunisman propraĵon, kion ĉi tie ni nomas farmobieno de la regno. Ni iris esperante vidi ion starigitan, kiel veran komunismon.

Jen kion ni povis scii pri ĝia organizo.

La "Komunisma Propraĵo" estis malnova Farmobieno de unu el la plej riĉaj bienuloj de la regiono.

Farita la revolucio la Soveto de Saratov konfiskis la Farmobienon kaj nomumis direktiston kaj agronomon por la ekspluatado.

La fiksaj laboristoj enspezis salajron de du mil rubloj monate kaj la "payot"-on (la porciumon). La provizoraj havis la porciumon kaj 75 ĉiutagajn rublojn.

La direktisto rajtis maldungi ajnan laboriston, kiam tiel tion opiniis konvena, donante al li nenian klarigon kaj per antaŭavizo de nur ok tagoj, kaj la laboristoj estis devigitaj ĉiutage labori ok horojn, kiel en ajna industria entrepreno.

Mirigita pro ĉi tiuj klarigoj, mi diris al Lozovski, ke ĉi tio havis nenion de komunismo, ke estis egale al tiom da industrioj ĝis tiam vizititaj de ni. Li respondis al mi, ke ĉi tio estis provo de komunismo. Mi restis konfuzita pro la respondo kaj la provo de komunisma organizo.

Kaj rimarku, ke por viziti la "Komunisman Propraĵon" kaj koni ties organizon, ni veturis ĉirkaŭ dudek kilometrojn per kamiono kaj sur neveturebla ŝoseo.

En Saratov, kiel sufiĉe grava industria loko kaj, ĉar ĝi estis urbo, kie koncentriĝis ĉiuj produktaĵoj de regiono riĉega en cerealoj, kio ĝin klasifikas, kiel unuarangan loĝlokon, la akceptoceremonioj estis senfinaj.

Vizitoj al oficialaj sidejoj; militistaj paradoj kaj marŝadoj; vizitoj al fabrikoj kaj industrioj, paroladoj, politikaj amaskunvenoj kaj la kutima bando de muziko, kiu neniam nin forlasis, kiam ni alvenis en ajna urbo, per ĝia Internacio ĉiumomente.

La du tagoj, kiujn ni pasigis en Saratov estis vivoplenaj kaj profitdonaj. Nur unu afero al ili mankis por plenigi nian

ambicion. Ke la popolo, la vera popolo, ne tiu, kiu nin servis, kiel sekvantaro kaj ĥoro dum niaj vizitoj, akceptoj kaj amaskunvenoj, ankaŭ intervenintus en la festoj kaj partoprenintus en la elmontradoj de kontento kaj ĝojkriado, kiujn ni ŝajnis prezidi per nia ĉeesto.

En Saratov, kiel ni jam diris, forlasis Volgon, kun granda malĝojo miaflanke kaj eniris en la saman trajnon, kiu nin veturigis de Moksvo al Nĵni Novgorod, kiu ĉi-intence estis direktita al Saratov.

Ni deiris je la dua tago de restado, jam nokte, al Tula. Ankoraŭ mankis multaj tagoj por ke la Kongreso komencu siajn taskojn. Tial ne nin urĝis alveni en Moksvo kaj ni elektis viziti Tula-on.

Tula ankaŭ estas sufiĉe grava industria loko. La industrioj estas por la milito kaj tie oni fabrikas la samovarojn.

Ni vizitis la fabrikojn de kartoĉoj, kies laboristoj estis fervoraj kaj konvinkitaj kontraŭbolŝevikoj.

Tri monatoj antaŭ nia vizito, ili okazigis strikon, kiun perdis, tial la bolŝevikoj al ili altrudis maljustajn kondiĉojn kiam ili revenis en la laborpostenon, krome estis kondamnitaj al punoj variantaj inter unu kaj ok jaroj de malliberejo tridek kvin strikintoj konsideritaj, kiel iniciatintoj de la konflikto.

Estos ĝuste averti—ĉar mi ĉiam serĉas la plej absolutan senpartiecon kaj por ke ne devojiĝu la juĝo de niaj legantoj—, ke oni ne prenu laŭ ĝia krudeco, nek kiel armilo por batali kontraŭ la bolŝevikoj, la aferon de la kondamnoj pro la striko de la fabrikoj de municioj de Tula.

Ni parolante klare opinias, ke al ni ŝajnis malmola kaj misproporcia la kondamno, kiun la Soveto altrudis; sed ni

ankaŭ diras, ke la striko ne havis pravigon, krome ĝi tiam havis kontraŭrevoluciajn efikojn.

La laboristoj de la fabrikoj de municioj de Tula, jam dum la carismo, ĝuis privilegiojn kaj avantaĝojn, kiujn ne ĝuis la laboristoj de aliaj fabrikoj. Ĉi tiuj avantaĝoj estis ankaŭ observitaj de la sovetia Registaro, laŭ la taŭga kaj ebla proporcio de la salajroj kaj kondiĉoj, kiuj por la cetero de la laboristoj aplikiĝis.

Kaj ĉar ili ĝuis ĉi tiujn avantaĝojn kaj estis en kondiĉoj de supereco rilate la ceteron de la laboristoj de la tuta Rusujo, kiu kialo pravigis la okazigon de ĉi tiu striko?

Sed estas alia kondiĉo, kiu ankoraŭ pli gravigas la teruran cirkonstancon, kiu ĉirkaŭis tiun strikon.

Ni jam diris, ke la fabrikoj de municioj de Tula estas la plej gravaj de la tuta Rusujo, kio pli-malpli volas diri, ke ili estas la solaj, kiuj ekzistis en Rusujo por la fabrikado de kartoĉoj, bajonetoj kaj mallongaj armiloj de la Armeo, tial estis la solaj provizantoj de ĉi tiuj militmaterialoj. En ĉi tiuj fabrikoj oni interkonsentas striki kaj proponi la konflikton, kiam la provoko de milito de Pollando al Rusujo estis io, kion ĉiuj antaŭvidis. Ĉu ne estis ĉi tio lasi la Ruĝan Armeon sen denfendrimedoj antaŭ la malamiko?

Ni ĉiam diru, ke tiun strikon ne eblis defendi en tiuj momentoj.

Ne ĝin pravigis la konkero de plibonigoj, ĉar la situacio de tiuj laboristoj estis pli bona ol tiu de ĉiuj laboristoj de la Sovetia Rusujo. Kaj male, per ĝia okazigo, povus okazi la invado de Rusujo fare de la reakciaj armeoj.

Oni ĉiam povos riproĉi, kiel ekscesan la kondamnon, kiun oni altrudis al la tridek kvin laboristoj konsideritaj, kiel iniciatintoj de la striko; sed la konduto de ĉi tiuj, kiel tiu de ĉiuj iliaj samfabrikanoj, estis nek oportuna nek justa.

Kiel ĉefmajoro de la sektoro de la fortoj de la Ruĝa Armeo, kiuj vigladis kaj deĵoris en la fabrikoj de municioj estis anarkiisto, membro de unu el la anarkiistaj grupoj, kiuj ekzistis nuntempe.

Ni volis paroli kun li; sed li ne sciis paroli la francan, nek ni la rusan aŭ la anglan, kiuj estis la lingvoj parolataj de li kaj pro tio neeblis al li fari demandojn pri la vero de la okazintaĵo.

Tamen, ne per li sed per junulino de la loĝloko, kiu bone parolis la francan, ni povis interŝanĝi opiniojn pri la situacio de la lando.

La esprimmaniero de ĉi tiu junulino tuj rimarkigis al ni, ke ni estis ĉe persono nenio favora al la bolŝevikismo kaj al la revolucio mem, tial ŝiaj eldiraĵoj kulpis pri la sama partieco, ke la oficialaj kaj duonoficialaj, kvankam laŭ tute kontraŭa senco.

Ŝi al mi konfirmis la opinion, kiun mi ekformis pri tio, kion la rusa popolo, tiu de la loĝlokoj vizititaj de ni, opiniis pri ni. Ili diris, ke ni estis kelkaj individuoj, kiujn la bolŝevikoj dungis en Eŭropo, pagante nin malavare, por ke ni reprezentu la rolon de delegitoj de la tutmondaj socialistoj kaj komunistoj kaj, ke pro tio la popolo tenis sin for de ni kaj interne ridis pro la farso, kiun reprezentis unuj kaj aliaj. Ĉi tiu aserto estis ree konfirmita de multaj personoj, kiujn mi vizitis en Moskvo. Nu, ne estis elpensaĵo de mia interparolantino, estis vero, kiun ĉiuj aŭ la plimulto de la popolo tute kredis. De Tula—kaj kiel ni ankoraŭ havis tempon— ni iris al Ivanovo-Vosnosiensky, fama teksa industria loko, konita kiel la rusa Manĉestro.

Mi preterlasas, por ne lacigi la atenton per ripetoj, la priskribon de la oficialaj akceptoj, kiuj ankaŭ estis brilegaj.

En la sidejo de la oficiala Soveto de la urbo, ni parolis kun ĉiuj ĝiaj estraranoj, al kiuj ni faris demandojn pri la ekonomia kaj politika situacio de la regiono.

—La ekonomio —ili al ni diris— estas ege malbona. El la centoj da teksaj fabrikoj, kiuj lokiĝas en la urbo kaj la provinco, apenaŭ laboras du dekoj kaj eĉ ne tre intense. La plimulto de la teksaj gelaboristoj devis elmigri, dediĉi sin al aliaj laboroj, se trovas laborpostenon aŭ suferi multan malsaton kaj mizeron pro manko de rimedoj.

Politike, la Soveto fieris esti Ivanovo-Vosnosiensky unu el la plej firmaj apogiloj de la bolŝevikismo.

—Ĉi tie, en nia loĝloko —ili al ni asertis— stariĝis la unua rusa Soveto la jaron 1905, kiam okazis tiu grandioza revolucia movado.

Ankoraŭ sin decidis neniu politika partio starigi ĝin, kiam ni ĵetis la iniciaton.

Ĝuste nun, el la ĉi-tiea Soveto, oni nomumis plurajn kamaradojn por prezidi tiujn el kelkaj gravaj regionoj de Rusujo, tiun de Saratov inter ili. Estas pruvo de la konfido, kiun la partio al ni donas; kaj ni, obeante ĝiajn ordonojn, respondas per la sama lojaleco.

Pro nia demando, ĉu jam en 1905 la bolŝevikismo superregis en Ivanovo, ili respondis al ni, ke ne; tiam estis la menĉevikoj kaj la revoluciaj socialistoj, kiuj superregis. "Eĉ nun —ili asertis—, en la revolucio de marto kaj novembro 1917, estis ĉi tie la plimulto; sed la komunista partio liberiĝis de ili. Iuj komunistiĝis; aliaj foriris. Ni estas tre severaj kun ĉi tiuj kontraŭrevoluciuloj".

Ni deiris tiun saman nokton de Ivanovo Vosnosiensky kaj sekvatage, 14-an de julio je la dekunua matene, ni alvenis en Moskvo.

Dum la 14 tagoj, kiujn daŭris la ekskurso, ni trairis centojn da kilometroj, vizitis rusajn urbojn, vilaĝojn kaj vilaĝetojn, partoprenis en pli ol tridek politikaj amaskunvenoj kaj vidis iujn el la fundamentaj eraroj de la rusa komunismo kaj la terurajn difektojn de la komunista centralizado.

Sed tio, kio pli min impresis estis la vizito al la lernejoj-ĝardenoj de Simbirsk.

Kiam tie oni al mi certigis, ke nur la filoj de la komunistoj rajtis ĉeesti en la lernejoj-ĝardenoj, ĉar estis iliaj gepatroj, kiuj faris la revolucion, la konturo de iu burĝaro tiom aŭ pli avara kaj kruela ol tiu detruita, kaj ĉiam pli interesata, ĉar ĝi estis nova kaj bezonis plisolidigi sian superregadon, aperis en mia menso per la rapideco de tiuj vizioj, kiujn oni neniam forgesas. Kiom mi volus esti erara! Kiom mi dezirintus, ke tio nur estintus io kaŭzita de la fantazio impresita de la antaŭjuĝoj, kiujn la deviga kunvivado sub kapitalisma reĝimo povus krei en mi!

Mi ankaŭ mencios publikan merkaton, kie oni faris ĉiajn komercajn interŝanĝojn per mono kaj naturaĵoj proksiman al la elŝipejo de Simbirks.

La plimulto de la komercistoj estis de islama origino, loĝantoj en la regiono. En la merkato estis ĉio. Ne en granda abundo, sed estis ĉio.

Mi mem aĉetis sandalojn de la lando kontraŭ ok mil rubloj, kaj ili estis de la plej malmultekostaj.

Panon, farunon, viandon, sekajn guŝojn, ladaĵojn, merceron, ĉion oni povis trovi en tiu semajna merkato, kvankam tio pli abunda estis la vestoj kaj ĉefe la ŝuoj.

Ni ripetu per unu fojo por ĉiam, ke la malpureco kaj neglektado viditaj sur la stratoj de Petrogrado kaj apenaŭ duonviditaj en Moskvo, estis la elstara noto en ĉiuj loĝlokoj, kiujn ni vizitis.

En Saratov estis nepriskribebla. La amasoj da rubaĵoj kaj ĉiaj forĵetaĵoj estis kontinuaj. Estis stratoj sur kiuj la cirkulado, pro la naŭzaj odoroj, preskaŭ neeblis.

Kelkaj grupoj de delegitoj apenaŭ eniris en straton, tuj turniĝis kaj rapide malantaŭeniris. Tiaj estis la malbonodoro kaj haladzo, kiujn oni enspiris.

Se la stratoj ne estintus tre larĝaj kaj la domoj malaltaj (de unu aŭ du etaĝoj tiuj de plej granda alteco) la loĝebleco en tiuj loĝejoj neeblintus.

Multaj domoj cedis aŭ estis ĉe la rando de la ruino, ĉar oni ne povis ripari ilin pro manko de materialoj kaj ĉi tiu neeblo kaj la fakto, ke multaj aliaj estis konfiskitaj de la lokaj Sovetoj, sen tio, ke ili povis esti loĝataj pro la konfisko, faris, ke multnombraj familioj vivis amasigitaj kaj en eta spaco, ĉar se ili ne atingis la permeson de la loka Soveto por loĝi en domo, ne estis rimedo havi ĝin; kaj ĉi tiu permeso kostis, kiom oni ne povas imagi, atingi ĝin.

Multe nin interesis demandi ĉu la homoj prizorgis lerni legi kaj skribi; ili al ni asertis, ke jes; kvankam la atingitaj rezultoj ne estis tiel brilaj, kiel en Moskvo kaj Petrogrado. La plimulto, turmentita de la malabundeco de nutrado kaj puŝitaj havigi al si la ĉiutagajn nutraĵojn, formetis la kulturon en duan lokon.

La tre homa deziro konservi la propran ekziston deprenis meritojn al la kultura verko.

Interesega observo: ni surstrate vidis neniun ebriulon. Kaj konata estas, ke la alkoholismo kaŭzis en Rusujo grandajn detruojn; la bolŝevikismo povis fieri pri ĉi tiu venko.

4a. Ree en Moskvo

Forlasi la stacidomon por direkti nin al la hotelo, kiam ni revenis en Moskvon, estis tre malfacile. Mesaĝoj kaj avizoj; aŭtoj, kiuj anoncas sin sed ne venas; neeblo forlasi la stacidomon ĝis oni donos la ordonon. Ni rezignaciis atendi, kion alian fari?. Finfine, post kvar horoj atende, venis pluraj aŭtoj kaj tri kamionoj. Ĉar ne estis sufiĉe da komfortaj veturiloj por ĉiuj, okazis kruda kaj abomena sceno. La enirklopodo en la aŭtojn estis tiel krudaĉa, ke ne povis enaŭtiĝi tri el la ses virinoj, kiuj estis en la sekvantaro.

Iu riprocîs al la impetantoj ilian malĝentilaĵon kaj krudecon, protestante kontraŭ tiu impeta atako fremda al viroj, kiuj iom respektis sin kaj kelkaj elaŭtiĝis.

La aliaj sidiĝis, kiel ni plej bone povis en la kamionoj.

La vivo en la hotelo ne ŝanĝiĝis. Nur ni renkontis pli da kamaradoj delegitoj; angloj kaj francoj. Oni anoncis la venon de aliaj, inter kiuj estis la antaŭtempe forpasintaj Vergeat, Lepetit kaj Lefevre, kaj kelkaj germanoj; oni eĉ parolis pri delegito de la hispana Komunista Partio.

Nia vivtenado estis grandioza. Tiusence ni estis la aristokrataro.

Ni faris kvar manĝojn ĉiutage. La matenmanĝo, kiu konsistis el peco de fromaĝo, pano kaj teo.

La tagmanĝo, je la dekdua, konsistigita de supo de guŝoj, plado da faruno de mileo, alia plado da viando, anaso ĝenerale, pano kaj teo.

Vespermeze, alia porcio el fromaĝo, pano kaj teo. Tiel en la porcio de la mateno, kiel en tiu de la vespermezo, la

fromaĝo estis ofte anstataŭata de la kaviaro, nutraĵo farita kun premitaj frajoj de sturgo, tre estimata en Rusujo kaj ĉiuj landoj de la Nordo.

Nokte, je la deka, ni vespermanĝis. La vespermanĝo kutimis konsisti el la samaj pladoj, ke la tagmanĝo.

Ĉiutage oni al ni disdonis paketon de cigaredoj kaj alumetskatolon ankaŭ al la ne fumantojn.

Ni ankaŭ disponis banejon, barbiron kaj plurajn aŭtojn por kiam ni bezonos translokiĝi al la Kremlo aŭ aliloke. Veras, ke la misuzo, kiun iuj delegitoj faris de la aŭtoj, senigis aliajn povi uzi ilin, kiam ili ilin bezonis. Ni devas diri, ke ni ĉiam preferis piediri. Estis pli oportune kaj oni ne retenis la aŭtojn por servoj, kelkfoje distraj. Nur tiel pensis ni kaj aliaj malmultaj delegitoj.

La kunvivado en la hotelo nin penetrigis en la psikologion de multaj el kiuj volis esti la estontaj diktatoroj de la proletaro de Eŭropo.

Estis tiuj, kiuj ĉiutage uzis la friziston kaj se ĉi tiu ne komplezis ilin laŭ iliaj gustoj, traktis lin sen konsidero, kun la risko de lia forpelo de la laboro. Iu estis, kiu plendis al la Majoro, kaŭzante al la servanto severajn kritikojn fare de la hierarkia superulo.

Ankaŭ ne mankis tiu, kiu ĉiunokte lasis siajn botojn en la koridoro, kiel estas kutimo en la hoteloj de Eŭropo, por ke la "kamaradoj" de servo ilin purigu kaj poluru, kun la sekva dankado per admonoj fare de la "komunista kamarado" delegito, kiam li malkovris en siaj ŝuoj la plej malgravan neglektaĵon.

Ankoraŭ restis aliaj pli abomenaj. Ekspluatante la malsato, kiun suferis la virinoj komisiitaj de la purigo de la hotelo, ili al ili petis specialajn servojn kontraŭ parto de la porcio, kiu al delegitoj respondis. Kiom da moralaj mizeroj!

Kaj tiuj estis, kaj ankoraŭ estas iuj, la daŭrigantoj de Lenino en la apostoleco de sociala regenerado!

Kiel estis tre varme kaj preskaŭ ĉiuj surportis vestojn por vintro, la Komitato de la Tria Internacio havis la ĝentilaĵon disdoni inter ni kelkajn "rubaska"-ojn aŭ tipajn bluzojn de la lando; kaj al kelkaj delegitoj, kiuj, pro la malfacilaĵoj, kiujn ili suferis por alveni en Rusujo, tion faris senigitaj de rezerva vesto, oni transdonis la bezonan. Al ĉiu, kiu tion deziris, oni transdonis ankaŭ sandalojn. Ĉi tiu disdono, kiu deprenis la eblon ricevi iujn vestaĵojn— kiujn bezonis pli ol ni la homoj de la lando, ĉar ni, revenonte al Eŭropo, povus provizi al ni ĉion—, ellasis la avaron de iu, ĝis la ekstremo peti vestaĵon por siaj filoj, kiuj estis en Eŭropo.

Estis alia, kiu, ĉar al li faliĝis la horloĝo sur la plankon kaj plu ne funkciis, sieĝis Zinovjev-on dum ok tagoj por ke oni al li donu alian.

—Mi rompis la mian —li diris—, juste estas, ke oni al mi donu alian.

Kaj por fini kun ĉi tiuj moralaj mizeroj: mi neniam forgesos, ke delegito de la Germana Sendependa Socialista Partio plendis al Lenino pri la manĝo, kiun oni al ni donis, dirante, ke tio "estis naŭzaĵo", kiam, mi devas ripeti ĝin, nia nutrado reprezentis enorman penadon pro la rimedoj disponeblaj de la lando kaj la registaro.

Kiuj tiel agadis tie, senĉese ĝenante per plendoj kaj depostuloj al la Komitato de la Internacio, kaj kiuj agadis per burĝa pensmaniero, kiam ankoraŭ estis nenio, kion ili farus kaj kiel ili agadus morgaŭ se revolucio al ili donus la Potencon en la lando, kiun ili reprezentis? Kaj krome ĉiuj ili estas kiuj tiam diris en Moskvo kaj ankoraŭ ripetas en

Eŭropo, ke ni havas la pensmanieron de etburĝoj. Kia cinikeco!

* * *

La aspekto de Moskvo estas tiu de ĉefurbo laŭ kontinua kaj ekscitata movado.

La restado de la Registaro kun la miloj da burokratoj ĝin ĉirkaŭantaj, faras, ke la vivo ege intensiĝis, kio evitas, ke Moskvo donu egalan senton de mizero, kiu kaŭzas la observon de la aliaj urboj de Rusujo. En Moskvo ĉi tiu sento nur estis pli malforta.

La malpuraj kaj forlasitaj stratoj, plenaj de krateretoj, neveturebla j, malfaciligis la trafikon de la oficialaj veturiloj.

Multaj konstruaĵoj aŭguris ruinon. La Registaro konfiskis kaj fermis ilin; iuj kun varoj kaj komercaĵoj kaj ili tiel restis ankoraŭ. La varoj, kiuj ne estis ŝtelitaj, putriĝas kaj difektiĝas interne.

Estis elstara noto vidi iujn montrofenestrojn de butikoj de graveco antaŭ la revolucio, kiuj ankoraŭ konservis, kvankam kovritaj de densa tavolo el polvo, la objektojn, kiujn tie elmetis la komercisto por altiri la atenton de la aĉetonto.

En kelkaj montrofenestroj oni vidas objektojn de nepra utileco kaj, kiujn oni ne trovas en la sovetaj deponejoj; sed tiujn videblajn kaj tiujn stokitajn ene oni ne povas tuŝi, ĉar la statistiko ne estas farita kvankam antaŭ kvar jaroj oni ĝin komencis. Ni diris "kiuj estas ene", kiam ni pli ĝuste devis diri "kiuj devis esti", ĉar oftas ke, kiam laŭ la statistikoj oni tuj disponos la varojn stokitajn en la ejo, oni trovas la lokon, kiun ili okupis, sed ne la varojn.

Kaj meze de tiom da fermita konstruaĵo kaj sen ia utileco, oni vidis dum la nokto grupojn de personoj

dormantaj sur la planko kaj en la framoj de la pordoj, ĉar ili ne havis loĝejon.

Alia elreviga spektaklo kaŭzanta perdon de grandega kaj konsiderinda tempo, estis tiu okazanta, kiam la disdonoj de nutraĵoj eksterordinaraj, vestaĵoj aŭ biletoj de fervojo. Ĉefe ĉi tio lasta estis io, kio altiris la atenton de kiu ne volas fermi la okulojn antaŭ la realo.

En la stacidomoj, samkiel en la centraj vendejoj de biletoj kaj vojaĝpermesoj, la homvicoj estis konstantaj. Ne maloftis vidi ilin el kvincent kaj pliaj personoj. Estis kiu devis pasigi du kaj tri tagojn antaŭ ol povi akiri bileton. Kaj ĉar ne eblis forlasi la vicon por ne perdi la lokon, aŭ ili devis manĝi kaj dormi sur la planko, aŭ anstataŭigi sin per iu alia persono. Ĉi tio pli oftis.

Ĉi tiu burokrata malrapideco en la disdono de nutraĵoj, vestoj, aliaj produktaĵoj kaj biletoj, kaŭzis sufiĉe profitdonan industrion: tiun de la eternaj konstantuloj en la atendovicoj.

La persono, kiu havis iun ateston kun rajto al eblo de vestaĵoj, nutraĵoj aŭ biletoj, kaj ne povis aŭ ne volis fari atendovicojn, akordiĝis kun profesiulo kaj, per rekompenco, ĉi tiu restis en la vico anstataŭ la interesato. Ĉar ili devis esti tie anstataŭ unu, al ili estis indiferente resti anstataŭ kvar aŭ kvin kaj per ĉi tiuj kvar aŭ kvin ili sekurigis al si tagsalajron.

Ne kreu, ke ĉi tiu profitdona tasko —ĉar estis kiu enspezis multe pli per ĝi ol li enspezus laborante— ne estis peniga. Oni bezonis havi specialan temperamenton por efektivigi ĝin. Krom kio signifas pasigi horojn kaj horojn atende, la malpureco de la ejoj kaj la intermiksado inter homoj plenplenaj de parazitoj, faris ĝin pli peniga kaj naŭza.

Pro kuriozeco, ni iutage eniris en unu el la biletvendejoj instalita sur la Placo de la Opero de Moskvo, ĉe la malnova hotelo Metropolitano, kaj kvankam estis

momento, kiam la homvico estis konsistigita de pli-m.alpli cento da personoj, la atmosfero estis preskaŭ nespirebla.

La planko, kiel la muroj, preskaŭ kaŭzis naŭzojn, kaj tie, kaj atende, devis pasigi la profesiuloj de la atendovicoj horojn kaj horojn por atingi bileton.

Ĉi tiujn mallongajn vojaĝojn kaj esplorojn ni faris ignorante ĉiun oficialan informon aŭ la gvidantojn kaj interpretistojn, kiujn en la hotelo oni al ni proponis.

* * *

La preparadoj por la malfermo de la Kongreso plu daŭris per nekutima aktiveco.

La alveno de eksterlandaj delegitoj tiel, kiel de la interno de Rusujo, donis aktivecon kaj vivecon al la ĉefurbo.

En la hotelo “Dielavoy Dvor” oni aŭdis paroli ĉiujn lingvojn kaj vidis vizaĝojn, kiuj montris rasajn diferencojn.

La antaŭaj kunvenoj, kiujn la Plenuma Komitato de la Tria Internacio okazigis, ĉiutage estis pli interesaj kaj pasiigitaj. Oni duonvidis en ili tion, kio poste dividos la socialistajn laboristojn de la mondo.

La fermita kaj dogma kriterio de la rusaj aŭtoritatemaj komunistoj cedis nenion. Protektitaj de la aŭreolo de la revolucio, ili altrudis, ne konsilis, sian politikon.

La insulta kritiko, la sarkasmo kaj tio pli malsimpatia, la malmodesteco, kiun ili atribuis sin, ĉar ili estis la solaj, kiuj faris la revolucion, estis iom post iom preparante la terenon por la rompo, kiun en la socialisma kampo kaŭzos la famaj dudek unu kondiĉoj de Moskvo[6].

Dume ni, pli atentaj al la deziro koni la realon ol interveni en kvereloj de partioj, ne ĉesis trairi la stratojn,

6 NeT. Vidu la aneksaĵon kun la traduko de la dudek unu kondiĉoj.

viziti duonoficialajn aŭ oficialajn ejojn, demandi, enketi, penetri la misteron, en kiu la malkono de la lingvo nin enfermis, por alproksimigi nin tio plej ebla al la realo.

Finfine, la 17-an de julio, oni anoncas al ni, ke du tagojn poste deiros ĉiuj delegitoj al Petrogrado, ĉar kiel Petrogrado estis la naskiĝejo de la revolucio, ili al ĝi volis fari maksimuman omaĝon de simpatio kaj admiro, okazigante en tiu ĉefurbo la malfermon de la Kongreso per serio de festaĵoj kaj de artaj spektakloj, kiuj tiucele estis preparitaj. En Petrogrado nur okazos la malfermkunsido kaj poste la Kongreso plu daŭros en Moskvo, kien ni revenos la 21-an.

La preparadoj por la vojaĝo de la delegitoj rapide plenumiĝis, ne sen tio, ke komence estiĝis afero de konkurado.

Zinovjev opiniis, ke, kiel ni estis delegitoj al la dua Kongreso de la Internacio, estis ĉi tiu, kiu devis organizi la vojaĝon, dum Trockij, rimarkigante la malsekurecon de la lando kaj la eblon de atenco kontraŭ niaj personoj fare de la kontraŭrevoluciuloj, opiniis, ke estis la Komisararo por la Milito, kiu devis prenis sur sir la organizon de la vojaĝo kaj nian personan sekurecon.

Triumfis Trockij kaj estis la Komisararo por la Milito la organizanto de la vojaĝo.

Oni komunikis al ni, ke la eliro de Moskvo efektiviĝos la 19-an de julio je la dua posttagmeze, per speciala trajno, por alveni en Petrogrado je la deka matene de la 20-a, dato de malfermo de la Kongreso.

Je la dekdua tagmeze de la tago elektita por la deiro ekalvenis aŭtoj al la hotelo “Dielavoy Dvor” por veturigi la delegitojn.

Sur la vojo kaj je prudentaj distancoj, patroloj de soldatoj efektivigis atentan vigladon.

En la ĉirkaŭaĵoj de la stacidomo la patroloj estis pli multnombraj kaj neebligis la publikon alproksimiĝi al la ĉefa pordo. La ordonoj estis nekontesteblaj.

Sur la internaj kajoj nur estis delegitoj, membroj de la sekvantaro. Ĉi tiu estis multnombrega.

La eksterlandaj delegitoj estis ĉirkaŭ sesdek. Kaj por la grupo estis du specialaj trajnoj, kiuj pleniĝis kaj eĉ estis iu, kiu malkomforte vojaĝis.

Sur la kajo ni konatiĝis Kamenev-on, Rikov-on, Rakosky-on kaj aliaj elstaraj komunistoj.

La tuta irvojo estis gardita de la armeo. Interspacige, du gardostarantoj, unu je ĉiu flanko de la vojo kaj armilo je la brako, senĉese vigladis. Sur la pontoj estis du gardostarantoj je ĉiu ekstremo.

En ĉiuj iom gravaj stacidomoj haltis la trajno kaj ni estis akceptitaj per la taktoj de “La Internacio”, kiu matematike sonis apenaŭ ekeniris la trajnon en la stacidomon.

En kelkaj stacidomoj oni utiligis la haltojn de la trajnoj por improvizi politikajn amaskunvenojn.

Kiam noktiĝis, ni spiris. Ni kredis, ke ĉiuj tiuj spontaneaj ceremonioj preparitaj de la Komisararo por la Milito, ne nin ĝenos plu. Granda eraro!

Ĉe tagiĝo, kaj kiam la delegitoj trankvile dormis, la bandoj de muziko kaj la lokaj Sovetoj neatendite eniris en la stacidomojn ekludante "La Internacion" kaj farante tre laŭtajn huraojn! al la Tria Internacio.

Estis iom ridindaj kaj groteskaj tiuj malĝustatempaj apoteozoj. Sed la ordono estis nekontestebla. La sovetia ŝtato tiel tion disponis por ke la Komisararo por la Milito povu konfirmi sin, kiel perfektan organizanton.

5a. Akcepto, malfermo de la Kongreso, politikaj amaskunvenoj kaj aliaj festaĵoj.

Ni jam estas en Petrogrado.

La kajoj de la stacidomo estis plenplenaj de homoj. Ĉiuj komunistoj de Petrogrado, kun la Soveto ĉekape, ĉeestis tie.

Krome la singardecoj kaj la manio doni al ĉio tio militistan nuancon kaj de perfekta organizo malfaciligis la cirkuladon.

Ĉiuj oficialaj kaj duonoficialaj institucioj sendis delegitaron, kio entute nombris kelkajn centojn da personoj enfermitaj en la mallarĝa limo de la stacidomo.

Iom post iom organiziĝis la sekvantaro.

La tuta Komitato de la Tria Internacio metis sin ĉekape. Poste, la diversaj komunistaj gravuloj; tuj poste, la delegitoj kaj, malantaŭe, ĉiuj standardoj de la organizoj de la urbo.

Ha! Ankaŭ ĉeestis tie la bandon de muziko, kiu, apenaŭ organizita la sekvantaro, ekludis "La Internacion".

Sed ĉio ĉi devis okazi sur la malkovritaj kajoj, dum la subtila pluvo iom post iom penetris en nian veston. Vere estis malmulte komforta kaj interesa tiel amaso de apoteozaj kaj laŭregularaj stultaĵoj.

La sekvantaro ekmoviĝis kaj alveninte al la placo, kiu estas antaŭ la stacidomo, la spektaklo, kiun vidis niaj okuloj cetere estis ridinda kaj groteska.

Ambaŭflanke de la stacidomo, enkadrigitaj laŭ linioj konsistigitaj de "homoj kaj soldatoj" troviĝis ĉiuj geknaboj de la lernejoj de Petrogrado, kun bukedetoj de floroj kaj herboj en la manoj, trempitaj ĝis la ostoj, ĉar antaŭ pli ol du horoj ili estis kondukitaj tien.

De tempo al tempo tiuj infanoj kaj, kiam iliaj instruistoj tion ordonis, kriis huraon! al la Tria Internacio.

Malantaŭ la infanoj enviciĝis miloj da laboristoj de la fabrikoj, kiuj ĉesis labori pro superaj ordonoj. La laboristojn oni kondukis tien sub la zorgado de iliaj submastroj kaj Komitatoj de fabrikoj.

La vico konsistigita de tiuj etuloj kaj plenkreskuloj miksitaj laŭ la sama karaktero de senmalico kaj, ke dum du horoj stare eltenis la pluvon pro supera ordono, etendiĝis de la stacidomo al la palaco Smolny, oficiala sidejo de la Komitato de la Tria Internacio de Petrogrado.

Kompaton vekis vidi la infanojn kun la vestoj gluitaj al iliaj skeletaj korpoj, dum la akvo glitis sur la palaj kaj malgrasaj vangoj kaj kun la paskaj bukedoj en la mano dum ili kriadis la laŭregularajn kaj ordonatajn huraojn.

La tramoj, samkiel la plimulto de la privataj kaj publikaj konstruaĵoj sur la irvojo, estis ornamitaj kaj tegitaj de flagoj kaj ruĝaj tolaĵoj kun surskriboj koncerne la Trian Internacion kaj la unuiĝon de ĉiuj proletoj de la mondo.

Tra inter la homvicoj konsistigitaj de pli kaj malpli grandaj geinfanoj kaj per la kvieteco kaj malrapideco, per kiuj marŝas la multnombraj sekvantaroj, sub la senkompata kaj malbrua pluvo, ni estis alproksimiĝontaj al Smoolny.

La ĝardenoj ĉirkaŭantaj la Palacon de Smolny estis invaditaj de la publiko.

La krioj kaj huraoj! al la Tria Internacio kaj la Komunista Partio apenaŭ ĉesis momenton. La bandoj de muziko, ludante “La Internacion”, kompletigis la bildon.

Krom la deviga kriado, la vizaĝoj de tiu homamaso similis nepenetreblajn maskojn. Escepte de la entuziasmaj komunistoj, kiujn oni tuj distingis pro la aktiveco kaj gajeco pri kiuj ili donis pruvojn apenaŭ oni aŭdis iun vorton aŭ murmuron.

Oni tuj rimarkis la moralan perforton, kiu, por la grandega plimulto, signifis ĝian ĉeeston en tiu loko.

La eniro en Smolny kaj la aliro al la granda salono de la unua etaĝo, kie oni al ni preparis la tagmezmanĝon, estis malfacila. La centoj da personoj okupantaj la koridorojn interrompis la pason.

La aspekto de la granda salono estis mirblindiga.

Arte lokitaj ruĝaj flagoj kaj kurtenoj donis ĉarman karakteron al la majesto de la ejo.

Longaj vicoj el tabloj, kovritaj de blankaj tablotukoj kaj kun multnombraj pretaj servicoj, invitis ĉiujn sidiĝi.

En la fundo kaj en la centro de la salono staris tribuno sur kiu la jam elektitaj oratoroj devis paroladi.

Sidiĝi ĉe tablo el tiuj estis malmulte facila entrepreno. La metitaj servicoj estis ĉirkaŭ kvincent, sed la nombro da manĝontoj alproksimiĝis al du mil. Fine, post kelkaj kunpremiĝoj kaj ĝenadoj, ni povis taŭge sidiĝi.

Dum la manĝo, kiu estis bonega kaj abunda —se ni konsideras la malsaton, kiun suferis la loĝantaro, kiu eĉ ne panon trovis—, oni disdonis al ĉiu delegito banton el ruĝa veluro, insignon de la Sovetoj kaj medalon el arĝento stampitan en reliefo kun desegno koncerne la Kongreson kaj ties daton.

Je la momento de la paroladoj, Zinovjev estis la unua, sekvante lin poste Serratí, de Italujo; Paul Levi, de Germanujo, kaj tiel sinsekve ĉiu oratoro de la lando, kiu lin delegis.

Kiam ĉiuj ni jam leviĝis por iri al la palaco Tauride, malnova cara Dumao, kie devis okazi la malfermkunsido, bruega, longatempa, neesprimebla aplaŭdado, al ni faris fiksi la rigardon en la tribunon.

Lenino ĵus aperis.

Estis la dua fojo, ke ni lin vidis de post nia vizito en la Kremlo. Tiu subita, momenta, preskaŭ magia apero —multe pli se oni konsideras, ke li veturis per neniu el la du trajnoj kaj, ke ni lin supozis en Moskvo—, impresis ĉiujn nin, kiuj ne estis alkutimiĝintaj al la ĵonglaĵoj kaj geniaĵoj pri kiuj estas veraj majstroj la bolŝevikoj.

Finita la aplaŭdado, kiu estis kronita de tri huraoj!, Lenino ekparolis por mallonge diri, ke ni iru al la Palaco Tauride, kie la kunsido de la Kongreso komenciĝos tuj kiam alvenos la delegitoj.

La marŝo al la Palaco Tauride estis tiel peniga kaj impresa, kiel la antaŭa al Smolny.

La pluvo ree falis kaj la irvojo estis ĉirkaŭata de centoj da infanoj kaj homoj, kiuj devis firmapiede elteni ĝis la fino por fari la kutimajn kaj devigitajn huraojn!.

Atingi la aliron al la malnova salono de kunsidoj de la Dumao, estis heroaĵo de epopeaj karakteroj. Centoj da personoj grupiĝis en la koridoroj kaj salonetoj dezirante povi okupi lokon en la publika tribuno.

La delegitoj, al kiuj la insigno ĉie malfermis la pason, bezonis la helpon de la soldatoj por povi alveni ĝis la salono.

La atmosfero estis preskaŭ nespirebla. Kvankam la mateno estis pluva, oni povis senti la varmegon. Varmego trempita de malsekeco, pli ĝenega tiuokaze pro la troa ĉeesto de personoj.

Sur ĉiu el la seĝoj por delegitoj estis lokitaj la diversaj uzaĵoj, kiujn oni al ili destinis. Estis dokumentujo kun la surskribo de la okazigita ceremonia kaj la dato de la Kongreso, blokoj el papero por preni notojn, krajonoj kaj bindita volumo de la revuo "La Internacio".

La plimulto de ĉi tiuj volumoj estis skribitaj en la germana kaj la angla. En la franca apenaŭ estis iu ekzemplero.

Zinovjev formale komencis la Kongreson per salutparolado al la delegitoj, al ĉiuj malliberuloj kaj persekutatoj de la kapitalistaj kaj burĝaj registaroj en la mondo, dezirante, ke la proksima tria Kongreso de la Tria Internacio povu okazigi sin en Berlino, Vieno, Sofio, Parizo aŭ Londono, post la disfalo de la malaminda kapitalisma reĝimo kaj jam starigita la komunismo kaj la diktatorado de la proletaro.

Nur partoprenis en ĉi tiu malfermkunsido la delegitoj, kiujn la Komitato antaŭe nomumis. Ĝi finiĝis per parolado en la rusa de Lenino, kiun oni ne tuj tradukis al iu lingvo, ĉar jam estis tro malfrue.

En kio estis malnova kukejo kaj salono-kafejo de la Dumao, oni al ni servis manĝon propran de princoj, se ni konsideras la tiaman rusan situacion.

Finita la manĝo, ni deiris al ebenaĵo de unu el la kvartaloj de la ĉefurbo, elektita loko por la inaŭguro per nia partopreno de monumentoj kaj placo alegoriaj al la revolucio.

Finita ĉi tiu ceremonio, ni revenis al la urbcentro por iri al la placo Ouritzky, antaŭe placo de Vintro, kie devis okazi grandioza internacia politika amaskunveno, por kio oni starigis tribunon antaŭ la ĉefa pordo de la Palaco de Vintro.

La homamaso kunvenigita sur la placo nombris multajn milojn da personoj kaj, pro la tribuno stariĝis apud la fasado de la Palaco mem, oni tuj rimarkis, ke la plimulto de la publiko ne aŭdos la oratorojn.

Oni evitis la malfacilaĵon improvizante tribunojn sur aŭtoj, kiujn oni lokis sur pluraj ekstremoj de la placo.

Finita la amaskunveno ni iris al la Palaco de la Laboro, en unu el kies salonoj oni al ni servis la vespermanĝon kaj ni povis malrapide viziti la konstruaĵon kaj la diversajn organizojn kaj instituciojn en ĝi lokitaj.

Inter la novaj institucioj vizititaj estis la Ritma kaj Deklama Klubo. Oni instruis al la gelernantoj ritmajn dancojn, plastikon kaj deklamon.

"La nombro da lernantoj komence estis konsiderinda—al ni diris unu el la instruistinoj—sed ĉiutage malpliiĝas. Ne okazas, ke malpliiĝas la inklino, nek mankas amo al la ritmaj kaj deklamaj artoj; estas la ekonomia bezono, la devo perlabori neprajn elementojn por la vivtenado, kio malpliigas la lernantojn.

"Ĉi tie en la klubo —ŝi plu parolis— oni donas porciumon al ĉiuj ĉeestantaj gelernantoj; sed unu porciumo ne sufiĉas por ilia vivtenado kaj ankoraŭ malpli por tiuj el niaj gelernantoj, kiuj havas familion aŭ iun, kiun flegi, kio oftas. Ni tamen esperas, ke ĉi tiu situacio pliboniĝos kaj, ke niaj lernantoj revenos por krei veran generacion de eminentaj artistoj."

En la fundo de la salono oni starigis tabulscenejon, sur kiu bando de muziko agrabligis la vespermanĝon per

elektita koncerto, komencante kaj finante ĝin per "La Internacio", kiun la plimulto de la ĉeestantaj delegitoj akompanis kantante la tekston kaj, kiun ĉiuj stare aŭskultis. La elprovitaj komunistoj ĝin akceptis salutante militiste.

En pluraj de la paŭzoj, duopo, kiu dancis tipajn rusajn dancojn, permesis al ni koni multajn el la lando. Ne necesas diri, ke ĝi komplezis al ĉiuj ni pro la noveco de la spektaklo por iuj kaj la arto per kiu ili estis plenumitaj por ĉiuj.

Oni diris al mi, ke la dancinta duopo, geedzoj, devenantaj de unu el la centraj provincoj de Rusujo, estis konsiderita, kiel la plej bona paro dancanta tipajn dancojn, kiu estis en la tuta lando.

Finita la vespermanĝo ni iris al la loko, kie estis lokita la konstruaĵo de la malnova Borso, antaŭ kiu oni estis ludonta, jam nokte, spektaklon de granda allogo, koncerne la lukton de la laboristoj kontraŭ la kapitalismo.

La aliro al la portiko de la Borso fariĝas per ŝtupoj el ŝtono kaj sur ĉi tiuj ŝtupoj kaj en la portiko, kiu estas tre ampleksa, okazis la prezentado.

La verko aŭ spektaklo konsistis el pluraj scenoj.

En la unuaj oni vidis la laboristan klason enprofundiĝintan en la plej humiligan sklavecon, dum la patricioj kaj aristokratoj amuzis sin kaj ĝuis. Poste, la proletaro ribelis kontraŭ la superregantoj por neniigi la sklavecon, sed ĝi estis venkita kaj severe traktita.

En aliaj, jam aperis la duonindustria proletaro, kun iliaj gildoj, en malmola lukto kontraŭ la regularoj de la reĝoj kaj feŭdaj sinjoroj; en la ceteraj scenoj aperis la organizo de la socialdemokrataj partioj, la laboristaj Organizoj, la Komunista Manifesto de Markso kaj Engelso, kaj laste oni alvenis en la periodo antaŭ la eŭropa milito.

Je la momento deklari sin ĉi tiu, aperis sur la scenejo centoj da figurantoj kiuj per la mimiko—ĉar la spektaklo estis mimika—— direktis sin al la intelektuloj— tiuokaze la gvidantoj de la Dua Internacio— por ke ili ĵetu la krion de milito al la milito!, kaj kontestu la militon per la universala ribelo. Kiel ili ne estis aŭskultitaj, senkuraĝiĝo etendiĝis inter ili, kaj ili forlasas sin en brakoj de la kapitalismo, kiu fiera kaj venkinta faris el ili kanonfuraĝon. Tiam aperas la bolŝevikoj, kiuj vekante la popolon kaj portante ĝin al la lukto, faras la triumfan kaj komunisman revolucion.

Finis la spektaklo per apoteozo, en kiu partoprenis centoj da figurantoj. La ruĝa stelo aperis en la spaco kondukita, dum sia malsupreniro al la popolo, de la bolŝevikoj, kia komenca signo de elaĉeto.

La tuta spektaklo disvolviĝis sub torentoj el lumo sendita de potencaj reflektiloj.

Ĉirkaŭ la dua de la mateniĝo finis la prezentadon en kiu ĉeestis miloj da personoj.

Per la aŭtoj, kiuj jam nin atendis, ni deiris al la stacidomo, ĉar pro la malabundeco de loĝejoj en la vilaĝo, ni dormos sur la litoj de la vagonoj.

Oni diris al ni antaŭ ol enlitiĝi, ke oni probable organizus ekskurson al Kronŝtadt, sed ĝi finfine ne realiĝis.

Preskaŭ la tutan matenon de la sekva tago ni pasigis en la stacidomo. Ĉiumomente venis ordonoj pri tio, kion oni devis fari.

Ĉirkaŭ la dekdua tagmeze oni al ni komunikis, ke definitive je la dua posttagmeze ni revenos al Moskvo.

La reveno estis pli trankvila. Nenio de sovetiaj komisionoj; nenio de paroladoj nek amaskunvenoj, kaj ĉefe nek sola fojo "La Internacio", kio jam estis io!

Ni finos ĉi tiun rakonton rimarkigante, ke dum tuta nia pilgrimado de la 20-a tra Petrogrado, ĉiuj flagoj de la Sindikatoj, Kooperativoj, Kluboj kaj duonoficialaj kaj oficialaj institucioj, kun miloj da personoj, senĉese akompanis nin; sed ne pro propra-vola ago, sed pro speciala dekreto de la Soveto de la urbo.

Ĉiuj fabrikoj, manlaborejoj, konstruejoj, oficejoj kaj ceteraj laborlokoj ĉesis labori kaj la laboristoj, kiuj en ili havis okupon, kiel la infanoj de ĉiuj lernejoj, estis kondukitaj, gviditaj de siaj Komitatoj de Fabrikoj kaj siaj instruistoj, por ĉeesti en la alveno de la eksterlandaj delegitoj kaj servi al ni, kiel akompanantoj dum nia pilgrimado tra la urbo.

6a. Kategorioj de salajroj kaj sindikata organizo

Por la 23-a de julio je la deka matene, oni anoncis la duan kunsidon de la Kongreso, kiu ĝis sia fino devis okazigi sin en la salono de la trono, nomita de Sankta Andreo, en unu el la Palacoj de la Kremlo.

Malgraŭ ke estis la deka matene, kiam ni prezentiĝis en la salono, la komenco ne okazis ĝis post la dekdua.

Ĉi tiu malfruo ne nur okazis la unuan tagon; en la postaj okazis same, kiam ne iom plej malbone. Iutage, kunsido anoncita por la deka nokte, komenciĝis je la dua de la mateniĝo.

Ekstere de la Kongreso, kaj dum la horoj, kiujn ĉi tiu al ni lasis liberaj, ni klopodis kompletigi la informojn kiel eble plej bone.

Ke Kibalchiche kaj aliaj dungitoj de la Tria Internacio troviĝis en Moskvo, multe favoris nian privatan deziron.

Unu el la personoj kun kiu ni unue kontaktis, estis kun Sacha Kropotkin, la filino de Petro Kropotkin, al kiu mi komunikis la kontentiĝon, kiun mi havus povi intervidiĝi kun ŝia patro.

Mi ankaŭ vizitis la anarkiisman Klubon establita en la Teverskaia, kie mi konis, inter aliaj kamaradoj, Askarof-on kaj Gordin-on. Danke al Schápiro, mi konis Maximof-on kaj aliajn.

En la anarkiisma Klubo, dum unu el miaj vizitoj, organiziĝis speco de prelego, kiun mi eldiris en la franca kaj Askarof tradukis al la rusa.

Parolante kun la kolegoj de la Klubo, mi rimarkis, ke multaj el ili iom inkliniĝis akcepti la centralismon kaj la diktatoradon de la proletaro.

Gordin, kiu estis la plej videbla kapo, la plej klera, nomis sin "Universalisma", kaj antaŭ nelonge eliris el la malliberejo de Butirki, kie pasigis tri monatojn pro la krimo esti elektita de la laboristoj de la fabriko, kie li laboris, por la Soveto de Moskvo.

Tiu de Gordin estas kurioza ekzemplo pri kiel komprenas la liberecon la bolŝevikoj kaj kio signifas la reĝimon de la Sovetoj en iliaj manoj.

Laboristoj de fabriko de municioj, kiam okazis la balotado por delegitoj al la Soveto de la kvartalo al kiu apartenis la fabriko, malgraŭ ke la komunistoj ĉiam faris fermitan liston por delegitoj al Soveto kaj akceptis la elstrekon de neniu el iliaj kandidatoj, la laboristoj de la fabriko en kiu laboris Gordin elstrekis unu komuniston kaj lokis lin.

Kiam oni faris la elnombradon de balotiloj en la oficejo de la Soveto, oni rimarkis, ke estis elstrekita komunisto kaj elektita Gordin, oni vetois lin kaj nuligis lian elekton, sed ne tiu de la komunistoj, kiuj estis elektitaj en la sama listo.

Ĉar laŭ la kvanto da voĉdonantoj kaj voĉdonoj, kiujn bezonis atingi kandidaton, al tiu fabriko respondis unu delegito, efektiviĝis nova balotado. La rezulto, en la dua, estis la sama, ke en la unua. Gordin estis elektita.

Nova nuligo kaj nova balotado. Estis jam la tria.

Sed ĉi-foje ankaŭ ne sukcesis la bolŝevikaj komunistoj.

La elnombrado de balotiloj donis preskaŭ absolutan plimulton al Gordin.

Tiam la bolŝevikoj, respektemaj kun la volo de la laboristoj kaj la diktatorado de la proletaro (?), nuligis la balotadon, enkarcerigis Gordin-on kaj akordigis, ke momente restu tiu fabriko sen reprezento en la Soveto de la kvartalo.

Ni devas konfirmi ĉi tie kion jam iu, skribante pri Rusujo, manifestis: ke ĉiu elekto por la Soveto okazis en ĉeesto kaj sub la plej rigora inspektado de Ĉeka, kio ne estis por inspiri ideojn de sendependeco kaj respekto al la volo de la voĉdonantoj.

Enkarcerigita Gordin kaj nuligita la elektado, oni proponis al la laboristoj novan balotadon, kion ili rifuzis, kaj al Gordin oni proponis, ke li rezignis la postenon. Obstina ĉi tiu pri sia rajto, la bolŝevikoj ne vidis la rimedon atingi sian celon.

Prezenti novan kandidaton ili ne povis, ĉar dum la laboristoj de la fabriko voĉdonos por Gordin, ĉiam estos venkita la komunisto.

Finfine, komprenis la kolegoj de Gordin, ke persisti en la adoptita konduto estis iĝi la prizongardistoj de sia kamarado, kaj ili decidis, se la Soveto okazigos novan balotadon, sindeteni partopreni en ĝi tiel, ke la oficiala kandidato estus elektita kvankam estus pro malplimulto de voĉdonoj. Tiel okazis.

Sciante la Soveto la sintenon adoptita de la laboristoj, kunvokis novan balotadon en la fabriko kaj la komunista kandidato estis elektita de trideko da voĉdonoj el pli ol du mil, kiuj respondis al la fabriko.

Kaj tio malgraŭ ke Gordin, kiel la plimulto de la membroj de la anarkiista Klubo de la Teverskaia, cedadis kaj sufiĉe konformiĝis al la centralizismo kaj la diktatorado de la proletaro.

La aktiveco de la membroj de la anarkiista Klubo ne estis por maltrankviligi la bolŝevikojn kaj tamen, tre ofte, Ĉeka faris sian aperon tie. Cetere la aferoj, kiel tiu okazinta kun Gordin, abundis en Rusujo.

El ĉi tiuj kamaradoj mi havis la unuajn referencojn pri tio, ke estis la ukraina ribelo kaj pri la rolo, kiu plenumis la agadon de Makhno en la lukto kontraŭ la reakcio. La Klubo vivtenis sin danke al restoracio, kiun tiu establis, kaj kiu atingis povi prepari manĝaĵojn, kiuj liveritaj kun malgranda profito permesis destini iujn monkvantojn al ĝi.

La kunvenoj tre oftis; sed oni bezonis esti sobraj kaj moderaj pri la juĝo.

Foje alvenis iu kamarado de la interno, kiu alportis novaĵojn de la kolegoj kaj ĉiuj samopiniis konfirmi la persekutadon, kiun la bolŝevikoj efektivigis kontraŭ la anarkiistoj, kiuj tute ne submetis sin.

Ili al mi montris numerojn de "Izvestia" kaj "Pravda", en kiuj oni informis pri la rekresko de mortpafadoj fare de Ĉeka. La opinio ĝin atribuis al tio, ke la Registaro timis, ke la eksterlandaj delegitoj petus amnestion, kaj se ĉi tio okazus, por ne liberigi la malliberulojn, ili mortpafis ilin. La mortpafitoj, kvankam iu estis kvalifikita de la ĵurnaloj, kiel bandito aŭ spekulaciisto, la plimulto aperis kiel kontraŭrevoluciuloj...

Ĉar ni komunikis al Lozovski nian intensan deziron koni kiel eble plej ĝuste la funkciadon de la Borso de la Laboro, de la Sindikatoj kaj de ĉio, kio rilatis al la organizo, li metis je nia dispono interpretiston kaj rilatigis nin kun ĉiuj superaj institucioj, kiuj povis gvidi nin.

Ni anticipe konfesas, kvankam el tio pretendas eltiri iun avantaĝon niaj kontraŭuloj, ke ni ne povis atingi klaran komprenon pri la funkciado de la Sindikata organizo en

Rusujo. Laŭ ĝeneralaj linioj, jes; sed detale, ne. Ni same konfesas kaj ne kiel preteksto al la nekapableco kaj malkompreno, kiujn la porbolŝevikoj al ni ŝarĝas, sed kiel vero klare malkaŝita de la sperto, ke la plimulto, aŭ preskaŭ ĉiuj, de la oficistoj kaj respondeculoj mem de la funkciado de tiu pezega sindikata maŝino estis tute netaŭgaj por doni al ni la klarigojn kaj detalojn, kiujn ni petis. Ankaŭ ne ili konis ĝian funkciadon.

Pro la diritaĵoj de unuj kaj aliaj, la problemo ne estis en la maniero de organizo. Estis en la kontinua ŝanĝo kaj variemo de formoj kaj movadoj de la sindikata organizo.

La ĝusta kono pri kiel devis funkcii la Sindikatoj permesus al la laboristoj, kiuj ilin konsistigis kaj al la multnombraj burokratoj, kiuj ilin direktis, povi difini kondutnormon pri iliaj rilatoj kun la ŝtato, kio devis esti, tempo poste, profita al la laboristoj, ĉar tio al ili certigus certan sendependecon de la tiraneco de la Komunista Partio; sed ĉi tiu, antaŭvidema kaj ruza, klopodis neebligi tion per ĉiuj atingeblaj rimedoj kaj nenio pli bona ol konstanta renovigo de la metodoj de organizo, taŭgaj aŭ ne al ĝi. Krome, ĉi tio ŝajnis doni iun eklektikismon al la penso. Io simila al la elpuriga strebo serĉi tion plej bonan kaj perfektan. Sed fakte tio, kion oni celis estis realigi manovron por plifirmigi la superregadon de la partio, malhonestan kaj krudan manovron.

Dezirante kompletigi laŭeble la informojn, kiujn ni bezonis, ni unue volis scii, kiuj estis la salajroj de la laboristoj kaj, kiel ili ricevis ilin kaj, kiuj ilin decidis.

La starigita tabelo de kategorioj de salajroj enhavas tridek ses plus kvar eksterordinarajn nur aplikeblajn al kiu la Komitato de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, la Komisararo pri la Laboro kaj la Konsilantaro pri Nacia Ekonomio tion opiniis ĝusta. Kaj tiel, kiel en la tridek ses

kategorioj de salajroj, estis limigita la pagenda kvanto, tiel en rubloj, kiel en la porciumo, kiuj neniel povis superi sin, la kvar eksterordinaraj ne havis limojn kaj la Komisiono komisiita doni ilin povis atribui la salajron kaj la porciumon, kiujn ĝi konsideris oportunaj.

La deirpunkto por koncedi unu el ĉi tiuj kvar eksterordinaraj salajroj estis unu el la tridek ses establitaj; sed la limo, kiel ni jam diris, ne estis difinita. Oni lasis tion al la arbitreco de la Komisiono.

El tiu sistemo kreiĝis unu el la plej tutmonde disvastigataj trompaĵoj komence de la rusa revolucio kaj, kiu al ni prezentis ĝiajn plej elstarajn gravulojn ĉirkaŭitajn de aŭreolo de sobreco kaj ofero, kiu estis tre for de la vero.

Oni al ni diris, ke Lenino, Trockij, Radek kaj aliaj gvidantaj gravuloj de la Komunista Partio kaj de la revolucio, donante pruvojn de ilia amo al la popolo kaj ofero por la revolucio, submetis sin al ĉiuj mankoj kaj malabundecoj al kiuj la manko de produktoj ilin devigis kaj, ke konsiderante sin proletoj kaj laboristoj, ili asignis al si salajron, kiel la aliajn kaj porciumon, kiel tiun de la intelektaj laboristoj.

Laŭ teorio tiel estis. Sed la praktiko estis tre alia.

Estis realo, ke Lenino, Trockij, Radek kaj aliaj komisaroj kaj aspirantoj al tiaj, estis konsideritaj kaj katalogitaj, kiel intelektaj laboristoj por la kalkulo de la salajro kaj la porciumo, kiun ili devis ricevi, kaj per ĉi tiu artifiko kaj procedo ili igis ĉiujn nin kredi je la sindonemo kaj altruismo de la bolŝevikaj komisaroj.

Sed tutcerte, ĉu ili ne konsideris tion grava aŭ opiniis, ke ne interesis al la aliaj scii ĝin, ili ne diris, ke oni starigis la kvar eksterordinarajn menciitajn salajrojn, kiuj estis aplikitaj al la politikaj gravuloj de la Revolucio. Laŭ ĉi tiuj salajroj, ne jam tion nemalhaveblan, ili havis eĉ tion superfluan. Oni ĉi

tion devis diri ekde la unua momento kaj ne la malon, ke estas tio diskonigita.

Sed reparolante pri la tridek ses kategorioj de salajro starigitaj en Rusujo por katalogi ĉiun laboriston en unu el ili, ni bone eksciis la uzatajn procedurojn.

En la plej malaltaj kategorioj, de la unua ĝis la sesa, oni enmetis la tutan braklaboristan laboron en fabrikoj, manlaborejoj, konstruejoj, magazenoj, ktp, ktp.

Kiel al ni ŝajnis strange tiom da detalado starigi ses kategoriojn por kio sufiĉis unu sola, ili pretendis konvinki nin pri la eraro, pretekstante kialojn, kiujn ni ne volas kvalifiki, kiel infanecajn.

—Tiel, ekz-e —ili al ni diris—, kiam braklaboristo eklaboras en fabriko unuafoje, la Komitato de la fabriko lin klasifikas dum la unua monato en la kategorio numero unu, kies salajro estas de du mil monataj rubloj, ĉar li ne estas sperta pri la laboro.

—Kiujn specialajn aŭ teknikajn konojn bezonas —ni diris— braklaboristo, kiu eklaboras en fabriko por porti pezaĵojn aŭ pecojn de flanko al alia, helpi plialtrangan laboriston, balai aŭ plenumi similajn taskojn? Post dek minutoj, maksimume je la dua tago, li jam estas tute kapabligita por sia laboro. Estas neniu kialo praviganta tiel rigoran, kiel arbitran klasifikon.

—Parte estas motivoj por tiel argumenti—ili respondis —, sed absolute ne. Oni ne povas nei, ke post plurtaga laboro oni pli bone konas la kutimojn de la fabriko kaj pli bone regas la devon.

—Ni akceptu tiun kriterion—ni reargumentis—. Ĉiuokaze, sufiĉus du kategorioj, unua kaj dua, kun periodo de dek kvin tagoj por la transiro de unu al alia. Sed ses ŝajnas troaj!

—Ho!, eble vi pravas —ili kontraŭargumentis, aldonante kiel tutan pravigon—. Tiuj, kiuj ilin starigis, havis sian kialon por tio.

Pri ĉi tiuj detaletoj, kiel pri aliaj rilataj al la sama afero, ni parolis poste kun Lozovski. Ni nur atingis la laŭregulajn klarigojn, kiujn ni jam konis danke al aliaj dungitoj de la Konfederacio. La fundamenta principo estis tiu de la praktiko en maksimuma antaŭdifinita tempo kaj en sama fabriko, ĉar la tempo pasigita en alia egala ne estis konsiderita por pruvi la kapablon de laboristo, ĉar tio ordinara kutimis esti, ke ĉiu nova laboristo akceptita en fabriko aŭ manlaborejo estis ĉiam klasifikita en la plej malalta kategorio.

Ni demandis por scii kiu kaj laŭ kiuj kondiĉoj estis starigitaj la tridek ses kategorioj de salajroj, pri kio oni al ni respondis, ke ili estis starigitaj post detalita enketo farita en la tuta Rusujo de komisiono konsistigita de individuoj de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro kaj la Komisararo de la sama branĉo.

La laboroj kaj esploroj de ĉi tiu komisiono estis tiom penigaj, ke ili prenis proksimume jaron finiĝi.

La dekreto kreinta la komisionon estis diskonigita je la unuaj monatoj de la jaro 1918 kaj ĉi tiu finis siajn taskojn en januaro 1919. Je unuaj de februaro samjare fariĝis devigaj la kategorioj de salajroj starigitaj en la informo de la komisiono, kio estis granda progreso kaj bono por ĉiuj.

—Kaj dum tiu tempo, kiel oni reguligis la rilatojn de salajroj inter la ŝtato kaj la laboristoj?—ni plu demandis.

—Per konvencioj kaj interkonsentoj, kiujn oni starigis en ĉiu aparta okazo, aŭ oni ĝeneraligis ilin al la tuta simila industrio de loĝloko.

—Kaj ĉi tiuj apartaj konvencioj, ĉu ne okazigis konfliktojn?

—Ne. Ĉar oni modifis ilin laŭ la bezonoj ĝin postulis.

—Tiel ke nun jam starigitaj ĉi tiuj ĝeneralaj kaj devigaj kategorioj, ĉu la salajro reguligos sin per ili? La malobservoj ne devas ekzisti. Ili ne estos modifitaj.

—Vi eraras. Tiuj kategorioj, tiel detale starigitaj, kiuj bezonis laborjaron por ellabori kaj ordigi sin; kiuj bezonis centojn da laboristoj kaj milojn da informoj por plenumi sin, DEVIS ESTI MODIFITAJ DUDEK UNU TAGOJN POSTE, ĉar la malekvilibro inter la valoro de la monero kaj la prezo, kiu en la merkato atingis la varojn kaj eĉ la nominala valoro, kiun en monero oni atribuis al la porciumo, pruvis la neutilecon de tiom da penado kaj informoj. Oni devis reveni al la malnova ludo de la apartaj konvencioj, kvankam prenante, kiel normon kaj deirpunkton, la starigitajn kategoriojn.

—Ĉiokaze, la salajro estos egalvalora kaj egala en ĉiuj rusaj provincoj! Mekanikisto en Tobolsko, en Ekaterinoslaw, en Odeso, en Moskvo aŭ en Petrogrado, tutcerte gajnos egalan salajron.

—Neniel. La prezo de la porvivaĵoj en tiuj loĝlokoj absolute varias inter ĉiuj ili kaj tiuj variadoj fatale efikas sur la salajroj.

Per tri mil rubloj en Simbirsk aŭ Saratov oni vivas pli bone ol en Moskvo aŭ Petrogrado, kaj akorde kaj laŭ la pli malalta kosto de la porvivaĵoj, oni reguligas la salajrojn.

—Ĉu vi al mi povus informi la amplekson de tiuj diferencoj?

—Absolute, ne; ĝi varias laŭ la loĝloko aŭ la provinco. Sed oni povas diri, ke ĝi atingas proporciojn, kiuj varias inter

ĉirkaŭ dek kaj dudek kvin procento en monero. Rilate la porciumon, kiun ricevas ĉiu laboristo, nevarie estas la sama por ĉiuj regionoj aŭ provincoj, ĉiam ene de la kategorio, kiu al li respondas.

—Ĉu vi povus ankaŭ diri al mi kiel estas organizitaj la Sindikatoj? Ĉu ili estas de industrio, branĉoj, aŭ oficoj, urbe, distrikte aŭ regione?

—La Sindikatoj estas organizitaj de industrioj kaj province.

—Ĉu province?

—Jes, province. La metalurgia Sindikato de Moskvo, ekz-e, estas provinca, ĉar al ĝi apartenas ĉiuj laboristoj de la metalurgia industrio de la provinco. La Komitatoj de Fabriko kaj la distriktaj subtenas la rilaton de ĉiu laboristo kun la Plenuma Komitato de la Sindikato.

—Sed kiam ili devas kunveni por trakti aferon, kiu interesas al la Sindikato ĝenerale, kiel oni aranĝas tion?

—Ili faras tion aparte en ĉiu loĝloko, kvankam tio pli ofta estas, ke ili tion faras en ĉiu fabriko.

La Plenuma Komitato de la Sindikato ellaboras tagordon, kiun transdonas al ĉiu Komitato de Fabriko aŭ Distrikta, kaj ĉi tiuj Komitatoj poste ĝin submetas al la laboristoj de ĉiu manufakturo. Kunvenas ĉi tiuj, diskutas kaj interkonsentas tion taŭgan al la afero. Poste, la rezolucioj estas senditaj al la Plenuma Komitato por ke ĉi tiu decidu laŭ la interkonsento de la plimulto aŭ laŭ sia kriterio.

—Per ĉi tiu formo de organizo rezultas, ke la laboristoj de sama Sindikato neniam kunvenos en ĝia ĝenerala Asembleo por diskuti ajnan problemon, kiu al ili interesos. Pli ol kunigitaj, ili estas disigitaj, ĉar ili havas neniun rektan

rilaton inter ili, se ne estas per ilia Plenuma Komitato kaj de Fabriko.

—Kaj por kio ili tion bezonas? Ĉar ili povas diskuti pri ĉiuj problemoj kaj sendi sian decidon al la Plenuma Komitato por ke ĉi tiu decidu, ili bezonas nenion pli. Krome kiam oni opinios ĝin necesa, la Sindikato povas okazigi Kongresojn aŭ ĝeneralajn Konferencojn en kiuj ĉeestos la delegitoj de ĉiu manlaborejo, kiuj por partopreni en ili estis nomumitaj.

—Ĉio, kion vi volas; sed tio grava estas, ke la laboristo de ĉiu fabriko havas neniun rilaton kun la laboristoj de similaj fabrikoj nek kun tiuj de la sama Sindikato. Pli ol kunigita li estas disigita. La Sindikato ne estas institucio al kiu la laboristo alportas sian individuan iniciaton, sed estas la Plenuma Komitato, kiu pensas kaj ordonas en nomo de la Sindikato. Tio estas, ke la impulso ne devenas de malsupre supren, kiel endas, sed de supre suben, kio kontraŭas ĉiun senton de libereco kaj de propra-vola organizo. Kaj tiu sistemo de organizo, kiuj akordigis ĝin?

—La laboristoj mem kunvenintaj en Kongreso kaj laŭ plano ellaborita anticipe al la Kongreso de la Komisararo pri la Laboro.

—Iliaj delegitoj al tiu Kongreso, kiujn tendencojn aŭ kiun idearon defendis?

—Ĉiuj estis komunistoj de la Partio, escepte de eta procento, kiu ne havis partion; tamen ili akceptis la vidpunkton de la plimulto.

—Kaj krom la Sindikato, kiuj aliaj institucioj ekzistas?

—Ekzistas la Naciaj Federacioj de Industrioj, al kiuj apartenas la provincaj Sindikatoj de ĉiu industrio.

Poste, la provincaj Federacioj de Sindikatoj kaj poste la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, konsistigita de la Naciaj Federacioj de Industrio kaj la Provincaj Federacioj de Sindikato.

—La delegitoj al la Kongresoj de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro kaj al tiuj de la naciaj Federacioj de Industrio kaj por konsistigi la Komitatojn de tiuj institucioj, kiel estas nomumitaj?

—Oni kunvokas la laboristojn de ĉiu fabriko kaj ili nomumas plurajn delegitojn por provinca Asembleo de la Sindikato; en ĉi tiu provinca Asembleo de la Sindikato nomumiĝas delegitoj por Konferenco aŭ provinca Asembleo de ĉiuj Sindikatoj, kaj poste, en ĉi tiu provinca Asembleo de Sindikatoj, estas nomumitaj la delegitoj, kiuj devas ĉeesti en la Kongreso, ĉu de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro ĉu de la Nacia Federacio de Industrio. Kaj en la Kongreso nomumiĝas la membroj de la respektivaj Komitatoj.

—Tiel do, la delegito aŭ delegitoj al ĉiu Kongreso, ĉu ne estas rekte, ne estas la Sindikato mem, kiu lin sendas?

—Ne; ni jam al vi diris, kiel oni procedas. Kelkfoje, kiam la okazigo de Kongreso aŭ regiona Asembleo urĝas, tiam anstataŭ aparte kunveni la laboristoj de ĉiu fabriko, kunvenas ĉiuj laboristoj de kvartalo aŭ de determinita kvanto da fabrikoj, sen distingo de profesio aŭ industrio kaj ĉiuj kune enoficigas siajn delegitojn.

—La elekto ĉi-okaze fariĝos tre malfacila, ĉar se la laboristoj ne konas sin, ĉiu volos, ke superregu tiu, kiun li proponas.

—Preskaŭ neniam okazas tio, ĉar la Komunista Komitato prezentas jam farita la liston de kiuj devas esti enoficigotaj por la delegitaro.

—La elekto de la laboristaj reprezentantoj al la Kongresoj do ne estas rekta: ĝi jam rezultas el tria vico.

—Ĝuste. Ĉar oni unue enoficigas la delegitojn por la provinca Asembleo de la Sindikato, ĉi tiuj nomumas tiujn, kiuj devas reprezenti ilin en la provinca kunveno de ĉiuj provincaj Sindikatoj kaj ĉi tiuj siavice enoficigas la delegitojn al la Kongreso.

—Kaj la temoj aŭ tezoj prezentitaj al la Kongreso, kiu ilin ellaboras?

—La Plenuma Komitato de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, kiam la Kongreso estas nacia kaj de la tuta organizo; kaj se la Kongreso estas de industrio, la Komitato de la respektiva Federacio.

—Tio volas diri, ke la laboristo, la reala laboristo, la membro de la Sindikato, estas pasiva elemento en la plej granda parto de la problemoj, kiujn lia Sindikato devas solvi. Nur oni lin alvokas por ke li ratifiku —ĉar li ne rajtas ŝanĝi ilin— la interkonsentojn, kiujn la Komitatoj prenas.

—Tio dependas de tio, kion vi komprenas, kiel pasivan elementon. Evidentas, ke la laboristoj ne estas rekte alvokitaj diskuti la aferojn proprajn de la Sindikato kaj, kiujn ĉi tiu devas proponi, sed vi devas konsideri la mankon de kulturo de la rusa laboristo. Krome li estas tre plenplena de kontraŭrevoluciaj kaj menĉevikaj influoj.

—La direktistoj, inĝenieroj, submastroj kaj manlaborejestroj de la fabrikoj, kiu ilin enoficigas?

—Komence de la revolucio estis la laboristoj, kiuj ilin enoficigis; nun estas la Sovetoj. Iufoje okazis, ke la laboristoj nomumis la malnovajn mastrojn aŭ direktistojn, kaj eĉ la inĝenierojn kaj submastrojn, kaj ĉi tion oni devis eviti.

—Kaj tiuj enoficigoj de la malnovaj mastroj aŭ direktistoj, kial okazis? Ĉu okazis pro kapablo aŭ premo sur la proletaro?

—Oni devas supozi, ke ili okazis pro tio unua, kapablo, ĉar pro premo ne povis okazi, ĉar ili ne povis efektivigi ĝin.

—Kaj kial oni ne respektis ilin se ili okazis pro kapablo?

—Ĉar la plimulto de la enoficigitoj, se ne ĉiuj, estis kontraŭrevoluciuloj.

—Kaj la Komitato de Fabriko, kiu ĝin nomumas?

—La laboristoj de ĉiu fabriko.

—Kaj kiu proponas la liston? Ĉu la laboristoj estas liberaj enoficigi kiun ili volas?

—Neniel; la liston ĉiam proponas la loka Soveto aŭ la membroj de la Komunista partio laborantaj en la fabriko. La listo estas fermita. Oni povas elstreki neniun nomon de kiuj ĝin konsistigas.

—Ĉi tiele nur tiuj, kiuj estas komunistoj, povas membri en la Komitatoj de Fabriko.

—Jes; kelkfoje oni enskribas en listojn individuojn sen partio.

—Kaj kiujn funkciojn plenumas la Komitato de Fabriko?

—Reprezentaj de la Sindikato kaj la Registaro. Ĝi plenumas la vigladon, por ke la laboristoj laboru kaj donu la bezonan produktkapablon; ĝi decidas la kategoriojn de salajroj; altrudas korektomanierojn kaj monpunojn al la laboristoj, kiuj ne plenumas sian devon; ĝi maldungas tiujn, kiuj ne respektas tion interkonsentitan; ĝi petas al la Borso de la Laboro la laboristojn, kiujn bezonas la fabriko; ĝi

klasifikas la kategorion, kiu al la laboristo respondas; ĝi vigladas por ke oni ne malŝparu la krudan materialon; ĝi kolektas ĉiujn depostulojn de la laboristoj; peras inter ĉi tiuj kaj la direktisto aŭ submastro; preparas la balotadojn en sia fabriko kaj, finfine prizorgas la ordon, la disciplinon kaj ĉion, kio rilatas al la bona irado kaj produktado de la fabriko.

—Ĉu rajtas la laboristoj eksigi aŭ peti la eksigon de sia Komitato de Fabriko aŭ de unu aŭ pluraj el ties membroj?

—Sendube. Ĉiuj postenoj estas eksigeblaj kaj, sekve, oni povas eksigi tiun, kiu onin reprezentas.

—Kiel povas procedi la laboristoj por atingi tiun eksigon?

—Ili petas al la Komitato de Fabriko kunvenon kaj kiam ĉi tiu ĝin koncedis, ili kunvenas. En la kunveno ili prezentas siajn plendojn kaj la Komitato de Fabriko kolektas kaj transdonas ilin al la Komitato de la Sindikato, kiu ekzamenas ilin kaj procedas laŭ tio, kion opinias konvena.

—Sed tio estas kontraŭsenco! La laboristoj devas peti permeson por kunveni al la samaj individuoj, kiujn ili devas eksigi. Estas ili, la koncernitoj de la malaprobo, kiuj devas preni kaj proceduri ĝin, sen la plej malgranda interveno de kiuj ĝin petis. Per tiu proceduro, la eksigoj devas esti tre maloftaj.

—Ege maloftaj. Apenaŭ okazas iu. Sed sciu, ke la disciplino de la Partio postulas, ke Komitato de Fabriko, al kiu la laboristoj petas ĝian eksigon, estas devigita konigi al la Sindikato la deziron de la laboristoj, kiujn ĝi reprezentas.

—Bone; sed kontraŭ la disciplino de la Partio estas la persona konveneco. Tion pruvas, ke oni neniam petas eksigon. Krome, ĉiuj burokrataj klopodoj, kiujn oni devas plenumi, la timo de venĝo aŭ puno, la ĉeesto de Ĉeka en ĉiuj kunvenoj, ke ne estu ĵurnaloj per kiuj oni povas denunci

misuzojn kaj arbitrecojn, kaj la timo esti misfamigita, kiel kontraŭrevoluciulo, sufokas ĉiun proteston kaj ribelklopodon.

(… …)

—La Komitatoj de Fabriko, kiel longe ili estas enoficigitaj?

—Por ses monatoj.

—Eblas esti reelektataj?

—Jes. Ili povas esti reelektataj.

—Jam enoficigita la Komitato de Fabriko, rilate la salajron kaj la porciumon, ĉu estas konsideritaj ĝiaj membroj, kiel laboristoj aŭ kiel oficistoj de la ŝtato? Ĉu ili estas devigitaj labori aŭ estas liberaj de ĉiu laboro?

—La membroj de la Komitato de Fabriko, jam enoficigita ĉi tiu, ĉesas esti konsideritaj kiel laboristoj, kaj eniras en la kategorion de dungitoj. Ili ne havas devigon labori kaj se ili laboras estas propra-vole. Ilia komisio estas de viglado, por ke la aliaj laboru.

—Estus io tiel, kiel speco de policisto de manlaborejo.

—Malmilda estas la epiteto. Ĝi havas neniun karakteron de policisto. Ĝia komisio ni jam diris, kiu estas.

—Kaj kiam laboristo estas morale humiligita de Komitato de Fabriko aŭ aligita al pli malalta kategorio ol tiu, kiun li konsideras meritota, kiujn procedurojn li devas plenumi aŭ kiel devas agi por ke la Sindikato lin protektu en ĉiu el la du okazoj?

Ĉar oni devas supozi, ke la Sindikatoj devas taski la defendon de la sindikataliĝantaj laboristoj en similaj okazoj.

—Certe. La Sindikato ĉi-okaze okupiĝas pri la laboristo kaj defendas kaj protektas lin. Kiam li estas humiligita aŭ

aligita al pli malalta kategorio ol kiun li opinias meritota, li turnas sin al la Komitato de Fabriko, al ĝi prezentante skribe la raporton.

La Komitato de Fabriko ĝin sendas, ĉiam sekvante la hierarkiajn vojojn, al la Loka Komitato de la Sindikato, kiu siavice ĝin transdonas al la Plenuma Komitato de la Sindikato al kiu apartenas la depostulanto.

Favore aŭ malfavore opiniita de la Plenuma Komitato de la Sindikato, por ke la plendo aŭ depostulo revenu al ĝia deirpunkto, t. e., al manoj de la laboristo, kiu ĝin iniciatis, ĝi devas fari la samajn procedurojn kaj pasi tra la samaj institucioj, ke kiam ĝi estis sendita al la Estraro de la Sindikato.

Kiel la elekto de la Komitatoj de Fabriko estas nur por ses monatoj, kaj kvankam tre ofte estas reelektataj la antaŭaj, okazas, ke venas al kono de unu el ili la rezulto de depostulo farita al ĝia antaŭanto.

—Ĉi-okaze la nova Komitato devas doni kontentigon al la laboristo se la rezulto de lia depostulo al li estas favora, neante ĝin male.

—Tiel kutimas okazi. Kvankam vi ne devas forgesi tion malfacilan, ke estas por Komitato de Fabriko solvi malkonsenton komencintan kiam ĝi ankoraŭ ne estis elektita. La kulpojn aŭ mankojn de unu ne devas pagi la aliaj.

—Konsentite. Tamen kaj la laboriston persone ĝenitan, aŭ kun monperdoj en lia salajro, ĉar oni aligis lin al pli malalta kategorio ol kiu lin respondis, kiu reenoficigas aŭ monkompensas? Ĉar se respektindaj estas la rajtoj de la komitato de Fabriko, ankaŭ estas tiuj de la laboristo, kiun la Komitato difektis. Ene de komunista reĝimo, kie la Povo efektiviĝas nome de la laborista klaso, juste estas, ke al ĉi

tiu oni faras justecon. Ne, ke al ĝi oni koncedas privilegiojn; sed ja, ke oni al ĝi faras justecon.

—Tiel okazas. Ĉiu depostulo farita de laboristo estas pritraktita.

—Ni ne ĝin neas. Sed kion ni ja neas estas, ke estu efika la zorgo. Unue, pro la multaj klopodoj, kiujn oni devas plenumi kaj, kiuj ne estas en manoj de la laboristo akceli ilin; due, ĉar ĝi devas esti solvita sen tio, ke li estu aŭdita, kio pligravas. La Plenuma Komitato de la Sindikato, por subteni la prestiĝon de la Komitato de Fabriko kaj tiun de la Komunista Partio, al kiu ĝi reprezentas en la manlaborejo, ĉiam donos al ĝi la pravon. Tial la malmultaj eksigoj de Komitatoj kaj, ke la laboristoj ne interesas sin pri ili.

—Tute male. La laboristoj ege interesas sin pri la Komitato de Fabriko.

—La komunistaj laboristoj mi ne ĝin neas. Sed ke sin interesos la aliaj, mi dubas. Sed, finfine, ni plu parolu pri tio.

Per la resumo de la aferoj, kiuj rilate kion en Rusujo reprezentas la Sindikatoj kaj, kiujn ni klopodis doni per la plej granda ebla klareco en la antaŭa dialogo, estos forminta proksimuman ideon la leganto pri kio la sindikata organizo reprezentas, la rolo, kiun ĝi ludas en la bolŝevika ekonomio kaj la utileco, kiun ĝi havas por la defendo de la interesoj de la laboristoj antaŭ la bolŝevika ŝtato.

Nia pilgrimo tra la diversaj sekretariaroj por serĉi donitaĵojn, kiuj nin orientis pri kio estis la sindikata organizo, ne estis libera de malfacilaĵoj, ĉar krom la divido de funkcioj en ĉiu sekretariaro, kio tre malfaciligis akiri detalojn pri la aro, la kontinua ŝanĝo, la konstanta modifo, kiujn oni enkondukis en ĉion kaj ĉefe tio ege komplika de institucio, kiun eĉ ĝiaj kreintoj mem komencis ne kompreni. Estis

nesupereblaj obstakloj por kiuj, kiel ni, bezonis precizajn ideojn kaj konkretajn normojn.

Sed la resumo de ĉiuj ĉi malfacilaĵoj estis sintezitaj en vortoj de Lozovski, kiu evidentigas la veran rolon de la Sindikatoj en Rusujo.

Lozovski diris, ke la rolo de la Sindikatoj en Rusujo estis obei la platformojn de la Partio kaj la ekonomiajn gvidliniojn, kiujn ĉi tiu al ili diktis kaj defendi la diktatoradon de la proletaro. Ĉio, kio estus eliri el tiu kadro, estus kontraŭrevolucia kaj la Sindikatoj ne povis fari ĝin nek la Komunista Partio toleri ĝin.

La grandega nombro da komunistaj dungitoj en la Sindikatoj absorbis la tutan funkcion de trejnado en la homamasoj.

Se ni volus preni alian Sindikaton, kiel ekzemplon kaj ni farus tion kun tiu de fervojistoj, ni konfesu, ke la rezultoj estus identaj. Se ni nur kalkulas la centojn da oficistoj en la burokrataj fervojaj superaj postenoj, en la komencoj kaj finoj de linio, en la relkrucoj kaj relkuniĝoj, en la oficejoj de interveno kaj direktado, ili sumigos milojn. Krome, en ĉiu stacidomo, ne gravas ĝia grando, ekzistis la eksterordinara Komisiono konsistigita almenaŭ de tri individuoj efektiviganta komision de viglado kaj komando. Ĉiu trajno, tiel de varoj, kiel de vojaĝantoj, ankaŭ kunportis sian eksterordinaran Komisionon. Konsideru, ke la plej granda parto de la membroj de ĉi tiuj komisionoj ne efektivigas aktivan servon; ilia komisio estis nure kaj ekskluzive vigladi. Ni ne kredas, ke en tempoj de la carismo, kiam ekspluatis la rusajn fervojajn liniojn privataj kompanioj, la nombro da dungitoj por la viglado, inspekto kaj direktado de ĉi tiuj neniel estis tiel granda, kiel kiun ili havis sub la bolŝevika reĝimo, kiam ni estis en Rusujo.

Se el la enspezoj devenantaj de la transporto oni devus pagi tiom da dungitoj, verŝajne la enspezoj ne atingus kovri la ricevitajn salajrojn.

7a. Granda festo kaj festeno

La bolŝevikoj proponis sin multe amuzi nin. Ili volis, ke nia restado en Rusujo estu kiel eble plej plaĉa. Ili distris niajn momentojn de nenifarado, eble intence al ni apartigi la rigardon de la mizerbildoj, kiuj tra la tuta Rusujo vidiĝis.

La nutradon, kiu, kiel ni jam diris, estis abunda kaj eksterordinara kaj la esceptajn kondiĉojn per kiuj ni vojaĝis, ĉirkaŭis sennombraj zorgoj, gentilaĵoj kaj preferoj, kiujn oni al ni malavare disdonis ĉie, kien ni iris.

Ni ĝuis ĉiajn etburĝajn koncesiojn kaj distingojn. Ni vidis, kiel nokton en la teatro oni levigis de lia sidejo spektanton por ke sidiĝu delegito. Ĉie la festoj, festenoj kaj ĝojegoj multiĝis en nia honoro. Pompe aranĝitaj akceptoj, militaj revuoj, ceremonioj, festenoj kaj regaladoj ne malabundis honore de la eksterlandaj delegitaroj. Ni devis senti nin flatitaj kaj kortuŝitaj.

Ĉu bezonis la delegitoj ĉiun tiun malŝparegon el nenecesaĵoj kaj vanaj pompoj? Ĉu ni vojaĝis al Rusujo por esti regalitaj kaj festitaj, aŭ ni iris identigi nin kun la popolo, kiu faris la revolucion, suferi kun ĝi, mediti en ĝia koro kaj fortikigi nin per ĝiaj doloroj kaj mizeroj?

Ĉu ni estis pasantaj vojaĝantoj, kiuj ĝuis la pompojn kaj luksojn, kiujn al ni povis proponi revolucia Registaro, aŭ ni estis la proparolantoj de krio de simpatio elirinta el brustoj de milionoj da homoj, kiuj ĵetis siajn malbenojn kontraŭ la maljusteco kaj direktis siajn rigardojn al la lando brulanta en grandega fajro de socia regenerado?

Ĉu oni volis malpliigi per tiuj postrevoluciaj allogaj iluzioj, kiaj novaj geedziĝoj de Camacho la riĉulo[7], la

7 NeT. Epizodo el la dua parto de Don Kiĥoto el Manĉo, en kiu la riĉa Camacho pompe kaj lukse preparas sian edziĝon kun la juna Quiteria, sed fine li estas trompita de la

grandega vespiro de tiom da doloro por ke ne alvenu ĝia eĥo al ni?

Ni tion ignoras. Tio vera estas ke, per tiom da festo oni pretendis apartigi nin de la esenca realo.

La festoj, festenoj, paradoj, manifestacioj kaj aliaj ĝojkriadoj per kiuj ni estis akceptitaj en la loĝlokoj de Volgo kaj la grandioza kaj impona ceremonio de la 20-a de julio en Petrogrado estis eklipsontaj pro tio, kion oni preparadis. Ĉu volis la bolŝevikoj sentigi al ni la impreson de ĝia povo kaj de la simpatio (?), kiun la popolo de Moskvo sentis al ni?

Venis la momento "tute malŝparegi" kaj ili tutcerte tion estis atingontaj.

Inter la preparoj de la granda festo, kiun oni organizis, tio pli "miriga" estis la teatra aranĝo de la granda tribuno starigita en la centro de la Ruĝa Placo.

Preskaŭ tuŝanta la muregon de la Kremlo, lasanta nur libera la spacon okupitan de la tomboj de la komunistoj tie enterigitaj, ili starigis imitaĵon de monto el ligno.

En la centro de ĉi tiu monto aperis la tribuno, kvazaŭ kvadrata turo kaj kovrita de arta ŝtofo.

Ĉe la du flankoj de ĉi tiu centra tribuno, ili konstruis du pli malaltajn kaj spacohavajn tribunojn, kapablajn enhavi kelkcentojn da spektantoj ĉiu el ili. La delegitoj okupis la du vicojn de prefero de ĉi tiuj tribunoj kaj la ceteraj la personoj inklinaj al la Registaro.

La festo konsistis el Ekspozicio de militmaterialo, kanonoj, maŝinpafiloj, tendoj, tendaroj kaj restadejoj de Staboj metitaj en konstruaĵoj ĉi-cele konstruitaj. Laboriloj kaj terkulturaj maŝinoj estis neniu…

juna Basilio, antaŭa amanto de Quiteria, kaj la du junuloj sukcesas geedziĝi.

Granda parado de la tuta garnizono de Moskvo kaj ceremonio kaj parado de ĉiuj laboristoj kompletigis la programon.

La festo okazis la mardon, 27-an de julio.

La loko de kunveno kaj formado de la militistaj kaj laboristaj trupoj de Moskvo estis tiu de la Placo de la Granda Teatro. Tie komenciĝos la parado al la Ruĝa Placo, kiu eniros en ĉi tiun tra la strato, kiu estas inter la fama kapelo de la virgulino Ibérica kaj la muregoj de la Kremlo. Tiel la militistoj, kiel la laboristoj deiros de la Placo de la Granda Teatro kaj marŝos laŭ formadoj de parado.

La homamaso pasos antaŭ la Tribunoj kaj plu iros ĝis la nomita Sankta Pordo de la Kremlo, kie komenciĝos la disigo.

Fronte al la tribunoj de ni okupitaj, estis kvar bandoj de muziko, kiuj senĉese kaj alternative ludos marŝojn kaj popularajn muzikojn. Samtempe, leviĝos katenbalono je la flanko de la Sankta Pordo, dum du aeroplanoj manovros super la Placo ĵetante komunisman literaturon.

Ne necesas diri, ke la Ruĝa Placo estis okupita militiste kaj, ke neniu havis aliron en ĝin, nek povis tie halti krom se li estis delegito aŭ speciala invitito.

La parado komenciĝis je la dekunua matene kaj finiĝis je la kvara posttagmeze. Dum ĝi ni devis resti sur la tribunoj eltenante la sufokan varmegon de la tago.

La bandoj de muziko ĉesis eĉ ne momenton ludi kaj la parado plenumiĝis kontinue kaj matematike.

Unue la trupoj dividitaj en dudek kvin grupoj: komencis la Ĉefstabo kaj finis la Regimento de la Volontarmeo surĉevale. Poste pasis la laboristoj el ĉiuj distriktoj de Moskvo. Laŭ korelativa ordo ĝin faris la distriktoj de

Khamovnikí, *Samoscrerechíe* kaj Krasnaia Presnia, tiu de la Urba distrikto de *Sokolniki* kaj *Rogosjko-Simonovsky*. La lastaj estis tiuj el *Baumanovski*.

Anonciĝis la komenco de la "procesio" —kiel laŭtekste diris la programo— per salvo de artilerio.

Oni povas kalkuli, ke paradis antaŭ ni pli ol tricent mil personoj.

La ĉeesto de la laboristoj de ĉiuj fabrikoj, manlaborejoj kaj oficejoj de Moskvo al la ceremonio estis deviga, ĉar tiel ĝin dekretis la Registaro.

En “*Pravda*” kaj “*Izvestia*” de la antaŭa tago publikiĝis dekreto, kiu tiel ĝin ordonis.

Je la naŭa matene ĉiuj laboristoj de ĉiuj fabrikoj, manlaborejoj kaj oficejoj estis devigitaj prezenti sin en la loko, kie ili kutime laboris.

Farita la elnombrado kaj la revuo, ili estis kondukitaj sub la viglado de la Komitatoj de ĉiu fabriko aŭ manlaborejo al la renkontejo.

Ĉiu grupo de laboristoj lokiĝis sur la lokon destinita al sia distrikto kaj tie atendis ĝis estos ĝia vico de la parado.

La ne ĉeesto en la ceremonio estos punita per la ĉesigo de la porciumo dum ok tagoj.

Krome, ĉar ne certis la organizantoj de la festo pri tio, ke la popolo ĉeestus malgraŭ la minaco, ili adoptis alian procedon: disdonis pecojn de vesto.

Al unuj ili donis bluzon; al aliaj pantalonon; al iuj ŝuojn, kaj eĉ iu havis la sorton akiri du pecojn de vesto el tiuj disdonitaj.

Tiu procedo estis pli certa por devigi la volon de la malemuloj ol ajna alia.

La ne ĉeesto al la ceremonio, krom senigi la porciumon al la laboristoj, kaŭzis, ke ili restis sen la peco de vesto, kiu al ili respondis. Grava eventualaĵo en tiuj cirkonstancoj.

En la manifestacio kaj parado ankaŭ ĉeestis batalionoj de la garnizono de Petrogrado. Ili venis la antaŭan nokton per kvar specialaj trajnoj.

Krome la organizo de la parado estis peniga.

La vastega placo kaj ĝardenoj fronte al la Granda Teatro de Moskvo kaj la ĉirkaŭaĵoj de la malnova hotelo Metropole plenplenis de homoj kaj soldatoj.

Distribuitaj ĉiuj laŭ la interkonsentita ordo, ĉiu grupo iris, alveninte de la fabriko aŭ kazerno, al la loko asignita al ĝi kun ĝiaj samkvartalanoj aŭ samkorpusanoj .

La grupoj frumatene ekvenis. Ĉar la scivolemo nin portis ĝis la loko destinita al la organizantaro, ni demandis pere de iu scipovanta paroli la francan, de kioma horo ili estis tie.

Iuj grupoj —ili al ni diris— ĉefe de soldatoj, kiuj estas la unuaj, kiuj devas paradi, estas ĉi tie de la sepa matene.

La aspekto de tiu homamaso tie amasigita, estis kortuŝa, ĉar oni konstatis, ke la granda plimulto tie estis devigitaj de la forto, kontraŭ lia volo, perfortita sia konscienco.

Sufiĉis, ke ili nin vidis kaj rimarkis, ke ni estis eksterlandanoj kaj krome delegitoj, en kies honoro oni faris la feston, por ke ili rigardadu nin per iu malestimo, ne libera de kuriozeco.

Sed baldaŭ la krioj kaj alvokoj de la prezidantoj de la Komitatoj de Fabriko aŭ de la kolonestroj igis al ili forgesi nin, kaj al ni demandi pri kio okazis.

Kiel la mateno estis brilega, proponis ĉarman bildon la mikskolora aro de flagoj kaj standardoj kun la verdo de la ĝardenetoj fone kaj la dekoraciita enirejo de la Granda Teatro, kiel ĉefa fasado.

La kontinuaj kaj seninterrompaj lavangoj da homoj, kiuj estis alvenantaj, faris, ke oni ne povis tro fiksi la atenton sur la detalojn se volis kompreni la tuton.

Tamen, kaj eble pro la sama fakto amasiĝi tiom da miloj da personoj sur la placo, ne ĉesis impresi la ekstera aspekto de la plimulto.

Kiuj ĉe la nova bluzo, kiun oni al ili donis la antaŭan tagon, montris sian pantalonon kun milkoloraj flikaĵoj kaj tute disfadeniĝinta sube.

Aliaj, portante la pantalonon nova, estis preskaŭ senŝuaj kaj montris la kubutojn tra la rompoj de la manikoj.

Ne mankis tiuj, kiuj pli malbonŝancaj en la disdono de la vestaĵoj, ricevis neniun aŭ iun, kiun ili ne povis surmeti sur sin, aŭ eble ili ĝin destinis al iu parenco aŭ proksimulo, kiu ĝin pli bezonis.

Laŭ pasis la mateno kaj novaj kvantoj da homoj aldoniĝis al la unuaj alvenintoj, la cirkulado sur la placo por la scivolemuloj kaj rigardantoj, kiel ni, neebliĝis.

Pro nia strebo vidi ĉion, ĉar demandi ni ne povis, ni senĉese iris de flanko al alia, eĉ foje troviĝis enfermitaj inter grupoj, devante malfermi al ni paŝon preskaŭ perforte.

Kiam la homamaso neebligis, ke ni libere cirkulis, ni decidis foriri. Krome la horo de la parado proksimiĝis. Ni devis okupi la lokon al ni rezervita, kiel spektantoj de honoro, de unua klaso.

La parado realiĝis po dek por vico, je militista paŝo kaj rigida marŝo, laŭ perfekta formado kaj la paradanoj iom turnis la kapon al la tribunoj pasante antaŭ ĉi tiuj.

Al tio monotona kaj malsimpatia de la parado, kuniĝis la surdiga bruo de la aviadiloj kaj la son-son' de la cimbaloj de la bandoj de muziko, kiuj ĉesis eĉ ne momenton ludi.

Post ĉiu grupo el dudek vicoj da manifestacianoj, la du aŭ tri unuaj vicoj de la alia grupo kriis fronte al la centra tribuno: Hurao al la Tria Internacio! Ni estis tute konvikitaj, ke tio estis plia trompo kaj, ke ili ne kriis la huraojn propravole.

Tra inter la elmontritaj militobjektoj ni alvenis ĝis la loko, kie finiĝis la konstruaĵoj de la Ekspozicio, kaj tiam ĉio al ni klare malkaŝis sin.

Ĉe la eniro mem de la Ruĝa Placo troviĝis oficiro de la Ruĝa Armeo, kiu antaŭe estis tio de la carismo, komisiita fari la lastan ekrigardon al la ordo de formado.

Li estis komisiita indiki al la grupo de vicoj la lauregulajn kriojn kaj huraojn!, kiujn ili devis ĵeti.

Ni vidis tion kaj nin premis granda malĝojo.

La farso, kiun oni tie ludis, ne povis esti pli maldigna, nek pli malnobla.

Kompantindaj estuloj alportitaj tien per la forto, por fari la impreson, ke la popolo nin aklamis! Kaj krome oni eĉ ordonis al ili la salutojn, kiujn ili al ni devis fari.

Finita la parado, kelkaj delegitoj iris al la flughaveno, kie okazis aviadila festo ankaŭ en nia honoro.

Parenteze, ĝi estis malfeliĉa. Ĉar rompiĝis peco de stirado al unu el la aviadiloj, ĝi devis perforte surteriĝi, kiel

povis, kaj koliziis kontraŭ unu el la tribunoj starigitaj por la delegitoj.

En unua vico sidiĝis delegitino antaŭ malmultaj tagoj alveninta al Moskvo, reprezentanta kun aliaj delegitoj la svedajn laboristojn. Unu el la aloj de la helico de la aviadilo ŝin batis en la kapo kaj rompis ŝian kranion. Tiun saman posttagmezon ŝi mortis en la malsanulejo.

Pro la akcidento kaj kiel montro de funebro oni ĉesigis la feston.

Kvankam ni estis invititaj al ĉi tiu aviadila festo, ni ne volis ĉeesti. Kion ni vidis tiun posttagmezon al ni forigis ĉiun deziron ĉeesti en kiu ajn festaĵo.

Ni preferis anstataŭ iri al la flughaveno, trairi Moskvon, kolektante impresojn pri la tago. Al ni interesis scii, kion opiniis la popolo pri la parado kaj ni.

Ni konfesas, ke nenion povas diri. Ĉar ni ne parolis la rusan, ne povis rekte demandi al la loĝantoj novaĵojn, kiuj estas la veraj.

Demandi estis malfacile, kaj pli ol malfacile, estis kompreni nenion. Tuj kiam ili sciis, ke ni estis eksterlandanoj kaj krome delegitoj, la buŝoj fermiĝis, kaŝante siajn sekretojn, kiel la tomboj de la faraonoj.

Rezignaciitaj ni revenis en la hotelon.

Nokte ni ĉeestis en la festeno. Kvankam tio persone ĉagrenis nin, ni ĉeestis.

La ĉi-tagaj vidaĵoj metis nin en malbonan humuron. Mi cedis al la insistaj petegoj de la antaŭtempe forpasintaj kamaradoj Petit kaj Vergeat de Parizo. Iris la tri, ne ĉar entuziasmigis nin ĉeesti en la festeno, sed por havi ion rakontotan.

Okazis la festeno en la malnova Palaco de la nobelaro de Moskvo.

En la Centra Salono kaj sur kvar vicoj el tabloj, kiuj ĝin okupis laŭ longo, ni vidis lokitaj multnombrajn servicojn.

La eksterlandaj delegitoj, honore al kiuj okazis la festeno, estis ĉirkaŭ cento, se ni inkluzivas la rusojn, kaj la ĉeesto en la Salono estis de pli ol du mil personoj.

La festeno ne povis esti pli grandioza. Oni al ni servis supon, fiŝon, viandon kaj blankan panon, ĉio abunde. Ankaŭ oni al ni servis alkoholaĵon el fruktoj, kafon kaj tabakon.

Dum la festeno, bando de muziko ludis plurajn pecojn, ne forgesante tri aŭ kvar fojojn "La Internacion".

Kantis Ĥorsocieto kaj la fama Schaliapine, majstre. Dum la delegitoj, kiuj havis nian manĝon en la hotelo, abundege festenis, la muzikistoj kaj ĥorsocietanoj ne estis manĝintaj, nek havis esperon manĝi. Al la popolo de Moskvo mankis tio pli nemalhavebla.

Por fari tiun nenecesan elmontron, oni senigis ĉiujn infanojn de Moskvo kvar tagojn je ilia ordinara panporcio. Ni estis sub la diktatorado de la proletaro! Kiel forgesi tion!

* * *

La sekvan tagon post la ceremonio kaj la festeno, Lozovski, kiu konis nian penson, al ni demandis kio ŝajnis al ni la okazintaĵoj de la antaŭa tago.

—Tio ne devis fariĝi —ni respondis—. Kaj se vi volis, ke la laborista popolo de Moskvo faru omaĝon de simpatio al la eksterlandaj delegitoj, estintus preferinde kunvoki ilin la proksiman dimanĉon, kaj per tiuj, kiuj ĉeestintus, organizi manifestacion.

—Neniu venintus —li respondis.

—Nu —ni diris—. Ni tiel scius la veron pri la afero kaj ne kiel nun, ke ŝajne estas grandioza la okazintaĵo, kiam fakte ĉio estis komedio de kiu ni estis ridindaj spektantoj.

—Vi ĉiam pri la samo! —diris Lozovski—. Vi havas, kamarado Pestaña, tre ŝokajn ideojn.

Kaj li malproksimiĝis prononcinte la lastajn vortojn.

8a. La problemo de la loĝejo

Dezirante scii, kiel la bolŝevikoj solvis la diversajn problemojn, kiujn la ekonomia kaj socia vivo proponas al la homo, ni dediĉis nin al la malfacilega tasko eldemandi ĉion, kio rilatis al tiuj problemoj, komencante kun tiu de la loĝejo. Stimulitaj de kio en Eŭropo kaj en nia propra lando okazis, ni volis scii, kiel tion solvis la revolucio.

La oficialaj informoj, kiujn ni povis kolekti, ne estis sufiĉe klaraj. Kvankam ili parolis pri matematikan kaj rigoran disdonon de la loĝejoj, la popolo, la personoj al kiuj ni sugestis niajn intencojn, eĉ al komunistoj, lasis duonvidi iun malinklinon kontraŭ la oficialaj disponoj.

Koincidis ĉiuj—oficialaj kaj privataj informoj— pri tio, ke oni faris justan kaj racian disdonon, unuavide. Analize traktante la aferon, oni rimarkis, ke dum la oficialaj informoj montris neplibonigeblan rezulton, neis tion la privataj, kiuj subtenis, ke la oficiala interveno ne povintus esti pli malfeliĉa. Kiu pravis? Jen kio al ni pli interesis ekscii.

La oficiala disdono baziĝis sur la matematika principo nur koncedi po unu ĉambro por persono, escepte de la kuracistoj kaj aliaj diversaj teknikistoj, kiuj bezonis plian ĉambron por oficejo aŭ kabineto de konsulto. La rigideco de la oficialaj disponoj ne validis por la ĝuantoj de la oficiala favoro. La influo povis pli ol ĉiuj registaraj disponoj. La privataj informoj tre klare parolis pri la multnombraj esceptoj favore de influaj gravuloj aŭ altrangaj bolŝevikaj dungitoj. Tiel do la problemo de la loĝejo jam tiam zorgis la loĝantojn de Moskvo. Kune kun la aliaj problemoj, ĝi faris pli angorplena la situacion de la popolo, kiu faris la revolucion.

Du kaŭzoj kontribuis al ĉi tiu pligraviĝo: la timo al la oficialaj disponoj, kiu ofte havis la karakteron de partiaj

rabaĵo aŭ venĝo, kaj la ĉiutage pli granda malabundeco de loĝejoj. Ĉefe la lasta estis pli alarma.

La loĝeblaj domoj malpliiĝis tago-post-tago, disfaliĝis multaj el ili, ĉar oni ne riparis la difektojn, kiujn la tempo kaj la klimataj kondiĉoj de la lando kaŭzadis. Krome la koncentriĝo de la registaraj servoj en Moskvo faris pli terura la problemon.

La luprezoj estis malgrandaj, sed etan avantaĝon oni atingis per tio, ĉar tio esenca estis povi trovi loĝejon, kio estis nefarebla.

Por la distribuo de la ĉambroj samkiel por la disdono de la aliaj varoj, la Konsilantaro de Komisaroj de la popolo kreis ian Komisararon pri la loĝejo, en kiu oni centralizis ĉion, kio rilatis al la problemo.

En ĉiu strato aŭ grupo de stratoj kaj, kelkfoje por duona strato aŭ grupo de domoj, estis komisiono de najbaroj. Ĉi tiu komisiono estis ĉiam prezidita de elprovita komunisto, konfidulo de la partio, kiun oni konsideris, kiel dungiton de la ŝtato kaj, kiu ricevis salajron kvazaŭ laborus en manlaborejo.

Lia komisio estis statistiki la loĝejojn, kiuj estis zorge de la komisiono, kiun li prezidis. Li prizorgis la translokiĝojn de ĉambro, kiujn realigis la najbaroj; li nomumis pordistojn en ĉiu domo, kaj, laste, esploris kiuj, kiel kaj kiam vizitis ĉiun najbaron el tiuj, kiuj loĝis en lia kontrolareo. Estis io tiel, kiel la polica Arguso de ĉiu domo, de ĉiu privata loĝejo. Li eĉ povis aresti la vizitanton, kiu al li ŝajnis suspektinda. Ankaŭ apartenis al lia komisio enkasigi la luprezojn kaj ordoni la riparojn. La malsimpatio per kiu ĉiu najbaro rigardis la kamarado-prezidanton de la komisiono de la domo, kie li loĝis, ege alprosimiĝis al la malamindeco.

Ĉi tion faris la Registaro. Ni vidu kion faris la popolo.

Al Kibalchiche kaj al eksprezidanto de Komisiono de najbaroj de Petrogrado, ni ŝuldas la grandvalorajn donitaĵojn, kiujn ni donas tuj poste.

La revolucio de novembro, kiu akcelis la okazaĵojn komencitajn de tiu de marto, permesis per la absoluta superregado de la popolaj klasoj realigi la tutan kaj kompletan eksproprigon de la nobelaj kaj kapitalismaj klasoj.

La elpelon de la grandaj bienuloj el iliaj bienoj sekvis tiu de la industriistoj el iliaj fabrikoj, kaj poste tiu de la propruloj de nemoveblaĵoj.

La laboristoj de la laboristaj kvartaloj, la proletoj, kiuj ĝis tiam loĝadis en malpuraj kaj naŭzaj domaĉoj, ŝarĝis siajn uzaĵojn kaj loĝiĝis en la plej bonaj domoj, kiujn ili trovis disponeblaj.

La maljustecoj kaj la misuzoj, neeviteblaj en tiaj okazoj, faris sian aperon.

El iuj riĉaj domoj, kvankam ne en multaj okazoj, oni elpelis ĝiajn loĝantojn kaj oni ilin ĵetis surstraten, lasante ilin sen loĝejo.

Ĝenerale oni devigis ilin okupi limigitan nombron da ĉambroj kaj loĝis la laboristaj familioj en la ceteraj. Sed la disdono multokaze estis arbitra.

Krome necesis antaŭvidi la konsekvencojn, kiujn estigas tiel granda malordo, kaj oni devis pensi pri la riparoj, lumo- kaj akvo-provizado, ktp, ktp.

Baldaŭ per tiu profunda intuicio, kiun havas la popolo kaj, kiu nur bezonas la stimulon por aperi, oni organizis komisionojn de najbaroj, kiuj provizis la bezonojn de ĉiu strato kaj ĉiu konstruaĵo.

Ili determinis la luprezon de ĉiu ĉambro; statistikis la disponeblajn loĝeĵojn; decidis kaj realigis —afero, kiun poste oni ne daŭrigis— la bezonatajn riparojn; ili starigis pli justajn disdonojn ol tiuj efektivigitaj dum la unua impulso kaj, fine, ili ordigis ĉion laŭ la plej bona ebla maniero laŭ la interkonsentoj kaj la opinio de la plimulto de la najbaroj.

La asembleoj de ĉi tiuj komisionoj oftis, kaj en ili, oni solvis la aferojn per la plej simpla kaj harmonia maniero.

—La kontentigo estis ĝenerala— diris Kibalchiche kaj la eksprezidanto de la Komisiono kun kiuj ni parolis. Malofte, malgraŭ la profunda konfuzo, kiun kaŭzis la revolucia fakto, okazis malakordo aŭ disputoj inter najbaroj.

Neprofiteme, per altruismo, kiu estos neniam sufiĉe laŭdata, solviĝis la aferoj kaj ĉio iris glate.

Sed la bezono, kiu estas preskaŭ ĉiam la patrino de ĉiuj novigadoj, komprenigis, ke ankoraŭ mankis multo farenda.

Ĉiu Komitato de domoj aŭ de strato rimarkis, ke la problemo estis pli malsimpla kaj, ke ĝi sufokis sin en sia propra verko. La plivastiĝo nepris, se oni ne volis perei. Kaj estiĝis la interkonsento.

La Komitatoj de apudaj domoj aŭ de apudaj stratoj federaciis inter si, malfondiĝis unuj, organiziĝis aliaj; ĉi tio donis pli grandan plivastigon al ĉiuj kaj moderigis la komence aperintajn malfacilaĵojn.

Baldaŭ fondiĝis la Federacio de la Komitatoj de la tuta ĉefurbo, kaj sen oficialaj disponoj, sen reĝaj ordonoj kaj iaj urbaj regularoj, la najbaroj de Petrogrado pro sia propra iniciato havis preskaŭ solvita la problemon de la loĝejo.

Oni difinis la luprezojn, kiu estis tre malaltaj; faris la necesajn riparojn; konsilis kaj realigis interŝanĝojn de

ĉambroj inter la laboristoj, kiuj havis la loĝejon tre malproksima de la laborloko kaj disdonis la ĉambrojn per la plej rigora justeco.

Dum ĉio ĉi periodo, kiu daŭris ĉirkaŭ jaron kaj duonon, ne okazis unu sola elhejmigo, nek restis sen gastejo iu familio.

Pensante pri la estonteco, de ĉiu luprezo oni dekalkulis prudentan procenton por daŭrigi la novajn konstruojn kaj oni destinis subvenciojn por la konservado de konstruaĵoj.

La higienon en la domoj oni notinde plibonigis kaj la pureco estis ekzempla.

En ĉiu domo, laŭ rigora deĵoro, escepte de neeviteblaj cirkonstancoj, ĉiu najbaro ĉiusemajne estis devigita certigi la purecon de la ŝtuparo kaj okupiĝi pri la depostuloj, kiujn oni transdonis al la Komitato, por ke ĉi tiu solvu aŭ informu al la asembleo.

Ĉiuj povis libere eniri kaj eliri, akcepti tiun, kiun li volus kaj enhejmigi kaj doni loĝejon en siaj ĉambroj al la personoj, kiuj estus de lia amikeco aŭ plaĉo.

Libero; plena libero de ĉiu dum li ne malutilus al tria persono.

Sed ĉi tio ne konvenis al la Registaro. La diktatorado de la proletaro, la centralizado de ĉio, kompreneble koliziis kun la spirito de libero de tiu institucio kreita de la popolo.

Tamen ne konvenis detrui ĝin. La praktiko pruvis ĝian utilecon. Pli bone ol detrui ĝin, konvenis kapti ĝin. Kaj ili sukcesis, kvankam ne sen penadoj kaj protestoj. Oni komencis prezidantigi komuniston en ĉiu Komitato aŭ Komisiono. La Komitatojn aŭ Komisionojn en kiuj oni ne povis atingi la prezidantopostenon por konfidulo, oni minacis

per la malfondo sub preteksto de kontraŭrevoluciaj intrigoj. Oni limigis la nombron da Komitatoj kaj, kiel fina bato, oni asignis salajron al la prezidantoj, egaligintaj ilin al funkciuloj de la ŝtato kaj oni ilin rajtigis penetri en la loĝejon de ajna najbaro kaj aresti, kiel ni jam diris, tiun, kiu al ili ŝajnis suspektinda.

La komunistoj tre bone konformiĝis al ĉi tiu polica rolo; la disciplino de la partio ĝin altrudis. La aliaj ne ĝin akceptis kaj amase okazis la eksiĝoj tiel, ke la Registaro ne plu havis obstaklojn.

—De post ĉi tiu momento— al mi asertis miaj informantoj— la Komitato aŭ Komisionoj de Domoj perdis sian efikon kaj iĝis peco plia de la peza komunista burokratismo.

La najbaroj ĉesis interesi sin pri la problemo de la loĝejo; ekaperis la favorismo. kaj la bolŝevikoj, mastroj de la situacio, detruis tion plej belegan el la kolektiva aktiveco: la individuan iniciaton.

Neniu volis esti prezidanto de la Komitato por ne malamikiĝi kun siaj najbaroj, nek havi la respondecon de la posteno. Abomenis ilin ankaŭ iĝi parazitoj. Ili malakceptis la komision, kiu al ili donis aŭtoritaton de informantoj, policistoj kaj traserĉantoj de loĝejoj. De tiam la Komitatoj aŭ Komisionoj, kiuj tiom kaj tiel gravajn servojn realigis, kiuj tiom da maljustecoj kaj arbitrecoj evitis, kiuj tiel juste kaj humane solvis tiel gravegan problemon, kiel estis tiu de la loĝejo, ĉesis ekzisti, por esti anstataŭita de karikaturo de Komisiono, al kiu nur akompanis la plej grandioza malestimo de la civitanoj. Mortis unu el la pli simpatiaj institucioj, kiun la revoluciaj ardo kaj febro estigis.

La ŝtata grandegulo ĵus detruis per sia senforma kruro la plej promesplenan burĝonon de la spontaneeco de la popolo.

9a. Publika instruado

En la klarigo aŭ rakonto, kiun ni estas faranta pri tio, kion ni vidis dum nia vojaĝo tra Rusujo, ne ĉio, kion ni diras devas esti malmola, kruda kaj korŝira. Io estas, kio povus kompari sin kun la oazoj, kiujn la vojaĝanto trovas en la dezerto.

Ĉu ĉi tio volas aŭ oni devas diri, ke ĉio, kion ili faris pri publika instruado, devas senkondiĉe esti akceptita? Neniel. La eraroj de organizo plenumitaj de la bolŝevikoj en la ordigado de la socia kaj ekonomia vivo de Rusujo, ne ĉesas aperi ankaŭ pri tio, kio rilatas al publika instruado; sed danke al la intenco, kiu ilin gvidis kaj al la rezultoj, kiujn ili povos atingi, eblas fari el ili abstraktecon kaj konsideri laŭ iliia rigora valoro la faritaĵojn profite de la kulturo de la popolo.

Ripeti ĉi tie, kion pri la rusa analfabetismo oni diris antaŭ la milito kaj dum la unuaj tempoj de la revolucio, estus monotone, ĉar estas tro konata. Tamen oni al ni permesos, ke ni citu donitaĵojn pli elokventajn per si mem ol ajna komento.

Petrogrado, ĉefurbo de la imperio, kun pli ol miliono kaj duono da loĝantoj, en 1914 havis, laŭ statistikoj de la cara reĝimo mem, ĉirkaŭ sesdek procenton de analfabetoj.

En 1920, la loĝantaro de Petrogrado malpliiĝis al okcent mil loĝantoj —malpliiĝo, kiu okazis pro la translokiĝo de ĉiuj registaraj servoj al Moskvo kaj la malapero de la burĝaro— kaj laŭ la statistikoj, kiujn al ni montris la bolŝevikoj, faritaj tiam, nur tridek mil el ĝiaj loĝantoj ne sciis legi nek skribi.

Ni volas akcepti defende de la oficialaj troigoj, ke la nombroj, kiujn oni al ni donis, estis iom troigitaj; ni volas

supozi, altigante ĝis la maksimuma limo nian suspektemon, ke tiuj nombroj estus pliigitaj ĉirkaŭ dudek kvin procento. Ankoraŭ ĉi-okaze, la kvanto da analfabetoj konsiderinde malpliiĝis.

Kiujn rimedojn uzis la bolŝevikoj por atingi ĉi tiun rapidan malpliiĝon? Mastroj de la ŝtato, sistemaj en ĉiuj siaj proceduroj, ili ankaŭ tiel agadis pri la instruado. De la devo ĉiutage ĉeesti en la lernejo determinitan nombron da horoj kaj eĉ ne koncedi la laborpostenon en la fabriko al tiu, kiu ne volis lerni legi nek skribi, ĉio estis provita. Oni povas diri, ke ili uzis ĉiujn trudadojn, la moralajn kaj la materialajn, por atingi la proponitan celon.

Tiuj, kiuj asertas, ke la popolo ne sentas la neceson scii, tute eraras. La popolo havas kaj sentas la aspiron scii. En la rusaj lernejoj oni vidis tipajn okazojn.

Tre oftis vidi maljunulon aŭ plenaĝulon blankharan pro la jaroj kaj tre lacan pro la laboro, eksterordinare strebi por deĉifri la hieroglifojn, kiujn por liaj okuloj prezentis la karakteroj de la skribaĵo, kaj voli penetri la misteron de tiuj signoj. Li komprenis, ke la ampleksa horizonto aperinta al lia menso post la revolucio, li nur povus observi ĝin sciante legi kaj skribi kaj pro tio li strebis lerni.

Metita je lia atingo la lernejo, li iris al ĝi kun la fervoro de kiu atendas la miraklon de sia feliĉo.

Sed ne estis nur por la plenaĝuloj por kiuj la bolŝevikoj altrudis la instruadon; ankaŭ estis por la infanoj. Kaj se la trafo ne prezidis ĉiujn iliajn agojn, oni ne povas kulpi ilin neglekti la korektadon de la eraroj.

La organizo de la bolŝevika publika instruado, kiel de ĉiuj iliaj organizoj, estas absolute centraliza.

La instruisto, ĉefe la instruisto de unua edukado, preskaŭ estas la lasta dento de la dentaĵo, kiu impulsas la

instruadon. Li povas havi nenian iniciaton kaj ankoraŭ malpli praktiki ĝin. Se li iun havas, povos klarigi ĝin, kiam la superularo lin konsultos, kaj apliki ĝin se tion rajtigas la programo, kiun oni ĉiujare ellaboras; sed nenio pli. La instruisto devas ĉiam alĝustiĝi al la normo, kiun la programo aprobita de la Komisararo pri publika Instruado lin diktas.

Ĉi tiu programo estas la sintezo de ĝenerala konsulto, kiun oni ĉiujare faras al ĉiuj instruistoj de la sovetia Rusujo, sed, pro tio mem, ĉar estas sintezo kaj ne la diverseco de aspektoj, kiujn la instruado bezonas, estas pro kio ĝi rezultas malutila.

Estus rekomendinda ĝia apliko se ĝi estus prenita kiel deirpunkto, kiel skemo, kiel ĝeneraligo por unuigi la rezultojn de la instruado, kaj oni permesus al ĉiu instruisto, ke li ĝin poluros, klarigos, kiel pli bone ĝin komprenos, ke eltiros el ĝi la plej bonajn sukojn, la elementojn: gvidojn de la laboro komisiita. Sed ne estas tiel kaj tial la neutileco de la entreprenita verko.

Parolante pri la formoj de organizo, ni diru, ke la Komisararo de publika Instruado estas konsistigita de "Estraro", speco de Komitato, subdividita en pluraj sekcioj. Ĉi tiuj sekcioj, kiu estas ses kaj, kiuj havas sian propran prezidanton, estas: pri Artoj, pri Organizo, pri socia Edukado, pri scienca Sektoro, pri eksterlerneja Laboro kaj Komitato pri publika instruado.

La prezidantoj de ĉiu el ĉi tiuj sekcioj, preziditaj siavice de la Komisararo pri publika Edukado, estas la konsistigantoj de la "Estraro".

Ĉio, kio rilatas al la instruado, de la akiro de materialo en la lasta lernejo de grupo de domoj ĝis la koncedo de titolo de doktoro en ajna scienca branĉo, ĉio devas esti aprobitaj de ĝi. Nenio estas ekster ĝia kontrolo.

Ĉu necesas krei lernejon en unu el la plej malproksimaj vilaĝetoj de Rusujo? Sen la aprobo de la "Estraro" ne eblas.

Ĉu oni devas akiri novan materialon aŭ anstataŭi la malnovan? Oni ne povas fari tion sen la konsento de la "Estraro".

Instruisto, al kiu la ĉiutaga praktiko montras, ke povus enkonduki sin iu modifo en la jara programo al li sendita, prenas notojn, redaktas Raporton, ĝin sendas al la plej proksima Komitato por la publika Instruado, ĉi tiu ĝin transdonas al la supera, kaj tiel ĝis ĝi alvenas al la "Estraro". Se la "Estraro" rajtigas la modifon en la programo, ĝi povas apliki sin; male, ne.

La sekcioj preziditaj de la konsistigantoj de la "Estraro" siavice subdividas sin en kvin sekcioj, kiuj estas pri ekonomio, pri financoj, pri asembleoj, de centra oficejo de interligo kaj pri materialo. Ni devas averti, ke iuj el ĉi tiuj sekcioj, kiel tiu pri Arto kaj tiu pri eksterlerneja Laboro, estas subdivididitaj en sep sekcioj, la unua, kaj en dekunu, la dua.

Sed ne finiĝas ĉi tie la serio de subdividoj, nek la sekcioj, kiuj dependante, ĉu de unu el la superaj sekcioj —ni tiel nomas tiujn, kiuj donas siajn prezidantojn al la "Estraro"—, ĉu de unu el la subdividoj de ĉi tiuj lastaj, konsistigas la komplikegan bolŝevikan organizon.

Restas sekcioj, kiel tiuj pri Eldonoj de la ŝtato, Instruado de malgrandaj nacianecoj kaj tiu de la ĝenerala Direktistaro pri Arkivoj, kiuj konsistigas apartan zonon, t. e., ke apartenante al neniu el kiuj rekte dependas de la "Estraro", ne estas sekcio aŭtonoma de ĉi tiu; sed ili al ĝi estas rekte ligitaj, ĉar dependas de neniu el la unue menciitaj sekcioj.

La programo de la lernejoj estas mikskonsista, konsistigita de la amerika kaj la Montesori-a sistemo.

La manko de lernolibroj estis kaŭzita de neniu pedagogia metodo, sed pro oni ne disponis rimedojn de ellaborado.

La ĉeesto de la infano en la lernejo komencis (ni rimarkigas, ke ĉio ĉi estis intencoj, kiuj pro la malabundeco de ejoj, de instruistoj kaj la ĝenerala mizero, ne havis tujan aplikon) kiam la etulo jam sola piediris. Tiam ili eniris en la Lernejoj-Azilojn, kaj jam fariĝintaj la tri jaroj de aĝo determinitaj por ilia restado, ili eniris en la lernejo-ĝardenon, kie restos ĝis la aĝo de sep jaroj.

La tipo de ĉi tiu lernejo aŭ domo-ĝardeno ne estis ununura, ĉar ili havis, kiel projekton, krei du tipojn de lernejo. Unu en kiuj la infano restus la tutan tagon, dormante ekstere, kaj alia, en kiuj li estus en kvalito de internulo. Tiel en unuj, kiel en aliaj, la vivtenado de la infano estas respondeco de la ŝtato.

La aĝlimo en la lernejoj-ĝardeno estis ĝis la sep jaroj. Post ĉi tiu aĝo, li devus eniri en tiun, kiun ni jam povus propre nomi elementa lernejo. Tie li povos ĉeesti ĝis la dekses jaroj.

Fariĝinte la sep jaroj de aĝo la infano forlasas la lernejo-ĝardenon por eniri en la praktikan lernejon (tiel oni al ni diris, ke ĝi nomiĝis), estas kiam oni vere povas diri, ke regas la lerneja edukado.

Antaŭ ĉi tiu eniro, oni faras la klasifikon de la malsanuloj kaj nenormuloj kaj sendas ilin al la specialaj lernejoj starigitaj por ili.

Jam en la praktika lernejo komenciĝas por la infano la eduka vivo. Al la instruado pri la literoj aldoniĝas la praktika instruado, laŭeble. Tiel, por doni al la infano la senton pri la

utileco de la geometrio, oni havigas al li la unuajn spertojn pri ĝi, komencante instrui lin mezuri la benkon sur kiu li sidiĝas, la spacon de la lerneja ĝardeno aŭ de la salono de la klasoĉambro. Egalan proceduron oni plenumas por enkonduki lin en la teknikajn konojn pri la terkulturo aŭ la desegno. Ĉi-aspekte la iniciato de la bolŝevikoj estas tre rimarkinda kaj iliaj provoj pri eduko devas esti utiligitaj de ni, sed ni devas preterlasi ĉiun partian koncepton.

Ni devas rekoni la bonan orientiĝon de la bolŝevikoj en la lerneja instruado. Iliaj proceduroj ne estas perfektaj, sed montras grandan superecon super la burĝaj.

Krome, inter la instruistoj kaj pedagogoj ekzistis kontraŭaj tendencoj pri la reformoj, kiujn oni devis enkonduki por akiri pli bonan rezulton el la paso de la knabo tra la lernejo. La unuformeco pri ĉi tiu aspekto, kiel pri ĉiuj aliaj, ne ekzistis. Kaj kvankam la centralizado sufokis la voĉojn de tiuj ne konsentaj kun la kriterio de la "Estraro", veras, ke la malkonsento manifestis sin.

Dum sektoro defendis la konvenecon, ke oni limigu pro la aĝo la restadon de la knabo en la diversaj tipoj de lernejo jam kreitaj aŭ kreotaj, la partianoj de la alia tendenco volis, ke la restado dependu de la grado de kapableco de la knabo.

Ili asertas, ne sen pravo, ke sepjaraĝa knabo povas akiri pli konojn ol alia dekjaraĝa. Kaj dum la pli malgrandaĝulo, kvankam pli instruita, elirante el la lernejo-ĝardeno kaj enirante en la praktikan lernejon devas aliĝi al la unua kurso, la alia, la pligrandaĝulo kaj malpli instruita, ĉeestos en la tria aŭ kvara kurso de la praktika lernejo.

Ĉi tiu rezonado rezultas pli solida pro la fakto esti gradigitaj la lernejoj.

La elekto, ili diras, devas fari sin laŭ kapabloj, ne laŭ aĝoj. Kaj ĉi tiu kriterio al ni ŝajnas la plej justa, kvankam ne estas la oficiala en Rusujo.

La praktikaj lernejoj pri kiuj ni paroladas dividas sin en du gradoj: la unua enhavas la geinfanojn de sep ĝis dekdu jaroj; kaj la dua tiuj de dekdu ĝis dekses.

Ĉi tiu divido estas simple teknika, t. e., ne havas alian celon ol faciligi en la instruado la taskon de la instruistoj.

Ĉi tiu sama divido, laŭ gradoj aŭ cikloj de instruotaj temoj, postvivas en ĉiuj bolŝevikaj publikaj institucioj, de la elementa lernejo ĝis la Universitato aŭ Alta Lernejo.

La statistikoj montritaj al ni, kun la nombro da ekzistantaj lernejoj, estis sufiĉe nekompletaj, sed ne ĉesis montri konstantan kreskon kaj grandegan superecon super la cara reĝimo. Donos proksimuman ideon pri la malabundeco scii, ke por lerneja loĝantaro de ĉirkaŭ ok milionoj da infanoj, triono el ili ne povis ĉeesti en la lernejoj, ĉar mankis ĉi tiuj.

Aneksitaj al la lernejo, kiel plilongigo kaj pligrandigo, ekzistis lernejaj kluboj kaj bibliotekoj; kiujn permesis establi la ekonomiaj rimedoj, kiujn ili disponis.

Je la dekses jaroj, kiam la knabo devis forlasi la praktikan lernejon, li povis realigi la studojn de sia prefero.

Elekti universitatajn studojn ne sendevigas post certa aĝo labori en mana laboro, escepte de la dudek kvin mil studentoj, kiujn la ŝtato prenos sub sia respondeco. Al ĉi tiuj, kiuj antaŭe nur estis dek kvin mil kaj, ke antaŭ nelonge oni altigis la nombron ĝis dudek kvin mil, la ŝtato kovris iliajn necesojn. La ceteraj ĝis 116.947, kiuj tiuepoke studis, devis labori almenaŭ kvar horojn en mana ofico.

La ekzamenoj komence ankaŭ estis forigitaj; sed tiam oni jam parolis pri restarigi ilin. Por iuj lernofakoj jam tiel estis.

La kvanto da kluboj, bibliotekoj kaj ĉambroj de legado por la studentoj estis tre konsiderinda, kvankam la studeblaj temoj estis tre limigitaj. Tio sola, kio abundis estis la bolŝevikisma literaturo. De ĉi tiu, oni ja faris realan konsumon.

Ili asertis al ni, ke la nombro da establitaj bibliotekoj superis la cent mil kaj la dekdu mil tiu de legadĉambroj.

La nombro da Popolaj Universitatoj superis la centon.

La lasta dekreto de la Komisararo pri publika Instruado, dum nia restado en Rusujo, temis pri la privataj bibliotekoj. Oni dekretis, ke ĉiu biblioteko de pli ol kvin mil ekzempleroj estos konfiskita por transdoni ĝiajn librojn al la publikaj bibliotekoj. Oni esceptis el la konfisko tiujn de la sciencistoj, kiujn la Registaro rekonis kiel tiajn kaj, kiujn ili bezonas por siaj esploroj aŭ sciencaj studoj.

Du vizitojn ni faris al institucioj de instruado dum nia restado en Moskvo. Unu al la Popola Universitato kaj alia al lernejo-ĝardeno de la antaŭurboj.

En la Popola Universitato ni estis akceptitaj de ĉiuj instruistoj kun la direktisto ĉekape kaj komisiono el komunistaj studentoj.

Ni trairis ĉiujn ĉambrojn. Ni vizitis la klasĉambron, la bibliotekon, la manĝejon, la ĝardenojn de lernopaŭzo kaj la dormoĉambrojn, ĉar preskaŭ ĉiuj studentoj, tio estas, la granda plimulto, estis komunistoj, kiujn la provincaj Sovetoj sendis al Moskvo pro peto de la Partio por eduki ilin pri la marksismaj teorioj, ne havis familion kaj tial la karaktero de internuloj de la plimulto de ili.

Ni demandis kiun normon oni uzis por la akcepto de lernantoj kaj ili respondis al ni, ke tiu decidita de la partio, ĉiam donante la preferon al la komunistoj.

Preskaŭ ĉiuj nuntempaj lernantoj, al ni diris la direktisto, estis komunistoj venintaj de provincoj, kiuj venas por pligrandigi siajn konojn pri la marksismo por atingi esti propagandistoj kaj diskonigantoj de la komunismo.

Ĉi tie oni ilin preparas per skribaj kaj parolaj ekzercoj por la kono de la filozofio, kvankam prefere la marksisma.

La kursoj estas diversaj kaj de pli aŭ malpli da daŭro. Estas kursoj de nur ses monatoj. Ĉi tiujn faras la kamaradoj, kiuj venas prepari sin por la laboro de organizo de la Partio kaj la homamasoj.

Tiuj, kiuj faras la kurson de daŭrjaro, estas, krom organizantoj, diskonigantoj de la marksismo: verkistoj, oratoroj, ktp. Kaj tiuj, kiuj faras la superajn kursojn, ampleksas ĉiujn aspektojn de la filozofio ĝenerale.

—Kaj la rilatoj inter la instruisto kaj la lernanto, kiuj estas? —Ni demandis.

—Tiuj de vera kamaradeco –oni al ni respondis—. Kiam venas la lernanto, li jam estas destinita al determinita klasĉambro. En la demandaro, kiun por la akcepto de lernantoj ni periode sendas al la provincaj Sovetoj, oni jam informas, ke ĉiu lernanto devas elekti la klason de studo, kiun li preferas, indikante ĝin je la momento peti sian enskribon.

—Kaj kiu nomumas la instruistojn?

—La instruistoj estas nomumitaj de la Estraro de la Komisararo pri Publika Instruado.

—Do ĉu la lernantoj de la Popola Universitato ne povas enoficigi aŭ malakcepti instruiston, kiun ili ne ŝatas aŭ opinias nekaplaba?

—Ili ne povas fari tion. La malmulta tempo, kiun daŭras la kursoj, estas nesufiĉa por ke povu la lernantoj elekti la instruistojn.

—Kaj kiel oni procedas, kiam finas la lernanto sian kurson por scii se li havas la necesajn kapablokondiĉojn?

Alilande oni scias aŭ supozas scii tion per la ekzamenoj. Kiel en Rusujo ili estas forigitaj, oni ne povas scii tion per tiu proceduro.

—La instruisto tenas kajeron de notoj pri ĉiu lernanto kaj laŭ ĉi tiuj estas favoraj aŭ malfavoraj, oni skribas informon al la Komisararo pri Publika Instruado.

—Kaj ĉu vi ne opinias —ni demandis, alparolante al ĉiuj instruistoj—, ke ĉi tiu vivo de intermikseco en la klasĉambroj, en la manĝoĉambroj, dum la lernopaŭzo kaj en la dormoĉambroj ne malutilas la moralon de la individuo? Tiu komunismo pri ĉio, eĉ pri la individuaj intimaj sentoj, ŝajnas al ni, ke malaltigas la personecon de ĉiu, konfuzante ĝin en mikskonsista kaj malklara tuto.

—Ni ne havis okazon observi tion. Kaj kvankam tiel estus, nenion ni povus fari por eviti ĝin. Ĉi tiuj Universitatoj estas kreitaj laŭ la normoj difinitaj de la Partio, kaj ni ne povas modifi aŭ transformi ilin.

—Kiom da lernantoj nun estas en la Universitato?

—Pli ol ducent. La manko de porvivaĵoj devigas limigi la akceptojn.

—Kian porciumon oni donas al la lernanto?

—La porciumo B, kiu estas tiu de liberala profesio.

Finitaj la demandoj kaj la irado tra la ĉambroj, ni iris al la klasĉambro, kie jam kunvenis la lernantoj por akcepti nin.

Delegito el tiuj, kiuj konsistigis la sekvantaron, ilin alparolis, kaj kiel bona marksisto kaj disciplinita bolŝeviko, parolis al ili pri la sovetismo, la diktatorado de la proletaro, la triumfo de la ruĝa komunismo kaj la komisio, kiun la Komunista Partio devis okupi en la monda revolucio.

Instruisto al ni donis la bonvenon dankante al ni la viziton.

Poste lernanto, la konfidulo, la elprovita komunisto, kiu tie reprezentis la Komunistan Partion, parolis pri la heroaj agoj de la Komunista Partio, la nemezurebla kuraĝo de ties homoj, la grandioza revolucio, kiun ili faris por emancipi la popolon; ankaŭ al ni li parolis pri la glora kaj neforgesebla ruĝa armeo, firmega subtenilo de la Socialista Respubliko kaj brava plenumonto, en venonta tago, de la monda revolucio. Ni estis en plena mesia apoteozo.

Finitaj la paroladoj, ni foriris kaj nin akompanis ĝis la pordo la lernantoj kaj instruistoj.

La vizito al la Lernejo-Ĝardeno okazis dimanĉon posttagmeze. Oni okazigis feston por la lernantoj kaj oni volis, ke ni vidu ĝin. Ankaŭ oni al ni regalis per posttagmeza intermanĝeto.

En ĉi tiu lernejo-ĝardeno nur ĉeestis geknaboj malpli ol dekdu jaroj, tial estis neniu instruisto, krom tiuj de gimnastiko.

La nombro da instruistinoj estis grandega. Multaj el ili ne studis la profesion de Instruado. Estis filinoj de nobeloj aŭ burĝoj mortintaj aŭ ruinigitaj de la revolucio, kiuj vidante sin en la mizero, elektis la profesion de instruisto por kontribui al siaj necesoj.

Kiel nia vizito al ili estis anoncita, ĉio estis preta por la akcepto.

Ni alvenis iom malfrue pro paneo de la aŭtoj per kiuj ni veturis.

De la enirejo de la ĝardeno ĝis la konstruaĵo de klasĉambroj kaj salono de festoj, la geinfanoj estis lokitaj laŭ vicoj flanke de la vojo. La instruistinoj kun la direktistino atendis nin ĉe la pordo.

Interŝanĝitaj la kutimaj salutoj kaj akompanitaj de la instruistinoj, ni iris al la loĝio, kiun oni al ni destinis.

La festo komenciĝis per la legado de poezioj koncerne la ceremonion kaj infanaj kantoj.

La gajeco de tiuj infanaj vizaĝoj estis grandega. Ili aplaŭdetis, ridis, kriis; leviĝis de la sidejoj kaj iris de benko al alia; ankaŭ kantis la kantojn, kiujn kantis tiuj de la scenejo, plenigante la vastan ejon per la sonoreco de siaj voĉoj.

Finita la unua parto kaj post kiam oni anoncis de la scenejo paŭzon el dek minutoj por prepari la duan, eksplodis bruo el kriadoj kaj ridadoj, infera tumulto, propra de la senmalico kaj senartifikeco de la ĉeestantaro.

En la dua parto de la festo ili reprezentis teatran pecon de infana argumento.

La tre etaj geaktoroj, ĉar estis geinfanoj de la lernejo mem, mirinde reprezentis sian rolon kaj la spektantaro, impresita de la spektaklo, tenis la plej religian silenton.

La bruoj, kriadoj kaj murmuroj de la unua parto iĝis graveco kaj seriozeco en la dua. Nur kiam la teatraĵo finiĝis, ripetiĝis la aplaŭdoj kaj la tumulto.

Dum ĉi tiu paŭzo oni disdonis la posttagmezan intermanĝeton al la geinfanoj kaj la invititoj.

Estis paŭzo el moralaj perfortoj.

Oni rimarkis kiom perforte estis por la instruistinoj, devigitaj honori la vizitantojn, reprezenti ilian rolon.

La konversacioj, ĉefe ĉe la tabloj okupitaj de la delegitoj, estis unusilabaj. La demandojn, kiujn oni al ili faris, respondis jes aŭ ne la instruistinoj. Ili uzis malmultajn vortojn. Nur la direktistino kaj du aŭ tri pliaj, kiuj estis komunistoj, kiuj apartenis al la Partio, estis iom pli parolemaj.

La tria parto de la festo estis dediĉita al gimnastikaj kaj ritmaj ekzercoj.

Nin surprizis, ke la gimnastikaj ekzercoj, eĉ tiuj, kiujn faris la infaninoj, havis militistan karakteron. Ni ne sciis vidi en ili la efikecon kaj ja la malavantaĝojn. Pli ol disvolvi la fizikajn fortojn de la infano aŭ starigi harmonion inter ĉiuj partoj de la korpo, ili atingos deformi ĝin pro troo de rigideco kaj perforto en la ekzercoj.

Dum paŭzo de ĉi tiu parto de la festo, parolis al la infanoj iuj delegitoj.

La unua tion faris en la rusa. Poste parolis en la franca la parulino de Rosmer. Estis vidindaĵo la mirigo de la infanoj pro tiu lingvaĵo, kiun ili ne komprenis.

Tradukitaj al la rusa la vortoj, kiujn eldiris la parulino de Rosmer, la infanoj aplaŭdis kaj al ŝi sendis kisojn kaj ridetojn.

La tria estis la delegito de la aŭstraj komunistoj.

Rigida kiel statuo; farante pli fortajn ol kutime la gorĝajn sonojn de la germana, kaj per seriozeco nepropra al

la loko kaj la ĉeestantoj, li ĵetis al la infanoj paroladon temantan pri Lenino, la Komunismo, la sovetismo, la diktatorado de la proletaro kaj alia serio da similaĵoj, kiuj kaŭzis ĉagrenojn aŭ dezirojn ridi.

La infanoj ankaŭ restis seriozaj kaj silentaj, atendante la tradukon. Kiam oni al ili tradukis la paroladon al la rusa, ili restis ankoraŭ pli seriozaj ol kiam ĝin aŭskultis en la germana.

Kompreneble ili komprenis eĉ ne unu vorton; ili ne sciis pri kio oni al ili parolis.

Finiĝis tiu agrabla festo per popularaj kantoj, kiujn ĉiuj infanoj plenvoĉe ripetis, kaj kiuj kaŭzis aron de teneraj soleneco kaj harmonio.

Ni foriris. La aŭtoj atendantaj nin, veturigis nin al la hotelo. Ni pasigis la posttagmezon for de la tre okupata ĉiutaga diskutado.

La senmalico kaj senartifikeco de la vizaĝoj, kiujn ni observis, iom malpezigis nian animon je la monotona batalado en la kunsidoj de la Kongreso.

La orelŝiran krion de "jes la diktatorado de la proletaro" anstataŭis la sonoreco de la infanaj kantoj.

10a. En la Departemento pri la Terkulturo

Ĉar Rusujo estas ĉefe terkultura lando, ege interesis al ni koni la funkciadon de ĉi tiu departemento kaj pli ol ĝia funkciado, ni volis koni la rezulton de la revolucio en la kamparo. Niaj deziroj nur iomete estis kontentigitaj.

Nesciante la lingvon kaj konvinkitaj, ke ni ne ĉiam renkontos en ĉiu registara Departemento fidelan interpretiston de la franca, ni petis unu al la majoro de la hotelo. Ĉi-okaze ni ne lin trovis. Tiam la kolego Borghi de la "Itala Sindikata Unuiĝo" kaj mi, kiuj estis la dezirantoj fari ĉi tiun viziton, turnis nin al neoficiala interpretisto kaj al ĉi tio mi atribuis nian preskaŭ neutilan viziton al ĉi tiu departemento.

Malgraŭ la penadoj de Sacha Kropotkin, kiu estis la interpretistino, la informoj, kiujn oni al ni havigis, estis tre nekompletaj. Ni tuj rimarkis, apenaŭ komencis la demandojn, kiujn portis en demandaro, ke la komisiito informi nin klopodis eviti ilin aŭ respondis per pretekstoj. Ĉi tiu malkonfido tre ĉagrenis nin, ĉar nenio ĝin pravigis.

Tamen per la informoj, kiujn ni akiris kaj aliaj, kiujn havigis iuj delegitoj, ni povis al ni ellabori juĝon pri la okazintaĵo.

Aliflanke ni devas rimarkigi pro la signifoplena graveco, ke en tiu Departemento oni ignoris la sepdek procenton de la aferoj okazintaj en Rusujo pro la problemo de la tero.

La donitaĵoj estis malabundaj kaj nekompletaj. La plej kriza problemo de Rusujo, la problemo de la tero, kaj tiu de la rilatoj de la kamparanoj kun la Registaro, disvolviĝis ekster la Departemento komisiita de ĝia solvo.

Tiu, kiu legis ion pri la situacio de la kamparano en Rusujo dum la cara reĝimo, opinios kiel ni pri la intereso, kiun vekis la kono de la okazintaĵo pri la tero.

En la malnova reĝimo la postvivadoj de primitiva komunismo evidentis. Kiom da penadoj faris la bienuloj, la malgrandaj terposedantoj kaj la aŭtoritatoj por detrui tiujn ĝermojn, estis vanaj.

La *Mir* (komunista organizo de la laboro) kaj la *Artel* (kolektivisma organizo de la laboro) postvivis ĉiujn klopodojn de engluto realigitajn kontraŭ ili. Kaj sciante ĉi tion, ni tre interesis scii, kio okazis al tiaj organizoj. Sed oni al ni ne povis diri ĝin.

Jam dum nia ekskurso sur Volgo, ni konkludis, ke la problemo de la tero en Rusujo fakte ne ekzistis, almenaŭ kun la karakterizaĵoj, kiujn ĉi tiu problemo kutimas prezenti en la cetero de Eŭropo. En preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, ĝi temas pri malabundeco; en Rusujo ne. En Rusujo, estis kaj daŭre estas, pli ol alia aĵo, problemo de trafikiloj. Estas en la koro mem de Rusujo preskaŭ virgaj regionoj. La homo, pro manko de ŝoseoj kaj vojoj, preskaŭ ne havis okazon meti sur ilin siajn plandojn.

Tial la donitaĵoj, kiujn la Departemento pri Terkulturo povus havigi al ni, havis por ni grandegan gravecon.

Ni jam diris, ke la Registaro de la Sovetoj deklaris la teron, kiel nacian propraĵon kaj disdonis ĝin per individuaj kaj kolektivaj terpecoj. La kolektivaj preskaŭ reprezentas la transformon de la malnova *Mir* en komunisman propraĵon.

Sed kvankam ĉi tiu estas tre interesa aspekto, ne estis kiu pli zorgis nin.

Ni sciis kaj la bolŝevikoj mem al ni konfirmis, ke la dekreto deklaranta la teron, kiel nacian propraĵon sekvis la spurojn, kiujn al li priskribis la kamparana tutrusa Kongreso

okazinta fine de julio 1917, kiam estis ankoraŭ Kerensky en la potenco.

El la informoj kolektitaj en niaj enketoj, ni konkludis, ke la reala fakto de la terdisdono efektiviĝis pli frue ol la publikigo de la bolŝevika dekreto.

Kiam ni demandis al nia oficiala informanto ĉu estis veraj niaj informoj, li tute konfirmis ilin, rimarkigante tamen, ke la divido en multaj regionoj estis artifiko de la posedantoj por eviti la efikojn de la oficiala dispono.

Tre ofte okazis, li diris, ke la posedantoj akordiĝis kun siaj malnovaj laboristoj kaj deklaris antaŭ la loka Soveto, ke la teroj de la unuaj estis disdonitaj inter la duaj.

La laboristoj, naivaj kaj timantaj la revenon de la pasinteco, donis sian konsenton al ĉi tiu trompo kaj la posedanto daŭre ĝuis plene, kvankam kaŝe, siajn posedaĵojn.

Malkovrita la trompaĵo, oni starigis la Komitatojn de Malriĉuloj, t. e., de kiuj neniam havis iun propraĵon kaj lavange forlasis la urbojn direkte al la kamparo por partopreni en la terdisdono.

La membroj de ĉi tiuj Komitatoj, kiel havis neniun kompromison kun la posedantoj kaj, krome, komprenis pli bone ol la kamparano la atingon de la revolucio, malkovris la trompaĵojn kaj realigis, konsente kun la lokaj Sovetoj, novan terdividon.

Rezulto de la agado de ĉi tiuj Komitatoj kaj de la nova terdivido, kiujn ili proponis, estis la unuaj luktoj, kiuj sangomakulis la landon.

La malnovaj posedantoj, samkiel la laboristoj, kiuj ricevis terojn, senhezite kontraŭstaris la disdonojn de la

Komitatoj de malriĉuloj kaj devis interveni la Registaro por tute solvi malkonsentojn.

Sed la konfliktoj pliintensiĝis. La senposedigitoj de la Komitatoj de Malriĉuloj organizis la reziston, kiu atingis karakterojn de enlanda milito. Tamen la Registaro ne povis forlasi la Komitatojn de Malriĉuloj, ĉar ĝi al ili donis vivon kaj preskaŭ ĉioampleksajn povojn, kaj statis antaŭ konflikto, kiu endanĝerigis ĝian propran sekurecon kaj ekziston.

Tiam, plu parolis nia informanto, venis la dekreto de la jaro 1919 malfondanta la Komitatojn de Malriĉuloj. Estis ĉi tiu dekreto unu el la pli resonantaj triumfoj de Lenino en la kerno de la Komunista Partio.

La kontraŭstaro al tiu dekreto estis fortega; sed Lenino devis al ili rimarkigi la danĝerojn, kiuj minacis Rusujon, eksplodi realan enlandan militon milfoje pli danĝeran ol la ĉiariskaj klopodoj de Judeniĉ, Denikine kaj aliaj lakeoj de la monda burĝaro.

Necesis la tuta aŭtoritateco de la estro por triumfi kontraŭ la opozicio.

Post ĉi tiu momento, la funkcioj plenumataj de la Komitatoj de Malriĉuloj estis surprenataj de la lokaj Sovetoj kaj tiel tute solviĝis unu el la plej grandaj danĝeroj minacintaj la sovetian Registaron.

—Kaj la malgrandaj posedantoj, tiuj, kiuj jam en la malnova reĝimo posedis kelkajn hektarojn de tero, kiuj permesis apenaŭ sufiĉe vivteni ilin kaj iliajn familiojn sen la ekspluatado de la fremda laboro, al ĉi tiuj, kiel ilin traktis la revolucio? Kiujn antaŭzorgojn la Registaro prenis por senposedigi ilin?

—Neniuj. Ĉi tiuj restas kiel antaŭe. Nure jam farita la rikolto kaj prenita la parto, kiu kiel porciumo al ili respondas laŭ la oficialaj statistikoj, ili devas transdoni la ceteron al la

dungitoj de la Komisararo pri Provizado. En la reĝimo de posedo de la tero, kiujn ili posedis, nenio variis; en ĉio cetera ili estas submetitaj al la disponoj diktitaj de la Registaro.

—Jes—ni respondis—. Io tiel, kiel kio okazas al la posedantoj de malgranda domo. Ili daŭre estas posedantoj de la domo, sed ne povas disponi ĝin. Estas posedrajto limigita; pli ĝuste imaga ol reala; io tre malsama de la maniero, kiel komprenas la posedrajton monda burĝaro kaj la ĉiulandaj Kodoj.

—Pli-malpli tiel estas—respondis nia interparolanto.

—Ĉu veras—ni demandis—, ke tre ofte la kamparanoj forlasas la terojn, kiuj al ili respondis en la disdono kaj kuniĝante per grupoj translokiĝas por komune plugi la nekultivatajn terojn ignorante ĉiun oficialan intervenon?

—Veras —al ni respondis la informanto—, pri tiuj aferoj ni povas citi multajn, ĉefe en la limoj de la Centra Rusujo kaj Ukrainujo.

En ĉi tiuj regionoj, la kamparanoj obeas naturajn impulsojn, komunigas siajn penadojn kaj translokiĝas de loko al alia kaj kultivas terojn, kiuj estas forlasitaj. Sed la Registaro ĉiam kontraŭstaris tiujn procedojn.

—Kaj pro kio oni opinias, ke okazas tiu impulso de la kamparano?

—Por eviti la oficialajn tributojn kaj impostojn de la Registaro. Kiel ni ne povas al ili pagi iliajn produktojn per varoj, ĉu maŝinoj, ĉu vestaĵoj, ĉu aliaj uzaĵoj, ili ne volas cedi al ni tion, kio al ili malmankas. Ili al la sovetia rublo koncedas neniun valoron. Ĝis antaŭ tre nelonge havis pli da valoro, inter la kamparanoj, la cara rublo ol la sovetia. Nun ili jam estas ŝanĝanta. La stabileco de la Registaro kontribuas al tio.

—Ĉu ne ekzistas la timo—ni argumentis—pri ebla reveno al la reĝimo de privata posedo de la tero?

—Neeble dum ni, la komunistoj, restos en la potenco. Deklarita la tero nacia heredaĵo sen tio, ke la privatulo rajtas vendi, testamenti aŭ cedi ĝin; perdita ĉiu rajto al la fruktuzo de la tero, kiu al li respondis tuj kiam li ne ĝin kultivas, aŭ li mortas; dum reakiras la ŝtato la rajton disponi la terpecon, kiu troviĝas en tiuj lastaj kondiĉoj, la privatulo povas atingi neniun posedrajton. Sekve la privata posedrajto sur la tero ne povas reveni.

—Ni konsentas kun tio, kion vi al ni diras. Sed tiam –ni insistis— la malgranda posedanto, ĉi tiu, kiu konservas la terpecon, kiun posedis en la malnova reĝimo sen tio, ke iu oficiala dispono lin koncernis, escepte de tiu de konfisko de la produktaĵoj, kiuj al li malmankis post la rikolto, ĉu li povas aŭ ne povas vendi, transdoni, testamenti aŭ cedi teron de kiu li daŭre estas tute laŭleĝa proprulo?

—Ni povas diri nenio pri tio, ĉar nenio estas leĝfarita. Kvankam oni povas pensi, ke tiu posedrajto tenas sin nefirma, ĉar la tuta rusa teritorio estas proklamita, kiel propraĵo de la regno.

—Ŝajne —ni kontestis— tiu devus esti la oficialaj senco kaj interpretado de la leĝfaritaĵo. Sed ni scias, ke nuntempe ekzistas granda spekulacio pri teroj kaj tiuj propraĵoj; ke oni faras privatajn kontraktojn inter la nuntempaj posedantoj kaj la novaj aĉetantoj; ke per tiuj bienoj realiĝas komercaj interkonsentoj kontraŭ sufiĉe granda monkvanto, tial ŝajnas, ke la oficialaj disponoj ne interpretiĝas laŭ la senco, kiun oni al ni asertas.

—Eble ekzistas tiu privata komerco, nova aspekto de la spekulacio; sed tio nenion influas sur la sovetia politiko kaj ne povas esti motivo de reveno al la pasinteco.

—Tamen—ni kontestis—la sekureco per kiu tiuj homoj agadas ne estas motivo, kiu nin trankviligas estontece.

—Ĉu vi povus doni al ni—ni demandis—kelkajn statistikajn donitaĵojn pri la organizoj, Komunumoj aŭ komunistaj Propraĵoj, kiujn la Sovetia ŝtato aŭ la privatuloj kultivas kaj per kiuj rilatkondiĉoj subtenas sin unuj kaj aliaj kaj ĉu malpliiĝas aŭ pliiĝas la kultivado de teroj?

—Kun plezuro. La nombroj, kiujn ni al vi donos rilataj al la Propraĵoj kaj Komunumoj, estas oficialaj. Ekster ili ankoraŭ restas multaj organizoj, sed ni nur povas doni tiujn, kiuj aperas en niaj statistikoj, kiel oficiale rekonitaj de la Registaro. Tiujn pri la kultivado de la disdonitaj teroj ni al vi ne povas havigi, ĉar ili ne povis fariĝi.

—Ĉu eĉ ne proksimume?

—Ne; ni nur al vi donos malkunajn donitaĵojn.

—Ĉi-okaze, kio al ni interesus scii estas ĉu pliiĝas aŭ malpliiĝas la kultivado de la tero kaj al kiuj kaŭzoj oni povas atribui tion.

—La kultivado de la tero malpliiĝis de la revolucio ĝis nun preskaŭ kvardek procento, laŭ la donitaĵoj, kiujn havas ĉi tiu Departemento. La kaŭzoj de ĉi tiu malpliiĝo estas tre kompleksaj kaj diversaj; ĝi okazas pro diversaj fenomenoj.

Tiel, ekzemple, estas regionoj, kie la kamparanoj ne kultivas la teron pro manko de uzaĵoj por fari ĝin. Malabundas la semoj, kiuj estas konsumataj pro la malabundeco de produktoj; kaj antaŭ ol malsati ili ilin destinas al la nutrado de la popolo. Ankaŭ malabundas la bestoj por helpi la kamparanon. La ĉevalo, sen kiu la rusa kamparano estas nekapabla por la kultivado, konsiderinde malpliiĝas. Estas regionoj, kie ĝi estas tuj malaperonta.

Pri maŝinoj kaj aliaj mekanikaj uzaĵoj por la plugado, sterkaĵoj inkluzive, ne necesas diri, ke ili tute malabundas.

Antaŭ la milito Rusujo dependis de la landoj de Eŭropo por tiu afero; la blokado tute neebligis provizi nin kaj renovigi kaj pliigi tiujn, kiuj estis.

Alia el la kaŭzoj, kaj eble la plej grava, estas la pasiva rezisto de la kamparano kultivi la teron. Li laboras pri ĝi, sed nur laŭ sufiĉa kvanto por la vivtenado de sia proksimularo.

Kontraŭa la kamparano al la deviga konfisko, li faras ĉion, kion povas por eviti ĝin. Ne estas stranga, sed tre ofta, la okazo de kamparanoj, kiuj faras konservujon en la monto, en malproksimaj kaj kaŝitaj lokoj por kaŝi la rikoltitajn produktojn kaj tiel eviti la konfiskon. Ĉar ili kultivas tion sufiĉan por la vivtenado de la familio, se ili ne adoptus ĉi tiujn singardecojn al ili mankus; ĉar kiam la Registaro deprenas la parton, kiu al ĝi respondas, al ili mankos por postvivi de iu rikolto ĝis alia.

—Kaj kial okazas, ke leĝigita de la Sovetia Registaro la posedo, kiun de la tero faris la kamparano dum la disvolviĝo de la revolucio, ili nun rifuzas helpi ĝin?

—Estas pro egoismo kaj spekulacio. La kamparano volas havi la liberon vendi siajn produktojn al kiu volas kaj kiel volas. Interŝanĝi aŭ taksi ilin laŭ valoro kaj laŭ sia propra volo. Tio, kion li ne volas, kion malakceptas kaj malamas per ĉiu energio estas la registara enmiksiĝo en liaj aferoj. Estas la etburĝa kriterio, kiu montriĝas.

—Ĉu ne estos pli ĝuste la deziro vivi per plena libero, aranĝi la aferojn laŭ lia kriterio, organizi la produktadon kaj konsumadon surbaze de libera komunismo kaj ne de ŝtata komunismo, kiel tiu, kiun al li oni altrudas?

—Ne; tio, kion li volas estas gajni monon. Eltiri la plej grandan profiton el sia laboro. Akiri la maksimuman gajnon

el tio, kion li produktas kaj ne aliaĵo. Vi forgesas, ke la rusa kamparano estas analfabeto kaj tre malklera. La vivo en li estas preskaŭ instinkta, rudimenta, besta sento, sen iom da idealeco.

Kiel li estis ĵetita de multaj jarcentoj de sklaveco kaj tiraneco en la barbarecon; dum li vidis, kiel liaj ekspluatantoj elspezis por senbridaj luksoj kaj skandalaj orgioj tion, kion li konsideris nepra por vivteni sin; kiel li estis humiligita, mokita kaj malestimita, la timo al la pasintaj malsato kaj mizero vekis en li sentojn de avareco.

Li avidas gajni multe, multe; ju pli gajnoj, des pli bone por savi sin de la eventualaĵoj de la malabundeco.

Li estas komunisto; sed estas pro instinkto, ne pro iu supera sento. Li laŭsperte scias, ke la laboro komune produktas pli ol la individua, tial lia komunismo. Nun, kiam li atingis la liberon de la laboro, ankaŭ volas disponi kion produktas por akiri pli grandajn profitojn.

—Veras, ke estas tre malsimpla ĉio ĉi.

La nombro da Komunumoj kaj da *Artel*-oj, kiuj, oni al ni diris, tiam ekzistis en Rusujo, estis de dek kvin mil, lokitaj inter la centraj provincoj de Rusujo.

En Niĵni Novgorod estis dek sep Komunumoj kaj cent dudek tri *Artel*-oj. En Astraĥano, dek naŭ Komunumoj, kvincent naŭdek unu *Artel*-oj kaj dek kvin grupoj de afineco.

En Saratov, sesdek ses Komunumoj kaj ducent dudek ses *Artel*-oj.

En la Gubernio de Smolensk ducent grupoj de afineco, naŭdek ok *Artel*-oj kaj tridek tri Komunumoj.

La surfaco de hektaroj da tero atribuita al ĉiu Komunumo aŭ *Artel* tiel, kiel al la grupoj, konsiderinde variis.

El la rikoltitaj produktoj en la komunistaj propraĵoj kaj *Artel*-oj konfiskis la Registaro la tuton. La porciumado kaj disdono de kio respondis al ĉiu membro el tiuj du institucioj fariĝis pere de la oficialaj organoj taŭgaj kaj kreitaj por tio.

Estis surprize rimarki, pro la centraliza kaj unuforma kriterio superreganta en la tuta bolŝevika organizo, ke ne ĉiuj Komunistaj Propraĵoj kaj *Artel*-oj dependis de la Departemento pri Terkulturo. De ĝi dependis du mil okcent kaj la cetero de la Konsilantaro pri Nacia Ekonomio.

Por kunordigi la vivon kaj disvolviĝon de la Propraĵoj kaj *Artel*-oj, krom la Departemento pri Terkulturo de Moskvo kaj la sekcio starigita en la kerno de la Konsilantaro pri Nacia Ekonomio por kiuj de ĝi dependas, ankaŭ estas komisionoj en ĉiu provinco, kiuj inspektas kaj kontrolas ilian iradon.

Oni donas multan preferon al la disdono de sterkaĵoj kaj terkulturaj maŝinoj.

La petojn oni devas fari al la Terkultura provinca Komitato, kiu ilin ordigas. Poste, kiam la disdono povas fariĝi, oni ilin klasifikas; unue la Komunistaj Propraĵoj, poste la Komunumoj, trie la *Artel*-oj, kaj laste la grupoj de afineco.

Alia tipa situacio, kiu pruvas la malmultan volon per kiu la kamparanoj akceptis la bolŝevikajn disponojn, kiuj ilin koncernis, estas la konstanta forlaso de la oficialaj institucioj —Komunumoj, Propraĵoj kaj *Artel*-oj— kaj la elmigrado por libere labori.

Kiu al ni havigis la donitaĵojn citataj de ni, konfirmis al ni kion per privataj personoj ni sciis: ke grupoj de kamparanoj forlasis la oficialajn instituciojn aŭ la terojn, kiuj al ili respondis pro la disdono, kaj komune dediĉis sin al la kultivado de terenoj nekulturataj aŭ apartenantaj al neniu.

Estis la vera komunismo aperanta malgraŭ ĉiuj oficialaj obstakloj.

El ĉi tiuj grupoj, naskiĝis kaj formiĝis la grupoj de afineco, kiuj, en iuj provincoj, kiel en la Gubernio de Smolensk, estis ĉirkaŭ ducent laŭ la citataj statistikoj.

Kaj konsideru, ke Siberio kaj Ukrainujo, la du rusaj regionoj pli inklinaj al la grupo de afineco, kiel sistemo de organizo, tute ne aperis en la oficialaj statistikoj.

La afero de la Respubliko (?) de Chubasky estas tre karakteriza kaj tute konfirmas kion ni diras.

La disponoj de la reganta partio, pli ol plibonigi aŭ disvolvi la instituciojn kaj la komunisman spiriton de la rusa kamparano, fakte estis baro, malhelpo, obstaklo, kiu neebligis ilian plenan disvolviĝon kaj kreskadon.

Ne estis komunismo de kazerno aŭ monaĥejo, kiel tiu altrudita de la bolŝevikoj disde la Povo, kion volis kaj sopiris la rusa kamparano; estis libera komunismo, aŭtonoma, sendependa, devenanta de lia propra volo kaj de lia fruktodona kaj kreanta penado. Kaj ĉar al li estis neita ĉi tiu rajto estiĝis la lukto, kiu kostis milojn da vivoj kaj lagojn el sango.

Komunistaj soldatoj kaj delegitoj komisiitaj por la konfisko, mortigitaj kaj barbare amputitaj, tute bruligitaj vilaĝetoj, kaj infanoj, virinoj kaj maljunuloj, ĉasitaj kiel sovaĝaj bestoj kaj uzitaj, kiel celo al la mortigaj maŝinpafiloj: ĉi tiu estas la rezulto de la bolŝevika politiko.

Kiam la rusa kamparano estis devigita labori sub ĝenaj kondiĉoj kaj vidis ĉiujn siajn proprajn instituciojn, kiel la *Artel*-ojn kaj la *Mir*-ojn, modifitajn laŭ kaprico kaj deziro de Registaro, kiu al li konfiskis kaj per la forto elprenis la produktojn, kiujn li rikoltis, ribelis kaj portis la proteston kaj la reziston al la kampo de la perforto.

La bolŝevikoj estas tre amantoj de la statistikoj kaj grafikaĵoj; sentas pri tiu maniero de elmontrado realan inklinon; tamen, aŭ ni multe eraras, aŭ ni opinias, ke ili neniam donos statistikojn pri ĉiuj plenumitaj mortigoj, la eldetruitaj kaj bruligitaj vilaĝetoj kaj la viktimoj, kiuj estis oferitaj al tiu politiko de eraroj. La tempon ni metas kiel atestanton.

11a. Politiko pri provizadoj

La kruelegaj luktoj okazintaj inter la rusa Registaro kaj la kamparanoj, pro la konfiskoj de produktoj, kiujn tiu realigis kaj, kiujn tiel vaste priskribis la eŭropa burĝa Gazetaro plezuriĝante per la reprodukto de la plej bagatelaj detaloj kaj, kiujn ni, por esti sinceraj, devas diri, ke antaŭ ol viziti Rusujon akceptis per granda malkonfido, estis afero, kiu al ni interesis tute kaj detale koni, por ke post nia reveno ni povu malkonfirmi aŭ pravigu ilin, se ili meritus ĝin.

Tiel do, apenaŭ transirita la landlimo kaj jam en interrilatoj kun la bolŝevikoj, ni multfoje klopodis paroli pri tiu afero kaj kvankam en ĉi tiuj konversacioj ni ne povis atingi klare esprimitajn detalojn, ili havis certan utilecon, ĉar havigis al ni unuajn konojn pri la afero.

Sed ĉi tiuj simplaj komencoj ne sufiĉis. La komisio, kiu nin portis al Rusujo ne povis kontentigi sin per simplaj izolitaj sugestoj. Ĝi postulis ion pli; postulis kompletajn donitaĵojn, kiuj povus servi kiel fundamento al firmaj juĝoj.

La kampanjo, kiun la Gazetaro faris en la tuta mondo kontraŭ la sovetia reĝimo, atingis la amplekson de ĝisfunda atako.

La voĉo de la reakcio levis sin brua, surdiga, orelŝira kaj per pli aŭ malpli veraj pruvoj, per granda provizo de donitaĵoj kaj rakonto de faktoj, insiste ĵetis sur la vizaĝon de la defendantoj de la rusa afero akuzojn, kiuj sufokis niajn voĉojn.

Nuligi ĉi tiujn efikojn estis neceso. Sed neevitebla neceso. La amo al la Revolucio kaj al la libero de la rusa popolo, kvankam estis nepraj elementoj por atingi ekvilibron, ne povas esti la solaj argumentoj uzataj kontraŭ la akuzoj por senvalorigi ilin.

Kaj se ni rompis la blokadon en kiu estis Rusujo kaj trapasis ĝiajn landlimojn post multaj kontraŭaĵoj, oni komprenos, ke ni ne eltenis sorto-ŝanĝojn kaj venkis obstaklojn por nur havi la plaĉon diri: "ni jam alvenis en Rusujo". Ĉi tio povus esti kontentigon, sed de persona vanteco.

La sociala agado kaj la sperto, kiun el ĝi ni eltiris, per la studo de la historiaj faktoj, portis nin al konkludo en kiu ni persistas; ke sen la ekonomia libero, la politika aŭ socia libero estas mito.

La bombastaj frazoj, la teneraj oratoraj periodoj de la ekscitaj paroladoj, pli aŭ malpli demokratiaj, la tre abundaj kaj deklamaj deklaroj de la homo, estas fajroj de artifiko, flugantaj raketoj, fumo, kiu malaperas se ili ne estas akompanataj de ekonomia plibonigo por la popolo. Kiam la homo ĉesos esti ekonomie submetita, ne estos politika dependeco ebla. Kiam la burĝaro ne havos kaptita la proletaron je la stomako, ties ideoj kaj agoj estos trempitaj de libereco.

Ĉar ĉi tiu estas nia kriterio, oni komprenos la atenton, kiun ni devis teni dum nia restado en Rusujo, pri ĉio rilatita al la ekonomia liberigo de la proletaro.

En la kapitalisma reĝimo, la laboristo malsatas. Kelkfoje vilaĝoj kaj tutaj distriktoj malaperas ruinigitaj pro tiu terura katastrofo; sed tio ne okazas, ĉar oni ne produktas tion sufiĉan por provizi ĉiujn. La fenomeno okazas, ĉar la disdono de la produktaĵoj estas arbitra kaj kruela, ĉar tiu enportas la karakterizaĵojn de fiaĵo farita kontraŭ la popolo. Kiel ili agadis en Rusujo? Ĉu ili trafis? Ni tuj konkrete diros ĝin.

La unua revolucio, tiu de marto, kiu unue donis la povon al la kadetoj kaj poste al Kerensky, faris nenion por

organizi la disdonon laŭ pli humana sistemo ol kiu ĵus porĉiame detruiĝis.

La tiama ekonomia situacio de Rusujo estis jam tre malfacila; la malsato kaj la plej malhumanaj mankoj superregis la popolon; la militjaroj, kune kun la malfacilaj kondiĉoj en kiuj Rusujo ĉiam disvolviĝis, multe kontribuis al la amasigo de malfacilaĵoj.

Kompreneble, en Rusujo, kiel en ĉiuj kapitalismaj landoj, kiu unue kaj pli intense suferis la ekonomiajn mankojn altruditajn de la milito, estis la laboristo; tial la homoj, kiuj metis sin ĉekape de la unua revolucio, devis celi pli justan kaj humanan disdonon rilate la provizadon de la popolo. Ili ne tion faris kaj tian sorton ili havis.

La periodo de marto ĝis oktobro pligravigas la situacion; plimalbonigas ĝin ĝis preskaŭ neatenditaj limoj. Tamen ĉi tiu graveco, la situacio favoris la bolŝevikojn, lasante al ili la manojn liberaj por agadi. Ilia ĉefa zorgo devos esti produkti.

Sed se la momenta situacio ne prezentis gravajn danĝerojn, ne estas dubo, ke ĝi estontece havos ilin.

La tuta malorganizo de la komerco, la neniigo de ĉiuj magazenoj de produktoj — malgrandaj kaj grandaj—, la konfisko, kiun la Registaro faris al sia favoro de ĉiuj produktitaj kaj ne produktitaj havaĵoj, al ĝi lasis plenan agliberon sur la vojo, kiun ĝi volus sekvi. Kaj por krei kiom da institucioj ĝi konsideros bezonaj por organizi la disdonon.

Ĉi tiuj avantaĝoj tiel favoraj estis uzitaj de la Registaro kaj ĝi tuj kreis la Komisararon pri Provizadoj, enoficigante elprovitajn komunistojn kaj konfidulojn de la partio.

Tio unua, kion faris la Komisararo estis taksi la prezon de la nutraĵoj, ĉar kvankam malorganizita kaj timema la libera komerco ankoraŭ ekzistis.

La rezultoj de ĉi tiu dispono ne povis esti pli fatalaj. Kiel ili taksis la komercaĵojn laŭ prezo tre malsupera al tiu de vendo en la merkato kaj minacis per severaj punoj tiujn, kiuj ne submetis sin al la imposto, malaperis de la merkato ĉiuj produktoj kaj en malmultaj tagoj plikostiĝis pli ol ĉirkaŭ tricent procento.

Minacoj, konfiskoj, malliberigoj, eĉ ekzekutoj; ĉio estis efektivigita; sed ĉiam kun negativaj rezultoj. La produktoj ne aperis kaj tiuj ofertataj atingis fabelajn prezojn.

Dume, en la Komisararo pri Provizadoj oni aktive laboris. Amasiĝis la informoj. Statistikon sekvis alia kaj ĉi tiujn aliaj kaj aliaj; sed la nutra situacio de la popolo ne pliboniĝis. La spekulacio tute oftis. Laŭ prezo de imposto oni povis aĉeti eĉ ne pinglon; male, laŭ la kutima prezo oni povis akiri ĉion.

La Sovetoj de kamparanoj de la provinco de Moskvo parolis kun la Komisararo pri Provizadoj kaj petis, ke oni metu iom da ordo kaj aktiveco por normaligi la rilatojn de aĉeto kaj vendo aŭ de interŝanĝo de produktoj inter la kamparo kaj la urbo.

Inter la pli malabundantaj produktoj estis la lakto. Eĉ ne por la malsanuloj ĝi troviĝis.

Altiris pli la atenton la manko de lakto, ĉar Moskvo estis urbo, kie ĝi ĉiam abundis pro la entreprenema spirito de industriulo de la kapitalisma reĝimo.

Viro kun mono kaj iniciatoj, jarojn antaŭ la revolucio, organizis la aĉeton de lakto en la apudaj vilaĝoj.

Li atingis interkonsentojn kun la kamparanoj, per kiuj aĉetis la tutan lakton produktatan de iliaj bovinoj kaj post la transporto per ujoj de sia posedo, li vendis ĝin en multnombraj filioj, kiujn establis en Moskvo.

La Sovetoj de Kamparanoj petis, ke oni respektu ĉi tiun organizon pro ĝiaj bonaj rezultoj, kvankam oni elproprigos la industriulon, kiel jam estis farita.

Ili ankaŭ petis, ke la Komisararo pri Provizadoj enoficigu unu aŭ plurajn individuojn ĉekape de la Entrepreno kaj kun rajto intertrakti kun ili la pagotan prezon.

Aŭskultis la Komisararo la peton, akceptis la iniciaton kaj promesis rapide respondi ĝin.

La kamparanoj foriris kontentaj, ĉar kredis, ke tuj solvos la afero.

Pasis semajnoj kaj monatoj; post duonjaro degnis la Komisararo doni la respondon, subtenante la kriterion de la imposto.

La Komisararo pri Provizadoj aprobis teni la prezon de tridek rubloj por la litro da lakto, kiam en la libera merkato oni jam pagis po ducent kvindek, kaj tiel, dum la Registaro ne povis provizi per lakto la loĝantaron, la merkato de la spekulacio tre abundis je ĉi tiu produkto.

Tiel do ĉi tiu ekzemplo, citita per certa amplekso por ke oni komprenu, kiel agadis la bolŝevikoj, estas la sama, kiun ni povis citi por ĉiuj ceteraj produktoj.

La unuformeco, la unuflankeco kaj la nefleksebleco, kiujn ili adoptis pri afero, regis en ĉiuj. Tial la serio de reĝustigoj, kiuj atingis tion neverŝajnan.

Faritaj la statistikoj de la loĝantoj, kiujn havis la sovetia Rusujo, oni devis atendi, ke estus disdonotaj produktoj. Tiuj konfiskitaj de la Registaro je la komenco baldaŭ estis elĉerpitaj, esceptante tiujn, kiuj putriĝis en la magazenoj atendante la ellaboron de statistikoj dum la homoj malsatis.

La ŝtato iĝis sola aĉetanto de ĉio produktata kaj daŭre plenumis la konfiskon kaj surmetis la impostojn, kiujn evitis

la kamparanoj uzante ĉiujn eblajn rimedojn: lasante la terenojn nekultivataj aŭ nur semante tion nepran por ili; rezistante per la armiloj enmane; ekzekutante kaj ŝtonumante la komunistojn kaj soldatojn komisiitajn de la konfisko.

La unua maniero de amasigo kaj disdono de produktoj, kiun la Komisararo pri Provizadoj starigis, estis la plej neordinara kaj absurda imageblaĵo.

Jen kiel ili ĝin starigis.

Sciante pro la statistikoj—pure proksimuma, ne fundamenta kono —la produktojn, kiujn ĉiu provinco produktis, ili establis en ĉiu provinca ĉefurbo unu aŭ plurajn grandajn magazenojn de produktoj. La Soveto de ĉiu vilaĝo, vilaĝeto aŭ grupo de domoj ellaboris statistikojn pri tio, kion ĉiu terkulturisto rikoltis kaj la tuta produkto, ĉar la terkulturisto eĉ ne retenis la plej minimuman parton, estis sendita de la Soveto al la magazenoj de la provinco.

Kiam ĉiuj produktoj de la provinco estis amasigitaj en la provinca magazeno, tiuj, kiuj respondis al ĉiu vilaĝo aŭ vilaĝeto, laŭ la nombro da loĝantoj kaj la kvanto, kiu respondis por individuo laŭ la porciumo dekretita en Moskvo, estis redonitaj al la vilaĝo aŭ vilaĝeto el kie antaŭe eliris.

Pro ĉi tiu novega kaj brila komunista proceduro, pli frue ol kamparano povis manĝi kilogramon da guŝoj rikoltitan en sia propra legomĝardeno, ĝi vojaĝis centojn da kilometroj laŭ la saĝaj bolŝevikaj kaj leninismaj disponoj.

Sed kiel la absurdo ne povas venki, ĉar la racio rifuzas subteni ĝin, pro la protesto de ĉiuj rusoj, kiuj estis ne komisaroj, nek estroj, nek diktatoroj, ili estis avertitaj de sia eraro kaj reĝustigis ĝin.

La eraroj de la bolŝevika ekonomia politiko estas multnombregaj. Kiam la historio diskonigos ĉiujn, la homaro restos mirigita. Se ilia celo estintus misfari tion, ili tiom ne sukcesintus.

La centralizado de ĉiuj servoj de disdono kaŭzis nekalkuleblajn difektojn kaj eĉ pli nekalkuleblajn perdojn.

La kamparanoj, kiuj vidis la mallertecojn de la ŝtato kaj ties erarojn pro la konsekvencoj kaj difektoj kaŭzitaj al ili, organizis la perfortan reziston kaj rifuzis trakti kun ĝi.

Krome ili petis, ke oni al ili pagu la konfiskitajn produktojn per aliaj produktoj, ĉar la bolŝevika monero pro la fakto, ke ili ĝin fabrikis sen limigo, estis ege senvalorigita.

-—Ni ne rifuzas —ili diris— produkti kiom ni povos ĉiam, kiam la transdono de la produktoj, kiuj al ni malmankas, post la reteno de kiuj estas al ni bezonaj, estu kontraŭ tio, kion ni bezonas por vivteni. Kion ni rifuzas estas transdoni la produktojn kontraŭ papermono, kiu neniom valoras kaj subteni la milojn da mallaboremuloj, kiuj kaŝas sin en la oficejoj de la Registaro kaj, ke estas kiuj premas kaj submetas nin, ĉar por ĉiu deputito, kiun ni sendas al la Soveto, ili rajtas sendi kvin.

Do la impostoj donis nenian rezulton. La akiro fare de la Registaro de ĉio produktita, la konfiskoj kaj la minacoj, akompanataj tre ofte de perfortaĵoj, ne plibonigis la situacion; kontraŭe, ĉiutage pligravigis ĝin.

Venis la momento, kiam la porciumo, kiun la Registaro donis al la popolo malpliiĝis al kvarono de tio, kion ĉiu individuo bezonis laŭ oficialaj donitaĵoj.

La situacio estis pli danĝera pro la centralizado de la metodoj de disdono.

Centralizitaj en Moskvo ĉiuj popolnombradoj pri la ekzistanta loĝantaro en Rusujo, tie oni determinis la porciumon, kiu al ĉiu respondis. Sekve, la statistikoj de la produktado ankaŭ devis iri al Moskvo.

Ni do vidas la jenan strukturon. Unue: farita de ĉiu kamparano la rikolto, ĉi tiu sendos ĉiujn rikoltitajn produktojn al la magazeno de la loĝloko —estu urbo, vilaĝo, vilaĝeto aŭ grupo de domoj—; due: kiam la produktoj estas en la magazeno, la loka Soveto faros statitiskan ekzaktan tabelon pri ili, kiun ĝi devas transdoni al la Soveto de la provinco; trie: la Soveto de la provinco sendos al Moskvo, al la Komisararo pri Provizadoj, la statitiskojn de ĉiuj loĝlokoj por ke oni faru la bezonajn kalkulojn, ordigu la provincan interŝanĝon kaj atribuu tion, kio respondas al ĉiu individuo; kvare: ĝi redonos la statitiskojn al ĉiu provinca Soveto; kaj kvine: distribuos la provinca Soveto la statitiskojn al ĉiu loka Soveto, por ke ĉi tiu komencu la disdonon de la produktoj, kiuj al ĉiu membro de la komunumo respondas.

Poste restas la troajn produktojn. La loka Soveto ilin sendos al la provinca amasiga magazeno, kiu ilin distribuos laŭ la ordonoj, kiujn ĝi ricevos de la Komisararo pri Provizadoj de Moskvo.

Ĉiuj ĉi operacioj bezonas perdon de tempo kaj bagatelon; miloj da dungitoj, kiuj estas, laŭ vortoj de Lenino, “la plej malutila plago, kiu atakis la bolŝevikismon”.

La malutiloj de ĉi tiu centralizado estis la plej bonega murrompilo uzita kontraŭ la bolŝevika ekonomia politiko, kaj la “nova ekonomia politiko”, kiun post nia vojaĝo al Rusujo rekomendis Lenino mem, estas la plej nerefutebla pruvo pri tio, kion ni asertas.

Tamen ni volas, antaŭ ol fini ĉi tiun ĉapitron, raporti kelkajn faktojn, kiuj certe estas tre instruaj. Per ili oni vidos

la katastrofajn rezultojn de tiu politiko de centralizado pri kiu tiom kaj tiel laŭde oni al ni ade parolis kaj parolas.

La provinco de Moskvo prefere produktas terpomojn. La rikoltoj kutimas esti regule abundaj. La malsato, kiu kaptis la loĝantojn de Moskvo post kiam la blokado ilin lasis nur kun iliaj propraj rimedoj, iom mildiĝis dum paro da monatoj per la rikolto de terpomoj.

Ĉar en Rusujo la glacioj ne permesas fari fruajn semadojn, la plej granda parto de guŝoj kaj tuberoj estas de tiuj, kiujn ĉi tie, en Hispanujo, oni nomas “malfruaj”, t. e., tiuj, kiujn oni rikoltas fine de somero.

La rikolto de terpomoj en la provinco de Moskvo, en la jaro 1919, estis abundega. La loĝantoj de la urbo estis feliĉaj, ĉar sciante la abundan rikolton de terpomoj pro la novaĵoj, kiujn la kamparanoj mem alportis al la urbo, ili esperis, ke la disdono kovros iliajn necesaĵojn.

Je la unua dekkvino de septembro de tiu jaro kuris la famon, ke la magazenoj de provizoj de terpomoj de Moskvo estis plenplenaj per tiu varo.

Ĉiuj atendis, ke tuj komenciĝos la disdono de terpomoj. Sed la disdonon oni ne faris. Kaj oni ĝin ne faris, ĉar la abundo mem de la rikoltoj devigis prepari aŭ reĝustigi la listojn de porciumo.

La tagoj pasis. La popolo turmentita de la malsato, kiu fariĝis al ĝi pli kruela, ĉar ĝi ne ignoris la ekziston de tiel riĉa rikolto de terpomoj, senpaciencis timante la katastrofon. Dume la Komisararo pri Provizadoj kaj la Konsilantaro pri Nacia Ekonomio kun ilia centraliza burokratismo daŭre laboris, farante listojn kaj nombrojn, ellaborante informojn kaj kalkulojn, kvazaŭ ĝi volis fariĝi kunkulpulo de tio, kio estis okazonta.

Kaj tio timita okazis. La klimato ruinigis la tutajn matematikon kaj centralizantan bolŝevikan sciencismon, detruante en malmultaj horoj la esperojn, kiujn miliono da malsataj loĝantoj metis sur tiu abundega provizo de terpomoj.

La frostoj de finoj de septembro, kiuj estas persistaj en Rusujo kaj anoncas la unuajn neĝojn de la vintro, malutilis la tutan riĉan rikolton de terpomoj, kiu troviĝis en la magazenoj. Ĝuste kiam, laŭ la bolŝevikoj, tuj estis finiĝonta la statistiko de la porciumo.

Kaj per la malĝojega doloro de kiu malsatas kaj ne povas sati al si, vidis la loĝantoj de Moskvo, kiel el la magazenoj oni ĵetis surstraten —ĉar sur la strato ili amasiĝis — milojn kaj milojn da kilogramoj de frostitaj terpomoj, neuzeblaj por la konsumo. Nenio povis disdoni sin inter la popolo.

La ĉarmoj kaj trafoj de la centraliza politika ekonomio ne povas esti pli konsolaj.

Alia kurioza afero, kiu meritas ne esti imitita, estas tiu okazinta kun la fiŝkaptado en Petrogrado, en la rivero Neva.

Frostita ĉi tiu rivero kelkajn monatojn de la jaro, kiam la temperaturo permesas dediĉi sin al fiŝkaptado kaj la kresko de la malgrandaj fiŝoj indikas la periodon de abundo, estas tiom granda la kvanto da fiŝoj, kiun havigas la rivero Neva, ke sufiĉas fiŝkano kaj horoj de restado ĉe ĝiaj bordoj por kapti kelkajn funtojn da fiŝoj.

Sed la bolŝevika ŝtato zorgata pri tio, ke neniu en ĝiaj teritorioj havu maltrankvilecon pri sia provizado, elpensis la rimedon por ke ĉiuj petrogradanoj havu fiŝon el Neva sur sia tablo. Ĉu ne estis reĝo, kiu volis meti al siaj subuloj pecon de kokino ĉiutage en la kuirpoton? Kial bolŝevika Registaro

ne povis meti frititan fiŝon por ĉiu el la loĝantoj de Petrogrado? Nenio pli justa.

Ĝi devigis sindikataliĝi al ĉiuj fiŝistoj de Petrogrado samtempe ke al ili altrudis la kondiĉon vendi la tutan kaptitan fiŝon al la Soveto de la urbo. Ĝi kompletigis ĉi tiun disponon per la plej absoluta malpermeso, ke neniu alia povis fiŝkapti en la rivero. Ĝi minacis la malobservantojn de ĉi tiu lasta dispono per severegaj punoj.

La profesiaj fiŝkaptistoj, kiuj estis la membroj de la Sindikato kaj al kiuj oni koncedis la monopolon de la fiŝkaptado en Neva, estis ĝojaj, ĉar ili esperis povi vivteni sin.

Sed okazis la neatenditaĵo. Kune kun la devigo, kiun ili akiris kiam oni koncedis al ili la monopolon, oni diktis la plej absurdan komercan teorion. La Soveto de Petrogrado taksis la fiŝon sekvante la normojn, kiujn ĝi aplikis al la imposto de la lakto. Ĝi difinis prezon tre malsuperan al tiu, kiun la fiŝo jam atingis en la libera merkato kaj en la komercaj interŝanĝoj libere interkonsentitaj.

Protestis la fiŝkaptistoj, volis komprenigi al la loka Soveto tion malkonvenan de tia interkonsento; sed la Soveto ne akceptis iliajn kialojn, male minacante ilin per severaj punoj se ili ne submetis sin. Ĉu rezulto?

La fiŝkaptistoj ĉesis fiŝkapti; forlasis ĉion; nur kelkaj submetis sin. Sed kiel tio, kion ĉi tiuj malmultaj fiŝkaptis, post la reteno de la parton, kiu al ili respondis, eĉ ne kovris la kvaronon de tio bezonata de la loĝantaro kaj, kiel la malpermeso al la privatuloj dediĉi sin al la fiŝkaptado daŭris pro la monopolo koncedita, la loĝantoj de Petrogrado devis malsati eĉ ne povante ĵeti ŝnuron kun fiŝhoko en la riveron.

Alia simila afero al tiu, kiun ni ĵus raportis, okazis al la fiŝkaptistoj de la lago Ladoga.

Ankaŭ oni al ili koncedis la monopolon de la fiŝkaptado en la lago post la deviga sindikataliĝo, kaj estos la Soveto de Moskvo, kiu aĉetos al ili la tutan fiŝkaptadon laŭ la prezo de imposto, kiun la Soveto decidos.

Kiel ĉi tiu prezo ne kompensis iliajn bezonojn, rifuzis la fiŝkaptistoj de la lago fiŝkapti. Sed kiel la tuta fiŝo de Ladoga estis konsumata en Moskvo kaj pro ilia rifuzo fiŝkapti, ĝi mankis en ĉi tiu urbo, oni dekretis la mobilizon kaj volis devigi ilin labori per la forto.

La dispono ne povis esti pli senutila nek pli kontraŭcela. Kiam oni sendis al la lago Ladoga majoron kun trupoj por submeti la fiŝkaptistojn, ĉi tiuj amase elmigris kaj el centoj da fiŝistoj, kiuj konsistis la Sindikaton de fiŝkaptado, nur restis trideko.

Sed la plej grandega akuzo, kiun oni povas fari kontraŭ la eraroj de la bolŝevika ekonomia politiko kaj la perfortoj kaj malutiloj, kiujn ĝi kaŭzis, estas tio okazinta al fervoja laboristo en la provinco de Saratov.

Patro de multnombra familio, la porciumo, kiun oni al li koncedis estis nesufiĉa. La malsato kaj kun la malsato la malespero instigis lin preni kompreneblan decidon. Li prenis la solan paron de ŝuoj, kiujn li havis kaj foriris al la kamparo kaj interŝanĝis ilin kontraŭ kelkaj kilogramoj da faruno.

Revenante al la vilaĝo, senŝua, sed kun iom da faruno, kiu mildigos kelkajn tagojn la malsaton de liaj proksimuloj, li estis arestita kaj konfiskita la faruno.

Ĉiuj petoj, ĉiuj petegoj, ĉiuj lamentoj frakasis kontraŭ la barbara oficiala dispono.

Senespera, li kuris al la cirkaŭaĵoj de la vilaĝo kaj pendumis sin de arbo.

Kazoj el ĉi tiuj oni povas citi milojn. Se ni citis ĝin ne estis por tuŝi la vundan lokon de kiu nin legas; ni faris tion por doni ideon pri la profunda tragedio, kiun tiu popolo spertis kaŭze de ties estroj.

Kaj oni ne diru al ni, ke la manko de produktoj estis la kaŭzoj de tiom da detruoj; ĉi tiu nur estas duona vero. Ni ne neas, ke estis malabundeco de produktoj en Rusujo; sed ni asertas, ke al tio kontribuis la mallerta kaj tute klare arbitra ekonomia politiko farita de la bolŝevikoj.

Ni finas avertante, ke preskaŭ ĉiujn ĉi donitaĵojn al ni havigis Víctor Serge (kromnome) Kibalchiche, konfirmitaj de aliaj altrangaj oficistoj de la Registaro de la Sovetoj. Ni diras ĉi tion, ĉar la parolvervo de niaj bolŝevikemuloj, kiuj tiel malavare fantazias, eble povus akuzi nin verŝi kalumniajn onidirojn por senkreditigi la ruĝajn diktatorojn.

* * *

La konfiskoj kaj la ekzisto de Ĉeka estas la du nigraj paĝoj de la bolŝevika politiko.

Ni sugestis en antaŭaj ĉapitroj la reziston, iafoje pasivan kaj alifoje perfortan, kiun la rusa kamparano ĉiam kontraŭstaris al la politiko de konfiskoj.

Kiom da viktimoj estis? Ni ne povis, kvankam persiste klopodis ĝin, eĉ ne proksimume koni ilian nombron. Ni vidis grafikaĵojn rilataj al la afero. Ni posedas fotografaĵojn de vilaĝoj kaj vilaĝetoj detruitaj pro ilia rifuzo transdoni siajn produktojn; sed niaj informoj finiĝas ĉi tie.

La konfiskoj estas la logika konsekvenco de la politiko pri provizadoj farita de la bolŝevikoj.

Kiam oni starigis la konfiskojn? Kiel oni ilin faris?

En la unuaj momentoj de la revolucio, la konfiskoj ne estis pravigitaj. La kamparano, samkiel la laboristo de la

urbo, interŝanĝis kion ili havis kaj transdonis ĉion, kelkfoje eĉ tion nemalhaveblan por ili. La instinkto de solidareco en la popolo, en la granda plimulto, donis bonegajn rezultojn. Sed kiam la oficiala agado intervenis volante reguligi kaj ordigi ĉion, aperis la konsekvenca batalo.

Kiam la Registaro ordonis la fermon de la Komerco kaj la konfiskojn de la produktoj por statistiki, paralizis ĉiun komercan interŝanĝon kaŭzante la malabundon.

Kiel la oficiala malpermeso estis absoluta, ĉiu malobservo estis punata; sed la malobservoj estis bezonaj pro la ĉiutage kreskanta malabundeco.

Antaŭ ol ordoni la fermon de la komerco, devis la Registaro havi preparita la anstataŭontan instrumenton, kiu kovros la neceson plenumita de la komerco, ĉar malgraŭ ĉio, kion oni diras kontraŭ la komerca ŝtelo, oni devas rekoni, ke ĝi plenumas neceson en la distribua procedo de produktoj en la modernaj popoloj.

Sed ne okazis tiel. La bolŝevika Registaro, plenigita de teorioj, sed sen iu kono pri la realo, neniigis la komercon, kiam ankoraŭ ne havis funkcianta la distribuan institucion, kiu ĝin anstataŭos.

La tuja, neprokastebla konsekvenco el ĉi tiu dispono estis la plej absoluta paralizo en la ĉiutagaj komercaj interŝanĝoj kaj ĝiaj efikoj estis pli sentataj en la domo de la laboristo.

Veras, ke la Registaro decidis establi grandajn magazenojn distribuantajn produktojn; sed la efikecon de ĉi tiuj magazenoj oni ne povis koni ĝis post konfiskitaj, klasifikitaj kaj enportitaj la produktoj en la magazenojn.

Ĉi tio fakte devis preni kelkajn tagojn kaj, kiel en la proleta hejmo, tiel en Rusujo, kiel alilande, oni vivas de tago al tago, fermitaj la komercoj, ili ne havis kie provizi sin.

Tio tuja estis serĉi en la spekulacio, en kio la bolŝevikoj nomis jam komence la spekulacion, sed ke estis urĝa neceso, kion ili nenie povis trovi.

La Kooperativoj havis dum tiu transirperiodo grandan rolon; sed estis nesufiĉaj. Kiel povus ili, apenaŭ kelkaj dekoj, provizi loĝantaron de preskaŭ miliono da loĝantoj?

La interŝanĝo de produktoj de manoj al manoj, kaŝa kaj ĝena, atingis egan amplekson kaj la kamparanoj kutimiĝis al la uzuro, ĉar la kaŝeco ilin favoris.

Kiam post kelkaj semajnoj malfermiĝis la aĉetantaj kaj distribuantaj magazenoj, kiujn la Registaro organizis, la rimedo malbonis pli ol la malsano, ĉar la kamparano, tentata de la fabelaj profitoj de la kaŝa vendo, ne volis vendi siajn produktojn al la Soveto kaj laŭ la prezo determinita de ĝi.

Tiam oni decidas la konfiskojn. Oni volis kuraci malbonon per alia pli granda malbono.

Dum la konfiskoj nur okazis en la urbo kaj limiĝis forpreni ĉiujn produktojn al ĝi alportitajn por la vendo aŭ stokitajn kaj kaŝitajn en deponejoj, la afero ne havis bedaŭrindajn konsekvencojn. Ĉi tiuj okazos poste.

Paralele al ĉi tiu ago de Registaro, de konfisko kaj forpreno per la forto, okazas tiu de imposto sur la produktoj laŭ la prezoj, kiujn decidas la Soveto de ĉiu vilaĝo, obeante la instrukciojn ricevitajn de Moskvo.

La kamparano, por ne submeti sin al unuj nek al aliaj, organizas la pasivan reziston. Li ne transdonas siajn produktojn; unue kaŝas ilin.

Tiam la bolŝevikoj organizas de la Registaro la atakagon kontraŭ la kamparano.

Ili organizas grupojn de individuoj, alifoje de soldatoj, sub komando de elprovitaj komunistoj kaj trairas vilaĝojn forprenante kaj konfiskante ĉion.

La kamparano pasas de la pasiva al la aktiva rezisto. Li alfrontas la grupojn kaj soldatojn komisiitajn de la konfisko. Sed ankoraŭ ne okazas la sangaj kolizioj. La aktiva rezisto konsistas lasi parton de la tero nekultivita, ĉi tiel malpliigante la komunan havaĵon.

Ĉi tion kontestas la Registaro per disponoj de rigoreco, multokaze eĉ ekzekutante la plej ribelemajn individuojn.

La rezulto ne povis esti pli bedaŭrinda, ĉar la kamparano pasis de la aktiva rezisto sen perfortoj al la aktiva kaj perforta rezisto.

En alia loko de ĉi tiu libro ni jam parolis pri la impresajn instrumentojn per kiuj la kamparano defendis sin, nun ni nur montras la aferon.

Kion faris la bolŝevika Registaro? Kiujn rimedojn ĝi efektivigis? Kiel ĝi pretendis solvi perfortegan situacion, kiu atingis tian ekstremon pro ĝiaj eraroj?

Ĝi ordonis pli rigorajn kaj perfortajn disponojn kaj traktis la kamparanon, kiel komunan malamikon. Ĝi donis ampleksajn povojn al la komisionoj komisiitaj de la konfisko, ordonante al ili, ke ili forprenu ĉion sen ia konsidero.

Eĉ pli: kiam ĝi vidis sin senpova pro la rezisto de la kamparanoj kaj, ke krome la homoj komisiitaj de la konfisko malantaŭeniris timemaj, ĝi al ili koncedis la dudek kvin procenton de la konfiskaĵo, kiel rekompencon.

La efiko estis magia. La malsato faris tion, kion eble la konscienco malakceptus. La konfiskoj kruelege fariĝis. Anstataŭ la komisiitoj de Registaro, kiuj estis plenumontaj sanktan komision, ili iĝis malbonfarularoj, kiuj falis sur la

vilaĝojn, kiel bandoj de rabistaj konkerantoj, avidaj de rabprofitoj kaj riĉecoj.

Ili konfiskis ĉion; forportis ĉion; forprenis ĉion. Kiam jam restis nenio pli por forpreni, ili eĉ forportis tion, kio kiel porciumo respondis al la familio mem de la domo.

Kiam dum nia ekskurso sur Volgo ni, fuĝante de la oficiala akompanantaro, demandis la kamparanojn kaj petis al ili, ke ili detalu faktojn pri la konfiskoj, ili eĉ ne nin respondis, sed la kolero ekaperis en iliaj okuloj kaj ili fermis la pugnojn, kiel signo de minaco.

Estis tiel profitdona la tasko de konfiskado, ke homoj kun bonaj laborpostenoj kaj altaj salajroj de aliaj ŝtataj sekcioj, forlasis ilin kaj petis esti destinitaj al la grupoj komisiitaj de la konfiskado.

En unu el la vojaĝoj, kiujn ni faris, kruciĝis la trajno per kiu ni veturis kun alia per kiu vojaĝis unu el tiuj grupoj. La estro, la respondeculo de la grupo, estis kuracisto, kiu forlasis sian klientaron kaj klinikon por akcepti tiun komision.

Kiel la du trajnoj devis atendi en tiu stacidomo pli ol horo, ni havis intereson detale koni la komision de la grupo kaj translokiĝis al ĝia vagono por demandi.

Ni estis akceptitaj de la estro.

Li respondis al nia demando, ke la konfiskado estis neceso, ĉar la kamparano, instigita de etburĝaj ideoj, ne volis transdoni siajn produktojn al la Registaro kaj ja vendi ilin en la libera merkato aŭ en la spekulacio por akiri grandajn profitojn.

—Kaj—ni lin demandis—, kiel vin akceptas la kamparanoj?

—Vi jam povas ĝin imagi. Ili malmilde akceptas nin. Ili neebligas tiom, kiom ili povas nian taskon. Ili kontraŭstaras ĉiun konfiskon de tio, kion ili posedas.

—Kaj kiel agadas vi kiam faras la konfiskoj? Al kiu vi parolas unue?

—Ni jam anticipe havas asignita la lokon aŭ lokojn, kie ni devas agi.

Alveninte, ni tuj postulas la ĉeeston de la Sovetia Komitato de la loko; ni enketas ĝin pri kiuj estas la plugistoj kontraŭaj al la transdono de la produktoj; kie ili ilin gardas kaj en kiu kvanto proksimume.

Kiam ni havas bone detalan liston de la kamparanoj farintaj tiujn kulpojn, akompanataj de pikedo de ruĝaj soldatoj, kies akompanon ni petas de la plej proksima kazerno al la loko, kie ni devas agi, ni trairas domon post domo depostulante la transdonon de la kaŝitaj varoj.

—Kaj ĉu ili rifuzas transdoni ilin?

—Ni arestas la obstinulon; kondukas lin antaŭ la loka Soveto kaj enfermas lin en la malliberejon.

—Kaj ĉu ĝi ankoraŭ rezistas? Kaj se malgraŭ la aresto kaj malliberigo li persistas ne transdoni la produktojn, kion vi faras?

Ni traserĉas la domon, la lokojn, kie ni suspektas kaj, kiujn oni al ni indikis, kiel loko de kaŝado, ĝis ni trovas ilin. Foje okazas, ke la kamparano post horoj de aresto propra-vole konfesas la kaŝitaĵon.

—Ĉu vi havas iun rajton al procento aŭ rekompenco de la parto de la varoj, kiujn vi malkovras?

—Se propra-vole, kiam unuafoje oni petas al la kamparano, ĉi tiu transdonas la produktojn, ne; sed se li

rifuzas kaj per niaj enketoj ni ilin malkovras, ni tiam havas la dudek kvin procenton.

—Ĉu ĉi-okaze vi havos grandan intereson malkovri la kaŝitaĵojn?

—Memkompreneble, kvankam ni havas pli intereson, ĉar estas instrukcio kaj ordono de la Registaro.

—Kaj kial—ni kontestis—, se vi estas kuracisto kaj mankas kuracistoj en la batalfronto por kuraci la vunditojn, vi preferis ĉi tiun malagrablan taskon kaj ne tiun rilatan al via profesio?

—Ĉiuj estas necesaj por la triumfo de la komunismo kaj la batalo kontraŭ la kontraŭrevolucio. Kaj por ĉi tiu oni bezonas inteligentajn homojn kaj inklinajn al la komunista politiko.

—Konsentite. Sed homoj inklinaj al la komunista politiko estas multaj, kaj iuj tre inteligentaj, kiuj mirinde povus plenumi ĉi tiun komision, sen tio, ke al ĝi kuniĝis tiuj bezonataj en la batalfronto, kiel la kuracistoj ekzemple, kiuj ne povas esti anstataŭitaj pro la specialeco de sia profesio.

—Ĉie oni servas al la Partio—li nin respondis.

—Kaj—ni plu parolis—, ĉu vi venis ĉi tien sendita de la Registaro, de iu Soveto de provinco, aŭ vi petis la postenon?

—Mi propra-vole petis ĝin.

—Kaj kial vi ne petis iri ĉe la batalfronto, al Pollando, kie luktas la Ruĝa Armeo defende de la Revolucio?

—Al vi nenio gravas tio, li respondis nin iom ĉagrenita.

La alveno de komunista gravulo el nia sekvantaro kaj ties interveno interrompis la dialogon, kiu cetere fariĝis

interesa, malkovrante al ni la motivon kaj la kialon de multaj aĵoj.

Pro peto de ĉi tiu gravulo oni al ni montris la kvantojn da konfiskitaj produktoj, kiuj ne estis malmultaj, kaj oni ankaŭ parolis al ni pri la kvanto, kiu laŭ la procento koncedita al la konfiskantoj al ili respondis. Kio ankaŭ ne estis nekonsiderinda.

Ĉi tiuj produktoj, kiuj devis esti transportitaj al Moskvo kaj metitaj je la dispono de la Komisararo pri Provizadoj, antaŭ multaj tagoj veturadis de loko al alia sekvante la movojn kaj zigzagojn, kiujn devis fari la konfiskanta grupo. Antaŭ ol alveni al destino, tre eblas, ke la duono malaperos dum la vojaĝo. La malsato instigos tion; la koruptado faros ĉion ceteran.

12a. En la Departemento de la Fervoja Transporto

Ĉar oni diversmaniere diris al ni, ke unu el la plej grandaj malfacilaĵoj, kiuj neebligis la normalan restariĝon de la ekonomia vivo estis en la malorganizo de la transportorimedoj, ni iris al la Departemento pri la Fervoja Transporto.

—La Registaro de Kerensky —oni tuj al ni diris—faris nenion por venki la malfacilaĵojn, kiuj ĉiutage aperis. La restado de ĉi tiu viro en la Potenco pri ĉi tiu samkiel pri la aliaj problemoj lasis nenian spuron meritantan esti menciita. Kaptita en la reto de kompromisoj, al kiuj kun la eŭropaj kancelieroj li devontigis sin, ne povis liberigi sin de la diplomatoj kaj perdis la tempon serĉante aranĝojn kaj kompromisojn anstataŭ utiligi ĝin realigi la verkon, kiun postulis tio eksterordinare malfacila de la cirkonstancoj.

La problemo de la transportoj en Rusujo, lando de grandegaj distancoj, datiĝas de nememorebla tempo. Oni povas diri, ke ĝi estis la problemo de la problemoj. Al tio jam malnova de la tero oni devis aldoni, kiel ĝeneralan, la problemon de la transportoj.

Kun ĉi tiu precedenco kaj krome la milito, kiu fine ruinigis la reduktitan ekzistantan organizon, kaj lasis en la plejmalbonaj kondiĉoj la tutan fervojan materialon, facile estas doni ideon pri la tre kriza situacio de Rusujo, lando dependanta de la eksterlando pri ĉi tiu aspekto de la industrio.

Sed ankoraŭ mankis la fina bato, kiu devis malorganizi ĉion, farante pli malstabila kaj terura la situacion.

Dum la lastaj monatoj de la carismo, la fervoja malordo estis tia, ke oni povis sendi nek virojn, nek municiojn al la militfronto per la postulata reguleco. Kelkfoje oni devigis la soldatojn fari centojn da kilometroj en streĉa marŝo, cele iom malŝtopi la fervojojn.

La unua revolucio de marto, kun la malordo, la necerteco kaj la provizoraj disponoj, kiujn kunportas ĉiu nova situacio, malorganizis tion malmultan, kio en la fervojaj transportoj ankoraŭ funkciis malgraŭ la komenca konfuzo.

La Registaro de Kerensky, kiu, anstataŭ interveni en la transportojn, krucis siajn brakojn kaj nur pensis solvi sian politikan situacion, kaŭzis, ke la malordo de transira karaktero iĝis longedaŭra stato.

Tiel la afero, preskaŭ tute malorganizitaj la fervojaj transportoj, en tre malbonaj kondiĉoj la materialo kaj sen rimedoj anstataŭi ĝin, okazas la revolucio de oktobro, la nia, kiu fine donis la finofaran baton al tio malmulta, kio restis de fervoja funkciado.

Unu el la unuaj dekretoj de la Konsilantaro de Komisaroj de la popolo, kiel vi jam scias, estis doni leĝan kaj juran formon, t. e., definitivan karakteron al la projekto ĵus ellaborita de la Nacia Tutrusa Kongreso de kamparanaj Sovetoj, okazigita je finoj de julio 1917, kiu decidis la disdonon de la teroj.

La efikoj de ĉi tiu dekreto estis fulmaj en la batalfronto. Amase la armeoj forlasis la ŝirmajn fosaĵojn, forĵetis la fusilojn, altrudis sin al la estroj kaj oficiroj riproĉantaj al ili ilian konduton, kaj entrajniĝis kuratake. La okazintaĵo en la militfronto estis nepriskribebla.

Ĉiu solviĝis pere de kruelaĵoj, ofendoj, perfortaĵoj kaj kvereloj. Tiuj nebrideblaj homamasoj, spronitaj de la angoro

ne malfrue alveni al la disdono kaj baldaŭ troviĝi en sia vilaĝeto, respektis neniun rajton.

La rajton ellaboris la forto. Tiuj plej fortaj, tiuj kun pugnoj pli pretaj por la kverelo, aŭ la plej aŭdacaj, trudis ĝin.

Tre ofte okazis, ke oni kaptis la unuajn okupantojn de vagono kaj ĵetis ilin tra la fenestreto por okupi la sidejojn. La malmobilizitaj trupoj kuratake entrajniĝis, rompis la fenestretojn kaj elŝiris la pordetojn el la vagonoj por improvizi sidejojn. En la vagonoj amasiĝis unuj sur aliaj ĝis la plafonoj. Eĉ oni konstruis skafaldojn sur la flankoj, la platformoj, la markezoj kaj la tendroj de la lokomotivoj, sur kiuj ili amasigitaj vojaĝis.

La vagonoj kaj multaj lokomotivoj baldaŭ restis neutiligeblaj, kaj oni devis forlasi iun dum la vojaĝo, elĵeti ĝin ekstere el la reloj kaj piede daŭrigi la vojaĝon ĝis la proksima stacidomo, kie rekomenciĝis la irado kaj ripetiĝis la samaj scenoj de perforto.

Kiam la soldatoj, kiujn la carismo sendis al la batalfronto tiel revenis, oni povas kalkuli, ke kvarono el la fervoja materialo estis tute neuzebla, alia kvarono pli-malpli uzebla kaj la cetero nur en kondiĉoj esti uzota post penigaj kaj malfacilaj riparoj.

—En ĉi tiu cirkonstancaro —ili plu informis nin— oni starigas ĉi tiun Departementon kaj ni surprenas la transportojn.

Post la nomumo de Krassin, kiel prezidanto de la Konsilantaro pri Fervoja Administrado, la laboristoj strikas dum monato kaj duono, inda fino al la malordoj, kiuj okazadis de post la komenciĝo de la milito. La striko ampleksis la tutan dungitaron, laboristojn, oficistojn kaj estrojn sen escepto, pligravigante la aferstaton.

Komence de 1918 ekis la fervoja organizo, eksigante la altrangajn dungitojn kaj estrojn kaj enoficigante la eksterordinarajn Komisionojn komisiitajn kontroli la laboron de la direktistoj kaj administrantoj de la diversaj fervojaj retoj.

La impulso donita al ĉi tiuj eksterordinaraj Komisionoj estis grandega —plu diras nia informanto—. Baldaŭ estis unu en ĉiu stacidomo kaj alia veturanta en ĉiu trajno, sub kies povo kaj komando restis ĉiuj dungitoj sen ia escepto.

Dum la periodo de tempo kiu pasis de la revolucio de oktobro ĝis oni reorganizis la transportojn, okazis tre strangaj aferoj. Ekz-e, en ĉiu stacidomo oni nur vendis bileton ĝis la proksima kaj de ĉi tiu al la sekva. La vojaĝanto devis aĉeti bileton en ĉiu stacidomo se li volis daŭrigi la vojaĝon. La enspezon atingitan de la vendo de biletoj disdonis al si la dungitoj.

Per la reorganizo finiĝis ĉi tiu aferstato kaj komenciĝis la normaleco en la servoj.

Oni ankaŭ entreprenis, laŭ la cirkonstancoj tion permesis, la riparon de la materialo, kiu povus esti reuzebla. Kompreneble, la riparoj estis tre malrapidaj; al tio kontribuis multaj kaŭzoj kaj la manko de krudmaterialoj, iloj kaj trejnitaj laboristoj estis tiuj pli gravaj.

Poste oni enkondukis la dividon en la funkcioj, eĉ kreante teknikan lernejon, kie ĉiu fervoja kandidato devis ĉeesti dum ses monatoj. Oni ankaŭ kreis la politikan sekcion komisiitan organizi la teknikajn lernejojn kaj fari komunisman propagandon inter la fervojistoj.

Oni starigis fervojan Centran Komitaton peranto inter la diversaj sekcioj de la fervoja Sindikato kaj la Departemento pri la Transporto.

Oni difinis laborplanon por la riparo de lokomotivoj kaj vagonoj kaj por la konstruo de aliaj, kiu, laŭ kalkuloj, permesus normaligi la servon kaj meti ĝin en identa situacio kun la antaŭa al la milito por la jaro 1925.

Oni starigis monrekompencojn en la manlaborejoj de riparo, koncedante kvar pliajn porciumojn al la laboristo, kiu produktos duoblan laboron de tiu indikita. Se, male, oni realigis kvanton da laboro pli malgranda ol tiu postulita, estis rajtigita la Komitato de manlaborejo por malpliigi al li la porciumon je la duono. Ankaŭ ricevis monrekompencojn la maŝinistoj pro ŝparoj aŭ troo da laboro.

La produktkapablo de la laboro de ĉiu laboristo estis kalkulita laŭ antaŭmilitaj statitiskoj kaj la fervoja servo estis konsiderita, kiel militistigita servo; la mobilizitaj laboristoj restis sub ĉi tiu kadro kaj estis juĝataj de militistaj tribunaloj.

Oni estis studanta la solan tipon de lokomotivoj kaj vagonoj por vojaĝantoj.

—La sindikataliĝo estis deviga —oni fine nin informis— kaj al ĉiu fervojisto oni dekalkulis la du procenton de la monata salajro por kotizo de la Sindikato.

* * *

La donitaĵoj havigitaj de la Departemento pri la Fervoja Transporto estis konfirmitaj de privataj donitaĵoj. Sed kiel la pligrandigo al ni donos novan aspekton pri la problemo, konvenas, ke ni revenos al iu el la punktoj jam konitaj.

La fervoja striko deklarita, kiam la bolŝevikoj prenis la Povon, estis stimulita de la revoluciaj socialistoj, ĉar inter la fervoja dungitaro estis multaj membroj el ĉi tiu partio. Kaj kvankam la bolŝevikoj superregis la strikon, ne povis eviti, ke estiĝis forta opozicio al iliaj centralizantaj kaj diktatoraj metodoj.

Estiĝis ĉi tiu protesto pro registara dispono, kiu ne povis esti pli absurda.

Favoraj la plej elstaraj bolŝevikoj al la kapitalisma sistemo, al la plej absoluta divido de la laboro, ili volis efektivigi ĝin en la disdono de la disponebla fervoja materialo.

Ili ellaboris kiel eble plej kompletajn statistikojn kaj dividis la transporteblajn materialojn en du ĉefaj grupoj, subdividitaj siavice en tri. La unua grupo enhavis ĉiujn militistajn transportojn: homojn kaj ekipaĵojn. La dua, kiu subdividis sin en du, enhavis la varojn de ĝenerala karaktero kaj la vojaĝantojn. Oni disdonis al ĉiu grupo la materialon, kiun oni povis, kun la eksplicita kondiĉo, ke neniu militista trajno povis transporti varojn nek civilajn vojaĝantojn, kaj male, neniu civila trajno, soldatojn aŭ militajn ekipaĵojn.

La rezulto de ĉi tiu dispono estis katastrofa.

Okazis, ke militista trajno, kiu deiris de Moskvo al Odeso aŭ alia destino, ne havante transportotajn militajn ekipaĵojn foriris malplena, dum en la stacidomo de Moskvo restis varoj aŭ civilaj vojaĝantoj, kiuj ne povis deiri pro manko de transportorimedoj. Kaj male, ke restis soldatoj aŭ militaj ekipaĵoj atendantaj la deiron, ĉar estis civila kaj ne povis transporti ekipaĵojn de milito nek soldatojn la trajno atendanta la deiron, ĉar tion malpermesis la tre trafaj bolŝevikaj disponoj.

Tiel okazis, ke restis en situacio de atendo varoj aŭ pasaĝeroj, dum la trajnoj trairis centojn kaj centojn da kilometroj sen ia ŝarĝo, sed farante la vojiron, kiun trairintus la varoj aŭ vojaĝantoj, kiuj restis en la stacidomoj; ĉio tio, ĉar la trajno ne estis asignita al la grupo de varoj aŭ vojaĝantoj en la stacidomo, sed al alia aŭ aliaj, ke ankaŭ ne

iu sciis en kiu stacidomo ili atendis. Necesis, ke la Fervoja Sindikato vidigis al la Konsilantaro de Komisaroj de la Popolo, prezidata de Lenino, tion sensencan, kio estis tiu organizo. Nur tiam estis nuligita la dekreto.

Ree manifestiĝis la kontraŭstaro de la fervojistoj al la kreado de la Centra Komitato, kiu devis peri inter la Sindikato kaj la Departemento de Transporto.

Komence opiniis la fervojistoj, ke la organizo de la Centra Komitato devenis de la deziro neniigi la Departementon aŭ Komisararon pri la Transporto; sed konstatante, ke restis la du, ili petis la forigon de ambaŭ institucioj, rimarkigante, ke la Sindikato mem sufiĉis por organizi la transporton rekte komunikiĝante kun la Komisararo pri la Laboro aŭ kun la Konsilantaro pri la Nacia Ekonomio. Ĉi tio akordiĝis en fervojista Nacia Kongreso. La Konsilantaro de Komisaroj de la popolo forĵetis la peton de la fervojistoj. Sed ĉi tiuj ne akceptis sian malvenkon.

En la Nacia Kongreso de fervojaj laboristoj, okazigita la jaron 1919, la opozicio al ĉiuj oficialaj disponoj estis tiel potenca, ke la forigo de la Centra Komitato kaj la Departemento pri la Transporto estis temo diskutita kaj aprobita de grandega plimulto de voĉdonoj, kio kompreneble ĉagrenis la politikan Komitaton de la Komunista Partio.

Urĝe kunveninta ĉi tiu lasta, ĝi alvokis ĉiujn komunistojn, kiuj estis delegitoj al la Kongreso, kaj devigis ilin sekvatage prezenti proponon, kiu petis, ke oni revoku la prenitan interkonsenton. Ĝi ankaŭ trude devigis la senpartiajn delegitojn kaj la interkonsento estis revokita, ne sen tio, ke la komunistoj mem sentis la senkuraĝigajn efikojn de la ĉiakoste altrudita sukceso.

Konvinkitaj la fervojaj delegitoj, ke ĉiuj interkonsentoj, kiuj kontraŭdirus la Komitaton de la Partio, estus nuligitaj, finigis ĉiujn temojn kaj rapide finiĝis la Kongreso per la nomumo de la Nacia Komitato de la Sindikato.

Sed eĉ ĉi tiu nomumo enhavis spiriton de protesto.

Pro propono de la Komunista Partio devis konsisti la Komitato el dudek individuoj, kaj se eblos, ke ĉi tiuj estu elprovitaj komunistoj.

Por ne komplezi la Partion, la nomumo falis sur dek komunistoj kaj dek, kiuj ne ĝin estis. Tiel obstaklis la fervojistoj la bolŝevikan diktatoradon.

Pro ĉi tiu mikskonsista konsisto de la Komitato okazis tio, kion la fervojistoj volis: ke neniu dispono estu aplikebla, ĉar ĝi troviĝis en senerilejo, kiam alvenis en la Komitato de la Sindikato.

La senŝanĝa rezulto de la balotado estis la egaleco.

Minacoj kaj petoj, petegoj kaj kritikoj, ĉio estis uzita de la bolŝevikoj por submeti la fervojistojn; sed ili nenion atingis.

Vidita ilia malsukceso, ili fine uzis despotan agon: malfondis la Nacian Komitaton de la Fervoja Sindikato kaj nomumis, por anstataŭi ĝin, eksterordinaran Komisionon inklinan al la partio—konsistigita de elprovitaj komunistoj —, kiu pro disciplino estis devigita submeti sin al ĉio.

Konvenas rimarkigi, ke la opozicio de la fervojistoj nek kontraŭis la ordigon de la servo de transporto, nek kontraŭis ĉion, kio malbonigus la interesojn kolektivajn kaj de la revolucio.

Kion ili kontraŭstaris, kion ili volis kaj por kio ili luktis, estis, ke oni ne nuligu la kolektivan personecon de la Sindikato inter la Centra Komitato kaj la Departemento pri la

Transporto. Ili volis, ke ĉio rilata al la fervoja transporto estu konfidita al la Sindikato kaj, ke oni neniigu senutilajn instituciojn, kiuj, krom iĝi bredejo de burokratoj kaj mallaboremuloj, nur utilis por kompliki la fervojan disvolviĝon.

Koncerne la eksterordinarajn Komisionojn, oni al ili koncedis ĉiopovajn rajtojn kaj ĉio restis sub ĝia aŭtoritato. Estis ia polico kun plenumaj povoj.

En la stacidomoj ili faris kaj malfaris laŭkaprice. Kiel ĉiu plendo kontraŭ iliaj misuzoj devis esti kontrolitaj de ili antaŭ ol proceduri ĝin senutile estas diri, ke neniu alvenis al ĝia destino.

Ili arestis kaj enprizonigis tiun, kiu al ili plaĉis, kaj pro iliaj denuncoj oni kondamnis al monatoj de malliberejo dungitojn kaj vojaĝantojn.

Krome, ili fariĝis tiel multnombraj, ke eĉ ne dum la carismo, kiam la fervojoj estis ekspluatataj de privataj kompanioj, la nombro da dungitoj, kiuj enspezis kaj ne faris servon, estis tiel troa komparita kun tiuj de la eksterordinaraj Komisionoj.

En la stacidomoj, la eksterordinara Komisiono havis, kiel komision vigladi, obeigi la oficialajn disponojn, zorgi por ke la ordo ne perturbiĝu kaj kolekti la plendojn (?) de la vojaĝanto.

La komisio de la Komisionoj vojaĝantaj en la trajnoj, kiel ili ne kontrolis la biletojn nek faris iun alian servon, estis limigita vojaĝi por akompani la trajnon.

Certe, kiel la vagonoj de vojaĝantoj malabundis, oni konsistigis trajnojn por vojaĝantoj per vagonoj da varoj, escepte de la vagono destinita al la eksterordinara Komisiono, kiu neniam mankis, la sola de la trajno.

Kaj ĝi veturis komforte. Ne gravis, ke la trajno estis plenplena de vojaĝantoj aŭ, ke iuj ne povis vojaĝi pro manko de loko. En la vagono de la eksterordinara Komisiono de la trajno povis eniri neniu, krom se li estis rekomendito, influa gravulo aŭ amiko de iu membro de la Komisiono. Nur la favoremo povis sidiĝi en la vagono de la eksterordinara Komisiono.

Kaj ni parolas pri nia propra sperto.

13a. En la Komisarejo pri la Laboro

Ĝi lokiĝis sur la alta etaĝo de grandaj magazenoj de la ĉina kvartalo, konfiskita, kiel multaj aliaj, de la bolŝevikoj.

Enkondukitaj de nia “gvidisto” kaj interpretisto al ĉeesto de la kamarado komisaro, anticipe informita de niaj deziroj, li afable ricevis nin.

Ni komencu dirante, por ne elrevigi tiujn, kiuj legos ĉi tiun ĉapitron kaj el ĝi atendos la grandajn instruadojn, kiujn el reĝimo nomita komunisma oni povus atendi, ke la donitaĵoj havigitaj de la Komisararo pri la Laboro entenas nenian novaĵon. Preskaŭ ĉiujn, por ne diri ĉiujn, de certa intereso, ni jam konis. Ili aperas en ĉio, kion ni jam skribis.

Nia impreso pri la utileco aŭ graveco de la rolo atribuita al la Komisararo pri la Laboro estis duba.

Ni opiniis kaj klare eldiris ĝin, ke ĝi estis institucio de malĉefa agado. Ni baldaŭ povis atingi la certecon de ĉi tiu impreso.

Pri la fundamentaj aferoj de la laboro, ĝia interveno estis limigita, por ne diri nula.

La fervoja afero ne apartenis al la inspektado de la Komisararo. Same okazis kun la Terkulturo. Nur en la industria aspekto ĝi faris iun intervenon. Kaj eĉ pri tio, ĝia interveno, kiel sola aŭ ĉefa elemento, restis tre limigita pro la amplekso, kiun atingis la aktivecoj aŭ funkcioj de la Konsilantaro pri Nacia Ekonomio.

Tiel disigita kaj en pluraj institucioj la komisio koncernanta la Komisararon pri la Laboro, ankoraŭ al ĝi

deprenis influon la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro mem kaj la Tria Internacio.

Multajn el la aferoj, kiuj koncernis la Sindikatojn kaj la laboron, oni proponis, diskutis kaj komence solvis, sen tio, ke la Komisararo pri la Laboro havis ian intervenon.

Veras, ke poste por doni al ili la laŭleĝan formon, oni bezonis ĝian aprobon kaj konsenton; sed oni nur ilin petis, kiam jam la afero estis tute antaŭjuĝita.

Tial nia komisio baldaŭ estis plenumita; oni nur al ni donis statistikojn, kiujn ni ne reproduktas pro ilia nur interna, transira aŭ cirkonstanca intereso.

Laŭ ĝeneralaj linioj, oni trovis en ĉi tiuj statistikoj la nombron da senlaboraj laboristoj en diversaj jarperiodoj; ĝian kreskon aŭ malkreskon; monhelpojn konceditajn al la sendungitoj kaj maljunuloj; akcidentojn pro la laboro kaj aliajn similajn aferojn.

Inter la serio da donitaĵoj, kiun oni al ni havigis, vekis nian atenton la fakto, ke kvankam estis determinita limo por la aĝo de nekapableco por la laboro, oni bezonis kuracistan kaj teknikan informon, kiu precizigis la absolutan invalidecon, sen kiu ne povis la Komisararo pri la Laboro dediĉi la maljunulon al alia laboro akordigebla kun la rezulto de la informo.

Utiligante ĉi tiun viziton, ni al ni proponis klarigi dubon. En nia posedo, ni havis ekzempleron de la Kodo pri la Laboro —severega kaj kruelega Kodo, kiu altrudas devojn al la laboristoj, sed al ili koncedas neniun rajton— kaj ni volis scii kiujn kontribuojn al ĝi faris la Sindikatoj kaj kiun partoprenon aŭ kunlaboradon havis la Komisararo.

Ŝajnis nekredeble kaj ni daŭre samopinias, ke Komisararo devigita defendi la interesojn de la laboristoj kaj,

ke diras kaj asertas esti regita de laboristoj, subskribis tiun Kodon.

Kiom ni povis scii pri tio, portis nin al la konkludo de tio, kion ni jam supozis: ke la Kodo de la rusa Laboro estis la verko de la Komunista Partio kaj de ties membroj, inter kiuj ankaŭ estis la komisaro.

Kiam oni al ni parolas pri la “diktatorado de la proletaro” por pravigi tion nepravigeblan kaj oni havas antaŭ la vido la faman rusan Kodon pri la Laboro, oni metas nin en la kriza momento devi demandi ĉu ĉiuj rusaj proletoj aŭ iliaj reprezentaj homoj estis frenezaj subskribante tiun dokumenton. En neniu lando de kapitalisma reĝimo ekzistas tiom rigida leĝaro kaj tiom kontraŭa al la intereso de la laborista klaso.

Tiu, kiu entreprenos la taskon de tradukado de ĉi tiu Kodo, havigos al la laboristoj de hispana lingvo la plej bonan argumenton kontraŭ la bolŝevika reĝimo.

Ili, tiel zorgemaj diskonigi sian literaturon kaj politikon, silentas kaj nenion diras pri sia ekonomia literaturo kaj sia leĝaro. Ili interpretas Markson laŭplaĉe.

La militantoj de la historia materiismo, la kantantoj pri la lukto de klasoj, kiuj reduktas ĉiujn aspirojn de la popolo al stomakaj kemiaj rezultoj, kiuj konsideras sin, kiel la elektitoj por elaĉeti la popolon el ĉiu ekonomia dependeco, efektivigante la proletan diktatoradon (?) por atingi ĝin, estas neklarigeble, ke ili prisilentas la plej grandan parton de la disponoj pri la deviga laboro.

Ili nenion diras en siaj propagandoj pri la fama Kodo pri la Laboro; ili ankaŭ prisilentas ĉion rilatan al la mobilizado de la laboristoj; ŝajnas, laŭ ili, ke ĉi tiuj aferoj ne interesas al la tutmonda proletaro. Male, al ni ŝajnas tute male. Eĉ pli, ni opinias, ke la nervo de la revolucio kuŝas tie,

sur la disponoj, kiuj garantias kaj certigas la plenan liberon de la laboristoj; sur la maniero organizi la laboron; sur la socia strukturo, kiu neebligas la ekspluatadon de la homo fare de la homo kaj la submetiĝon de klaso al alia klaso.

Ĉar, kiu estas la vera situacio de la rusa laboristo pro la bolŝevika leĝaro kaj, sinsekve, la mobilizado? Tiu de sklavo, de homo al kiu oni altrudas devojn ne koncedante al li iun rajton. Veras, ke tiuj devoj maskas sin per la paradokso esti faritaj por lia profito kaj en lia nomo; sed la realo estas pli malagrabla ol la bolŝevikaj elcerbaĵoj kaj fantazioj, malkovrante la trompon kaj malkaŝante la artifikon.

Ĉu diktatorado de la proletaro? Ni vidu.

Post enskribita la laboristo en la sekciojn de sia ofico ene de la Borso de la Laboro, li restas sub la tuta dispono de la Ministrejo pri la Laboro.

Se pro necesoj de la produktado, realaj aŭ fikciaj, ĉar oni al li ne ilin klarigas, la Ministrejo decidas, ke li devas foriri realigi siajn servojn al Odeso, kvankam li kutime loĝas en Moskvo kaj tie havas sian familion, la laboristo devas deiri sen rajto kontesti la donitan ordonon.

Li estas laboristo mobilizita nome de la diktatorado de la proletaro, tial ĉi tiu disponas de li laŭkaprice.

Se jam en Odeso decidas la Ministrejo, ke la sama individuo devas foriri realigi siajn servojn al Tobolsko aŭ kiu ajn alia siberia loĝloko, li devas tuj deiri je la horo kaj tago, kiujn la Ministrejo al li ordonis.

La laboristo, laŭ ĉi tiuj kondiĉoj, estas mekanika ludilo en manoj de la Komunista Partio. Ĝi povas disponi de li laŭ sia deziro kaj kaprico, kiam kaj kiel ĝi volas.

Ni vaste priparolis ĉi tiun aferon konversaciante kun la kamarado Komisaro pri la Laboro. Kaj kiam ni al li diris, ke al ni ŝajnis absurda kaj arbitra la laborista mobilizado tamen rekonante, ke kelkfoje kaj eble laŭ la ofico estus necesa, sed kruela, kiel sistemo, li al ni respondis, ke sen ĝi la triumfo de la revolucio neeblis, ĉar multaj laboristoj rifuzis labori en profesio, preferante alian, kio malekvilibrigis la nacian ekonomion.

Ni rekonis ĝusta la pledon; sed malakceptis la premisojn, kiujn ĝi asertis. Ni diris, ke al ni ŝajnis pli racie konvinki la laboriston aŭ laboristojn specialigitajn en profesio kaj bezonajn en alia loko ol kie li kutime loĝis, kie oni bezonis lian partoprenon en alia laborposteno kaj, kvankam dumtempe, li iros realigi ĝin. Sed preni ĝeneralan kaj tiel rigoran disponon, ni ne komprenis.

Li respondis, ke tiel la Registaro, kiu devas esti la sola rajtigito organizi la politikan kaj ekonomia vivon de la lando nome de la Revolucio, havas pli da libero disponi la aferojn, evitante doni klarigojn. Ĉi-okaze, li asertis, ĝi bezonas la plej blindan, kompletan kaj absolutan obeadon de ĉiuj al la disponoj de la laborista ŝtato. Se ni agadus kiel vi diras, oni ne atingus tiun celon.

Veras, ni kontestis; sed la laboristo havus pli da libero, li pli sentus sin partoprenanto en la aro de la lukto por la plibonigo de la revolucio, li partoprenus pli aktive por identigi sin kun ĝi, ĉar oni petis lian partoprenon kaj ne ĝin altrudis, oni ne lin devigis, ke li ĝin realigu.

En gravaj situacioj, ni asertis, stranga estos la individuo, pli ĝuste oni povis konsideri lin nenormala, kiu rifuzos kunlabori kun la verko de liberigo de la popolo, kiu pli-malpli fine estas lia propra liberigo.

—Ĉu vi eble forgesas, oni respondis nin, ke la kontraŭrevolucio ne ĉesas en siaj atakoj; ke la senposedigita burĝaro ĉiutage konspiras por reveni en la estintecon; ke kontraŭ la Komunista Partio kuniĝas ĉiuj fortoj de opozicio kaj, ke la Partio devas ilin alfronti per ĉiuj rimedoj?

—Tiam, ni kontraŭargumentis, la mobilizado, ĉu pli ol dispono de ekonomia ordo por organizi la vivon de la lando estas politika dispono direktita kontraŭ la politikaj partioj aŭ sektoroj, kiuj ne akceptas la komunistajn vidpunktojn?

—Ho, ne; nenial. La mobilizado iras kontraŭ ĉiuj kaj ĉiuj devas submeti sin al ĝi. La komunistoj de la partio samkiel la aliaj. Ne ekzistas esceptoj.

Ni ridetis pro ĉi tiu aserto kaj akceptis ĝin.

—Al ni interesus scii —ni diris—, kiun sintenon adoptis la Komisararo pri la Laboro pro la Projekto prezentita de Trockij por organizi la produktantan Rusujon uzante la tipon de la militista organizo.

Laŭ niaj informoj, Trockij proponis dividi Rusujon en dek militistaj regionoj, farante la saman dividon kun la laboro. Tiel, la soldato kaj la laboristo restus dependantaj de sama organizo, kvankam kompreneble farante malsamajn servojn.

—Tute konsente se la Partio tion akceptintus.

—Tiam la Komisararo pri la Laboro en siaj multnombraj kaj diversaj aktivecoj sekvas la vojon, kiun al li indikas la Komunista Partio. Kaj kiel la samon faras la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, la laboristo ne povas en la reĝimo de sia diktatorado fari sian volon, sed tiun de la Partio, paradoksaĵo al ni ŝajnas ĉio ĉi.

—Ĉar vi ne loĝis en Rusujo, ignoras, ke ĉi tie la organizo kaj la Komunista Partio estas en tuta kaj komuna akordo. Mi mem—diris la komisaro pri la Laboro— kvankam estas membro de la Partio, ne estis asignita de ĝi por ĉi tiu posteno, sed de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro.

Kiam oni kreis ĉi tiun Komisararon, la Partio petis al la organizo, ke ĝi mem nomumu la individuon, kiu ĝin devis regi, kaj en ĝia nomo kaj reprezentante ĝin mi estas ĉi tie.

—Plia kialo por ke nin surprizu la disponoj rilataj al la laboro, kiujn oni decidas.

La mobilizado de la laboristoj, la Kodo de la Laboro kaj ĉiu alia serio de disponoj deciditaj por organizi la produktadon kaj, kiujn ni juĝas kontraŭaj al la kolektiva intereso de la laboristoj, ni ne kredas, ke ili aprobintus ilin se havintus elektoliberon. Sed kiel al ni ŝajnas, ke ĉi tiu libero al ili mankas, ni supozas ĉion ceteran.

—Ni trapasas malfacilajn cirkonstancojn kaj oni ne povas koncedi tiun eblon pri kiu vi parolas.

—Tamen—ni kontestis—, se vi perfortas la volon de la laboristoj, ne povos harmoniigi sin iliaj aspiroj kun la verko de Registaro kaj multege malpli kun la spirito de la revolucio. La efikoj de ĉi tiu politiko de perfortoj estos negativaj.

Al ĉiu perforto, morala aŭ fizika, de la Registaro kontraŭ la proletaro, dum tiu trudas al ĉi tiu normojn en kies preparado kaj adopto ĝi ne partoprenas, ĝi respondos per pli granda pasiva rezisto, kiam ne perforta, kaj la disigo inter la Komunista Povo kaj la laboristo estos ĉiutage pli granda.

—Ne; ĉar nia politiko venkos.

Ni deiris. Nia elreviĝo ne havis limojn. Ni foriris konvinkitaj pri la neutileco de la institucio, kiun ni ĵus vizitis.

14a. La “komunismaj sabatoj”

En unu el la paŭzoj de la kunsidoj de la Kongreso, dum oni tradukis unu el la paroladoj de Zinovjev al la germana, ni permesis al ni, iun posttagmezon, fari al Lozovski iun sedon pri la manko de entuziasmo, kiun ni rimarkis en la popolo pri la komunisma reĝimo, kaj pli ol pri la reĝimo, pri la starigita organizo de la Laboro.

Ni plifortigis nian argumentadon per la grafikaĵoj, kiujn tie mem, en la salono de la Kongreso kaj la koridoroj, kiuj donis aliron al ĝi, oni montris al ni. Estis industrioj en kiuj la produktado malpliiĝis ĉirkaŭ sesdek procento. Kaj ĉi tio nin konfuzis.

Veras, ke ĉi tiu malpliiĝo klariĝis pro la elmigrado de la laboristoj, kiuj ne volis resti en la fabrikoj. La vivo en la kamparo estis pli facila kaj malpli mizera; kaj en la kampon ili enmigris. Sed, kvankam oni rekonis ĉi tiun kialon rilate la aron de la produktado, kiam oni studis la detalojn—ĉiam vidante grafikaĵojn— rimarkis, ke la kvanto da produktado, la individua produktkapablo estis pli malgranda. Al kio atribui ĝin?

Ni nur vidis unu kaŭzon: la manko de entuziasmo, de identiĝo kaj akordiĝo inter la popolo kaj ties regantoj. Kaj estis nature, ke ĉi tiun opinion ni eldiris.

Lozovski, kiu jam konis nian naturan pozicion de rezervo antaŭ ĉiu bolŝevika nuanco, volis tute malaperigi ĝin kaj al ni parolis pri la “komunismaj sabatoj".

La organizo de la “komunismaj sabatoj” estis tre ĵusa. Kaj kvamkam la entuziasmo de la unuaj momentoj ne estis

defalinta, la komunistoj mem per statistikoj, kiujn ni poste publikigos, rekonis, ke ĝi ne progresis, kiel ili kalkulis.

El la diskuto farita kun Lozovski estiĝis la ideo iri iun posttagmezon la delegitoj kontroli la rezultojn de la “komunisma sabato”.

“Komunisma sabato” ne estis, resume, alia aĵo ol la servo de la propra-vola laboro sen rekompenco rekonita.

Starigita en Rusujo la angla semajno[8], oni pensis utiligi la posttagmezon de la sabato engaĝante la laboriston en propra-vola laboro.

Akceptita de ni la propono, krome dezirantaj scii ĝis kiu ekstremo la laboristoj, laŭ ĝenerala maniero, engaĝiĝis pliigi produktadon, kiu devis rekte profitigi ilin, ni vizitis kelkajn manlaborejojn kaj konstruojn, kie oni faris la “komunisman sabaton”.

Iom suspektemaj por ĉio, kion oficiale oni al ni asertis, post tio, kion ni jam vidis, ni volis konvinki nin se veris, ke estis poseditaj de la sindonemo, la ofero kaj la entuziasmo, kiujn oni al ni diris, ĉiuj laboristoj favore de la “komunisma sabato”.

Kutimiĝintaj jam rimarki klare videblan malakordo inter la registaraj disponoj kaj la popolo, kiu ilin devis obei kaj, kiel oni al ni diris, ke la kreo de la “komunismaj sabatoj” ne estis oficiala dispono, sed popola iniciato, ni pensis, ke almenaŭ iufoje finfine trovos punkton de konkordo inter kiuj ordonis kaj, kiuj devis obei.

Tiel do post la fino de la kunsido de la Kongreso de sabato matene, per la aŭtoj antaŭe metitaj je nia dispono, ni deiris viziti manlaborejojn de metalurgio.

8 NeT: oni laboras de lundo ĝis sabato matene.

Ni vizitis plurajn ĉambrojn de la manlaborejo kaj poste faris kelkajn demandojn.

La nombro da laboristoj, kiuj kutime laboris en tiu manlaborejo, estis ducent kvindek, kaj tiu de laboristoj farantaj la “komunisman sabaton” nur ĉirkaŭ sepdek kvin.

La produktkapablo de laboro en la “komunismaj sabatoj”, kompare kun tiu realigita ĉiu tago, estis ĉirkaŭ dudek kvin procento supera, mezume. Oni al ni montris la grafikaĵojn de ĉi tiu produktado, kiuj, laŭ la manlaborejestro, pruvis pli ekzakte liajn asertojn.

Je la sekva sabato oni organizis alian viziton al laborejoj de malŝarĝo de ligno el barĝoj en la randoj de la rivero Moskva.

Ankaŭ ĉi tie oni al ni entuziasme parolis pri la “komunismaj sabatoj". Personoj, kiuj dum la aliaj tagoj de la semajno elturniĝis por ne labori spekulaciante aŭ farante similajn aĵojn, entuziasme laboris en la "komunismaj sabatoj”. Kiel pruvo, oni montris nin kvar aŭ kvin personojn laborantajn. Veras, ke ĉi tiuj personoj estis enskribitaj en la listojn de la Borso de la Laboro, kiel senlaboraj kaj ili ĉiam trovis la manieron aperi kiel tiaj.

La entuziasmo de multaj el la eksterlandaj delegitoj al la Kongreso, post ĉi tiuj vizitoj, ne havis limojn. La plej bombastaj kaj emfazaj epitetoj estis malmulto por karakterizi la entuziasmon de tiuj, kiuj entuziasmigitaj de la belecoj de la komunisma reĝimo kaj la diktatorado de la proletaro, ne nur alportis penadon dum la kvardek ok horoj de la semajno, por ke la produktado pliiĝu, sed ili eĉ donis la kvar horojn, kiuj en la posttagmezo de la sabato al ili restis liberaj.

Kiu ajn sedo al ĉi tiuj entuziasmoj estis konsiderita kiel herezo, kaj antaŭ la entuziasmo de kiuj ne laboris kaj

manĝis —ni diras tion por kiuj malbone manĝis kaj laboris —, ne estis pli rimedo ol silenti, se oni ne volis vidi sin traktita, kiel malinklina al la revolucio aŭ, kiel kiu ne penetris en la profundan lecionon, kiun tiuj aĵoj al ni donis.

Estis vane, ke per videblaj donitaĵoj oni klopodis al ili komprenigi tion mizerkoran de ĉiu tiu entuziasmo, ĉar eĉ ne ĉirkaŭ dek procento el la laboristoj faris la “komunismajn sabatojn”, kio pruvis la malmultan efikecon de tiuj proceduroj. Ili, rajdante sur la nuboj de siaj entuziasmoj, nenion volis kompreni.

Estis ni, kiuj faris sedojn, kiuj vidis kaj sciis nenion. Kaj kvankam ili cedis al la rezonado pri la sensignifeco de la nombro da laboristoj, kiuj akceptis la ‘‘komunismajn sabatojn”, argumentis al sia favoro —koncedo, kiun ni estis devigitaj fari al ili— tio alte simpatia, ke tio estis.

Se la faro de la komunisma sabato, se la faro de la servo de laboro dum kvar horoj estintus la rezulto de tute libere akceptita kaj neprofitema iniciato, kiu povas nei plenumitan kaj kontentigan pruvon de la identiĝo ekzistanta inter la laborista popolo kaj la bolŝevika registaro? Ĉar ni ne havis ĉi tiun konvinkon, ni ĉiam dubis kaj en la diskutadoj pri ĉi tiu afero, ni eldiris niajn dubojn.

For de la oficiala favoro, kiam jam la entrudiĝemo de la akompanantoj, kiujn la Komitato de la Tria Internacio ĉiam metis je nia dispono, ne povis neebligi niajn apartajn esplorojn, ni proprariske enketis sen ĝenaj atestantoj kaj preparitaj aranĝoj.

La iniciato fari la “komunismajn sabatojn” naskiĝis en kunveno de la partio en Moskvo kaj pro propono de Lenino. Sekve ne estis popola iniciato. Tamen por eviti, ke ĝi ŝajnis de la Registaro, oni serĉis plurajn elprovitajn komunistojn kaj ne oficiale oni al ili ordonis, ke kvazaŭ estus iniciato de

ili, spontanea kaj propravola ago, ili proponos en la fabriko, kie ĉiu laboris, fari la “komunismajn sabatojn”.

La respektivaj Komitatoj de Fabriko, kiuj jam estis avertitaj pri la propono, kvankam ŝajnigis scii nenion, varme apogis ĝin kaj invitis la laboristojn de siaj fabrikoj aŭ konstruaĵoj por ke ili ĝin akceptu.

La laboristoj, kiuj estis veraj komunistoj, kiuj suferis ĉiujn kontraŭaĵojn de la reĝimo ne aspirante esti komisaroj nek similuloj, kiuj ne volante honorojn, estis ĉiam pretaj al la ofero por la partio kaj la revolucio, akceptis ĝin per entuziasmo, ĝojeco, ĝuo, dezirante esti utilaj al la afero. Sed la cetero de la laboristoj ĝin malakceptis kaj la malmultaj, kiuj aliĝis al ĝi, faris tion pro intereso.

Dezirante engaĝi la laboristojn kaj la popolon ĝenerale en la iniciato kaj doni impulson al la verko de la “komunismaj sabatoj”, la bolŝevika Registaro ne ŝparis la laŭdojn, al ili dediĉis laŭdegajn artikolojn en la ĵurnaloj kaj faris longajn rezonadojn pri la afero. Ili konsumis multan inkon, sed tre malmulte pliiĝis la produktado.

Pro la negativa rezulto, kiun la iniciato estis doninta, ĉar nur la komunistoj, kaj ne ĉiuj, oferis sin al ĉi tiuj sabatoj, ĝi uzis alian pli praktikan procedon: la disdonon de nutraĵoj aŭ vestaĵoj al kiuj faros la "komunisman sabaton". Kaj ĉi tio donis iun rezulton; ankaŭ ne multe.

Oni disdonis funton da pano, aŭ duonan, laŭ la disponebla kvanto; kelkfoje farunon aŭ sekigitan, salitan fiŝon. Ĉi tiuj proponoj altiris multajn laboristojn. Memkompreneble. Funto da pano egalvaloris, en rubloj, la salajron, kiun multaj gajnis en monato.

Sed kiam ili konstatis, ke la ofertoj ne daŭris kaj, ke iun sabaton post la laboro ili devis iri hejmen sen tio promesita,

komenciĝis la forlasoj kaj la nombro da enskribitaj laboristoj konsiderinde malpliiĝis.

Jen, por ni, alia revo, kiu malaperis; alia plia elreviĝo por aldoni al tiuj, kiujn ĉiutage ni ricevis.

La asertoj de Lozovksi kaj ties subuloj havis malmultan bazon, malhavis observon, ĉar ĉu ili estis subtenitaj de la naiva fido devenanta de absoluta lojaleco al la bolŝevikaj proceduroj aŭ estis en ili intencoj al ni kredigi ĉiajn stultaĵojn.

15a. Trajnoj kaj ŝipoj por propagando

Unu el la organizoj, kiun al ni pli laŭdis la komunistoj, parolante pri ĝi per fervoro de katekumenoj kaj atribuante al ĝi preskaŭ admirindajn virtojn, estis tiu de la propagando.

—Ĉi tiu —ili al ni diris— estos, kiu malfrue aŭ frue (kvankam ni esperas, ke estos frue) portos en la koron de la homamaso, de tiu homamaso senforma kaj sen idealoj, la preskaŭ dian spiraĵon de la Komunismo.

Per ĝi nia Partio estos forta, nedetruebla; ĝi komprenigos al la granda rusa popolo la signifon de la revolucio; ĝin eltiris el la malutilaj influoj de la estinteco, indikante al ĝi la ampleksan vojon de la estonteco.

—Ni multe faris en la lernejo —oni al ni diris—, sed apenaŭ ni komencis. Krome, la lernejo estas nur la enkonduko. La infanoj daŭre ĉeestas en ĝi por kompletigi sian edukadon kaj iĝi plenkreskuloj; al la plenaĝulo tio neeblas. Kiam li konas tion pli elementan, devas forlasi ĝin.

La socio bezonas lian penadon de produktanto kaj sekve ne povas permesi al li, ke li ekskluzive dediĉu siajn horojn al la studado.

Kaj se per la lernejo ni malfermis al la plenaĝulo la ampleksajn horizontojn, kiujn la malnova reĝimo al li sisteme fermis, tenante lin en la malklereco, ni ne povas forlasi lin, kiam komencis lin instrui movi sin tra la vivo.

Sur tiuj organizoj ni bazas niajn esperojn. El ili ni atendas grandajn rezultojn.

De kiam vi eniris en Rusujon, vi tutcerte vidis en iu stacidomo la trajnojn por propagando, tiuj trajnoj dediĉataj porti al la kamparo la voĉon de la komunismo.

Estas bonegaj instrumentoj de diskonigo. La impreso, kiun ili kaŭzas en la naiva animo kaj samtempe deziranta scii de la kamparano, ne estas klarigebla. Oni devas vidi, senti ĝin; esti ĉe la kamparano, kiam li venas admiri tiujn trajnojn. Per kia admiro li observas la simbolismon de la figuroj pentritaj sur la ŝtofoj, kiuj ornamas la trajnon! Kaj kiel li ilin komprenas!

Necesus, ke vi vizitos unu el tiuj trajnoj; sed bedaŭrinde nun estas neniu en Moskvo. Kvankam verdire: al vi ankaŭ ne estus facile viziti ĝin ĉi tie, ĉar ili preskaŭ neniam haltas pli ol kelkaj horoj, tiuj bezonaj por preni la komunisman literaturon, kiun ili devas distribui en la trapasontaj lokoj.

Estus interese, tre interese. Se vi vizitus unu, ĝi al vi kaŭzos agrablan impreson.

* * *

La unuan trajnon por propagando ni vidis en la stacidomo de Petrogrado la tagon mem de nia alveno.

Dum eniris la trajno per kiu ni veturis en la stacidomon, vekis nian atenton alia haltita sur senelira relvojo, sur kies vagonoj estis pentrintaj simbolaj figuroj akompanitaj de surskribaĵoj en la lingvo de la lando.

Pro manko de tempo ni ne alproksimiĝis al tiu trajno; sed demandis ĝian signifon. Estas unu el la trajnoj por propagando, ili diris al ni.

Tagojn poste, jam en Moskvo, ni pli de apude povis observi alian, kaj interesis nin la simbolismo de ĝiaj figuroj kaj tio okulfrapa de la koloroj per kiuj ili estis pentritaj.

Konsistis ĉi tiuj trajnoj el pluraj vagonoj. Kvar, kvin kaj iufoje ses. Tiu, kiun ni vidis en Moskvo konsistis el ses unuoj. Estis unu el la plej grandaj kaj bone ekipitaj.

La dungitaro veturanta per ĝi, tiel de propagando, kiel de servo, faris komunan vivon ene de la vagonoj. Konvene manĝoprovizitaj; ankaŭ provizitaj per konsiderinda kvanto da broŝuroj kaj libroj de komunisma propagando por la disdono, ili ĉiudirekte trairis la grandegan Rusujon.

La simbolaj figuroj pentritaj sur la vagonoj okupis la flankajn flankojn laŭ tuta ilia etendo. En iuj, ne en ĉiuj, la ŝtofoj kovris la tutan flankon de la vagono laŭ longo kaj alto, kelkfoje superante pli ol metro la altecon de la vagono.

La pentritaj scenoj estis diversaj kaj koncerne plurajn motivojn de la lukto de klasoj.

Oni vidis grupojn de laboristoj je minaca kaj perforta sinteno kontraŭ aliaj grupoj reprezentantaj la burĝaron.

Ne mankis tiuj priskribantaj scenojn en kiuj, post la triumfo de la revolucio, sur la amasoj de rubaĵoj de la malnova mondo, troviĝis laboristo kun la ruĝa flago kaj la sovetia standardo, svingante ilin kaj invitante la laboristojn de la mondo al la ribelo.

En grupo oni vidis la industriajn laboristojn donante la manon kaj brakumante la kamparanojn, sigelante la fratecon de laboristoj kaj kamparanoj sub la sovetiaj insigno kaj flago kaj la Komunista Povo.

Ĉio tio kun fono el intensaj kaj okulfrapaj koloroj, ĉirkaŭitaj de simbolismo, kubismo kaj impresionismo.

La metodoj de propagando estis tiel simplaj, kiel efektaj.

Alveninte al loko, oni invitis la kamparanojn ĉeesti en la Prelegoj kaj ceremonioj organizitaj de la Komisiono pri propagando de la trajno.

Al la ĉeestantoj oni distribuis komunisman literaturon.

La loka Soveto taskis fari la alvokon kaj certigi la ĉeeston de la kamparanoj de la vilaĝo kaj la ordon, okaze de kverelo.

Pli de apude, ĉar ni interne ĝin vizitis kaj parolis kun la propagandistoj, vidis unu el la vaporŝipoj dediĉataj al la propagando en la ĉeriveraj loĝlokoj de Volgo.

En unu el la loĝlokoj, kiujn ni vizitis, ankaŭ haltis unu el tiuj vaporŝipoj kaj ni vizitis ĝin.

Tio, kio antaŭe estis keloj, transformiĝis: unu en salono kaj komuna manĝĉambro de la ŝipanaro kaj dungitaro de propagando, kaj la alia en salono de spektakloj kaj kunvenoj.

Oni faris prelegojn, politikajn amaskunvenojn, komentitajn legadojn, kursojn pri scienca marksismo kaj prezentadon de kinofilmoj, ĉio tio, kiel supozendas, ene de la plej pura marksisma ortodokseco.

Ni parolas kun la propaganda grupestro, petante al li iujn detalojn pri la laboro, kiun ili realigis.

Li parolis al ni pri la entuziasmo per kiu la kamparanoj kaj laboristoj akceptis la alvenon de la propaganda vaporŝipo.

Sed tio, kion ili pli admiras, li diris al ni, estas la projekcio de kinofilmoj, ĉar ili donas al ili pli plastika senton de realo kaj de materieco de la aĵoj ol la literaturo.

Ili estas avidaj scii kaj enketi. Ili havas la impertinentecon de la infano, kiu ĉion demandas. Ili ade

demandas, sen ripozo kaj mallaboremeco, per senlaca strebo ekscii ĉion.

Ili ĝojaj akceptas la literaturon; sed mi ne scius diri se ili metas por la legado la entuziasmon, kiun ili metas aŭskultante la parolon aŭ vidante reproduktitaj la bildojn sur la ekrano.

Por la projekcio de kinofilmoj ĉiam, sen escepto, estas malgranda la ejo, kiun ni disponas. Kaj tio pli interesa estas, ke ili spektas la disvolviĝon de la epizodoj per la samaj naiveco kaj atento, ke infano spektis ilin.

Oni klarigas ĉi tiun atenton —li al ni asertis—, ĉar dum la malnova reĝimo malofte estis al lia atingo tiaj spektakloj. Por la rusa kamparano ĉi tio estas la vidado de nova mondo, kiu eĉ ne li duonvidis pro lia malklereco.

Ĉiuj filmoj, kiujn ni projekcias —li aldonis pro niaj demandoj—, reprezentas epizodojn de la revolucia lukto kontraŭ la blankuloj kaj malnovaj burĝoj. Ni tiel impresas la kamparanon kaj ĉi tio favoras la komunistan politikon kaj samtempe malfortigas tiun de niaj kontraŭuloj. Ni volas alveni al tio pli intima de la kamparana animo, eltiri ĝin el liaj antaŭjuĝoj kaj eraroj kondukante ĝin al la marksisma komunismo.

Ni estas konvinkitaj, ke estas verko de multa tempo, pacienco, persistado; sed al ĝi ni dediĉis multajn penadojn kaj estas pretaj dediĉi multajn pliajn. Ĉiuj, kiuj estos bezonaj ĝis ni atingos la definitivan venkon de niaj ideoj.

Mi bedaŭras, li plu parolis, ke la malmulta tempo kiun vi kaj ni disponas, ne permesas, ke de apude, per viaj okuloj, vi vidu kaj kontrolu kion ni diras. Se ni povus organizi kinofilman prokjecion ĉi-nokte, vi konstatus la abundon de spektantoj kaj la intereson kaj atenton de la ĉeestantoj al la projekciotaj epizodoj.

La filmoj submetiĝas, antaŭ ol konigi ilin al la popolo, al la cenzuro de la Partio —li respondis nian demandon—. Kiel la ellaborado de la filmoj estas pagita de la ŝtato, oni devas supozi, ke nur aferoj, kiujn ĝi rajtigas, povas esti filmotaj.

Ĉiuj temas pri komunisma propagando. Filmi aferojn de alia karaktero estus granda eraro ĉi-momente. La lukto, kiun ni devas subteni kontraŭ la malamikoj de la Sovetia Rusujo, ne permesas distrojn nek malfortecojn. Oni devas havi fortan manon por trudi la komunismon kaj severecon por eviti deviojn.

Ni adiaŭis nin. Nia scivolemo restis kontenta. Lastfoje ni observis la flankojn de la ŝipo kovritajn de simbolaj ŝtofoj kaj surskribaĵoj koncerne la lukton de klasoj.

La marksisma dogmo, pli ol per la studo kaj la cerbo, volis komprenigi sin al la kamparano per la vido kaj la impreso. La metodo uzata por atingi ĝin ne povis esti pli taŭga. Ĉu ĝi sukcesus?. Jen la enigmo.

16a. En la Centra Oficejo de Kooperativoj

Nia vizito al la Centra Oficejo de Kooperativoj estis farita neatendite.

La notoj kaj skizoj, kiujn ni kolektis, kiel rezulto de la vizito, ne estis skribitaj sur la kajeroj, kiujn ni kutime uzis, sed sur paperfolioj; paperfolioj, kiuj de nia aresto en Italujo revenante de Rusujo, ni ne scias, kie ili estas. Tial ni nur rakontos kion ni konservas en la memoro (kaj bone rememorante ĝin), por ne fali en erarojn aŭ malĝustaĵojn.

* * *

Trapasitaj la sojloj de la Centra Oficejo de Kooperativoj, ni iris tra koridoro. Kaj suprenirinte ŝtuparojn, ni trairis malbruajn salonojn kaj alvokis, kiel ni jam faris ĉe la ĉefa pordo kun egala rezulto. La domo ŝajnis senhoma. Silento ĉie. Nek pordisto, nek soldato, nek dungito, kiu nin gvidos.

Finfine, post ripetitaj alvokoj, ni aŭdis malfortan voĉon, kiu de proksima ĉambro nin invitis eniri.

Akceptis nin maljunulo; kaj post kiam ni al li esprimis niajn pretendojn, li respondis al ni, ke malmulte jam povis diri al ni.

—Fakte la Kooperativoj jam ne ekzistas —li komencis dirante nin—. La bolŝevika Registaro, aldonante unu plian al la amasigitaj mallertecoj, ŝtatigis ĉiujn Kooperativojn. Per ĉi tiuj disponoj ili iĝis simplaj magazenoj por disdono de la produktoj, kiujn la bolŝevikaj delegitoj konfiskas aŭ aĉetas en provincoj. Tial mi diras, ke nenion mi povas diri al vi, kio estu interesa.

Kiel ni insistis pri nia peto, rimarkigante la kondiĉon de eksterlandanoj kaj delegitoj al la Kongreso, kaj komprenigante al li la intereson, kiu havus por la kooperativistoj de la landoj, kiujn ni reprezentis koni la atingon kaj amplekson de la kooperativa rusa movado, li finfine akceptis doni al ni la detalojn, kiujn ni petis.

—Pri la kunlaborado en Rusujo —li al ni diris— oni povas diri, ke ĝi datiĝas, kiel organizo de klaso kaj kun certa sociala kaj politika tendenco, de 1905. Antaŭ ĉi tiu dato, la kooperativismo jam ekzistis en nia lando, sed sen iu difinita tendenco. La celo de tiu kooperativismo, kiun ni nomos primitiva, estis pure kaj ekskluzive ekonomia kaj ampleksis tre diversaj nuancojn.

La "*Mir*" kaj la "*Artel*" estas la plej konataj variaĵoj. La unua de klare komunista tendenco kaj la dua de kolektivismaj tendencoj.

En la plej granda parto de la "*Mir*"-oj la laboro samkiel la disdono de produktoj, kiujn oni akiris el ĝi, estis komuna, dum en la ''*Artel*" ĉiu membro ricevis tion respondan laŭ la realigita laboro. Por tiom da horoj de laboro respondas tiom da kvanto da produkto. Ĉi tiu estas ĝia principo.

Kutime, la influzono en kiu disvolviĝas la "*Mir*"-oj kaj la "*Artel*"-oj ne estas la sama, ĉar tiel, kiel la "*Artel*" prefere stariĝas por la manufakturitaj varoj, la "*Mir*" influas la laborojn de la kamparo, plantadon de la tero kaj aliajn similaĵojn.

Ĉi tiu diferenco perfekte klariĝas.

Nialande, pro la longa daŭro de la vintro, dum kiu la kamparano ne povas efektivigi iun terkulturan laboron, ĝenerale li dediĉas sin fari objektojn el ligno, kiujn poste vendas en la merkatoj de la loĝloko.

La konkurenco, kiun en la merkatoj ili faris inter si vendante tiujn objektojn, estis kio decidigis la kreon de la “*Artel*”-oj.

Kiel la laboro ne povis fari sin komune pro tio disa, ke troviĝas la kamparana loĝantaro sur la senfinaj rusaj ebenaĵoj, tial fariĝis bezona la kolektivisma sistemo, t.e., ke ĉiu ricevis la profiton egalvaloran al la kvanto da objektoj alportitaj por la vendo.

Ĉi tiu sama kialo, tiu de la senfinaj vintroj kaj la mallongeco de la printempo kaj aŭtuno —ĉar apenaŭ daŭras semajnojn ĉiu el la sezonoj—, faras, ke la laboro de kulturo de la tero, semadoj kaj zorgoj, kiujn poste ĝi bezonas ĝis la rikolto, postulas pli grandan aktivecon kaj sekve pli intensa amasigo de penadoj. Tial oni preferas la laboron komune.

Sed, mi ripetas ĝin, ĉiuj ĉi institucioj “*Mir*”-oj aŭ “*Artel*”-oj agadis laŭ la apartaj interesoj de ĉiu, sen rilato kaj interrilato kun la ceteraj, krom esceptoj.

De post 1905, la situacio ekdisvolviĝis sur aliajn vojojn.

La influo de la socialaj ideoj, kiuj pro la movado okazinta tiu jaro prenis iun impulson en Rusujo, ne ĉesis sentigi en la interno de la “*Mir*”-oj kaj la “*Artel*”-oj.

Iom post iom, ĉi tiu influo decidigis la fondon de Kooperativoj de produktado kaj konsumado.

Multaj el la lastaj sin provizis preskaŭ ekskluzive de produktoj ellaboritaj de la “*Mir*”-oj kaj “*Artel*”-oj kaj same okazis kun la unuaj.

Tiel potenca iĝis ĉi tiu impulso, ke ĉi tie, en Moskvo, kiam oni deklaris la militon, estis Kooperativo de Konsumo, kiu taskis la vendon de pli ol cent kooperativoj de produktado, t. e., de “*Mir*”-oj kaj de “*Artel*”-oj.

Kaj ne estis ĉi tiu sola. Mi citas ĉi tiun ekzemplon, kiel mi povis citi aliajn.

La nombro da kooperativanoj estis sufiĉe konsiderinda.

En 1914, oni kalkulis ĉirkaŭ kvar milionojn de kooperativanoj en la tuta Rusujo. Kaj post ĉi tiu dato ĝis la ĵusa Sovetia dekreto, kiu ĵus enmetis la kooperativojn en la ŝtatigon de ili dezirita, la nombro da kooperativanoj ege kreskis. Oni kalkulis ĉirkaŭ dek unu milionoj.

Sed ne estas pro la nombro da kooperativanoj per kio oni povas montri la influon kaj amplekson, kiujn la kooperativismo atingis en Rusujo; estus eraro tiel juĝi. Ĝian influon oni devas klarigi pro la servoj, kiujn al ĝiaj membroj kaj al la ŝtato mem ĝi faris. Ni opinias, ke ĉi tio lasta, la servoj faritaj al la Registaro estas kiuj kaŭzis la decidon, kiun kontraŭ la Kooperativoj oni ĵus prenis.

Plurfoje, pro malfacilaĵoj de provizado por ĝiaj propraj institucioj —Armeo kaj aliaj—, la Konsilantaro de Komisaroj de la popolo petis helpon al la Kooperativoj kaj ĉi tiuj ĝin plene faris.

La nekapableco de la Registaro kaj de la sovetiaj institucioj por plenumi siajn celojn kontrastis kun la diligenteco, aktiveco kaj kompetenteco pruvitaj de la Kooperativoj, kiuj neniun profiton akiris kaj nur per ilia propra iniciato ili solvis urĝojn, kiujn nek la konfisko, nek la forpreno, nek la mortpafadoj sukcesis solvi.

Stimulita la Registaro de ĉi tiuj realaĵoj, tre superaj al ĝiaj ekonomiaj konceptoj kaj ĝiaj centralizantaj kaj aŭtoritatemaj organizoj, ĝi pensis ke, por eltiri sin el la malfacila situacio kaj doni solventecon al la bolŝevikaj ekonomiaj institucioj, tio plej rapida kaj farebla estis enmeti la Kooperativojn en ĝian ekonomian politikon, fari el tiuj

institucioj, kiuj antaŭe estis aŭtonomaj kaj sendependaj, instituciojn de Registaro kaj de Partio, ĉar per ilia sperto kaj kapablo ili ĝin eltirus el la embaraso. La eraro ne povis esti pli evidenta.

La Kooperativoj, florintaj hieraŭ, velkiĝis kvazaŭ vintra ventopuŝo pasintus sur ili.

Malmultaj monatoj sufiĉis por plenumi tiun detruan laboron.

Hodiaŭ, oni povas diri, ke la Kooperativoj jam ne ekzistas. Apartigitaj de ili ĉiuj, kiuj nin dediĉis al ĝia disvolvigo kaj grandigo; metita, ĉiu Kooperativo, sub la estreco de elprovita komunisto, de homo inklina al la partio, kvankam li estas nekompetenta por la posteno; inspektitaj kaj submetitaj al la kuratoreco de la Konsilantaro pri nacia Ekonomio; neebligitaj fari operaciojn de aĉeto kaj vendo al la privatuloj aŭ al ĝiaj membroj mem; devigitaj provizi sin el la magazenoj de la ŝtato kaj perdita por la membro de la Kooperativo ĉiu rajto de interveno en ties funkciado... de la motora ideo, kiun Kooperativo reprezentas, nenio restas en la rusaj Kooperativoj, ĉar ili nur estas, kaj mi ripetas ĝin, plilongigoj de la magazenoj de produktantoj de la sovetia ŝtato.

Do reduktitaj al la senpoveco, la kooperativanoj ne pro tio forlasis la idealon de nia tuta vivo. Tago venos kaj ni ne ĝin supozas malproksima, ke ĉio ĉi ŝanĝos. Kaj se ne estas la samaj kooperativoj, ĉar eble oni ne povas jam uzi ilin, fondonte aliajn novajn ni povos daŭrigi nian idearon de elaĉeto kaj interhelpo inter la popolo. De la nunaj maldolĉaj momentoj, tiam nur al ni restos dolora memoro, kiu al ni servos —vi povas esti certaj— por persisti per pli entuziasmo en nia verko.

Estis tia sento de doloro en liaj vortoj, ke ni foriris demandante nenion pli. Ni ne volis pliigi ĝin per memoroj, kiuj ĝin intensigos.

17a. Aliaj vizitoj

La deziro kolekti la plej grandan kvanton da informoj, kiuj al ni permesis formi kiel eble plej ĝustan juĝon pri la reala situacio de Rusujo, senĉese, aktive pelis nin viziti tiujn lokojn, kie oni povis atingi tiun celon.

Tre kara persono, al kiu ni ŝuldas dankemon pro liaj grandvaloraj informoj kaj, ke pli ol unu fojo nin akompanis en niaj vizitoj, al ni parolis pri Sujarefka.

Kelkajn tagojn poste ni faris la viziton. Kiel ni ne devis enketi, nek demandi ion, sed vidi; kiel estis la okuloj, kiuj nin devis informi, ni preferis iri solaj por ne preterlasi eĉ unu detalon.

Sujarefka de Moskvo estas ia Avenuo senarba kaj tre larĝa.

Jam dum la carismo ĉiutage okazis en Sujarefka merkato, kiel tiu de *Los Encantes* de Barcelono aŭ *Rastro* de Madrido. Estis la merkato de la malnovaĵoj kaj neordinaraĵoj.

Pro la karaktero de ĉi tiu merkato, la bolŝevikoj ĝin respektis kaj neniun disponon decidis kontraŭ ĝi.

Persekutata la Komerco pogrande kaj pomalgrande; fermitaj la vendejoj kaj punataj per ege severaj punoj ĉiuj personoj dediĉataj al komercaj interkonsentoj, nur restis loko, kie ĉiu negoco estis, se ne laŭleĝa, tolerata: Sujarefka.

La graveco, kiun akiris ĉi tiu merkato, estis konsiderinda. La transformo estis rapida kaj la vestaĵoj kaj objektoj, kiuj tie lombardis sin, ne povis kompari sin kun aliaj tempoj.

Flanke de la paro da uzitaj ŝuoj, oni elmetis la diamanton aŭ la perlon taksitajn je milionoj da rubloj, obliĝinta valoro.

La sama viro, kiu al vi ofertis rompitan pantalonon tra la genuoj, metis je via dispono palton el ledoj kontraŭ kiu al vi petis fabelajn kvantojn.

En la amaso el malnovaj plandumoj, el uzitaj ŝuoj, vi povis admiri elegantajn korkosandalojn modo Ludoviko la 15a.

Tie oni vendis kaj aĉetis ĉion. Tiel multnombraj estis, kiuj volis vendi, kiel kiuj volis aĉeti.

Vendejoj de mercero, kuriloj kaj manĝilaroj, kie kontraŭ centoj da rubloj oni al vi havigis tranĉaĵon de karno, aŭ pecon de fiŝo kaj tranĉaĵon de pano. Kaj la petoj estis multnombraj. Oni apenaŭ povis kontentigi ĉiujn.

Oni ankaŭ vendis lakton po 75 rubloj por glaso. La prezo variis laŭ la kvanto.

Oni vendis freŝan kaj putran viandon. Promeni proksime de iu individuo el kiuj vendis viandon, kelkfoje estis vera tormento.

Blanka kaj nigra pano. Pomoj, piroj; ĉiaj guŝoj; esencoj kaj sapoj pli aŭ malpli odoraj. Konklude, oni vendis ĉion kaj komercis per ĉio.

La perfortoj kaj kruelaĵoj de Ĉeka nenion povis kontraŭ la urĝa vivneceso.

La impetaj eniroj, kiujn la malaminda polico faris en la merkaton, tre oftis, kvankam la kaŭzo de ili pli estis senpage alproprigi la elektitan produkton ol por respektigi la oficialajn disponojn. Sekvatage kaj ofte horojn poste, la merkato de Sujarefka rekomencis siajn komercajn interŝanĝojn kvazaŭ nenio okazis.

Kaj ne pensu, ke la cirkulado estis facila. Kelkfoje kaj kelkloke, ĝi fariĝis malfacilega. Oni nombris milojn da ĉeestantoj.

La vido de iuj el la vendotaj ekspoziciaĵoj memorigis al ni la oficialan kaj registaran nekapablecon, kun ĝia centralizado kaj ĝiaj konfiskoj.

Tiel, ekzemple, dum vizito, kiun tagojn antaŭe ni faris al la Akuseĵo, ni aŭdis, kiel la direktistino kaj virinoj respondecaj de la infanoj plendis pri la manko de sućboteloj por doni al ili la lakton, dum tie en la merkato de Sujarefka ni vidis amasojn da sućboteloj.

Nadlojn, pinglojn, fadenon kaj butonojn, malofte distribuis la Registaro, ĉar ne havis; tamen en Sujarefka ili abundis. Kaj tiel ĉio.

La oficialaj disponoj kontraŭ la komerco povis esti malmolaj kaj kruelaj; sed pli malmola kaj kruela estis la vivneceso. Ĉi tie tio restis bone pruvita.

Kelkfoje la arestitoj de Ĉeka en Sujarefka estis mortpafitaj akuzitaj esti spekulaciistoj. Oni devus supozi, ke ĉi tiuj mortpafadoj semus la teruron kaj la panikon kaj, ke interrompus tiun neoficialan merkaton. Nenio pri tio.

La pelatoj de la malsato aŭ de la mongajno revenis en sian lokon. Ili supozis, ke al ili povus okazi samkiel al la mortpafita kunulo; sed la terura, nigra, minaca malsato reĵetis ilin en la merkaton. Por vivteni sin, oni devis fari tion; kaj tio fariĝis spite de Ĉeka kaj la mortpafadoj.

* * *

Ni ankaŭ vizitis Ĉeka-on. Oni parolis al ni pri la Muzeo, kiun la fama kaj timata polico kreis, kaj ni volis vidi ĝin. Ĉar ni estis pretaj ekscii nin pri ĉio, kial ne ekscii nin pri la

grandaj agoj, kiujn oni atribuis al la fama institucio de revolucia sekureco?

Ĉar Ĉeka estis ĉi tio: la polico de la Komunista Partio kaj la orbito en kie movis sin la ekzekutistoj serve de la eksterordinara Komisiono, kiun prezidis la nuntempa Komisaro pri Internaj Aferoj, kamarado (?) Dzerĵinskij.

Por la viglado de la stratoj kaj subpremo de la krimaj, vulgaraj faktoj, estis patroloj da soldatoj. Ĉeka havis kiel komision persekuti la kontraŭrevoluciulojn, gardi la personojn de la Komisaroj kaj plenumi la mortoverdiktojn, kiujn la revolucia Tribunalo ordonis. La komisio estis tute malĝoja kaj malaminda; sed la bolŝevikoj ne sciis seniĝi je ĝi.

La admiro al Ĉeka estis tia, ke pli ol unu fojon estis ni la admirantoj de tiuj laŭdoj.

Laŭ opiniis iuj komunistoj, sen Ĉeka la revolucio estintus venkita kaj Rusujo transdonita al la nesatigebla detruemo de la kontraŭrevoluciaj malbonfarantaroj.

Kiel perdi la okazon viziti la Muzeon de tiel utila, kiel revolucia institucio?

Kiam ni alvenis en la sidejo de Ĉeka, virino, kun teniĝo de grava persono kaj certa aspekto de supereco, submetis nin al Pridemandado.

Rekonita nia personeco de delegito por la Tria Internacio, io egalvalora al la diplomatiaj Ambasadoroj en la kapitalismaj landoj, oni al ni petis pardonon kaj al ni permesis la eniron.

Al la oficiala interpretisto nin akompananta kuniĝis Ĉeka-ano, altrangulo en la Muzeo mem.

Jam en la unua etaĝo, ni penetris en la Salonon, kie troviĝis la ekspoziciaĵoj.

La Salono ne estis granda, nek la ekspoziciaĵoj multaj. Ili tamen malkaŝis la kruelecon de la lukto komencita inter la diversaj kontraŭbolŝevikaj frakcioj kaj la bolŝevikoj.

Tio unua aperanta al nia vido estis nigra flago, bruligita, ŝirita kaj borita de la kugloj. En elmontra vitroŝranko estis pecoj de revolveroj, ŝeloj de bomboj kaj blankaj armiloj bruligitaj de la fajro.

Ni demandis pri la origino de tiuj restaĵoj.

—Estas –ili al ni diris- la armiloj trovitaj apud la cindrigitaj kadavroj de la domo de la anarkiistoj, post la atenco de ili farita kontraŭ la bolŝevikoj en la strato Leontyesky.

Kiam oni sciis, kiuj estis la aŭtoroj de la bomboĵeto sur la strato Leontyesky, kiu mortigis dek kvar komunistojn kaj kaŭzis pli ol tridek vunditojn, oni sieĝis la domon, kie ili rifuĝis kaj, kiel la postulojn por ke ili kapitulacu, ili respondis ĉiam pafante kontraŭ la Ĉeka-anoj, ĉi tiuj brulegis la domon por submeti ilin per ĉi tiu procedo. La nigra flago, standardo de la grupo, kiu faris la atencon kaj, kiu flagris pro la vento sur la balkono, estas tiu, kiun vi vidas tie.

Oni montris al ni la uniforman jakon, kiun surportis la admiralo Kolĉak, kiam li estis mortpafita post lia malvenko en Siberio.

Ni vidis flagojn kaj standardojn prenitaj al la kontraŭrevoluciaj Armeoj kaj al institucioj aŭ politikaj grupoj, kiuj iafoje ribelis per armiloj kontraŭ la Registaro.

Al ni vekis la atenton serio da kontuzantaj instrumentoj de primitiva formo, inter kiuj estis ia pistolo konstruita per la restaĵoj de fusilo Mauser.

Estis krudaj bastonoj kaj aliaj longaj kun unu aŭ du subdisketoj el fero sur la malsupera ekstremaĵo laŭ formo

de pintingo. Aliaj, pli mallongaj, kiuj anstataŭ subdisketoj portis ĉenon kaj ligita al ĝi bulo el fero de sesflanka formo.

La bato per unu el ĉi tiuj bastonoj devis esti mortiga aŭ de nekalkulebla difekto.

Blankaj armiloj de ĉiu formo kaj ĉiuj grandoj kaj serio da instrumentoj, kies sola celo estis vundi aŭ kaŭzi la morton.

Al niaj demandoj, ili respondis, ke ĉiuj tiuj armiloj estis kolektitaj dum la alfrontoj okazintaj kun la taĉmentoj de ruĝaj soldatoj komisiitaj de la perfortaj konfiskoj faritaj kontraŭ la kamparanoj.

Senarmigita la popolo pro registara dispono, ĝi alfrontis la patrolojn, kiel povis, improvizante armilojn kaj defendaĵojn.

Poste oni al ni montris fotografaĵojn. Ni ĉi tie povis konstati la teruraĵojn de la bolŝevika ekonomia politiko.

Grupoj de kadavroj de ruĝaj soldatoj kriplitaj de la kamparanoj. Kelkfoje, jam ŝtonmortigitaj kaj kriplitaj, ili bruligis ilin. La venĝo kaj la malamo decidis la ekstermon.

Apud la fotografaĵoj de ĉi tiuj grupoj de ruĝaj soldatoj, oni vidis aliajn de vilaĝoj detruitaj de la soldatoj senditaj por efektivigi punrespondon post la maŝinpafado de ĉiuj iliaj loĝantoj. Viroj, virinoj, infanoj kaj maljunuloj; ĉiuj pereis. La procedo estis sen formalaĵoj kaj... praktika.

Ili venis. Grupo de maŝinpafilistoj ĉirkaŭis la vilaĝon; ekpafadis kaj daŭris ĝis la bruligo ĉion konsumis.

Ĉu verdikto? Ĉu urĝa verdikto kontraŭ la eblaj kaŭzintoj de la morto de la soldatoj? Por kio? Ili estis kontraŭrevoluciuloj. Oni devis ekstermi ĉiujn. Ĝingis-Ĥano devis rideti en sia tombo.

Noton de senutila krueleco, de rafinado fare de primitiva tataro, ni vidis, kiam oni montris al ni ganton fabrikitan per la haŭto de la mano de ruĝa soldato malliberigita de Kolchack. La barbarecon de ĉi tiu admiralo nenio malkaŝas, kiel tiu haŭto ĉifita kun la ungoj algluitaj; ĝi donis timtremojn.

Se aliaj kruelecoj kaj perfortaĵoj ne sufiĉis por malbeni la memoron de la admiralo Kolchack, la protektito de la angloj, tiel prudentaj, kaj de la usonanoj, tiel amantoj de la “Libereco”, sufiĉus por kovri lin per malhonoro kaj honto la haŭto eltirita de la mano de viva ruĝa soldato malliberigita.

Terurigitaj de ĉi tiu vidado ni forlasis la Ĉeka-an Muzeon; kaj la rememoro de tio, kion ni lasis forlasinte la Muzeon, nin persekutis dum pluraj tagoj.

La tuta teruro de la enlanda milito, kun ĝiaj kruelecoj kaj perfortaĵoj, kun ĝiaj malamoj kaj venĝoj, kun ĝia strebo triumfi unu sur aliaj, estis enfermita en tiu ejo.

Hontigita sendube de sia propra verko, la partia teruro kaŝis sin en la duonombro de la salono, kiun ni ĵus vizitis. Estis ĝia pli taŭga loko.

* * *

Oni diris, diskonigis kaj skribis verajn kruelaĵojn, agresemajn kaj insultajn kritikojn kontraŭ la rusa Ĉeka. Kontraŭ ĉi tiu institucio leviĝis la plej impeta protesto de la rusa popolo. Pri neniu el la policaj organoj de Eŭropo kaj de la tuta mondo, oni povus diri nenion similan rilate la disvolvitan terorisman sistemon.

Ĝi posedas ĉiopovajn potencojn. Super la volo de Lenino kaj de la Konsilantaro de Komisaroj de la popolo ĉiam regis la aroganta volo de Ĉeka.

Nerespondeca pri ĝiaj propraj agadoj, ĝi nur dependas de la eksterordinara Komisiono, kaj ĉi tiu estas ekster ĉiu inspektado de la komunista Partio; konfidita ĝia agado al la volo de sola viro kun plenaj povoj kaj absoluta nerespondeco, oni povas facile dedukti kion Ĉeka reprezentas en Rusujo.

Ĉeka estis konsistigita de preskaŭ ĉiuj uloj de la cara polico de sekureco; ĝi agadis pretekstante supozitajn aŭ realajn kontraŭrevoluciajn agojn; ĝiaj membroj estas malavare pagitaj, ĝuante kromsalajrojn kaj privilegiojn kelkfoje superajn al tiuj de la Registarestro. Ĉeka mem, pretekstante lian personan sekurecon, kelkfoje rifuzis al la Registarestro petojn, kiujn ĉi tiu al ĝi faris. Ĉeka povis ĉion, estis ĉio.

Kiel pruvo de la privilegioj, kiuj ĝuis ĝiajn membrojn, ni citos la jenan.

Revenante al la Hotelo, la tagon, kiam ni vizitis la merkaton de Sujarefka, ni soifis kaj ne trovis manieron satigi nin.

Piedirante, ni trovis vendejon de manĝaĵoj, kie oni vendis alkoholan trinkaĵon el fruktoj. Ni eniris, petis tiun trinkaĵon kaj oni al ni servis ĝin; ni pagis sescent rublojn kaj foriris.

Ni poste demandis la kialon pro kiu oni ne malfermis tiun vendejon. Ĝi apartenis al unu el la estroj de Ĉeka de Moskvo.

La malpermeso de ĉia komerco ne validis por tiu altranga gravulo. Tie oni aĉetis kaj vendis malgraŭ ĉiuj estintaj kaj estontaj diktatoradoj.

Ni ne volas eĥigi la multajn misuzojn, kiujn oni al ni denuncis, atribuitajn al Ĉeka. Ili solaj sufiĉus por plenigi multajn paĝojn; tutcerte ne mankos, kiu tion faros.

Sed ĝis tio okazos, ni asertu, ke la misuzoj, kiujn oni al ĝi atribuas, estis rekonitaj eĉ de la bolŝevikoj mem.

Konata estas la inklino, kiun ĉi tiuj havas por la statistikoj kaj grafikaĵoj divastigantaj ilian verkon.

Ĉeka, por ne esti malpli ol la aliaj institucioj, ankaŭ havas sian statistikan libron kaj siajn grafikaĵojn. Kiuj kaj kiom estos la hororoj, kiujn ĝi rakontas, ke monaton post ĝia eldono, la Konsilantaro de Komisaroj de la Popolo ordonis ĝin retiri de la cirkulado, minacante per severaj punoj tiujn, kiuj havis ekzempleron kaj ne ĝin redonis.

Ĉi tiu fakto diras pli kontraŭ Ĉeka ol ajna alia argumento.

18a. Vizito al Kropotkin

La penso de Kropotkin pri la rusa revolucio estis nekonata en Eŭropo tiame.

La silenton, kiun la majstro subtenis, oni diversmaniere klarigis. Por unuj, tio estis signo de konformeco kaj alligiteco al la bolŝevika reĝimo; por aliaj, lia sinteno antaŭ la okazaĵoj okazintaj en Rusujo, estis la sola trafa kaj logika.

Ĉu ne estis nature, ke ni klopodos, ĉar la okazo nin favoris, koni lian penson?

Krom ĉi tiu cirkonstanco, tre tenta kompreneble, restis la intima, persona kaj privata kontentigo koni lin, trakti lin, paroli kun li iom da tempo. Ni estis aŭskultonta la parolon de unu el la plej fortaj kaj respektindaj mensoj el Eŭropo kaj la mondo.

Faciligis nian deziron la amiko kaj kamarado Souchy, delegito de la germanaj sindikatistoj, kiu estis tie pro vojaĝo de studo kaj informado. Li estis, kiu al ni prezentis Sacha-on Kropotkin, la filino de Petro, kiu loĝis en la strato Leontyesky.

Konsente kun Souchy kaj Sacha, ni vizitis ĉi tiun lastan kaj interkonsentis vidi Kropotkin-on en Dimitrov.

Ni ne bone rememoras se estis dimanĉo fine de julio aŭ komence de aŭgusto kiam ni frue matene deiris.

La stacidomo estis for; ni portis iujn pakaĵojn de provizoj, kiujn la kamaradoj de la anarkiisma Klubo al ni donis por Kropotkin kaj ni havis malmultan tempon. Ni do serĉis veturilon kaj kontraŭ kvin mil rubloj oni nin veturigis al la stacidomo.

Tie ni devis vicatendi por aĉeti bileton. Kelkaj personoj, kiuj okupis la unuajn lokojn, atendis vicon de la antaŭa tago. Ili pasigis la nokton en la stacidomo. Se ni enviciĝas estis pli ol probable, ke ni ne elirus ĝis posttagmeze.

Sacha tiam al ni diris, ke ni uzu nian rangon de delegitoj kun la eksterordinara Komisiono de la stacidomo, per kio ni atingos deiri per tiu trajno.

Ĉiam nin abomenis tiuj preferoj kaj ni nur uzis ilin en vere esceptaj okazoj.

Ni do intervidiĝis kun la prezidanto de la Komisiono. Ĉion ĉi ni povintus eviti petante en la Hotelo vojaĝpermisilon al Dimitrov, sed ni volis ignori la oficialan permeson por agi per pli da libero. La afero, kiel oni povas konstati, ne iris glate, kvankam fine la rezulto estis la sama.

Prezentita al la prezidanto de la eksterordinara Komisiono nia legitimilo kiel delegito, oni tuj al ni transdonis la biletojn. Krome oni nin komforte lokis en la vagono de la eksterordinara Komisiono.

Jam veturanta la trajno, ni komencis konversacion kun iuj el la vojaĝantoj, uzante Sacha-on, kiel interpretistinon.

Nia ĉefa interparolanto estis soldato, kiu al ni entuziasme parolis pri la preskaŭ mesia komisio, kiun devis realigi la ruĝa Armeo. Laŭ li, oni kompletigus la kadrulojn de la Armeo kiel eble plej forte; oni havigus al ili la plej bonan kaj perfektigitan armilaron, kaj tiel ekipita, kun insigno la ruĝa stelo kaj moto “morto al la burĝaro” la Ruĝa Armeo helpus starigi la komunismon en la tuta mondo. Estis la demonhavanto, la mistikulo, la fanatiko de ideo, kiun li ne konas nek komprenas, sed ke estas influita de fremdaj, pure subjektivaj rezonadoj kaj sen valoro.

Kaŭzis malĝojon tiu dialektiko de bulteno de la ruĝa Armeo, kiu tiel influis kaj deturnis virgajn mensojn kaj sen ia idearo.

Liaj profetaĵoj, liaj asertoj pri la baldaŭa neeltenebla marŝo de la ruĝa Armeo tra la mondo, salutata kaj akceptata de la aplaŭdoj kaj aklamoj de la konkeritaj popoloj, kaj la apoteozo per kiuj la popoloj ĝin akceptos, pli ŝajnis tiuj de la Apokalipso ol rezonadoj de persono kun minimumo de komuna senco.

La konversacio baldaŭ perdis viglon. Ni ne volis sekvi la komunistan ĵusvarbiton dum lia triumfa marŝo tra la mondo kaj malpli vojaĝante per trajno, kiu apenaŭ veturis je dudek kilometroj hore.

Observante la aliajn vojaĝantojn, ni atente rigardis soldaton, kiu portis sur la kolo pendjuvelon de virino. La ĉeneto, kiu ĝin subtenis estis el oro kaj la pendjuvelon el perloj, kun diamanto en la centro. Tiu juvelo nedubeble estis produkto de la disrabado.

La soldato estis filo de humilaj vilaĝanoj, apud Dimitrov, kien li iris pasigi iom da tempo.

La senĝeno mem, per kiu li ĝin surportis, pruvis, ke li konis ne la uzon nek la valoron de la ornamo.

La sesdek verstoj, kiuj distancas de Moskvo al Dimitrov, ŝajnis fantazie obliĝi, ĉar ni jam veturis dum pli ol tri horoj per trajno kaj ankoraŭ ne proksimiĝis la momento eltrajniĝi.

La cirkulado de vojaĝantoj de vagono al alia estis kontinua. Ĉiuj vane serĉis pli bonan sidlokon.

Kiel Dimitrov estis fina stacidomo de la trajno, kiu nin veturigis, la multnombraj vojaĝantoj etendiĝis rapide sur la kajoj apenaŭ ĝi haltis.

Ĉiam gviditaj de Sacha, ni piediris sur vojo aŭ strato kondukanta al la centro de la vilaĝo; sed antaŭ ol alveni al ĝi, lasante ĝin maldekstre, ni rekte daŭrigis la iradon kaj piediris sur deklivo.

Ni piediris ĉirkaŭ kvardek paŝoj, kiam turnis maldekstren kaj eniris en straton, kiu etendiĝis inter ĝardenoj, en la centro de kiuj staris somerdomoj laŭ stilo de tiuj ekzistantaj en kelkaj svisaj kantonoj.

Mezstrate Sacha iris al pordo dirante: “Ni jam alvenis. Kiel paĉjo ne scias, kiun tagon ni venos vidi lin, li ne eliris akcepti nin. Sed ne gravas. Ni kaptos lin surprize kaj li estos pli ĝoja.” Tiel estis.

Ni antaŭeniris tra vasta ĝardeno, ĉio forlasita, al palaceto, kiun ni vidis en la centro kaj, kiam ni jam estis proksimaj, la patrino de Sacha nin akceptis.

Patrino kaj filino kare brakumis sin.

Post la deviga prezento, la nedisigebla parulino de Kropotkin, kiu iĝis hortikulturulino por kontribui al la vivbezonoj, forte premis nian manon, montrante ŝian intensan kontentigon pro la vizito.

Dum la parulino de Petro kaj mi interŝanĝis kelkajn vortojn, Sacha eniris en la domon por saluti sian patron kaj anonci al li nian alvenon.

Baldaŭ aperis, enkadrigita de la kadro de la pordo, la grandioza figuro de la majstro. Li estis iom maldikiĝinta kaj reflektiĝis sur lia vizaĝo tiu ironia grimaco, kiun stampas la moralaj suferoj.

Pro la apero de tiu figuro de universala renomo, al kiu donis aspekton de apostolo la blanka barbo kovranta lian vizaĝon, ni sentis profundan emocion.

Dum la parulino de Kropotkin al ni metis seĝojn en ampleksa belvidejo servanta kiel aliro al la loĝejo, Petro al ni alproksimiĝis kaj intime brakumis. La emocio nin regis.

Ni estis antaŭ unu el la plej fortaj mensoj de la eŭropa penso kaj la ĝusta kono de nia sensignifeco nin impresis, kiel infanojn.

Kropotkin, kiu sufiĉe bone konis la hispanan anarkiistan kaj sindikatan movadon petis, ke ni pligrandigu ĝiajn lastajn novaĵojn. Ni longe parolis, detale klarigante al li la intensecon de la anarkiisma movado dum la lastaj kvin jaroj, sed evitis ĉiun aludon koncerne al lia sinteno pri la milito.

Sacha ege petis al ni tion. La koraj atakoj al kiuj li estis inklina okazis tuj kiam li ekscitis sin dum diskutado. Kaj kiel la diskuto pri lia sinteno dum la milito kaŭzus ekscitan disputadon, tio plej bona estis eviti ĝin. Kaj kvankam Petro sugestis la aferon, ni klopodis deturni ĝin dirante, ke ni adoptis kontraŭan pozicion, ĉar ni opiniis, ke ĝi pli akordis kun nia anarkiisma kriterio.

Ni pasigis la tutan tagon en akompano de tiu familio, kiu nur ĝentilaĵojn kaj servojn havis por ni. Ni revenis Moskvon posttagmeze.

Dufoje ni vidis Kropotkin-on; en Dimitrov, kien ni iris viziti lin, kaj la alia en Moskvo, en domo de Sacha.

Li venis al Moskvo, malgraŭ la malfacilaĵoj kaj ĝenadoj de la vojaĝo, por viziti Leninon kaj paroli kun li. Sed Lenino ne volis lin akcepti. Per preteksto de urĝaj okupoj, li ne volis perdi minutojn lin aŭskultante. Veras ke, li sendis sian propran sekretarion por ke li informiĝu pri tio, kion Petro volis, sed estis malrespekto de arogantulo ne akcepti tiun viron, kiu estis petonta la neplenumon de terura krimo. Ni diru, ke ĝi ne plenumiĝis danke al la interveno de Kropotkin.

Temis pri la mortpuno, kiun la sovetia tribunalo volis apliki al dek kooperativanoj denuncitaj de agento de Ĉeka, kiel kontraŭrevoluciaj konspirantoj.

La fantazio de tiu agento imagis teruran komploton, kie nur estis la surda protesto de malkontentuloj.

Per kio Kropotkin mem al ni diris, ni povis scii, ke la akuzitoj, por kiuj oni petis mortpunon, iam estis en sia societejo amike parolante. Post longa babilado, la konversacio venis al la politika tereno kaj iu kuraĝis eldiri la ideon, kiun la aliaj konfirmis, ke estos bezona konspiro de ĉiuj malkontentuloj kontraŭ la bolŝevika reĝimo por detrui ĝin.

Ĉi tiujn vortojn eksciis la Ĉeka-ano, kiu ilin komunikis al la eksterordinara Komisiono, kiu ordonis la areston kaj enprizonigo de la dek individuoj.

Ĉar Petro konis, kiel okazis la aferon, sciante, ke ili estis juĝotaj kaj, ke la sovetia akuzisto petis mortpunon, li volis paroli kun Lenino por diri al li, ke “la mortpafado de tiuj dek viroj estus la plej granda honto, la plej nigra makulo kiun la bolŝevismo ĵetus sur sin”.

Kaj li atingis sian klopodon. Li liberigis ilin el la morto; kvankam ne de la dek jaroj de malliberejo al kiuj ĉiu el ili estis kondamnitaj.

Pri kio ni parolis dum niaj konversacioj kun Kropotkin, mi preterlasas ĉion en konsidero al la kvalito de ĉi tiuj paĝoj, tamen volas rimarkigi, ke ĝi estis tre interesa.

La koncepto, kiun Kropotkin havis pri la revolucio estis tre riĉa en nuancoj kaj en instruadoj por ĉiuj, kvankam pli aparte por ni la anarkiistoj.

La komplekseco de la rusa revolucia movado trovis en lia elstara menso la plej sinceran kaj verdiran interpretiston.

Kia bedaŭro, ke Kropotkin ne vivis jarojn pliajn, por ke lia penso estu konkretigita en iuj paĝoj!

Pri la bolŝevikoj li ne diris multe. Li konsideris ilin, kiel absolutaj babeuf-istoj[9]. Por li, Lenino kaj ties teorioj, samkiel la komunismo de Karolo Markso kaj de ĉiuj marksistoj, ne estis alia aĵo ol la teorioj de Babeuf iom kovritaj per iuj nuntempaj idiomaĵoj.

Foje li nin demandis ĉu post la reveno al Hispanujo ni skribus ion pri Rusujo.

—Se vi skribus libron parolante pri Rusujo, titolu ĝin “Comment on fait pas une revolution” (france, “Kiel ne endas fari revolucion”). Ĉar la tuta kritiko, kiun oni faras pri la bolŝevikoj kaj ilia maniero kompreni la revolucion, devas ĝuste celi pruvi, kiel ne eblas fari revolucion adoptante iliajn sistemojn kaj premisojn.

Ĉar ni estis avidaj pro la deziro koni tiujn, kiuj estis la tiamaj aferoj de lia prefero, li diris al ni respondante niajn demandojn:

—Timante, ke la bolŝevikoj senutiligos kion mi povus skribi pri la revolucio, mi nenion skribas pri ĝi; mi nur prenas notojn. Ni ankaŭ estas tro proksime de la okazaĵoj kaj de ties homoj por ke la pensulo ne estu tro influata de la unuj kaj la aliaj. Ĉi tiu estas la ĉefa kialo de mia sindeteno.

Sed por ne perdi la tempon, mi skribas pri etiko, ĉar la legado de paĝo de Bakunin al mi sugestis la ideon fari ĝin, kaj mi al tio dediĉas miajn horojn kaj miajn tagojn; sed la laboro al mi estas peniga.

La manko de rilatoj kun la ekstera intelekta mondo kaj la malfacilaĵoj, kiujn la starigita reĝimo kaj mia sano

9 NeT. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Fran%C3%A7ois-No%C3%ABl_Babeuf.

amasigas, faras, ke mi ne povas progresi kun la laŭcela rapideco kaj, ke nur post nekredeblaj penadoj mi povas atingi kion mi al mi proponas.

Ni lin demandis pri lia ekonomia situacio, kiu ne estis tre monhava. Li vivtenis pli ol de la porciumo, kiun al li atribuis la Komisararo pri Provizadoj (porciumo de saĝulo), de tio sendita de la kamaradoj de ĉiuj anguloj de Rusujo.

—Mi vivas malbone —li al ni diris— sed ankoraŭ povas konsideri min bonŝanca. Milionoj da rusoj vivas multe pli malbone ol mi.

—Ĉu vi ne dezirus reveni en Anglujon aŭ ajnan alian landon?

—Arde —li respondis.

—Kial vi ne petas tion al la Konsilantaro de Komisaroj de la Popolo?

—Ĉar mi ne volas ricevi negativan respondon de Ĉeka, kiu estas la mastro kaj sinjoro de la agoj de ĉiuj rusoj, de tiu hontaĵo, kiu malhonoros la bolŝevikan reĝimon.

Nur la personoj plaĉaj al Ĉeka, kvankam estus malŝatindaj banditoj dum la cara reĝimo, povas akiri la permeson por eliri eksterlanden.

Mi preferas morti en Rusujo, konsumi min en ĉi tiu agadmanko, elporti la malsaton kaj la malvarmon antaŭ ol submeti min al la ordonoj de tiu institucio.

* * *

Ni devis foriri.

La samovaro, kiu kun ĝia dikventra formo staris sur la tablo ĵetante al la plafono la vaporojn de la bolanta akvo, projekciis malgrandan ombron inter la du.

La tago iris al sia fino. La krepusko metis noton de malĝojo en liaj vortoj. Ĉu li aŭguris sian proksiman finon?

La pasinta vintro estis tre kruela por Kropotkin. Sen brulligno, preskaŭ sen lumo kaj nutraĵoj, la mankoj malfortigis lian organismon ankaŭ forkonsumitan de la jaroj. Tiu alproksimiĝonta estos ankoraŭ pli kruela.

La ekonomia situacio de Rusujo ĉiutage fariĝis pli grava kaj malfacila. Bone tion rimarkis Kropotkin!

La malavareco de la kolegoj, la solidareco kaj apogo, kiujn ĉi tiuj lin donis sendante al li kion ili povis, estis la barometro, kiu montris konsiderindan malaltigon.

La sendoj interspaciĝis, fariĝis pli intermitaj. Kelkfoje, letero de preteksto ilin akompanis. “Ni volintus sendi vin antaŭe ĉi tiujn malgrandajn donacojn —ili al li diris—, sed ni ne povis. Se vi scius Petro la malfacilaĵojn, kiujn ni havas por provizi nin en ĉi tiu malgranda angulo!...”

Per ĉi tiuj vortoj senkulpigis sin tiuj malavaraj kolegoj, perditaj en iu vilaĝo de la rusa vasteco, ne povi helpi lin pli efike, kaj ili montris la mankojn al kiuj ili submetiĝis por plenumi simplan devon de solidareco.

Adiaŭante la Majstron, ni forte prenis lian manon; brakumis nin kaj ricevis lian fratan kison.

—Salutu en mia nomo —li al ni diris— ĉiujn anarkiistojn de Hispanujo, pri kiuj mi konservas elkorajn rememorojn. Rigardu —li aldonis montrante belegan horloĝon el oro—. Mi ne scias ĉu vi rememoras...

—Jes, jes ni rememoras —ni interrompis lin.

—Diru al ili, ke mi ankoraŭ ĝin konservas. Ke mi neniam forgesos ĉi tiun belegan agon de la hispanaj anarkiistoj pro la iniciato de la kamaradoj de Korunjo.

La enskribo, kiun ĝi portas en la interno de ĝia kovrilo: (“Pro iniciato de la anarkiistoj de Korunjo al Petro Kropotkin pro lia arĝenta geedziĝo”), ĉiam por mi estos plaĉa memoraĵo de la hispanaj kamaradoj.

19a. Interparolo kun Lenino

La dua Kongreso de la Tria Internacio estis finiĝanta. La ideologia pozicio de la diversaj ĉeestantaj delegitoj iom klariĝis.

Estis opinioj malflekseblaj; aliaj, male, iom post iom estis cedintaj.

Sed —kurioza fenomeno—, kiam la Kongreso finiĝis, deĉeniĝis la aktiveco de la plimulto de la delegitoj.

Estis iuj, inter ili Bombacci, membro de la itala delegitaro, kiu dum la Kongreso ĉeestis en unu kunsido kaj malĉeestis en tri, kaj tiam, jam finita, oni vidis lin iri kaj veni, senlaca, okupata, malkvieta. Li ne ĉesis viziti la Komitaton de la Internacio kaj fari sekretajn kunvenojn kun ĝi.

Male al Serrati. Ĝis farita proksimume la duono de la taskoj de la Kongreso, Serrati estis nepra viro, la deviga oratoro en ĉiuj politikaj amaskunvenoj de certa graveco, la viro, kiun oni konsultis por ĉio, pri ĉio kaj en ĉio.

Kio okazis?

La faktoj ĝin poste montris kaj ne estas ĉi tie, kie ni devas skribi ĝin. Io simila okazis kun aliaj delegitaroj.

Sed nia mirigo ne havis limojn vidante, kiel antaŭe necedemaj delegitoj mienis kontentige kaj konsilis kompromison kaj akordon.

La petoj al la delegitoj por ke ili vizitu la Komitaton senĉese fariĝis. Ni devas averti, ke al ni kaj al iu alia delegito, oni faris neniun peton. Kaj la delegitoj iris. Ni ne scias pri kio temis; sed la mallojalaj disigoj en la kampo de

la necedemuloj rimarkis sin en ĉiu sinsekva kunsido. En la antaŭlasta ĉeestis Lenino.

Ĉar la diskutotaj aferoj malhavis intereson kaj, krome, jam ĉio aranĝiĝis inter kulisoj kaj ni deziris niaflanke reveni Hispanujon kiel eble plej baldaŭ, ni utiligis tiun okazon por saluti Leninon kaj adiaŭi nin de li.

Dum oni tradukis lian paroladon al la angla, kiel ni lin vidis preta foriri, ni iris al li kaj atingis lin, kiam li estis ĉe la pordo de la bufedejo.

—Kiam vi pensas foriri?—Li diris al ni.

—Kiel eble plej baldaŭ. Nur al ni restas realigi iujn informojn; finitaj, ni foriros.

—Restu iom da plia tempo.

—Ne —ni al li diris—. Ni ne povus multe pli ampleksigi la informojn, kiujn ni havas, ĉar ni bezonus multon da tempo. Nia restado tie iujn semajnojn pliajn havus jam neniun intereson. Kaj, male, la kolegoj de Hispanujo al ni povus riproĉi la malfruon.

—Ĉar ankoraŭ vi estos kelkajn tagojn en Moskvo —li diris— ĉu ne plaĉus al vi, ke ni solaj parolos momenton?

—Kun granda plezuro. Ni tiusence faris neniun sugeston pro timo esti ĝenaj.

—Neniel —respondis Lenino—. Sed kiel mi havas multajn okupojn kaj povus esti, ke mi forgesis avizi vin, ĉu vi volos memorigi ĝin al mi la proksiman mardon per telefono? La mardon mi al vi povos diri la tagon kaj horon por paroli.

Sekvatage, vendredon, okazis la lasta oficiala kunsido de la Kongreso kaj oni akordigis en ĝi, ke oni okazigos je la proksima dimanĉo la ferman kunsidon, kaj kiel horo por

okazigi ĝin tiun de la tria posttagmeze, en la granda teatro de la Opero de Moskvo.

Sabaton kaj dimanĉon ni pasigis ordigante niajn notojn. Ni decidis ankaŭ la ordon de la esplorlaboroj, kiujn ni pensis realigi.

La matenon de la lundo ni destinis por ordigi la notojn de la lastaj kunsidoj de la Kongreso kaj restis en la hotelo ne elirante el ĝi.

Ĉirkaŭ la dekunua matene, la majoro urĝe nin vokis al sia oficejo.

Pere de la interpretisto li nin sciigis, ke Lenino demandis pri ni kaj ordonis, ke oni pretu aŭton al nia dispono.

Ĉi tiu baldaŭ venis. Apenaŭ ni finkolektis la kajerojn kaj la paperfoliojn disĵetitajn sur la labortablo, la interpretisto avizis nin, ke la aŭto atendis. Akompanata de militista majoro ni tuj deiris. Ni eniris en la Kremlon per la pordo tra kiu kutime eniris la delegitoj.

Ni elaŭtiĝis kaj la kaporalo komandanta la gardopatrolon al ni petis la nomon, kaj post la komparo kun kiu aperis en la ordono portita de mia akompananto, parolis kun ĉi tiu en la rusa kaj al ni permesis la aliron.

Ni alvenis sur la unua etaĝo, kie alia paro da soldatoj ripetis la komparon.

Ni plu supreniris.

Sur la ŝtuparhaltejo, kiu aliris al la dua etaĝo, la kaporalo komandanta la patrolon, konsistigita de kvar soldatoj, rekontrolis nian identecon. Sed, ĉu la prononco de mia nomo ne lin kontentigus, aŭ tiu estus la ordono, la vero estas, ke li uzis telefonan aparaton por konsulti.

Kiam li ricevis la respondon, lasis nin pluiri tra la koridoro direkte al la oficejo de Lenino. Sed antaŭ ol alveni, ĉe la enirejo estis tablo kun registra libro.

Mia akompananto iris al la majoro, al li transdonis la ordonon, kiun li portis kaj foriris. Lia komisio finiĝis.

La majoro al ni redemandis la nomon kaj ĝin komparis kun tiu de la ordono kaj notis ĝin en la libro, kiu li havis antaŭ si.

Finfine!, finita la skribado, li leviĝis, akompanis nin ĝis la pordo, malfermis kaj invitis nin eniri en la oficejon, kie, en la plej granda silento kaj aktiveco, laboris ses tajpistinoj.

Post malmulta tempo en la antaŭĉambro, oni nin kondukis al la laborkabineto de Lenino.

La ĉambro de Lenino estis meblita sobrece. Ĉio superflua estis formetita.

Grandioza mapo de Rusujo; iu pli malgranda de aliaj landoj: labortablo plenplena de dokumentoj kaj paperoj; kelkaj seĝoj kaj iaj brakseĝoj. Ĉi tiu estis la tuta meblaro.

Aperis Lenino.

Ridetanta li al ni etendis la manon, kiun ni premis per vera fervoro kaj ni sidiĝis unu fronte al alia. Li estis ĝoja, gaja, kontenta.

—Ĉu vi estas kontenta pri la traktado, kiun al vi donis la komunistoj?—Li demandis.

—Multe—ni respondas—. Vi ĉiumomente havis ĝentilaĵojn kaj respektojn, kiujn ni sciis estimi laŭ ilia valoro. Se tiel ne estus, se nia diskretemo estus transpasinta iumomente la limon de tio deca, ni petegus al vi, ke vi nin pardonu.

—Nenio pri tio. De la unua momento, ni ricevis la plej bonajn impresojn. Ne gravas, ke vi ne partoprenas en nian penson, nek ke vi ne estas unu el la niaj. Ni scias, ke via malakordo de kriterio ĉiumomente tenis vin malproksime de kondutoj nekonvenaj al la postulita seriozeco.

Farante mallongan transiron, li poste aldonis:

—Ni parolu pri tio interesa. Ĉu vi al mi povus pligrandigi iujn detalojn pri la informo, kiun vi prezentis al la Tria Internacio, pri la situacio de la diversaj politikaj kaj socialaj fortoj de Hispanujo?

Mi al li donis la petitajn detalojn kaj li plu parolis:

—T. e., ke vi daŭre malakceptas la diktatoradon de la proletaro, la centralizadon kaj la neceson fondi en Hispanujo la Komunistan Partion por fari la revolucion.

—Ni restas firmaj en nia kriterio, niaj asertoj kaj principoj.

—Ĉu vin ne konvinkis la verko de Rusujo?

—La vidaĵoj en Rusujo, la observaĵoj en Rusujo kaj la konkludoj, kiujn ni eltiras el la tuto refirmigas nian kriterion.

Ni ne devas kaŝi al vi, ke kiam nin vojaĝis de Parizo ĉi tien, dubo daŭre nin atakis. Antaŭ la nekonataĵo, sugestita kaj hezita, ni multfoje al ni faris ĉi tiun demandon: “Ĉu estos eraraj ni, la anarkiistoj, pri la fundamentaj aspektoj de nia doktrino?“ Kaj mi ne devas kaŝi al vi la timon per kiu ni vidis alproksimiĝi la momento, kiam ni eble devis subskribi la neadon de tiuj ideoj defenditaj de ni per tiom da ardo kaj, kiuj konsistigis la malgrandan intelektan pakaĵon de nia vivo. Oni ne rezignas sin sen doloro, kiam oni honeste pensas la ideojn, kiuj al ni estis karaj. Estas paĝo, kiun ni devas elŝiri el la historio de nia vivo. Kaj tiuj amputadoj estas ĉiam

doloraj. Sed la vidaĵoj kaj observaĵoj en Rusujo konfirmis kaj fortikigis niaj konvinkojn.

—Tiam, ĉu vi daŭre kredas, ke ne estas bezona la diktatorado de la proletaro? Kiel vi pensas, ke oni povas detrui la burĝaron? Vi ne kredus, ke oni povas fari tion sen revolucio!

—Neniel. La burĝaro ne lasos sin pace eksproprigi. Ĝi kontraŭstaros la atakojn de la popolo, kiu tion klopodis, per la plej kruelega rezisto kaj revolucio fariĝas neevitebla. Ĝi estos pli aŭ malpli perforta; ĉi tio dependos de la rezisto, kiun la burĝaro kontraŭstaros; sed neeviteblas la sanga revolucio.

Nu, la diferenco inter la bolŝevika penso kaj la nia aperas de ĉi tiu momento.

La revolucio estas ago de forto. Ĉi tio estas nediskutebla. Sed la revolucio ne estas la diktatorado de la proletaro.

Diktatorado estas trudo de registaro, de aŭtoritato, de unuj, malmultaj aŭ multaj, kiuj disponas de ĉio laŭ sia arbitro kolektive aŭ en propra nomo, fronte al aliaj, kiuj devas obei ne kontestante, sub la puno de sankcioj kaj perfortoj, plenumataj de personoj rajtigataj por tio per komando, per nediskutebla aŭtoritato.

Revolucio ne estas tio. La revolucio estas la popolo armata, kiu laca elteni maljustaĵojn, esti senigita je siaj rajtoj, de ekspluatado, kiu al ĝi neas la rajton pri la vivo, protestas kontraŭ ili; ĝi prenas la armilojn, eliras surstraten kaj altrudas per la forto de la nombro la socian organizon, kiun ĝi opinias pli justa. En ĉi tio estas perforto; veras; sed ne estas diktatorado.

Kompreneble per arbitra kaj insida dedukto oni povus, per certa subtileco de talento, eĉ kunigi ĉi tiujn du

ekstremojn: revolucio kaj diktatorado. Sed la vero kaj la realo, kiuj kaŝas sin malantaŭ la valoro kaj enhavo de ĉiu el tiuj du konceptoj, tuj pruvus al ni la artefaritecon de tia rezonado kaj la malfortecon de la argumento.

Por pli bone konkretigi nian penson, t. e., por esti pli precizaj, ni povas tiel sintezi: la Revolucio estas kaŭzo; la diktatorado povas esti la efekto de ĉi tiu kaŭzo. Konfuzi unu kun la alia ne ŝajnas al mi facilan aĵon, kiam oni ne submetas sin al la antaŭpenso de instrukcia altrudo.

—Sed, la revolucio, ĉu ne estas trudo? Ĉu oni ne devigas la burĝaron, ke ĝi forlasu siajn privilegiojn de klaso?

—Veras, ke la revolucio estas trudo; sed la revolucia ago de la popolo ne estas diktatorado. Kaj se oni volas subtiligi la esencan valoron de ĉiu vorto kaj koncepto por atingi konkludojn favorajn al ajna tezo, mi diros al vi, ke oni ne ĝin “devigas al la forlaso de ĝiaj privilegioj”, sed ke oni ĝin “senposedigas”, kio ne estas la samo.

Kiam oni “devigas", estas, ke estis antaŭa interkonsento, ke ekzistas mandato, per kiu oni ordonas kaj, kiam oni ordonas, diktas; dum kiam la popolo “senposedigas”, ekzistas nek mandato, nek ordono, nek antaŭa interkonsento. Ĉi tio lasta havas puran revolucian valoron. Ĉio cetera, ne.

Sed mi opinias, ke estas vane subtili pri konceptoj.

Do parolante pri ĝeneralaj konceptoj, nun pli ol neniam, ni opiniis, ke la diktatorado de la proletaro, la organizo aŭ starigo de Registaro de klaso —atako al la Povo, por dikti leĝojn al tiuj, kiuj ilin diktis hieraŭ—, ne nepras en revolucio de sociala karaktero, kiel tiu, kiun petas la tempoj, en kiuj ni vivas. Sufiĉas senposedigi la burĝaron kaj armi la popolon, por ke oni atingos tiun celon.

Koncerne la defendon de la Revolucio kaj ties konkeroj, la faktoj mem okazintaj en Rusujo pruvas, kiel la popolo scias defendi sin eĉ oferante sian propran vivon.

La submetigo de la popolo postvivas pro la ekonomia superforto de la burĝaro. Forprenu al ĝi la rimedon efektivigi tiun superforton kaj la submetigo estos fininta. Transdonu al la Sindikatoj la organizon de la laboro kaj la disdonon de la produktado kaj vi vidos, kiel la burĝaro ne relevos la kapon. Tia estas nia persona kriterio naskiĝinta de la ĉi-tieaj observaĵoj, en Moskvo, en Rusujo.

—Mi konstatas, ke ne estas maniero konvinki vin. Tiam, ĉu ankaŭ ne akceptas la centralizadon kaj la disciplinon?

—La rezultoj de via centralizado bone klare proklamas ĝian fiaskon en la politika kaj ekonomia ordo. El la informoj kolektitaj en la diversaj Komisararoj, la konkludoj, kiujn ni eltiras el la politika kaj administra centralizado, estas tute kontraŭaj al tiuj, kiujn eltiras via partio. La bolŝevikismo asertas —tiel ni deduktas el la paroladoj eldiritaj en la Kongreso—-, ke la politikaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj, kiuj en Rusujo okazas, estas kaŭzataj de manko de centralizado kaj disciplino, kaj ili petas pli disciplinon kaj pli centralizadon.

Ni opinias la malon.

Ju pli centralizadon kaj disciplinon oni postulas, des pli grandaj estos la malfacilaĵoj kaj des pli malfacilaj venki.

—Eraro; vi estas en eraro, Pestaña.

—Eblas, kvankam ni ne ĝin opinias. Nur la tempo povos tute pruvi ĝin. Veras, ke en momentoj, kiel en kiuj ni vivas, estas dolora ĉi tiu konkludo! Sed ne estas alia. Tamen kaj ne perdante pli da tempo ol tio nepra pri ĉi tiuj teoriaj

aferoj, ni devas pensi, ke vivas por renversi la kapitalisman reĝimon, kaj ĉi tion oni nur atingos farante la revolucion.

—Tio estas fundamenta. Kaj kvankam en ĉiuj landoj tio ne havas la samajn nuancojn kaj oni devas eviti aŭ korekti la erarojn en kiujn ni falis, tio esenca nun estas fari la revolucion en la aliaj landoj. Emancipi la proletaron de la burĝa diktatorado.

Kaj rilate tion: kiun koncepton, kiel revoluciuloj, meritas al vi la delegitoj ĉeestintaj en la Kongreso?

—Ĉu vi volas, ke mi estu sincera?

—Pro tio mi al vi demandas ĝin.

—Nu, kvankam scii ĝin al vi kaŭzos iun elrevigon, aŭ vi pensos, ke mi ne scias koni la valoron de la homoj, la koncepto, kiun mi havas pri la plimulto de la delegitoj ĉeestintaj al la Kongreso, estas abomeninda.

Ekster malmultaj esceptoj, ĉiuj havas burĝan pensmanieron. Unuj, ĉar estas karieristoj kaj aliaj, ĉar tiaj estas ilia temperamento kaj eduko.

—Kaj sur kio vi baziĝas por esprimi tiel malfavoran juĝon? Ne estos pro tio, kion ili diris en la Kongreso!

—Nur pro tio, ne; sed mi baziĝas sur la kontraŭdiro inter la paroladoj, kiujn ili eldiris en la Kongreso kaj la ordinara vivo, kiun ili faris en la hotelo. La ĉiutagaj malgrandaj agoj instruas koni la homojn pli bone ol ĉiuj iliaj vortoj kaj paroladoj. Estas pro tio, kion oni faras kaj ne pro tio, kion oni diras, pro kio oni povas koni ĉiun.

Multaj sableroj amasigitaj faras la amason. Ne la amaso la sablerojn. La senfina serio de malgrandaj aĵoj, kiujn oni devas realigi tagon post tago, pruvas pli bone ol neniu alia rimedo la veran fundon de ĉiu el ni.

Kiel vi volas, Lenino, ke ni kredu je la revoluciaj, altruismaj kaj emancipaj sentoj de multaj el tiuj delegitoj, kiuj en la vivo de ĉiutaga rilato, agadas nek pli nek malpli, kiel la plej perfekta burĝo?

Ili murmuras kaj malbenas, ke la manĝo estas malmulta kaj mezkvalita, forgesante, ke ni, la eksterlandaj delegitoj, estas la privilegiitoj en la nutrado, forgesante tion pli esencan: ke milionoj da viroj, virinoj, infanoj kaj maljunuloj malhavas, ne jam tion superfluan, sed tion minimume nemalhaveblan.

Kiel oni devas kredi je la altruismo de tiuj delegitoj, kiuj kunportas en la hotelon malfeliĉajn malsatajn knabinojn por ke ĉi tiuj enlitiĝu kun ili kontraŭ manĝaĵo, aŭ ili faras donacojn al la virinoj, kiuj nin servas, por seksperforti ilin?

Per kiu rajto parolas pri frateco tiuj delegitoj, kiuj ofendas, insultas kaj malrespektas la servistaron en la hotelo, ĉar ili ne estas ĉiam tute pretaj por kontentigi iliajn plej bagatelajn kapricojn? Virojn kaj virinojn el la popolo ili konsideras, kiel servantojn, servistojn, lakeojn, forgesante, ke eble iu el ili batalis kaj endanĝerigis sian vivon defende de la revolucio. Por kio, tio al ili utilis?

Ĉiunokte, kvazaŭ ili vojaĝus tra kapitalismaj landoj, metas siajn ŝuojn ĉe la pordo de la ĉambro por ke la “kamarado” servanto de la hotelo ilin purigu kaj ciru. Oni povas krevi de ridado pro la “revolucia” pensmaniero de tiuj delegitoj!

Kaj la teniĝo kaj aroganteco kaj malestimo per kiuj ili traktas tiun, kiu ne estas iom influa en la kerno de la Registaro aŭ en la Komitato de la Tria Internacio, indignas, senesperigas. Tio pensigas pri kiel agadus tiuj individuoj se morgaŭ oni faros la revolucion en iliaj landoj de origino kaj ili estos la komisiitoj estri nin de la Povo.

Malmute gravas la paroladoj, kiujn ili faras en la Kongreso! Ke ili parolas pri frateco, kolegeco, kamaradeco por ke ili poste agadu kiel mastroj, estas simple ridinda, kiam ne senhonora kaj abomeninda.

Kaj laste tiuj profitaj fiartifikoj, kiujn vidas ni, kiuj estas naŭzitaj pro tiom da mallojalaj disigoj; tiuj senfinaj iroj kaj venoj dum ili etendas la manon kaj metas prezon al sia aliĝo, prezentas ĉiujn karakterojn de la plej malnobla kanajlaĵo, de la plej malinda friponaĵo. Tio estas tiel malnobla, mizerkora kaj kanajla, kiel estus patrino, kiu vendus sian filinon por kontentigi kapricon el la plej abomenindaj kaj fiaj.

Kiel ni povos kredi je la revolucia spirito kaj la seriozeco de tiuj homoj?

Ĉu ili deziras la revolucion en siaj respektivaj landoj? Jes ja; sed ili volas, ke ĝi fariĝu sen danĝero por iliaj fieraĉaj personoj kaj por ekskluziva profito de iliaj monavidoj.

Kompreneble ĉi tio ne volas diri, ke en la kerno de la komunistaj partioj kaj de la homamasoj reprezentitaj de tiuj delegitoj, ne estu centoj da bonfidaj individuoj, pretaj al la ofero kaj indaj de ĉiu respekto kaj konsidero. Ĉi tiuj restas aparte. Ĉi tiuj kritikoj ne havas pli amplekson ol la pure persona kaj rilate la delegitojn ĉeestintajn al la Kongreso.

Ĉi tiu estas nia opinio, sincere esprimita.

—Konsentite, Pestaña, konsentite... kvankam estas iu troigo en viaj juĝoj.

Dirante ĉi tiuj vortoj, Lenino stariĝis. La intervidiĝo finiĝis. Eble ni misuzis la konceditan bonvolon; sed estus sentakte niaflanke fini konversacion, kiun ni ne sciis kiun amplekson oni volis doni al ĝi. Antaŭ ol adiaŭi nin de Lenino, li nin demandis se ni revenus al Rusujo je la proksima Kongreso.

—Klopodu veni kaj, ke vin akompanu pluraj el viaj amikoj. Venu kaj studu sur la tereno nian verkon. Por tiam la situacio pliboniĝos kaj eble ni povus atingi konkludojn, kiuj nin proksimigos pli ol ni estas hodiaŭ. Ĉu vi skribos ion pri tio, kion vi vidis kaj la koncepto, kiun al vi meritas?

—Tre eblas—ni respondis.

—Se vi faras ĝin, sendu ĝin al mi. Mi havos multan plezuron ricevi kaj legi ĝin.

Ni varme manpremis nin kaj ni eliris.

Profunda simpatio kaj senlima respekto al ni restis por Lenino post ĉi tiu konversacio.

Ni ne partoprenis en liaj ideoj, nek en ili partoprenas hodiaŭ; sed scias ĉiuj tiuj amikoj kun kiuj ni parolis pri li, ke kiam ni parolas pri Lenino, ni havas por li la konsiderojn kaj ĝentilaĵojn, kiujn ni kreas, li meritas.

Malmultajn tagojn post ĉi tiu konversacio kun Lenino ni iris al domo de Sacha, la filino de Kropotkin, kaj hazarde troviĝis tie ŝia patro. Estis la tago kiam li venis al Moskvo por intervidiĝi kun Lenino, interesiĝante pri la kooperativanoj por kiuj oni petis la mortpunon.

La celo de ĉi tiu vizito estis diri al Sacha la rezulton atingitan de peto, kiun en ŝia favoro ni faris al Lenino.

Pro la rilatoj, kiujn en Londono havis Sacha kaj, kiel krome ŝi estis sperta pri la materio, Lunatscharky, la Komisaro de Popolo ŝin delegis por iri al la angla ĉefurbo aĉeti materialon de instruado por la lernejoj de Rusujo.

Aprobita de la Konsilantaro de Komisaroj de la Popolo la propono, oni petis de Ĉeka la respondajn pasportojn kaj Ĉeka rifuzis koncedi ilin.

Kiom da klopodoj fariĝis por ke ĝi koncedu ilin, estis senutilaj. Ne estis maniero venki ĉi tiun opozicion.

Kelkajn tagojn antaŭ nia vizito al Lenino, oni ricevis triafoje la rifuzon de Ĉeka. Sacha, kiu sciis, ke ni devis intervidiĝi kun Lenino, proponis al ni, ke ni insistis pri la peto. La respondo de Lenino ne povis esti pli favora; li asertis al mi, ke la pasporto de Sacha estos sendita.

Tiel Kropotkin, kiel lia parulino kaj lia filino al ni demandis kiun impreson ni eltiris el la intervidiĝo kaj kiun ni opiniis, ke estis la penso de Lenino koncerne la evoluon de la okazaĵoj.

—La impreso, se ni juĝas persone, estas bona —ni al ili diris—. Koncerne la penson de Lenino pri la evoluo de la okazaĵoj, estas tiu de viro, kiu eraris kaj serĉas kun intereso la vojon, kiu lin eltiros el la embaraso. Se li trafas, bone; se ne trafas, la revolucio malprogresos.

Tio estas kion esence ni povis dedukti de la fundo de amareco de iu el liaj esprimaĵoj.

20a. La reveno al Hispanujo

La Kongreso de la Tria Internacio finiĝis.

La aktiveco de la Komitato estis absorbita de la organizo de la Kongreso de flava raso, kiun la Tria Internacio preparis por la 13-a de septembro en Bakuo, kaj de la ordonoj al la delegitoj, kiuj al la ceteraj landoj de Eŭropo kaj Ameriko jam deiris.

La disiro estis preskaŭ ĝenerala.

La dudek unu kondiĉoj, kiujn altrudis Moskvo al la socialistaj partioj, kiuj volus eniri en la Trian Internacion kaj al la komunistaj, kiuj ankoraŭ ne senkondiĉe submetis sin, al la hezituloj, devigis internan laboron, kiu anstataŭis tion eksteran ĝis tiam superregantan.

Grupo de delegitoj al la Kongreso, en kiu troviĝis la tuta itala delegitaro kaj la antaŭtempe forpasintaj francaj kolegoj Vergeat kaj Lepetit kaj la komunisto Lefebre, inter aliaj, deiris en vojaĝo de ekskurso al Ukrainujo —al kiu ni ne iris por havi pli da tempo por kompletigi niajn informojn— kaj ni atendis, ke ili revenis.

Ni interkonsentis kun Vergeat kaj Lepetit, ke ili al mi havigos donitaĵojn kaj informojn pri ilia vojaĝo kaj, ke ni al ili donos la donitaĵojn kaj informojn, kiujn ni kolektos en Moskvo.

La tagoj pasis iom monotonaj kaj enuaj. Kiel ĉiu dediĉis al sia afero, kaj la atendo por atingi interpretiston aŭ ajnan permeson kelkfoje fariĝis senfina, pasis la horoj tre malrapide, kaj ni ne sciis, kiel uzi ilin.

Ni petis la pasportojn kaj du tagojn poste oni al ni avizis, ke ni povis preni ilin. Ni antaŭe devis iri al la oficejoj de Ĉeka, por ke la Ĉeka-a polico nin fotografis. Ĉi tiu fotografaĵo estis nepra kondiĉo por ne suferi interrompojn dum la vojaĝo.

Ni sentis nin humiligitaj. La instinkta abomeno kontraŭ Ĉeka pliiĝis de post ĉi tiu momento. Sed pli da sento de indigneco estis tiu, kiun al ni kaŭzis la bolŝevikaj delegitoj, kiuj konsideris justa la disponon kaj krome laŭdis ĝin. La morala kvalito de ĉi tiuj estuloj kaŭzis naŭzojn.

La apero en la sceno de nova aktoro eltiris nin el ĉi tiuj zorgoj kaj forgesigis la okazaĵon de la antropometria slipo. Ni laboradis en la ĉambro de la hotelo, kiam oni forte frapis sur la pordo.

Ni donis la permeson por ke li eniru kaj aperis en la kadro de la pordo nekonato de ni.

Sen enkondukoj, ne dirante kiu estis nek donante lian nomon aŭ rangon, kaj uzante ridindan tonon de aroganteco, li demandis en ĝusta hispana.

—Do, ĉu ne ŝanĝiĝis viaj ideoj?

Ni restis surprizitaj pro tiu entrudulo. Kiu estus tiu personaĉo, kiu rekte, per ordonema kaj aŭtoritatema tono, havis la aplombon pridemandi nin?

Pli ĝentilaj ol li, kvankam malpli bolŝevikaj, ni respondis ne konsiderante liajn malĝentilajn manierojn.

—Kiel! —li mirige diris aŭskultante nian respondon—. Post tio, kion vi vidis en Rusujo, de la grandioza spektaklo de la revolucio, de la netaksebla verko de la komunistoj kaj la diktatorado de la proletaro, ĉu vi daŭre pensas kiel antaŭe?

—Same, ke antaŭe —ni kontestis sen mirigo de ni mem—. Ĝuste, ĉar mi vidis ĉion tion kaj pro tio, kion mi vidis, mi daŭre pensas kiel antaŭe; daŭre tenas min en miaj ĉiamaj ideoj.

—Tiam, ĉu vi vidis nenion de la revolucio?

—Mi certe vidis la verkon de la revolucio pli bone ol vi —mi respondis.

—Antaŭ ol vi deiros mi volus intervidiĝi kun vi ĉeeste de la Komitato de la Tria Internacio, ĉar mi estas Merino Gracia, la delegito de la hispana Komunista Partio.

—Ha!—ni respondis—. Ĉu vi estas Merino Gracia?

—Jes—li respondis—. Mi estas Merino Gracia!

—Mi ne havas problemon ĉeesti en tiu kunveno; mi nur deziras, ke ĝi okazu kiel eble plej baldaŭ. Estas via respondeco.

La kunveno ne povis okazi, ĉar Merino Gracia sekvatage deiris al la Kongreso de Bakuo. Kaj tiel finiĝis la neordinara okazaĵo.

Dum tiuj tagoj denove ni arde rekomencis la taskojn por atingi interkonsenton pri la organizo de la Ruĝa Sindikata Internacio.

La alveno al Moskvo de la kamarado Borghi, delegito de la Unione Sindacale Italiana, kiu estis alfrontonta nin al D'Aragona, la reprezentanto de la Confederatione Generale de la Lavoro[10], kaj la deiro de Lozovski al Londono anstataŭita de Tomsky, pli tolerema kaj prudenta, faris, ke ni ree okupiĝis pri organizo, forgesante ĉiujn malgrandajn malagrablaĵojn de la neatenditaj renkontoj kaj la monotoneco de la tempopaso.

10 NeT. Unione Sindacale Italiana: Itala Sindikata Unuiĝo. Confederatione Generale de la Lavoro: Ĝenerala Konfederacio de la Laboro.

Ĉi tiuj kunvenoj eĉ fariĝis ŝtormaj. Veras, ke ŝtormaj sen grandaj agitadoj. Kvazaŭ tempestoj en glaso de akvo.

Borghí, kiu, kiel ni jam diris, ĵus venis, petis la solidarecon de la Nacia Konfederacio de la Laboro, ĉar ĉi tiu estis la organizo pli afina al tiu de li reprezentita, por ke oni akceptu la “Unione Sindacale”-on, ekskluzivante la “Confederatione Generale de la Lavoro”-on, reprezentita de D'Aragona, klare reformisma organizo, ĉar eĉ ties sekretario, D’Aragona, formis parton de nacia institucio favore de la italaj invalidoj pro milito de kiu ankaŭ estis membro la reĝo de Italujo. Afero, kiun la bolŝevikoj ne ignoris.

La peto de Borghi iom malhelpis la okazaĵojn kaj agitis la pasiojn. Niaflanke, ni akceptis lian peton, kaj en unu el la kunsidoj de la organiza Komisiono, ni proponis ĝin.

La surprizo de Tomsky ne havis limojn. Kaj ĉiuj liaj kapabloj direktiĝis rezignigi al ni nian intencon.

La rifuzo lin kolerigis. Li respondis, ke neniel. La Confederatione Generale de la Lavoro ne povis esti ekskluzivita.

Kiam ni al li dokumente pruvis, ke tiu organizo, krom formi parto lia sekretario de institucio de kiu estis prezidanto la reĝo de Italujo, ankoraŭ ĝi estis, kvankam D’Aragona diris la malon, aliĝinta al la Sindikata Internacio de Amsterdamo[11], neakceptebla dualiĝo, li proponis prokrasti la diskuton ĝis la sekva tago, por konsulti la Komitaton de la rusa centra organizo.

Akceptita lia propono, ni plu diskutis la tagordon.

11 NeT. La Internacia Sindikata Federacio estis la internacia asocio de laboristaj organizoj, kiu funkciis inter 1901 kaj 1945. Ĝi kundividis kun la Dua Internacio ties celojn kaj multfoje ties estrojn. Ĝi malestime estis nomita Internacio de Amsterdamo de la Ruĝa Sindikata Internacio.

Kiam komenciĝis la kunsido de la sekva tago, ni repetis la proponon, sed Tomsky arde batalis kontraŭ ĝi kaj ĉiuj kialoj, kiujn ni alportis, pruvantaj la nelogikecon de la pozicio defendita de li, estis sisteme malakceptataj de li kaj aliaj delegitoj.

Venis momento, kiam ni kredis, ke tiam finiĝus nia laboro por starigi la Ruĝan Sindikatan Internacion, ĉar estis egalaj la fortoj, kiuj subtenis unu kaj alian kriterion, la du neakordigeblaj, kaj ne estis maniero atingi interkonsenton.

Ni tiam petis prokrasti la diskuton por interkonsenti kun Borghi kaj scii se estis iu rimedo savi la situacion. Interrompita la kunsido, ni interkonsultis kun Borghi. El tiu konsulto, ni akordigis retiri la proponon ekskluzivi la italan “Confederacione Generale de la Lavoro”-on kaj proponi, ke la Unione Sindacale estus akceptita laŭ egaleco de kondiĉoj en la diskutadoj de la Komitato kaj en la estonta Internacia Kongreso, kiun oni preparis. Ĉi tiu propono estis akompanita de deklaro, kiu sinteze diris la jenon: "La organiza Komisiono de la Ruĝa Sindikata Internacio simpatie vidas la sincere revolucian sintenon kaj la spiriton de lukto de klasoj, kiujn la Unione Sindacale Italiana plenumis inter la italaj laboristoj.”

Respondis Tomsky, ke li akceptis la unuan parton de la propono, sed ne la dua, ĉar kvankam kaŝe enhavis malaproban voĉon por la Confederatione Generale de la Lavoro.

Ni komprenigis al li, ke ne estis tia intenco en la propono; sed pli ĝuste stimuli la italan proletaron aliĝintan al la Confederatione, ke ĝi imitu tiun de la Unione Sindacale. Sed li ne konvinkiĝis.

Firmaj en nia propono, ĉar ni ĝin opiniis logika, ni malakceptis ĉiujn, kiujn oni al ni faris por ke ni retiriĝu ĝin.

Ree paraliziĝis la laboro, kiun ni realigis kaj senfine diskuti. Petis Tomsky novan prokraston en la diskutadoj por interkonsenti kun la reprezentantoj de la rusa laborista organizo, tial ni interrompis la kunsidon ĝis la sekva tago, por ke Tomsky konsultu.

Je la sekva kunveno Tomsky manifestis, ke nome de la revolucio kaj la diktatorado de la proletaro, la rusa Komunista Partio ne povis akcepti nian proponon, invitante nin, sekve, ke ni ĝin retiris.

Ni restis surprizitaj pro la deklaroj de Tomsky, ĉar ni ne sciis la rilaton, kiu havis la revolucion kaj la diktatoradon de la proletaro kun propono, kiu nur klopodis pruvi simpation al organizo ne malestimante nek kritikante la ceterajn.

Ni klopodis diskuti la sintenon en kiu Tomsky lokiĝis, sed estis senutila. Oni klare diris al ni, ke aŭ ni retiris la proponon aŭ ili konsideris finitaj la taskojn de la organiza Komisiono.

Nun estis ni kiuj, pro la ultimato, petis interrompi la diskutadon dum kelkaj minutoj por decidi.

Kun Borghi, kiu ĉeestis, kiel supozeblas, en ĉiuj diskutadoj de la Komisiono, ni iris al la koridoro kaj interŝanĝis opiniojn, ĉar la situacio estis tute kriza. La dilemo por ni estis: aŭ cedi aŭ veni al la rompo. Kiun el la du proponoj ni devis elekti? Ni decidiĝis favore al la unua. Ni cedis. Al ni ŝajnis la plej logika.

Rekomenciĝis la diskuto kaj ni prenis la parolon, retirante la proponon, sed antaŭe bedaŭris la entrudiĝon de la rusa Komunista Partio en la diskutadoj de la Komisiono. Ni diris, ke oni perfortis la volon de la delegitoj altrudante al ni eraran kriterion, kaj ke se ni, la reprezentantoj de la hispana kaj itala organizo, cedis, ne estis pro tiu trudado, kiun ni malakceptis, sed por ne fari senfruktaj la taskojn de

la Komisiono kaj subteni la unuiĝon de la proletaro, kvankam ni antaŭvidis estontece, se tiuj entrudiĝoj daŭris, gravajn malfacilaĵojn por subteni ĝin.

Finita ĉi tiu okazaĵo, ni plu diskutis la aliajn aferojn.

Alia el kiuj kaŭzis skandalon kaj perfortajn diskutadojn, estis tiu de la teksto por la kunvoko de la Internacia Kongreso de la Ruĝa Sindikataro.

Proponis la komunistoj, ke oni ekskluzivis ĉiujn Federaciojn kaj centrajn instituciojn inklinajn al la Internacio de Amsterdamo, male akceptante la Sindikatojn, kiuj apartenis al tiuj Federacioj kaj volus ĉeesti. Sed la malpermeso de tiuj Federacioj estis kondiĉita. Tio al ni ŝajnis tro komplika kaj ni malakceptis ĝin.

Ni proponis, ke oni simple kaj sincere kunvokis ĉiujn urbajn, regionajn aŭ tutlandajn sindikatajn organizojn, ĉu laŭ industrioj ĉu inkluzivante ĉiujn oficojn aŭ industriojn de loĝloko, kiuj volis ĉeesti, nur limigante, por eviti ajnan surprizon, la voĉdonrajton, ĉu limigante la kvanton, ĉu neante ĝin al kiuj fakte apartenis al la amsterdama sindikataro.

Komence oni ne volis akcepti ĉi tiun proponon. Oni aŭguris nekalkuleblajn malbonojn kaj la eblan invadon kaj superregadon de la reformistoj.

Oni ankaŭ al ni proponis, ke en la invitilo tekstu, ke ĉiuj organizoj ĉeestontaj en la Kongreso anticipe akceptu la diktatoradon de la proletaro. Ni ankaŭ malakceptis ĝin kaj proponis forigi tian devigon. Ni subtenis, ke por allogi al la estonta Kongreso la plej grandan kvanton da laboristaj organizoj, por ke fakte estu universala Kongreso de sindikataj institucioj, necesis malakcepti ĉiujn antaŭajn dogmemon kaj devigon.

Fine, post longaj diskutadoj, oni interkonsentis ne mencii la diktatoradon de la proletaro, kunvokante ĉiujn revoluciajn sindikatajn organizojn praktikantajn la lukton de klasoj, kiuj volus ĉeesti.

La diskutadoj cetere estis malfacilaj; kaj kvankam fizike ni eliris unuiĝintaj el ili, la morala unuiĝo restis sufiĉe rompita pli ol kio estintus bezona.

Ĉiu sedo al la diktatorado de la proletaro kaj al la submetiĝo de la Sindikatoj al la Komunista Partio furiozigis la bolŝevikojn kaj okazigis senfinajn kaj pasiajn diskutadojn.

Tamen per ĉirkaŭiroj kaj akordoj, per koncesioj kaj interkonsentoj, ni atingis konkretigi la ĝeneralajn liniojn por la kunvoko de proksima Ruĝa Sindikata Internacia Konferenco, kiu devis okazi en Nederlando aŭ Italujo kaj, ke nur okazus en Rusujo se neniu el la registaroj el tiuj du landoj koncedis permeson[12].

Solvita ĉi tiu afero, ni definitive disiĝis.

Tio pli interesa de ĉi tiu lasta fazo koncentriĝis en la vivo de hotelo.

Ĉiutage okazis foriroj. En la koridoroj oni jam ne rimarkis la aktivecon de dek kvin tagoj antaŭe. Iuj novaj vizaĝoj anstataŭis la okazintajn forestojn; sed ili ne servis por doni al ĝi la pasintajn agitadon kaj movadon.

Oni rimarkis, ke la ekonomia situacio de Rusujo rapide plimalboniĝis.

Oni ne nur malpliigis la porciumon, kiun oni al ni donis en la hotelo, forigante unu manĝon kaj malpliigante la

12 NeT. Finfine, la unua kongreso okazis la 3-an de julio 1921 en Moskvo. Ĝia Sekretariaro estis konsistigita de la hispana Andrés Nin kaj la rusoj Tomski kaj Lozovski.

kvanton kaj kvaliton en la ceteraj, sed ke ĉiutage venis novaj ordonoj.

Unue oni donis al ni ateston, kiujn ni devis transdoni je ĉiu manĝo, kiun ni faris. Oni volis per tio efektivigi rigoran inspektadon pri la nombro da distribuitaj porciumoj, sed tio ne donis bonan rezulton.

Poste, oni al ni donis kartojn kun kuponoj. Je ĉiu manĝo oni devis tranĉi unu el tiuj kuponoj kaj transdoni ĝin al la disdonestro de provizoj de la hotelo. Ankaŭ ne ĉi tio donis rezulton, ĉar oni ilin al ni forprenis, kaj al ni donis aliajn, kiuj pli-malpli estis la samo, ĉar oni nur devis elstreki presitajn numerojn.

La blanka pano tute malaperis de la tablo. Kaj la nigra, kiu anstataŭis ĝin, estis de tre malbona kvalito kaj malabunda.

Ili ankaŭ forigis la sukeron por la teo. Oni al ni donis karamelojn por sukerigi ĝin.

La disdono de tabako kaj alumetoj, kiu antaŭe estis ĉiutaga kaj regula, fariĝis alterna. La fumantoj estis furiozaj kaj malkontentaj.

Tamen ankoraŭ estis enviinda nia situacio.

Mi opinias, ke escepte de la komisaroj kaj iu alia gravulo, ni estis la plej bonaj nutrataj el la tuta Rusujo.

Senutile diri, ke la aŭtoj tute malaperis kun granda ĝojo por iuj el ni, ke al ni fariĝis netolereblaj la misuzoj, kiujn ni vidis.

Konsente kun Vergeat kaj Lepetit, pro la reala manko de tempo, ĉar ili ankaŭ volis reveni al Francujo kiel eble plej baldaŭ, ni akordigis, ke la interŝanĝon de informoj kaj donitaĵoj ni faros en Parizo. La tragika morto de ĉi tiuj

kamaradoj en la maroj de la Nordo faris, ke la interŝanĝo ne efektiviĝis.

En nia posedo la pasportoj, la 5-an de septembro ni eliris el Moskvo, la 6-an alvenis en Petrogrado, kaj samtage nokte, kune kun Borghi, ni deiris de Petrogrado al Reval. Post restado de sepdek tagoj en Rusujo, en la lando de la revolucio, ni ree kontaktis la kapitalisman mondon.

Dum la malmultaj horoj, kiujn ni pasigis en Petrogrado hazarde renkontis du hispanojn: kataluno unu, valenciano, la alia.

La kataluno estis kuiristo: li laboris por Zinovjev, la estro de la Tria Internacio, komence de la revolucio. La valenciano estis kukisto kaj sukeraĵisto. La du, dum la carismo, okupis gravajn postenojn en la plej bonaj hoteloj de Petrogrado, Moskvo kaj aliaj rusaj loĝlokoj. Ili ŝparis milojn da rubloj kaj por pli da sekureco ilin deponis en Banko. Kiam la revolucio konfiskis la Bankojn kaj ties havaĵojn, kuiristo kaj kukisto restis sen centono, kio al ili igis malbeni la revolucion kaj ĉiujn revoluciulojn. Sed kiam ni ilin demandis ĉu ili volis reveni en Hispanujon, respondis, ke ne.

—Ĉi tio ŝanĝos —ili diris—, kaj kiel kiam ĝi ŝanĝos mankos laboristoj de nia ofico kaj ni bone konas la landon kaj ties kutimojn, ni sukcesos reakiri kion al ni konfiskis la revolucio. Krome —ili aldonis— ni jam pasigis tion plej malbonan kaj ni volas vidi, kiel ĉio ĉi finiĝos.

Ni adiaŭis ilin ĝis ili revenos al Hispanujo iĝintaj “kapitalistoj”.

Fine, la 7-an de septembro duonmatene, ni retransiris la landlimon, kiu disigas Rusujon de Estonujo.

Malantaŭ ni restis, malgraŭ la "diktatorado de la proletaro”, Ĉeka kaj la bolŝevikaj persekutadoj kaj arbitrecoj,

la ĝermoj de nova mondo, la briloj de brilega sociala esperiga komenco. La plej granda gesto, kiun por sia liberigo faris neniu popolo.

Ne gravis, ke la freneza fanatikeco de partio ruinigis tiun geston; la popolo ĝin faris, kaj ĉi tio estis tio pli interesa por ni, kiuj ĉiam fidis je la popolo.

21a. Konkludo

Multaj, multegaj aĵoj el tiuj, kiujn ni vidis, restas ankoraŭ dirotaj.

Ni tamen klopodis diri, kiujn ni juĝas pli interesaj por la kono de la sovetia Rusujo kaj de la Partio ĝin reganta.

Por diri ĉiujn ceterajn, traktante ilin laŭ ĝeneralaj terminoj kaj ne detale, oni bezonus multajn pliajn paĝojn. Por detaligi ilin, eble alian volumon.

Nur la malorganizo rezultanta de la bolŝevika organizo bezonus kompletajn ĉapitrojn.

La fakto, ke atingi interpretiston, kiam ni bezonis liajn servojn, postulis konsulti eĉ la Komitaton de la Tria Internacio aŭ interveni tri aŭ kvar departementoj, donas ideon pri la komplikega bolŝevika organizo.

Sed estas pli: la disigo de funkcioj efektiviĝis tiel trozorgeme, ke eĉ personoj laborantaj en sama departemento kaj efektivigantaj funkciojn tute dependajn unu de la alia, ne sciis klarigi al ni la kialon de la funkcio, kiun ili realigis, nek ĝiajn eblajn kaj necesajn konsekvencojn.

La organizo mem de la Kongreso de la Tria Internacio, en kiu entute ĉeestis malpli ol cento da eksterlandaj delegitoj, postulis la laboron kaj la konstantan atenton de dekoj da dungitoj dum preskaŭ tri monatoj, kaj venis la tago de ĝia komenco kaj oni devis improvizi ĉion aŭ preskaŭ ĉion.

Sufiĉas diri, ke ni nur disponis, dum la bolŝevikoj estis la posedantoj de la Povo kaj la absolutaj mastroj de ĉio, unu

interpretiston por traduki al ĉiuj lingvoj, oni povas atingi ideon pri kio estas la bolŝevika organizo.

Homoj, kiuj iris kaj venis tien kaj reen, dungitoj je konstanta aktivado, kiuj ricevis ordonojn de ajna gravulo; movado, jes, multa; sed nenio pli ol movado. Tio praktika, pozitiva, reala, kio estintus rapide plenumi la laborojn de la Kongreso, la diskutadojn kaj rezoluciojn, ĉi tio jam estis alia historio.

Monato ĝuste de kunsidoj. Tridek tagoj de diskutadoj; ni eĉ kunvenis tri fojojn iutage, donas ideon pri la aĵoj, kiujn oni povas fari. Tamen ni apenaŭ povis konkretigi duonan dekduon el ili.

Kaj tiel okazis en ĉiuj aferoj. Se la sovetiaj institucioj estintus organizitaj por perdi la tempon, malfacile ili sukcesus pli plene. Sed ĉi-okaze kiel en ĉiuj analogaj okazoj, la popola intuo kaj la necesoj superis tiujn mankojn kaj obstaklojn, trovante ĉiam la plej rapidan kaj ĝustigitan solvon. Neniam kiel en tio, kion ni vidis en Rusujo, oni povas kompari la vivforton kaj aktivecon de la popolo, individue kaj kolektive konsiderita, kun la malrapideco kaj mallerteco de la registaraj institucioj. La afero de la Kooperativoj jam citita kaj multaj aliaj, kiujn ni povus citi, atestas kion ni diras kaj asertas.

La oficialaj deklaroj mem helpas konfirmi ĝin.

En la koridoroj de aliro al la Salono de la Trono, kie okazis la kunsidoj de la Kongreso, oni elmontris komparajn grafikaĵojn pri la nutrado, kiun ĉiu persono bezonis kaj, kiun oni al li oficiale donis. La simileco ne povis esti pli bedaŭrinda.

La oficiala porciumo egalvaloris la dudek kvin procenton el la bezono de la individuo. Kio mankis ĝis la tuto, t. e., la sepdek kvin cetera, oni devis atingi ĝin spite de

la oficialaj obstakloj, ĝenoj kaj balastoj. Ĉu oni ĝin atingis? Entute, ne; sed ja en granda parto.

Ĉi tiuj samaj grafikaĵoj al ni parolis pri ĉirkaŭ kvindek procento de kio mankis al la individuo, sed li atingis uzante siajn rimedojn. La alian dudek kvin procenton oni konsideris neebla, ke li trovis ĝin, kaj estis tio, kio enprofundigis la popolon en la mizeron kaj la ĝeneralan malriĉecon.

Do la realo estis tre malfavora al la bolŝevika ŝtato. Se absoluta mastro kaj sinjoro de ĉio; sola aĉetanto kaj vendanto; en ĝiaj manoj ĉiuj rimedoj de cirkulado kaj ŝanĝo de produktoj, kiuj povas posedi landon, ĝi ne kapablis transdoni al ĉiu individuo sed la dudek kvin procenton de tio, kion li bezonis, dum spite de ĉiuj obstakloj, kiujn la ŝtato metis al la individuo, ĉi tiu sukcesis atingi per siaj rimedoj la duoblon de tio, kion tiu al li transdonis, ĉu ĉi tio ne instruas kaj klare diras al ni pri la nekapablo de la ŝtato multege pli ol ĉiuj fantazioj de la bolŝevika literaturo defendanta ĝin?

Sed por kio plu paroli pri ĉi tio!

Kaj konsideru, ke ni ne pensas, por alifoje pruvi la fiaskon de la ŝtato pri la organizo de la socia vivo, uzi, kiel argumenton, la bildojn de hororo kaj mizero, kiujn ni vidis, nek la degeneradon en kiu la popolo defalis pro efiko de la mizero.

Krome ni avertas, ke en ĉi tiu apenaŭa taksado pri ŝtata nekapableco, ne nur inkluzivas la bolŝevikan ŝtaton; ni inkluzivas ĉiujn, ĉar ĉiuj donis evidentegajn pruvojn de nekapablo.

Ni vidis en la Ruĝa Placo de Moskvo, ĉe la pordoj de la Kremlo mem, dekojn da personoj, virinoj kaj infanoj inter ili, dormantaj sur la malmola planko, kiam finitaj la taskoj de la Kongreso ni iris ripozi.

Ni ankaŭ vidis, dimanĉon posttagmeze promeni viron vestita per kostumo en sufiĉe bona stato, sed kun nenio en la piedoj, tute senŝua, sen ĉemizo kaj kun nenio sur la kapo. Sendube estis la restoj de vestaĵo, kiuj al li restis, kaj li ilin surmetis la dimanĉon por promeni.

Ĉu ni devus mencii la piedvestitajn virinojn, sed sen ŝtrumpoj aŭ nuda kruro, ĉar tiu, kiu portis ŝtrumpetojn, konsideris sin feliĉa, kaj kiuj tranĉis la hararon, ĉar ne povis kombi ĝin, mankaj de tio pli elementa por tio?

Ĉu tiuj virinoj, kiuj prostituas sin kontraŭ manĝo, pasigante tagojn kaj tagojn, irante de oficejo al alia, serĉante laborpostenon, kiu ĝin havigas, sed ne trovante ĝin?

Ĉu la viroj duonvestitaj? Ĉu kiuj vestis kostumojn faritajn de restaĵoj de aliaj vestaĵoj, kio denuncis la mizeron kaj la malabundecon kun ĉiuj ties kruelaj konsekvencoj?

Por kio paroli pri la infanoj de ok, dek, dek du aŭ dek kvin jaroj, kiu serĉis en la spekulacio kaj la komerco kion la oficialaj institucioj ne povis doni al ili?

Sed, ĉu estas la solaj respondecaj de ĉi tiuj mizeroj la bolŝevikoj, la rusaj regantoj, la homoj, kiuj posedas la Povon nome de la laborista klaso, de la suferanta popolo? Per la sama sincereco, ke ni malakceptas kaj batalas ĝiajn politikajn procedojn, ĝiajn sofismajn ruzaĵojn por triumfi kaj subteni sin en la Povo, ni malakceptas, ke oni ilin faras respondecaj de la tuta malbono. Ja parte, la plej minimuma, ni diru ĝin anticipe.

La reala respondeco de ĉiuj mizeroj, kiujn ni vidis dum la sepdek tagoj pasintaj en Rusujo, falas kiel ofendo, kiel malhonoro kaj terura akuzo sur la eŭropaj burĝaro kaj Registaroj. Ĉi tiuj estas la respondeculoj, la plej grandegaj respondeculoj.

Sen la blokado, sen la ferzono, sen la ĝendarmo, kiun la Ententо metis ĉe la pordoj de la landlimaj landoj kun Rusujo, tiuj mizeroj estintus laŭ skalo multe pli malpliigita; la rusa popolo defendintus sin de ili multe pli bone kaj ne atingante la ekstremon, kiun ĝi atingis.

Al la bolŝevikoj oni devas pardoni tiun pekon. Ili jam havas sur sia konscienco de socialistoj, de aktoroj en la dramo naskanta novan mondon, sufiĉe da mankoj sen tio, ke oni al ili ŝarĝos tiujn, kiujn ili ne plenumis, tiujn pri kiuj oni ne povas fari ilin respondecaj.

Se oni al ĉiu nur devas atribui la mankojn de li faritaj, ĉi-okaze, ni ŝarĝu, ĉar al ili oni devas ĝin ŝarĝi, sur la eŭropaj registaroj la respondecon de tiu grandega kontraŭhomara krimo farita al Rusujo.

En ĉi tiu konkreta afero, la bolŝevikoj povas stariĝi, kiel akuzantoj, ne kiel akuzatoj, juĝistoj, ne krimuloj, viktimoj, ne ekzekutistoj. Unu solan fojon ni devas koncedi al ili ĉi tiun eblon. Multe tion ili bezonas.

La celon, kiu nin gvidis, ni jam plenumis.

Sen pasio, sen sarkasmoj kaj insultoj, ni raportis kion ni vidis dum nia estado en Rusujo.

Kiu nin legos sen antaŭjuĝoj kaj sen ia antaŭzorgo, kun deziro scii aĵojn pli ol juĝi ilin, al ni faros justecon rekonante, ke en nia prezento de faktoj ni metis la plej malgrandan eblan kvanton da partieco kaj ĝustigis nin al tio, kion ni diris komence: ni ne kritikos, nek mallaŭdos; ni nur raportos. Kaj ni opinias, ke ĝin plenumis.

Tial finante, ni faras promeson; se la favoro de la publiko nin akompanas, ni skribos duan parton, kiun ni titolos: “Sepdek tagojn en Rusujo. Kion mi pensas”[13].

Tiel, kiel en la unua parto ni nur rakontas, ni kritikos kaj analizos la faktojn laŭ nia opinio en la dua. La laboron de prezento sekvos tiu de kritiko.

Do, se ni sukcesas plenumi nian verkon, ni sentos nin kontentaj; se ne, ni bedaŭros ĝin, sed nenio pli.

Angel PESTAÑA
Aŭgusto 1924.

13 NeT. Efektive Angel Pestaña verkis tiun libron ankoraŭ tradukotan al la esperanta, laŭ mi scio.

Aneksaĵo: kondiĉoj por la akcepto en la Komunista Internacio

La unua kongreso de la Komunista Internacio formulis neniun precizan kondiĉon por la akcepto de la partioj en la Tria Internacio. Kiam la unua kongreso estis kunvokita, en la plimulto de la landoj nur estis komunistaj tendencoj kaj grupoj.

La dua kongreso de la Komunista Internacio kunvenas en malsamaj cirkonstancoj. Nuntempe en la plej granda parto de la landoj ne estas nur komunistaj tendencoj kaj grupoj, sed komunistaj partioj kaj organizoj.

Ofte oni formulas la peton de akcepto en la Komunista Internacio fare de partioj kaj grupoj, kiuj ĝis nelonge ankoraŭ apartenis al la Dua Internacio, sed ke fakte ne iĝis komunismaj. La Dua Internacio definitive rompiĝis. La partioj kun intera pozicio kaj la centrismaj grupoj, rimarkante, ke la Dua Internacio estas tute neutiligebla, klopodas trovi apogon en la Komunista Internacio, kiu ĉiufoje estas pli forta. Sed samtempe, ke ili faras ĉi tion, esperas subteni sufiĉan "aŭtonomecon", kiu al ili permesos daŭrigi la malnovan oportunisman aŭ "centrisman" politikon. La Komunista Internacio iamaniere enmodiĝas.

La deziro de iuj el la ĉefaj "centrismaj" grupoj aliĝi al la Komunista Internacio estas nerekta pruvo de la fakto, ke ĉi tiu gajnis al si la simpatiojn de la grandega plimulto de la konsciaj laboristoj de la tuta mondo kaj, ke ĝi iĝas ĉiufoje pli potenca forto.

La Komunistan Internacion minacas la danĝero de infektado fare de malstabilaj kaj hezitemaj elementoj, kiuj ankoraŭ ne tute forneis la ideologion de la Dua Internacio.

Krome en iu el la plej solidaj partioj (Italujo, Svedujo, Norvegujo, Jugoslavio, ktp.) en kiuj la plimulto aliĝis al la komunista vidpunkto, ankoraŭ persistas reformisma kaj socialpacisma tendenco, kiu nur atendas la favoran momenton por ree levi la kapon kaj komenci la aktivan sabotadon kontraŭ la proleta revolucio, tiel helpante la burĝaron kaj la Duan Internacion.

Neniu komunisto devas forgesi la lecionon de la hungara revolucio. La hungara proletaro pagis multekostan prezon pro la fandado de la hungaraj komunistoj kun la socialdemokratoj nomitaj de "maldekstra".

Pro tio la dua kongreso de la Komunista Internacio juĝas bezone formuli per absoluta precizeco la kondiĉojn por la akcepto de novaj partioj kaj indiki al la partioj jam aliĝintaj la devojn, kiujn ili havas.

La dua kongreso de la Komunista Internacio metas la sekvajn kondiĉojn de aliĝo al la Komunista Internacio:

1a.- La tuta aktiveco de propagando kaj agitado devas esti de aŭtentike komunisma naturo kaj konforme al la programo kaj la decidoj de la Komunista Internacio. La tuta gazetaro de partio devas esti sub la direktado de komunistoj de multa konfido, kiuj donis pruvon de inklino al la afero de la proletaro. La diktatorado de la proletaro ne devas esti simple konsiderita, kiel formulo de kuranta uzo por mekanike ripeti ĝin, oni devas defendi ĝin laŭ maniero, kiu faru komprenebla ĝian neceson al ajna ordinara laboristo aŭ laboristino, al ajna soldato aŭ kamparano, devenante de la faktoj de iliaj ĉiutagaj vivoj, kiuj al ni devas senĉese servi kiel argumento en nia gazetaro.

La ĵurnaloj kaj ceteraj publikigaĵoj tiel, kiel ĉiuj eldonejoj de la partio, devas esti tute subordigitaj al la prezidantaro de la partio, sendepende de la fakto, ke je konkreta momento la partio estas leĝa aŭ kaŝa. Oni ne povas permesi, ke la eldonejoj trouzu de sendependeco kaj disvolvu politikan linion, kiu ne estas en absoluta harmonio kun la politika linio de la partio.

En la artikoloj de la gazetaro, la publikaj asembleoj, la sindikatoj kaj la kooperativoj ĉie, kie la aliĝantoj al la Komunista Internacio ĉeestas, necesas sisteme kaj senkompate denunci, ne nur la burĝaron, sed ankaŭ ties servantojn, la reformistojn de ajna tipo.

2a.- Ajna organizo volanta aliĝi al la Komunista Internacio devas principe forigi la reformistojn kaj centristojn de ĉiuj postenoj de respondeco ene de la laborista movado (organizoj de partio, komitatoj de redaktejo, sindikatoj, parlamentaj grupoj, kooperativoj, lokaj organoj de registaro, ktp.) kaj anstataŭigi ilin per elprovitaj komunistoj, eĉ kvankam, ĉefe je la komenco, necesos anstataŭigi spertajn "oportunistojn" per simplaj laboristoj de bazo.

3a.- En preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj Ameriko la lukto de klaso eniras en la fazon de la enlanda milito. En ĉi tiu situacio la komunistoj neniel povas dependi de la burĝa leĝaro. Ĉi tiuj estas devigitaj ĉie krei paralelan kaŝan organizon, kiu je la decida momento helpos la partion plenumi ĝian devon al la revolucio. En ĉiuj landoj, kie la komunistoj ne estas en kondiĉoj leĝe agadi, pro la sieĝostato aŭ leĝoj de krizokazo, estas absolute necese kombini la leĝan aktivecon kun la kaŝa.

4a.- Ene de la devo diskonigi la komunismajn ideojn, meritas specifan mencion la plenumo de tiu devo en la armeo per aktiveco de energia kaj sistema propagando. Tie, kie tia laboro de agitado neeblas pro la leĝoj de krizokazo,

oni devas efektivigi ĝin kaŝe. La malakcepto plenumi similan taskon egalvaloras fornei la revolucian devon kaj neakordigeblas kun la aparteno al la Komunista Internacio.

5a.- Necesas fari laboron de sistema kaj planita agitado en la kamparo. La laborista klaso ne povas plifirmigi sian venkon se ne certigas al si, pere de sia propra politika linio, la apogon de la kampara proletaro kaj de almenaŭ parto de la plej malriĉaj kamparanoj tiel, kiel la neŭtralecon de parto de la cetera kampara loĝantaro. Nuntempe la komunista aktiveco en la kamparaj zonoj atingas unuarangan gravecon. Necesas efektivigi ĝin ĉefe per la helpo de la komunistaj laboristoj de la urbo kaj la kamparo, kiuj havas intiman rilaton kun la kamparo. Neglekti ĉi tiun laboron aŭ lasi ĝin en la manoj de la neniel fideblaj duonreformistoj egalvaloras rezigni la proletan revolucion.

6a.- Ĉiu partio volanta aparteni al la Komunista Internacio havas la devon malmaski ne nur la videblan socialpatriotismon, sed ankaŭ la falsecon kaj la hipokritecon de la socialpacismo, sisteme vidigi al la laboristoj, ke sen la revolucia disfalo de la kapitalismo, neniu internacia kortumo de arbitracio, neniu interkonsento por la limigo de armilaro, neniu demokratia "reorganizo" de la Societo de la Nacioj, povos neebligi novajn imperiismajn militojn.

7a.- La partioj volantaj aliĝi al la Komunista Internacio havas la devon rekoni la bezonon de kompleta kaj absoluta rompo kun la reformismo kaj la politika linio de "centro", kaj defendi ĉio, kion oni povas, ĉi tiun rompon inter la propraj membroj. Sen ĉi tio neeblas iu politika linio konsekvence komunisma.

La Komunista Internacio tute kaj kategorie postulas, ke tia rompo okazu kiel eble plej baldaŭ. La Komunista Internacio ne povas permesi, ke bedaŭrinde famaj oportunistoj kiel Turati, Modigliani, Kautsky, Hilferding,

Hillquit, Longuet, MacDonald, ktp., havu la rajton esti konsideritaj, kiel membroj de la Komunista Internacio. Ĉi tio nur povus enporti la Komunistan Internacion en staton de ruino simila al tiu de la Dua Internacio.

8a.- La komunistaj partioj de landoj, kie la burĝaro posedas koloniojn kaj subpremadas aliajn naciojn, estas necese, ke ili havu aparte difinitan kaj klaran sintenon pri la afero de la kolonioj kaj la subprematoj popoloj. Ĉiu partio, kiu volas formi parton de la Komunista Internacio havas la devon malmaski la lertaĵojn kaj trompaĵojn de siaj "propraj" imperiistoj en la kolonioj, apogi ne nur parole sed per faktoj ĉiun movadon de liberiĝo en la kolonioj, peti, ke la lialandaj imperiistoj estu forpelitaj de tiaj kolonioj, inspiri al la laboristoj de sia propra lando sintenon de vera frateco kun la laboristoj de la kolonioj kaj la subprematoj popoloj, kaj sisteme fari laboron de propagando inter la trupoj de sia propra lando por ke ili ne kunlaboru kun la subpremo sur la koloniaj popoloj.

9a.- Ĉiu partio volanta aparteni al la Komunista Internacio devas disvolvi sisteman kaj longdaŭran aktivecon en la sindikatoj, la laboristaj konsilantaroj kaj la komitatoj de entrepreno, la kooperativoj kaj la aliaj amasaj organizoj de laboristoj. Necesas starigi ene de tiuj organizoj komunistajn ĉelojn, kiuj pere de konstanta kaj nelacigebla laboro konkeros por la afero de la komunismo la sindikatojn, ktp. En sia ĉiutaga laboro la ĉeloj devas diskonigi ĉie la perfidojn de la socialpatriotoj kaj la hezitemojn de la centristoj. La komunistaj ĉeloj devas esti tute subordigitaj al la aro de la partio.

10a.- Ĉiu partio apartenanta al la Komunista Internacio havas la devon komenci senkompatan lukton kontraŭ la "Internacio" de Amsterdamo el flavaj sindikatoj. Ĝi devas diskonigi per tuta forto inter la sindikatistoj la neceson de

rompo kun la flava Internacio de Amsterdamo. Ĝi devas fari ĉion eblan por apogi la internacian Asocion de ruĝaj sindikatoj, asociitan al la Komunista Internacio, nuntempe en proceso de kreiĝo.

11a.- La partioj volantaj aliĝi al la Komunista Internacio havas la devon submeti al revizio la membrojn de siaj parlamentaj grupoj kaj eksigi ĉiujn mallojalajn elementojn, fari, ke tiaj grupoj estu subordigitaj al la prezidantaro de la partio ne nur parole sed en la faktoj, postulante, ke ĉiu individua komunista parlamentano subordigu tutan sian aktivecon al la aŭtentike revoluciaj interesoj de propagando kaj agitado.

12a.- La partioj apartenantaj al la Komunista Internacio devas bazi sin sur la principo de la demokratia centralizismo. En la numtempa momento de malmola enlanda milito, la komunista Partio nur povos plenumi sian devon se ĝia organizo estas kiel eble plej centraliza, se ĝi altrudas ene de ĝi feran disciplinon kaj se la estraro de la partio, apogita sur la konfido de ĝiaj membroj, havas forton kaj aŭtoritaton kaj oni al ĝi havigas la plej ampleksajn povojn.

13a.- La komunistaj partioj de la landoj, kie la komunistoj agadas laŭ la leĝaro, de tempo al tempo devas entrepreni laboron de purigo (reenskribo) inter la membroj de la partio por liberiĝi de ĉiuj etburĝaj elementoj, kiuj enŝteliĝis.

14a.- Ĉiu partio volanta aliĝi al la Komunista Internacio havas la devon senkondiĉe apogi ĉiujn sovetiajn respublikojn en la lukto kontraŭ la kontraŭrevoluciaj fortoj. La komunistaj partioj devas efektivigi klaran propagandon por neebligi la elsendon de municioj al la malamikoj de la sovetiaj respublikoj; ili krome devas realigi laboron de

propagando, per ĉiuj rimedoj, tiel leĝaj kiel neleĝaj, inter la trupoj senditaj sufoki la laboristajn respublikojn.

15a.- La partioj, kiuj ankoraŭ subtenas la malnovajn socialdemokratajn programojn, havas la devon submeti ilin al revizio kiel eble plej baldaŭ, kaj redakti, konsiderante la apartajn kondiĉojn de sia lando, novan komunisman programon, kiu estu konforme al la decidoj de la Komunista Internacio.

Kiel normo, la programo de ĉiu partio apartenanta al la Komunista Internacio devas esti konfirmita de laŭregula kongreso de la Komunista Internacio aŭ de la Plenuma Komitato. Se la programo de partio ne akirus la aprobon de la Plenuma Komitato de la Komunista Internacio, tiu partio rajtas apelacii al la kongreso de la Komunista Internacio.

16a.- Ĉiuj decidoj de la kongresoj de la Komunista Internacio tiel, kiel la decidoj de ties Plenuma Komitato, estas devigaj por ĉiuj partioj apartenantaj al la Komunista Internacio. La Komunista Internacio, kiu agadas sub situacio de malmola enlanda milito, devas havi multe pli centralizan strukturon ol tiu de la Dua Internacio. Kompreneble la Komunista Internacio kaj ties Plenuma Komitato devas konsideri en ĉiuj siaj aktivecoj la diversecon de situacioj en kiuj troviĝas ĉiu partio por lukti kaj agadi, kaj devas preni decidojn devigaj por ĉiuj nur kiam tiaj decidoj eblos.

17a.- Ĉi-sence, ĉiuj partioj volantaj aliĝi al la Komunista Internacio devas ŝanĝi sian nomon. Ĉiu partio volanta aparteni al la Komunista Internacio devas nomiĝi: Komunista Partio de tia aŭ kia lando (sekcio de la Komunista Internacio). La fakto de la nomo ne nur estas formala afero, sed eksterordinare politika afero kaj de granda graveco. La Komunista Internacio deklaris la militon al la tuta burĝa mondo kaj al ĉiuj partioj de la flava socialdemokratio. La diferencon inter la komunistaj partioj

kaj la malnovaj "socialdemokrataj" aŭ "oficialaj" socialistaj partioj, kiuj perfidis la flagon de la laborista klaso, oni devas fari komprenebla por ajna simpla laboristo.

18a.- Ĉiuj ĉefaj organoj de gazetaro de partio de ĉiuj landoj havas la devon publikigi ĉiujn gravajn oficialajn dokumentojn de la Plenuma Komitato de la Komunista Internacio.

19a.- Ĉiuj partioj apartenantaj al la Komunista Internacio kaj tiuj, kiuj faris la peton de akcepto, havas la devon kunvoki kiel eble plej baldaŭ, kaj kiel ajn ene de la kvar sekvaj monatoj al la dua kongreso de la Komunista Internacio, eksterordinaran kongreson por ekzameni ĉiujn ĉi kondiĉojn de akcepto. Tial ĉiuj estraroj de partio devas kontroli, ke la decidoj de la dua kongreso de la Komunista Internacio estu komunikitaj al ĉiuj lokaj organizoj.

20a.- La partioj, kiuj nun volas eniri en la Komunistan Internacion, sed ke ankoraŭ ne ŝanĝis radikale sian malnovan strategion, antaŭ ol eniri en la Komunistan Internacion devas fari, ke ilia centra komitato kaj ĉiuj centraj estraj organoj estos konsistigitaj de ne malpli ol du trionoj de kolegoj, kiuj jam antaŭ la dua kongreso publike kaj sendube defendis la eniron de sia partio en la Komunistan Internacion. Oni rajtas fari esceptojn kun la konsento de la Plenuma Komitato de la Komunista Internacio. La Plenuma Komitato de la Komunista Internacio ankaŭ havas la rajton fari esceptojn okaze de la centristaj reprezentantoj menciitaj en la alineo 7.

21a.- La membroj de la partio, kiuj malakceptos kiel principon la kondiĉojn kaj tezojn ellaboritajn de la Komunista Internacio, devas esti forpelitaj de la partio.

La samo speciale validas por la delegitoj al la eksterordinaraj kongresoj.

LENINO, ENTOMBIGINTO DE LA RUSA REVOLUCIO

GASTON LEVAL

Mi unuafoje vidis kaj aŭskultis Leninon dum la Kongreso de la Komunista Internacio en kiu mi estis akceptita, samkiel miaj kundelegitoj, kiel observanto[14]. Tiu kongreso jam komenciĝis antaŭ ok aŭ dek tagoj, kaj ĉiuj eminentaj gravuloj de la internacia komunismo kaj de la rusa komunista partio uzis la parolon rilate konflikton, kiu en Italujo disigis la ĵus starigitajn komunistajn fortojn kaj la maldekstrajn socialistojn, kies estro estis Serrati, kiu volis subteni iun distancon aŭ almenaŭ iun sendependecon de la homoj de Moskvo. Oni eldiris argumentojn. Trockij, Zinovjev, Radek, Rakovski jam intervenis. Kaj subite ĉiuj observantoj, ĉiuj rusaj komunistaj kaj internaciaj delegitoj leviĝis, eksplodante per aplaŭdoj kaj ĵetante sennombrajn: vivu Lenino!; ĉi tiu ĵus eniris tra la kuliso kaj sidiĝis en la tribuno.

Mi opinias, ke mi estis la ununura, kiu ne leviĝis nek aplaŭdis. Sed mi min sentis rigardata de miaj najbaroj samkiel tiuj, kiuj en Francujo ne salutis la flagon dum militista parado, aŭ en Hispanujo, kiuj ne delevis la ĉapelon aŭ genuis sin, kiam pasis procesio. Ni diru, ke fakte tio ne min tuŝis.

Mi tiam havis la okazon kontroli kion al mi diris du el miaj amikoj: la franca Rene Marchand, sincere aliĝinta al la

14 Mi iris al Moskvo, kiel delegito de la hispana Nacia Konfederacio de la Laboro, por partopreni en la fondo de revolucia Sindikatista Internacio.

revolucio, kaj la kuracisto Nicolaiko, anarkiisto al kiu mi formulis ĉi tiun demandon: «Ĉu vi konsideras, ke Lenino estas geniulo?».

-Kion vi komprenas sub geniulo? -Min respondis Nicolaiko-. En la diskutadoj Lenino nur havas la kondiĉojn de insidema advokato de vilaĝeto («ho jes, insidema», interrompis Marchand) kaj de malmulta substanco, mi tion al vi certigas.

En tiu interveno pri la itala afero, la sola en kiu aperis Lenino dum la dek kvin tagoj, kiujn daŭris la kongreso, mi nur povis konstati la malriĉecon de liaj rimedoj, lian senruzan ironion (li mokis Lazzari-on, defendanto de Serrati, simiis liajn italajn vortojn kaj prononcon, kaŭzante la ridojn de servema aŭskultantaro) kaj la aŭtoritatan karakteron de liaj deklaroj. Lenino ne havigis la plej etan originalan argumenton, sed ja proponis la ultimaton: ĉu Serrati kaj ties amikoj submetis sin al la kondiĉoj, kiujn oni al ili altrudis, aŭ ili estis forpelotaj de la komunista Internacio.

Se mia unua impreso ne estis favora, la dua estis eĉ malpli. Dum pli ol du monatoj mi tre aktive okupiĝis pri la sorto kaj liberigo de dek kvar kamaradoj[15], kiuj estis je ilia dekunua tago de malsatstriko en la malliberejo de Butirki, kaj fine mi povis, per senespera penado, treni aliajn delegitojn por la Kongreso de la ruĝa Sindikata Internacio en grandegan klopodon antaŭ la supera estro. Ĝis tiam oni al ni faris perdi la tempon sendante nin de gravulo al alia, ĉiam malakceptante al ni la rajtigon viziti tiujn anarkisindikatistajn kamaradojn, kiujn oni akuzis pri la plej malbonaj malbonfaroj neniam donante al ni la plej malgrandan pruvon pri ilia kulpeco. Rakonti ĉiujn tiujn klopodojn estus tro longa. Sed estas taŭge klarigi, ke mi sukcesis kaŝeniri en la malliberejon, ke intervidiĝis kun niaj

15 Inter la plej kapablaj el la rusa anarkiistaro.

kamaradoj kaj havis longan interparoladon kun Volin, kiu admirinde parolis la francan kaj refutis ĉiujn kalumniojn (interligiteco kun la blankaj generaloj, amasbuĉo de soldatoj de la ruĝa armeo, elreligoj de trajnoj transportantaj sovetiajn trupojn, ktp.), kiujn Ĉeka (polico de ŝtato) ĵetis sur lin.

Ĉi-foje ni estis deciditaj atingi nian celon. Kaj ni iris al la Kremlo por vidi la novan caron, kiu estis enfermita inter ĝiaj muroj. Estis anoj el ok aŭ dek delegitaroj: hispana -en kiu mi membris-, franca, angla, itala (de la Itala Sindikata Unuiĝo), germana R.P.D., kanada I.W.W., ktp. Kaj kiam la gvardikorpuso gardanta la enirejon de la Kremlo petis niaflanke kaj telefone al la kamarado Lenino akordigi intervidiĝon, ĉi tiu, komprenante la malbonan impreson, kiu kaŭzus rifuzon, akceptis.

Sed, alveninte antaŭ ia granda konstruaĵo, kie li loĝis, ni renkontis novan gvardian taĉmenton, kiu siavice rifuzis lasi nin pasi. Unu el ni skribis, en la franca, noton insistantan pri la intervidiĝo. Lenino respondis per alia noto tekstanta, ke la taskoj de la Revolucio al li ne permesis ricevi nin. Nova noto el nia parto. Finfine, favora respondo. Kaj jen ni ĉi tie sur la unua etaĝo de la konstruaĵo, en ia enirejo, kie staris tri pordoj. Ni atendis kelkajn minutojn kaj aperis Lenino.

Mi ne povas, pro manko de tempo kaj spaco, detale rakonti tion, kio estis ĉi tiu intervidiĝo. Ni diru tion, kio al ni ŝajnas pli karakteriza.

Unue, en la enirejo mem, Lenino al ni premis unu post alia la manon longe retenante ĝin kaj, ankaŭ longe, fikse rigardis nin per konfuziga senhonto. Li al ni demandis nian nomon, de kiu lando ni venis, de kiu delegitaro ni formis parton, ktp. Iom poste, ni sidiĝis ĉirkaŭ granda ortangula tablo kaj Tom Mann, angla delegito kaj la plej elstara gravulo el nia grupo, eldiris al Lenino la celon de nia

klopodo. Lenino lin respondis en la angla, poste al ni alparolis en sufiĉe mezkvalita franca.

Li tuj komencis dirante al ni, ke la rusaj anarkiistoj ne estis kiel la anarkiistoj de Okcidento, sed malamikoj de la revolucio, perfiduloj, kiuj deklaris sin por la milito flanke de la aliancanoj, kio estis mensogo, sed al li donis la «moralan rajton» persekuti ĉiujn kontraŭbolŝevikajn anarkiistojn[16]. Poste li ĵetis sur niajn enprizonigitajn kamaradojn la eternajn akuzojn.

Mi lin interrompis, kiam li ŝarĝis Volin-on per la plej malbonaj malbonfaroj. Klare, firme, mi diris al li, kion mi sciis pri la veraj aktivecoj de nia kamarado, nigra besto de ĉiuj liaj persekutantoj. Mi parolis per preciza maniero, martelante miajn vortojn, priskribante preskaŭ tago-post-tago la aktivecojn de nia kamarado. Lenino, kiu, kiam la aliaj parolis, kutimis rigardi la plafonon ironie ridetante ne aŭskultante kion oni al li diris, momente restis embarasita. Poste, serĉante la manieron eliri el sia embaraso, li parolis pri la kontraŭrevoluciuloj, kiuj estis ĝis tiam revoluciuloj, pri la defendo de la ŝtato («la ŝtato estas maŝino pri kiu ni estas respondecaj kaj ni devas protekti ĝin kontraŭ kiuj ĝin atakas»), pri la revolucia realismo («Volin estas tre inteligenta kaj, ĝuste pro tio, ni ne povas lasi lin propagandi kontraŭ ni»), reparolis pri la elreligoj de trajnoj, la ruĝaj soldatoj buĉitaj, akuzis Maĥno-n fari monstraĵojn en Ukrainujo kaj kunigis Volin-on kun Machno. Ĉiu diskuto iĝis senutila, des pli ĉar mi estis la sola malkonfirmi mian interparolanton.

16 Malatesta, Luigi Fabbri, Sebastian Faure, Rudolf Rocker, Bertoni, Emma Goldman, A. Berkman, inter la plej konataj, Pierre Ramus, Volin kaj aliaj luktis en la milito kaj estis malamikoj de la bolŝevikismo.

Ĉar dum la tuta dialogo la aliaj delegitoj silentis. Ili havis siajn validajn kialojn[17]. Poste la konversacio iom ŝanĝis la temon kaj oni petis al Lenino la rajton por ĉiuj revoluciuloj vorte kaj skribe diskonigi iliajn ideojn. Malakcepto de Lenino, kiu nur akceptas interveni por la dek kvar strikantoj de la malliberejo de Butirki, sed (kaj ĉi tio modeste dirite) ke li povas decidi nenion per si mem, ĉar estis la plimulto de la Politika Buroo, kiu devis decidi.

Ni sciis, ke estis li, kiu faris la leĝon en ĉi tiu organo, tiam konsistigita de li mem, Trockij, Zinovjev, Buĥarin kaj Kamenev. Sed oni devis akcepti tiun komedion kaj mi mem skribis noton per kiu ni komisiis «al la kamarado Lenino» prezenti nian postulon al la kamaradoj de la Politika Buroo. La konversacio ankoraŭ iomete daŭris kaj ni foriris. La respondo sekvatage venis al la ĉambro de la franca delegito Sirolle. Ĝi estis subskribita de Trockij kaj al ni rifuzis la liberigon de niaj kamaradoj; oni nur akceptis la jenon: elpeli ilin el Rusujo aŭ nenio. Ni nepre devis akcepti. Kaj tiel estis, kiel nia kamarado Volin revenis en Okcidenton, kie li antaŭe rifuĝis sub la carismo kaj de kie li deiris por reveni en Rusujon de post la revolucio de februaro.

La impreso, kiun al mi kaŭzis Lenino estis tiu de absoluta nesentemeco. Li rigardis la homojn, kiel aĉetanto rigardas la brutaron en foiro aŭ, kiel inĝeniero scivolanta kion li povas ricevi de nova maŝino. Nenio de simpatio, de spegulo de la animo sur ĉi tiu fizionomio pli sarkasma ol kora. El ĉiuj homoj, kiujn mi konis tiam, li estis la malplej kapabla je humaneco. Veras, ke mi ne havis la okazon koni Stalinon…

***

17 Sirolle, franca liberecana delegito, reveninte al Parizo, respondis kamaradojn, kiuj al li riproĉis ne interveni dum tiu diskutado: «Kion vi volas?, oni devas prizorgi la kolon».

Lenino estis la absoluta mastro en Rusujo. «Ni havas eĉ ne burĝan respublikon, ni havas absolutan monarkion», diris al mi Simon Steinberg, sekretario de la revolucia socialista partio de maldekstro, kiun mi kaŝe vizitis en la ĉambreto, kie li ankaŭ kaŝe loĝis. Kaj estis vero. Kiam oni formulis peton de subpremaj disponoj kontraŭ membro de la centra Komitato de la partio, oni decidis per plimulto kaj malplimulto kion oni devis fari. Sed Lenino arestigis tiun, kiun li volis, kiam volis, petante permeson al neniu. Li havis en la oficejoj de la diversaj ministroj - Ĉiĉerin, Lunaĉarskij, Trockij mem- siajn konfidulojn, kiuj lin informis pri ĉio, kio okazis en ili aŭ kion tie oni diris. Ĉar li havis en siaj manoj Ĉeka-on. Ĉeka, kies nomo resonis tiel fatale, kiel tiu de la Gestapo, kiu efektivigis absolutan diktatoradon sur la tuta Rusujo, kiu arestis, enprizonigis, ekzilis, torturis, mortigis tiun, kiun ĝi volis, sen la devo raporti pri siaj agoj, kiu eĉ elpensis novajn rimedojn de torturo[18]. La jugoslava verkisto kaj instruisto Mihailovitch malkaŝis, antaŭ ĉirkaŭ tri jaroj, ke kiam Odeso estis reokupita de la ruĝa armeo, tridek mil personoj estis mortpafitaj. Tion mi jam sciis en 1921 kaj nur estis unu fakto inter multaj aliaj. Ĉeka (anstataŭita de KPIA, de ŜPD, de MIA[19] kaj de, mi ne scias, kiu alia nuntempa polica institucio) organizis la unuajn koncentrejojn de Eŭropo. En 1921 estis jam miloj da personoj enfermitaj en koncentrejoj, kiujn oni nomis «izolantaj». Ili ne estis malpli teruraj ol la hitleraj kampoj.

18 Inter ili, la «leterkestoj». La leterkestoj estis malgrandaj ĉambroj, tegitaj de korko, kiuj estis perfekte fermitaj kaj ne enlasis la aeron. Ĉi tie oni enfermis la viron aŭ virinon dum certa nombro da horoj kaj eltiris lin en tia stato, ke li subskribis ĉiujn akuzojn, kiujn oni al ili postulis.

19 Noto el tradukinto: KPIA - Народный комиссариат внутренних дел, ruse, Komisararo de la Popolo por Internaj Aferoj de Sovetio; ŜPD - Государственное политическое управление, ruse, Ŝtata Politika Direktantaro; MIA - Министерство внутренних дел, ruse, Ministrejo pri Internaj Aferoj.

Ĉeka mem persekutis, enprizonigis kaj mortigis la membrojn de ĉiuj aliaj revoluciaj partioj. Estas tiel, kiel Maria Spiridinova, juna heroino, kiu eliris el la siberiaj malliberejoj, kiam disfaliĝis la carismo kaj iĝis la estro de la revoluciaj socialistoj de maldekstro, tre baldaŭ ree estis en malliberejo kaj tie mortis.

Ĉion tion sciis Lenino, toleris tion por disponi forton, kiu lin blinde obeis. Kaj kiam Rene Marchand proponis al Trockij, al Buĥarin, al aliaj altaj gravuloj, ke oni reguligu la aktivecojn de Ĉeka por ke ĝi ne daŭre disponu plenan permeson, kiu al ĝi rajtigas fari ĉion, kio al ĝi plaĉas, tiuj akompanantoj de Lenino akceptis, sed Lenino ĵetis la projekton en la paperkorbon.

* * *

La tiraneco de Lenino ne estis nova. Ni ne povas ĉi tie fari historion, eĉ mallongan, pri liaj aktivecoj en la kerno de la rusa socialdemokrata partio, kie la lukto de frakcioj gvidita de li kaŭzis, ke ofte li estis komparita de Pleĥanov, fondinto de la rusa marksismo, kun Robespiero, des pli kiam post la kongreso de 1903, skribis Trockij al Axelrod, alia membro de la rusa socialdemokratio, ke pro homoj, kiel Lenino «la aparato de la partio anstataŭis la partion, poste la centra Komitato anstataŭis la aparaton, kaj finfine la diktatoro anstataŭis la centran Komitaton mem''. La «demokratia centralizismo» de Lenino fakte estis la egocentralizismo[20].

* * *

La laŭdantoj, kiuj abundas por la venkintoj kaj, kiuj plejparte farus la laŭdon de la venkintoj de la kontraŭa tendaro se la vento blovintus alidirekte, tre facilanime parolis kaj ankoraŭ parolas pri la «genio de Lenino». Mi jam

20 Vidu la informon de la siberia delegitaro, skribita de Trockij kaj ĵus eldonita de la kolekto Spartacus.

diris, ke pro tio, kion vidis, mi al mi formulis la demandon dum mia restado en Rusujo, de junio al oktobro-novembro 1921. Kaj antaŭ longe mi respondis nee. Pri tio cetere mi ne estas sola.

La kialoj de la triumfo de Lenino ne dependas de la escepta kvalito de lia penso, de lia kreanta spirito, sed de la furioza povvolo, kiu ĉiam lin regis kaj de lia absoluta senmoraleco pri la uzotaj rimedoj por atingi ĝin. Oni povas paroli pri la genio de la manovro, pri la genio de la artifiko (ĉi tie aperas la mensa strukturo de la «advokato de vilaĝeto»), pri la genio de la mensogo kaj la falsaj teorioj. Estis en la kerno de la rusa socialdemokrata partio aliaj tiel inteligentaj homoj, kiel Lenino: Pleĥanov, Martov, Trockij, Axelrod lin egalvaloris, sed ili ne havis lian falseman kaj artifikeman kapablecon. Inter la revoluciaj socialistoj de maldekstro kaj dekstro, Tchernov, Tseretelli, kaj sendube Maria Spiridinova ankaŭ lin egalvaloris. Per kio Lenino superis ilin, krom la povambicio kaj la politika cinikeco, kiu pravigis sin mem nome de la necesa diktatorado en la revolucio?

Kunigu homojn, kiuj penadas por komuna celo. La sukceso de la entrepreno devas esti la frukto de iliaj kunaj penadoj. Sed unu el ili, rompante la neklare aŭ klare esprimitan interkonsenton, kiu komence ilin kunigis, ilin faligas en kaptilon, kiun ili ne atendis, kaj li ilin ĵetas en la abismon, deturnante la tutan aron de la klopodita celo. Ĉu estos tio trajto de genio? Ĉu pro tio li estos supera al tiuj, kiujn perfidis? Neniel. Tio estos pruvo de mallojaleco kaj tiuj, kiuj aplaŭdis tian venkinton, estas frenezuloj, blinduloj aŭ iaj friponoj.

Tiele iuj pravigas la ŝtatrenverson (ĉar ne estis vera revolucio) de oktobro 1917, riproĉante al la aliaj partioj, ĉefe al la revoluciaj socialistoj (kiuj poste atingis la 50 procenton de la voĉdonoj en la balotadoj por la konstitucia Asembleo,

dum ke, eĉ posedante la povon, la bolŝevikoj nur atingis la 25 procenton), ilian mankon de revolucia aŭdaco[21]. El ĉi tiu vidpunkto, veras, ke Lenino majstre ekspluatis la situacion. Sed de oktobro 1917 ĝis februaro 1918, kiam okazis la balotadoj por tiu Asembleo, nur pasis tri monatoj. Kaj dum ĉi tiuj tri monatoj la laboristoj okupis la plej grandan parton de la fabrikoj, manlaborejoj kaj aliaj institucioj de produktado, la kamparanoj okupis la teron, nova sociala kaj grandparte socialisma reĝimo estis tuj naskiĝonta. La disvolviĝo de la kurantaj realigoj ne kondukis al la restarigo de la carismo, nek al reala superregado de la kapitalismo. La franca konstitucia Asembleo prenis pli ol du jarojn por plenumi sian verkon, kial riproĉi al tiu de Rusujo ne tuje plenumi la ĝian?

La «genio» de Lenino ree baziĝis sur la manovro. Li sciis, kaj sendube ne estis la sola, resumi per kelkaj frapantaj frapfrazoj la gravajn faktojn okazintajn dum la periodo de Kerenski. La grandega plimulto de la soldatoj, de kamparana origino, estis lacaj de la milito kaj volis reveni en sian teron, kiun la kamparanoj restantaj en la postmilitfronto alproprigis kaj disdonis al si: tial la formulo ĵetita de la bolŝevikoj pri «Tuja paco, sen aneksaĵoj kaj kontribucioj!». La sovetoj -al kiuj Lenino nur atribuis malmultan gravecon dum la Revolucio de 1905- multiĝis sur la rusa teritorio kaj estis la spontanea esprimo de la loka popola demokratio. Lenino kaj la bolŝevikoj ĵetis la formulon de «La tuta povo al la Sovetoj!» (ne al la bolŝevikoj, ni rememoru ĝin bone). La kamparanoj ekspropriga dis la bienulojn. Lenino kaj ties sampartianoj proklamis: «La tero por kiuj prilaboras ĝin!»[22].

21 El 715 parlamentaj seĝoj, la revoluciaj socialistoj atingis 412, la bolŝevikoj 158. La plimulto de la Asembleo do estis inklina al la socialistaj solvoj.

22 Ni rimarku, ke la bolŝevikoj tiam ne havis terkulturan programon. Ilia tendenco (simila al tiu de la revoluciaj socialistoj) estis la ŝtatigo fare de la ŝtato; la menĉevikoj, kun Pleĥanov, defendis la «municipigon» de la teroj. Sed la kamparanoj al si disdonis la grandajn bienojn; tiam, por ne ĉagreni kaj altiri ilin, la bolŝevikoj adoptis la neŭtran formulon «La tero por kiuj

La universala voĉo petis la kunvokon de konstitucia Asembleo, kiu, kolektinte la esprimitajn dezirojn, starigos la ĝeneralajn bazojn de la nova Rusujo. Kaj la bolŝevikoj ankaŭ faris kampanjon por la rapida kunvoko de la konstitucia Asembleo.

Politika oportunismo lerta, genia, se oni volas, sed se ĝi nur konsistas el ruzeco, perfido, ĉu estas vere genia?

Ni diris oportunismon. Ni aldonu, ke ĝi estas multvizaĝa. Estus interese montri ĉiujn kontraŭdirojn de Lenino, lia maniero samtempe subteni la plej kontraŭdirajn tezojn laŭ li parolas en kongreso aŭ en la Centra Komitato, laŭ liaj tiumomentaj interparolantoj, laŭ la situacioj.

Tiel, monaton antaŭ la ŝtatrenverso de oktobro, Lenino skribis broŝuron titolitan *Ĉu povos la komunistoj konservi la povon?*, kiu verŝajne estis rezervita al la membroj de la partio laŭ kutima praktiko. Kaj samtempe, ke li faris kampanjon por la kunvoko de la konstitucia Asembleo, kio logike enhavis la respekton de la popola volo, samtempe, ke li proklamis: «La tuta povo al la Sovetoj!»[23], kio signifis, ke la povo estus dissolvita inter la plimulto de la rusa popolo kaj ne restus en manoj de la sola partio komunista, li prognozis por siaj amikoj, ke la komunistoj povus konservi la povon, dirante, ke la partio -kiu ses monatoj antaŭe nombris 20.000 aliĝantojn kaj, kiu, laŭ li, nombris en oktobro 240.000- povus, per tiuj 240.000 membroj, kies ega plimulto venis en la bolŝevikismon sciante nenion pri Markso, la marksismo, eĉ la leninismo, ke la 240.000 aliĝantoj, ni diras, povus tre bone anstataŭi la 130.000 bienulojn, kiuj regis Rusujon antaŭ la disfalo de la carismo.

---

prilaboras ĝin!», kio signifis la rekonon de la multiĝo de la malgrandaj terposedaĵoj. Oportunismo, ĉiam.

23 Tutcerte Lenino kalkulis, ke poste estus pli facile forpreni la povon de la Sovetoj ol de revolucia socialista registaro.

Tio estis trompiĝi per liaj propraj sofismoj kaj fari krudan kaj stultan karikaturon pri la realo. Ĉar antaŭ ĉio Rusujo ne estis regita de 130.000 bienuloj, sed krom ankaŭ ĉi tiuj lastaj, de aparato de nacia ŝtato, kiu nombris 250.000 profesiajn funkciulojn, kaj ankaŭ de la lokaj kaj regionaj administracioj, la «zemstvo»-j (provincaj asembleoj), de la tuta ekonomia aparato en manoj de la kapitalistoj kaj de la teknikistoj de la kapitalismo -pri kio Lenino parolis en la 11a kongreso de la komunista partio-, de la tuta komerca aparato kaj de la ŝtatigitaj industrioj, kiuj havis tiel grandan gravecon. Pro tia limigita vidado de la aferoj, oni restas mirfrapita legante kelkajn komentariistojn, kiam ili asertas, ke Lenino montriĝis eksterordinara pro sia kapablo analizi diversajn situaciojn.

Estu kiel ajn, ni vidas, ke li planis konservi la povon... post ĝia preno per maniero aŭ alia. Ĉi tio signifis, foje konkerita la povo, la diktatoradon fare de kerno de profesiaj revoluciuloj, de tute elprovitaj bolŝevikoj, kaj konsekvence centralizon, kiu, pro necesoj de la kaŭzo, nomiĝos demokratia.

Sed samtempe, ke li skribis tiun broŝuron (septembron 1917), Lenino verkis sian libron titolitan *La ŝtato kaj la Revolucio*, en kiu, bazante sin sur tiaj kaj kiaj skribaĵoj de Markso kaj Engelso, proklamis sin, kiel malamikon de la ŝtato kaj alproprigis al si la engelsan formulon: «Dum la ŝtato ekzistas ne estos libereco; kiam la libereco estos starigita, la ŝtato estos malaperinta». Kaj li asertis sian konformecon de principoj kun la anarkiistoj koncerne la necesan malaperon de tiu ŝtato. Li nur riproĉis al ili (kiel faris Markso al Bakunin kaj ties amikoj) voli iri tro rapide, meti la ĉaron antaŭ la bovoj.

* * *

Tamen, Lenino diras: «For la ŝtato!» sed temas pri la kapitalisma ŝtato. Anstataŭ ĝi oni establos ŝtaton konsistigitan de «la laboristoj armitaj». Li aldonas, ke ĉiuj civitanoj iĝos «salajrataj oficistoj de la ŝtato konsistigita “de la laboristoj armitaj”»; ĉiuj civitanoj, li aldonas, iĝas dungitoj kaj laboristoj «de sola ‘kartelo’ de la tuta popolo, de la ŝtato». Ĉio baziĝas atingi, ke ili laboru laŭ egala proporcio, ekzakte observu la mezuron de laboro kaj ricevu laŭ proporcio. Ĉu laŭ proporcio de kio? Ni ne ĝin scias.

Kiu povas kompreni ion el tiu nekompreneblaĵo? Ĉar finfine, kiu konsistigos la ŝtaton? Kio signifas tiun «solan kartelon de la tuta popolo, de la ŝtato»? Ĉu la ŝtato estus konsistigita de la 150 milionoj da loĝantoj, kiujn nombris Rusujo? Se ĉiuj civitanoj iĝas laboristoj kaj oficistoj de sola kartelo de la popolo, ĉu la civitanoj tiam ne estos la popolo?

En ĉiuj liaj prognozoj, eĉ tiuj, per kiuj li anoncis, ke danke al la komunismo estos la eblo konsumi sen limigo kaj la neniigo de la ŝtato, kiu estos la konsekvenco de la komunismo, Lenino ĉiam prezentas la ŝtaton, kiel organizon de demokratia lukto de la popolaj amasoj, kiel la simplan «organizon de la homamasoj armitaj». En la miksaĵo el liaj teoriaj konsideroj, estas multaj ripetoj, kiuj kelkfoje eĉ ŝajnas deveni de anarkiisma spirito. Tio estas ĉar Lenino volis ŝtaton ĉe kies kapo oni povis meti laboristojn, kiuj alkutimiĝos direkti ĝin, «kiel oni direktas fabrikon».

Ke oni pardonu, se volas, la krudecon de nia juĝo: tia aserto estas granda stultaĵo. Kompari la direkton de fabriko kun tiu de ŝtato estas ne scii tion, kio estas ŝtato, kun la grandega komplekseco de ties aktivecoj; tie ree al ni aperas la nekompetenteco de Lenino, kiam li prognozis, ke la 240.000 komunistoj, el kiuj nur eta malplimulto havas iun ideon pri la aperontaj problemoj, povos solvi tiajn problemojn. Same ne povas surprizi lia konfeso en la 11a

kongreso de la komunista partio, marton 1922: «Eble nia aparato estas netaŭga, sed oni diras, ke la unua elpensita vapormaŝino estis ankaŭ netaŭga kaj eĉ oni ignoras se ĝi funkciis. Tio **ne estas la esenco**[24]. Tio esenca estas, ke la maŝino estis elpensita».

Kaj la sofisto, la ruza advokato insistas: «la unua vapormaŝino, pro sia formo, estis neuzebla! Kio gravas! Danke al tio ni nun havas la lokomotivon. Nia aparato de ŝtato estas sincere netaŭga. Kio gravas! Ĝi estis kreita kaj estas grandega historia elpensaĵo; ŝtato de proleta tipo estis kreita. Jen la grandaj konkeroj, kiujn ni akiris kaj, kiuj ne povas esti al ni forprenitaj. Sed por ni, reprezentantoj de la komunista partio, ĉi tio signifas nur malfermi la pordon. Nun la tasko, kiu al ni aperas, estas meti la fundamentojn de la socialisma ekonomio. Ĉu oni faris tion? Nu, tio ne estis farita. Ni ankoraŭ ne havas la socialismajn fundamentojn. Tiuj el la komunistoj, kiuj imagis, ke tiaj fundamentoj jam ekzistas, faras tre grandan eraron».

Ĉi tiuj vortoj estis eldiritaj kvar jarojn kaj duonon post kiam Lenino faris la antaŭvidojn, kiujn ni konas. Iom poste, li skribos en siaj notoj, ke la aferoj estas abomenindaj koncerne la ŝtaton, ke la bolŝevikoj reprenis la caran ŝtaton kaj simple farbis ĝin per mantelo de socialisma glazuro. Sed ĉiuj iliaj akrobataĵoj ne al ĝi permesis la plej malgrandan restarigon.

* * *

Same okazis en la ekonomia kampo. Relegu la finan alineon de la deklaroj de la 11a kongreso: la fundamentoj de la socialismo ankoraŭ ne ekzistas... Iuj serĉus pretekstojn tiajn, kiel la enlanda milito, kiun ni ne forgesas. Sed la sekva deklaro farita de Lenino en tiu sama kongreso de 1922, montras, ke estis tie aliaj multe pli gravaj kaŭzoj: «La ideo

24 NeT: Substrekita de la aŭtoro

konstrui komunisman socion nur per komunistoj estas infanismo, pura infanismo. Oni devas konfidi la ekonomian konstruon al aliaj, al la burĝaro, kiu estas pli kulturita, al la intelektuloj el la kampo de la burĝaro. Ni mem ankoraŭ ne estas kulturitaj por tio».

Tamen, antaŭ oktobro 1917, Lenino asertis, ke la socialismo estos starigita post ses monatoj. Tiel, la tuta politiko de la rusa komunista partio baziĝis sur antaŭvidoj, kiujn la sperto malkonfirmis. Antaŭvidoj kaj promesoj estis bloke reĝustigitaj sen timo al la kontraŭdiroj.

Sed krom la eraroj, kiuj devenis de la ega nescio de Lenino kaj ties sampartianoj pri la problemoj de organizo de socio[25], estis tiu volo preni kaj ĉiakoste konservi la povon, eĉ la duobla, triobla aŭ kvarobla ludo. Kaj ĉio tio sen honto, sen timo al la pli gravaj kaj malmoralaj kontraŭdiroj. Ĉar ĉiuj kontraŭuloj, eĉ la revoluciuloj, estis detruitaj kaj neniu povis protesti.

Tiel, la «paco sen aneksaĵoj kaj kontribucioj», kies proklamo kunvenas en Petrogrado kaj Moskvo sufiĉa parto de soldatoj kaj la maristoj de Kronŝtadt por sekurigi la triumfon de la bolŝevikoj, iĝas akcepto de la traktato de Brest-Litovsk, kiu transdonis al la germana kaj aŭstra imperioj Ukrainujon, Krimeon, Kaŭkazon, bonan parton de Pollando kaj la provincojn de la Nordo. Ĉi tiu transdono, kiun kontraŭstaris la plimulto de la centra Komitato de la komunista partio, sed ke Lenino, kiu restis sola, altrudis kontraŭ ĉiuj, estis unu el la kaŭzoj de rompo inter la komunistoj kaj la revoluciaj socialistoj, kiujn Lenino, por senkreditigi ilin, kompreneble akuzis pri perfido favore al la aliancanoj.

25 Tutcerte Lenino pensis, kune kun Markso, ke oni ne devis okupi sin pri la «receptoj por la marmitoj de la estonta socio».

Ankaŭ estis perfido pri la falsaj promesoj koncerne la frapfrazon: «La tuta povo al la Sovetoj!», ĉar la povon ne kaptis la Sovetoj, sed la komunista partio, kiu centralizis kaj tute akaparis ĝin. Veras, ke la Sovetoj nominale daŭre ekzistis kaj ankaŭ, kiel supera ironio, ke oni starigis la reĝimon de senbrida diktatorado de la komunista partio, kiun oni ĉiam nomas Respubliko de la Sovetoj. Sed fakte nur restis la karikaturo de la Sovetoj, submetitaj al la ferpugno de la lokaj sekcioj de la komunista partio, apogitaj de la subpremfortoj, kiuj dekomence ilin subjugis, neebligante ilin funkcii, malpermesante, malakceptante, subpremante ilin per la pli trompaj akuzoj: voĉdonaj eksterregulaĵoj, malkapableco, malversacioj, ĉio taŭgis por tio[26]. La tutlanda registaro de la Sovetoj estis fakte efektivigita de la membroj de la centra Komitato de la partio; super la centra Komitato estis la Politika Buroo kaj, kiel ni jam diris, en la kerno de la Politika Buroo, Lenino altrudis sian volon.

* * *

Sed samtempe okazis aliaj arbitraj malaperigoj. Grandega kooperativa movado, naskiĝinta antaŭ la Revolucio, disvolviĝis de post la disfalo de la carismo, ĉefe en la kamparo, kie estis la plej grava konstrua realigo. Fondiĝis Federacioj de kooperativoj, kiuj kovris vastajn zonojn de Kaŭkazo aŭ Turkestan en la malproksima Siberio, sen tio, ke la registaro povis submeti ilin al sia volo pro ilia

26 Jen cetere kiu estis la doktrino diskonigita de Lenino post la kongreso okazinta en Stokholmo fare de la socialdemokrata partio en kiu, en 1906, oni diskutis pri la sovetoj aperintaj antaŭ jaro en Rusujo: «La partio neniam rezignis sian intencon uzi certajn organizojn, kiuj al li estis fremdaj tiaj, kiel la sovetoj, por pligrandigi la influon de la socialdemokratoj sur la laborista klaso. Samtempe la socialdemokrataj organizoj devas rememori, ke se la socialdemokrata laboro estas organizita, kiel konvenas, laŭ ampleksa maniero inter la homamasoj, tiaj institucioj povas praktike iĝi superfluaj».

granda potenco en la superregado de la ekonomiaj aktivecoj.

Tiam, neatendite, Lenino decidis la nuligon de tiuj kooperativoj, bazitaj sur la propra-vola asocio de iliaj membroj, kiel postulas la vera kunlaborado, kaj anstataŭigis ilin per la kooperativoj de la ŝtato metitaj en manojn de nekompetenta kaj parazita burokrataro. La konsekvencoj de ĉi tiu dispono estis la detruo de gravegaj organizaj fortoj, la nuligo de strukturoj de terkultura produktado kaj disdono, kaj la malapero de funkciaj rimedoj de interŝanĝo inter la urbo kaj la kamparo.

Sovetoj... Kooperativoj... Ĉu la sindikatoj, kiuj konsistigas la trian kolonon de la nova ekonomio? Ankaŭ ne povis toleri ilin Lenino, kiel aŭtonomajn instituciojn, kiuj havas siajn proprajn principojn, siajn proprajn metodojn de organizo kaj agado. Unue, ĉar la sindikatoj estis kreo de la laboristoj kaj Lenino, obsedita de sia malplimulta diktatora koncepto pri la revolucio, de la unuflanka superregado de la socialdemokrata partio -la komunista partio estis kreita poste-, ne povis akcepti, ke konstruanta revolucia forto fremda al la lia agadis ekster la imperativaj ordonoj de la partio de kiu li estis la estro kaj esperis daŭre esti. Krome, ĉar li estis intelektulo, kiel la grandega plimulto el la partiestroj ĉefe de la bolŝevika frakcio, donis neniun valoron, neniun gravecon al tio, kion povis fari la laboristoj mem. Ĉi-rilate li esprimis sin sen ĉirkaŭfrazoj en la sekvaj linioj:

«Liberigita al si mem, la laborista klaso nur kapablas disvolvi sindikatan konsciencon. La moderna socialisma konscienco nur povas alveni al ĝi el la ekstero... nur povas estiĝi el profunda scienca kono. Portanto de la scienco ne estas la proletaro, sed la burĝa intelektularo. Estas el la cerbo de membroj de ĉi tiu socia klaso, kiel Markso kaj

Engelso, el kie estiĝis la moderna socialismo. La pura kaj simpla sindikatismo signifas la ideologian subordigon de la laboristoj al la burĝaro».

Ke estis parto de vero en tiuj asertoj se ni prenas la aron de la tutmonda sindikatismo, ni akceptas, kvankam ni povas demandi kio restas de la lukto de klasoj kaj de la marksismaj konceptoj; sed tiaj rezonadoj servis kiel pretekstoj al la deviga subordigo de la sindikataj aktivecoj al la komunista partio, eĉ kiam la sindikatismo faris tiom aŭ pli ol la socialdemokrata partio aŭ la komunista partio mem. Dum tiu revolucia periodo, la sindikatismo aŭ pli ĝuste la agado de la rusaj sindikatoj estis socialisma laŭ la ampleksa senco de la vorto: la sindikatoj prenis en siaj manoj la manlaborejojn, la fabrikojn, kaj Rykov, vicprezidanto de la Konsilantaro de la komisaroj de la popolo, povis skribi en la *Narodnoie khoziasistvo* ĉi tiujn signifoplenajn liniojn:

«La tuta laboro pri organizo de la ekonomia vivo de la lando ĝis nun fariĝis (komence 1919) per la rekta partopreno de la sindikatoj kaj la reprezentantoj de la laboristaj amasoj. La sindikatoj kaj la laboristaj konferencoj de fabrikdelegitoj de iuj industriaj branĉoj estis la ĉefaj kaj solaj laboratorioj, kie instruis kaj ankoraŭ instruas sin la servoj de ekonomia organizo de Rusujo».

Do ankaŭ tie estis grandegaj rekonstruaj ebloj. Sed ĝuste ĉar tiuj ebloj estis grandegaj, Lenino ne povis toleri ilin. Ĉar pro lia egocentralizisma koncepto pri superregado de partio, de lia partio, superregita de li, Lenino -post la adopto de ofte kontraŭdiraj teoriaj pozicioj, kiuj farus, ke psikologo demandus sin ĉu ni ne estas antaŭ kazo de skizofrenio-, revenis al la aserto de sola komando, ĉiam inter siaj manoj memkompreneble. Pri ĝis kie povis ampleksi ĉi tiu komando, en la teoria kaj poste en la praktika kampo, ni povas trovi ekzemplon en la libro, kiun li publikigis

antaŭ la revolucio sub la titolo de *Unu paŝo malantaŭen, du antaŭen*.

Sub tiaj kondiĉoj oni komprenos, ke Lenino tiel, kiel ne volis sovetojn, nek verajn kooperativojn, kiuj havis sian propran direktadon, eĉ kunordigita en aro, kiu povintus harmoniigi sin, ankaŭ ne povis akcepti la ekziston de sindikatoj ne submetitaj al la diktatorado de lia partio, t. e., al lia persona diktatorado. Tial Ĉeka intervenis post la ŝtatrenverso de oktobro en la asembleoj de la fabrikoj; tial la laboristoj de la fabrikoj tre frue komencis protesti kontraŭ tiuj enmiksiĝoj; en la industriejoj, ĉefe de Petrogrado kaj Moskvo, estis organizitaj kunvenoj de fabrikdelegitoj, kontraŭ kiuj Ĉeka kaŭzis detruojn ofte efektivigante amasajn arestojn. Ĉi tiu lukto ne nur respondis al la volo de la laboristoj por administri ili mem la fabrikojn, sed ke prezentis ĝeneralan aspekton, kiu koncernis la esencajn principojn de la revolucio kaj la problemon de la libereco. Tiel, fine de decembro 1917, la tutrusa konferenco de la laboristoj de la libro kunveninta en Moskvo adoptis longan rezolucion kontraŭ la persekutado fare de la bolŝevika partio al la gazetaro kaj la rimedoj de propagando skribe, en kiu aperas la du sekvaj alineoj:

«1º) Persekutante la gazetaron, la Konsilantaro de la komisaroj de la popolo senigas al la nacio la solan eblon esti informita pri la agado de la povo kaj ĝi liberiĝas je ĉiu kontrolo kaj respondeco; 2°) La fakto starigi ekskluzivan rajton pri la ĝuado de la gazetarlibero profite de sola partio, de sola grupo aŭ de sola klaso neebligas al la popolo disvolvi ties konojn kaj malutilas la interesojn de la laborista klaso luktanta por la socialismo».

Kompreneble Lenino kaj liaj sampartianoj akuzis la laboristojn de la libro esti kontraŭrevoluciaj menĉevikoj[27]. Des pli kiam grava parto de la laboristaj amasoj samtempe protestis kontraŭ la ĉikanaĵoj, kiujn ili suferis, kaj kontraŭ la fermo de la konstitucia Asembleo, kio signifis la neniigon de ĉiuj aliaj partioj kaj la tutan forigon de la esprimrajto de la penso.

Ni resumu**:** nuligo de la sovetoj, kiel faktoro de administra kreado kaj loka organizo; nuligo de la kooperativoj; nuligo de la sindikataj kaj laboristaj organizoj: kreitaj kaj kreantaj sin; nuligo ankaŭ de la konstitucia Asembleo balotita de la tuta rusa loĝantaro. Ja necesis multa «genio» por ĉi tiu grandega detruverko de la rimedoj, kiujn disponis la revolucio.

En ekonomio, la konsekvenco estis rapidega falado de la produktado. Ĉio paralizis sin, unuflanke, stokoj el tritiko, kiuj malpliiĝis laŭ fulma rapideco en Petrogrado kaj aliaj urboj; aliflanke, la krudmaterialoj daŭre ne alvenis al la fabrikoj de transformo, kio estigis teruran senlaborecon.

«En Petrogrado, 832 industriaj entreprenoj okupis, je januaro 1917, 365.800 laboristojn; je aprilo 1918, la kvanto da dungitoj malpliiĝis al 144.000, t. e., malaltiĝo de la 60 %. En Moskvo kaj ĉirkaŭaĵoj, je aprilo 1918, 36 teksaj manufakturoj, kiuj okupis 130.000 laboristojn kaj 24 fabrikoj de mekanikaj konstruoj, kiuj okupis 120.000 laboristojn, fermis siajn pordojn»[28].

La robotoj de la bolŝevikismo al ni asertas, ripetante la artifikon de siaj mastroj, ke la terura situacio en kiu troviĝis la rusa loĝantaro dum la jaroj 1920-1921 kaj tiu, kiu sekvis, estis la konsekvenco de la enlanda milito kaj ĉefe de la

27 Ni rimarku per kiu facileco Lenino traktis, kiel oportunismulojn, perfidulojn, kontraŭrevoluciulojn, ktp., tiujn, kiuj malkonsentis kun li.

28 *La laboristo de Petrogrado*, 2-an de junio 1918.

blokado de la aliancitaj landoj, post la sabotado de la kontraŭrevoluciuloj, inter kiuj, laŭ la malnobla taktiko de la miksado, Lenino kaj liaj sampartianoj enmetis la menĉevistojn, siajn kunulojn de la antaŭa tago, la revoluciajn socialistojn de maldekstro kaj dekstro kaj ankaŭ la anarkiistojn. Vere oni ne povas nei la konsekvencojn de la enlanda milito, sed tiuj akuzoj kontraŭ la aliaj frakcioj ne estis pli ol mensogoj. La fakto ne voli submeti sin al malplimulta frakcio tute ne signifas**,** ke ĉi tiuj aliaj tendencoj estis konsistigitaj de «perfiduloj» kaj «kontraŭrevoluciuloj», de «likvidantoj» kaj «filistroj». Ni estas alkutimiĝintaj al tiaj akuzoj, kiujn la disĉiploj de Lenino ĉiam ĵetis kaj daŭre ĵetas kontraŭ ni de post 1917, kio kaŭzus, kiel konsekvenco en revolucia situacio, nian ekstermon; ĉi tiu simpla sperto al ni permesas prijuĝi la valoron de la akuzoj ĵetitaj sur la rusajn socialistajn kaj revoluciajn partiojn ne bolŝevikajn.

Ni vidis, kiu estis la konfeso de Lenino rilate la ŝtaton, je marto 1922. Ni ankaŭ vidis, ke Lenino tiam deklaris, ke ĉio devis esti entreprenita danke al la burĝaro kaj la teknikistoj de la burĝaro en la ekonomia kampo, ĉefe pri la ekonomia socialigo.

Tio, kion li ne diris estis, ke la malprogreso en tiu tereno atingis grandojn senfine superajn al tio, kion sugestas la nombroj pri senlaboreco, kiujn ni reproduktis pli supre. Ekzemple, la produktado de malpura ŝtalo en ingotoj, kiu estis de 4.274.000 tunoj en 1916, malaltiĝis al 182.000 tunoj en 1920, al 177 tunoj en 1921, al 255 tunoj en 1922, al 690 tunoj en 1924. Ĉi tiu kapturna malaltiĝo ne nur klariĝas pro la milito ĉar en 1917, post oktobro, 24 el la 65 ekzistantaj fornoj estis aktivaj.

Inter la kaŭzoj de tiu malprogreso oni povas sendube inkluzivi certan pasivan reziston de la laboristoj, kiel protesto kontraŭ la sufokado de la liberoj kaj la starigo de

ĝeneraligita diktatorado. Al ni neeblas klarigi laŭ kiuj proporcioj fariĝis ĉi tiu rezisto, kiun kelkaj homoj de la partio prezentis kiel «sabotadon de la laboristoj». Sed ni ne devas forgesi kion asertis Rykov, unu el la altrangaj gravuloj de la partio, koncerne la rolon de la laboristoj kaj ties sindikatoj, kaj kiu ŝajnas malkonfirmi ĉi tiun alian specon de asertoj .

Oni ankaŭ ne devas forgesi la situacion kreitan por la inĝenieroj kaj diversaj teknikistoj. La letero direktita al Lenino je marto 1919 de inĝeniero, kies tekston reproduktas Prokopovitcz en sia ekonomia historio de USSR, informas al ni pri tio. Jen ĝiaj esencaj fragmentoj:

«Ĉu okazos, ke vi estas ĝis tia ekstremo enfermita en via soleco de la Kremlo, ke vi ne vidas tion, kio estas la vivo en viaj ĉirkaŭaĵoj kaj, ke vi ne rimarkas tion, kio okazas inter la rusaj teknikistoj, certe ne oficialaj komunistoj, sed veraj laboristoj, kiuj akiris siajn teknikajn konojn koste de grandega penado sen tio, ke la kapitalistoj iom intervenis, kaj neniel intence servi la kapitalon? Ili akiris tiujn konojn krude luktante kontraŭ la mortigaj kondiĉoj altruditaj al la studentoj dum la malnova reĝimo. Por ili, tiuj kondiĉoj ne pliboniĝis sub la komunisma registaro».

«Kontraŭ ĉi tiuj aŭtentikaj proletoj, kiuj, malgraŭ la diverseco de siaj sociaj originoj, metis sin je la servo de tiu frato, kiu estas por ili la laboristo, kaj ĉi tio ekde la unuaj gestoj de sia konscia vivo, per la penso, la vorto kaj la ago, kontraŭ ĉi tiuj aŭtentikaj laboristoj, mi diras, ĵetitaj de vi en saman amason de misodoraj «intelektuloj», oni incitis la senkonsciajn komunistojn kaj freŝe varbitajn inter la malnovaj policistoj, la kamparaj komisaroj de polico, la malgrandaj funkciuloj, la vendistoj kiuj, en provinco, ofte konsistigas grandan parton de la «lokaj aŭtoritatoj»[29].

29 Ni vidas, kiel la bolŝevikoj kaj ties supera estro rapide pliigis sian anaron, kiu estis konsistigita de kiuj faris la leĝon en la kamparoj kontraŭ la

«Estas malfacile priskribi al vi la hororon de la humiligoj kaj la suferadoj, kiujn oni al ili trudis. La plej absurdaj denuncoj kaj akuzoj, enketoj sen rezulto, sed ekstreme humiligaj, minacoj esti mortpafitaj, forprenoj kaj konfiskoj, enmiksiĝoj en la plej intimaj aferoj de privata vivo..., tia estas la atmosfero en kiu devis labori multaj teknikistoj elirintaj el la grandaj lernejoj ĝis ĉi tiuj lastaj tempoj».

«Kaj tamen ĉi tiuj «etburĝoj» ne forlasis sian postenon; plenumis la sanktan sindevontigon, kiun prenis sur sin iĝi, koste de ne gravas kiaj oferoj, gardistoj de la kulturo kaj la scio por tiuj, kiuj ilin humiligis kaj insultis pro instigo de siaj estroj. Ili komprenis, ke oni ne povas konfuzi la malfeliĉon kaj la personajn ĉagrenojn kun la kreo de pli bona vivo, kaj tio helpis kaj ankoraŭ helpas ilin elteni ĉion kaj daŭre labori. Sed vi estu certa, ke inter ĉi tiuj homoj, kiujn vi bloke karakterizis kiel burĝojn, kontraŭrevoluciulojn, sabotantojn, ktp, nur ĉar ili havas opinion, kiu diferencas de la via pri la rimedoj realigi la estontan socialisman kaj komunisman reĝimon, vi aĉetos ne unu laŭ la prezo, kiun vi pensas[30]. Se vi volas “uzi” la teknikistojn, ne ilin aĉetu: lernu estimi ilin kiel homoj kaj ne kiel brutaro, kiun vi bezonas de tempo en tempo».

Ĉi tiu letero, ekstraktita laŭ Prokopovitcz de la Kompletaj verkoj de Lenino, helpas nin kompreni la malprogreson de la rusa ekonomio, kaj ankaŭ kial Stalino devis venigi multnombrajn inĝenierojn kaj diversajn teknikistojn de Germanujo kaj Usono dum la jaroj 1924-

kamparanoj kaj la ne leninismaj revoluciuloj. Trockij aligis la militistojn, ne pro konvinko, sed pro profesiismo, al la ekzistanta ŝtata armeo, kiel Tujachevski-on, cara oficiro, aŭ Brusilov-on el la gloroj de la rusa armeo. Nature, la unua el la du metis la tutan sian sciencon kaj teknikon de amasbuĉo por, sub la ordonoj de Trockij, detrui la ribelantojn de Kronŝtadt.

30 Lenino volis allogi la teknikistojn proponante al ili situacion de privilegiuloj. Materiisma interpreto de la historio.

1935 (la abunda senlaboreco en ĉi tiuj du landoj faciligis tiun agon). Ĉar se en 1922 Lenino omaĝis la kapablon de la teknikistoj de la rusa burĝaro, jam ne restis sufiĉa numero de ĉi tiuj lastaj por realigi la taskojn, kiujn oni al ili atribuis.

Ĉu la taskoj? Jes aŭ plej bone la tasko organizi la ekonomion de kiu li estis la ĉefa detruanto. Post la ribelo de Kronŝtadt li komprenis ĝis kia ekstremo necesis reĝustigi la situacion, kaj pro tiu ago multaj komentariistoj al li atribuis refoje geniecon. Sed kio al ni ŝajnas pli karakteriza koncerne la disponojn prenitajn de Lenino, estis, ke anstataŭ mobilizi la laboristojn donante al ili pli da libero de iniciato, lasante al ili disvolvi iliajn organizojn, donante al ĉi tiuj pli da ebloj de kreanta aktiveco, Lenino preferis uzi la teknikistojn de la burĝaro, laŭ siaj propraj vortoj. Ĉar li sciis, ke poste povus, se vivus sufiĉe longe por fari tion, facile forigi tiujn momentajn kunlaborantojn, dum ke al li estus tre malfacile forigi la laboristajn organizojn, kiuj akiris pli da matureco. Li tiam komisiis al la burĝaro «organizi la komunismon», ĉar li ne sciis organizi ĝin eĉ per la helpo de sia partio, siaj sbiroj kaj siaj funkciuloj. Tia estis la kaŭzo de NEP aŭ Nova Ekonomia Politiko. Kaj estas homoj, kiuj ekstaziĝis pro ĉi tiu kontraŭsenco, pro ĉi tiu monumenta malica ago.

Des pli kiam post la revivigo de la entreprenlibero, kiu permesis certan kvanton da malnovaj entreprenistoj aŭ riĉaj kamparanoj, oni devis malfari tiajn privilegiojn, kies aperon kaj reaperon oni kaŭzis. Kaj tio estis la ĉasado de la «kulakoj», la denunco de la kulakoj (Trockij senkompate agadis pri tio), la ekzilo kaj la pereigo de milionoj da kulakoj, da virinoj, da kulakidoj. Nova paĝo de honto kaj malhonoro, kiu alportis nenion de komunismo, ĉar ĝi kreis novan parazitismon kaj kontribuis al tio, kion oni nomas la stalina erao.

La stalina erao! Ĉi tie ni ankaŭ kolizios kontraŭ la robotoj, kontraŭ la intelektaj pupoj de Moskvo. Ĉar ni diras, ke Lenino kaŭzis ĉi tiun eraon de la komenco ĝis la fino. Ĉefe ĉar li pelis antaŭen Stalinon, en kiu li ekvidis sian instrumenton aŭ sian posteulon. Oni neniam sufiĉe diros, ke Stalino eniris en la ĝeneralan sekretariaron de la rusa komunisma partio pro volo de Lenino -kiu lin enirigis en la centran komitaton en 1912-, kiu volis uzi lin por neebligi la supreniron de Trockij, kontraŭ kiu li ĉiam estis en lukto malgraŭ certa kunlaborado[31]. Kaj se Stalino povis preni tiel facile la rimenojn de komando estas, ĉar Lenino tiamaniere centralizis kaj aranĝis la aparaton de subpremo kontraŭ siaj propraj kamaradoj de partio, ke estis tre facile por la georgia diktatoro anstataŭi lin. Ke jaron antaŭ lia morto, rimarkante kion Stalino okazigos, ĉefe ĉar li samtempe ĉiam pli vidis ĝis kia ekstremo la ŝtato iĝis «abomena», li skribis la «testamenton» en kiu avertis kontraŭ la «brutaleco» de sia spirita filo kaj laŭdis, sen multa entuziasmo, la meritojn de Trockij -ni ne pretendas per tio defendi ĉi tiun, kiu estis pli valora ol Lenino ĝis la momento, kiam al li kuniĝis-, tio malpliigas je nenio lian historian respondecon.

Tio ŝanĝas nenion pri la starigo de la stalina reĝimo, kiun li vaste preparis. Do tiuj, kiuj sciis, kiuj scias tion, kio estis la lenina reĝimo, kio en ĝi estis la polica karaktero, la sufokado burokrata, libertmortiga, persekutanta, la organiza nekompetenteco (ĉefe tiu koncernanta la policon), la administra malmoraleco, tiuj, inter kiuj mi estas, diras, ke Stalino elpensis nenion (krom la procezoj de Moskvo), ke esence la tuta stalinismo troviĝis en la leninismo.

Eĉ pli: ĝisfunda studo montrus kiom da psikologiaj similecoj karakterizis la du virojn. En Lenino, la volo de superregado estis ĉiam la ĉefa rimedo de liaj sintenoj, kaj

31 Ĉiam estis opinidiversecoj inter Lenino kaj Trockij, kvankam tiuj kaŝe okazis. Kaj estis Lenino, kiu venkis.

en la polemikoj, en la disputoj, en la teruraj internaj luktoj de la rusa socialdemokrata partio, eĉ antaŭ ol plenumiĝis la rompo inter la bolŝevikisma frakcio kaj tiu, kiun oni nomis menĉevikisma, ĉiuj procedoj -la friponaĵoj, la trompoj, la malobservoj de la donita parolo - estis taŭgaj. Ekde la momento kiam oni malkonsentis kun li, tiu estis kontraŭrevoluciulo kaj malamiko de la proletaro, kaj li deklaris antaŭ tribunalo de la partio, en proceso de morala ordo, kiun al li faris samtempe la menĉevikoj kaj la plimulto de lia bolŝevika frakcio, ke «estas devo detrui, per ĉiuj rimedoj, tiujn, kiuj estas la malamikoj de la proletaro».

Ĉi tiu sinteno, kiun li observis ĉiam, ĉu jam ne estas tiu de la stalinismo? Veras, ke oni ankoraŭ ne estas antaŭ la pereigo de la kamaradoj de partio. Sed ĉi tiu sinteno al ĝi malfermas vojon, ĉar laŭ la ĝusta logiko estas juste kaj necese, ke la perfiduloj estu ekzekutitaj.

Lenino, ni ripetu ĝin, ne tiom faris… Sed li faris konsiderindan paŝon sur tiun vojon per la ekstermo de la maldekstraj kaj dekstraj revoluciaj socialistoj, de la anarkiistoj, de la menĉevikoj, kiuj pri iuj punktoj donis multe pli da garantio pri la praktikoj de socialigo kaj respekto al la libero (al la sindikatoj kaj la sovetoj, ekzemple). Ke la praktiko de tia amasbuĉo poste etendiĝis al la luktoj de frakcioj inter bolŝevikoj, estas nur disvolviĝo de kio antaŭekzistis. Cetere estas tre utile observi, ke estas en la tereno de la praktiko de la ekspropriigoj, kiuj subfosis la socialdemokratan partion kaj kontraŭ kiuj la tuta menĉevika frakcio kaj la plimulto de la bolŝevika frakcio fine manifestis sin, ke Lenino kaj Stalino koincidis kaj interfratiĝis. Lenino principe akceptis rezigni, dum la kongreso de Stokholmo en 1907, ĉi tiun praktikon, kiu malkuraĝigis ĉion kaj al li certigis rimedojn per kiuj li luktadis ne nur kontraŭ la cara reĝimo, sed ankaŭ kontraŭ la aliaj revoluciaj frakcioj. Sed post la akcepto de tia rezigno, li rapidis starigi sekretan organizon

de batalo, kiu daŭrigis la eksproprigojn, kiujn la granda plimulto de la socialdemokratoj denuncis tiel, kiel la plej elstaraj personecoj de la socialista Internacio, kiel Kautsky kaj Rozo Luksemburgio. Kaj estis Stalino, kiun li komisiis estri, ĉefe en Kaŭkazo, tiun sekretan aktivecon. Jen la kialoj de la unuaj kontaktoj, de la unuaj afinecoj inter la du viroj. Lenino poste elektis Stalinon, en la centra Komitato de la socialdemokrata partio (tio okazis en 1912), kaj kiel Stalino akceptis esti propra-vole kvietan instrumenton, Lenino al li skribigis libron pri la problemo de la naciecoj, kiu donis al lia posteulo certan karakteron de teoriisto.

Se oni serĉas kun kiuj aliaj homoj li havis, eĉ en aliaj terenoj, similajn afinecojn al kiuj ekzistis inter Stalino kaj Lenino, mi opinias, ke oni ne ilin povas trovi. Nek Trockij, nek Zinovjev, nek Kamenev, nek Bujarin, nek Martiv, nek Pleĥanov havigas tian gradon de simileco. Pro lia volo ĉiakoste superregi kaj sen tio, ke nenio lin haltigu, Stalino estis la inda posteulo de Lenino. La sola diferenco estis, ke ĉi tiu lasta, multe pli informita pri la socialismaj teorioj, kelkfoje havis kritikajn subitajn timojn, kiuj ne al li neebligis daŭri sur la fatala deklivo en kiu li ĵetiĝis.

AKTIVULO DE NKL EN RUSUJO

VICENTE PÉREZ (Combina)

Dediĉo.

Estas devo de ĉiuj, kiuj luktas, de ĉiuj, kiuj estas ĉekape de la revolucia proletaro rememori la pasintecon, apogeo de la barbarecoj kaj maljustecoj.

Por skribi tiun modestan libron, nur gvidis min deĉifri enigmon por multaj kaj servi la interesojn de la sklavoj antaŭ la tuta demokratia politiko de la bolŝevikoj. Kontraŭ la revolucio de la rusa popolo, neniam, sed kontraŭ ties uzurpantoj, ĉiam.

Ĉi tiun libron mi dediĉas al ĉiuj, kiuj luktis kaj luktas kontraŭ la kapitalista tiraneco kaj kontraŭ la subpremanta sistemo de la Ŝtato.

Justa memoro, plena de emocio kaj sento por ĉiuj, kiuj oferis siajn vivojn sinofere al la libereco kaj la justeco de la Liberecena Komunismo, supera idealeco, kiu plene emancipos la tutan sklavan proletaron.

Ankaŭ memoro por ĉiuj falintoj kaj mortigitoj dum la hispana Respubliko tiel, kiel por ĉiuj, kiuj troviĝas en la sklavkarceroj pro sia defendo de la Liberecana Komunismo. Nenio pli.

Vicente Pérez (Combina)

Barcelono, septembron 1932

Enkonduko.

Ne atendu la leganto trovi en ĉi tiu libro teorian nek doktrineman elmeton pri la komunismaj kredoj. Nur kaj ekskluzive estos konciza, tamen vera, elmeto pri faktoj kaj aferoj viditaj kaj spertitaj –pli spertitaj ol viditaj- dum restado en Rusujo, kiu daŭris ĉirkaŭ tri jarojn kaj duonon.

Neniu hodiaŭ ignoras, ke la rusa proletaro, post kuraĝa luktado ĉe la barikadoj por disfali la despotan kaj malican caran reĝimon, devis poste alfronti ĉiujn imperiajn potencojn, interligitaj por komuna ago, kiuj pretendis per krima blokado definitive detrui la revolucian movadon kaj fortranĉi je ĝiaj komencoj la fortan vivon de tiu nova sistemo. Ili ne atingis sian celon, kvankam semis la mizeron kaj la doloron inter la punata rusa loĝantaro, kruele mortigante per malsato milionojn da estuloj, kies sola krimo estis konkeri sian liberon kaj defendi ĝin kontraŭ ĉiu ebla uzurpo.

Kaj venkis la rusa popolo kontraŭ ĉiuj siaj malamikoj, ĉar en la multiĝo de liberigaj pensoj kaj ideoj, en la diverseco de la kriterioj kaj agoj, ne estas pli ol unu forto, kiam oni luktas por justa, nobla kaj humana afero; okazis, ke la rusa proletaro havis la okulojn fiksaj je tiuj ampleksaj horizontoj, kie ĝi esperis, ke aperos la suno de la Libereco kaj la Justeco, la brila astro, kiu finos kun ĉiuj grandaj maljustecoj; ĉar jam plena la kaliko de amareco en ĝia pasio, jam laca suferi mistraktojn kaj persekutojn, ne nur sur si mem, sed ankaŭ sur la karno de siaj fratoj ekspluatataj en ĉiuj landoj de la Tero, tiel kreskis ĝia fido, ĝis tia ekstremo la IDEO fariĝis karno de ĝia karno, ke antaŭ ol malprogresi ĝi preferintus malaperi de la tersurfaco.

Sed… pasis la jaroj. Indiferenta Kronos daŭrigis sian vojon kaj tio, kio komence ŝajnis proleta triumfo, iĝis kunmiksaĵo el pompaj frazoj, vanaj nomoj, kiuj ne havas praktikan virtualecon. Ŝanĝiĝis la nomoj, sed la situacio de la laboristo ne variis. La elverŝita sango, la amasoj el viktimoj kaŭzitaj de la blanka mitrajlo kaj la malsato, nur donis kiel frukton malĝojan, bedaŭrindan interŝanĝon en la terminaro de la aferoj.

Veras, ke oni faris gravajn progresojn tiel en la teknika kampo, kiel en tiu de la produktado, sed tio, kvankam estas multo, ne estas la idealo por kiu donis sian vivon tiom da milionoj da homoj.

Ĉar jam estas momento, ke oni diru: la rusa Ŝtato trairas termidoran[32] periodon. La homoj, kiuj stariĝis kiel deponprenantoj de la esenco de la revolucio, la mentoroj kaj direktantoj de la nova USSR, kiuj alligis al si mem la reprezentadon kaj la interpreton de la popolaj deziroj, ankoraŭ ebriigitaj de la vino de la granda atingita venko -sed ne atingita de ili, sed de la luktintaj kernoj -, konsideras la laboristajn amasojn de la urboj kaj la kamparo, kiel militan materialon, kiel socian instrumenton, kiun ili povas uzi laŭ sia volo kaj kapriĉo por la celoj, kiujn ili al si proponos.

Pro tio kaj pro la absoluta malesto de demokratio en la Sindikatoj kaj en la interno mem de la Partio, la produktantaj amasoj neniom interesas sin pri la publikaj aferoj, eĉ deklarante sian absolutan malkonsenton kun la agadoj kaj taktikoj de siaj gvidantoj per malrapida, sed senĉesa sabotado en la produktado. Ĉi tiu estas la sola defendarmilo, kiu restas al ili kontraŭ la malestiminda despotismo de la trustoj, administraj organoj de la

32 NeT: periodo de la franca Revolucio konita kiel termidora Konvencio, kiu komenciĝis per la ŝtatrenverso de la 27-a de julio 1794, kiu faligis Robespieron.

produktado, kaj kontraŭ ŜPD, kiu estas la reguliga organo de la politika vivo, kiuj terurigadas la tutan loĝantaron de la lando.

Tiele, lokita Stalino ĉekape de la politika buroo, li povis facile skizi la du kvinjarajn planojn pri nacia industriigo, ne antaŭe konsultante, kiel estis juste kaj demokratie, la laboristan klason, kiu estas la rekte koncernita de la deciditaj disponoj kaj, kiu devas elteni la tutan pezon de la troa penado, kiu reprezentas la planon.

Ree la malsato kaj la mizero kaptas la produktantojn samkiel dum la tempoj de la enlanda milito; alifoje la malbonaŭgura fantomo de la senhavecoj minacas de apude, pli terura ol neniam, la proletajn hejmojn de Rusujo, kies voĉon oni ne volis preni en konsidero por la ellaborado de la ĝeneralaj linioj de la nova plano.

Nur la usonaj teorioj pri taksado trudiĝis. Ĉie aperas la usonismo, la fordismo kaj la raciigo. Sed oni nenie vidas frazon de stimulo por la malsatulo, nek etendiĝas amika mano al la falinto. Ne estas paco por la nekonformulo, nek la nekontentulo povas aŭdigi sin. Vi ĉie nur vidos surstrate, en la manlaborejoj kaj la fabrikoj, grandajn afiŝojn kun surskriboj kiel tiu: “Post dek jaroj ni devas atingi kaj superi Usonon”.

Jen la sola zorgo de la moderna diktatoro. Kio gravas la volo de la homamasoj kaj la krioj de angoro? Li altrudis sian personan volon kaj ve al kiu protestas!. Kiu tion faros, estos arestita, forpelita de la sindikatoj kaj forportita al Siberio, ene de absoluta silento, sen iu defendrimedo kaj sen tio, ke iu kuraĝos eĉ eldiri favoran opinion pri li.

Ĉio tie estas monopolo de la Ŝtato, la papero, la libroj, la ĵurnaloj, la sindikatoj, ktp, ktp. Sekve neniu povas disponi de la bezonaj rimedoj por aŭdigi nek manifesti sin sen la

konsento de la gvidantoj. Diru al mi, legantoj, kion oni povas atendi de lando, kie eĉ la libero estas objekto de monopolo kaj dozado? Kion ni povas diri pri lando, kie la laborista klaso tute malhavas rimedojn por libere manifesti siajn opiniojn kaj ideojn?

Sed tio pli bedaŭrinda el ĉio ĉi estas, ke misprezentante la realon, falsante la faktojn, oni pretendas plenumi intensan propagandon por porrusa glorigo. Ĉar, oni devas klare diri ĝin, la vero pri tio okazanta en Rusujo estas konita de ĉiuj komunistaj gvidantoj de la mondo; ĝin scias la Hispana Komunista Partio kaj scias, eble pli bone, la “Laborista kaj Kamparana Bloko de Katalunujo”. Kial do ili silentas? Kial ili prisilentas la veron de la okazaĵoj? Ili diras, ke havas fidon, ke fidas, ke tre baldaŭ la rusoj faros direktoŝanĝon kaj Stalino rekonos siajn erarojn.

Kiel eraraj estas tiuj, kiuj tion bonfide diras. Ne, ne eblas la direktoŝanĝo nek la rekonado de la misoj. Por ke tiu afero okazu, estus bezona la firma premo de la internacia proletaro favore de la rusa popolo. Dum ĉi tio ne okazas, la proletaro de USSR povos impulsi neniun ŝanĝon en la estraro de la komunista ŝipo, ĉar ĝi estas ligita je piedoj kaj manoj, ĉar ĝi estas buŝumita kaj al ĝi estas neebla aŭdigi sian voĉon.

Oni povis kalkuli dudekojn da verkistoj, kiuj vizitis Rusujon. Multnombraj estas la delegitaroj, kiujn la proletaro ĝemanta sub la humiliga jugo de la kapitalista ekspluatado, sendis en tiun landon kun la sola kaj ekskluziva celo, ke ili transdonu klaran, kategorian kaj detalan informon pri ĉiuj aspektoj de la vivo -mizera aŭ eltenebla-, kiun la proletaro spertas en la sino de la Komunista Rusujo.

Ĉi tiu malfacilega tasko ankoraŭ ne povis efektiviĝi, nek povos, pro du fundamentaj kialoj, kiujn neniel ni povas kaŝi al niaj legantoj. Prisilenti ilin estus perfido al la rusa

proletaro, kiu iutage kredis esti farinta sian Revolucion, kaj krome estus ago de forsilentantoj de la Bolŝevika Partio, kiu fakte estis la strangolanto de la libero. En la paĝoj de ĉi tiu libro, trovos la leganto la pravigon de niaj asertoj kaj detaligitaj la du kialojn pri kiuj ni parolis en la antaŭa alineo.

***

La naŭdek procento de la tuta literaturo publikigita dum ĉi tiuj jaroj havas intense kaj esence partian karakteron. Ĝia celo estis semi la konfuzon en la avangardajn mediojn kaj samtempe esti apogpunkto por efektivigi tendencajn kampanjojn, tute mankajn je bazo kaj destinitajn al la ekskluziva celo dividi la opiniojn por varbi la nekontentulojn cele pliigi la vicojn de la Partio.

Ha! Per kiu simpleco la kredema popolo englutas la eldiraĵojn, kiujn la salajrataj verkistoj al ĝi donas, kiel benitan panon. Kiom facile estas al profesia literaturisto (?) beligi la aferojn, eĉ la plej malestimindajn, kaj rakonti, ke ekzistas paradizoj tie, kie nur estas ruiniĝo kaj morto… Sufiĉis al multaj posedi paperon, plumon kaj inkon kune kun du ĝeneralaj kaj sensence strangaj ideoj pri kio estas la vivo en Rusujo por skribi libron per kiu li ludis ne nur kun la vero kaj la honoro mem, sed kun la digneco kaj la interesoj de la tuta laborista klaso.

Kaj ne estis sincera voĉo, kiu leviĝis kontraŭ tiuj fantazioj. Eĉ ne unu sola el tiuj, kiuj povis, denuncis, ke la verkisto, uzante la literaturan liberon, penadis meti florojn kaj tapiŝojn sur la ŝtonabundan vojon semitan de dornoj. Ĉi tio estas, kion faris la plimulto el kiuj iris al Rusujo, apogitaj de la kulpa silento de kiuj pro unuj aŭ aliaj kialoj prisilentis kion povis diri.

Eblus skribi kaj prezenti realan informon pri la ekonomia kaj politika situacio de la rusa proletaro tiel, kiel

estis kaj estas deziro de la laboristoj de la mondo kaj pri kiu ni parolis en antaŭaj paĝoj, se la delegitoj kaj turistoj, kiuj translokiĝis en la landon de la sovetoj, anstataŭ pasigi la tempon vizitadante la oficialajn oficejojn pri informado, ricevante de tendencaj manoj la statistikojn, kiuj devis servi al ili por ekreklami siajn impresojn, dediĉos sin, puŝataj de la propra iniciato kaj de la strebo scii kaj esti utilaj al la legantoj, certiĝis ĉu la ricevita dokumentaro respondas al la realo;ili enketos kaj konsultos la laborantan popolon kaj starigos rigoran kontrolon inter la opinioj de tiuj de malsupre kaj la informoj de tiuj de supre. Sed, se hazarde al ili venas en la kapon tia ideo, kiel ili ne konas la rusan lingvon, troviĝas en la neebleco rekte komuniki sin, kaj la kontakto kun la laborista kaj produktanta homamaso nur povas ĉi-okaze efektiviĝi per interpretistoj, kiuj per korpo kaj animo apartenas al la Partio, dediĉas paradigi antaŭ ili, kiel kinan bendon, specon de abstrakta Rusujo.

Se verus, ke la vivo en Rusujo onidire disvolviĝas laŭ la normoj de feliĉo kaj bonfarto, kaj se la laborista klaso reale ĝuus ĉion, kio ĝis hieraŭ estis privilegio de la kapitalisma klaso, kial oni ne rajtigas delegitaron el anarkiistoj por ke ĝi translokiĝu tien kun siaj propraj interpretistoj kaj faru la rektajn enketojn? Tiel estas, kiel oni efike luktus kontraŭ la anarkiismo, kaj la komisiitoj mem, se tio, kion oni diskonigas, verus, ili revenus laŭdante la perfektecojn de lando, kiu sciintus forĝi la feliĉon de siaj loĝantoj.

Se oni jam atingis, kiel iuj asertas, la neniigon de la Kulakaro kaj la *Nepman*-aro[33], kiuj tiulande estas la prototipoj de la privata kapitalo kaj, ke oni progresas per grandegaj paŝoj kaj sur neniaj zigzagaj vojoj al la fundamento de la Socialista Ekonomio, kial al ni, kiuj estis la plej fidelaj defendantoj de la rusa Revolucio dum la jaroj en

33 NeT: negocistoj, kiuj aperis post la oficialigo de la NEP (Nova Ekonomia Politiko)

kiuj okazis la krudaj kaj sangaj bataloj kontraŭ la blankaj armeoj, kiuj estritaj de Kolĉak, Denikine kaj Judeniĉ endanĝerigis la realigitajn konkerojn, kial ni ripetas, oni al ni neas la eniron en USSR-on kaj eĉ malpermesas surpiediri ĝin? Kial oni nin eĉ akuzas je kontraŭrevoluciuloj, portante ĝis neklasifikebla ekstremo la malamon, kiun ili al ni sentas?

Ĉar ni ne fermas la okulojn antaŭ la realo. Ĉar se internacia anarkiista komisiono vizitus Rusujon, ne prisilentus la hontaĵojn kaj grandajn maljustecojn, kiujn tie vidus, ĉar ni ne povas defendi subpreman kaj aŭtoritateman sistemon, kiu persekutas, enkarcerigas kaj ekzilas milojn da sendefendaj laboristoj. Ĉar ni volas la maksimuman liberon por ĉiuj, kiuj laboras, por ĉiuj, kiuj produktas, ne distingante sekson nek aĝon.

Kiel estas nature kaj logike, ni respektas kaj observas la fizikan malegalecon, sed ni ne toleras, ne povas suferi la ekonomian maljustecon, ĉar ĝi estas la karakterizo de la kapitalisma reĝimo.

Ĉu malaperis en Rusujo ĉi tiu malegaleco? Ne. Neniam en tiu lando la hierarĥioj montriĝis per la hodiaŭa forto. Nuntempe ekzistas kvindek mil kategorioj kun malsamaj salajroj en ĉiuj industriaj kaj profesiaj branĉoj. Pri tio, kion poste ni detalos, nenion diris la laŭdantoj de la ‘Ruĝa Paradizo”.

Pro tio ni diras ke, kiam estas intereso fari profundan kaj konsciencan studon pri la vivo de popolo, kiam oni volas penetri en tion plej intiman de la rusa animo, oni devas iri tien labori kun la parioj, sen ia privilegio tiel, kiel mi faris, intermiksiĝante kun la laboristo en la fabriko, kun la ministo en la minejo, kun la kamparano en la kamparo; profundigante kaj eĉ entrudiĝante en la privata vivo de la hejmoj; partoprenante en la rapidaj brigadoj, kiuj gvidas la produktadon, kiuj eltenas la maksimuman pezon en la

ĉiutagaj laboroj, fine dependante de salajro konkerita per la plej granda fizika penado, per propra impulso, sen helpo de iu. Tio sinteze estas kio devis fariĝi por povi kompari la principojn, por povi krude taksi, kiu estas la diferenco inter la kapitalisma ekspluatado kaj kiu efektiviĝas en Rusujo per la ekspluatantaj organoj, kiuj ricevas la nomon de Trustoj de la Ŝtato.

Kion povas diri la eksterlandaj delegitoj, kiuj iras al Rusujo por ĉeesti en la festoj de la Revolucio aŭ, kiuj translokiĝas en tiun landon por “oficiale” festi la unuan de Majo? Kion povas rakonti tiuj, kiuj iras reprezentante la sindikatan movadon aŭ nome de la Partio de siaj respektivaj landoj en la Komintern aŭ la Profintern[34], se de la unua tago komencas loĝi en la plej komfortaj kaj centraj hoteloj de la urbo, ricevante –hontinda afero- salajron pli grandan ol tiu, kiun enspezas laboristo en fabriko, manlaborejo aŭ oficejo?

Kiel povas doni proksimuman ideon pri la rusa realo tiuj sinjoroj, kiuj nur povis juĝi la staton de la popolo per sia profitdona restado plena de komfortoj kaj ĝentilaĵoj?

Se ili ne vidintus ĝin –ĉu estas ilia kulpo aŭ ĉar la estroj havas intereson kaŝi ĝin-, mi devas diri al ili, ke ekzistas skalo de salajroj kaj, ke ĉi tiuj estas tiel etaj, ke tio, kion enspezas rusa laboristo, apenaŭ sufiĉas por kovri liajn plej urĝajn bezonojn.

Ni alvokas la aktivulojn de la Partio, tiujn, kiuj per kriegoj monotone kantis ene kaj ekster de la sindikatoj, tiujn, kiuj bonfide kredas, ke en Rusujo jam plenumiĝis la egalecon kaj, ke sufiĉas labori por manĝi, tiujn, kiuj kredas,

34 NeT: La Komunista Internacio aŭ 3a Internacio ankaŭ konata per siaj komencliteroj en la rusa Komintern (Коминтерн, mallongigo de Коммунистический интернационал) La Ruĝa Sindikata Internacio ankaŭ konata per siaj komencliteroj en la rusa Profintern (Профинтерн, mallongigo de Красный интернационал профсоюзов)

ke tie la ununura bone vivanta estas la proletaro, por ke al ni diru, kion ili komprenas pri “proletaro”.

Kaj ni diras tion, ĉar en Rusujo, escepte de la *Nepman*-oj kaj la Kulakoj, ĉiuj estas proletoj. ŜPD, la urba polico, la Armeo kaj la Ŝiparmeo, la Korporacio de juĝistoj, la Komisaroj de la popolo, la dungitoj de la malliberejo kaj la tuta sinsekvo de parazitoj, kiujn en la kapitalismaj landoj oni nomas popolaĉo, ĉar ili vivas danke al la fremda laboro, estas en Rusujo proletoj, sed proletoj, kiuj samkiel okazas en la kapitalismaj landoj, enspezas pli kaj vivas pli bone ol tiuj, kiuj vere estas tio: la laboristoj.

Ĉu vi eble ignoras ĉion ĉi, laŭdantoj de la bolŝevikismo kaj necedemaj defendantoj de Rusujo? Ĉu vi reale kredis, ke la proletaro nur estis konsistigita de kiuj laboras, de kiuj produktas utilaĵojn por la kolektivo?

Ĉu vi ne scias, ke ankoraŭ nun en Rusujo ne produktiĝas varoj por esti deponitaj en la “Kolektivaj Magazenoj” intence distribui ilin inter kiuj laboras, sed ke oni ilin fabrikas por la vendejoj, kie nur povas aĉeti ilin tiuj enspezantaj tre altajn salajrojn? Ĉu vi ne scias, ke ankoraŭ validas la leĝo pri ofertado kaj mendado samkiel en la kapitalismaj landoj, kun la sola diferenco, ke la Ŝtato detruas la burĝaron kaj monopoligas ĉiujn branĉojn de la produktado samtempe, ke disvolviĝas potenca kaj ampleksa burokrataro ne malpli danĝera nek timinda ol tiu?

Jen kio okazas en Rusujo. La solaj, kiujn reale favoris la oktobra revolucio, estis al la parazitoj. Male la klaso, kiu nelace produktadas, kiu konstruadas, malmulte profitis sin. Pro tio etendiĝis tiu skeptikeco inter la laboristaj klasoj. Vidis la popola amaso, kiel aperis, kvazaŭ el sorĉaĵo, novaj kastoj; la laborista aristokrataro, konsistigita de inĝenieroj, teknikistoj, direktistoj, instruistoj, artistoj, komisaroj, la komitatoj de la sindikatoj, la politikaj oficejoj kaj la estroj de

la partio; kaj la malfido, la seniluziiĝo, la elreviĝo kaj la malkontento profunde enpuŝis siajn radikojn en la koron de la socia kolektivo… Ĉar tie, kiel ĉi tie, la laboristoj de kalaj manoj daŭre estas la eternaj ekspluatatoj; hieraŭ de la burĝaro, hodiaŭ de la Ŝtato.

Dume la adorantoj de la nova idolo, tiuj, kiuj incensas per la benditaj okuloj la plej grandan altaron de la nova Moloko, daŭre krios: “Vivu la Sovetia Respubliko”, tute ne sciante en nomo de kiu, nek kial.

Ĉu eblos, ni demandos al ni, malaperigi la grandegan abundon de naiveco kaj bona fido, kiun surportas la hispana laborista amaso? Ĉu ni sukcesos demeti la bendon, kiu kovras la okulojn al tiom da enamiĝintoj de la komunismo?

Ĉi tiu libro celas tion. Ni serĉis, por atingi ĝin, nek superan kaj plibeligitan literaturon, nek brilegajn frazojn. Ni nur alvokis la koncizan, simplan elmontradon, sen ornamoj pri la spertitaj faktoj. Se mia celo ne estas senfrukta, mi kontentiĝos kaj konsideros, ke mia laboro, rezulto de pluraj jaroj de pacienca esploro en la internaĵoj mem de la rusa lando, ne estis vana.

***

Kaj du vortoj pliaj antaŭ ol fini.

Mi nun konkrete alparolas vin, kunulojn de ekspluatado, vin, kiuj pensas pri la imagaj belaĵoj de reĝimo, kiu estas kiel iu ajn, al vi mi diras, ke se vi havus la okazon iri al Rusujo kaj, kiel mi, loĝus tri aŭ kvar jarojn en la koro de fabriko aŭ ĉe maŝino, vi ricevus sen ia dubo grandegan elreviĝon. Kiel mi suferis, kiel ĝin havis multaj politikaj enmigrintoj, kun kiuj mi konatiĝis en Rusujo, kiuj naŭzitaj lokiĝis ekster la Partio.

Tutcerte se vi realigus ĉi tiun vojaĝon, plej bone dirite, ĉi tiun sperton, ĉiuj, kiuj vivas influataj de ĉi tiuj fidemagogiaj propagando kaj literaturo fariĝanta en ĉiuj landoj,

propagando kaj literaturo pagita de Moskvo; tutcerte vi finfine malamus de apude tio, kion nuntempe vi defendas de malproksime.

Mi diras tion, ĉar kiam mi venis en Barcelonon, renkontis kelkajn amikojn miajn, kiuj estis fervoraj luktantoj por la Liberecena Komunismo dum la mallumaj kaj funebrecaj epokoj de la terorismo en Hispanujo, kiuj transiris en la vicojn de la Komunista Partio sendube trompitaj aŭ allogitaj de kvar ambiciuloj, ĉarlatanoj kaj oportunistoj salajritaj de Rusujo; de diversaj politikaj neelstaruloj dizertintoj de aliaj partioj, el kiuj ili fuĝis, ĉar ne povis atingi postenon de deputito, posteno, kiun ili esperis konkeri koste de la laboristoj.

Mia devo estas veki la atenton de ĉi tiuj kunuloj pri tiaj aferoj kaj ree altiri ilin al la revolucia movado por ke ili daŭre luktu kun ni por la ideoj, kiuj hieraŭ estis komunaj al ni.

***

Mi ne ripetos kion jam diris aliaj pri la disvolviĝo de la Rusa Revolucio kaj pri la rimedoj kaj manovroj, kiujn uzis la bolŝevika partio por devojigi ĝin de ĝiaj veraj vojoj.

Dum la ellaborado de ĉi tiu libro, ŝajnis al mi konvene resumi la historian parton de la origino de ĉi tiu popolo; tial mi nur ekskluzive parolas pri la pure objektiva parto de la aferoj komparitaj, kio estas, laŭ mia opinio, kio pli interesas al ĉiulanda proletaro.

Mi detale konigos, kiel disvolviĝas la vivo kaj, kiel efektiviĝas la laboro en USSR, afero, kiun neniu ankoraŭ klarigis.

Neniu pli taŭga ol mi -laŭ opinio de multaj kolegoj- por entrepreni tiun taskon, ĉar, kiel jam dirite, mi longe loĝis sur la sovetia teritorio, ĉiam laborante en fabriko aŭ manlaborejo ĝis mia reveno al Hispanujo.

Mi klopodos per ĉiuj eblaj rimedoj senigi min je ĉiu ideologia prijuĝo por ke la farota klarigo reale havu karakteron de rigora senpartieco.

1a. Kiel kaj kial mi iris al Rusujo.

Estis finoj de 1926, kiam Hispanujo, enmetita en la malhonoran ofendon de la diktatorado, penadis por liberigi sin je tiu jugo. Ĵus bedaŭrinde fiaskis la separatisma movado preparita de Francisco Maciá[35].

Garibaldi[36], la faŝisto maskita de revoluciulo, denuncis unu-post-unu ĉiujn implikitojn en la afero kaj la registaroj de Mussolini kaj Primo de Rivera premis tiun de Francujo por ke ĝi severe punu la konspirantojn. La franca polico konsente kun la deziroj de tiuj diktatoradoj komencis senbridan subpremadon kontraŭ ĉiuj hispanoj, kies ideoj ne estis afinaj al tiuj defenditaj de la reakciularo. La plenumo de la persekutado sin sentis en ĉiuj departementoj de Francujo, sed ĉefe kaj senĉese en Parizo. La arestoj ĉiutage multiĝis kaj la vivo en la ĉefurbo estis ĉiufoje pli malfalcila.

Kelkaj amikoj miaj, francaj kaj aliĝantoj al UĜKL[37], konsciaj pri la danĝero, kiu supozis por mi resti pli da tempo en la lando, konsilis min, ke mi forlasu Francujon kiel eble

35 NeT: Je finoj de novembro 1926 Francisco Maciá organizis armitan ekspedicion konsistigitan de voluntuloj por invadi Katalunujon de Francujo, kaŭzi ĝeneralan ribelon kaj proklami katalunan respublikon; la soldataro, nesufiĉe preparita, eĉ ne sukcesis trairi la franca-hispanan landlimon ĉar estis arestita de la francaj Ĝendarmoj en *Prats de Molló*.

36 NeT: Riciotti Garibaldi, nepo de la heroo de la itala unuiĝo, kiu reale ne estis kontraŭfaŝista luktanto, sed duobla agento serve de la politika polico de Mussolini. Danke al ĉi tiu Primo de Rivera ekkonis la planitan invadon.

37 NeT: Unuiga Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, franca sindikato ekzistanta inter 1921 kaj 1936, ĉefe de komunisma tendenco kvankam ankaŭ konsistigis ĝin anarkiistoj.

plej baldaŭ, ĉar se ne, pli aŭ malpli frue estos kaptita de la policistaĉoj.

Mi sekvis iliajn konsilojn kaj kelkajn semajnojn poste, tiuj kolegoj mem, nur zorgante pri la urĝa bezono de mi deiro, transdonis al mi leteron de la Sindikato pri la Meblo de Parizo kaj alian de la Internacia Ruĝa Helpo por la kolegoj de Berlino, al kiuj rekomendis, ke pro mia kondiĉo de politika persekutato ili faru ĉion eblan por aranĝi al mi pasporton cele internigi min en Rusujon.

Mi alvenis al Berlino je lastaj tagoj de samjara oktobro, sen ia problemo dum la vojaĝo kaj, kio estas pli surpriza, tute ne estante ĝenita. Laŭ la instrukcioj, kiujn mi ricevis de la kolegoj de Parizo, tuj kiam mi estis en la ĉefurbo de Germanujo, komencis la klopodojn, kiujn oni konsideris bezonaj por povi trairi kiel eble plej baldaŭ la landlimon kaj penetri en la sovetian landon.

Jam ne premis min la timo de la persekutado, nek spronis miajn aspirojn la fantomo de la malliberigo. Prenis min pasia deziro loĝi en Rusujo kaj, kvankam la berlinaj kamaradoj certigis al mi, ke mi povis trankvile resti en Berlino, ade direktis miajn penadojn atingi la enirpermeson en USSR. Estis pli forta la scivolemo ol la petegoj de la amikoj.

Tamen pasis la monatoj, kiuj al mia retenita senpacienco ŝajnis jaroj, kaj malgraŭ miaj ripetitaj vizitoj al la respektivaj konsulejoj, mi neniel sukcesis progresigi tian deziritan pasporton.

Pro tiu malrapideco de la rusaj aŭtoritatoj, malrapideco, kiu kolerigis min ĝis neimagebla ekstremo, kaj ĉefe timante ne povi plenumi tion, kio jam estis obsedo por mi, mi decidis skibi iujn leterojn al la kolegoj Andrés Nin kaj Ramón Casanellas, kiuj tiutempe troviĝis en Moskvo.

Mi al ili klarigis miajn dezirojn kaj aparte la tre pravigeblajn motivojn, kiuj pelis min iri al Rusujo, ne kaŝante al ili miajn ideojn nek la pasian aspiron, kiu voris min. Mi al ili diris, inter aliaj aĵoj, ke kvankam mi ne apartenis al Partio -kiel neniam mi apartenis al iu politika frakcio-, kiel anarkiisto mi ne estis sektisma. Ke mia devo estas kun la revolucia movado de la Nacia Konfederacio de la Laboro, laŭ tio interkonsentita en la fama Kongreso de la teatro de la *Comedia* de Madrido, okazinta la jaron 1919.

Iom poste mi ricevis la respondon subskibita de Gabriel Trilla, tiama secretario de la Hispana Komunista Partio. En ĉi tiu letero, li al mi diris, ke malgraŭ la precizaj donitaĵoj, kiujn en mia letero mi sendis al ili, neniu el la tri rememoris min kaj ankaŭ ne opiniis koni min. Kiel preteksto de tiu aserto, li aldonis, ke eble tio okazis pro la pasintaj jaroj aŭ ankaŭ pro iu nevola forgeso kiam mi menciis datojn aŭ donitaĵojn. Ili al mi ege petis, ke por pli granda certigo pri la rekonado, mi al ili sendu fotografaĵon. Ĉi tiel, foje certigitaj pri mia vera personeco, ili povus fari ĉion eblan por ke oni al mi faciligu per la plej granda ebla rapideco la eniron en Rusujon.

Malgraŭ ke jam ne estis plia dubo pri mia personeco; malgraŭ ke ankaŭ ili plenumis la bezonajn laborojn per ĉiu ebla rapideco, la permeso ne venis en miajn manojn ĝis kvin monatoj poste.

La kontentiĝo, kiu kaptis min, kiam mi vidis min posedante tian deziritan legitimilon, ne eblas priskribi. La kolegoj, sen demandoj, nur pro la gajeco pleniganta mian vizaĝon, eksciis la, por mi, tiom feliĉan novaĵon kaj elkore gratulis min.

Sekvatage mi iris al la rusa konsulejo, kie oni stampis la vizon sur mian pasporton. Vespere, post kora adiaŭo al tiuj

germanaj kolegoj, pri kiuj tiom da agrablaj memoroj mi konservis, mi entrajniĝis direkte al la rusa landlimo.

2a. Sur rusa teritorio.

Estis meze de marto kaj kvankam laŭ la kalendaro la printempo devis jam montriĝi, estis malvarme. Mi ĵus trairis la tutan germanan teritorion, tiun de Estonujo kaj de Latvujo, tra ĉarmaj panoramoj, vidante pasi ambaŭflanke ombrajn arbarojn, verdajn herbejojn kaj krutajn montojn. Mi trairis plurajn riverojn, muĝantajn kaj minacajn unuj, kvietajn kaj trankvilajn aliajn, tamen neniam povis halti momenton la rigardon sur la naturajn belaĵojn de tiuj landoj.

Ĉio pasis antaŭ miaj okuloj, kiel nedaŭra vidado, kiel fulmo el verdo aŭ blanko, laŭ estis la teritorio sur kiu la trajno rapide kuris.

Post milda deklivo de la tereno la trajno malrapidiĝis. Ni eniris en la landliman stacidomon. Haltis la trajno kaj el ĝi eltrajniĝis la malmultaj vojaĝantoj, kiuj restis.

Tuj ĉirkaŭis min kelkaj ruĝaj soldatoj, komisiitaj plenumi la vigladon sur la strategiaj punktoj de la landlimo. Ili akompanis min al eta laborĉambro, kie tri dungitoj de ŜPD prizorgis la revizadon de la pasportoj kaj la inspektadon de valizoj kaj pakaĵoj.

Plenumitaj tiuj kondiĉoj kaj, ĉar ĉio konformis, ili eksciigis al mi, ke mi devis atendi du horojn ĝis deiros la trajno ironta rekte al Moskvo. Dum la atendo, oficiroj de la Ruĝa Armeo al mi invitis, per signoj, manĝi. Mia stomako jam de longe ĝuste donadis al mi urĝajn avizojn pri tio, kaj ĝojoplena, preskaŭ kun la emocio en la okuloj pro tiel feliĉa koincido, mi volonte akceptis.

Kiam mi ĉetabliĝis, cirkaŭita de rigardaltiraj uniformuloj, falis sur min vera pluvo el demandoj, kiuj kompreneble

restis sen respondo, ĉar estis faritaj en la rusa. Mi sukcesis komprenigi ilin, kiel eble plej bone povis, ke tute ne konis ilian harmonian lingvaĵon. Tiam, unuj demandis en la germana, aliaj enketis en la franca. Al ĉiuj ili, jam per konataj lingvaĵoj, mi donis kompletan respondon.

Iom poste kaj sendube altirita de la vigleco de la konversacio en nia rondo, alproksimiĝis individuo, kiu post momentoj kaj alparolante nur al mi, diris: “Ĉu vi parolas la hispanan?”-Estas plezure konatiĝi kun vi, ĝuste mi estas hispana- mi respondis ridanta, emociata, plena mia animo de profunda ĝojeco kaj lumaj sentoj.

Kaj jam forgesitaj la postuloj de la stomako kaj la ĝentilaĵoj de la oficiroj, mi prepariĝis babili kun tiu, kiun mi kredis mia samlandano.

Mi faris, ke li sidiĝis apud mi kaj, pro demandoj miaj, li rakontis al mi, ke estis rusa; ke ĵus venis de la Argentina Respubliko, kie pasigis dek kvin jarojn laborante kaj suferante. Li klarigis al mi, ke fuĝis de Rusujo dum la eŭropa milito, dizertante de la granda buĉado pro kialoj de ideologia sentimentaleco. Finfine post tiom da tempo de propravola ekzilo, prenis sian koron la nostalgio de la naskiĝa lando kaj li revenis en sian teron preta vivi relative feliĉa en la nova reĝimo de libero.

Ekscitita la scivolemo de la aŭskultantoj, kiam ili konstatis, ke ni tenis veran konversacion, ili volis ekscii pri kio ni parolis. Mia interparolanto detale al ili klarigis la historion kaj proponis sin por esti interpretisto inter la oficiroj kaj mi. Tiel akordigita inter ĉiuj, komencis la oficiroj esprimi sin laŭ la jena maniero:

-Kio pensas la hispana proletaro pri la Rusa Revolucio?

-Kiu estas la nuntempa stato de la emancipa movado en Hispanujo?

-Kun kiuj fortoj kalkulas la Komunista Partio?

Apenaŭ mi ekrespondis la unuan el la demandoj, kiam orelŝira fajfo de la lokomotivo alvokis nin al la kajo. Laŭ informis al ni dungito, efektive estis la trajno, kiu deiris al Moskvo kaj per kiu mi devis veturi. Rapide mi prenis miajn pakaĵojn kaj, akompanita de ĉiuj ĉeestantoj, lokiĝis en la vagono.

Ĉiuj eldiris sian ĉagrenon pro la rapideco de mia foriro kaj ripetadis proponojn por plilongigi mian restadon inter ili. Tamen, mi pretekstis urgajn aferojn kaj jam venkitaj iliaj petegoj, ili adiaŭis min per nedudeblaj montroj de simpatio kaj sincereco.

Kiam la trajno ekmoviĝis, surdigis la stacidomon laŭtega krio de: “Vivu la Revolucio”, ĵetita de tiuj bravaj kaj afablaj kolegoj, kiuj tie restis. La krio ripetiĝadis ĝis la stacidomo ne estis pli ol nigra punkto en la malproksimeco.

Premita de emocio pro tiu adiaŭo, mi eniris en mian kupeon. Ĉe mi vojaĝis ruĝa soldato, kiu, laŭ li al mi diris, iris pro forpermeso al Moskvo kaj tiu rusa kolego, kiu parolis la hispanan; kiu post tiom da jaroj de pilgrimado tra argertinaj teroj revenis en sian landon, en sian hejmon, por ŝirmi sin per sopira varmo de la familio kaj la apogo de la amikoj.

Pro la konversacio, kiun ni tenis komence de la vojaĝo, mi eksciis, ke ĉirkaŭ tiuj datoj estas okazonta en Moskvo la kvara Kongreso de la Ruĝa Sindikata Internacio, kaj pro la maniero per kiu esprimas sin miaj akompanantoj tiel, kiel pro iuj vortoj, kiujn ili interŝanĝas inter si, mi komprenas, ke ili min konsideras, kiel delegiton.

Tiam, nur tiam, venas al mi en la kapon mediti pri la afableco de la dungitoj de la stacidomo kaj la trajno kaj ĉefe venas al mi tutklara, travidebla, per meridiana klareco, la klarigo pri la ĝentilaĵoj kaj korinklino per kiu regalis min tiuj

belaspektaj oficiroj. Ne eblas ia dubo. De la unua momento, ili konfuzis min kun delegito kaj multigis ĝisekstreme la ĝentilaĵojn al mi. La pruvon, ke tiel estis, oni havigis al mi poste en Moskvo, kiel vidos la pacienca leganto en alia ĉapitro.

Kvankam mi sentis min vere laca kaj malgraŭ ke la akompano de tiuj du simpatiaj rusoj estis tre agrabla por mi, post tiu momento mi restis preskaŭ la tuta cetero de la vojaĝo elklinita tra la fenestreto de la vagono.

Estis la malkvieteco de la nekonataĵo, la deziro koni tiun landon, lerni la kompletan topografion de tiu popolo, kiu plenigis unu el la pli brilaj paĝoj en la nuntempa historio. Estis, kiel ia neceso ebriigi min per pejzaĝo, interkompreniĝi kun la animo, kun la aromoj de tiu tero, kiu ekde tiu momento estis mia adopta patrujo, ĉar en ĝi mi devis labori kaj loĝi.

Ĉie, dekstren kaj maldekstren, rigardante norden, samkiel rigardante suden, mi ne vidas pli ol neĝo. Ĉio blanka, kiel kovrita de mortotuko de alta toneco. De la plej altaj montopintoj ĝis la plej malaltaj ebenaĵoj, de la rivero ĝis la stepo, ĉio restas ankoraŭ kovrita per geedziĝa mantelo de tiu tero, per la naskipova tavolo de tiuj kampoj, kiun la kamparano laboras per pacienca kaj ekzempla konstanteco.

Neĝo sur la monto! Neĝo sur la ebenaĵo! Kaj mi tiam pensis pri Hispanujo, Katalunujo, kie tiutempe la suno devis lumigi la ridantajn, ĝojajn pejzaĝojn malfermante por la kiso de viviga Febo la plej diversajn florojn kaj, kie nur dum la vintro oni escepte konas la neĝon.

Kiom da tempo mi estis absorbita, fiksita la penso pri tiuj memoraĵoj? Mi ignoras ĝin. La voĉo de mia kunulo faris al mi subeniri de la alteco al kiu mi leviĝis. Okazis, ke ni venis al stacidomo de la irvojo. Li volis rimarkigi al mi la

grandegan homamason, kiu plenigis la kajojn kaj montri al mi la trafikon -tre gravan certe- de la rusaj urboj. Mi estis momenton interesata pri la spektaklo, kiun proponis la stacidomo; ĉi tie patrino adiaŭanta sian filon; tie parencoj adiaŭantaj aliajn; pli for, knabinoj irantaj al la ĉefurbo… Amasbruo, ridoj, adiaŭoj, ploroj.

Sed la spektaklo -eble pro efiko de la antaŭa impreso de la vojaĝo- malĝojigas min. Mi ne vidis gajecon sur tiuj afliktitaj vizaĝoj; mi ne vidis koloron sur la freŝaj vangoj de la junuloj. Nur palaj kaj ekstreme maldikaj vizaĝoj, skeletaj gorĝoj, kiuj reflektas la suferitajn malsaton kaj mizeron.

La plimulto vestas ĉifonojn kaj ŝuvestas siajn piedojn per ŝuoj, kiuj iam eble estis fortaj. Tra la plando de unu aperas la frostorigida fingro de piedo ne havanta ŝtrumpetojn. Mi daŭrigas la analizon kaj trovas kunigitan al piedo, skeletan kruron kovritan de eluzita pantalono, kiu lasas vidi tra kelkaj truoj la violan haŭton de ĝia proprulo. Mi demandas mian kunulon. Mi volas certigi min, ĉar tiu vidado min konsternas. Li klarigas al mi, afable. Simple estas malriĉaj kamparanoj. Multaj vestas, kiel tiu. Ankoraŭ ili ne povis profiti la avantaĝojn de la reĝimo. Oni esperas, ke la venontan jaron ili povas surporti novajn vestojn kaj ŝuojn. Ili fidas akiri iun palton.

Mi fermas la okulojn. La oreloj zumas al mi kaj la frazoj de mia akompananto dancas burleskan ĥoron en mia cerbo. Mi komparas la vestaĵojn de tiuj malriĉaj produktantoj kun tiu de la dungitoj de ŜPD kaj de la dogano, kaj la rezulto ne povas esti pli katastrofa. Tiuj bone piedvestitaj, bone vestitaj kaj kovritaj de dikaj paltoj, kiuj ŝirmas ilin de la veterrigoro. Ĉi tiuj, la malriĉaj kamparanoj, duonnudaj, ĉifonaj, kiuj ne povas meti sur siajn ŝultrojn ian palton por ŝirmi sin de la glacia malvarmo, kiu regas en tiuj regionoj de Rusujo. Jam eknaskiĝas en mi suspekto, kiu tradukiĝas en demando, kiu

ne eliras el miaj lipoj: Ĉu tiu eble estos la rezulto de la revolucio?

Ĉi tiam, miaj akompanantoj stariĝas kaj komunikas al mi, ke ni devas prepari nin ĉar mankas kvin minutoj por fini nian vojaĝon. Rapide do ni aranĝas la valizojn, preparas niajn paltojn kaj… post bruego el bremsadoj kaj knaroj ni alvenas en la stacidomon.

3a. Moskvo.

Ne estos eble al mi per tiel modesta plumo pentri al la leganto pentraĵon perfektan de koloreco kaj vivforto, kiu donis al li ĝustan ideon pri kio estas Moksvo. Tamen mi klopodos venki la malfacilecon kiel plej bone povos.

Moksvo prezentas la tutan malvigligan aspekton de malnova urbo sur kiu pasadis la jaroj, ne produktante spuron. La plimulto de la domoj estas de malalta konstruo. Ĉie, kien ni direktas la vidon, ni vidas aperi speco de militaj turoj de agrabla arkitecturo, kronitaj de brilegaj kaj oraj kupuloj, kiuj reflektas kaj irizas la sunajn radiojn. Pro ilia konstruado kaj memorante antaŭe viditajn fotografaĵojn, mi komprenas, ke ili estas preĝejoj.

Sur la stratoj, certe tre malbone ŝtonpavimitaj, malpuraj kaj malsekaj, svarmas grandega amaso de migraj vendistoj, kiuj ofertas per krioj siajn varojn, metante specialajn intereson kaj obstinon vendi ion al kiuj estas aŭ ŝajnas esti eksterlandanoj.

Kiel mi ne sciis kien iri, decidis post konsulto kun mia akompananto, malantaŭeniri kaj demandi la stacidomestron. Tiel ni faris ĝin kaj post mallonga konversacio el kiu mi komprenis eĉ ne vorton, li invitis nin sidiĝi samtempe petante al ni, ke ni atendu.

Post malmultaj minutoj de atendo, oni pasigis nin en internan ĉambron. Mia kunulo iomete parolis kun kiuj tie ĉeestis kaj post lia prezento, li kore adiaŭais min dirante: “Nenio mankos al vi; vi ne havas kialon zorgi vin. Vi estas en la ŜPD-ejo de la transporto”. Verdire mi restis iom konfuza. Mi ne sciis, kio volis diri tion nek kio signifis, sed komprenante, ke mi devis fari ion, venis al mi en la kapon

transdoni leteron en la rusa, kiun donis al mi la majoroj de la ruĝa Armeo de la landlimo kaj, kiun mi opiniis kiel bonegan por mia enkonduko en tiun oficejon.

Kiu ŝajnis esti la oficejestro atente legis la leteron. Poste li ĝin zorge gardis en tirkeston kaj eldiris al mi plurajn demandojn, kiuj memkompreneble restis sen respondo. La “kamarado” parolis sian lingvon kaj mi tiam komprenis eĉ ne silabon en la rusa.

Ĉar ni ne interkomprenis nin kaj estis tie neniu interpretisto, ili invitis min trinki vazon da “*chai*” (teo). La teo –kaj permesu al mi la afabla leganto ĉi tiun digresion- estas la plej kuranta trinkaĵo en tiu lando. Ĝi konsumiĝas laŭ grandegaj kvantoj kaj ne estas hejmo, eĉ la plej mizerega, kie oni ne trovis vazon de teo. Oni komprenas la grandan konsumon de ĉi tiu trinkaĵo se konsideras la bezonon fortigi la korpon per varmaj infuzaĵoj pro la grandega malvarmo reganta tie. Krome klariĝas, ke ĝi estas preferata al kafo pro sia pli malgranda prezo. La kafo en Rusujo estas konsiderita kiel luksa varo kaj nur troviĝas en la grandaj hoteloj aŭ en la pompaj kukejoj. Vazo de ne tre bonega kafo kostas la grandegan kvanton da kvindek kopekoj, kiuj en hispana monero samegalas pli-malpli tri pesetojn.

Proksimume unu horon post mia alveno, eniris en la ĉambron, kie ni estis, virino simple vestita. Ŝi kovris sian kapon per ruĝa tuko laŭ freŝa kutimo en la lando kaj piediris rekta kaj malpeza. Oni vokis ŝin per telefono por la ekskluziva celo, ke ŝi kondukos min al la restadejo preparita por la ceteraj eksterlandanoj, kiuj antaŭ malmultaj tagoj venis.

Oni prezentis al mi la “kunulinon”, kiu, post rapida ekzameno de mia persono, invitis al mi per gesto, ke mi sekvu ŝin. Ni eniris en aŭton starantan ĉeporde kaj post kvin minutoj ni haltis antaŭ la Hotelo Eŭropo, kiu estis aranĝita

kiel restadejo de ĉiuj delegitoj, kiuj devis ĉeesti en la 4a Kongreso de la Ruĝa Sindikata Internacio.

Ni elaŭtiĝis kaj ne interparolante –klopodi ĝin estus cetere malutile-, ni supreniris al la unua etaĝo kaj haltis antaŭ ĉambro sur kies pordo oni legis la jenan laŭtekstan surskibon: “Lieu d’arrivée des delegués” (france, “Alvenloko por la delegitoj”). Mi komprenis, ke estis la oficejo de akcepto. Mi antaŭvidis, ke tie interne estis finonta ĉiuj regaladoj kaj gentilaĵoj, sed kuraĝe –kion alie fari?- mi pretigis min alfronti la situacion.

Post mallonga paŭzo, ni eniris en la oficejon. Akceptis nin junulo, kiu ne aĝis pli ol 25 jaroj. Li scipovas plurajn idiomojn escepte de la hispana, afero, kiu ne min ĉagrenas, sed ja min seniluziigas. Mi deklaris mian ŝtatanecon kaj ni decidis interparoli en la franca. Foje interkonsentita tio, li demandas min:

- Kion preferas la kamarado, manĝi aŭ dormi?

- Dormi –mi respondis-. Mia organismo estas elĉerpita pro la laceco, konsekvenco de tiel longa vojaĝo. Ripozi do estas mia sola deziro.

Mia interparolanto vokis per tintilo. Tuj aperis pedelo al kiu li donis instrukciojn por ke oni aranĝu al mi ĉambron, kie mi povos ripozi. Farita ĉi tio, alifoje alparolante min, li diras:

- Ĉu vi kunportas ordonojn? Kiun organizon vi reprezentas?

Miaj malkonfidoj restis konfirmitaj. Estis jam nenia dubo pri tio, ke oni konfuzis min kun unu el la delegitoj, kiuj devis ĉeesti en la Kongreso. Mi komprenis, ke tio plej bona estis malfari kiel eble plej baldaŭ la miskomprenon, kaj mi rapidis diri la veron.

- Mi estas neniu delegito –mi respondis-. Mi estas persekutato, politika enmigrinto, kiu venis en Rusujon esperante trovi akcepton kaj laboron.

Tiam la vizaĝo de mia interparolanto ŝanĝis de mieno. Jam ne estis la ridanta vizaĝo de la afabla gastiganto, sed la malafabla malkonfido de aristokrata ĉambristo. La miela afableco de tiu junulo, kiu proponis al mi manĝon kaj ripozon, tuj iĝis preskaŭ malamika sekeco kaj, per stranga voĉo, kvazaŭ li traktus kun subulo, li diris:

- Ha!, se estas tiel, vi devas iri aliloken. Ĉi tiu hotelo estas ekskluzive rezervita por la delegitoj. Prenu ĉi tion –kaj li rapide skribis adreson sur paperfolio-, ĉi tiu estas la oficejo de *Mopra* (Internacia Ruĝa Helpo). Tie oni okupiĝos pri vi kaj laŭeble priatentos vin.

Dirante nenion pli kaj eĉ ne donante al mi la manon, li adiaŭais min. Jam rivelita mia vera personeco, finiĝis la honoroj kaj gentilaĵoj, kiujn mi ricevis de post mia alveno al la rusa teritorio.

Mi eliris el hotelo plenplena de indigno, ne pro la malmilda ŝanĝo de la traktado, sed pro la evidenta elmontro, ke tio, kion oni faris, estis kruda komedio; ke oni havis preparita taŭgan ornamon por vidigi al delegitoj kion la sovetiaj gvidantoj volis, ke ili vidis.

Absorbitaj de tiuj meditoj, mi kuris tra inter la densa homamaso, kiu ĉi-hore invadis la stratojn de Moksvo. Kiel malesperigito, donante kubutbatojn kaj ricevante puŝegojn, mi piediris pli ol horo, sen destino, sen orientiĝo tra tiu homa formikejo. Mi atentis nenion kaj ignoras se iu direktis sian atenton al mi. Tio vera estas, ke finfine, lacega, perdita la ideo pri la tempo kaj spaco, mi demandis. Afabla piediranto, foje legita la papero portita de mi en la mano, indikis al mi la vojon. Kaj mi tien iris.

Sen ia problemo, mi alvenis al la konstruaĵo, kie estas instalita la Ruĝa Internacia Helpo. Estis domo, kies fasado farbita de blanka koloro, montras klopodon de ĵusa restarigo, pli bone dirite, klopodon de refarbo. Mi eniras. Sufiĉe vasta ĉambro plenplena de geviroj atendantaj vicon kun paperoj en la manoj kaj pasantaj de iu al alia fenestreto. Mi studas iliajn gestojn de aŭtomatoj kaj malkovras en ili la mizeron kaj la mankojn. Ilia tuta deziro konsistas en la transdono de la paperoj, kiuj sendube devas solvi al ili iun problemon. Sed iliaj malgajaj vizaĝoj, maldikaj, malgrasegaj ne havas ekbrileton de entuziasmo. Mi ne povis vidi, inter tiom da junuloj, lipojn, kiuj duonmalfermiĝis ekmontrante rideton. Ŝajnis kvazaŭ la ĝojo estus nekonataĵo por tiuj homoj; kvazaŭ la okazaĵoj de la vivo, la ploro kaj la mizero tute elĉerpintus la kristalklarajn fontojn de la rido kaj la humuro…

Duonamika premo, farita de vila mano sur mian ŝultron, remetis min en la realon. Estis la pordisto, kiu vidis min iri de flanko al alia senhalte, kaj sentis sin scivolema.

- Ĉu vi serĉas ion, kamarado? –li diris al mi en la germana. Li divenis eble pro la valizo, ke mi estis eksterlandano.

Kiel tuta respondo, mi pasigis al li la paperon, kiun oni donis al mi en la hotelo. Tuj li akompanis min ĝis pordo. Estis la sekretariejo pri politikaj enmigrintoj.

La sekretario sidigis min per afektema afableco. Mi detale klarigis al li la kialojn de mi vojaĝo kaj nombris la organizojn, kiuj respondis pri mi, kiuj estis sufiĉaj garantioj. Mi transdonis al li la leterojn de rekomendo, kiun mi portis, la pasporton kaj ceterajn legitimilojn. Ĉion ekzaminis la sekretario per skrupula atento, kaj foje konfirmita mia identeco oni enskribis min en registron, mi devis kelkfoje surskribi kaj finfine li transdonis al mi DUDEK SEP rublojn

en monero por kontribui al la elspezoj de nutraĵoj de la unua monato. Krome li donis al mi leteron pere de kiu mi povos atingi senpagan liton en la centra domo de la politikaj enmigrintoj.

4a. La vivo de la politikaj enmigrintoj.

La restadejo de la politikaj enmigrintoj estas lokita en Boronzobo-pole. Tien mi iris kun la dudek sep rubloj en la poŝo kaj la letero de prezentado en la mano. La koro forte batis min kaj sentis en mia interno preskaŭ la antaŭsenton, ke mi troviĝos kun novaj kontraŭajoj.

Tamen, ne estis tiel. Mi estis bone akceptita kaj post kvaronhora atendo, oni asignis al mi la liton, kiun oni destinis al mi.

Tuj ĉirkaŭis min kelkaj italaj, rumanaj, germanaj, francaj kaj alilandaj enmigrintoj kun kiuj baldaŭ komencis konversacii. Ni amikiĝis kaj post nelonge kunigis ĉiujn intima amikeco, kiu ne malfortiĝis dum ni kunvivis kaj pri kiu mi gardos plaĉegan memoron dum vivos.

El ĉiuj tiuj kamaradoj, kiujn mi eĉ estimis kiel fratojn pro la bonecoj kaj gentilaĵoj, kiujn ili havis kun mi dum mia estado en Rusujo, eĉ ne unu lasis manifesti al mi la grandegan elreviĝon, kiun ili suferis; ĉiuj akordiĝis aserti, ke la plej grandan elreviĝon de ilia vivo ili havis loĝante en Rusujo.

Ili, kiel mi kaj multaj aliaj naivuloj kredis, ke la idealoj de Egaleco, Frateco kaj Libereco por kiuj per tiom da persisteco ni luktadis, finfine fariĝos realo per la nova bolŝevika reĝimo establita de la Revolucio. Sed la sana kaj esperiga ĝojo, kiu ilin kondukis al Rusujo, ŝanĝiĝis malmultajn semajnojn poste en amara elreviĝo kaj de fervoraj defendantoj de la nova rusa reĝimo ili transformiĝis en konstantaj malamikoj de la komunismo.

Estis natura la ŝanĝo. Neniu el la plaĉaj revoj, kiujn la mensoj junaj kaj plenaj de entuziasmo de tiuj idealistoj forĝis, plenumiĝis. Tie, kie ili esperis harmonion, ne vidis pli ol fortan ekonomian malegalecon, sen tendenco malaperi, ĉiurimede kaj rigore subtenata kaj nutrata de burokrataro, kiu ĉion invadas, kiu, kiel la hedero, envolvas sin sur ĉiujn branĉojn de la nacia vivo kaj el ĝi eltiras iom post iom la viglon.

Ne ekzistas la politika libero. Ĉiuj ideoj, kiuj ne estas la bolŝevikaj, estas persekutataj. De la reakciulo ĝis la anarkiisto, pasante tra la tuta gamo de la ideologiaj nuancoj, oni furioze persekutas ĉiun, kiu havas la kuraĝon manifesti sin konsente kun siaj propraj ideoj.

Kiel ekzemplo por la leganto kaj cele ĝi povas servi kiel solida bazo por nia argumentado, ni citos aferon, kiun mi persone vidis kaj, kiu per si mem tute pruvas kion ni diras.

Devis okazi balotadoj por nomumi la membrojn, kiuj devis konsisti la lokan Soveton. La kamarado Bestujev – inĝeniero konstruanto- rifuzis akcepti la balotilon. Liaj amikoj kaj kunuloj insiste petis al li, ke li akceptu ĝin kaj post multaj petegoj, ili sukcesis, ke li prenis unu, sed je la momento de la baloto li skribis malantaŭe tion jenan: “Konsente kun miaj principoj, mi neniam partoprenas en la balotadoj por administraj organoj”.

La ĝenerala asembleo de laboristoj kaj funkciuloj de la fabriko, kie Bestujev laboris, petis al ĉi tiu kamarado, ke li klarigu la konceptojn kaj klare diru, kiuj estis liaj “principoj”. Tiam, leviĝinte de sia seĝo kaj vizaĝ-al-vizaĝe antaŭ la asembleo, Bestujev diris: “Principe mi estas anarkiisto. Sed mi estas preta doni miajn servojn al la bolŝevika reĝimo, ĉar ŝajnas al mi, ke estas la sola formo de Ŝtato, kiun al ni permesos atingi la realigon de la anarkiismo. Ĉiam, kiam la kapitalistoj atakis la sovetian reĝimon, mi metis miajn konojn

kaj miajn kapablojn serve de ĉi tiu lasta kaj ankaŭ suferis por subteni ĝin. Mi estis membro de la anarkiista organizo de Sudameriko, sed nuntempe mi apartenas al neniu partio nek grupo. Tamen mi neniam rezignos miajn anarĥiajn ideojn”

Tiu estis la plej granda krimo, kiun povis plenumi la kamarado Bestujev. Tuj la kaŝpolicistoj de ŜPD kaj la satelitoj de la loka Soveto preparis kaj falsis rezolucion, kiu –kiel ĉiam okazas- estis aprobita unuanime, tio estas, *sen voĉdonado*.

En tiu rezolucio oni karakterizis la kamaradon Bestujev, kiel “malamikon de klaso” kaj diris, ke li klopodis kaŝi siajn danĝerajn kontraŭrevoluciajn ideojn; krome oni deklaris, ke malantaŭ la *masko de anarkiisto* kaŝas sin la sangavida faŭko de la kapitalismo, kiu prepariĝis por salti en la kolon de la tutmonda proletaro kaj ĉefe de la sovetia Respubliko. Finis la kurioza dokumento asertante, ke la asempleo postulis, ke “Bestujev estu forigita de la sindikato, maldungita de la fabriko kaj signalita kiel kontraŭrevoluciulo” cele ke estu al li neeble trovi laborpostenon en ĉiuj sovetiaj institucioj (ekspluatejoj aŭ fabrikoj)

Jen kiel oni komprenas en Rusujo la politikan liberon kaj vidu kiel oni senpie ĵetas, pro simpla elmontro de ideoj, en la malsaton kaj mizeron laboriston, kiu metis siajn fortojn serve de tio, kion li kredis liberiga revolucio. Tiel estas, kiel aplikas la lakeaĉoj de Stalino la alineon de la Konstitucio de USSR, kiu garantias “al ĉiuj laboristoj de la Unio la absolutan liberon esprimi siajn opiniojn”.

Aferojn kiel tiun supre cititan ni povus prezenti multajn. Kaj ni faros tion en aliaj ĉapitroj. Koninte ĉi tiujn procedojn kaj taktikojn, tiuj enmigrintoj, tiuj entuziasmuloj, kiuj luktis en siaj respektivaj landoj pro la alveno de justa kaj egalema

reĝimo, perfekte konstatis, ke en Rusujo okazis neniun profundan ŝanĝon en la socia strukturo.

Samkiel en la cara reĝimo, dum unuj naĝas en riĉaĵoj, la aliaj penadas en la plej absoluta mizero. Ni mem, la politikaj rifuĝintoj, ne povis eskapi el pezo de tia ekonomia malegaleco kaj sentis niajn karnojn vipitaj de la mankoj, niajn korpojn torturitaj de la malvarmo kaj niajn cerbojn plenplenaj de konfuzaj ideoj, kiuj luktis por esprimi sin, por brue manifesti sin.

Kaj la filantropa institucio, kiu pompe titoliĝas "*Mopra*" (Ruĝa Internacia Helpo) nur transdonas al la rifuĝintoj la nesufiĉan kvanton da naŭdek kopekoj tage, tio estas, dudek sep rubloj monate per kiuj oni devis kovri ĉiujn bezonojn. La malgrandecon de ĉi tiu kvanto konstatos la leganto, kiam li scios, ke al la delegitoj –kiuj ricevas traktadon tute malsaman al la nia- oni pagas *sep ĝis ok rublojn* tage, tio estas, *220 rublojn monate.*

Kial diras nenion pri tio Vidal Mata, la pamfletema kaj ridinda verkisto, la argentina ŝajniganto, kiu skribis tiun abomenindan pamfleton titolitan "La vero pri Rusujo"? Kial li prisilentas la veron pri tio, kion li scias kaj konscie mensogas dirante tion, kio ne ekzistas? Ĉi tiu afektema revoluciulo, naŭza sintezo de la hipotezo kaj la malico, skribis sian libron laŭ diktado de la oficiala volo. Li akceptis la rolon de kaŝanto kaj falsanto por povi enspezi kelkajn dolarojn, kiujn eble promesis a li la sekretarioj de Stalino. Kaj estis tiel, kiel li diskonigis serion da stultaĵoj kaj malĝustaĵoj pri kiuj li devus honti sin.

Mi persone konatiĝis kun ĉi tiu individuo en Moksvo, ĉar kelkaj amikoj de Latinameriko ege rekomendis lin al mi. Li nomis sin anarkiisto kaj reprezentanto de la "Argentina Liberecana Alianco" (A.L.A.) kaj certigis al mi, ke venis kun

la ekskluziva celo dokumenti sin por diri la veron al la argentina popolo.

Ĉi tiu ulo restis tri monatojn en Moksvo oficiale enspezante la belan kvanton da 50 rubloj semajne plus senpaga ĉambro. Malgraŭ tio, ankoraŭ li havis la cinikecon diri al mi, ke tio, kion li enspezis, estis tre malmulte kaj ne sufiĉis por kovri liajn bezonojn. Kalkulu do la leganto: se Vidal Mata ne povis kontribui al siaj elspezoj per 220 rublojn monate, kion povis fari la politikaj enmigrintoj per la kvanteto da 27 rubloj monate (tio estas, la naŭona parto de tio, kion li enspezis)?

Kiom da mizero de animo enfermis tiu falsigita anarkiisto nomita Vidal Mata! Kiom da mensa mizero kaj kiun abundon tiel grandegan de nedankemo li pruvis, prisilentante ĉiujn ĉi aferojn; trompi mizere la argentinan popolon kaj la organizon, kiu sendis lin al Rusujo; blinde laŭdi, kontraŭ mono aŭ kontraŭ kio ajn, en sia libro tion mem, kion aparte li diris al mi, ke abomenis!

Tre baldaŭ, lacaj jam pro la malsato kaj la mankoj, la politikaj rifuĝintoj komencis protesti pro la nesufiĉan monhelpon kaj pro la malrespekta traktado, kiun ni ricevis.

Ni komunikis niajn plendojn al la delegitoj de niaj landoj ĉeestantaj en la 4a Kongreso de la Ruĝa Sindikata Internacio, sed malgraŭ la bonaj paroloj per kiuj ili akceptis nin kaj eĉ mi volas kredi, ke malgraŭ iliaj bonegaj intencoj, nenion oni povis atingi por solvi nian situacion.

Pro tio multaj enmigrintoj decidis eliri el Rusujo, sed ne sukcesis, ĉar se malfalcile estas eniri en sovetiajn terojn, multe pli estas eliri el ili. Tio anstataŭ esti paradizo, kiel multaj asertis, estas la Infero de Danto. Kiam oni estas interne, la pordo malfermiĝas malantaŭ oni; la vera problemo estas tiam reeliri.

Dum la tri monatoj, dum kiuj mi serĉis laboron ĝis ĝia atingo, mi devis klopodi vivteni min laŭ la plej bona maniero ebla. Mi ĉeestis en ĉiuj kunsidoj de la Kongreso kaj multfoje mi manĝis kun la hispanaj kaj argentinaj delegitoj invitita de ili. Tiel, kvankam ni pasigis iun nokton sen vespermanĝo, oni ne povas diri, ke ni malsatis kaj tiel evitis la fizikan dekadencon, kiu nepre regus nin.

Finis siajn taskojn la Kongreso kaj la delegitoj deiris por efektivigi ekskurson internen de USSR. Cele ke ili povis kolekti siajn lastajn impresojn, kies efikoj jam anticipe preparitaj devis fari al ili reveni hejmen entuziasmigitaj de la *bonega vivo*, kiu spertas la loĝantoj de la “Ruĝa Paradizo” (?)

Ne ĉiuj povas diri la samon kaj jam konstatas la leganto, kiel ne povas esti identa la impreso, kiun forportis de tiu lando tiu, kiu iris tien reprezentante Organizon, ke kiu estas simpla persekutato serĉanta en Rusujo protekton kaj rifuĝon. Nome ne estas la samo viziti Sovetian Union, ke loĝi en ĝi per la propra laboro.

Dum la tempo, kiu daŭris la Kongreson, unu el la hispanaj kamaradoj loĝantaj en Moksvo, Jesús Ibáñez, ege interesis pri mia situacio kaj klopodis per ĉiuj rimedoj, kiuj estis je lia atingo, ke oni al mi havigis laborpostenon kiel eble plej baldaŭ. Por tio, li kontaktigis min kun la kolego Bernardino Alonso, ankaŭ hispana, tiam laboranta en fabriko de mebloj. Iom poste mi estis akceptita kaj eklaboris kune kun li ĝis nia reveno al Hispanujo.

5a. La Komitatoj de Fabriko kaj la Sindikatoj.

Malgraŭ tiel pompaj nomoj, la Komitatoj de Fabriko kaj la Sindikatoj nur estas, en Rusujo, filioj de la Ŝtato kaj obeemaj kaj blindaj instrumentoj de la Komunista Partio. La rolo, kiun tiuj organoj plenumas, simple estas efektivigi kaj apliki inter la laboristaj amasoj de la urbo kaj la kamparo ĉiujn decidojn -konatajn aŭ ne-, kiujn prenas la gvidantoj de la oficialaj organoj -Politika Buroo, Komisarioj, trustoj, ktp- kaj klopodi ĉiurimede firme teni la senmovecon de ĉiuj laboristoj en la fabrikoj aŭ manlaborejoj, kie ili laboras, cele ke ĉi tiuj neniam povos, se tia estas ilia plaĉo, ŝanĝiĝi al alia manlaborejo, oficejo aŭ fabriko, kvankam estu pro la ekskluziva celo plibonigi sian ekonomian situacion.

La laboristoj, sub la konstanta kaj trafa viglado de la Komitatoj de Fabriko, pagas devigan kvoton de du procento de la salajroj, kiujn ili enspezas. Ĉi tiu kvoto servas por nutri la burokratan strukturon de la sindikatoj.

La leganto eble kredos -pro tio, kion oni al li diris aŭ pro tio, kion li legis- ke la postenoj de la Komitatoj de Fabriko kaj Estraroj de la sindikatoj akiras sin per popola elekto. Nenio pri tio. La demokratio nur estas tre uzata vorto, sed neniam praktikata. Kiam oni devas elekti postenojn, oni ne turnas sin al la asambleoj de fabriko nek de branĉo, sed ke tion faras la estraj organoj de la Komunista Partio, kiuj trudas siajn favoratojn.

Oni komprenas, sciinte tion, ke ĉiuj postenoj sindakataj aŭ de Komitatoj estas monopologitaj de la Komunista

Partio; kaj tiel klariĝas kial en unu kaj aliaj nur plenumiĝas, sen diskuto, la ĉiopova volo de la diktatoro.

Veras, ke oni okazigas ĝeneralajn asembleojn, sed ĉi tiuj, ĉu de Kooperativoj, ĉu de Sindikatoj aŭ aliaj organizoj, nur realiĝas pro pura formalismo, por la ekskluziva celo konfirmi la interkonsentojn, kiuj jam anticipe estis deciditaj en la ĉelo de la partio; sed neniam por diskuti aŭ analizi ilin.

La sistemo, kiun oni uzas por ĉi tiuj elektoj, estas la jena: ĉiujare, laŭ indikas la statuto, oni renovigas la Komitaton de Fabriko. Por realigi ĉi tiun renovigon, oni unue nomumas la membrojn en la kerno de la ĉelo de la Partio, havante tre zorgon pri tio, ke la elektitoj estu absolute fidindaj individuoj kaj, ke ŜPD ne povu vetoi ilin. Farita kaj ellaborita la listo, oni prezentas ĉi tiun al la ĝenerala asembleo por ke ĝi aprobu ilin, kio cetere ĉiam okazas.

Do ni vidas tute klare, ke ne estas en la asembleoj de Fabriko aŭ Manlaborejo, kie oni nomumas la membrojn, kiuj devas partopreni en tiu organo, sed ke la interkonsento tute estas ago de la Partio, kiu ĝin altrudas -kiel dirite- al la asembleo.

La jena ekzemplo klare ilustros la leganton pri tio, ke ni asertadas. Kiam en 1930 aperis la opozicio nomita de dekstro, gvidata de Bujarin, oni sciis, ke formis parton de ĉi tiu opozicio la ĝenerala sekretario de la rusaj Sindikatoj, Tomsky. Tuj li estis eksigita de sia posteno, sen la kunvoko kaj anticipa okazigo de iu Kongreso aŭ sindikata konferenco. Sufiĉis, ke la “Politika Buroo” kunvenis por ke la interkonsento estu definitive prenita kaj tuje plenumita. Samtempe estis nomumitaj du anstataŭantoj, ´`viroj de absoluta fido de Stalino, nomitaj Schvernik kaj Aboline.

Nek la sindikatoj, nek la komitatoj, nek la laboristoj mem havis ian partoprenon en la manovro pri kiu ili eksciis, kiam jam ĉio estis definitive solvita.

Ĉi tiu estas la demokratio, kiu regas en la sovetia lando! Sciinte tion, kio estas dirita, ĉu ni povas kredi, ke la laboristoj, la laboristaj amasoj plenumas iun kontrolon sur la diktatoroj? Ĉu estas ĉi tiu la koncepto, kiun la membroj de la diversaj komunistaj partioj de Hispanujo havas pri la komitatoj de fabriko?

Ĉi tiu sistemo kaŭzis, kiel logikan konsekvencon, absolutan maleston de la laboristaj amasoj en la politika kaj ekonomia vivo de tiu lando, kiu neebligas la facilan plenumon de la tiel trumpetata kvinjara plano.

Pro tio ankaŭ, kiam kie ajn de Rusujo devas okazi asembleo, necesas, ke en la kunvokoj oni diru, ke la kunveno estos akompanita de teatra aŭ kina spektaklo, tiel ke la kunvoko kvazaŭ estas la programo de amuzo. Se oni ne ĝin faras tiel, neniu ĉeestus en la asembleoj kaj oni ne povus doni la impreson, ke oni konsultas la popolon. Ĉi tiel kaj malgraŭ ne interesiĝi pri la propra asambleo, la laboristoj iras kun siaj familianoj por ĝui la senpagan spektaklon, kiun la okazo proponas al ili… Sed tio esenca estas atingita. Ke ili ĉeestu por doni la impreson de kvanto.

Ni, kiuj laboris en la fabrikoj, kunsuferante la dolorojn kaj humiligojn de la proletaro, scias kial la laborista klaso ĉiutage pli apartiĝas kaj iĝas senformaĵo, io, kio perdis sian konsiston, kiu estis ĉi-okaze la fido pri idealo.

La fundamentaj kaj pli karakterizaj kaŭzoj de la popola indiferenteco estas la absoluta manko de demokratio kaj memkritiko. Tial la homamaso ne zorgas pri la Ŝtato nek la institucioj. Aliflanke, la terorismo multe zorgis elradikigi ĉiujn iniciatojn aŭ ĉiujn klopodojn manifesti la volon de la

proletaro. Neniu povas diskuti la agojn nek juĝi la interkonsentojn de la homoj, kiuj personigas la superajn organojn. La membroj de la partio ne estas pli ol blindaj adeptoj aŭ mekanikaj pupoj, kiuj movas sin laŭ la taktoj de la muziko, kiun Stalino ordonas ludi…

Tiel do nenion, absolute nenion, oni diskutas en la laboristaj asembleoj. La interkonsentoj -ni ripetas por ke la leganto perfekte konstatu tion- anstataŭ preni sin en la minoj, la fabrikoj, la manlaborejoj aŭ la kamparo -la lokoj, kie troviĝas la laboristaj amasoj, la solaj kreantoj de la tuta socia riĉeco- eliras el la kabinetoj de la trustoj, de la komisaroj kaj de la “Politika Buroo”. Kaj ve al kiu ne tute obeas la ordonojn devenantajn de la Ĉefstabo de Stalino aŭ, kiu simple kuraĝas diskuti ilin! Li estos konsiderita kiel kontraŭrevoluciulo, kiel trockiisto, kiel dekstremulo aŭ maldekstremulo.

La rusa popolo estas nuntempe senkapa popolo. Speco de politika kadavro sen iu rajto pensi kaj diskuti ion. La diktatorado de Stalino proponis al si paralizi la homajn cerbojn, uzante la plej despotajn kaj maljustajn procedojn: la kruelan persekuton, la lacegan karceron kaj la kruelajn ekzilojn en la glaciajn siberiajn estepojn.

Nur tiuj, kiuj ne loĝis en Rusujo kaj, sekve, nur konas la teorian koncepton pri la revolucio; aŭ kiuj faras tion por siaj propraj intereso kaj konveno aŭ ĉar ili estas pagitaj, nur tiuj, ni diras, povas solidariĝi kun tia diktatora reĝimo, kiu havas ne precedencojn en la historio. Nur tiuj povas defendi ĝin.

La rusa ekonomia vivo estas regata de sistemo tute kopiita laŭ bildo kaj simileco de la kapitalisma, por ne diri, ke estas la sama. Kompreneble, la laboristo ne estas ekspluatata de burĝo nomita s-ro Ajnulo aŭ s-ro Iu Ajn, sed tie la sola burĝo nomiĝas Ŝtato kaj la ekspluatado tute egale efektiviĝas. Tiel ke, la afero preskaŭ estas la sama kaj la

solaj, kiuj povas mezakcepteble vivteni sin, estas la hundetoj de la Ŝtato, kiuj nomiĝas burokratoj.

Krome, kiel ne ĉiuj naskiĝis sub la samaj kondiĉoj kaj, kiel la naturo faris nin malsamaj, estas devige -kiel ne diable?-, ke ekzistas, ankaŭ en la lando de la Libereco, diversaj sociaj hierarĥioj de la fizika ordo ĝis la intelekta. La fizika kaj intelekta kapablo -kiu mezuriĝas laŭ la kapriĉo de la direktisto- determinas la salajron, kiu respondas al ĉiu, kiel ni vidos en la jena ĉapitro.

Do restas tute provite -kaj ĉi tio estas, kion ni proponis-, ke la Komitatoj de Fabriko havas neniun rolon asignitan en la administrado de la produktoj. Ĉi tiu dependas de direktisto, kiu devus esti nomunita de la laboristaj asembleoj, sed ke -por ne perdi la kutimon de la demokratio- estas nomumita de la trustoj… Per tio oni diras, ke oni klopodas anstataŭigi la privatan kapitalon per la Trustoj de la Ŝtato.

La supera komisaro de la Nacia Ekonomio, konsilita de la diversaj komisaroj de la aliaj respublikoj, estas kiu zorgas nomumi la direktistojn kaj la administristarojn de la Trustoj. Ĉi tiuj siaflanke estas taskitaj nomumi la direktiston kaj la administristaron de kiu ajn fabriko apartenanta al la branĉo de produktado de tiu Trusto.

La direktistoj, laŭ la ĵusaj disponoj de la Komisaro, ĉeestas en speciala teknika lernejo, kie akiras, krom la nemalhaveblajn konojn por sia posteno, la praktikon pri la diversaj aspektoj de la fabriko kaj, kio estas pli grava, la spiriton de partio, kiu al ili instruas obei la ordonojn de supre kaj malŝati la volon de tiuj de sube.

La legendo pri tio, ke en Rusujo la produktado estas kontrolata kaj administrata de la laboristoj mem, restas forblovita. La produktadon administras la Komisaro pri

Ekonomio, la Trustoj de la Ŝtato kaj la direktistoj de fabriko. La laboristoj nenion. Ili eĉ ne ekscias. Ĉio, kio estas direktado iras de supre al malsupre, ne de malsupre al supre.

Do la rusa centralismo limigas la rolon de la komitato de fabriko fari simple kaj sincere, ke en la fabrikoj kaj manlaborejoj oni plenumu kaj realigu laŭlitere la interkonsentojn, kiujn prenas la organoj de la Ŝtato, kiuj pasas de ĉi tiu al Partio, de la Partio al la Sindikatoj kaj de ĉi tiuj al la Komitatoj de Fabrikoj…

6a. La salajroj kaj la laborkondiĉoj en USSR.

Por ektrakti aferon de tiel esenca graveco, kiel ĉi tiu de la salajroj, kiujn enspezas la laboristoj en la sovetiaj fabrikoj, estas tute necese, ke la leganto ne konsideris la aferon de la vidpunkto de la 1920-a Rusujo, de tiu periodo, kiam la monstra enlanda milito tute paralizis la produktadon kaj la tranportadon, neebligante la translokadon de regiono al alia de la nutraĵaj produktoj, kio kaŭzis, ke la mizero, la malsato kaj la morto kruelis per pli granda furiozo kontraŭ iuj loĝantaroj ol kontraŭ aliaj.

Nu ni ne parolos pri la rusa konstrua periodo, kvankam ni mallonge rakontos la historion pri la proceso. Tiam Rusujo nur estis terkultura lando, sen reala industrio kaj detruita de profunda kaj nekuracebla ekonomia krizo – gravigita de la ĥaosa kaj prokrastema stato, kiu sekvis la subtenitan lukton- malgraŭ ke –devige estas diri tion- ĝi enportis mirigan vivforton nutratan de la entuziasmo, kiun por la revolucia fakto sentis la tuta junularo, tiel de la urbo, kiel de la kamparo. Ĉi tiu entuziasmo havigis al ili blindan fidon pri la krea kapablo de ilia propra penado kaj ili sentis sin kun sufiĉaj energioj por konstrui, fronte al la malnova Eŭropo brutigita kaj dekadenca, novan mondon de libero kaj laboro reguligitan de rigore moderna ekonomio de socialisma tipo.

Tiucele, lokitaj la okuloj en la kreo de ĉi tiu revo, kiun ili volis realigi, la rusa popolo laboris, ne ok horoj, sed dek, ne kalkulante la dimanĉojn, kiujn ili dediĉis al la senpaga laboro “por la konstruo de la nova libera Ŝtato”. Okazis, ke la rusa homamaso kutimiĝinta al la sinofero kaj soifa de libereco

konstatis, ke la enlanda milito elĉerpis la esencajn riĉofontojn de la lando, ke la terkultura riĉeco estis malutiligita kaj, ke por ekfunkciigi tiun grandegan produktantan maŝinon estis tute necesa grandega kolektiva penado. Oni bezonis superhoman firmecon por ree levi tiun falintan strukturon, kiu per la forto de la armiloj iĝis –dolore sed ankaŭ ĝoje- komuna havaĵo.

Ĉiuj –viroj, virinoj, infanoj kaj maljunuloj- laboris regataj de la sama aspiro. La kampoj ekkultivis sin kaj el ili estiĝis la viviga tritiko kaj la ceteraj terkulturaj produktoj. Funkciis la fabrikoj kaj la fervojoj vekiĝis, komencante efektivigi la transporton de varoj kaj produktoj de unua neceso. La produktado eknormaligis sin kaj la naturaj riĉecoj de la lando ree akiris potencon kaj vivforton. La spectro de la mizero iom post iom fuĝis de Rusujo kaj plifirmiĝis –tago post tago- la krea kapablo de mistika popolo, regata de fido je idealo kaj subtenita de la ardo de proksima celo.

Sed la bolŝevikoj ne komprenis ĉi tion. Ili ne sciis aŭ ne volis rimarki la gravecon de tiu kreanta forto elmontrita de la laboristoj. Ili ne vidis, ke la popolo, per si mem, per sia propra impulso, povis normaligi la situacion kaj sufiĉis por solidigi tiun novan ordon, kiun la proletaro penis realigi. Kaj tiel estis, kiel blindaj antaŭ la potenco de la homamaso, ili deklaris en 1921 la politikon de la “NEP”…

Mastro jam de la Ŝtato la bolŝevika partio, ĝi dediĉis preni decidojn kaŝe de la laborista klaso por poste altrudi ilin al ĝi. Ni ne povas priskribi per la tuta amplekso kaj beleco de la realo la malbonan impreson, kiun tia politiko kaŭzis inter la laboristoj. La popola indigno ne malfruis videble manifesti sin, kiam ĝi rimarkis, ke alifoje aperis la privataj kapitaloj en la rusa industrio. La Nepman-o en la urboj kaj la Kulako en la kamparo.

Iom post iom restariĝis la tuta komplika kapitalisma sistemo en la vasta sovetia teritorio, tiom, ke hodiaŭ post dekkvar jaroj de “proleta” diktatorado ĝi estas la ununura sistemo, kiu regas la ekonomian vivon de la lando.

La rusa popolo kaj mi kune kun ĝi estas tute konvinkita, ke la reveno al la “NEP” estis ruza perfido, plenumita de la bolŝevika partio, kiu havis kiel sekvon la tutan devion de la sociala Revolucio, kiu kun tiel promesplenaj prognozoj komenciĝis en oktobro 1917.

Post ĉi tiu mallonga, sed bezona rakonto pri kiel Rusujo bedaŭrinde refalis en la saman kapitalisman sistemon, kiun ĝi antaŭe faligis, perfekte komprenos la leganto, ke estas juste kaj logike, ke ni ne parolu –kiam ni elmetos la kondiĉojn de vivo kaj laboro- pri la hieraŭa Rusujo, pri tiu nacio malorganizita kaj sen industrio, kiu meritus tian nomon, sed pri respubliko, kie realiĝis rimarkindaj teknikaj kaj industriaj progresoj.

Ni parolas pri la 1932-a Rusujo, kiu kun siaj zigzagoj kaj konformiĝoj lokiĝis ĉe la nivelo de kiu ajn kapitalisma lando kaj, kiu konkurencas en la tutmondaj merkatoj kun la plej progresantaj nacioj komerce kaj industrie parolante.

La “oficiala” taglaboro en la sesdek kvin procento de la industrioj estas de sep horoj kaj la laborsemajno nur konsistas el kvin tagoj. Tamen endas rimarki, ke adoptis ĉi tiun novan labormanieron post 1930 *ĉiuj tiuj fabrikoj, kiuj sukcesis plenumi la okhorajn produktadon dum sep*. Tiel do, ni asertas, ke estas kompleta farso la kliŝo, kiun oni ekspluatadis pri tio, ke la taglaboro de sep horoj stariĝis pro la ekskluziva celo havigi okupon al la granda kvanto de sendungaj laboristoj.

Ĉi tio nur estas trompa demagogio pagita de Moksvo. Ni pruvos per elokventaj kaj veraj nombroj, ke la rusa

proletaro nuntempe produktas pli laborante sep horojn ol hieraŭ dum ok kaj tiuj, kiuj estas sendungaj, daŭre estas terura problemo de malfalcila –por ne diri neebla- solvo.

En 1928, laŭ oficialaj statistikoj, estis en Rusujo 1.800.100 laboristoj sen laborposteno. En 1929, post la komenco de la kvinjara plano, ili malpliiĝis je dudek procento proksimume, *sed ne malaperis* –tute ne-. Tio sola, kio reale malaperis, estis la statitiskoj, kiuj post tiu dato ne plu eldoniĝis cele ke neniu povus publikigi ilin. Ĉi tiu estas la plej facila maniero, kiun trovis la sovetia registaro, por eviti la doloran kontraston kun la ceteraj kapitalismaj landoj, kie la krizo ĉiutage pli akriĝis, do laŭ la plej ĵusaj burĝaj statitiskoj ekzistas en la mondo profesia armeo de sendugitoj, kiu atingas tridek kvin milionojn. Ĉi tiuj estas la rezultoj, kiujn la raciigo de la laboristaro metita en manoj de la kapitalismo kaj la Ŝtato kaŭzas al ni!.

En Rusujo, la tuta mana laboro kaj parto de la intelekta realiĝas laŭkvante. Tio estas, ke la salajroj estas determinitaj de la kvanto da produktado realigita. Tamen, la salajroj de la laboristoj de sama industrio varias ne laŭ la profesioj aŭ oficoj, sed laŭ la fizikaj kaj intelektaj kapabloj de ĉiu laboristo. Eble pro tio, unu el la profesioj plej bone pagitaj, malgraŭ la tri kategorioj de salajro, estas la metalurgia, kaj unu el la plej malbone konsideritaj la metia kaj teksa industrio.

Cele loki nin en intera punkto, por doni pli bonan ideon pri la salajro, ne parolante pri la maksimumo nek pri la minimumo, ni baziĝos sur alia ajna profesio el kiu ni povos dedukti pli-malpli, kiuj estas la kurantaj salajroj de la rusa laboristo.

Ni do studos la situacion de la laboristoj de la branĉo de la ligno, ĉar mi laboris en ĉi tiu. En ĉi tiu branĉo ekzistas ses kategorioj de laboristoj. La kategoriojn klasifikas la

submastro de la sekcio al kiu oni apartenas en ĉiu fabriko, kaj la aron de ĉiuj kategorioj prezentas la Sindikato en la kolektiva kontrakto, kiun ĉiujare ĝi okazigas kun la administristaro de la fabriko, se estas Trusto de la Ŝtato, aŭ kun la entreprenoj, se ĉi tiuj rilatas kun privata kapitalo.

Tiel ke, kiam laboristo eklaboras en fabriko, li ne scias la enspezotan salajron, nur post tri tagoj aŭ unu semajno la submastro komunikas al li la kategorion, kiun oni al li asignis kaj la salajron, kiun al li respondas. Okaze, ke la laboristo ne konformis kun la asignita kategorio, li neniel povas forlasi la laborpostenon. Li nur disponas la rimedon skribi atentan kaj detalan peton al la fabrikkomitato, protestante kontraŭ la klasifiko kaj donante siajn kialojn. La fabrikkomitato, se ĝi opinias oportuna, kunvenas kun la administristaro kaj ekzameninte la solvon kaj la plenumitan laboron de la depostulanta laboristo, definitive decidas kiu estas la kategorio, kiun al li respondas.

Iufoje okazis –kaj mi vidis iujn-, ke laboristoj laborantaj en fabriko estis enskribitaj en la kvina kategorio, kaj enirinte en alian oni asignis al ili la kvaran, eĉ la trian. La depostulo ĉi-okaze preskaŭ ĉiam donas favoran efikon.

Tiuj, kiuj antaŭ longe laboras en fabriko, se deziras –pro bezono aŭ pro kio ajn- altigi sian kategorion, devas ankaŭ skribi peton al la fabrikkomitato por ke ilia altiĝo estu studota. Okaze ke la respondo estas negativa, la petanto neniel povas forlasi la fabrikon, ĉar la strikrajto estas nuligita kaj oni rigore punas tiun, kiu klopodas uzi ĝin.

Rilate la salajratan laboron, la klasifiko per kategorioj ankoraŭ havas iun efikon, ĉar determinas la salajron, kiun devas enspezi la laboristoj, sed en la laboro laŭkvante havas nenian efikecon kaj ja multajn ĝenaĵojn.

Estis kelkaj branĉoj, kiel tiu de la vestofaro ekzemple, en kiu, kiam oni determinas la prezojn de la laŭkvantaj laboroj, ankaŭ oni konsideras la sindikatajn kategoriojn. Ekzemple: por kudri ĵakon, necesas laboristo de la kvina kategorio. Tiam oni determinas la prezojn laŭ lia sindikata kvoto, ne laŭ kaprico de la submastro. Se por kudri pantalonon, necesas laboristo de la tria kategorio, la enspezotaj salajroj estos laŭ lia sindikata kvoto. Tiel, ke se laboristo de la kvina kategorio havas, kiel sindikatan kvoton, 4.80 kaj tiu de la tria nur havas 3.20, kiam oni altigas la pluson de 38 procento por la laŭkvanta laboro, okazas, ke tiu de la kvina kategorio enspezos 6.62 kaj tiu de la tria nur 4.41

Same okazas en la ceteraj kategorioj. Tiel, ke la laborhierarĥioj daŭre validas, malgraŭ ke oni tiom luktis kontraŭ ili kaj, ke aperis ilia nuligo en la komunista programo.

Tuj sekve ni detalos la sindikatajn kategoriojn, kiuj estis determinitaj de la komitatoj de la sindikatoj kaj sub kies nefleksebla normo oni determinas la salajrojn kaj prezojn enspezotajn de la laŭkvanta laboro. Sed antaŭ ol fari tion, endas averti la leganton, ke en Rusujo nuntempe la laboro ne estas individua, ĉar la sistemo de produktado transformiĝis, sed kolektiva. Per ĉi tiu sistemo la gvidantoj pretendas, ke la laboro estu pli produktema. Pro ĉi tiu kaŭzo, en la plejparto de la fabrikoj, oni produktas kolektive, farante brigadojn aŭ grupojn el dek aŭ dudek samfabrikanoj, kiuj realigas la laboron komune, kvankam la salajroj, en multaj brigadoj, ankaŭ estas pagitaj laŭ la kategorio de ĉiu.

La sekva tabelo, kiu montras la kategoriojn ekzistantajn en la branĉo de la ligno kaj la salajroj, kiuj respondas al ĉiu, donos klaran ideon pri la sistemo:

Sindikata kvoto	Prezoj de la laŭkvanta laboro		
		1928	1931
1a… 1.75 rubloj	Ŝrankoj	3.15	1.40
2a… 2.50 rubloj	Manĝoĉambraj tabloj	2.12	0.90
3a… 3.20 rubloj	Oficejaj tabloj	2.55	0.90
4a… 3.85 rubloj	Komodoj	1.35	1.00
5a… 4.80 rubloj	Bufedoj	3.30	2.25
6a… 5.60 rubloj	Bibliotekoj Unu seĝo	2.50 0.38	1.80 0.24

Al ĉiuj ĉi kategorioj, se oni laboras laŭkvante, aldoniĝas la 38 procento de pluso, tiel, ke laboristo de la kvara kategorio finfine enspezas 5.31. Sed la kurantaj salajroj, kiujn oni enspezas, ne superas la 60 ĝis 80 rublojn monate por la braklaboristoj kaj la 120 ĝis 150 por la kvalifikitaj laboristoj. La submastroj kaj direktistoj de fabrikoj varias inter 180 kaj 300 rubloj; la inĝenieroj, teknikoj, profesoroj, direktistoj de la trustoj, komisaroj de la popolo, ktp, de 400 ĝis 2500 rubloj.

Ankaŭ eniris en la historion tio pri la sobreco de la homoj de la partio, ĉar ĉiuj superaj dungitoj (de direktistoj de fabriko, inĝenieroj ĝis komisaroj), kiuj estis membroj de la partio, antaŭe enspezis kiel maksimume 220 rublojn monate. Nuntempe ili enspezas la samajn fabelajn salajrojn, ke la ceteraj.

Stalino, kiu, laŭ li diras. “ne favoras la malegalecon de la salajroj”, asertis, ke se inĝeniero, kiu ne estis membro de la partio, enspezis 500 rublojn monate, estis juste kaj egaleme, ke iu apartenanta al partio kaj havanta la samajn profesiajn kapablojn devis enspezi la samon. Kaj oni

interkonsentis la altigon de salajroj al ĉi tiuj homoj, en la ĝusta momento, kiam estis pli malfacila la plenumiĝo de la kvinjara plano, kaj kiam la Ŝtato kaj la partio mobilizis la financajn rimedojn, eĉ *malaltigante la prezojn de la laŭkvanta laboro*.

Ĉi tiu lasta dispono kaŭzis, kiel konsekvenco, malpliigon de 20 procento en la salajroj de la laboristo, dum la burokrataro anstataŭ partopreni en tiuj malpliigoj, vidis altigi la tipon de sia salajro, ĉar de 220 rubloj, kiu estis la enspezota maksimumo, pasis al 250 rubloj *kiel minimume*, kun la garantio, ke ĉiu individuo enspezos de ĉi tiu kvanto supren, laŭ la respondeco de la posteno, kiun li plenumas.

Ĉar –kion diros la regantoj-, kiel povas okazi, ke direktisto de fabriko enspezas la samon, ke tiu de trusto? Ĉu estas juste, ke majoro de la ruĝa armeo enspezas la samon, ke komisaro por milito? Ĉu estas logike, ke manlaboristo enspezas la samon, ke intelektulo? Ĉu aŭ, ke braklaboristo enspezas egalan salajron, ke kvalifikita laboristo? Ili, ĉar tio povis favori ilin, opiniis, ke tio ne estas justa kaj akordigis la ekonomian malegalecon akompanitan de ties respondaj socialaj hierarĥioj. Ni tamen opinias la malon.

Ĉu la komunismo defendata de Stalino ne proponas la malaperon de la sociala malegaleco? Kion do komprenas per komunismo la ruĝa diktatoro? Ni volas –malfacila afero- povi ricevi kategorian respondon al ĉi tiuj du demandoj.

Ni ne komprenas kiel post dekkvar jaroj ankoraŭ ne oni sukcesis prepari kelkajn kadrojn de specialistoj, kiuj regataj de la spirito de sinofero animanta la laboristojn, jam finitaj iliaj universitataj studoj, revenos en la fabrikon kun siaj ekssamfabrikanoj por kunlabori kun ili pere de sia tekniko, sed enspezante salajron de laboristo, ekzakte egalan, ke la aliaj kaj ne konsiderante sin superaj.

Do ni eĉ volas koncedi, ke post kelkaj jaroj de revolucio necesintus teni la kategoriojn kaj estintus pravigitaj la altaj salajroj por la ekskluziva celo komence altiri la teknikojn, inĝenierojn kaj ĉiajn specialistojn devenantajn de la malnova reĝimo. Se nun, jam ne.

Diru do la laŭdantoj de Rusujo, kion oni faris dum dekkvar jaroj de diktatorado por krei liberan konsciencon inter la universitatanoj kaj formi kernojn de specialistoj kun pure komunisma menseco? Oni ĉi-rilate faris nenion kaj se tio estas tiel, kiam malaperos la socialaj hierarĥioj kaj la ekonomia malegaleco sen kies nuligo neeblas komunismo? Stalino eble respondos al ni, ke la unueco de salajroj ne eblos ĝis ĉiuj ni estos ŝaguloj aŭ vivantaj enciklopedioj.

***

La popezan aŭ laŭkvantan laboron oni praktikis antaŭe, je la jaroj 1926 ĝis 1928 laŭ la sekva maniero. En la asembleoj, oni nomumis komisionon konsistigitan de individuo de ĉiu el la sekcioj de la branĉo. Ĉi tiu komisiono taskis kune kun la administristaro de la fabriko determini la prezojn de la laboroj. Okaze, ke oni ne atingis interkonsenton, la afero pasis al la estraro de la Sindikato, kiu analizis kaj decidis je lasta instanco.

Ĉi tiu iom demokrata sistemo ne sufiĉe konvinkis Stalinon, kiu decidis tute ŝanĝi ĝin. Hodiaŭ la laboristoj jam havas nenian partoprenon en la determino de la prezoj de la laŭkvanta laboro. La nova sistemo estas multe pli despota. De komencoj de 1931 stariĝis speciala burokrata organo, kies sola celo konsistis studi la prezojn de la plenumenda laboro, doni kaj dikti normojn, kiuj pri tio devas regi tiel, kiel determini kiom devas enspezi la laboristo kaj la tempon, kiun endas uzi por la plenumiĝo de ĉiu proceso.

En ĉiuj fabrikoj ekzistas ĉi tiu organo nomita “O.T.N.” (Oficejo pri teknikaj normoj), kies membroj ne estas nomumitaj de la laboristaj asembleoj, sed de la administristaro de la fabrikoj. Krome ĉi tiuj organoj taskas kronometri ĉiujn fazojn de la produktado kaj specifi la kvanton da pecoj, kiujn oni povas fabriki dum la tago, tiel per la manlaboro, kiel per maŝino. Akorde kun la kvanto determinita de “O.T.N.”, oni determinas la prezojn kaj deduktas la salajron, kiun povas enspezi laboristo, kiu laboris laŭ la kalkuloj realigitaj de la burokrataro. Se la laboristo ne atingas tiun produktadon kaj enspezas malpli, povas fari nenian depostulon, ĉar ĉiam oni respondas al li, ke tio, kio okazas al li, estas ĉar li ne volas labori.

Antaŭe, por konscie determini la prezojn de la laŭkvanta laboro, oni prenis kiel bazon la mezan nombron, tio estas, unue oni ĝuste kalkulis la kvanton da laboro, kiun povis plenumi la plej rapida laboristo, kaj poste oni realigis la saman kalkulon kun la plej malrapida laboristo. La diferenco de unu al alia donis la mezan nombron, kaj per ĝi oni determinis la salajron.

Hodiaŭ oni jam ne konsideras la malrapidan laboriston. Kiam ekis la kvinjara plano, la individua laboro ŝanĝiĝis al la kolektiva kaj kreiĝis grupoj da laboristoj. Elinter ĉi tiuj grupoj, oni elektis unu konsistigita de la plej rapidaj produktantoj, kiun oni nomis “*udarnaia brigad*” (speciale trejnita brigado) El la produktkapablo de ĉi tiuj rapidaj brigadoj, kiuj estas la gvidantoj de la produktado, oni determinas la prezojn de la laŭkvantaj laboroj, tiel ke, por atingi egalecon de salajroj, oni devas atingi la nivelon de produktado. Sed kiel tio ne okazas, en sama kategorio ĉiam estas kiu enspezas pli ol alia, ĉar kiel estas logike, ne ĉiuj povas fari la saman produktadon.

De antaŭ nelonge, la bolŝevikoj ne ĉesas kanti himnojn al la eminentecoj de ĉi tiu novega sistemo de laboro per grupoj asertante, ke la konkureco en la produktado de la diversaj brigadoj donas bonegajn rezultojn por la pliigo de la produktado. Ĉi tiuj rezultoj fariĝas pli efikaj, kiam la rivaleco montriĝas pere de spitoj inter la laboristoj de fabriko kontraŭ tiuj de alia, por vidi kiu produktas pli dum malpli da tempo. Sed oni devas klarigi, ke ĉi tiuj spitoj kaj konkuroj ne efektiviĝas pro kolektiva entuziasmo nek pro spontanea impulso de la laboristoj, sed ke ili okazas pro la monaj premioj starigitaj de la administristaro.

La brigadoj pli produktantaj ricevas premion, kiu estas pli-malpli alta laŭ la graveco de la produkto, kaj la plej bonajn laboristojn oni sendas iom da tempo al kuracdomo. Aliaj ricevas premiojn, kiel vestaĵojn aŭ aliajn objektojn, laŭ estas la laborkondiĉo aŭ eĉ la bezonoj de la laboristoj mem.

Ĉi tiu sistemo ekis dum la unuaj jaroj de la kvinjara plano, kiam oni starigis tri premiojn laŭ la sekva maniero: unue, por tiuj, kiuj pleje produktas; due, por tiuj, kiuj pleje ŝparas materialon; trie, por tiuj, kiuj produktas plej bonan kvaliton de varo.

Tamen nuntempe la laboristoj jam ne lasis trompi sin per ĉi tiuj premioj ne per la kromsalajroj, ĉar ili vidis praktike, ke tio, kio ŝajnis avantaĝo, servis por malpliigi al ili la salajrojn je 20 procento, ĉar apenaŭ ili superis la kadron de tio specifita, pro la sindikata kvoto kaj la laŭkvanta pluso, oni al ili malpliigis la prezojn de la peco. Tiel ke la laboristoj, kiuj dum la unuaj monatoj de la kvinjara plano penadis por produkti pli ol kutime, sole por atingi la specifitajn kromsalajron aŭ premion, vidis malice eksplutatita sian penadon per malpliigo de la salajro. Krome ili estis devigita daŭre produkti laŭ la sama maniero kaj kvanto, ĉar per sia

“heroaĵo” ili mem altrudis novan normon pri la produktota kvanto.

Elokventan ekzemplon pri tio, kion ni ĵus diris, ni havas en la sekcio de barnisado de la branĉo de la ligno, kies laboristoj de kvara kategorio, dum tiuj monatoj, kiam oni starigis la premiojn, sukcesis enspezi salajron de 8,40 ĉar atingis produktadon de kvar ŝrankoj tage, kiuj laŭ prezo de 2,10 por ŝranko, donas la cititan kvanton. Sed la taskitoj de la kronometrado –“O.T.N.”- starigis de tiam, kiel normon, la produktadon de kelkaj monatoj por ĉiu laboristo –sed anstataŭ daŭre pagi la pecon per 2,10, ili determinis novan prezon, kiu estas la numtempa uzata, de 1,40 por ŝranko.

Pro tiel granda malpliigo, kelkaj laboristoj ĵetis la voĉon, kiel montron de protesto, sed ne estis aŭskultitaj kaj iliaj plendoj perdiĝis en la malpleno. Por eviti kiun ajn etendon de la protesto, aperis en la organo de la Partio, “*Pravda*”, dekreto kiu diris laŭtekste, ke la salajroj de la laboristoj devis esti pagitaj ekskluzive akorde kun la sindikata kvoto kaj kun la 38 procento de pluso por la laŭkvanta laboro. Restis do elradike fortranĉita ĉiu klopodo de depostulo kaj oni metis novan buŝumon sur la buŝo de la laboristoj. Ĉu oni toleris tiel grandan ofendon en kiu ajn alia parto de la mondo?

7a. La ina salajro.

Ankaŭ en Rusujo, samkiel en kiu ajn kapitalisma lando, estas rimarkinda diferenco inter la salajroj, kiujn enspezas la viro kaj tiuj de la virino.

Kvankam oni faris kiel armilon de lukto la devizon “egala salajro por la viro, kiel por la virino”, ni povas aserti, sen timo esti polemikaj, ke tia devizo estas tutcerte belega frazo, kiu en Rusujo estas rigore defendita… sed nur teorie. Kiam oni klopodas apliki ĝin en la realo, ne mankas kialoj kaj sofismoj, kiuj pravigas ne fari ĝin. Kaj la virino samkiel ie ajn, kie oni parolas al ŝi pri libero, ĝemas pro la malaltigo de la valoro de sia penado.

Estas aserto, kiun jam neniu disputas, tiu de “por sama laboro, sama salajro” kaj, kiu ajn bolŝeviko, kiun vi rekontos surstrate, rekte al vi neatendite ĵetos ampleksan kaj konvinkan paroladon pruvante, ke tiel devas esti, tiel por la viro, kiel por la virino. Sed, kiel estas logike, ĉar estas registara sistemo, de la teorio ĝis la praktiko estas granda distanco, kaj estas reala fakto, ke malgraŭ tiel bela teorio kaj tiel ardaj defendantoj la salajro de la virino -por egala laboro- neniel estas egala al tiu de la viro.

La prezojn -la enspezo tie nomiĝas prezo- de la laŭkvanta laboro oni ĝuste starigas kiel en la antaŭa ĉapitro laŭ la sindikata kvoto, sed oni prenas, kiel bazon, la malsupran kvoton. Oni deduktas el tio, ke la salajro nepre ankaŭ estos malgranda.

En la Kooperativoj kaj magazenoj por vendo de produktaĵoj pomalgrande estas ambaŭseksaj dungitoj kaj kvankam la laborhoroj kaj laborkondiĉoj estas egalaj por

ĉiuj, ili ne enspezas la saman salajron. Por determini tiun diferencon en la enspezo, oni uzas sufiĉe arbitran sistemon.

En la magazenoj de nutraĵoj estas diversaj sekcioj; unuj dediĉas sin al la vendo de viando, aliaj al tiu de pano; aliaj al tiu de konfitaĵoj; tiuj, legomoj; ĉi tiuj, fruktoj, kaj tiel plu. Ĉiuj, kiuj laboras en ĉi tiuj sekcioj, kompreneble, nur dediĉas sin vendi. Kial do devas ekzisti inter ili la diferenco de salajroj? Ĉu ĉar ili estas de malsama sekso? Ĉi tiuj demandoj restas sen respondo. Sed la realo estas, ke kiu vendas la viandon ne enspezas la saman kvanton, ke kiu vendas panon; kaj, ke kiuj dediĉas sin vendi konfitaĵojn enspezas malpli ol kiuj dediĉas sin liveri fruktojn.

Ni konsentas pri tio, ke eble estas Rusujo la sola lando, kiu havas propran sistemon de salajroj, sed en neniu kapitalisma lando la hierarĥioj sin elmontras per tiel elstara spuro, kiel ĉi tie. Tion oni devas diri tre laŭte; ni devas ĉiariske krii ĝin al la vizaĝo de la mondo, malgraŭ ĉiaj malgraŭoj, kvankam ni povos detrui multajn revojn, ĉar ĝi estas la pura vero.

Pro la interesata mensogo de kiuj havas, kiel normon, la trompon kaj la fikcion; pro la asertoj de la salajrataj propagandistoj, ni havas la devigon klare, mallonge, travideble diri la tutan veron. Se ni ne farus tion, ni kredus nin malhonoritaj kaj rompus per indigno nian plumon. Ĉi tiu libro estas libro el lumo, estas proparolanto de la VERO, estas ĉefe la mano, kiu devas demeti la maskon al sistemo, kiu malantaŭ pompaj afiŝoj kaŝas ĉiujn difektojn, ĉiujn koruptojn.

Kaj ni parolu pri la salajroj. La virvendistoj de kooperativoj kaj magazenoj, enspezas 90 ĝis 150 rublojn monate. La vendistinoj nur enspezas 60 ĝis 80 rublojn monate. En la branĉo de la transporto -sekcioj Tramoj kaj Aŭtobusoj- la diferenco inter la viraj kaj inaj salajroj estas

ankaŭ notinda. Dum la viroj enspezas 80 ĝis 120 rublojn monate, la virino ne enspezas inter 60 kaj 70.

Ĉar en la antaŭe menciitaj branĉoj oni ne laboras laŭkvante, la salajro determinas sin laŭ la sindikata kvoto, kiel ni poste vidos.

Tiel por unu, kiel por alia sekso, por determini la salajron, oni konsideras la nombron da jaroj dum kiuj oni praktikadis la profesion, kaj laŭ tio, kion ni povos nomi profesia sperto, oni determinas la kategorion. Krom tio, la laboro dividiĝas en fakoj, por fari malpli suspekta tiun malegalecon pri la salajroj. En la branĉo de la ligno, ekzemple, la virinoj faras la vernisadon de la seĝoj kaj la viroj, tiun de la ŝrankoj. Por labori en la seĝoj, oni ne bezonas esti tiel kvalifikita, kiel por labori en la ŝrankoj, tial la sindikata kvoto estas malsama.

Tiel tiuj, kiuj tranĉas la viandon, havas sindikatan kvoton malsaman, ke kiuj vendas panon aŭ liveras fruktojn, kaj tiel en ĉiuj branĉoj.

Tiel oni pravigas en Rusujo, ke la virino enspezas malpli granda salajro ol la viro. Kvazaŭ kiu vernisas tablon aŭ seĝon ne realigas la saman agon, ke kiu vernisas ŝrankojn aŭ litojn! De la momento, kiam oni estas vernisisto, oni devas enspezi la samon, ĉu viro, ĉu virino. Ĉu tiu vendanta terpomojn ne havas la samajn kapablojn, ke kiu liveras karamelojn? Ambaŭ estas vendistoj kaj havas kapablojn por vendi unu aĵon aŭ alian; tial estas juste, estas logike, ke ili enspezu la samon, ĉu apartenas al malforta sekso, ĉu al forta.

Kiam ili sukcesos realigi la egalecon, kiam la hierarĥioj kaj la diferencigoj ne estos faktoj, povos la bolŝevikoj kaj ties protektatoj krii, ke en Rusujo la viro enspezas, kiel la virino kaj ĉi tiu, kiel tiu. Sed dum daŭras la ekonomia

malegaleco, dum la virino estas praktike konsiderita kiel malsupera, ĉiuj aranĝoj, kiujn elpensos la komunistoj por pravigi ĉi tiun ne pravigeblan skalon de salajroj, konvinkos neniun.

Ne sufiĉas ŝanĝi la nomojn de la aĵoj kaj purigi la frazojn per kaol[38] por ke ili restu brilaj. Oni bezonas, ke tio, kio brilas, estu oro. Tio estas, oni devas ŝanĝi la fundon.

Tio, kion ni ĵus aplikis al la kategorioj de salajroj kaj la kondiĉo de la virino, povas same apliki sin al alia aspekto. Oni diras kaj ripetas, ke en Rusujo ne estas klasoj. Tio veras. Oni neniigis ilin. Se iafoje vi irus en Rusujon kaj en kiu ajn fervoja stacidomo vi petus bileton de unua klaso, mi certigas al vi, ke vi ne povos aĉeti ĝin. En Rusujo, oni devas diri: “Donu al mi malmolan sidlokon”, ĉar, kiel ni diris, ne estas klasoj, sed anstataŭ ili, ekzistas tio malmola kaj tio mola. Ĉu ne ŝajnas al vi, ke ĉi tiu estas lerta kaj diskreta maniero trompi ĉiujn? Do la samo ĝuste okazas pri ĉio.

La ekonomia sistemo estas simila al de kiu ajn kapitalisma nacio. Tio sola, kiu ŝanĝis -kaj ni ripetas ĝin por ke la legando tute rimarku la realon- estas la nomoj, sed ne la aĵoj. La ministroj nun estas komisaroj kaj same kun la polico kaj la armeo. Same okazas kun la burĝaro, kiu iutage estos anstataŭita de la burokrataro, kiu nuntempe jam estas grandega vampiro de la rusa proletaro kaj konsistigas la laboristan aristokrataron.

38 NeT: purigilo por briligi plankojn, ktp.

8a. La laborista moveco.

Ĝis 1930 ekzistis en Rusujo tio, kion oni nomis “moveco de la laboristaro”. Tio estas, ke kiu ajn laboristo rajtis ŝanĝiĝi de fabriko aŭ manlaborejo ĉiam, kiam li ĝin opinius oportuna aŭ dezirinda, laŭ la bezonoj aŭ la avantaĝoj, kiujn la ŝanĝiĝo povus alporti al li, ĉar la salajroj ne estas egalaj en ĉiuj fabrikoj de la sama branĉo. Memkompreneble, tiel la kvalifikita laboristo (fakulo), kiel la braklaboristo, kiam ili vidis la eblon plibonigi sian materialan situacion, forlasis la postenon de fabriko aŭ manlaborejo por labori en alia.

Se ekzistintus unueco de salajro en ĉiuj fabrikoj, ne okazintus tiuj aferoj, ĉar kiun neceson havus la laboristo ŝanĝiĝi de fabriko, se li gajnos nenion pro la ŝanĝiĝo?

La moveco de la laboristaro nu okazis pro la malegaleco de salajroj.

Nuntempe, la rusa laboristo ne povas laŭvole forlasi la fabrikon. La Komunista Partio dekretis antaŭ nelonge la “senmovecon de la laboristaro”, per kiu rompiĝas la libero de la laboristo kaj estas devige labori ĉiam en la sama fabriko. Por ĉesi labori en kiu ajn fabriko, oni bezonas antaŭan permeson de ĝia direktisto. Okaze, ke iu laboristo ne plenumas tiun kondiĉon, *li estos akceptita en neniu fabriko*, ĉar ĉiu laboristo, kiam forlasas la fabrikon aŭ estas maldungita, devas ricevi de la direktisto komunikaĵon klarigantan la kialojn de la ĉeso aŭ maldungo. Kaj kiam laboristo eklaboras en fabriko, devas posedi atestilon de akcepto liveritan de la Borsa pri Laboro mem. Sen tiuj kondiĉoj tute neeblas trovi laborpostenon.

Tiujn nuligon de la individua libero, la homoj, kiuj estas en la Potenco, nomas *disciplino de partio*. Per tio oni pretendas aliigi la fabrikojn en rigidajn domegojn, kiel kazernojn loĝatajn de aŭtomatoj, kiuj nur movas sin kaj agadas laŭ la voĉo de la Stabo.

En la plimulto de la rusaj fabrikoj, la laboristoj, kiuj malfruiĝas dek minutojn, estas devigitaj perdi duonan salajran tagon. La 16-jaraĝaj metilernantoj nur laboras ses tagajn horojn, sed tamen havas la devon produkti laŭkvante, kiel la plenaĝuloj. Ĉu tio ne estas absurda kontraŭdiro kaj abomeninda atenco kontraŭ la infaneco? Ili laboras ses horojn, veras, sed laŭkvante, por ke ilia produktado estu egale al ok.

Cele, ke la leganto atingu pli ĝustan ideon pri la realo kaj konstatu, kiu estas la koncepto, kiun la diktatoro Stalino havas pri la moveco de la laboristaro, ni donos tuj poste la tradukitan tekston de la parolado, kiun li eldiris dum la Konferenco de ekonomiistoj kaj administristoj, okazinta en Moksvo:

“En serio da entreprenoj -diras Stalino- la nestabileco de la laboristaro ne malaperas, sed kreskadas ĝis 30 aŭ 40 procentoj dum la paso de sesmonato aŭ eĉ trimonato.”

“Kun movado de laboristaro, kiu atingas 30 ĝis 40 procenton trimonate, neeblas atingi altan ritmon de organizata kaj konstanta laboro”

“Tiel, la ritmo de konstruado en USSR dependis de la sinteno de la laboristaj amasoj; ĝi iafoje –multe- superis la antaŭvidojn, kaj alifoje restis tre sube de ili.

“Komence, la sinteno de la laborista klaso estis de entuziasmo preter ĉiu prudento; estis de fervora entuziasmo, laboro, kiu poste malfortiĝis, farante, ke la

sinteno de la laboristoj ŝanĝiĝis almenaŭ en certaj tavoloj de la laborista klaso…

“Antaŭe, je la momento de la rekonstruo de la industriejoj, kiam la teknika ilaro estis malmulte komplika kaj la skalo de produktado malmulte grava, la moveco de la laboristaro povus esti tolerata. Sed je la nuna momento, dum la periodo de intensiva rekonstruado, sur bonega skalo de produktado kaj kun tre malsimpla ilaro, kiuj estas la kaŭzoj de la moveco de la laboristaro? -demandas Stalino. Kion li respondas: “la salajroj neĝuste determinitaj, la malbonega sistemo de kvotoj kaj la maldekstrema egaleco en la kampo de la salajroj… La egaligo de la salajroj kaŭzas, ke la nekvalifikita laboristo sentas nenian intereson por iutage iĝi kvalifikita; tiel li duonvidis neniun esperon de rangaltigo, li konsideras sin, kiel sezona laboristo de la produktado, ne laborante sed provizore en iu entrepreno por foriri provi ‘sian sorton’ aliloke”

Tiuj deklaroj de Stalino enhavas multajn kontraŭdirojn. Unue, tute falsas, ke iam ekzistis inter la bolŝevikoj egaligo de salajroj. Hodiaŭ, ne ekzistas. La salajroj de la kvalifikitaj laboristoj multe diferencas de tiuj de la nekvalifikitaj. Ni ne parolu pri la teknika dungitaro: inĝenieroj, teknikoj kaj ĉiaj fakuloj, enlandaj kaj eksterlandaj, samkiel nenombreblaj “laboristoj de la artoj”, kies salajroj estis kaj estas kelkoble superaj al tiuj de la manaj laboristoj kaj braklaboristoj.

Alia kontraŭdiro de Stalino. Se, kiel li asertas, la kaŭzo de la moveco de la laboristaro estas la egaligo de la salajroj, la nekvalifikita laboristo havos neniun kialon forlasi entreprenon por “provi sian sorton” aliloke. Kiun hazardon li devus serĉi kaj kie, ĉar iliaj salajroj ĉie egalas al tiuj de la kvalifikitaj laboristoj?

Stalino krome diras, ke “eĉ la kvalifikitaj laboristoj estas devigitaj forlasi industrian entreprenon serĉante alian, por

trovi ĉi tiun aŭ tiun entreprenon, kie oni scias ŝati la laboron de la kvalifikitaj laŭ justa maniero”

Tiel okazas, ke la nekvalifikitaj laboristoj ne nur iras de entrepreno al alia serĉante “ŝancon”, sed ke la kvalifikitaj laboristoj praktikas la samon laŭ la sama senco, la malbenita egaligo, kiel kaŭzo de ĉio. Tiel oni klarigas la ĝeneralan okazintaĵon en la entreprenoj. Tiu klarigo estas tro malforta, simpliga; pruvas nenion kaj konvinkas neniun. Kiel ĉiu diktatorado de partio, la rusa konsistas el kontraŭdiroj nepre ligitaj inter ili.

Kiu estas la konkludo, kiun eltiras Stalino el la fakto de la ĝenerala okazintaĵo en la entreprenoj kaj kiujn disponojn defendas por meti finon al tiu situacio? Li proponas: “la nuligon de la egaligo kaj starigi la malnovan sistemon de la tarifo”. Tradukita al simpla lingvaĵo, tio volas diri: determini limon inter la kvalifikitaj kaj la nekvalifikitaj laboristoj ankoraŭ pli grandan ol kiu nuntempe ekzistas.

“En ĉiu branĉo de la industrio, diras Stalino, en ĉiu entrepreno, ekzistas la grupoj-gvidoj konsistigitaj de pli aŭ malpli kvalifikitaj laboristoj, kiujn ni devas alligi al la produktado kaj ĉefe se ni reale volas certigi al ni konstantan dungitaron, la grupoj-gvidoj estas la fundamenta ĉenero de la produktado.

“Engaĝi ilin al la produktado, al la manlaborejo, signifas ligi ĉiun laboristan dungitaron, definitive neniigi la fluon de la laboristaro. Sed, kiel engaĝi ilin al la entrepreno? Tio povas fariĝi per la rangaltigo, per la altigo de la nivelo de ilia salajro, per organizo de la salajro, kiu donu tion, kio respondas al la kvalifiko de la laboristo.

Kio signifas rangaltigi ilin kaj altigi la nivelon de la salajro? Tio signifas ĉefe malfermi la perspektivon por la

nekvalifikitaj laboristoj kaj doni al ili stimulon por la rangaltigo: la rangaltigo en la vicojn de la kvalifikitaj.”

Kiel kompletigaĵo al ĉi tio, Stalino proponas fini kun la restoj de la kolektiva administrado en la grandaj industriaj trustoj, konsistigitaj de cent ĝis ducent entreprenoj, reveni al la individua administrado samkiel oni faris en la ekspluatejoj sendependaj de la trustoj.

Sekve, la laborista klaso de USSR ricevas individuan administradon de la trustoj, individuan administradon de la entreprenoj; ricevas la privilegiitajn grupojn de la kvalifikitaj laboristoj aliĝintaj al la entreprenoj pro la alta laborsalajro kaj, laste, la grandaj amasoj de nekvalifikitaj laboristoj, kiuj rajtas la rangaltigon en la vicojn de la kvalifikitaj kaj ricevi tie for, super la plej bone pagitaj laborpostenoj, la sistemon ŝvitigan (pro malsano) de pago de la laŭkvanta laboro; tiaj estas la novaj metodoj de administrado de la entreprenoj en USSR ellaboritaj de la Politika Buroo kaj anoncitaj de Stalino en la Konferenco de administristoj.

***

Post la eltiraĵo de la parolado, ŝajnis al ni oportune publikigi la pripensojn, kiujn ĝi sugestis al la ilustre kritikisto Petro Archinof. La trafaj frazoj de ĉi tiu rusa verkisto esprimas, per pli granda klareco ol mi mem farus, nian penson pri tiu grava afero:

Ne estas la unua fojo, ke la komunista partio aperigas la aferon pri la “ekonomia” organizo de la laboro ene de la ekspluatejoj.

Ankoraŭ ĵuse, antaŭ du jaroj, la Centra Komitato de la komunista partio publikigis cirkuleron en kiu konstatante la nekapablecon de la kolektiva administrado en la postenoj de Registaro, preskribis la enkondukon de la reĝimo de la individua administrado ene de la fabrikoj.

La mekanismoj de administrado tiel, kiel la teknikaj organizoj apartenas al la “gvidanta” administristaro; rilate la sindikatojn, ili nur devas “periode konsulti la informojn de la administristaro, studi la materialojn relativajn al la produktado kaj enkonduki siajn proponojn sen tio, ke ili intervenu en la direktado de la entreprenoj”. Tiel ĝin deklaras la dispono de la Centra Komitato de la komunista partio de la 7a de septembro 1929.

Sekve tiu reĝimo de individua administrado ne plenumis la taskojn, kiujn la sovetia registaro trudis al ĝi kaj, du jarojn poste, la estro de la komunista partio estas devigita ree montri la danĝerajn paŝojn en la produktado.

De antaŭ kelkaj jaroj la laboristoj fuĝas de la penigaj laboroj minaj kaj siderurgiaj. La simpleco de la afero ŝajnas esti tute starigita; necesas, unue, studi la kaŭzojn de ĉi tiuj fuĝoj kaj poste klopodi forigi ilin.

Estas kompreneble, eĉ por infano, ke la homamasoj evitas la karbohavan basenon del Donec kaj la ceterajn branĉojn de la peza industrio pro la penigaj kondiĉoj de la laboro kaj, ke la energio kaj la vivo elĉerpiĝas al ili sen la nepra kompenso.

Neniu konsentos tute fordoni sin al la ekzisto de pario kaj ĉiu serĉos la kondiĉojn de ekzisto, kiujn li meritas kaj, kiujn li indas pro sia laboro. Ĝuste tio estas, kion faras la laboristaj amasoj de la minaj kaj siderurgiaj industrioj. Kaj ne nur tiuj, sed ankaŭ ĉiuj laboristoj, kiuj havas la kondiĉojn de peniga ekzisto kaj konsideras sin trompitaj, prirabitaj de la ekzistanta aferstato.

Neniu konsideros Trockij-on, kiel suspektan de simpatio al la anarkiismo, sed pri la nuna aferstato lia kritiko pri la parolado de Stalino en multaj punktoj konfirmas niajn vortojn.

Trockij skribas: “Oni ne fuĝas de la feliĉo por serĉi ĝuste la samon. La pliigo de la fluo signifas, ke la laborista amaso sentas sin kontraŭvole ene de la kondiĉoj, kiuj estas kreitaj de la tri jaroj de ekzisto de la kvinjara plano…

La alfluo de laboristoj de la kamparo al la urbo ĉesis, ne ĉar la kamparanoj atingis iun ajn idealan plibonigon, sed ĉar la situacio de la laboristoj kaj tion oni devas diri honeste, klare kaj sincere, *aparte malpliboniĝis de antaŭ nelonge* “(substrekita de Trockij)

Kaj Trockij ekavizas la bolŝevikajn gvidantojn: “Oni ne devas trompi sin mem; la fizikaj elmigradoj povas esti anonco de la politikaj elmigradoj” (Bulteno de la Opozicio, n-ro 2)

Tia estas la aferstato. Tia estas la fakto. Estas ridinde kaŝi sin kaj firmigi ĝin. Ŝajnas, ke oni devas uzi ĉiujn penadojn por maksimume altigi la vivkondiĉojn de ĉiuj laboristoj kaj, unue tiuj de la laboristoj apartenantaj al la branĉoj de la peza industrio.

Oni devas sekurigi la plenan vivtenadon de la laboristoj. Oni devas havigi al ili ĉambrojn, kie ili povos ĝui la normalan ripozon post la elĉerpiga laboro. Oni devas doni al ili la eblon kontentigi iliajn kulturajn aspirojn. Laste oni devas redoni al la homamasoj kaj ties sindikatoj la rajton organizi ili mem la administradon de la industrio kaj de la ekonomio de la lando.

Nur tiel kaj ne per la divido en kategorioj de privilegiitoj kaj ne privilegiitoj estas kiel oni povas konstrui la socialisman ekonomion kaj starigi la socialismajn ligojn inter la laboristoj.

Sed ne estas tiel, kiel agadas la diktatoraj eminentuloj de la komunista partio… De la izoleco de sia laborĉambro,

ili studas tutan sistemon de prenotaj disponoj, kiuj ĉiakoste kaj malgraŭ ĉio devas alligi la laboristojn al la entreprenoj. Kion signifas ĉio tio?

Tio volas diri, ke dum la periodo de longaj jaroj de registaro sen kontrolo, tiuj homoj lasis pensi kiel socialistoj; ili forgesis, ke oni devas entrepreni la socialisman aferon per socialismaj metodoj. Ili administre, burokrate pensas. Ili atendas, ke per cirkuleroj kaj ordonoj, oni povas konduki la vivon tien, kie oni volas. Tiu estas la kaŭzo de iliaj tragediaj kontraŭdiroj kun la vivo de la grandaj laboristaj amasoj.

Sed, ĉu la sociala problemo devas tiel solvi sin? Ĉu eble tiel iom ŝanĝos la ĝenerala situacio de la homamasoj, kiuj serĉas siajn politikajn kaj ekonomiajn rajtojn en USSR kaj nenie trovas ilin? Evidentas, ke ne. Oni devas pensi, ke la tasko de la laborista aristokrataro faros, ke ĝi servos kiel vipo de la grandaj homamasoj el ne kvalifikitaj, helpante la administristarojn alligi ilin al la entreprenoj, kiel proletaro de malsupera kategorio.

Stalino trankviligas ĉi tiun kategorion de proletoj per la promeso, ke ĉiu el ili povos rangaltigi en la personarliston de la kvalifikitaj kaj, sekve, plibonigi sian materialan situacion.

Ĉi tiu argumento similas tiun de la burĝaj ekonomikistoj, kiuj asertas ke, ene la kapitalisma socio, kiu ajn laboristo aŭ kamparano rajtas rangaltigi en la personarlisto de la entreprenistoj (negocistoj) kaj agentoj de la Ŝtato. Por pruvi tion, la burĝaj politikistoj citas ekzemplojn.

Tia estas la argumento; la realo estas tre malsama.

Nur la laboristaj kaj kamparanaj unuopuloj povas rangaltigi ene de tiuj personarlistoj. La laborista klaso entute daŭras kiel klaso, laborante profite de la entreprenistoj de la kapitalisma socio. Se ne, ĝi devas malaperi.

Ni trovas ĝuste la samon en la parolado de Stalino. Evidentas, ke la kvalifikitaj laboristoj rangaltiĝos, sed en ĉiuj branĉoj de la industrio la laboro estos farita de la ne kvalifikitaj. Ĉar la kvanta supereco pri la laboro ĉiam estos ĉe la flanko de la ne kvalifikitaj; sekve, en la entreprenoj estos la plimulto de ne kvalifikitaj laboristoj.

Oni ne povas trompi la vivon, samkiel oni ne povas trompi la popolon, dirante, ke ĝi estas la reganta popolo, mastro de la nova vivo, tamen teni ĝin sub la dependeco de la silentaj plenumantoj de la burokrata partio. Post la sperto de 14 jaroj de sia propra diktatorado, la komunista partio jam devis konvinki sin, ke la sistemo de la diktatorado de partio kaj la burokrataro nur faras bridi la socialisman kontruadon, ne lasante al la homamasoj la eblon fortigi sin kaj efektivigi sian grandegan konstrueman genion.

Sed la homamasoj vivas kaj movas sin. Inspiritaj de la granda ideo de sia emancipiĝo, ili movas sin detruante unu post alian ĉiujn obstaklojn, kiujn ili trovas meze de sia vojo de libereco, sendependenco kaj inteligenteco.

Ĉi tiu plektaĵo el kontraŭdiroj, kiun la bolŝevikismo kreis ene de laborista medio, nur povas esti malimplikita per la kompleta redono al la laborista klaso de ties ekonomiaj kaj politikaj rajtoj, nuntempe uzurpataj de malgranda kasto de karieristoj. Nur sur la vojo de la kreanta potenco, la diligento de la homamasoj kaj ties ekonomiaj organizoj, sur la vojo de la vastaj laboristaj demokratio kaj komunismo, eblos la eliro el la situacio en kiu nuntempe troviĝas la proletaro de USSR.

9a. La kolektivigo.

En 1929, la “Politika Buroo” de la rusa Komunista Partio proklamis dekreton pri la terkolektivigo. La kamparanaj amasoj, malkleraj kaj nesciaj, ne konantaj la verajn registarajn intencojn daŭre kultivis la teron, kiel la antaŭaj jaroj… Sed, je konkreta momento kaj neatendite por tiuj kompatindaj homoj, elementoj de la ruĝa armeo kaj ŜPD mobilizitaj de la Ŝtato por tiu ekskluziva celo, prezentis sin sur la kamparo kaj konfiskis la tutan rikolton kaj la brutaron de la kamparanoj, devigante ilin perforte, ke ili aliĝu al la terkultura-brutaraj kolektivaj farmoj.

Per tiel rapidaga procedo, per tiu armita “mildeco”, kiu havas, kiel superan argumenton, la bategon, kiun uzas ĉiuj diktatoradoj, sukcesis la sbiroj de Stalino treni tri milionojn da kamparanoj en la “Sovetiajn Farmojn”. Sed la tre malbonaj vivkondiĉoj, kiujn oni ĝuas en ili, kaj la etaj salajroj de malsato, kiujn oni ricevas, kreis tiel profundan ĉagrenon en la kamparo, faris tiel malama la vivon de la kamparo, ke la kamparanoj plurope fuĝas en la urbojn, forlasante la teron, kiun per tiom da amo ili kultivis kaj, kiu iam estis ilia tuta strebo.

La ĝenataj rusaj kamparanoj, cele venĝi la malican kaj kriman procedon de la sovetiaj diktatoroj, realigis kolektivan ribelon kontraŭ la ekspropriganto j. La kamparanoj, vunditaj en tio plej intima de sia esto, kiam ili vidis sin perforte senigitaj, sen klarigoj, je tio, kio tiom da ŝvito al ili kostis, kontraŭstaris armitan reziston kaj realigis verajn batalojn kontraŭ la ruĝa armeo, kies rezulto estis granda kvanto da mortintoj kaj vunditoj.

Tiuj faktoj ĉiam estis prisilentitaj de la rusa gazetaro, ĉar la komisiono pri cenzuro malpermesas la publikigon de tiaj novaĵoj. Per tio oni pretendas eviti, ke la malkontento, kiu nuntempe ekzistas inter la industriaj laboristoj, estu konata de la kamparanoj –aŭ male- kaj ne povu okazigi revolucian ĝeneralan movadon, kiu evidente riskos -se ne detruos- la tutan despotan strukturon de la Ruĝa Faŝismo.

La ago farita de la bolŝevikaj estroj ne povas esti pli malhumana. Ĉiuj homoj akordiĝos kun mi aserti, ke tute ne estas juste forpreni la teron al kamparano, se antaŭe oni ne havigis al li aliajn labor- kaj viv-rimedojn. Neniu, nome de ia ideo, kvankam tiu estu la plej eminenta, rajtas ĵeti en la malsaton kaj la malriĉecon aliajn homojn. Kaj en Rusujo oni faris tion kaj aliaĵojn al la kamparanoj.

La tri tipoj de socialisma ekonomio defendita kaj direktita de la tertrusto, kiuj estas: la “Kolĥozo”, la “Sovĥozo” kaj la “Komunumo”, pli-malpli reprezentas iajn terkulturajn fabrikojn, en kiuj la rusa virkamparano estas devigita labori laŭkvante enspezante la mizeregan salajron de 1,40 rubloj tage, 90 kopekoj la virino kaj 40 kopekoj la geinfanoj, kiuj ankaŭ devas labori *se volas supervivi*.

Kiel oni konstatas, la rusaj kamparanoj hodiaŭ spertas situacion, kiu ili neniam konis. Post traktado tiel manka de konsidero, oni iom post iom ruinigas ilin pere de impostoj, kiujn ni karakterizas kiel krudaĉajn, tiel esperante, ke detruita ilia vivo, ili aliĝos al la “Kolektivaj Farmoj”. Sed la rusa kamparano, tradicia sed intua, ne inteligenta sed malfidanta pro la suferitaj priraboj, diris, ke antaŭ ol iri al “Kolĥozo” li preferas morti.

Oni povas nombri milojn da kamparanoj, kiuj estis translokitaj kune kun siaj familioj al Siberio, pro la sola fakto ne pagi la impostojn al la komunista Ŝtato aŭ rifuzi aliĝi al la terkulturaj farmoj de la Ŝtato.

Por ke la leganto ne opiniu, ke ni skribas ĉi tiujn liniojn ne posedante veran dokumentaron pri la afero, por ke neniu imagu, ke ni luktas pro la ekskluziva troa deziro lukti, kaj cele ke neniu povas suspekti en ni malamikan fanatikecon aŭ sisteman manion kritiki la rusan registaron, ni devas averti -kiel ni jam diris aliloke en ĉi tiu libro-, ke nia komisio konkretiĝas simple elmontri la faktojn, kiujn ni konas, kaj pri kies vereco ni respondas.

Cele kolekti realajn kaj precizajn donitaĵojn pri tiu afero, antaŭ ol mi foriris de Rusujo por reveni en Hispanujo, amiko mia invitis min por ke mi pasigu kelkajn tagojn en la kamparo, en la hejmo de la familio de lia parulino. Ĉi tie mi havis okazon multan tempon paroli kun kelkaj kamparanoj. Maljunuleto, kun longa blanka barbo, rakontis al mi meze ploregoj kaj dum iliaj okuloj brilis pro indigno, ke antaŭ du tagoj lia filo estis forportita al Siberio kune kun aliaj pliaj de la sama loĝloko. Li aldonis, ke li mem estis minacita havi la saman sorton, kvankam li opiniis, ke oni lin respektis pro lia granda aĝo. Inter multaj aliaj aferoj, kiujn mi ne enmemoris, li rakontis al mi, ke nur antaŭ du monatoj la Ŝtato forprenis iliajn terojn kaj la brutaron, kiun li posedis, konsistanta el du bovinoj, ĉevalo kaj iuj ŝafoj, kaj lasis al ili sen iu rimedo kaj kun la devigo perlabori tiun apenaŭan salajron de 1,40 rubloj. Pro sia maljuneco li jam ne havis fortojn por la laboro, tial tiu sola, kiu povis alporti ion por la vivtenado de ambaŭ, estis lia filo. Tiu filo, kiun oni nun al li deŝiris de liaj brakoj por esti mortigita en Siberio kaj por mortigi lin pro malsato.

“Mi, kolego -plu diris la maljunulo- ekspluatis neniun. Hejme nur laboris mia filo; mi iomete helpis lin kaj tiel ni pasigis la vivon, relative feliĉaj. Nia sola havaĵo estis tiu terpeco kaj tiuj malmultaj animaloj, kiujn al ni forprenis. Nun, sen iaj posedoj, ankoraŭ ili volas devigi nin pagi imposton pri la rikolto. Ni rifuzis kaj ili forportis mian filon.

Vibrante pro la indigno pro tia procedo, sed dubante pri tio, ke la bolŝevikoj tiom despote kaj malhumane agadis, mi demandis lin:

-Ĉu eble vi estas kulako?[39]

-Mi ne estas kulako -li al mi respondis- neniam mi estis. Eble povus esti, ke nuntempe la sola fakto posedi bovinon signalis nin, kiel kulakon. Sed por ke vi vidu, kiel estis nia vivo, vi bezonas scii, kolego, ke la kooperativoj liveras al ni neniun produkton. Ĉiutage, ĵus kiam mallumiĝas, ni devas enlitiĝi…

-Kial? -mi demandis surprizita.

-Ĉar ne estas elektro forto kaj la sola lumilo, kiun ni disponas estas ĉi tiu -li diras al mi, montrante fingre olelampon- Sed, ĉar oni al ni ne liveras petrolon, neeblas ardigi ĝin.

-Kiel oni klarigas, ke al vi ne liveras petrolon -mi diris al li ridetante- se, laŭ asertas la gazetaro, pri la nafto oni finis la kvinjaran planon en du jaroj kaj duono?

-Mi ne scias la kaŭzon. Ni supozas, ke ili preferas eksporti ĝin antaŭ ol liveri ĝin al ni… al la kamparanoj.

Estis tia vibro en liaj lastaj vortoj, metis en ili la kompatinda homo tiom da emocio, ke ŝajnis al mi la plej granda el la riproĉoj, kiun oni povis ĵeti sur la vizaĝon de industria laboristo. Efektive, kio estas por ni kamparano? Ĉu ni ne metas sur la vorton, kiam li nomas lin, la tutan malestiman akcenton, kiun ni kapablas? Kaj… tamen kio okazus al ni sen la kamparano?

Mi tiam komprenis, nur tiam -tia estis la magia virto de la vortoj de tiu maljunulo-, kiu estis la grandega tragedio de

39 Noto el aŭtoro: Oni nomas kulakon al la riĉa kamparano, kiu posedas grandajn bienojn kaj havas dungitojn por labori ilin.

la laboristoj de la kamparo: produkti tion esencan, tion nemalhaveblan kaj, kiel pago, esti malestimataj.

Mi levis la kapon kaj medite rigardis la blankeco de tiu barbo kaj la noblaj trajtoj de la maljunulo. Kaj min kaptis nepra deziro genuiĝi je iliaj piedoj kaj peti al li pardonon. Estis, kiel strebo pardonigi en mi la kulpojn de ĉiuj industriaj laboristoj, estis bezono aŭdi per buŝo de la respektindulo la vortojn de pekliberigo, kiujn ni bezonas de ĉiuj kamparanoj.

Tamen mi ne genuiĝis. Maŝine mi proponis al li cigareton, kiel sola rimedo de muta kompenso.

Kiam li vidis la tabakon, liaj trajtoj vigliĝis. Li rulumis la cigareton kaj plene gustumante ĝin, rakontis al mi –meze malrapidaj ekblovoj el fumo-, ke la tabako estis por ili luksa varo, kiun ili nur povis gustumi tre malofte.

-*Majorca-on* oni al ni ne donas -li klarigis al mi-. Se ni deziras fumi, devas transdoni *dek* ovojn kontraŭ ĉiu pakedo de *majorca*. Kalkulu, kamarado, kiel estas nia senhaveco, se ni rimarkas, ke apenaŭ restas al ni kokinoj post la konfisko…

Mi vidis ekaperi el liaj okuloj, maldiskretajn, du momentajn larmojn, kiujn li rapide forviŝis, aldonante:

-Ni vivas apartigitaj de la mondo. Ŝajnas, ke ni estas pli malbonaj ol la brutoj por ŝarĝo. Ni estas forgesitaj de ĉiuj. Pri ni, ili nur memoras, kiam bezonas tritikon, terpomon aŭ brutaron. Sed ili neniam venas mildigi nian mizeron, nek dolĉigi la amarecon de nia situacio.

Tiel parolis tiu respektinda maljunulo, reprezanta figuro de la doloro kaj mizero de tuta socia klaso formetata, malestimata kaj miskomprenata. Liaj amaraj plendoj ĝuste reflektas la realon. Ne gravas, ke ĉiuj rusaj gazetoj plenigis siajn paĝojn per ditiramba literaturo, asertante, ke la situacio de la laboristaro ĉiutage pliboniĝas kaj, ke la salajro altiĝis

laŭ nivelo tre supera al tiu antaŭa al la milito. Nenio gravas, ke oni diris, ke komence de ĉi tiu jaro la salajroj estis altigitaj je 12 procento kaj, ke la kamparanoj aliĝas je milionoj en la kolektivajn farmojn. Oni devas rimarki, ke tiuj, kiuj asertas tiajn aĵojn, faras tion pro tre videbla intereso de partio, ĉar la realo, ni jam vidis -kaj vidos ankoraŭ pli bone- estas tute malsimila.

La strebo, kiu gvidas tiujn mensogajn artikolistojn, ne estas alia ol streĉi la senton de la laboristaj klasoj cele kredigi ilin je kio ne ekzistas. Bonsanĉe, la plimulto el la laboristoj tute konscias, ke la situacio tute ne ŝanĝiĝis dum la tri pasintaj jaroj de la kvinjara plano. Alia el la intencoj, kiuj instigas la komunistajn organojn enkonduki ĉi tiujn preskaŭ monstrajn mensogojn, estas la natura deziro ĉasi senprudentulojn, kiuj -kredemaj aŭ posedataj de naiveco- tute falas en la kaptilon, kiun ili preparas al ili.

Sed tiuj, kiuj longe loĝis en USSR, scias tutcerte, sen ia dubo, tion, kio okazas en la fabrikoj kaj manlaborejoj. Pro tio, nia honesteco, nia deziro servi al la homaro kaj la aspiro, kiu superregas nin, venkigi super ĉio la Veron, devigas nin ne prisilenti kion ni scias. Nia devo estas neniel servi kiel platformo al iu partio -ruĝa, blanka aŭ nigra-, sed klare kaj sincere, oferi nian sperton por la realigo de la LIBERECO.

La bolŝevikoj, por pardonigi sian tre malbonan kamparan politikon kaj cele pravigi severegajn disponojn, ŝarĝas la respondecon de ĉio, kio okazas en la kamparo, sur la kulakojn. Veras, ke tiuj neniam rigardis per bonaj okuloj la novan reĝimon; sed ni scias -kaj firme asertas-, ke la solaj rektaj respondeculoj de la kampara ĝenateco estas la “Politika Buroo” kun Stalino ĉekape kaj ties malfeliĉa centraliza sistemo, kiu senpie sufokas la individuajn volon kaj iniciaton.

La konfirmo pri ĉio, kion ni diras, povas resumiĝi per la jena demando: Kia influo povus havi la kulakon sur la malriĉaj kamparanoj, se tiuj samaj kamparanaj amasoj povintus konstati praktike, ke ilia kultura materiala situacio pliboniĝis se ili aliĝis al la “Kolĥozo” aŭ la “Sovĥozo”?. La logika kaj natura respondo estas ĉi tiu: Neniu!

Sed, ĉar la unuaj kamparanoj, kiuj aliĝis en la kolektivajn farmojn, devis forlasi ilin pro la tre malbonaj vivkondiĉoj, kiujn en ili oni al ili kreis, okazis, ke nuntempe en ĉiu kamparano estas kaŝa malamiko de la kolektivigo. Nu ne estas la kulakoj la respondeculoj de la malamoj al la “Kolĥozoj”; estas la tuta komunista sistemo kaj ĉefe la direktistoj kaj la administristaro de tiuj kolektivaj organoj de la terkulturo, kiuj, anstataŭ klopodi la plibonigon de siaj administritoj, nur kaj ekskluzive zorgas sin plibonigi siajn enspezojn kaj prirabi la kamparanojn.

10a. La kooperativoj pri konsumo kaj la krizo de produktoj.

La kooperativoj estis kreitaj por avantaĝe anstataŭi la magazenojn de la privata komerco. Ĉiuj ili estas sub la rektaj regado kaj direktado de la Ŝtato, kiu estas, kiu starigas aŭ enoficigas la administran organon de ili.

Ĝis la jaro 1930, la numero de aliĝantoj al la kooperativoj estis du milionoj. Poste, serĉante la rimedojn disvolvi la kooperativismon, la komunista partio decidis, ke estu venditaj produktoj al neniu, kiu ne estu membro de kooperativo kaj estu paginta sian kvoton.

Antaŭ la citita jaro, la kvotojn oni pagis laŭ la salajro enspezita de la laboristo. Tiuj, kiuj enspezis 50 ĝis 100 rublojn monate, pagis 15 rublojn; 100 ĝis 150, pagis 30; 150 rubloj ĝis la maksimumon enspezeblan, pagis 45 rublojn monate. Nuntempe (1931), la kvoto pliiĝis laŭ senmezura proporcio. Tiuj, kiuj pagis 15 rublojn, devas pagi 30; tiuj, kiuj pagis 30, nun 50; kaj tiuj de 45, nun 75. Tiuj, kiuj ne laboras, nome la edzinoj de la laboristoj, devas pagi kvoton ankaŭ proporcian al tio, kion enspezas la edzo; ekzemple: 50 ĝis 100 rublojn, 9.50; 100 ĝis 150 rublojn, 16; kaj la cetero, 22 rubloj.

Kiam efektiviĝis la decido ne vendi produktojn al nealiĝantoj al la kooperativoj, tiuj, kiuj troviĝis en tiu situacion, estis tute devigitaj aliĝi al ili, kvankam estu kontraŭ sia volo, ĉar se ili deziris manĝi kaj vesti sin, ne povis uzi alian rimedon.

***

Iuj povus kredi, ke ĉi tiuj kooperativoj estas regataj de la laborista klaso. Nenio pri tio. La laboristoj (kiuj estas la societanoj) eksciiĝas pri nenio kaj tute ne konas kiuj estas la atingitaj monprofitoj. Ankaŭ ne ili iam estas vokitaj al kunveno por elekti la estraron o esti informitaj pri io rilatita al la irado de la kooperativo. La Ŝtato zorgas ĉion kaj faras aŭ malfaras laŭ siaj profitoj; la laboristojn oni ne konsideras.

En kiu ajn kapitalisma lando, la societanoj de kiu ajn laborista kooperativo kunvenas por koni la akiritajn profitojn, la iradon de la institucio kaj la vojon sekvotan en la estonteco, emante ĉiam profitigi la aliĝantojn. En Rusujo, proleta lando (?), la kooperativoj ne havas sendependan nek aŭtonoman karakteron, ĉar kiel ni jam diris, la Ŝtato estas ilia kuratoro.

La laboristoj de Moksvo –samkiel tiuj de aliaj gravaj urboj, Leningrado, ekzemple- per la kooperativa identigilo povas fari la aĉetojn de ĝiaj produktoj en kiu ajn loko de la urbo. Nur paradoksan anomalion oni povas rimarki en ĉi tiu organizo kaj estas, ke, kvankam ĉiuj laboristoj povas trairi la diversajn kooperativojn, ekzistas en ĉiuj urboj de Rusujo kooperativo, kie la laboristoj ne povas aĉeti kaj, kiu –eskterordinaraĵo- estas la ununura, kie ne estas malabundo de produktoj. Simple estas la kooperativo de ŜPD[40].

Al ĉi tiu kooperativo oni volas doni karakteron de sendepedenco kaj izoleco, ĉar ĝi estas polica institucio, kiu ne devas fratece interamikiĝi kun la laborista klaso. Kompreneble, tia agadmaniero kaŭzis fatalan impreson en la laboristaj medioj, ĉar per tiom granda diferenco oni komprenigis, ke per la privilegio formiĝas nova kasto de malamikoj de la proletaro kaj fervoregaj defendandoj de la aŭtoritato kaj la diktatorado.

40 Noto el aŭtoro: Politika Polico por la Sekureco de la Ŝtato

Asertas la rusaj laboristoj, ke dum la cara reĝimo la polico ankaŭ ĝuis grandajn privilegiojn kaj estis lokoj, kiuj nur estis vizitaditaj de la anoj de tiu institucio. Hodiaŭ okazas ekazkte la samo. ŜPD havas proprajn kooperativojn por la ekskluziva polica uzo, domojn, restoraciojn, ktp. Baldaŭ ĝi havos fervojojn kaj aviadilojn. Ĉu oni povos akcepti ĉi tiujn procedojn en reale nova socio, konsistigita kaj regita de la proletaro mem? Mi opinias, ke ne. La idealo de proleta revolucio ne konceptas sin sub la ombro de subprema aparato. La polico ne akordas kun la proletaro, ĉar ĉi tiu aspiras al la glorigo de la laboro, tiu al la glorigo de la mallaboremo, la subpremado, la forto kaj la “ordo”.

La laŭdegantoj de la ŝtata komunismo kaj la regantoj mem de Rusujo asertas, ke ili defendas liberan socion el liberaj laboristoj. Kiel povas harmonii sin tiuj deklaroj kun la brutala realo, kiu al ni montras la policistojn apartigitajn de la proletaro, bone nutritajn, kaj akrigante siajn kojnodentojn por ĵeti sin sur kiun al ili ordonis ilia mastro: la Ŝtato? Ni interkonsentu, ke neniel oni povas pravigi tion kaj ni ankoraŭfoje konstatu, ke la komunista strukturo estas konstruita per serio da fundamentaj kontraŭdiroj.

Kiam ekis la kvinjara plano, la rusa Registaro volis doni al la kapitalisma mondo la senton, ke la Unio de Sovetiaj Respublikoj estis lando, kie ĉio abundis. Tial, por mirigi siajn rivalojn, ĝi starigis sian eksteran politikon de eksportado de nutraĵoj kaj krudmaterialoj, fundamente konfuza kaj falsa politiko, ĉar ĝi kreis malesperan situacion al la proletaro pro la malordo kaŭzita en la interna organizo.

Se antaŭ la milito, la karteloj, la trustoj kaj la germanaj industriaj sindikatoj ĵetis sin al la konkero de la eksterlandaj merkatoj, antaŭe havis la prudentan prizorgon reguligi la propran merkaton. En USSR oni volis sekvi ĉi tiun politikon, sed trudante al la proletaro tian kvanton da oferoj kaj

mankoj, ke se ĝi daŭradas, donos kiel rezulton generacion de malsanaj kaj elĉerpitaj homoj. La anemio regos la homajn organismojn, ĉar la nuntempa nutrado de la rusaj laboristoj estas 50 procento malpli ol la normala de ĉiu homo, kiu eluzis siajn energiojn pro tro peza aŭ lacega laboro, kiel kiun oni realigas -intensan- en la lando de la sovetoj.

La fama kvinjara plano povas resumi sin, por la laboristoj -kaj nur por ili, ĉar la burokratoj kaj ceteraj parazitoj no faras pli ol plibonigi sian situacion- per la jena frazo:"Produkti pli kaj manĝi malpli". Sed oni ne rimarkas, ke la homa organismo bezonas, por produkti, efikan konsumadon. Pro tio ne estas strange, ke la diktatoro Stalino bedaŭris, ke la kvinjara plano no povos plenumiĝi en multaj industrioj kaj ĉefe en la siderurgia kaj mina, ĉar, kiel eblas elteni la intensecon de la ĉiutaga superproduktado en laboroj de tiom da fizika eluzo?

Laŭ propra konfeso de Stalino, en tiuj industrioj nur eblis plenumi la 10 procenton de la plano, kaj en aliaj, kiel la teksa kaj metia, oni eĉ ne povis atingi tiun kvanton. Havu paciencon la temperamenta diktatoro kaj pensu, ke ĉiuj ĉi produktantoj, al kiuj li petas pli grandan penadon, manĝas multe malpli kaj malbone ol li… Li pensu pri tio kaj humane agu konsekvence.

Tiel do, tuj kiam efektiviĝis la kvinjara plano kaj malfermiĝis la eksportado, la kooperativoj komencis malhavi nutraĵojn laŭ alarmigaj kvanto kaj ripetiĝoj. Tre baldaŭ la krizo atingis la plej necesajn kaj nemalhaveblajn produktojn por la vivteno, kiel estas la pano, viando, terpomoj, la subvestoj kaj vestoj, la ŝuoj, ktp.

Konstatante, ke la krizo pligraviĝis tagon-post-tago kaj observante, ke la malkontento inter la popolo rapide kreskadis, la bolŝevikaj ekonomikistoj ĵetis la genian ideon

porciumi ĉiujn produktojn. Aprobita la plano, fine de 1929, ĉiuj produktoj estis porciumitaj laŭ la jena maniero: oni faris dividon laŭ kvar kategorioj, distribuitaj tiel: apartenas al la unua kategorio la laboristoj, kiuj laboras en iu industrio; al la dua, la laboristoj, kiuj laboras en aliaj ne industriaj profesioj; al la tria, la dungitoj kaj virinoj okupataj en domaj laboroj; al la kvara aŭ speciala, la infanoj malpli aĝaj ol dek jaroj.

La diferenco inter la unua kaj la dua kategorio ne estas tre konsiderinda, rilate tiun, kiu ekzistas inter ĉi tiuj kaj la tria. Por pli bone elmontri la kvantojn, kiujn ricevas ĉiu kategorio kaj por ke la leganto povu fari al si ĝustan juĝon pri ili, ni poste donas pruvantan tabelon, kiu per si sola parolas per pli elokvenco ol ĉiuj opinioj, kiujn ni povus kopii.

Antaŭe ni volas averti, ke la distribuo de la produktoj fariĝas per numerigitaj kuponoj.

Jen la tabelo:

Unua Kategorio	Dua Kategorio	Tria Kategorio	Kvara Kategorio
Sukero, 1½ kg monate	Sukero, 1½ kg monate	Sukero, 1½ kg monate	Sukero, 1½ kg monate
Teo, 50 gramoj monate	Teo, 50 gramoj monate	Teo, 25 gramoj monate	Teo, 25 gramoj monate
Sardinoj, 800 g. monate	Sardinoj, 600 g. monate	Sardinoj, 400 g. monate	Sardinoj, 200 g. monate
Makaronioj, 800 g. monate	Makaronioj, 600 g. monate	Makaronioj, 400 g. monate	Makaronioj, 400 g. monate
Oleo, 500 g. monate	Oleo, 400 g. monate	Oleo, 250 g. monate	Oleo, 250 g. monate
Vermiĉeloj, 400 g. monate	Vermiĉeloj, 400 g. monate	Vermiĉeloj, 250 g. monate	Vermiĉeloj, 250 g. monate
Butero, 200 g. monate	Butero, 200 g. monate	Butero, 100 g. monate	Butero, 200 g. monate
Faruna de mileo, 1 kg. monate	Faruna de mileo, 1 kg. monate	Faruna de mileo, ½ kg. monate	Faruna de mileo, ½ kg. monate
Ordinara sapo,	Ordinara sapo,	Ordinara sapo,	Ordinara sapo,

½ kg. monate	½ kg. monate	250 g. monate	250 g. monate
Tualeta sapo, 50 g. monate	Tualeta sapo, 50 g. monate	Tualeta sapo, 25 g. monate	Tualeta sapo, 25 g. monate
Ovoj, 10 monate	Ovoj, 10 monate	Ovoj, neniu	Ovoj, 15 monate
Viando, 100 g. tage	Viando, 100 g. tage	Viando, 50 g. tage	Viando, 100 g. tage
Blanka pano, 400 g. tage	Blanka pano, 400 g. tage	Blanka pano, 200 g. tage	Blanka pano, 200 g. tage
Nigra pano, 400 g. tage	Nigra pano, 400 g. tage	Nigra pano, 200 g. tage	Nigra pano, 200 g. tage
Konservaĵoj, 1 ladujo monate	Konservaĵoj, 1 ladujo monate	Konservaĵoj, neniom	Konservaĵoj, neniom
Tabako, 18 paketoj monate	Tabako, 18 paketoj monate	Tabako, 18 paketoj monate	Sekaj fruktoj, 500 g. monate
			Rizo, 500 g. monate Biskvitoj, 100 g. monate Lakto, ½ litro tage

Ĉi tiu tabelo validas -kompreneble- por la laboristoj de la grandaj urboj, kiel Moskvo kaj Leningrado; en la ceteraj regionoj de Rusujo, la produktoj malpliiĝas je kvanto, laŭ la loko, ekzemple la blankan panon oni nur manĝas en la du menciitaj urboj; en la cetero de la lando, oni manĝas nigran panon. Dufoje monate oni povas akiri anstataŭ viandon, kolbason, kaj anstataŭ panon, farunon.

La kamparanoj havas asignita neniun kvanton, tiel ke ili ricevas neniom de la kooperativoj krom tiuj, kiuj laboras en la terkulturaj farmoj de la Ŝtato.

La laboristoj, kiuj laboras en Moksvo kaj loĝas en la kamparo pro la malabundo de loĝejo rajtas aĉeti la saman kvanton, ke la aliaj, sed iliaj familioj nur rajtas la duonon el kio respondas al la tria kategorio… Nenecesas diri ion plian!

Kiel ne eblas, ke laboristo povas vivteni sin per tia nutrado, konstatante, ke la lakton oni akiras je tiel eta kvanto, ke apenaŭ sufiĉas por zorgi la bebojn kaj la malsanulojn, oni establis novajn kooperativajn magazenojn kaj restoraciojn, en kiuj oni rajtas akiri ĉiajn produktojn, sed kondiĉe pagi ilin laŭ supera prezo, kiu atingas kaj superas iafoje la 200 procenton de la kuranta prezo de la aliaj kooperativoj.

Al nutraĵa suplemento, kiun ofertas ĉi tiuj multekaraj magazenoj -multekaraj pro tio altega de la prezoj, ne ĉar ili estu plaĉaj -nur povas turni sin la burokratoj, la teknikistoj kaj la fakuloj, kiuj enspezas salajron de 10 ĝis 12 rubloj tage.

Same okazas kun la fruktoj. Por manĝi ili, oni bezonas fari la mendon anticipe kaj pagi ankaŭ anticipe, male, oni ne gustumas ilin.

La laboristaj restoracioj estas tute mankaj je ĉia komforto kaj eĉ higieno. La manĝaĵoj malpure prezentataj kaj malbone servataj. La manĝilaro makulata kaj malpliigata je la duono pro la konstanta uzo; male, la restoracioj vizitadataj de la burokratoj, delegitoj, fakuloj, teknikistoj, ktp, tio estas, en kiuj ĉeestas la “aristokrataro de la proletaro”, havas la samajn kondiĉojn de komforto kaj lukso, ke kiu ajn burĝa restoracio de Eŭropo.

Neniu laboristo povas vizitadi la grandajn restoraciojn de la nuntempa Rusujo, samkiel ne povis vizitadi ilin antaŭe. “*Metropol*”, “Centra Hotelo”, “Hotelo Eŭropo”, “Hotelo *Pasajes*”, “Hotelo *Lux*”, “Hotelo *Savoi*” kaj aliaj multaj, kiujn ni ne volas mencii, servas bonegajn manĝaĵojn per la samaj kondiĉoj, ke kie ajn de la mondo, dum en la popolaj restoracioj nur kostas de 70 ĝis 90 kopekoj. Kompreneble, per tiu prezo, oni nenie vidas la viandon. La menuo konsistas el du pladoj, unu el fiŝsupo kaj alia el terpomoj

kuiritaj kune kun la fiŝo, kiu servis por fari la supon. Ili ne liveras deserton nek vinon nek bieron. Si oni volas trinki glason da biero, do oni devas pagi 90 kopekojn. Pro tio, la rusoj nur trinkas teon, ne ĉar ili malamis la trinkaĵojn kaj alkoholaĵojn, sed ĉar la prezoj estas tro altaj por la reala salajro de la laboristo.

La manĝaĵoj, kiujn oni servas en la laboristaj restoracioj, kuiriĝas en la “Kuirejoj-fabrikoj” pri kiuj kelkaj aŭtoroj jam parolis kaj al kiuj oni volis doni troan gravecon. Oni devas klarigi, ke la nutraĵoj, kiujn havigas ĉi tiuj kuirejoj, estas de tre malbona kvalito, ne nur pro la uzataj produktoj, sed ankaŭ pro la fakto, ke ĉiuj homoj tie laboras per granda rapideco. Ĉi tiu cirkonstanco faras, ke multfoje la laboristoj devas forĵeti la manĝaĵon, ĉar ĝi estas kruda aŭ tro kuirita.

La malmultaj laboristoj, kiuj povas manĝi iom mezkvalite, estas kiuj laboras en fabriko posedanta propran kuirejon, tiaj, kiaj la fabrikoj de aŭtomobiloj “*Amo*” kaj tiu de la motoroj “dinamoj” kaj tre malmultaj pliaj. Sed vere mi diras al vi, ke tiuj, kiuj devas uzi la “kuirejoj-fabrikojn”, krom la malmulta variado, estas devigitaj engluti verajn karcerajn manĝaĵojn.

La vestaĵoj ankaŭ estas distribuitaj pere de numeritaj kuponoj. La laboristoj de ĉiu fabriko devas skribi liston per kiu oni petas al la superaj organoj la vestaĵojn, kiujn bezonas la nombro da enskribitaj laboristoj. Preskaŭ neniam oni ricevas la petitan kvanton, ĉar ili diras, ke ne estas stokoj.

En fabriko de mebloj de Moksvo en kiu laboras 1400 laboristoj, oni ellaboris mendon el 500 paroj da ŝuoj, 250 kostumoj, 100 paltoj, 150 pantalonoj kaj kelkaj subvestaĵoj. Post tri monatoj oni ricevis, ne la petitan kvanton, sed nur la trionon. Ĉi tiuj samaj aferoj okazas ofte en ĉiuj fabrikoj.

Tamen -kvankam estu hontaĵo por “komunisma” reĝimo- tiuj, kiuj havas materialajn rimedojn, ne bezonas fari mendon nek atendi, ke ĉi tiuj estos servitaj. Ili akiras ĉiujn ĉi produktojn en la magazenoj, kiuj ankaŭ apartenas al la Ŝtato kaj, kie -kiel ni jam diris- pagante ĉion je 200 procento pli multekosta, oni povas akiri ĉiujn tiujn aĵojn, *kies stokoj jam finiĝis por kiuj pleje bezonas ilin*.

Paro da ŝuoj kostas 10 ĝis 15 rublojn. Se oni aĉetas ĝin en ĉi tiuj magazenoj, ĝi kostas 30 ĝis 48 rublojn. La kostumoj, kies normala prezo estas 60 ĝis 80 rubloj, kostas 160 ĝis 200 rublojn; same okazas kun la ĉemizoj, la pantalonoj kaj ĉiaj vestaĵoj[41].

La fakaj laboristoj, kiuj iras al Rusujo dungitaj elde la eksterlando, havas disajn magazenojn kaj restoraciojn, kiel ŜPD. Tio multe kontribuis stimuli la ĝenatecon inter la rusaj laboristoj, kiuj konsideras sin flankmetitaj.

Iafoje mi parolis kun germanaj, anglaj kaj kelkaj hispanaj ministoj, kiuj laboris en la minoj de Donec, kiuj rakontis al mi, ke ili estis dungitaj por labori kvin jarojn en tiuj minoj. La laborkondiĉoj estas las samaj, ke la ceteraj

41 Noto el aŭtoro: Ni opiniis konvena aldoni al ĉi tiuj donitaĵoj la kurantajn prezojn de la nutraj produktoj, avertante, ke la vorto “kuranta” signifas, ke la produkto estas porciumata, tiel ke oni nur povas akiri la kvanton, kiun decidas la porciumo de la responda kategorio. Se oni bezonas pli grandan kvanton, tiam devas akiri ilin en la magazenoj pri kiuj ni parolas, kiujn malfermis la Ŝtato, en 1930: Sukero, po 72 kopekoj por kilo; teo, po 60 kopekoj por 50 gramoj; nigra pano, po 15 kopekoj por kilo; blanka pano, po 30 kopekoj por kilo; rizo, po 1,30 rubloj por kilo; sardinoj, po 1,50 por kilo; lakto, po 30 kopekoj por litro; makaronioj, po 1,20 rubloj por kilo; ordinara sapo, po 1,20 rubloj por kilo; oleo, po 1,30 rubloj por litro; tualeta sapo, po 50 kopekoj por briketo; butero, por 4,20 rubloj por kilo; ovoj, po 2 rubloj por deko; formaĝo, po 7 rubloj por kilo; kolbaso, por 4,80 rubloj por kilo; oranĝoj, po 5,80 rubloj por kilo; faruno de mileo, po 80 kopekoj por kilo; terpomoj, po 30 kopekoj por kilo; viando, por 2,20 rubloj por kilo; biero, po 2 rubloj por litro; vino, po 4 rubloj por botelo.

laboristoj, tio estas, ili laboris laŭkvante kaj po certa monkvanto por tuno de karbono. Tio sola, kio variis estis la vivkondiĉoj, la komfortoj kaj ankaŭ la prezoj de la laboro, ĉar dum la rusa laboristo neniam gustas la buteron, nek la ovojn, nek la formaĝon, nek aliajn bezonajn nutrajn produktojn, la eksterlandaj mineroj sategas, kiel patricioj.

Ĉi tiel ili povas labori kontentaj. Bona nutrado, domoj, kiuj havas bonegajn kondiĉojn proprajn al regule bone organizata vivo. Ni havas la certon, ke se la rusa laboristo posedus la samajn rimedojn de relativa bonfarto, havus multe pli da stimulo kaj amo al la laboro. Sed nun vidante la diferencon de la traktado, kiun li ricevas, malsupera al tiu de liaj eksterlandaj samlaboranoj, li sentas sian animon sinĝena kaj maŝine plenumas la laboron, nur por ne morti pro malsato! Se la traktado estus la sama, la komunista partio evitintus devi mobilizi en 1930 1500 laboristojn de la fabrikoj, ĉiujn apartenantajn al la komunistaj junularoj, por ilin laborigi en la minoj anstataŭe de la ministoj, kiuj rifuzis daŭre produkti. Ni komprenas kiom da pravo havis la ministoj, ĉar ne estas logike, ke antaŭ egaleco de laborkondiĉoj, tiom videble ŝanĝiĝis la vivkondiĉoj. La egalecon oni devas postuli kaj praktiki ĉiam, kiam oni faras elmontron pri ĝi.

Eble la diktatoro Stalino kreis, ke la rusa laboristo povas labori kaj multe produkti manĝante nenion. Eble li volas, ke samkiel la kamaleonoj, ili nur nutras sin per tio, kion ili povas “ĉasi” per la lango.

Ni konkludas do, ke la laboristoj apenaŭ povas gustumi la unuarangajn fruktojn el Kaŭkazo kaj Ukrainujo, kiel same devas rezigni gustumi multajn produktojn, naturajn aŭ artefaritajn, kiujn aliaj, ne pli kapablaj nek superaj al ili, multe konsumas. Ĉi tiun staton de maljusteco, kiu nur havas komparon kun la plej despotaj kapitalismaj landoj, pravigas

la hazardaj komunistoj per pli aŭ malpli brilaj sofismoj, sed mankaj je virtualeco.

Multaj el ili eĉ malĝentile kalumnias la rusan proletaron, dirante, ke ĉio tio okazas pro la mensa malfruo de la laboristaj klasoj. Certe, ni konvenas, ke la rusa popolo estis superregita dum multaj jarcentoj de la malvirto kaj la religio, sed tion ni kontraŭargumentas demandante: Kiu estas la lando, kiu ne suferas la pezon de ĉi tiuj ĉagrenaj ŝarĝoj, kiuj estas naturaj produktoj de la kapitalisma reĝimo?

Kontraŭ ĉiuj misfamigantoj de la popolo, kiuj volas pravigi la registarajn maltrafojn, aperis neniu laŭdanta la bonegajn kvalitojn, de boneco kaj sinofero, kiujn posedas la rusa homamaso, kiu rezignazias elteni ĉion per stoikismo kaj humileco nur kompareblaj kun kiujn havigas la FIDO por atingi la celon de siaj aspiroj.

La mistika spirito de la rusa popolas permesas, ke ĝi estu inklina al ĉiuj provoj kaj al ĝi donas stimulon por elteni la plej grandajn mankojn, la plej grandajn misfortunojn kaj plenumi la plej eminentajn sinoferojn.

Tamen alvenos tago kiam lacaj elteni paceme tiom da ofendoj, lacaj de tiom senfrukta sinofero, la rusaj laboristoj skuos la jugon de tiu diktatora reĝimo. Alvenos tago, kiam ili levos sian nukon kaj donos al la diktatorado la saman finon, kiun donis al Kerenski kaj la Caro.

11a. La kooperativo pri konstruado kaj la disdono de loĝejoj.

Post la Revolucio, ciuj domoj, ĉiaj konstruaĵoj, ktp ekzistantaj en Rusujo iĝis posedaĵo de la Ŝtato. Ĉi tiu, senigante je iliaj nemoveblaĵoj la antaŭajn proprulojn, nomumis administran organon taskitan efektivigi la enspezojn de la luprezoj.

Aliflanke ĝi decidis la kreon de la Kooperativo pri Konstruado, kies komisio estis konstrui loĝeĵojn por laboristoj. Komence ĉiuj laboristoj, kiuj ne havis loĝejon, estis devigitaj enskribiĝi en ĉi tiu Kooperativo, kiu taskis la distribuon de la apartamentoj inter siaj membroj tiel, ke ne eblus vidi la korŝiran spektaklon de kompletaj familioj dormantaj surstrate.

Sed iom post iom la Kooperativo pri Konstruado iĝis monopolo de la *laborista aristokrataro*, ĉar oni decidis kvotojn tiom troe altaj, ke estis tute neeble, ke kiu ajn laboristo povus kolekti sufiĉan monon por pagi ĝin.

Kaj tio pli ĝena estas, ke la kvotoj sinsekve pliiĝis dum la plej malfacilaj kaj angorplenaj momentoj, kiujn trairis la rusa proletaro pro la problemo de la loĝejo.

Moksvo ekzemple –por nur citi unu urbon- kalkulis loĝantonombradon, je 1913, de ĉirkaŭ unu miliono da homoj. Je 1931, la loĝantaro de tiu ĉefurbo havis pliigon de 200 procento, tio estas, ke la nombro da loĝantoj pliiĝis je 3.400.000. Antaŭ tiu tiel grandega obliĝo, la konstruo de loĝejoj ne atingis pli ol 50 procento super la antaŭa nivelo.

Nu kalkulu, la afabla leganto, se estas problemo por la loĝantoj de Moksvo trovi kie ŝirmi sin.

La konsiderinda pliigo de loĝantaro, kiun oni konstatas –ne nur en Moksvo, sed ankaŭ en la ceteraj laboristaj urboj de Rusujo-, okazas unuflanke pro la konstanta disvolviĝo de la industrio, kaj aliflanke pro la tre malbonaj vivkondiĉoj, kiujn suferas la kamparanoj kaj la misfarto, kiu regas ilin, ene de la tria jaro de la neniam sufiĉe trumpetita kvinjara plano.

Okazas, ke la kamparanaj homamasoj forlasas la teron, kiun ili akvumis per siaj ŝvitoj kaj foriras al la urbo, serĉe de pli grandaj vivebloj kaj pli bonaj rimedoj de kunvivado ol tiuj, kiujn ĝis la momento ili konis. Tia kamparana alfluo al la urbo donis kiel rezulton, ke oni multe rimarkis la mankon de brakoj en la terkulturo ĝis tia ekstremo, ke por kultivi la kampojn, kiuj restis nekulturataj, la Komunista Partio estis devigita mobilizi, je 1930, 25.000 laboristojn de la fabrikoj por ke ili iru labori en la “Terkulturaj Farmoj” de la Ŝtato.

La krizo de loĝejoj, kiun pli supre ni citis –kaj kiu kaŭzo estas klarigita per la antaŭa alineo- devigas la laboristojn loĝi 25 aŭ 30 kilometrojn distance de la urbo, kio kaŭzas gravajn ĝenojn kaj ne malmultajn elspezojn al kiuj devas ĉiutage translokiĝi al la manlaborejo aŭ fabriko lokita en la centro mem de Moksvo.

La kvoto, kiun oni pagas al la “Kooperativo pri Konstruado”, baziĝas sur la salajroj, sed la plej malalta almenaŭ estas de 250 rubloj, kiun oni devas pagi kiel eble plej baldaŭ, ĉar la disdono efektiviĝas laŭ la listordo de la pagintoj. Pro tio, la plimulto de la domoj de la centro aŭ tiuj pli bone lokitaj estas loĝintaj de tiuj burokrataj kaj teknikaj“sinjoroj”, kiuj enspezas altajn salajrojn kaj povas seniĝi je tiaj monkvantoj.

Por la laboristoj male estas tre malfacile –aŭ neeble- pagi tian kvanton, ĉar la eta salajro, kiun ili enspezas, apenaŭ permesas al ili kovri iliajn plej urĝajn bezonojn. Tio jam malfaciligas al ili la eblon asociiĝi al la “Kooperativoj pri Konstruado”, kaj krome estas la altega kaj senkonsidera kvoto, kiu ne nur estas obstaklo por ilia aliĝo, sed ke definitive malproksimigas ilin de institucio, kiu devis esti ilian plej grandan apogon.

Krom la “Kooperativo pri Konstruado” ekzistas alia ŝtata institucio, kiu ankaŭ prizorgas la konstruadon kaj disdonadon de loĝejoj. Estas la “loĝloka Soveto”, kiu disdonas la ĉambrojn, kiujn ĝi konstruadas, inter la “Sovetoj de kvartaloj”. Tuj ni diras, ke la nombro da loĝejoj, kiujn konstruas la “loĝloka Soveto”, estas tre malgranda kaj ne estas solvo, eĉ ne provizora rebonigilo.

La laboristoj enskribiĝas en la listo de la “Soveto de kvartalo” kaj devas atendi, ke venos ilia vico, kiu preskaŭ ĉiam malfruiĝas monatojn aŭ jarojn. La “Soveto de kvartalo” samtempe taskas havigi apartamentojn en la malnovaj domoj de la ĉefurbo, ĉar ekde la sama momento, kiam iu forlasas apartamenton, ĉi tiu ekestas respondeco de la “Soveto”, kiu prizorgas meti ĝin je dispono de la laboristo, kiu bezonas ĝin.

Je 1930, nur en unu kvartalo de Moksvo estis enskibiĝintaj en la listo de disdono la bagatela kvanto da MIL NAŬCENT laboristoj. El ĉi tiuj, kelkaj atendis vicon de antaŭ KVIN jaroj. Ĉi tiu ekzemplo, la malplej grava el la milo, kiujn ni povus citi, donas palan ideon pri kiel granda estas la manko de loĝejoj en Moksvo.

Laŭ konfeso de la Bolŝevika Registaro mem, la problemo de la loĝejo ne estos solvita ĝis post DEK jaroj, kiam la malabundeco malaperos, forpelita de konstanta kaj persista konstruado de novaj domoj. Ĉi tiu aserto, iom naiva

kaj tute teoria, ne sufiĉas por malfermi promesplenan perspektivon por la laboristoj, kiuj troviĝas mankaj je ĉambro, ĉar neniun konvinkas pri la boneco de reĝimo, la eblo resti DEK jarojn sub la libera ĉielo aŭ sub la arbitro de piaj aŭ kompataj amikoj.

Krome ni konsideru, ke kvankam oni intensigos la konstruadon ene de la limtempo fiksita de la registaro, la loĝantaro denove kreskos, ĉar kiel montras per granda trafo Panait Istrati[42], la naskiĝokvanto ĉiutage krestas en ĉiuj urboj de USSR. Tiel ke pro la konstanta kresko de la naskiĝokvanto kaj la ebla –tutcerta- kreado de novaj familioj kaj pro la malrapida konstruado, la problemo de la loĝejo daŭrados post DEK jaroj, kiel NUN, se oni obstinas en la samaj absurdaj nuntempaj procedoj. La ununura solvo estus, ke la “Kooperativo pri konstruado” ne daŭre estus monopolo de la altaj salajroj kaj oni malfermus ĝiajn pordojn al la laboristoj de eta salajro. Ĉi tiuj donus potencan puŝon al la ŝipo kaj la konstruado atingus nekutiman aktivecon.

***

Klarigita laŭ grandaj skizoj la uzata sistemo por la disdono aŭ distribuo de la loĝejoj, ĉu en la “Soveto” ĉu en la “Kooperativo”, ni nun parolos pri la luigoj. Oni devas diri antaŭ ĉio, ke rimarkante la neeston de la laborista klaso en la “Kooperativo pri konstruado”, la rusa registaro donis novajn normojn al ĉi tiuj institucioj, kredante, ke malpliiĝos la malkontento. La realo pruvis, ke la registaro estis erara, ĉar la malkontento iom post iom kreskis.

Nuntempe, la kooperativo transdonas procenton de ĉambroj al “Soveto” por ke ĉi tiu distribuu ilin inter la aliĝantoj. Sed la laboristoj, kiuj bonsanĉe ricevas unu el ĉi tiuj ĉambroj konstruitaj de la “Kooperativo”, sed disdonita de la “Soveto”, *neniel liberiĝas pagi la kvoton*, kiun la

42 Noto el aŭtoro: Panait Istrati, Rusujo senvualigita. 1930.

“Kooperativo” determinis. Ili same devas pagi ĝin, sed disponas de unu jaro por pagi la specifitan monkvanton, *escepte de la luprezo*.

Ni povas citi la okazaĵon de hispana enmigrinto al kiu “*Mopra*” (Internacia Ruĝa Helpo) transdonis ĉambron. Ĉi tiu, loĝinte en ĝi kaj paginte la respondan luprezon, devis pagi la kvanton da 250 rubloj, kvankam oni al li koncedis jaron por pagi ĝin.

La luigoj en USSR ne estas pagitaj rilate salajron, kiun oni enspezas, sed laŭ la amplekso de la okupita apartamento kaj laŭ la kvadrataj metroj. Krome la prezoj varias laŭ estas novaj aŭ malnovaj domoj. Ni ankaŭ devas rimarkigi, ke la moderna konstruado de domoj en Rusujo estas tute malsama al tiu de Eŭropo, kiel ankaŭ estis dum la tempoj de la caroj. Pratempe, la domoj estis malaltaj –la plej grandaj atingis du etaĝojn de alteco- kaj la plimulto estis konstruitaj el ligno. Ĉi tiu karakterizaĵo faras, ke Moksvo tute similis grandan vilaĝeton. Nuntempe la konstruaĵoj havas modernegan eksteran aspekton kaj altecon, kiu por la loĝantoj de tiuj teroj kutimiĝintaj al la vivo nivele kun la tero estas konsiderinda. Pri ĉi tiu aspekto -nur ekstera, ni ripetas- oni ne povas nei, ke la bolŝevikoj faras laŭdindan laboron, kiu donos kiel rezulton plenan transformadon de la fizonomio de ĉi tiu malnova urbo, kiu estas Moksvo, fakte ĉefurbo de USSR.

Nun la domoj estas konstruitaj per plifortigita cemento kaj brikoj, kvankam la kondiĉoj higienaj kaj de bonfarto ne estas tiel elstaraj, kiel en la aliaj. Preskaŭ ĉiuj novaj domoj konsistas el kvin aŭ ses etaĝoj de alteco kaj, kvankam ĉi tiuj estas ampleksaj, ilia interno ne estas modelo de beleco, ĉar krom ilia simplega konstruo (laŭnorma) ili nur havas po ĉambron por familio. La kuirejo, la banejo, la necesejo, la lavejo *estas komunaj*. Ĉiu etaĝo enhavas tri ĉambrojn kun

sendependa enirejo, kiu donas aliron al koridoro, kiu kondukas al la ŝtuparo tiel, ke ankaŭ la aliro al la ŝtuparo estas komuna, ĉar kvankam la ĉambro havas sian *privatan* pordon, ĉiuj devas trapasi la saman koridoron por eniri aŭ eliri.

Kiajn komfortojn, kian sendependecon kaj kian hejmvarmon povas havi ĉi tiujn *komunajn* ĉambrojn por ĉiu individuo amanta la solecon? Ĉu estus iu, kiu opinius, ke ĉi tiu sistemo estas inda por ke oni al ĝi dediĉu tiom da laŭdoj? Post la vidado de ĉi tiuj domoj kaj ĉefe post la loĝado en ili, oni ne povas paroli sen malestimo pri la tiom trumpetita nova sovetia konstruado. Ni komprenas, ke tiuj, kiuj vizitis Rusujon, ne povis vidi pli ol la fasadoj de ĉi tiuj modernaj konstruaĵoj kaj, kiel ĉi tiuj havas certan aspekton de beleco kaj sobreco rilate la desegnon, estas logike, ke iuj entuziasmiĝis. Tamen tre malsama estus ilia impreso, se ili loĝus dum kelkaj monatoj en unu el ĉi tiuj apartamentoj.

La modernaj rusaj domoj estas kvazaŭ hoteloj, kun la sola diferenco, ke ĉi tiuj havas la manĝĉambron (restoracion) aparte kaj tiuj havas ĝin en la ĉambro mem. Oni tute ne konsideris la necesojn de la familio, nek la plej elementajn normojn de higieno, ĉar kvankam la idaro estus multnombra, nur ekzistas unu sola ĉambro, kiu servas same por manĝi, kiel por dormi.

La prezo de la luigoj varias en la malnovaj domoj de 8 ĝis 15 rubloj monate. En la modernaj, la minimuma luprezo estas de 10 rubloj kaj la maksimuma de 34 rubloj. Se oni konsideras –tiel kiel ni pruvis en antaŭa ĉapitro-, ke la laboristoj enspezas salajron de 70 ĝis 120 rubloj, ni demandas: Ĉu eblas, ke kiu ajn mana laboristo povos pagi tiel altajn luprezojn post la kontribuo al aliaj bezonaĵoj per tiel eta salajro? Neeblas. Ĉi tiu estas la kaŭzo, ke estas multnombraj la ŝanĝoj de loĝejo, kiuj ĉiutage okazas, ĉar

kiel la laboristoj ne povas pagi la luprezon nek la kvoton de la kooperativo, ili devas ŝanĝi kiel eble plej baldaŭ sian loĝejon. Ĉi tiuj ŝanĝoj estas rajtigitaj de la sovetia registaro kaj la gazetaro ĉiutage publikigas ĉiujn, kiujn oni deziras plenumi dum la antaŭa tago.

En la urboj, la pago de luprezoj devas fariĝi ĉiumonate, ĉu en la “Kooperativoj”, ĉu en la telefonaj centraloj laŭ la konveno de la luprenanto. Tiuj, kiuj malfruiĝas je la pago, estas punitaj per krompago de 2 procento, krompago, kiu povas esti pliigita se la malfruiĝo longiĝas troe.

Ankaŭ oni povas fari la pagon de la luigo pere de la fabriko, kie laboras la interesato, sed ĉi tiu sistemo preskaŭ ĉiam nur efektiviĝas okaze de “urĝa asigno”. Ekzemple se laboristo longe malfruiĝas je la pago de la luprezo de sia ĉambro, la “Kooperativo” ne petas juĝon pri elhemigo, ĉar tia sistemo ne ekzistas, sed ĝi sendas komunikaĵon al la fabriko kaj ties administristaro taskas efektivigi la monigon per proporcia dekalkulo de la salajro de la laboristo rilatita al la depostulo. La klarigo de ĉi tiu metodo tiel rapidaga por enspezi la prokrastojn baziĝas sur la fakto, ke en Rusujo ĉio rekte dependas de la Ŝtato, kiu absolute regas ĉion, kio rilatas al nemoveblaĵoj kaj al laboro kaj eĉ al la individuaj aktivecoj de la loĝantoj de ĉi tiu lando, tiel ke tute neeblas, ke iu ne pagos.

Tiel la kvoto de la “Kooperativo”, kiel la luprezoj povas esti altigitaj; sed ne per akordiĝo de la ĝeneralaj asembleoj de la membroj de la “Kooperativo” aŭ per silenta akordo inter ĉi tiu kaj la luprenantoj, sed pro volo de la Ŝtato kaj ĉiam, kiam ĉi tiu konsideras tion oportuna aŭ bezona.

Alifoje nepre ni devis rimarkigi –kiel tiom da fojoj oni jam faris en la libro- la ekziston de ĉi tiu stulta kaj malica sovetia centralizismo, kiu sorbas la tutan rusan vivforton, kiu

gvidas, regas ĝin kaj ĉion solvas, neniel konsiderante la laboristajn amasojn, nek siajn voĉojn, nek siajn iniciatojn.

Kiam alvenos la tago, kiam la laborista klaso de Rusujo decidiĝos definitive malhavi la Ŝtaton – domluanto, burĝo, ekspluatanto kaj komercisto, ĉio en unu peco- por gvidi kaj organizi sin konkretigante en grandioza kristaligo de sia tuta eminenta animo sian volon esti libera super policistoj, burokratoj kaj konstantaj armeoj?

Por atingi ĝin, oni devos efektivigi novan revolucion, kiu, detruinte la ŝtatan grandegulon –treninte en la kirlon ĉiujn instituciojn, kiuj subtenas ĝin-, konstruos la novan konstruaĵojn de la Libereco, kie la individua kaj kolektiva disvolviĝo estos fakto per la praktiko de la vera Frateco.

12a. La depruntoj de la Ŝtato.

Krom ĉiuj ŝarĝoj, kiuj pezas sur la rusa laboristo -jam elnombritaj en la antaŭaj ĉapitroj-, gravigitaj de la nesufiĉeco de la salajroj, ekzistas por li la devigo enskribiĝi jare en la depruntojn de la Ŝtato.

Ĝis nun estas kvar la depruntoj cirkuligitaj de la rusa registaro. Unue aperis la unua, dua kaj tria depruntoj pri industriigo, kiuj tute estis kovritaj de la laboristoj de la lando.

La depruntoj tamen ne estas propravolaj, sed ke ĉiu laboranta laboristo havas la devigon investi determinitan monkvanton, kiun antaŭe decidas la oficialaj institucioj. Tamen estas iu tolero kaj la monkvanto investita povas esti malsupera aŭ supera, laŭ la ebloj de ĉiu.

La monkvanto destinita kovri tiujn depruntojn dekalkulas sin de la salajro de la laboristo en limtempo de dek monatoj.

Kiam oni cirkuligis la du unuajn depruntojn, ĉiuj rusoj ekster tre strangaj esceptoj enskribiĝis, ĉar iuj vidis en tio la solan manieron ŝpari iom da mono. Aliaj partoprenis prematajn de la strebo pliigi siajn ŝparojn pro la perspektivo povi atingi premion, ĉar inter la posedantoj de la legitimilo de la depruntoj efektiviĝis lotadoj similaj al tiuj de la Loto.

El inter la manaj laboristoj, multaj, post la pago de la subskribita monkvanto kaj jam posedante la legitimilojn de la depruntoj, realigis ilian vendon por monkompesi la elspezitan monkvanton. Aliaj deponis ilin en la banko, enspezante anticipon.

Pro tio okazis, ke la plimulto de la laboristoj konsideris la depruntojn, kiel rimedon okaze de neceso, ĉar krome

ekzistis la avantaĝo, ke la legitimilo de la depruntoj estis akceptita de la banko ajnamomente.

Sed en 1930, kiam aperis la kvara deprunto pri industriigo, trovis ĉirkau si muregon el malvarmeco kaj surpriza indiferenteco. Okazis, ke la laboristoj eksciitaj pri la dekreto publikigita de la komisaro pri Financoj avertinta, ke la depruntoj ne estos pagitaj ĝis post dek jaroj, sentis nenian inklinon investi monkvantojn en obligacio de la Ŝtato, kiu ne povis al ili doni tujan profiton. Krome pro la novaj disponoj, la legitimilo de la unua kaj dua depruntoj ankaŭ ne estos akceptita, de post tiu tago, de iu banko de la Unio.

Pro la unuanima protesto de la proletaro kaj konstatante kiel senentuziasmaj estis la laboristoj por enskribiĝi, la komisaro pri Financoj konsente kun la Partio decidis modifi la dekreton por ke ĉiu fabriko enoficigu komisionon komisiitan efektivigi ĝisfundan studaĵon pri la petoj, kiujn farus la laboristoj, kiuj volus peti rajtigon de vendo de la legitimilo de la depruntoj, sed klarigante, ke okaze esti akceptita ilia peto, nur oni al ili repagos la ses dek procenton de la invertita kapitalo.

Ĉi tiu komisiono konsistis el la sekretario de la Komitato de fabriko, la sekretario de la ĉelo de la Partio kaj la librotenisto, apogataj de kelkaj absolutaj adeptoj al la partio. Tiel estas, kiel en la sino de ĉi tiu sekreta kunveno oni solvas laŭ la plej malĝusta maniero la prezentitajn petojn, ĉar estas malakceptitaj la naŭdek ok procento, kaj ne sufiĉis por kaŭzi revizion la protestoj ĉiutage pli impetaj kaj insistaj de la proletaro.

La kvara depruntoj pri industriigo, cirkuligita en 1931, estis la plej granda el ĉiuj efektivigitaj ĝis tiu dato, ĉar li altiĝas je 1.600 milionoj da rubloj kaj estis kovrita en limtempo de du monatoj.

Kiuj estis la rimedoj uzitaj de la Registaro por kunigi tiun monkvanton en tiom mallonga limtempo? Tre simple. Komencis la Ŝtato mobilizante ĉiujn elementojn de la sindikatoj, kiuj kune kun tiuj de la partio ekigis persistan kampanjon de propagando tra la kamparo, fabrikoj kaj manlaborejoj. Samtempe de ĉi tiu buŝa propagando, aperis la grafika konsistanta el grandega kvanto da afiŝoj, manifestoj, broŝuroj, ktp kaj ankoraŭ ĉi tiuj rimedoj ne donintus la deziratan frukton se oni ne alvokis la perforton, farante reprezaliojn kaj premadojn sur kiuj ne volis enskribiĝi.

En la sindikatoj kaj en ĉiuj sekcioj de la Ŝtato aperis grandaj afiŝoj sur kiuj oni legis la jenan: “Nek sola membro de la sindikatoj, nek laboristo povas lasi enskribiĝi per tri semajnoj de salajro al la depruntoj de la Ŝtato”. La laboristoj, kiuj ne destinis la tri semajnojn de salajro al depruntoj estis karakterizitaj, kiel malamikoj de la sovetia reĝimo, kaj oni publikigis artikolojn en la “Mura Ĵurnalo” aludante, premante kaj minacante ilin. Se per ĉiu ĉi subprema aparato la senentuziasmulo ne subskribis la tri semajnojn, ĉi tiuj ankaŭ estis al li dekalkulitaj por la depruntoj pro supera ordono.

Multaj laboristoj en la respektivaj asembleoj de fabriko substrekis, ke se ili ne faris la subskribon kontraŭ salajro de tri semajnoj, estis ĉar la enspezata salajro estis tre malgranda kaj apenaŭ sufiĉis al ili por kovri iliajn plej urĝajn bezonaĵojn, sed neniel oni devis atribui tion al malbona volo aŭ malamikeco al nova reĝimo. Por nenio servis la klarigoj kaj lamentoj. En diktatora kaj arbitra reĝimo ne estas orelo por aŭskulti la voĉon de la racio. Kaj al la veraj kaj klaraj eldiraĵoj de la apelaciantoj, kontraŭstaris la Ŝtato, malvarma, nepenetrebla, la motivon de sia daŭrado kaj la definitivan “fundamentan mensogon” pri tio, ke super la bezonoj de la individuo kaj la familio estas la bezonoj de la Ŝtato.

Pro tiuj faktoj -sinsekvaj, ripetataj kaj amasigataj- la laborista klaso, senigita je libero, manka de opinio kaj neebligata realigi la kritikon de sistemo, krome ne disponante rimedojn por organizi sin kaj manifesti siajn opiniojn ĉu pere de la gazetaro, ĉu pere de aliaj kanaloj, ekis iom-post-ioma forlaso de la partio, kiel sola rimedo de muta protesto.

Devigitaj la proletoj toleri la despotajn ordonojn de grupo de individuoj, kiuj konsistas la nomitan “politikan Buroon”, ĉekape Stalino, ili devas prisilenti siajn sentojn kaj supervivi sub la arbitreco de la uzurpantoj de la trofeo de revolucio, kiu iam estis horizonto kaj celo por la tutmonda proletaro.

Pro ĉiuj ĉi kaŭzoj, kiam post dekkvar jaroj de konstrua periodo, Ŝtato ne sciis doni politikan nek ekonomian kontentigon al la aspiroj de la produktantaj klasoj, male dediĉante sin subteni pli hierarĥiojn kaj la saman malegalecon, ke dum la kapitalisma reĝimo, estas tute kompreneble kaj logike, ke pliiĝis tago-post-tago la nombro da malamikoj, kiujn havas Rusujo.

Oni ne devas forgesi, ke la procedoj, kiuj en 1917 estis pravigitaj aŭ pravigeblaj, ne povas trovi kialon, kiu pravigas ilin hodiaŭ, kaj multe malpli ili trovos pravigon morgaŭ.

13a. La karceroj de Rusujo.

Sed tio pli bedaŭrinda en tiu malaperigo de la Libereco, estas la ekzisto en USSR de tiuj ejoj de individua nuligo, de tiuj truaĉoj de morala kaj fizika degenero de la homo, nomitaj malliberejoj.

Por povi paroli per kono pri la malliberejoj kaj pri la reĝimo, kiu en ili aplikiĝas al la arestitoj, necesas esti tie, kiel enkarcerigito, aŭ viziti ilin de ekstremo al alia, dum oni kolektas personajn opiniojn, ne lasante impresi sin pro la klarigoj de la direktisto aŭ de la dungitoj. Oni devas interparoli kun la malliberuloj per tuta fido, en intimeco kaj komparante iujn deklarojn kun aliaj kaj per la propra sperto, dedukti pure la veron.

Sed ankaŭ ĉi-okaze, ni estas devigitaj malkonfirmi unu post unu ĉiujn asertojn, arbitrajn kaj skribitajn laŭ diktado, faritajn de ĉiuj, kiuj asertis, ke la sovetia karcera reĝimo estas neplibonigebla.

Maksim Gorkij, la poeto de la homamasoj, la viro, kiu ĝis hieraŭ konservis per la plej senmakula brilo la purecon de sia profesia digno, rifuzante vendi sian plumon al iu partio, entrepreno aŭ registaro, vidis paligi sian brilegan stelon pro la kontakto kun la bolŝevika viruso, kiu, veneninte kaj nuliginte lian honestecon, sukcesis klini la nukon de kiu tiom alte kaj firme sciis meti ĝian nomon.

Nuntempe Maksim Gorkij jam ne estas la sama de antaŭe. La falsa kanto de laŭdo dediĉita al la karceroj de la Sovetia Unio, makulis lian prestiĝon kaj la brilecon de lia kariero ĉar, dolore estas al ni diri tion, li ade ne diras la veron. Neniam, bone komprenu porrusoj kaj kontraŭrusoj,

neniam la sovetiaj karceroj estis domoj de regenerado de la homo.

Ni volus scii kiujn karcerojn vizitis Gorkij; el kiuj li povis ekstrakti tiun impreson kaj ĝis kia ekstremo estas sincera tiu homo, kiu tiel majstre kondamnis la karcerojn antaŭ la alveno de la bolŝevikismo… Sed, ne volante senkreditigi Gorkij-on, pri kiu ni sentas profundan respekton, profundradikan literaturan admiron kaj preskaŭ filan korinklinon, ni kuraĝas aserti, ke li vizitis -almenaŭ per atentemo- neniun sovetian karceron; kaj, ke tre probablas, ke la libro, kie li asertas tian aferon, estis skribita cele al la konveno de la komunisma partio kaj la propagando.

Ĉar tio vera estas, ke la rusa komunista partio, sciante, ke Gorkij estis la plej legata verkisto de la kamparano kaj la laboristo, proponis al li gloron kaj monon, protektadon kaj eĉ kunlaboradon. Pro tio, la busto de Gorkij hodiaŭ aperas ĉie apud tiu de Stalino kaj de aliaj gravuloj de la “Politika Buroo”, kiel Kalinin kaj Voroshilov. Kaj kiam Gorkij mortos, la bolŝevika registaro starigos monumenton en ĉiuj grandaj urboj, memore de ĉi tiu granda poeto, kiu tiel bonegajn servojn faris -estas faranta- al la sovetia registaro.

Gorkij, kiu antaŭ nelonge estis idolo por miloj da legantoj, morale mortis por la laborista klaso. La moderna Puŝkin ne sciis defendi sian individuecon, nek kuraĝis fari la defendon de sia popolo kontraŭ la despotismo de registaro, kiu neniigis ĉiujn liberojn por kiuj tiu sama popolo per tiom da persisto luktis.

La sovetia karceroj diferencas sin per nenio de tiuj de la kapitalismaj landoj; nome estas unu diferenco kaj ĉi tiu estas, ke la traktado eble estas pli malbona. Post la revolucio oni ne konstruis iun novan karceron tiel, ke la nuntempaj estas la samaj, kiujn uzis la carismo. Ni krome diras, ke ankaŭ ne ili estis transformitaj nek plibonigitaj.

Por elmontri, per kelkaj kuriozaj detaloj, kiel vivas la malliberuloj en la karceroj de Rusujo, mi rakontos la rezultaton de vizito plenumita al unu el tiuj instalaĵoj.

En 1928, iom poste mia alveno al Moskvo, mi iris kune kun aliaj politikaj enmigrintoj viziti la karceron “Tangankia”, kies spaco estis por 1200 enkarcerigitoj, sed ke tiudate enfermis 1600. Post kiam la direktisto montris al ni la tutan altan parton de la konstruaĵo, ni rimarkis, ke iuj malliberuloj faris al ni signojn indikante al ni, ke ili volis, ke ni iru viziti ilin. Finita la vizito al ĉio, kion la direktisto kredis oportuna montri al ni, ni petis permeson al li por translokiĝi al loko, kie estis la menciitaj malliberuloj. Jam tie, ni konvinkis nin pri tio, ke ĉio, kion diris Gorki kaj aliaj, parolante pri la sovetia karceroj, estis falsa.

Antaŭ ni -komuna ĉelo- ni havis senkuraĝigan spektaklon el doloro kaj mizero. La malliberuloj dormis sur la pavimo, ĉar malhavis matracojn kaj eĉ litkovrilojn por ŝirmi sin. Por esti iom pli ŝirmitaj kontraŭ la malvarmo, ili devis dormi vestitaj kaj en konfuza amasigo por doni al si komunan varmon. La manĝajoj, kiujn oni al ili servis, estis tre malbonaj kaj ili devis manĝi po kvin por la sama telero. La komuna ĉelo, kiun ni vidis, havis spacon por dudek kvin personoj, sed tiam enhavis sesdek.

La direktisto al ni klarigis, ke tiuj estis preventaj arestitoj, kiuj ne havis iun destinitan lokon en la karcero kaj oni enfermis tie, ĉar ili nur restis enfermitaj tri aŭ kvar tagojn, kaj poste oni translokigis ilin en aliajn karcerojn.

Tiam, unu el nia grupo, kiu perfekte parolis la rusan, demandis al la malliberuloj de kiom da tempo ili restis en tiel malbonaj kondiĉoj, kaj ili al ni informis, ke la plej ĵusa eniris tien antaŭ monato, aliaj jam antaŭ du aŭ tri monatoj estis tie.

Ni poste vizitis la ĉelojn de la procesintoj aŭ komdanitoj, kaj povis konstati, ke ili ankaŭ malbone vivis. La litaĉoj, kiuj estas el fero, havas pajlan matracon kun nur du litkovriloj por kovri sin. Ĉiuj malliberuloj kun kiuj ni povis paroli plendis pri la malvarmo kaj la nutraĵoj, sed ĉefe pri la malvarmo, kiun ili suferis, ĉar en Moskvo, la temperaturo vintre varias inter la dudek ses kaj tridek ses sub nulo.

En Rusujo, preskaŭ ĉiuj malliberuloj laboras escepte de, kompreneble, la punitoj. Ni ne povis ekzakte scii kion ili perlaboras, ĉar la direktisto de la karcero informis nin laŭ unu senco, kaj la malliberuloj laŭ alia; sed laŭ versioj, kiuj al ni meritas tutan fidon, ni povas aserti, ke la malliberuloj laboras ok horojn kaj nur enspezas la dudek kvin procenton el tio, kio gajnas.

Ni devas averti, por eviti kiu ajn konfuzon aŭ misinterpreton, ke ĉiuj arestitoj de la karcero Tagankia estas komdanitaj pro komunaj krimoj.

Nur unu fojon monate, estas permesite al ili havi komunikon kun la ekstero kaj vidi siajn familianojn aŭ amikojn. Por amuziĝo de la malliberulo, unufoje por semajno, estas kinprezentaĵo en la karcero, sed la eniro ne estas senpaga -do, kion vi kredis?-, sed oni devas pagin ĝin, kvazaŭ kiu ajn kinejo sur avenuo. Tiel tiuj, kiuj havas ne monon, ne povas spekti la spektaklon kaj naskiĝas en ili la malamo al la feliĉuloj, kiuj povas distri sin. Kaj ankoraŭ ĉi tiu estas unu el la privilegiitaj karceroj, kie la trakto estas pli afabla, kaj kiun kompreneble oni montras al la delegitoj kaj al ĉiuj, kiuj montras dezirojn koni la rusajn karcerojn.

En 1931 mi havis la okazon viziti, en Moskvo, alian karceron multe pli malbonan ol tiu, kiun ni ĵus menciis, ĉar en ĝi ne estis kinejo. La direktisto diris, ke la maŝino fuŝiĝis kaj oni devis aĉeti novan, sed ke por atingi tion oni bezonis, ke la malliberuloj destinis tiucele monkvanton, ĉar la Ŝtato

havas buĝeton asignitan por malliberejoj kaj karceroj kaj ne povas pliigi ĝin tiel, ke ne eblas destini pli da mono por aĉeto de kina materialo.

En la karcero pri kiu ni parolas estis manlaborejoj por teksi vestaĵojn, kie devis labori devige la malliberuloj. Ĉi tiuj plendis al ni, ke ili estis tre malbone konsideritaj kaj, ke oni al ili traktis tre kruele. La manĝaĵoj estis naŭzaj kaj la dormĉambroj malmolaj kaj sen ŝirmo.

Ĉiuj faciligoj, kiujn oni trovas por viziti la karceron Tagankia, iĝas nevenkeblaj malfacilaĵoj kiam oni klopodas vidi la internon de la karcero Butirka. Tiel ĉiuj delegitoj ĉeestintaj en la festoj de la unua de majo 1931 devis foriri de Rusujo malsukcesinte vidi ĉi tiun karceron, malgraŭ ke ili ade petis ĝin kaj malgraŭ ke ili plenumis influajn klopodojn tiucele. Same okazis kun alia antaŭa franca delegitaro, kiu restis iun tempon en Moskvo kaj, kiu ankaŭ ne sukcesis povi enkonduki sin en la menciitan karceron.

Oni klarigas ĉi tiun sisteman neadon, kiam oni scias, ke la karcero Butirka estas, kiu enfermas ene de siaj kadukaj kaj naŭzaj muregoj ĉiujn arestitojn pro politikaj krimoj, kiuj atendas esti translokitaj al aliaj malliberejoj -Siberio aŭ Solovski-, kien alvenas ĉiuj anarkiistoj kaj socialistoj. Nur restas en Moksvo, Ramsin, Fedotov kaj ĉiuj estroj de la nomita Industria Partio, kiuj ne estis translokitaj pro rekta ordono de la centra ŜPD.

Sed, se ĈIUJ rusaj karceroj estas lernejoj, kie oni edukas la malliberulon, kiun misteron enfermos la karcero Butirka por ke estu tute malpermesita viziti ĝin?

Neniu povos nei, ke la petoj por viziti tiun karceron estis laŭregule kaj insiste faritaj. Mi povas aserti ĝin, ĉar mi mem vidis, kiel la membroj de la franca delegitaro persone faris la

peton, en la Hotelo Eŭropo, al helpanto de la Prokuroro de la Respubliko.

Tio vera estas, ke la vivkondiĉoj, kiuj ĉirkaŭas la politikajn arestitojn, estas multe pli malbonaj ol tiuj de la ordinaraj krimuloj; ke la higieno en la karcero Butirka tute forestas; ke la arestitoj malmulte kaj malbone manĝas; ke ili ne havas litaĉon nek sufiĉajn litkovrilojn por ŝirmi de la glacia malvarmo kaj la konstanta malsekeco, kiun elŝvitis la muroj de la malnova karcero. Ĉi tiuj estas la bonegaj kondiĉoj de la rusaj malliberejoj kaj la malrespekta trakto, kiun ricevas la politikaj malliberuloj!

Ne veras, ke la malliberuloj povas eliri el la karcero ĉiam, kiam volas por viziti siajn familianojn. Ankaŭ ne veras, ke oni permesas al la kamparanoj eliri por fari la rikolton de siaj kampoj. Estas neniu malliberulo al kiu oni permesas la eliron el la malliberejo antaŭ ol fini la kondamnon, se temas pri ordinara krimo. Koncerne la politikajn arestitojn, ni asertas, ke ili ne povas ĝui certajn tolerojn, kiujn oni havas kun la krimuloj, kaj ke ili restas senkomunikaj tutajn monatojn; oni senhonte legas senpermese ilian korespondadon; oni konfiskas tiun, kiun ili konsideras, ke ne devas iri eksteren kaj fine oni ilin submetas al la plej diversaj moralaj torturoj.

Tiaj estas reale la “lernejoj” karceroj pri kiuj al ni parolis Maksim Gorkij. Ĉi tiu estas la pura vero koncerne la sovetiajn malliberejojn, kiuj, okaze esti lernejoj, nur estos tiaj de la krimo kaj la degenerado por la rabistoj, kaj de ribelo kaj malrapida morto por la politikaj kondamnitoj.

14a. La malliberejoj.

Iufoje, en la antaŭa ĉapitro, ni menciis la malliberejon de la insuloj Solovski, kiu estas por Rusujo la *malliberejo tipo*. Kiam ni parolas pri la karceroj kaj la karcera reĝimo, ni neniel povas eviti dediĉi ĉapitron al tiu nomita “speciala ejo de Solovski”, kie punpagas la krimon pensi per si mem multnombraj homoj, kiuj tre fiere manifestas siajn malkonsentojn kun la komunista reĝimo.

La “speciala ejo de Solovski” havas grandegan amplekson. Ĝi entenas, ne nur la proprajn insulojn Solovski-ojn, sed ankaŭ la tutan marbordon de Murmansko. La ĉefa insulo, kie estas starigita la fama monaĥejo, nuntempe iĝinta malliberejo, estis baptita de la arestitoj per la signifa nomo de “Insulo de torturoj”.

La insuloj Solovski (aŭ insuloj Solovetzki) nuntempe enfermas entute ĉirkaŭ 30.000 malliberulojn de ambaŭ seksoj. La ĉefa insulo havas: mekanikan fabrikon, kiu okupas 150 homojn; elektran stacion, kiu donas laboron al cento da laboristoj; tanejo de ledoj okupanta tridek homojn; fornon por fabriki brikojn, kiu laborigas 100 laboristojn kaj ekspluatado de torfo, kiu nuntempe okupas pli ol 200 laboristojn. Krome estas manlaborejo de ŝuaro kaj alia de tajlorejo, kie laboras ĉirkaŭ 300 personoj. La ceteraj malliberuloj sen escepto laboras en arbaraj ekspluatadoj dum la vintro. Somere ili konstruas novajn soŝeojn inter la vilaĝoj kaj la urboj de la marbordo de Murmansko.

Escepte de ĉi tiuj du klasoj de laboro, ĉiujn ceterajn okupojn menciitajn oni konsideras, kiel privilegiitajn. Nur povas aspiri al ili la tre kvalifikitaj laboristoj aŭ kiuj posedas influojn, ĉu pere de mono aŭ privataj rilatoj.

Kutime ĉiuj ĵusaj alvenintoj eklaboras en komunaj okupoj, escepte de kiuj antaŭe servis en karceraj sovetiaj institucioj (la milicio, ŜPD, ktp), kiuj ricevas favoran trakton. Tiel, la administristaro de la “ejo” (kies membroj estas ĉiuj malnovaj Ĉeka-anoj kondamnitaj pro rabo) premias kaj helpas siajn proksimulojn.

Kiam venas al la “ejo” nova trajno de arestitoj por ke neniu povu konstati kio okazas, por eviti miksaĵojn kaj homamasiĝojn, kiuj faciligis kiun ajn fuĝoklopodon, tuj post la eltrajniĝo, militistestro mallonge ordonas, ke ili ĵetu la pakaĵojn sur amasigon kaj enviciĝu. Tuj oni aŭskultas voĉon, kiu ordonas: “De dekstre al maldektre… nombru vin”. Ĝenerale, la nombrado ne estas ekzakta ĉar inter la ĵusaj alvenintoj estas multaj, kiuj ne komprenas la rusan kaj aliaj, kiuj ne povis aŭdi la diritaĵon. Tiam ekas la “manovroj” laŭ la sekva maniero: Ha, kanajloj, mi instruos vin nombri. Ni vidu… rapida paŝo…ek! Kaj tiel oni devigas ilin kuri dum horoj ĝis iuj -multaj- falas elĉerpitaj pro la lacego.

Oni ree aŭdas la komandan voĉon: “Enviciĝu”. Kaj alifoje: “De dekstre al maldektre… nombru vin”. Finfine la nombrado estas ekzakta kaj ili eniras en la “ejon”. Ĉe la enirejo oni al ili donas la “bonvenon”. La veteranoj de la “ejo” diras: “Sanon, kompanio” kaj la novuloj devas respondi: “Sanon”. Memkompreneble ankaŭ ĉi tiu komedio donas malbonan rezulton kaj oni ree ordonas la “rapidan paŝon”, kaj ekas alifoje lacega kurado ĝis la aŭtoritatoj, ŝajnigante kompaton, kiun ili tute ne sentas, ordonas la ĉeson de la puno. Nova ordono por enviciĝi kaj ree ekas la tuta komedio ĝis ĝi perfekte plenumiĝas.

Dum la tuta tempo daŭranta la “manovrojn”, oni ne aŭdas pli ol rekomendojn, kiel ĉi tiuj: “Forgesu, ke vi estas homo”. “Memoru, ke ĉi tio ne estas karcero, sed la speciala ejo de ŜPD”.”Nenio de tio, kio estas ĉi tie, apartenas al vi”.

“Faru la mortinton”. “Absoluta silento”. “Faru kion oni al vi ordenos, ne kontestu”, ktp, ktp.

Tuje, ne koncedante momenton de ripozo al la jŭsaj alvenintoj -post vojaĝo, kiu kutimas daŭri ok aŭ naŭ tagojn per vagono por transporti brutaron, en kiun oni enmetas la homojn, kiel haringojn, po kvantoj da cent homoj por vagono- oni sendas ilin labori dum dekdu horoj senĉesaj. Ĵus alveninte post laboro, kiu daŭris tagon kaj nokton, kaj post la manĝo de iom da varma akvo, iomete kolorigita, kiu ricevas la nomon de teo, alifoje oni aŭdas la komandan voĉon, kiu ordonas: “Staru ĉiuj”. Kaj ekas la disdono de laboro por nova tago. Ĉi tiu estas la regulo en Solovski. Sendi la juŝajn alvenintojn du sinsekvajn tagojn al la laboro, ne lasante al ili dormi nek ripozi kaj punante ilin pro la plej malgranda plendo.

La realigita laboro estas tre malpura kaj supera al la fizikaj fortoj de multaj. Ili dediĉas sin porti kaj ŝarĝi karbon en la haveno, malŝarĝi sakojn de faruno, ktp. Por tiel *puraj taskoj* oni ne disdonas laborsupertuton nek laborvestojn, tiel ke ĉiuj estas devigitaj labori kun la vestaĵoj, kiujn surportis, kiam venis, sekve la plej bonaj kostumoj iĝas iom poste ĉifonoj.

La ĉambroj aŭ rifuĝejoj estas sufiĉe grandaj barakoj el ligno, kie devas ŝirmi sin de sepcent ĝis okcent malliberuloj. Laŭ longo de la muroj estas du etaĝoj de tabuloj enfondigitaj, kiuj servas kiel lito kaj, kie ĉiu malliberulo povas disponi duonan metron de larĝo, tiel ke ili nur povas kuŝi surflanke.

La cimoj kuras je miloj kaj ni ne parolu pri la pulgoj kaj pedikoj, kiuj sategas. La aero, kiun tie oni enspiras, estas tute poluita pro la homamasiĝo ĝis la ekstremo, ke iuj mortis sufokitaj. Estas nenia trinkebla akvo. Tiuj, kiuj volas lavi sin -multfoje ne estas tempo por fari ĝin-, devas efektivigi sian

purigon per neĝo kaj se volas trinki aŭ atingi akvon, devas fandi la neĝon en siaj trogoj. Nur ĉiun du aŭ tri tagojn efektiviĝas disdono de varma akvo, ĉar en la tuta insulo ne estas sprucejo de dolĉa akvo. Por provizi la akvajn bezonojn oni portas la akvon de Kema, urbeto lokita je 12 kilometroj de la insuloj.

Kaj kiel ni parolas pri Kema, estas bezone diri, ke ĝi simple estas la koncentrejo, tio estas, la alvenloko de ĉiuj malliberuloj. Estas la centro de la sovetia malliberejo. En ĉi tiu koncentrejo loĝas la direktistaro de la “ejo de Solovski”, kiu estas samtempe la entreprenistaro de la arbaraj laboroj kaj soŝeoj. De tie, la ĉefa amaso de la malliberuloj estas sendita al la diversaj lokoj de la regiono de Murmansko por la plenumo de ĉiaj laboroj. La propra insulo de Solovski, kiu donas nomon al la ceteraj de la grupo, ne enhavas pli ol kvar mil malliberuloj.

La sistemo de “instruado”, kiun ni skize klarigis tiel, kiel la inspektado kaj la militistaj komandoj estas devigaj por ĉiuj malliberuloj. Matene kaj nokte oni enviciĝas, faras la “memnombradon”, faras la salutojn, ktp.

Kiel oni povas vidi pro tio, kion ni rakontis, la vivo de la malliberuloj en la sovetiaj malliberejoj estas terura. Ni ankaŭ diros, ke ili nur povas skribi unufoje semajne al la familio, kaj unufoje monate al la amikoj. La leteroj estas reviziitaj antaŭ ol eliri el la “ejo” kaj oni rigore punas tiun, kiu aŭdacas diri la veron pri sia situacio.

Tia estas la patreca trakto, kiun la politikaj arestitoj ricevas. La vipo kaj la brutaleco ĉiutage okazas. Tiuj definitive estas la lernejoj de regenerado pri kiuj tiom parolis al ni la salajrataj verkistoj.

Do ne estas strange, ke eliras el ĉi tiuj mallibereoj neniu partiano de la bolŝevika reĝimo. La malico kaj la despotismo

ne estas la taŭgaj metodoj por altiri al si la simpation de la malkonsentuloj. Ignori -propravole aŭ ne- ĉi tiujn aferojn kaj uzi kontraŭajn metodojn estas la du grandaj eraroj de ŜPD, kiu potence kontribuas subfosi la fundamentojn de la nuntempa Rusujo.

15a. La kazerno kaj la deviga militista servo.

En USSR la militservo estas deviga kaj daŭras du jarojn por la surteraj fortoj. Por la mararmeo, la daŭro de la servo estas de kvar jaroj.

La rusa armeo distingiĝas de tiu de la ceteraj landoj, sed tiu diferenco ne estas pro la malpliigo de la militista hierarĥio, nek pro la manko de disciplino, ĉar ĉi tiu estas fera, sed sole pro la fakto, ke la soldatoj ekster de la kazerno ne havas devigon saluti siajn superulojn kaj, ke ĉi tiuj ne elmontras tiom da galonoj nek steloj, kiel en la kapitalismaj landoj. Cetere, la militismo estas egale tie, ke ĉi tie.

La disciplino ene de la kazerno neniel povas esti rompita. Okaze, ke soldato ne obeas la ordonojn de oficiro, tuj stariĝas ene de la kazerno mem militkonsilo konsistigita de soldatoj kaj oficiroj. Oficiro kun kiu ni havis okazon iutage interparoli, asertis al ni, ke la unua malobeo malofte estis punata, sed poste, ni klopodis scii la veron de la aserto kaj eksciis pere de kelkaj soldatoj, ke antaŭ malmultaj tagoj estis kondamnitaj je tri monatoj de enkarcerigo kvin soldatoj pro la grava malobeo “protesti pro la malbonaj kondiĉoj de la manĝo”.

Do nepre la ĉiulandaj armeoj estas konsistigitaj sammaniere. Unuflanke, orgojlaj kaj kredantaj pri sia supereco, la profesiuloj; aliflanke kiuj iras tien per la forto aŭ pelitaj de la malklereco aŭ la fanatismo. La estroj estas la posedantoj de la tasko defendi la socion kaj la Ŝtaton kun

ĉiuj ties difektoj kaj malvirtoj, ĉar ili ĉi tiun konsistigas kune kun la polico kaj la juĝistaro.

Ĉi tiuj konstantaj armeoj gardantaj de la ŝtataj aŭ registaraj interesoj -kiuj ĉi-okaze estas la samo- konsistigitaj de homoj, kies individueco ne estas disvolvita aŭ troviĝas misevoluinta, ne havas alian komision ol pafi al la loko indikita de la oficiroj, ne sciante la kialojn nek la kaŭzojn, kvankam oni ordonos pafi kontraŭ iliaj propraj fratoj.

Pli ol unu fojo, la ruĝa armeo vomis fratajn kuglojn kontraŭ la rusa proletaro. Ĉi tiu armeo mem estis, kiu mortigis la maristojn de Kronŝtadt kaj, kiu en 1931 malŝargis nubojn el mitrajlo kontraŭ la kamparanaj amasoj, kiuj malsataj ribelis kontraŭ la bolŝevika Ŝtato.

La oficiroj, majoroj kaj la tuta Stabo enspezas salajrojn, kiuj varias inter 150 kaj 300 rubloj monate. Ili havas apartan konstruaĵojn, kun ĉiuj dezirindaj komforto kaj oportunaĵoj kaj ne interamikiĝas kun la soldatoj. Por la unuaj, ĉiuj aspektoj de la vivo estas malsamaj, ke por la duaj, ĉar ĉi tiuj nur enspezas unu rublon monate por aĉeti tabakon kaj ceterajn kromajn elspezojn. En la tramoj, escepte de la komisioj de servo, ili devas pagi. Ankaŭ por la soldatoj regas la seninterrompa semajno, tio estas, ke ili restas kvar tagojn de servo en la kazerno kaj ferias la kvinan.

La militlernejoj nur estas vizitadaj de la elektitoj de la komunista partio. Same okazas kun la lernejoj de ŜPD. La oficiroj de ĉi tiuj institucioj -armeo kaj polico- ne devenas de la fabrikoj, manlaborejoj, minoj aŭ kamparo, nomumitaj de la laboristoj mem, iliaj kolegoj, sed ke estas la komunista partio, kiu nomumas ilin kaj, kiu sendas fari la studojn tiun, kiu laŭ ĝia opinio devas esti pli inklina kaj, sekve, pli bone realigos la plenumon de komando kaj disciplino samtempe, ke de fideleco al la reĝimo.

Ni kredas, ke se oni opinias kiel neceson la ekziston de armeo, tio plej bona kaj demokratia estus, ke la vakaj postenoj estus anoncataj en la laboristaj asambleoj, kaj ĉi tiuj konante la kapablon kaj alvokiĝoj de ĉiu el siaj membroj, nomumus ankaŭ demokratie la samlaboranojn, kiuj devus eniri en la lernejojn por fari la militistajn studojn. Tiel la laboristoj havus la konsolon tutcerte scii, ke la membroj de ŜPD kaj la ruĝa armeo estis laboristoj, kiel ili, enoficigitaj tie pro ilia iniciato kaj aprobo.

Kaj ne okazus tio nuntempa. Ne estus ĉi tiu nebrua malamo inter la laboristo kaj la du institucioj subtenantaj la bolŝevikan Ŝtaton. Ĉefe ili reciproke konatiĝus, kio ne okazas nuntempe.

16a. La geedziĝo, la familio, la divorco, socialaj asekuroj, lernejo kaj prostituado.

Antaŭ la revolucio la geedziĝo estis en Rusujo ceremonio, kiu devis plenumiĝi en la preĝejo unue kaj en la juĝejo poste, kun la aparteco, ke la dua ne estis valida se ne okazis antaŭe la unua, kaj ĉi tiu ja validis sen la alia.

La ligo estis nerompebla kaj tiel la viro, kiel la virino, jam geedziĝintaj, estis devigitaj kunvivi ĝis la morto, ĉar la divorco ne nur ne ekzistis, sed ke estis komdanita de la leĝo kaj la moro ekster tre maloftaj esceptoj, kiam ĝi estis koncedita pro tre gravaj motivoj.

Same okazis antaŭ nelonge en nia lando, kie la disigo de du estuloj, kiuj ne trovis moralan aŭ fizikan afinecon, estis afero preskaŭ neebla se ili volis teni sin al la diktado de la leĝo. Kaj ĉar niaj agoj multfoje ne respondas al niaj propraj bezonoj, sed al tio, kion starigas la Leĝo per absurdaj kodoj, ni estis devigitaj daŭrigi nian suferadon aŭ salti super tiaj leĝoj, kiuj ne estas pli ol ĉenoj, kiuj forte ligas la homojn.

Pri tiu afero, la rusa revolucio plenumis vere rimarkindan laboron, ĉar elradikigis ĉiujn ĉi absurdaĵojn, donante kontentigon kaj plenan liberon al la viro kaj la virino, sen iaj distingo kaj limigo. Sufiĉas, ke unu el ili manifestas la deziron pri tio por ke la unuiĝo aŭ la disigo plenumiĝos sen pliaj formalaĵoj. Kompreneble por la unuiĝo la konsento devas esti komuna.

La patreco en USSR donas neniun povon nek rajton de posedo sur la filoj. La gepatroj ne estas pli ol la kuratoroj aŭ protektantoj de sia filaro, kies plenaĝo komenciĝas je la dekok jaroj. Post ĉi tiu aĝo nek la gepatroj nek kiu ajn alia povas kontraŭstari la volon de la gejunuloj, tiel ke ili povas libere geedziĝi se tiu estas ilia deziro, sen tio, ke la gepatroj rajtas neebligi ĝin.

La geedziĝoj, tiel se estas realigitaj en la “Registro” de la sovetiaj institucioj, kiel se estas efektivigitaj sen registro kaj ia oficiala sciigo, validas ekde la sama momento, kiam efektiviĝas antaŭ atestanto, kaj la Ŝtato rekonas ilin, kiel leĝajn. La formalaĵo de la atestanto stariĝis por la okazo, ke estus idaro, ĉar ĉiu patro respondecas de la filoj, kiujn naskas.

Tio motivas nin klarigi, ke la instruado kaj subteno de la infanaro ne dependas de la Ŝtato, sed de ĉiu patro.

La geedziĝo efektiviĝas laŭ la plej simpla maniero, sen ceremonio kaj bezono pagi iun centonon. En ĉiu Soveto de distrikto aŭ departamento estas sekretariejo nomita “*Saks*”. La gefianĉoj devas prezenti sin en ĝi kaj montri siajn identigilojn. La dungito notas la nomojn, aĝon kaj situacion de ĉiu el ili. La estontaj geedzoj devas prononci neniun vorton nek fari iun promeson. Nur enirinte ili devas averti: “Ni venas por enregistri nin”.

Por realigi ĉi tiun enskribon en la registron, oni ne bezonas la ĉeeston de la gepatroj nek de iu atestanto. Sufiĉas la klare esprimata deklaro de la gefianĉoj: “Ni venas por enregistri nin”. Tia estas la maniero, kiel oni realigas la geedziĝon en USSR.

La divorco estas ankoraŭ pli simpla, se eblas, ol la geedziĝo. Okaze, ke edzo ne volas daŭre kunvivi kun sia edzino, aŭ male, bezonas fari neniun peton de divorco

skribe nek pere de iu peranto. Ankaŭ ne estas bezone, ke interkonsentis la geedzoj. Sufiĉas, ke unu el ili -la viro aŭ la virino- kreas je la neceso disiĝi, por ke ĝi efektiviĝis. Pri tiu afero, ne estas diferenco inter unu kaj la alia sekso.

Tiu, kiu petas la eksedziĝon, devas iri al sama loko, kie ili estis enskribitaj en la registro, kaj peti, ke oni elstreku lin el ĝi, ĉar li ne volas daŭre kunvivi kun sia edzino -aŭ edzo-. Foje plenumita la deziro de la petanto, kaj neniam demanditaj la kaŭzoj de lia decido, oni sendas komunikaĵon skribe al la virino informante ŝin, ke ŝi estas eksedziniĝinta ĉar la edzo faris la peton. La avizo estas pura formalaĵo kaj oni sendas ĝin nur pro se estus io depostulota, ne kontraŭ la eksedziĝo, sed pri la idaro aŭ iu malbona ago de la edzo.

Kiel ni jam diris, la geinfanoj ne dependas de la Ŝtato, sed ke ĉiu familio devas zorgi la siajn. La Ŝtato nur prizorgas la bubaĉojn aŭ friponetojn, ĉi tiujn vagantajn aŭ forlasatajn infanojn, kiuj ne konas la patrinan amon aŭ, kiuj perdis ĝin pro la morto de siaj gepatroj. La Ŝtato kolektas kaj enfermas ilin en iajn azilojn nomitajn kolonioj, kie ili laboras, ricevas instruadon kaj lernas la profesion, kiu plej bone akordas kun iliaj kapabloj. Poste oni sendas ilin al la fabrikoj por ke ili okupu la lokon, kiun al ili respondas por la konstrua tasko de la nacio.

La gefiloj, laŭ preskribo de la sovetia leĝo, apartenas al la virino, sed se geedzoj havas du filojn, povas resti ĉiu geedzo kun unu, kiam ili disiĝas. La viro siaflanke estas devigita sekurigi la nutraĵojn de la filo (aŭ filoj) ĝis la aĝo de deksep jaroj. La kvanto, kiun li devas pagi, estas determinita de la tribunalo la tagon, kiam okazas la juĝo, kaj la forlasanta patro devas efektivigi ĝin akorde kun la ebloj de sia salajro.

Ĉi tiu lasta afero ŝajnas al ni iom arbitra kaj nelogika, ĉar per tia sistemo la infano ekde la plej frua aĝo devas

sperti la konsekvencojn de ĉie kritikebla malegaleco, kaj pli en la bolŝevika reĝimo, ĉar -kiel la leganto scias-, la salajroj varias laŭ la kapablo kaj la aktivecoj de ĉiu. Ĉi tiuj varioj nepre efikas sur la infano kaj kaŭzas verajn malfeliĉojn.

Por pli bone komprenigi ĉi tiun aferstaton, ni donas ekzemplon. Ni supozu, ke edziĝinta inĝeniero eksedziĝas de sia edzino kaj ili havas unu infanon. Samtempe, braklaboristo ankaŭ edziĝinta kaj same patro de infano petas la eksedziĝon. La inĝeniero mezume enspezas 400 rublojn monate kaj la braklaboristo nur 80. La edzino de la unua povos ricevi, por la nutrado de sia filo, 50 ĝis 60 rublojn monate, dum la edzino de la braklaboristo nur ricevos 10 ĝis 15 rublojn.

Do la filo de la unua povos taŭge nutri kaj vesti sin samkiel kiu ajn filo de ĉi-tiea “bona domo” dum la dua nur konos la malabundecon, la mankojn kaj la mizeron, kiuj ŝajnas esti la heredaĵo de la parioj.

Multe pli logike ŝajnas al ni establi komunan fonduson, el kiu oni destinos egalan kvanton por la nutrado de ambaŭ infanoj. Ni avertas, ke se ni kredas, ke la kreo de tia fonduso neeblas, ni detenas nin sugesti ĝin; sed ni opinias, ke ne nur ĝi estas realigebla, sed ke en komunista reĝimo estas la sola maniero starigi relativan egalecon.

Ŝajnas, ke jam venis la momento, kiam oni koplodu eltiri la materialismon el la konsciencoj. Se ni volas, ke la novaj generacioj impulsu la mondon antaŭen, oni devas purigi la fundon de la koroj nesentemaj pro la mono. Se oni ne faras tiel, ni povos aserti, ke la bolŝevikoj ne nur nuntempe perfidis la komunismon, sed ke ili ne zorgas pri ĝia alveno en estontaj epokoj.

La domoj por infanoj

Estus malprudente kaj evidenta montro de malbona fido, nei, ke la kreo de la domoj por infanoj (vartejoj) estis verko de la oktobra revolucio.

Ĉiu facilaĵoj, kiujn oni pretendas doni por ke la instruado de la infanaro estu pli realigebla, estis ne konataj en Rusujo, kvankam jam estis efektivigitaj en aliaj landoj, kiel Germanujo kaj Francujo ekzemple, kvamkam eble ne per la sama perfektigo kaj la komfortoj, kiujn disponas tiuj de Rusujo.

Ni devas rekoni, ke la domoj por infanoj havas vastegan efikecon de la komunisma vidpunkto, ĉar la infanoj edukitaj en siaj hejmoj akiras individuajn kaj egoistajn spiriton kaj inklinojn, kiuj ilin faras ribelemaj, kiam ili plenaĝos, al ĉiu kunvivado aŭ kooperado en la kolektivigoj, dum en ĉi tiuj domoj lia spirito malfermiĝas al la kunlaborado, la solidareco kaj la sindonemo.

La Ŝtato ne entute monhelpas la domojn por infanoj, tiel ke la prizorgo de ĉi tiuj ne estas senpaga por la gepatroj, male. Ĉiu familio pagas, laŭ siaj enspezoj, monkvanton variantan inter 15 kaj 25 rubloj. Dum la tago oni nutras ilin trifoje. La matenmanĝo je la naŭa matene, la tagmanĝo je la dekdua. Post la tagmanĝo, oni enlitigas ilin du horojn, kutimo kiu estas regulo en ĉiuj similaj institucioj de la Ŝtato: malsanulejoj, domoj de ripozo, ktp. Ellitiĝinte, ili manĝas teon kun kukaĵoj kaj eliras por ludi ĉiuj kunaj -infanoj kaj infaninoj-, somere, surstraten, kaj vintre, en la specialaj salonoj. Plejparte, la ludiloj devenas de la domoj de la geinfanoj.

Ekzistas du klasoj de vartejoj. Unu por la infanoj de la naŭ monatoj ĝis la tri jaroj, kiuj ricevas la nomon de “Domo

lulilo”. Alia por la geinfanoj de tri ĝis sep jaroj, lasta aĝo en kiu ili eniras en la lernejon nomita “Ĝardeno de infanoj”.

Ĉiumatene je la horo iri al la laborposteno, la patrinoj portas siajn infanojn al la domo por infanoj kaj reprenas ilin, kiam finiĝas la taglaboro. Por ke la infanoj estu akceptitaj, oni bezonas prezenti laborpravigilon, per kio oni kreas novan malegalecon, ĉar ne ĉiuj, kiuj volas, povas porti siajn filojn al la “Domo lulilo” aŭ al “Ĝardeno de la infanoj”, sed nur kiuj laboras.

Ĉi tiuj domoj por infanoj estis kreitaj por ke ne okazu kiel antaŭ la Revolucio aŭ, kiel en la kapitalismaj landoj, kie la virino, kiu laboras kaj estas patrino, devas forlasi la laboron en la manlaborejo, la fabriko aŭ la oficejo, por resti zorge de la ĵusa naskito. La domoj por infanoj plenumas tiujn zorgojn. Per tiuj malaperas la edzino-servistino aŭ la edzino-kovaparato kaj aperas la libera virino, kiu povas daŭrigi siajn laborojn.

Kvankam rekonante la grandan socialan kaj instruan verkon, kiun realigas la domoj por infanoj, oni devas diri, ke ĉi tiuj ne estas sufiĉe taŭge zorgataj, ĉar en ĉiu domo estas virino por prizorgi tridek infanojn. Krom tio, kio estus malĉefa, estas la maloportunaĵo de la monkvanto, kiun oni devas pagi, maloportunaĵo, kiu devigas multajn laboristinojn, kiuj enspezas malgrandajn salajrojn -pri kiuj enspezas altajn salajrojn, ni ne parolas- forlasi la laborpostenon, kiam estas patrinoj, ĉar ili ne povas porti siajn filojn al la “Domo lulilo”.

Okazas, ke aliaj devas daŭre labori pro neceso kaj, ke pro tiu sama kaŭzo-neceso, kio estas manko de tio nepra, ankaŭ ili ne povas profiti sin de la avantaĝoj de la domoj por infanoj. Krome estas la morala kialo, ĉar ne estas zorgoj, kiel tiuj de patrino, kio apartigas ankaŭ multajn de ĉi tiuj institucioj.

Nu ne estas strange, ke ĉiuj, kiuj iris al Rusujo, revenas laŭdante la superajn kvalitojn de la “Domoj por infanoj”, ĉar iliaj starigo kaj tasko estas tre estimindaj. Sed ĉiuj forgesas detale klarigi al ni la internan funkciadon de tiuj, io fundamenta por la ĝusta konado de afero. Same okazas kun la aserto, kiun iuj ĵetis pri tio, ke la Ŝtato zorgas la infanojn. Nenio pri tio. Oni devas detrui ĉi tiun falsan klišon. En Rusujo, samkiel en kiu ajn alia lando, la infanaro -ties instruado kaj zorgoj- apartenas al la familio.

La Ŝtato -ni ripetas- nur prenas sur sin la forlasitajn infanojn, la orfojn aŭ tiujn de nekonataj gepatroj. Por tiuj, oni kreis la domojn de instruado, kie oni instruas ilin labori kaj kapabligas ilin prizorgi sin per si mem kaj esti utilaj al la Ŝtato.

La recidivuloj estas senditaj al la disciplinigaj kolonioj, kie restas internigitaj ĝis la fino de la puno, kiun oni al ili trudis.

En alia ĉapitro, ni klarigos la pozicion de la virino antaŭ la geedziĝo. La leganto vidos en ĝi, kiel oni solvas la problemon de la patrineco en USSR.

La socialaj asekuroj en USSR

Kvankam la defitiva strukturigo de la socialaj asekuroj datiĝas de la oktobra revolucio, iliaj radikoj jam estis metitaj ekde la mallumaj epokoj de la carismo, dum kiuj la laborista klaso tenis perfortan kaj konstantan lukton kontraŭ la burĝaro, cele fini la teruran mizeron de kiu ĝi estis viktimo. Pro tiu kaŭzo, en 1911, pro metalurgia striko en Sankta Petersburgo (hodiaŭ Leningrado) la laboristoj adoptis

senhezitan kaj decidan sintenon, energian kaj persistan, kiu donis kiel rezulton konkeri kelkajn plibonigojn en la ekonomia kampo, kiuj iom protektis ilin kontraŭ la malsato dum la penigaj tagoj de deviga mallaboremo, kiujn nepre devas trapasi la laborista klaso.

Tamen ĉio akirita per tiom da sangaj luktoj estas bagatelo kompare tion, kion oni devis konkeri kaj la neprokasteblaj necesoj de la humiluloj. Sed venis la oktobra Revolucio kaj kun ĝi la triumfo de la proletaj idealoj. La bolŝevika Ŝtato, konscia de la neeviteblaj depostuloj de la laboristoj kaj ne ignorante la efikecon de la preventivaj disponoj, donis plenan kontentigon al la multfoje manifestitaj aspiroj kaj vaste kaj efike starigis la reĝimon de la socialaj asekuroj.

La regularo de la sociala asekuro en Rusujo enhavas la du jenajn punktojn: 1) Akcidentoj de la laboro kaj malsanoj de medicino kaj ĉiugrada kirurgio. 2) Proviza aŭ tempa nekapableco kaj invalido.

Ni ripetas iufoje pli, kvankam estas konsideritaj kiel tedaj, ke ni lokas nin laŭ nivelo de perfekta senpartieco. Animas nian plumon neniu batalema strebo, nek rimarkebla intereso de skolo. Pro tio, kiam oni metas la aferojn en ilia ĝusta punkto, ni devas deklari, ke ja la afero de la socialaj asekuroj estas unu el la konkeroj pli kompletaj kaj efikaj realigitaj de la rusa proletaro. Sed tio ne estos obstaklo por ke, dum la disvolvo de nia klarigo kaj de la detalo de la funkciado de ĉi tiuj asekuroj, ni komentu el nia privata vidpunkto la novan leĝon voĉdonitan en 1930.

Per tiuj klarigoj, mallongaj kaj tute ĝustigitaj al la realo, ni ne faras alian aĵon ol klare pruvi, ke la plej vastaj konkeroj malprogresadas kaj malpliiĝas siaj valoroj kaj amplekso laŭ pasas la tempo, kiam pri ili ne efektivigas rigoran kontrolon

la klaso, kiun realigis la konkeron, kiu ĉi-okaze estas la laborista klaso.

En la regularo de socialaj asekuroj, kiuj validis ĝis 1930, oni specifis, ke ĉiuj laboristoj ekde la unua tago de malsano enspezos la tutan salajron kaj havos la medicinojn senpage. Ĉi tiu devis ŝajni troa koncedo al la novaj diktatoroj, ĉar en 1930 ili voĉdonis novan leĝon, kiu specifas, ke oni nur pagos la tutan salajron al la laboristoj, kiuj laboris de antaŭ pli ol tri kaj duonaj jaroj kaj samtempe estis aliĝintoj al kiu ajn sindikato. Por kiuj ne plenumas tiujn kondiĉojn, oni disponas, ke la kvin unuajn tagojn de malsano ili enspezos nur la 75 procenton de la salajro kaj de post la kvina antaŭen la tutan salajron.

Kiel oni konstatas, sen tio, ke la dekalkulo estas tre rimarkinda, la bolŝevika Registaro serĉis per tia dispono la ŝparon de kelkaj milionoj da rubloj jare, ĉar estis multnombraj la malgravaj akcidentoj de laboro, kiuj nur neeblas labori de du ĝis kvar tagoj. Krome, oni konstatas la tendencon devigi per la forto de la bezono, ke ĉiuj laboristoj estis enskribitaj en la sindikatoj ekde la unua tago de laboro, ĉar kontraŭe ili ne povos rajti la samajn avantaĝojn, ke la ceteraj.

Ni neniel volas fari kritikon pri tia sistemo; ni preferas, ke la leganto meditu pri tio kaj decidu per si mem. Nur oni devas rimarkigi, ke la malaltiĝo komenciĝis. Hodiaŭ la rabato estas de nur 25 procento; morgaŭ, profitante la proletan submetiĝon, oni povas altigi ĝin al 50, kaj tiel sinsekve ĝis la malpliigo al minimuma tipo de 25 procento por kiuj ne estis aliĝintaj al sindikatoj antaŭ determinita nombro da jaroj.

La logiko, la racio kaj la humanismo diras al ni, ke tia konduto neniel konformiĝas kun la principoj, kiujn la

bolŝevikoj diras subteni, kaj ĉefe estas tute kontraŭaj al la ideologia etiko kaj la justeco.

La domoj por ripozo

Institucio, kiu meritas ĉiujn niajn gratulojn kaj, kiu devus intensigi sin ankoraŭ pli, estas tiu de la domoj por ripozo. Estas konstruaĵoj sufiĉe spachavaj, higienaj kaj aerumitaj, lokitaj en arbaroj aŭ ĉe riveroj, ekskluzive destinitaj por servi kiel ripozloko por laboristoj.

Ĉiu laboristo, kiu laboras pli ol jaro en kiu ajn industrio, rajtas resti dekkvin feriajn tagojn enspezante sian tutan salajron. Tiuj, kiuj deziras resti ĉi tiujn dekkvin tagojn en la domoj por ripozo, devas sendi anticipan peton skribe al la komitato de la fabriko. Okaze, ke estus vaka loko, oni komunikas al la aŭtoro de la peto, ke li povas plenumi sian deziron.

La laboristoj, kiuj pasigas siajn feriojn en la domoj por ripozo, nur devas pagi la vojaĝojn, ĉar la manĝaĵoj kaj restado estas senpagaj koste de la socialaj asekuroj.

Tiuj, kiuj laboras en sandifektaj aŭ danĝeraj profesioj, ferias de tri semajnoj ĝis monato laŭ estas la kondiĉoj de la profesio. La direktistoj de fabrikoj, la submastroj, kuracistoj, sanigistoj kaj ceteraj profesioj ĝuas ferimonaton kun la samaj rajtoj, ke la laboristoj.

La kuracdomoj

Kiam venkis la Revolucio, la Registaro konfiskis ĉiujn kuracdomojn kaj banlokojn ekzistantajn en Rusujo kaj metis ilin je dispono de la laborista klaso.

Ĉiuj ĉi konstruaĵoj, kiuj antaŭe servis kiel lokoj de kuraco, ripozo aŭ distro de la rusa nobelaro kaj burĝaro, estas lokitaj en la plej kuriozaj lokoj de la provincaj urboj, meze de foliabundaj arbaroj kaj provizitaj de ĉiuj bezonaj elementoj por prizorgi laŭdeve la malsanulojn kaj malsanemulojn.

Unu el la plej vizitadataj kaj rekomendataj pro siaj klimataj kondiĉoj estas la urbo de Kislavosk, kie estas la fontoj de la famaj mineraj akvoj de “*Narsan*”, kie ekzistas pli ol sesdek malsanulejoj por ĉiaj malsanoj: reŭmatismo, nerva sistemo, tuberkulozo, koro, ktp, ktp.

Ĉiuj malsanaj laboristoj devas konsulti la komisionon de kuracistoj, kiuj determinas la malsanon, la taŭgan kuracadon kaj la klason de malsanulejo, kiu al ili respondas. Oni enskribas ilin en registron kaj kiam estas ilia vico, oni avizas ilin por ke ili translokiĝu al destinita loko.

Ĉar la nombro de malsanuloj estas tiel granda, ne estas strange, ke iuj atendos vicon dum tri kaj kvar jaroj ne atingante postenon en ajna kuracdomo.

La nova leĝo de 1930 starigas, ke en la kuracdomoj oni devas rezervi grandan numeron da litoj kaj “specialajn” ĉambrojn, kiuj nur povos esti okupataj kontraŭ pago de 180 ĝis 250 rubloj monate. La arbitrecon kaj maljustecon, kiun tia dispono reprezentas, konstatos la leganto rememorante kion ni diris en la antaŭa alineo, kaj rimarkante, ke la malnova leĝo disponis, ke ĉiuj litoj povis esti okupataj de ĉiuj laboristoj senpage.

Tiel ke, se antaŭe, kiam la akcepto estis senpaga, ne estis sufiĉa loko por ĉiuj malsanuloj, kiu estos nun la problemo pro la devigo rezervi pagendajn litojn?

Krome tiu dispono nuligas la tutan belecon, kiu aŭreolis la kreantan geston de ĉi tiuj kuracdomoj, ĉar estas perfida atenco kontraŭ la sociala justeco.

Rimarku, ke per tio, kion enspezas la laboristoj, estas tute neebla, ke neniu el ili povas atingi pagendan liton. Nu la nova dispono profitigas kaj protektas ekskluzive la burokrataron, kiu enspezas fabelajn salajrojn.

Ni supozas, ke per tia dispono oni ne pretendis alia aĵo ol imiti la nobelaron kaj la burĝaro de la malnova Rusujo, ĉar, kiel tiam tiuj, ni nun vidas la altrangajn dungitojn translokiĝi ĉiujare, dum la ferioj, al ĉi tiuj kuracdomoj cele evidentigi sian malŝpareman potencon, kiu estas humiliga ofendo al la laboristoj.

Dume la malriĉaj malsanuloj, kiuj ne havas monon por pagi al si la lokon en la kuracdomoj, devas agonii kaj morti atende. Por fari malpli evidenta la maljustecon, al kiuj estas en la antaŭa situacio, oni redaktas tempan atestilon de invalideco, kiu en la plimulto el la okazoj estas atesto pri morto.

La kuracdomoj, samkiel la domoj por ripozo, havas plenajn bibliotekojn, teatrojn, kinejojn en kiu ĉiusemajne okazas sufiĉe amasaj reprezentaĵoj. Tio esenca estis agrabligi la restadon de la malsanuloj.

Ĉar ni parolis pri la invalidoj aŭ sentaŭguloj, necesos klarigi al la leganto, ke ekzistas tri klasoj de invalideco: apartenas al la unua klaso, tiuj deklaritaj kompletaj invalidoj kaj sekve ne povas daŭre labori. Ĉi tiuj enspezas la 75 procenton de sia salajro. Al la dua klaso apartenas la

dumtempaj invalidoj, kiuj enspezas nur la 40 procenton de sia salajro kaj oni enmetas en la trian klason tiujn, kiuj perdis sian produktan kapablon kaj, kiuj suferantaj malgravan malsanon ne povas doni la saman produktokvanton, ke la ceteraj laborantaj laŭkvante. Por ĉi tiuj oni kreis novan tipon de salajro, kiu al ili permesas enspezi proksimume la samon produktante malpli, ekzemple: laboristo antaŭe produktis kvar ŝrankojn; post sia malsano, li nur povas produkti tri. Tiam oni al li pagas 50 procenton super la specifita prezo kaj tiel oni ne malpliigas la salajron.

Jen mallonga, pura kaj skema la elmontro rapida kaj vera pri kio estas la socialaj asekuroj en USSR. La leganto konstatos per si mem la avantaĝojn, kiujn oni komence konkeris, kaj la okazintan malprogreson kaj tutcerte meditu pri tio.

La asekuro pri patrineco

La sovetia leĝo specifas, ke ĉiuj okupataj laboristinoj en USSR rajtas du monatoj antaŭe kaj du poste la akuŝo ferii cele laŭdeve prepari sin por la alveno de la estonta estulo. Ĉi tiujn datojn tamen devas decidi la kuracistoj, kiuj konsistigas la komisionon taskitan de ĉi tiu afero. Pro tio iufoje okazas, ke la estonta patrino eĉ ne ferias du semajnon, ĉar la kuracistoj ne povas tutcerte determini la ekzaktan tagon, kiam okazos la akuŝo.

Ni tuj diras, honore al la vero, ke dum la tuta tempo, kiun daŭras la ferioj, la virino enspezas la tutan salajron.

Krome ĉiuj, kiuj estos patrinoj, ricevas senpage vestaĵojn por la ĵusa naskito kaj pliigo de naŭ rubloj monate

dum la naŭ monatoj de la gravedo, cele ili povas plibonigi sian nutradon laŭ oportuna maniero.

Laŭ la oficialaj statistikoj, kiujn ni ne pridubos, la Sovetoj elspezis, nur por prizorgi la socialajn asekurojn, la kvanton da du mil milionoj, el kiuj kvarcent kvardek milionoj estis destinitaj al la konstruado de loĝejoj.

Antaŭ ol fini ĉi tiun ĉapitron, ni volas preni aserton diskonigatan de la fervoraj komunistoj, kiu diras, ke la salajro de la laboristo estas pli alta ol tio, kion oni diras, ĉar oni devas aldoni al ĝi la monkvanton da ĉi tiuj plibonigoj ne ekzistantaj en la kapitalismaj landoj kaj, kiuj estas kvazaŭ komplemento al la salajroj: senpagaj lernejoj kaj socialaj asekuroj.

Tion ni kontraŭargumentos per simpla kaj logika maniero por pruvi, ke ne estas tiel, ke de la specifita salajro oni dekalkulas du procenton de la imposto pri la salajro, kiun rekte enspezas la ŝtato; alia du procento, kiel kvoto por la sindikato; alia du procento por la kooperativo pri konsumo kaj, laste, la neevitebla devigo subskribi la depruntojn, kiujn ĉiujare cirkuligas la Ŝtato. Se ni rimarkas, ke al la menciitaj depruntoj, oni devas kontribui almenaŭ per semajna salajro kaj sumas la monkvanton da la impostoj aŭ dekalkuloj de la salajro, ni simple atingos logike la konkludon, ke la lernejoj kaj la asekuroj estas nur subtenitaj per la salajroj de la laboristoj mem.

La lernejoj

Kiel en Francujo kaj Germanujo, kie la instruado estas deviga ĝis la dekkvar jaroj, la rusaj infanoj devas ĉeesti en la lernejo post mimimume la ok jaroj kaj ricevas senpagan instruadon.

En la elementaj lernejoj oni ne havigas al la infano racian instruadon bazitan sur la harmonia disvolviĝo de la infano cele krei al li individuecon kaj, ke li evitos per sama takto kaj diskreteco fali en la ungegojn de la krudaj materiismo kaj aŭtoritatismo.

Tiel, kiel en la landoj nomitaj burĝaj oni instruas la infanaron laŭ maniero aŭ sistemo pli-malpli katolika, kaj enplantas en la junajn cerbojn la nuligantajn dogmojn de la modaj religioj, kies ĉefa celo estas kultivi la tendencon sindoni al la abstraktaĵoj kun la malproksima espero atingi tion, kio ne estas en la ĉielo, forgesante tion, kio estas sur la tero, same, sed kun malsama tendenco fariĝas en USSR.

Oni ne instruas en la lernejoj la katolikan religion, sed male oni diskonigas, subtenas kaj disvastigas alian ne malpli danĝeran kaj arbitran: la marksisman.

La edukajn librojn, devigajn en ĉiuj rusaj lernejoj, devas pagi la gepatroj de la lernantoj aŭ ties familianoj. Ĉiuj ili enhavas temojn kaj skribaĵojn rilatajn aŭ faritajn de la bolŝevikaj idoloj, de Lenino ĝis Kalinin; tiel ke la instruado estas el resumo de la marksismaj teorioj interpretitaj de ĉiu tiuj gravuloj.

Tiel la novaj generacioj kreskas kaj disvolviĝas konvinkitaj pri la nesupereblaj bonecoj de la reĝimo edukinta ilin, kiu tiel siavice scias, ke povas absolute kalkuli kun la aliĝo de tiuj junularoj, kies krania kapablo estis modlita laŭ gusto de la ŝtata kriterio.

La sistemo -kiel ne povis okazi alimaniere- estas egala al tio uzita de ĉiuj registaroj. La laikaj lernejoj -pri la religiaj ni ne parolu-kreitaj de ĉiuj respublikaj registaroj ne havas alian celon ol modli cerbojn laŭ bildo kaj simileco de la menso bezona por la subtenado de la Respubliko.

Kaj pri la konkreta kazo de Rusujo, kiel eblas, ke malaperos de tiu lando la aŭtoritato kaj diktatorado, se oni enkondukas ĉi tiujn konceptojn en la medolon de la infano, kaj male oni ne metas lin sur la vojon, kiu duonvidos la eblon, ke ĉiuj ĉi obstakloj malaperos?

La kreo de nova, libera, humana kaj frateca mondo ne povas estis tuŝebla fakto dum oni edukas la junularon en la sankta timo al la aŭtoritato kaj en la profunda sento pri tio, ke estas necesa la subpremado por porti la homojn sur la “bonan vojon”. Nur la libero povas naski la feliĉon. Kiam la instruistoj emancipiĝos de ĉiu kuratoreco kaj komprenos kiu estas sia vera rolo, la homaro estos doninta decidan paŝon al sia leviĝo. Dume ĉiuj penadoj kolizios kiel la ondoj kontraŭ rifo, kontraŭ la murego de la prijuĝoj.

Venis la momento forlasi, ĉar estas kontraŭefika, la kultivon de tiu malutilega planto, kiu nomiĝas aŭtoritato. Se ni devas semi nian konfidon en la plugo de ĉi tiuj generacioj, ni devas antaŭ ĉio elŝiri el ili la malbonigan herbon.

Sed la rusa junularo ne povos impulsi la mondon antaŭen, ĉar ricevas tendencan kaj arbitran instruadon, ĉar, samkiel la fervojo, jam havas determinita sian irvojon. Tamen aliaj homoj venos, nerespektemaj kaj aŭdacaj, partianoj de la libera aero kaj la flugiloj -enamiĝintaj de la vojoj sen reloj-, kiuj finigos tiom da artifaritecto.

Manke de sanktuloj kaj religiaj ferioj, la registaro determinis kvar festojn jare -aparte de la kurantaj-, kiuj servas por instrui la infanoj pri ilia signifo kaj, kiuj utiligas por gravitigi iom pli da plumbo sur la malforta juna kapo. Estas ĉi tiuj festoj: la unua de majo; la sepa kaj oka de novembro -nomitaj festoj de la revolucio- kaj la dudek unua de januaro, pro memorfesto de la morto de la granda bolŝevikestro Lenino.

Ci-okaze la stratoj pleniĝas per afiŝoj, sur kiuj oni vidas figurojn de ĉiuj homoj reprezentaj de la diktatora aparato reganta USSR-on.

Ĉi tiu estas la instruado, kiun oni havigas al la infanoj en Rusujo. Ni ne luktas kontraŭ ĝi, sed laŭ nia juĝo ŝajnas al ni erara, se ĝi klopodas produkti sendependajn estulojn. Nu se ĝi klopodas krei ulojn aŭtomatajn, disciplinitajn, senkonsciencajn kaj mankajn de iniciato, ili sekvas trafan vojon sur kiu ni konsilas al neniu, ke li sekvu ĝin. Estas vojo, kiu kondukas al la memmortigo.

La prostituado

Al la plimulto de niaj legantoj ŝajnos nekredebla, sed veras, ke en la Sovetia Rusujo ankoraŭ ne malaperis la prostituado malgraŭ ke ĉi tiu estis deklarita neleĝa kaj, ke ĝi devas disvolviĝi en la kasecô.

Multaj asertas, ke la ekzistanta prostituado estas tre eta kaj, ke nur postvivas, kiel miskutimo de la moroj de la malnova reĝimo. Nenio pri tio. Tiel en Moksvo, kiel en la ceteraj gravaj urboj, kiujn mi vizitis, mi povis konstati, ke la plimulto el la ĉiesulinoj estas knabinoj de 18 ĝis 20 jaroj, kio tute malkonfirmas la menciitan aserton.

La nuntempa prostituado ne estas la sama, ke antaŭe. Fariĝis nova rekrutado kaj la “falintaj” virinoj amase venis.

Veras, ke la bolŝevika ŝtato uzas multajn disponojn por malebligi la disvolviĝon de ĉi tiu plago. Ĵuse oni disponis, ke ne estu permesa la eniro en la hotelojn je altaj horoj nokte al la paroj, kiuj ne estas geedzoj. Ankaŭ ne dum la tago, oni povas akiri ĉambron en la hoteloj, escepte de iuj geedzoj, kiu venis pro vojaĝo.

Se iu ĉiesulino surstrate iras serĉante klientojn por la plenumo de sia komerco, estas tuj arestita. Se ŝi ne havas laborpostenon nek parencanojn nek familion, kiuj okupiĝis pri ŝi, oni serĉas por ŝi okupon, cele ŝi gajnis la vivon laŭ pli deca maniero.

Multaj el ĉi tiuj malfeliĉulinoj estas laborantaj virinoj, sed pro la nesufiĉa salajro, kiun ili enspezas, estas devigitaj realigi ĉi tiun “eksterordinaran laboron” por ricevi kromajn enspezojn. Oni devas diri, ke multaj jam trovis novan sistemon por solvi la aferon.

Ĉi tiu sistemo konsistas profitigi la avantaĝojn, kiujn proponas la eksedziĝo kaj edziniĝi kun la unua aperonto por la ekskluziva celo solvi la ekonomian problemon. Tamen ne ĉiam povas efektiviĝi ĉi tiu plano kaj ĉi-okaze, la supera rimedo estas la prostituado.

Ni ne scias, kiuj motivoj kaŭzas la intereso, kiun havas la komunistoj aserti, ke en Rusujo estas neniigita la almozado kaj forigita la prostituado, ĉar ajna vizitanto de la “ruĝa paradizo” tuj konstatos, ke ĉi tiuj socialaj plagoj ankoraŭ daŭras, kvankam malpliigitaj, kaj li povos ridi pro la komunistoj, kiuj neas kion la okuloj vidas, kaj pro reĝimo, kiu por pravigi sin alvokas la mensogon anstataŭ sincere konfesi la veron kaj klarigi la kaŭzojn.

Ni jam scias, ke la bolŝevikoj diros al ni –estas ilia eterna pravigo-, ke ĉi tiuj almozuloj aŭ tiuj ĉiesulinoj estas eksnobeloj aŭ grandaj kapitalistoj, kiuj ne volis labori. Sed ni diras, ke eĉ akceptante la eblon, ke tio iuokaze estus vera, ne eblas, ke ĉi tiu aserto ĝustigis sin al la vero, ĉar la aĝo, la kulturo kaj la manieroj, kiujn ni konis, neniel respondas al tiuj de kiuj troviĝis en la unua kazo. Almozado kaj prostituado estas du katastrofoj, kiuj vipas la karnojn de la proletoj de la urbo kaj la kamparo. Estas du kruelegaj

elmontroj pri tio, ke la mizero kaj la ekspluatado ne malaperis nek ŝajne malaperos de USSR.

Dume ankoraŭ daŭras la ruĝa povo kaj kaŝe de la rusa proletaro dikiĝas tiu grandega vampiro, kiu estas nomita *burokrataro*.

La aborto

Ege doloras al ni ne povi dediĉi la tutan bezonan spacon al tiel elstara kaj grava afero, kiel tiu de la aborto. Kaj ni karakterizas ĝin, kiel gravan aferon, ĉar ĝi estas unu el la rimedoj limigaj de naskiĝoj kontraŭ kiu oni pli batalis kaj, kiu per pli granda penado sukcesis subtenadi.

Pro tiuj kialoj, ni opinias, ke unu el la plej bonaj trafoj de la rusa kodo estas leĝe akcepti la aborton.

La leĝa aborto ne efektiviĝas, en la Sovetia Unio, ene de la hejmo de la paciento, sed en klinikoj specialaj por tiu afero. Estas taskitaj de ĉi tiu komisio la kuracistoj ginekologoj kaj la akuŝistinoj, kiuj prizorgas, ke la aborto efectiviĝos per la plej malgrandaj ĝenaĵoj kaj la plej grandaj facilecoj.

Ĉiuj tiuj virinoj, kiuj ne deziras naski filojn kontraŭ sian volon en kiu ajn situacio, povas profiti sin de la leĝo, kiu rajtigas la propravolan aborton.

Tamen la leĝo specifas, ke la prizorgado kaj ceteraj akcesoraĵoj por la aborto estu senpagaj, sed fakte nur povas profiti sin de tio la patrinoj de multnombra familio, kiuj havas pli ol kvar filojn; kiuj suferas iun kontaĝan malsanon, kiu povus heredi ilian filon, kiel estas la sifiliso aŭ la tuberkulozo, ktp, ktp. En la ceteraj situacioj, estas devige

pagi la kostojn de la simpla operacio, kostoj, kiuj ĝenerale estas tridek rubloj.

En la unua situacio, tio estas, kiuj povas peti la senpagan prizorgadon, oni devas prezenti la legitimilon pruvantan, ke la koncernatino rajtas tion. En la dua situacio, oni bezonas neniun legitimilon, sufiĉas pagi.

Cetere ni rekonas, ke la leĝigo de la aborto estas bonega leciono por la nacioj, kiuj konsiderante sin “progresantaj”, ankoraŭ ne kuraĝis alproksimiĝi al io simila.

Ĉi-sence en la ama kaj eŭgenika leĝaro, Rusujo sen iu dubo lokiĝis ĉekape de la mondo, kvankam ĝiaj leĝoj kaj metodoj estas plibonigeblaj. Ni ege deziras, ke ankaŭ estu tiel en la ekonomia kaj politika vivo. Tiam ni estus akordiĝintaj aŭ identiĝintaj kun la sovetia reĝimo.

17a. La persekuto de la libera penso en USSR.

Neniu dubas pri tio, ke ni vivas –ideologie parolante- unu el la plej sangaj epokoj, kiun registras la historio de la landoj nomitaj civilizaciaj. La 20a jarcento karakteriziĝas pro la krueleco per kiu ĝi traktas la homojn, kiuj lumigitaj de porjusta idealo aŭ soifaj de libero penas por renovigi la socialan sistemon de la mondo, alportante la lumon de la novaj konadoj al la mallumaj cerboj de tiom da estuloj, kiuj vivas en la plej kompleta nescieco.

Multaj estas la idealistoj –de la pli diversaj tendencoj-, kiuj ĉiutage pereis en sia lukto kontraŭ la nuntempa organa sistemo de la Socio, kiu estas subtenita de la forto de la fusiloj kaj la mitrajloj, kiuj tiel en la paco, kiel en la milito, estas mortigaj instrumentoj serve de la maljusteco kaj la subpremado.

Dum la kancero de la koruptado kaj la subaĉeto ronĝas la popolojn, kaj al la duonruina ĉaro de la burĝaro aliĝas –kiel la malnovaj sklavoj jungis sin al la imperia kaleŝo de la cezaroj- la partianoj de la forto, de la malunuiĝo, de la malamo kaj de la superregado –, la laboristoj -modernaj parioj- ne povas ĉesi ĵeti ĉiudirekten la flamigan vorton de sia pekelaĉeto kaj, pioĉo enmane, prepariĝas detrui la ruinan konstruaĵon, kiun aliaj konstruis kaj ankoraŭ nelonge subtenis.

La jam komencita diserigo de la nuntempa burĝa reĝimo kunportis, kiel konsekvencon, lavangon el doloro kaj mizero pli grandan ol antaŭe por la laboristoj de la tuta mondo. La registaroj, konsciaj pri ĉi tiu irado en la abismon

de sia malapero, ĉiel serĉas la stabiligon de sia politika kaj ekonomia platformo cele plilongigi la vivon de ĉi tiu mortanta Socio. Sed la proletaro, laca de suferoj kaj mankoj, siaflanke prepariĝas doni al ĝi la decidan baton por ke per ĝia morto ĉi tiu Socio preparu la naskiĝon kaj disvolviĝon de alia en kiu ekzistas pli da egaleco, libereco kaj justeco.

Multaj protestis kaj ankoraŭ protestas kontraŭ la blanka teroro deĉenita en ĉiuj nacioj. Oni parolis per multo da detaloj kaj per flamiga vorto pri la reakciaj persekutadoj faritaj en la Balkanaj Landoj, kie la karceroj estas plenplenaj de homoj defendantoj de la socia renovigo. Oni arde luktis kontraŭ la krimoj, kiujn la itala faŝismo –personigita de Mussolini, la moderna Cezaro- plenumis dum sia irado al Romo, en kiu mortigis centojn da pensuloj, kiuj falis pro la kugloj de iliaj riglilaj fusiloj.

Tamen malmultaj protestis kontraŭ la persekutoj, enkarcerigoj kaj ekziloj, kiuj arbitre fariĝas en la lando de la “libereco” kaj la “demokratio”. Ni parolas –sen ironioj- pri USSR, pri ĉi tiu edena lando, kie la individuo de kiu ajn tendenco, kiu ne submetas sin al la decidoj de la diktatorado de la Komunista Partio, estas viktimo de la plej furioza persekutado, enkarcerigoj kaj ĉiaj ĝenadoj.

Ni ne povas kompreni ĉi tiun rimarkeblan intereson prisilenti ĉion, kio okazas en la lando de la Sovetoj, kie la proletaro ne povas havi privatajn bibliotekojn, kiu enhavas ĉiajn verkojn, nek sendependajn ĵurnalojn en kiuj estas permesate libere elmontri ĝiajn ideojn aŭ simple ĝiajn plendojn. Nur la gazetaro de la Komunista Partio kaj la libroj, kiujn ĉi tiu rajtigas, povas esti legitaj. La cetero estigas krimon. Tiel ke la verkoj de la grandaj pensuloj kaj sociologoj, kiel Max, Stirner, Kropotkin, Bakunin kaj aliaj multaj eĉ ne hazarde povas esti legitaj, ĉar troviĝas en neniu biblioteko.

La solaj, kiuj protestis kontraŭ tiaj procedoj estis la revoluciaj sindikatistoj kaj la anarkiistoj, kiuj finfine estas la solaj, kiuj ĉiam levas la voĉon kontraŭ ĉiu subpremado, ĉu loka, ĉu internacia; kontraŭ ĉiu Ŝtato kaj kontraŭ ĉiu diktatorado efektivigita de kiu ajn partio per kiu ajn nomo – blanka, ruĝa kaj nigra.

Estas nature, ke ĉiu konscia estulo abomenis la diktatoradon. Ĉi tiu klaso de povo, kvankam estu bonkora, ĉiam reprezentas obstaklon por la disvolviĝo de la socia progreso. Faciligante la eterniĝon de la aŭtoritatema spirito en la kolektivo kaj la individuo, la diktatorado metas grandegan digon al la impulso de la progreso.

Sub tia reĝimo devas vivi la homoj en USSR. La malkontentuloj, malkonformuloj, ĉiuj tiuj, kiuj movitaj de sia amplekse liberala spirito, kuraĝis manifesti sian ne komunisman penson – ĉu anarkiistoj, sindikatistoj, nepolitikemuloj aŭ simple revoluciaj socialistoj- pentopagas la subtenon de siaj teorioj en la amarecoj de la malliberigo, ĉu en Centra Azio, en Siberio, en Turkistano ĉu en la famaj malliberejoj “Modeloj”, kiel tiu nomita “Butirka”, pri kiu ni parolis en alia ĉapitro.

Rememoros la leganto, ke la belga kaj franca delegitaroj kelkfoje petis viziti ĉi tiun karceron lokitan en Moksvo sen tio, ke neniam ili povis atingi kontentigon al siaj pretendoj. Kial okazas ĉi tiu neebleco penetri en ĝin, kiel vizitanto? Simple: ĉar Butirka estis la karcero destinita ekskluzive al tenejo de politikaj malliberuloj, kiuj ajnamomente atendas esti kondukitaj ĉu al Siberio, ĉu al la insuloj Solovski, la arestitoj loĝas en ĝi sub malbonegaj kondiĉoj por la sano kaj de higieno, mankaj de surtutoj kaj amasigitaj je granda kvanto en tre etaj ĉeloj. Se ĉi tiun spektaklon vidintus kiu ajn eksterlanda delegito, estas nedudeble, ke tio kaŭzos al li tre malbonan impreson. Por

eviti la klarigojn, kiuj estos bezonaj kaj malaperigi tiun impreson, oni elektis malpermesi la vizitojn.

Estas centoj da anarkiistoj enfermitaj en la karceroj de Moksvo, Leningrado, Uralsk, Werchne, Charcow, ktp. La sola krimo, kiu pravigis la liberperdon de tiuj kolegoj, estas la spontanea, varma kaj decida deklaro de ilia emancipa kredaro, farita antaŭ kaŝpolicanoj aŭ satelitoj de Stalino. Kelkfoje ankaŭ la kaŭzo estas la buŝa aŭ skriba propagando, kiujn ili povis fari. Preskaŭ ĉiuj perdis la sanon dum la enfermado pro la abomeninda traktado ricevita.

De 1920, kiam estis fermita la anarkiista eldonejo "*Golos Truda*" (La Voĉo de la Popolo) kaj malpermesita la samnoma ĵurnalo pro ordono de la Komunista Partio, la anarkiistoj kaj revoluciaj sindikatistoj konstante suferas furiozan persekutadon fare de la bolŝevika diktatora povo. Cele malfimigi kaj detrui ilin, oni elpensis la plej nekredeblajn komplotojn, oni akuzis ilin je sabotantoj, banditoj kaj rabistoj. Kiam ĉi tiuj kalumnioj ne kaŭzis la sufiĉan efikon kaj cele havi pli da pravigiloj por persekuti ilin, oni akuzis ilin esti spionoj aŭ esti je intima rilato kun la Kulakoj kaj la burĝaro por detrui la sovetian reĝimon.

Ĝuste la samo okazas en kiu ajn lando –jen regas kiu ajn sentaŭgulo, jen estas respublika reĝimo-, kie, kiam oni ne povas persekuti la anarkiistojn, kiel defendandojn de idealo, oni elpensas rabojn kaj aliajn "krimojn", kiujn poste oni atribuas al ili.

La aŭtoritatemaj komunistoj partianoj de Stalino aŭ de alia ajna disidento asertas, ke en Rusujo la anarkiismo estis detruita; ke ĝi havas nenian influon inter la laboristaj amasoj kaj, ke ĝia morto estas faritaĵo. Tio estas, ili uzas la saman artifikon, kiun uzis la mortinta hispana diktatoro Primo de Rivera, kiu post la fermado de la sindikatoj, la malpermeso de la laborista gazetaro kaj la enkarcerigo de miloj da

aktivuloj –ni ne parolas pri la mortigitoj- diris: “La sindikatismo estis venkita kaj ne reviviĝos”. Sed, samkiel eraris Primo de Rivera, ĉar la cirkonstancoj pruvis, ke la anarkiista sindikatismo estas viva kaj atenta, tiel ankaŭ trompiĝas la komunistoj, ĉar la anarkiismo, kvankam ne manifestas sin, vivas kaj disvolviĝas konstante en la koro kaj spirito de la rusa proletaro.

Se en tiu lando nur ekzistus ŝanco de relativa libero, ni tuj vidus kiel ekstarus kaj manifestus sin pere de potencaj gazetaro kaj organizoj, ĉiuj nekalkuleblaj anarkiistoj, kiuj tie estiĝis sub la diktatora boto. Nur tiel ili povus konvinkiĝi ĉu vere ekzistas aŭ ne la anarkiismo en Rusujo.

Ĉar –kiu ajn iom meditanta, klare ĝin vidos - kiel eblas, ke la anarkiismo estis venkita de sistemo, kiu sukcesis doni nek ekonomian nek politikan kontentigon al la proletaro? Oni krome komprenas, ke la pereigo de la anarkiismo en USSR estas tre malfacila, rimarkante, ke estas tiu unu el la eslavaj landoj, kie la anarkiismo akiris pli grandan influon. Tio, kio okazas, kiel ni jam diris, estas, ke ĝi ne havas eblon libere manifesti sin kaj se iufoje klopodas fari tion, devas esti tre kaŝe kaj riskante sin al severaj punoj, ĉar ĝi estis deklarita eksterleĝa kaj devas disvolviĝi en la kaŝeco, kiel okazas al ĉiuj frakcioj, kiuj, kvankam estas marksismaj, malkonsentas la oficialan komunistan koncepton.

Cele ke la leganto akiru klaran kaj travideblan ideon pri la kruelega persekutado okazanta en Rusujo, ne nur kontraŭ la anarkiistoj kaj revoluciaj sindikatistoj, sed ankaŭ kontraŭ la amikoj de Trockij, ni mallonge klarigos kelkajn el la plej gravaj procesoj, kiuj okazis en la Sovetia Respubliko. Per tio, ni pruvos, ke la sola konkreta akuzo, kiun oni povis ĵeti kontraŭ la anarkiistoj kaj ceteraj malkonformuloj, estas teni neŝangeblaj siajn ideologiajn konvikojn de opozicio al la aŭtoritatemaj tendencoj, kiuj jam aperis en 1866 en la kerno

de la “I.A.L.” (Internacia Asocio de Laboristoj) inter la partianoj de Markso kaj Bakunin.

Estas nedudeble, ke nuntempe la rusaj laboristaj amasoj sentas sin elreviĝintaj pro la agado de la Komunista Partio, ĉar pasas la jaroj, oni ade kreas novajn burokratarojn kaj la politika aŭ mona kondiĉo de la laboristo ne pliboniĝas. Dume daŭras la enkarcerigoj, kies nombro pliiĝadas, ĉar se hieraŭ estis nur la anarkiistoj la viktimoj, hodiaŭ ankaŭ estas la membroj men de la partio, kiuj manifestis sin favoraj al la enkonduko de demokratiaj normoj en la ŝtata komunista agado. Pro tio, Trockij samkiel Andrés Nin, Víctor Serge kaj Rakovski kaj multaj aliaj, kiuj farus la liston senfina, estis forĵetitaj de la Oficiala Partio, persekutitaj kaj ekzilitaj de la lando, kiun per tiom da fervoro ili kontribuis liberigi kaj pro kiu ili riskis malavare eĉ la propran vivon.

La Historio ripetiĝas. La samo, kio okazis en la franca Revolucio de 1793, en kiu ties estroj, pro personaj ambicioj aŭ pro konvenaĵoj de partio, gilotinis unu al aliaj, okazas – alimaniere, memkompreneble- en Rusujo. Politike, la trockiista movado estis gilotinita, samkiel la anarkiista movado kaj ĉiu demokrata aŭ liberiga movado, nomita de ajna maniero.

Kiel kaj per kiuj rimedoj ili sukcesis krei ĉi tiun aferstaton, malican kaj malhonoran, kiu endanĝerigas la komencitan progresan iradon al pli bona morgaŭo? Ni jam diris, elmontris kaj pruvis tion en aliaj ĉapitroj, sed ne gravas al ni ripeti ĝin ĝis la sateco. Ĝia divizo ĉiam estis la manko de demokratio. La malestimo al ĉiu demokrata normo. La manko de kritiko kaj esprimlibero. Se eblus la propagando de ĉiuj ideoj, kiuj emas levigi la etikan sencon de la homamasoj, eble en ĉi tiuj momentoj Rusujo vivus en la apogeo de la libereco. Kvankam ni bone komprenas, ke la sekvan tagon de la detruo de la kapitalismo reĝimo neeblas

tute starigi la liberecenan socion, ĉar la ekonomia fakto havas grandegan influon sur la socia konstrua senco kaj, ĉar de la disvolviĝo de la produktantaj fortoj dependos la grado de feliĉo kaj bonfarto de ĉiuj, ni ne povas akcepti, ke la taskito regularigi la pason al tiu libereco estu Registaro aŭ ajna grupo de politika partio, kiel okazis en Rusujo, sed ke devas esti la sindikatoj de produktado kune kun la Komunumoj aŭ Municipoj, kiuj ellaboros la statistikojn de la produktado kaj konsumado kaj kunordigos la bezonojn de unuj regionoj kun aliaj. Ĉi tiu laboro estos ekskluziva verko de la manaj kaj intelektaj laboristoj, kiuj estas la solaj kreantoj de la socia riĉeco. Ĉiuj kunaj, laŭ plena harmonio kaj kamaradeco, laboros sen neceso konfidi ĉi tiujn laborojn al Trustoj, Komisaroj aŭ aliaj ŝtataj institucioj, kiuj nur estas utilaj por subpremi, devigi kaj vivi mallobereme, kiel okazas en la “ruĝa paradizo”. Ankaŭ ne estus bezona la polico nek ŜPD –ĉio estas la samo-, kies komisio estas persekuti la laboristojn, kiuj malkonsentas kun la superreganta kredo, ĉar tiuj, kiuj laboras, estos la solaj, kiuj povos diskuti tion, kio rekte efikas sur ili kaj pro tiu sama kialo reciproke toleros sin.

Ĉi tiu estas, laŭ nia opinio, la sola maniero logike kaj racie detrui la malvirtojn, kiujn la burĝa reĝimo postlasis al la kolektivigoj, ĉar nur la trankvila diskuto kaj la konscienca studado lumigas la cerbojn kaj, ĉar nur per la persvado povas formiĝi konsciencoj. La persekutadoj kaj enkarcerigoj anstataŭ allogi partianojn, nur atingas pliigi la kvanton da malamikoj. Komprenante tion tiele, ni neniam kaj nenie ĉesos defendi la liberon de gazetaro kaj organizo, elementoj, kiujn Rusujo tute malhavas. Tial ne estas komunisma forto, sed dekadenco. La junaj cerboj, fontoj de ideala riĉeco, de kreantaj novaĵoj kaj de impulsoj kaj inklinoj, devas stagni sin en la mallarĝa cirklo, kiun decidis la diktatoro, la aŭtoritato, la Ŝtato. Male ili estas devigitaj

alfronti sin kontraŭ ĉi tiuj tri institucioj kaj alfronti la danĝerojn proprajn al sia ribela pozicio. Tiujn, kiuj tiel agadas, atendas la plej kruelaj persekutoj.

La plimulto de la juĝprocesoj, kiujn oni juĝas en USSR ne realiĝas publike, tiel ke la publiko ne povas aŭskulti la akuzon kaj la pledon de la procesitoj. Je malferma pordo nur okazas la juĝprocesoj, kiuj pro sia speciala karaktero povas kaŭzi certan sensacion en la internacia opinio, cele altiri al si la simpatiojn de certa popola sektoro aŭ pravigi la ekziston kaj daŭron de la “diktatorado de la proletaro”.

Tio estas, kio okazis en la nomita “proceso de la Industria Partio”, kun Ramsin, Fedotow, Larichew kaj aliaj akuzitoj. Samkiel en la proceso de la menĉevikoj, tiu de la minoj de Donec kaj tiu de la ukraniaj separatistoj. En neniu el ĉi tiuj procesoj estis sola anarkiisto akuzita. Tio, per si mem, estas plena pruvo, ke estas nenia rilato kun la sabotantoj kaj la kontraŭrevoluciuloj. En la proceso Ramsin, male, estis akuzita malnova bolŝeviko, eble unu el la plej grandaj rusaj marksistoj, kiu plenumis la taskon de direktisto de la Instituto Markso kaj Engelso. Ĉi tiu, malgraŭ ĉio, ne estis juĝita publike, kiel oni faris kun la ceteraj “insdustriistoj”.

Per la sama sekreta maniero oni agadis kun la anarkiistoj kaj ceteraj disidentoj, kiuj devas foriri al la ekzilo aŭ al malliberejo ne sukcesante, ke iliaj voĉoj estis aŭditaj de la juĝistoj aŭ la publika opinio. Ĉiuj iliaj argumentoj, plendoj aŭ deklaroj restas sufokitaj en la ĉeloj de ŜPD.

Neniu povis ĉeesti en la proceso Ghezzi kaj ankaŭ ne en iu de kiuj estis arestitaj kun li, tiel ke neeblis rekte ekscii kiuj estis la akuzoj, kiujn oni prezentis kontraŭ ili. Tamen, malgraŭ ke oni povis trovi nenion kontraŭ ili, ili estis komdanitaj al tri jaroj de malliberejo. Nur pro la grandega krimo ĉiam manifesti, Ghezzi, sian malkonformecon kun la

diktatorado, kun la centralizismo kaj, ĉar li ĉiam kaj ĉiumomente subtenis la samajn ideojn pro kiuj li ankaŭ estis persekutita en Italujo.

La sola reala akuzo kaj, kiu estis la kerno de la proceso, kiun oni povis formuli kontraŭ Ghezzi estis pri tio, ke li kunvenis kun aliaj anarkiistaj amikoj. Tamen la Itala Komunista Partio asertis, ke Ghezzi efektivigis insideman kampajnon kontraŭ la sovetoj, havigante materialon al la “I.A.L.” Niaflanke, ni asertas, ke tia afero estas kompleta farso. Ghezzi kunlaboris kun la rusa konstruado per sia konscia penado, ĉiam laborante per fervoro kaj entuziasmo en sia ofico de mekaniko. Krome, li estis premiita de la Partio mem ĉar li enkondukis en la industrio etan elpensaĵon, kiu faciligis la raciigon kaj havigis grandajn ŝparojn. Antaŭ tia precedenco, oni povas demandi: Ĉi tiu estas la sabotado realigita de la anarkiistoj en Rusujo? La nepartia kaj klarvida leganto havas la parolon.

Alia fakto, kiu pruvas ĝis kiu ekstremo estas furioza la persekutado kontraŭ la anarkiistoj en USSR estas la sekva afero, okazinta en 1927. Ĉi-epoke estis arestita Alfonso Petrini pro sengravaj aferoj, kiujn ankoraŭ oni ne scias kaj ĝis nun, neniu povis scii pri li kaj ni ignoras se li vivas aŭ mortis. Mi, kune kun kelkaj amikoj loĝantaj en Moksvo, faris la bezonajn formalaĵojn cele scii lian loĝlokon kaj klarigi la faktojn pro kiuj li estis komdanita. Post ne malmultaj esploroj, ni sukcesis scii, ke Petrini estis komdanita je la maksimuma puno, kiu estas dek jaroj de enkarcerigo. Laŭ asertas kelkaj bolŝevikoj, Petrini estis komdanita pro spionado serve de la itala faŝismo.

Kiel povas klariĝi ĉi tiu aserto se Petrini devis fuĝi el Italujo persekutita de la faŝistaj bandoj kaj la itala komunista partio mem rekomendis al li, ke li eniru en Rusujon? Ne estas verŝajne, ke post mallonga loĝado en sovetia teritorio,

li metis sin serve de siaj propraj ekzekutistoj kaj persekutantoj.

La proceso Petrini samkiel tiu de Ghezzi kaj de aliaj multaj anarkiistoj kaj trockiistoj disvolviĝis ĉirkaŭataj de la plej absoluta sekreto. Ĉiuj ĉi procesoj, kiel multaj aliaj, kiuj sufiĉos por plenigi plurajn volumojn, efektiviĝis en la ŜPD-ejo mem sen tio, ke la amikoj aŭ familianoj povis helpi ilin, nek fari ion favore de ili. Ĉu ne havis tempon la bolŝevikoj por formi tribunalon revolucian, kvalifikitan kaj liberan por juĝi kiujn ili nomas kontraŭrevoluciuloj, sub la taglumo, prenante sur sin la respondecon de siaj verdiktoj kaj kondamnoj? Ĉar ili ne faras ĝin tiel, ni neniel povas doni krediton al la akuzoj, kiuj pezas sur la anarkiistoj, trockiistoj kaj ceteraj disidentoj.

Por kompari la akuzon necesas, ke ekzistu la defenda advokato kaj, ke la juĝoj fariĝu publike, invitante la atestatojn de unu kaj alia flanko, io, kio nuntempe ne okazas en Rusujo. La evidentan pruvon ni havas, krom la cititaj procesoj, en la afero Rusakow kaj tiu de Lazarevich, kvankam ĉi tiuj du kazoj, malgraŭ la kondamno, oni sukcesis forpreni ilin de la malliberejo, pro la energia protesto kaj la persista premado de la tuta internacia laborista klaso.

La samon oni devus fari kun ĉiuj kamaradoj, kiuj estas kondamnitaj kaj suferas ĉiujn dolorojn kaj amarecojn pro la sola krimo ne voli konsenti con la nekredeblaĵoj de la ŝtata komunismo. Ĉi tiu estas la sola kaŭzo de ilia ekzilo kaj de la persekutadoj, kiujn ili suferas, kvamkam por doni la sensacion, ke en Rusujo estas demokratio kaj libereco, oni ne parolas pri iliaj ideoj kaj oni prezentas ilin, kiel krimulojn, faligante sur ĉi tiujn persekutitojn makulon, kiu por ilia konscienco kaj etiko estas ofendo. Oni akuzas ilin pri sabotado aŭ spionado. Ĉi tiun sistemon de insidema,

intrigema kaj abomeninda akuzo uzas la komunistoj, ne nur en Rusujo, sed ankaŭ ĉiulande, por enkonduki la dubon kaj la ŝanceliĝon inter la vicoj de tiuj, kiujn ili konsideras kiel malamikojn. Mi konstatis kiel ili uzis tiun kalumnian sistemon en Moksvo, ne nur kontraŭ anarkiistoj, sed ankaŭ kontraŭ Trockij mem.

Okazis en 1930. La Komunista Partio publikigis broŝuron per kiu akuzis Trockij-on, antaŭ la laboristaj amasoj de la tuta Unio, vendiĝi al la angla kapitalismo kontraŭ X britaj pundoj. Kaj ĉiu ĉi kalumnia kaj malnobla aparato estis direktita kontraŭ viro, kiu fakte nur estas disigita de la Komunista Partio pro etaj malakordoj de rigore politika senco, pli da formo ol da fundo. Kalkulu per tiu pruvo kiuj devas esti la rimedoj uzitaj kiam oni volas lukti kontraŭ anarkiistoj! Ni devas konstante esti singardaj kontraŭ tiaj kanailaĵoj.

Ĉiuj penadoj faritaj de Trockij por sinceri sin antaŭ la rusaj laboristaj falangoj kaj pruvi, ke ĉio estis malhonora kalumnio, rezultis nulaj, ĉar eĉ ne unu sola el liaj notoj estis publikigita. Same okazis kun lia “Platformo”, libro, kiun li skribis por difini sian politikan pozicion kaj, kiun pro ordono de la stalina diktatorado oni ne povas legi nek cirkuligi en la sovetia Respubliko.

Ĉi tiuj estas la indignaj rimedoj, kiujn uzas la komunistoj –mi jam diris, ke same en Rusujo, ke en la ceteraj naciojpor misfamigi tra la tuta mondo la aktivulojn de la revolucia sindikatismo aŭ la anarkiistojn. Necesis –prisilenti tion egalas kunkulpecon- klare kaj sincere diri tion por ke la publiko sciu kio okazas.

Alia fakto, kiu elokvente pruvas per kiu furiozeco agadas la bolŝevikoj, estas, ke neniu povas eliri el la lando se ne estas satelito de Stalino aŭ konvikito pri la bonecoj de la reĝimo tie reganta. Por la rusaj civitanoj estas tute

malpermesita la elmigradon. Koncerne la eksterlandanojn tie rifuĝintajn, se ili ne tutklare konsentas kun la stalina komunismo, trovas ĉiujn imageblajn malfacilaĵojn kaj obstaklojn, se ili klopodas foriri de Rusujo. La familianoj de ĉi tiuj havas la saman sorton kaj eĉ multfoje ne sukcesas la proponitan celon.

Ĉu estas ĉi tiu la spektaklo de la “libereco” (?), kiun per sia revolucio volas porti al ni la diversaj frakcioj de la Komunista Partio? Absolute necesos, ke la komunistoj mem konfesu, ke la ŝtata tendenco de la unua internacio, plenumita en la realo, ne kontentigas la aspirojn de la laboristaj amasoj. Tiel ĝi estas devigita subteni kvanton da burokrataj institucioj, kiuj uzurpas plejparte la produktojn el la laboro de la laborista klaso. La burokratoj pro sia privilegia situacio, pro kiu ricevis la kromnomon de “laborista aristokrataro”, estas la plej fervoraj defendantoj de la nova Ŝtato, subpremanto de la laboristaj amasoj de la urbo kaj la kamparo.

Tial, post la spertaĵoj de la rusa Revolucio, la malamikoj de ĉiuj diktatoradoj, de ĉiuj ŝtatoj kaj registaroj: la anarkiistoj, kiuj reprezentas la alian kontraŭaŭtoritateman tendencon defenditan unue de la nelacigebla luktanto Bakunin kaj poste de la sciulo geografo Elizeo Rekluzo, opinias, ke la sola revolucio, kiu donos plenan politikan kaj ekonomian kontentigon al ĉiuj laboristoj, estas tiu, kiu definitive finos kun la nelogika ekspluatado de la homo fare de la homo, tiu, kiu reale kreos justan kaj egaleman socion, en kiu ne estos krizo kaj ĉiu laboros por vivteni sin. Tiam oni povos paroli pri komunumo el laboristoj kaj ni kredos, ke la laboro riĉigas kaj dignigas la laboriston; la produktado estos posedaĵo de la ellaboranta homamaso kaj ne de la Ŝtato.

La sindikatoj, laŭ mi kompreno, povas esti granda faktoro de renovigo kaj konstruado ĉi-sence. Sed ili ne

povas fali en la politikajn deviojn, ĉar ĉi-okaze perdos sian tutan krean valoron kaj malvigliĝos eterne en neniam finita atendo.

18a. Panait Istrati.

Ni ne volas fini ĉi tiun libron ne dedicante ĉapitron al ĉi tiu eksterordinara rakontisto, ĉi tiu revolucia kaj entuziasma verkisto, kiu fervora admiranto de ĉio, kio estas progreso kaj libereco, volis koni de apude la rusan revolucion.

Mi havis la okazon konatiĝi kun li la jaron 1929, kiam li ĵus finis rondveturon tra la sovetia teritorio, el kiu li eltiris tre malbonan impreson kaj kies donitaĵojn, kolektitajn ĉe la fonto mem de la protesto, aŭditajn el popolaj lipoj, servis al li por skribi tiun kuraĝan libron, modelo de sincereco kaj brileco, titolitan “Rusujo senvualigita”.

Dum la konversacio, kiun ni tenis, li klarigis al mi la grandon de sia elreviĝo kaj rakontis al mi tion doloran, kio estis por li devi konfesi la veron post ol manifesti tiel fervoran entuziasmon en la leteroj, kiujn li skribis al siaj amikoj pro lia alveno al USSR.

Mi rimarkigis al li, kiel senkulpigon, ke neniu povas elteni la entuziasmigan ondon, kiu trenas lin, kiam venas al Rusujo la unuajn tagojn pro la apoteoza akcepto, kion oni faras tiel la delegitojn, kiel la turistojn, kiuj iras al tiu lando pro vojaĝo de oficiala karaktero.

Tiam Istrati parolis al mi pri siaj projektoj. Per frazoj plenaj de fervoro kaj rezonado, li al mi skizis la grandajn liniojn de sia libro, kiu laŭ bonega esprimo de A. Bailly, estas sincera kaj lojala atako kontraŭ la nova malbonfarantaro, kiu en la Povo satiĝas dum la mizeruloj malmole laboras por pagi la konton, certe tre altan, de la proletaro.

La libro ja estas sincera krio kontraŭ la senbrida orgio de la “sovetiaj direktistoj”, kiuj forgesante la originon de la

revolucio, sendas la verajn kaj purajn revoluciulojn en la karceron, la malliberejon aŭ Siberion. La libro devis esti pura, senmakula bildo pri la malordo, timo kaj burokrata diboĉado, kiu detruas la sovetian landon.

Kaj ekkrias Istrati:

“Jes, la mondo mortas ĉie, supre kaj sube. Tamen se estas juste kaj taŭge, ke ruiniĝas la strukturo de tio supre, ĉar ĝi jam donis de si ĉion, kion povis, mi neniel povas koncepti la senmoralecon de tio sube, kiu manifestiĝas apenaŭ komencinta la provo.

Mi ne protestas kontraŭ la homamaso. Ĉi tiu, en sia mizero, ĉiam suferis malsaton kaj nur pensis pri tio sublima je rekta rilato kun sia stomako. Ĉi tiun ni devas pekliberigi. Sed, kiel ni povos pekliberigi tiujn, kiuj elstaras en ĝia kerno kaj, anstataŭ favori la homamason, faras kvazaŭ asignas al si apenaŭajn salajrojn, kiam reale akaparas salajrojn, rabas, seksperfortas, sufokas, detruas kaj mortigas ĉirkaŭataj de la plej absoluta silento?

Ĉu ne estas ĉi tiu la plej kategoria malsukceso de revolucio?

Eblas fari la analizon de ĉi tiu senmoraleco. Per ĝi oni povos plenigi volumojn kaj aperos kiel akuzitoj ĉiuj hierarkioj de la supro ĝis la bazo, kiuj konsistigas USSR-on kaj la Internacion. Unuj, ĉar ili profitis sin, aliaj, ĉar ili vidis kiel tiuj rabis kaj ne denoncis ĝin, kaj ĉiuj kune, ĉar ili sciis tiom da aferoj kaj prisilenti ilin; ĉar ili kaŝis antaŭ la okuloj de la mondo la nudan veron…”

***

Neniu, nek antaŭe, nek post Panait Istrati, kuraĝis paroli per tiom da klareco pri Rusujo. Ĉar tiu rumana verkisto estas unu el la malmultaj verkistoj, kiu iris al USSR kun spirito de esploro kaj analizo.

Ĉar li volis penetri, sen helpoj kaj interpretistoj, en tion plej profundan de la animo de tiu popolo. Ĉar li volis tuŝeti la grasajn bluzojn de la laboristoj, aŭdi iliajn voĉojn kaj aŭskulti iliajn ĝojojn aŭ malĝojojn. Li estis preta konkrete kaj vere ekscii kiu estis la vivo de la laboristo post la oktobra Revolucio. Resume, li volis ekscii per propra iniciato kaj rektaj rimedoj, kiuj estas la plej efikaj kaj neniam trompas.

***

Mi memoras, kiam li bedaŭris ne povi kolekti la tutan bezonan informon, esprimis al mi sian ĉagrenon, dirante:

“Mi volus povi labori en iu fabriko, manlaborejo aŭ mino. Tiel mi povus persone rimarki, kiuj estis la laborkondiĉoj kaj, kiu estas la vivo, kiun devas fari la laboristo. Ĉi tiu estas la sola maniero per kiu mi povus doni ekzaktan informon pri tiuj aferoj”

Li ne iris al la fabriko, veras. Lia kondiĉo de turisto ne permesis tion al li, sed dum la dekses monatoj en kiuj li restis en USSR, klopodis lerni la rusan lingvon kaj senigis sin -kiel mi jam diris- je ĉiuj interpretistoj, kaj li mem sufiĉis por la redaktado kaj studo pri tio, kion al si proponis.

Kaj tiel estis, kiel li amikiĝis kun la laboristoj de la fabrikoj en la ĉefurbo kaj kun la kamparanoj en provincoj. Pro tio, li povis diri poste, ke la alkoholismo, la multnombra naskado, la deviga senlaboreco, la malsato kaj la mizero regis Rusujon. Pro tio, li povis aserti -kiel ni pruvis ĝin-, ke en la “Sovetia paradizo” la popolo troviĝis laŭ la sama situacio, ke antaŭ la revolucio.

***

Panait Istrati, nelacebla esploristo, nelacebla enketanto, vidis ĉion. Li trairis la rusan teritorion de flanko al flanko, ĉiam demandante, notante detalojn kaj observojn kaj neniam perdante okazon ade paroli, kaj ĉiam per atentemo

kaj zorgo, kun kelkaj politikaj enmigrintoj inter kiuj mi troviĝis.

Lia plej granda ĝojo estis renkonti, inter tiuj lastaj, kelkajn intimajn amikojn siajn, samlaboranojn, de kiam ili estis laboristo en metalurgia fabriko -ĉar tiu estis lia vera profesio-, kun kiuj perdis ĉiun rilaton, kiam li forlasis la fabrikon por dediĉi sin al la literaturo.

Tiel kunigante la forton de sia valora plumo, la valorajn donitaĵojn, kiujn li povis akiri pro sia sperto kaj, kiujn al li havigis liaj amikoj kaj konatoj, Panait Istrati skribis siajn du bonegajn librojn, veran kaj senpartian kritikon, titolitajn: “Al la alia flamo” kaj “ Rusujo senvualigita”, kiuj estis tiom diskutitaj de la tutmonda kritikistaro kaj, kiuj meritis la plej furiozajn insultojn de ĉiuj fideluloj al la diktatora reĝimo Bolŝevika.

LA ŜTATO KAJ LA KLASOJ

CAMILLO BERNERI

En 1921 Lenino difinis la rusan sovetian ŝtaton, kiel «laboristan ŝtaton kun burokrata misformo en lando konsistigita de plimulto de kamparanoj».

Tiu difino hodiaŭ devas aliiĝi laŭ la sekva maniero: «La sovetia ŝtato estas burokrata ŝtato en kiu disvolviĝas burokrata mezburĝaro kaj laborista etburĝaro, dum postvivas la kamparana mezklaso».

Boris Souvarine, en sia libro *Staline* (Parizo, 1935), skizas la sekvan bildon pri la socia aspekto de Sovetio:

«La socio nomita sovetia kuŝas laŭ maniero, kiu al ĝi estas propra, sur la ekspluatado de la homo fare de la homo, de la produktanto fare de la burokrato, teknikisto de la politika povo. La individua alproprigo de la plusvaloro estas anstataŭita de kolektiva alproprigo fare de la ŝtato, kun la ŝtelema alproprigo de la parazita konsumo de la funkciularo. [Stalino raportis la kvanton da ĉirkaŭ 8 milionoj da funkciuloj kaj dungitoj en 1933, kies salajro ja rilate la efektivigitan laboron estas neeble kalkuli. Sed] la oficiala dokumentaro sendube konfirmas, ke: koste de la laboro de la ekspluatata klaso devigita al senkompata sweating system[43], la burokrataro eltiras senrajtan parton, kiu plimalpli respondas al la malnova kapitalisma profito.

Sekve apud la Partio kreiĝis nova socia kategorio favora al la konservado de la starigita ordo kaj la eternigo

43 «Sweating system»: elĉerpiga sistemo de produktado. Noto de 2016.

de la ŝtato, kies estingon, kune kun la malapero de la sociaj klasoj, antaŭdiris Lenino. Se la bolŝevikoj ne havas la juran posedon de la instrumentoj de produktado kaj la rimedoj de interŝanĝo, neleĝe posedas la ŝtatan maŝinon, kiu al ili permesas ĉiujn prirabadojn per pluraj procedoj. Havi la liberon povi trudi prezojn de vendo plurfoje superajn al la prezoj de kosto ja enhavas la veran sekreton de la burokrata-teknokratia ekspluatado, aliflanke karakterizita de la administra kaj militista subpremo».[44]

La bonapartismo ne estas alia aĵo ol la politika spegulbildo de la tendenco de ĉi tiu nova burĝaro, konservi kaj pliigi sian propran ekonomia-socian situacion.

En la alvoko de la bolŝeviko-leninisto Tarov [Armenak Manukian], direktita al la tutmonda proletaro en 1935, oni povas legi la jenon:

«La tasko de la burokrataro de la Partio nur konsistas izoli kaj turmenti la opoziciulojn dum ĉi tiuj ne estos publike detruitaj, tio estas, ĝis ili ne iĝos kompatindaj nepolitikuloj. Efektive, la burokratoj ne deziras, ke vi estu aŭtentika komunisto. Ili ne havas neceson de ĉi tio. Por ili tio estas malutila kaj morte danĝera. Ili ne volas sendependajn komunistojn, ili volas mizerajn servantojn, egoismajn kaj civitanojn de lasta kategorio […] Ĉu tiam eblus, ke sub vera proleta povo, la lukto aŭ simpla protesto kontraŭ la burokrataro, kontraŭ la ŝtelistoj kaj banditoj, kiuj senpune forprenas la sovetiajn havaĵojn kaj estas la kaŭzantoj de la perdo, fare de la malvarmo kaj la malsato, de centoj da miloj da homoj, estu konsiderita, kiel kontraŭrevolucia krimo?[45]»

44 Tradukita de la franca originalo, en Boris Souvarine *Staline* (*Aperçu historique du bolchevisme*) [france, *Stalino (Historia rigardo pri la bolŝevikismo*)] Parizo, Plon, 1936, paĝo 516. Noto de 2016.

45 «*Appel au prolétariat mundial* [france, *Alvoko al la tutmonda proletaro*]» [https://www.marxists.org/francais/4int/ogi/divers/tarov. htm] Post sia fuĝo de USSR en 1934, Manukian eldonis sian alvokon en Parizo en 1935 «Ĉi

La grandega tragedio de la lukto inter la revolucia «opozicio» kaj la «konservativa ortodokseco» estas tute natura fenomeno en la kadro de la socialismo de ŝtato.

La leninista opozicio pravas rimarkigante al la tutmonda proletaro la misformojn, la deviojn kaj la degeneradon de la stalinismo; sed se la diagnozo de la opozicio preskaŭ ĉiam estas preciza, la etiologio[46], male, ofte estas nesufiĉa. La stalinismo ne estas alia aĵo ol la rezulto de la efektivigo de la leninismo en la politika problemo de la sociala revolucio. Ĵeti sin kontraŭ la efikoj kaj ne konsideri la kaŭzon, la originan pekon de la bolŝevikismo (burokrata diktatorado surbaze de la diktatorado de la Partio), signifas arbitre simpligi la kaŭzan ĉenon, kiu de la diktatorado de Lenino pasas al la diktatorado de Stalino sen profundaj kontinurompoj. La interna libero de partio, kiu neas la liberan ludon de la konkurado inter la partioj de avangardo en la kerno de la sovetia sistemo, hodiaŭ estus mirakla spektaklo. La laborista hegemonio, la bolŝevika absolutismo, la socialismo de ŝtato, la porindustria fetiĉismo: ĉiuj ĉi koruptantaj ĝermoj nur povis produkti venenajn fruktojn tiaj, kiaj la absolutismo de frakcio kaj la hegemonio de sociala tavolo.

Trockij, per la sinteno de Sankta Georgo luktanta kontraŭ la stalinisma drako, neebligas forgesi Trockij-on de Kronŝtadt. La respondecoj de la nuntempa stalinismo devenas de la formulado kaj praktiko de la diktatorado de la bolŝevika partio tiel, kiel de la revo pri la neniigo de la ŝtato,

---

tiu dokumento raportis lian sperton kaj avertis la publikan opinion pri la sorto de la politikaj malliberuloj en USSR. Ĝi estis diskonigita de la trockiista internacia gazetaro kun komento de Trockij.»

46 Medicina termino: parto de la medicino, kiu studas kaj esploras la kaŭzojn de la malsanoj. La diagnozo nur estas la konstato de la malsano. Noto de 2016.

kiel rezultato de la malapero de la klasoj farota de la socialismo de ŝtato.

Kiam Trockij skribis, la 6-an de septembro 1935: «La historia absurdo de la aŭtokrata burokrataro en socio sen klasoj ne povis subteni sin kaj ne subtenos sin nedifinite», li diris absurdaĵon koncerne la «historian absurdon». En la historio ne estas absurdoj. Aŭtokrata burokrataro estas klaso kaj sekve ne estas absurde, ke ĝi ekzistas en socio, kie persistas la klasoj: la burokrata kaj la proleta. Se USSR estus «socio sen klasoj», ankaŭ estus socio sen burokrata aŭtokrataro kaj tiu aŭtokrataro estas la resulto de la postvivado de la ŝtato.

Estas pro ĝia kvalito de partio superreganta la ŝtatan maŝinon, ke la bolŝevika partio iĝis centro de altiro por la karieristaj etburĝaj uloj kaj la mallaboremaj kaj oportunistaj laboristoj.

Fakte la burokrata plago ne komenciĝis kune kun la stalinismo, ĉar ĝi estas samtempa kun la bolŝevika burokrata diktatorado.

Sufiĉas legi la novaĵojn de 1918 kaj 1919, publikigitaj de la bolŝevika gazetaro[47]. *Vechernaya Izvestia* de la 23-a de aŭgusto 1918, parolante pri la malorganizo de la poŝta servo, konstatas, ke malgraŭ la malpliigo de ĉirkaŭ 60 procento de la korespondaĵoj, la nombro da oficistoj komparita kun la periodo antaŭa al la revolucio pliiĝis ĉirkaŭ cent procento.

Pravda de la 11-a de februaro 1919 rimarkigas la senĉesan kreon de novaj oficejoj, novaj burokrataj

47 Oni devas konsideri, ke la ekzemploj de Berneri estas fidindaj kaj, ke la kritikoj de la bolŝevikoj (kiel hodiaŭ en Ĉinujo, Nord-Koreujo, ktp.) ĉiam temis pri aspekto kaj ne pri ĝia kaŭzo (vidu la 19an noton).

institucioj, por kiuj oni enoficigis kaj pagis la oficistojn antaŭ ol la novaj organizoj ekfunkciis.

«Se ĉiuj ĉi novaj oficistoj -diras *Pravda* de la 22-a de februaro 1919- invadas kaj okupas plenajn palacojn, pro ilia efektiva numero sufiĉus iuj laborĉambroj.»

La laboro iĝas malrapida kaj obstrukcanta eĉ en la komercoj kun industriaj funkcioj. «Submastro de la Komisararo de Lipetzk, -rakontas *Izvestia* de la 29-a de novembro 1918- por aĉeti naŭ "*pud*" (NeT: unu *pud* egalvaloras 16,3807 kilogramojn) da najloj kontraŭ 417 rubloj, devis ekspedi dudek skribaĵojn, akiri kvin ordonojn kaj dektri subskribojn, por kiuj li devis atendi en antaŭĉambro dum du tagoj, ĉar la funkciuloj, kiuj devis subskribi ilin, estis netroveblaj».

Pravda (num. 281) denuncis «la invadon en nia partio de etburĝaj elementoj», kiuj faris eksproprigojn «por persona uzo». En la numero de la 2-a de marto 1919 la sama ĵurnalo konstatis:

«Necesas rekoni, ke en la lastaj jaroj iuj kolegoj, kiuj ne estis membroj de la Komunista Partio en la unuaj tempoj, komencis uzi labormetodojn, kiuj estas neakcepteblaj en nia partio. Akcepti, kiel sistemon, la kutimon ne konsideri sin ligita al la opinio de la lokaj organizoj, ĉar ili havas ordonojn persone agadi, surbaze de sufiĉe limigita mandato, kaj ordoni al ĉiuj, ekzemple. Pro tio estiĝas kaŝa streĉiĝo inter la centro kaj la periferio, kaj ili altrudas per sia individua diktatorado diversajn mistraktojn».

Parolante pri la provinco de Penza, la Komisaro de la popolo pri internaj aferoj diris:

«La lokaj reprezentantoj de la centra Registaro kondutas, ne kiel la reprezentantoj de la proletaro, sed kiel veraj satrapoj. Serio de faktoj kaj pruvoj atestas, ke la solaj

reprezentantoj de la Registaro prezentas sin armataj antaŭ la plej malriĉaj homoj, malliberigante kaj portante ilin kune kun ĉio bezona, minacante per morto okaze de protestoj kaj punas per batoj. La ŝtelitaj objektoj estas revenditaj kaj per tiuj monoj ili organizas ebriiĝojn kaj orgiojn» (*Vechernaya Izvestia*, 12-an de februaro 1919).

Alia bolŝeviko, Mescheriakov, skribis:

«Ĉiu el ni ĉiutage vidas senfinajn okazojn de perforto, mistraktoj, koruptadoj, mallaboremo, ktp. Ĉiuj scias, ke en niajn sovetiajn institucionjn amase eniris friponoj kaj mallaboremuloj. Ĉiuj lamentas ilian ĉeeston en la vicoj de la partio, sed povas fari nenion por purigi al ni ĉi tiun malpurecon. […] se institucio forpelas friponon, li baldaŭ trovas alian, kiu akceptas lin kaj al li donas postenon de respondeco. Anstataŭ esti punita, li finfine estas rangaltiĝinta » (*Pravda*, 5-an de februaro 1919).

En parolado eldirita dum la 8a Kongreso de la rusa komunista partio (11-12-an de marto 1919) Lenino konfesis:

«En iuj lokoj al ni gluiĝis karieristoj kaj aventuristoj, kiuj proklamas sin komunistoj kaj trompas nin, kiuj penetris en niajn vicojn, ĉar la komunistoj hodiaŭ estas en la potenco kaj, ĉar la plej honestaj dungitoj ne volis labori kun ni pro iliaj malprogresaj ideoj, dum la karieristoj malhavas ideojn, honestecon. Ĉi tiuj homoj, kies sola aspiro estas fari meriton […].»[48]

La bolŝevika registaro montriĝis senpova kontraŭ la abunda, parazita, aroganta kaj malhonesta burokrataro.

De kvin milionoj da burokratoj oni pasis al dek milionoj. En 1925 estis 400.000 funkciuloj en la kooperativoj (*Pravda*, 20-an de aprilo 1926). En 1927 la rusa Federacio de

48 Lenino, Elektitaj Verkoj, 3a volumo, Moskvo, Progreso, 1961, paĝo 108. Noto de 2016.

laboristoj de la nutrado nombris 4.287 dungitojn por ties 451.720 aliĝantoj kaj la sindikato de metalurgiistoj de Moskvo kalkulis 700 funkciulojn por 130.000 sindikataj membrokartoj (*Trud*, 12-an de junio 1928).

Ĉi tiu burokrata abundo ne respondas al intensa kaj efika administra aktiveco. «La direktantaro de la sovetia aparato, de la bazo ĝis la plej alta rango, havas paperan karakteron. La provinca komitato kutime ĉiutage sendas unu aŭ du cirkulerojn pri ĉiuj imageblaj demandoj kaj konsideras, ke tiel finiĝas ĝiaj devoj.»

«La nombro da cirkuleroj donantaj la instrukciojn ricevitajn en la ĉeloj varias en iuj lokoj de 30 ĝis 100 monate» (*Pravda*, 7-an de junio 1925).

Altranga funkciulo, Dzerzinsky, skribis:

Oni petas de la entreprenoj la plej diversajn informadojn, raportojn, statistikajn donitaĵojn, fine kreante torenton da leteroj, kiuj devigas subteni troan dungitaron kaj sufokas la plej esencan laboron: kreiĝas maro el leteroj en kiu implikiĝas centoj da personoj; la situacio de la librotenado kaj la statistiko estas simple katastrofa; la entreprenoj ĉagrene eltenas la pezon havigi informojn per dekduoj kaj centoj da diversaj formoj. Oni nun mezuras la librotenadon laŭ la pezo.» (*Pravda*, 23-an de junio 1926).

Arbara oficejo postulas kalkulon pri la perdrikoj, leporoj, ursoj, lupoj, ktp., vivantaj en la sektoro de la konsultita funkciulo, kaj ĉi tio en la limtempo de semajno (*Krasnaya Gazeta*, 14-an de majo 1926). La provinca direktantaro pri la terkulturo de Viatka ordonas al la plenuma komitato de la kantono rakonti la tervermojn trovitajn en la kampo (*Pravda*, 1-an de marto 1928).

La informo de la Komisararo pri Komerco enhavas 27.000 petojn: ukraina terkultura informo enhavas 20.000

(*Izvestia*, 11-an de decembro 1927). Loka plenuma komitato sendas al la soveto de la vilaĝo demandaron el 348 demandoj, kaj ĉi tio dum la rikoltosezono de la greno (*Pravda*, 18-an de aprilo 1928). La instituto de eksperimenta agronomio publikigas enketfolion de ses metroj da longo kaj tute plenan per demandoj pri traktoroj (*Diednot*, 1-an de aprilo 1929).

En la 15a Kongreso de la Partio, Stalino citis la kazon, inter multaj aliaj, de kriplulo, kiu devis atendi sep jarojn aparaton de protezo[49]. Laboristo, kiu devas fari depostulon kontraŭ la administristaro de entrepreno, devas trapasi 24 burokratajn formalaĵojn (*Trud*, 14-an de januaro 1928). Oficejo proceduras po 210 kontraktoj por dungita laboristo kaj ĉi tio kvankam la dungitaro estas tre varia (*Trud*, 5-an de aŭgusto 1928). Horloĝo importita en USSR-on trapasas en la dogano 142 formalaĵojn (*Izvestia*, 9-an de decembro 1928). Inventisto, alveninta al Moskvo por eksperimenti malkovron, devas fari proceduron por atingi ĉambron. Post jaro kaj duono ankoraŭ ne ĝin akiris, sed kolektis aron da burokrataj folioj rilataj al tiu proceduro: 400 dokumentoj (*Vechernaya Moskva*, junion 1929).

La funkciuloj de la Partio estas troŝarĝitaj de taskoj. Kamenev, antaŭ ol esti eksigita, estis membro de la Centra Komitato kaj de la politika Buroo de la Partio, prezidanto de la Konsilantaro pri la Laboro kaj la Defendo, prezidanto de la Soveto de Moskvo, vicprezidanto de la Konsilantaro de Komisaroj de la Popolo, membro de la kolektiva prezidantaro de la Supera Ekonomia Konsilantaro, membro de la plenuma Centra Komitato de la Unio kaj de la plenuma Komitato de la Soveto de la Respubliko, direktisto de la

49 Estas la problemo, kiu montris la sovetia disidento Andrej Saĥarov kiam estis nomumita Nobel-Premio pri Paco en 1975. https://www.jppetit.org/sakharov/discours_prix_nobel_sakharov/discours_prix_nobel_fr.htm Noto de 2016.

Instituto Lenino, kundirektisto de *Bolchevik*, oficiala revuo de la Partio, kaj certe la listo de liaj taskoj aŭ postenoj ne estas kompleta. Eĉ la malgrandaj estroj estas troŝarĝitaj de taskoj kaj de ĉiaj postenoj. Komunista junulo deklaris okupi li mem dekses postenojn. (*Pravda*, 21-an de marto 1925).

Kun tiel abunda burokrataro, kun tiel komplika administra mekanismo, kun tiel minimuma kontrolo, estas nature, ke la ŝtelado estu unu el la karakterizaĵoj de la burokrata vivo de Rusujo. Altranga sindikata funkciulo, Dogadov, raportis al la Centra Konsilantaro de la sindikatoj en 1925, ke preskaŭ la duono (47 %) de la buĝeto de la rusa sindikata konfederacio (700 milionoj da rubloj) estis vorita de la funkciuloj (*Pravda*, 9-an decembro 1926). Dum unu jaro 5.323.000 rubloj estis malŝparitaj en la kooperativoj (*Torgovo-Promizhlenaya Gazeta*, 23-an de majo 1926).

La tuta bolŝevika gazetaro de la sekvaj jaroj estas plena de novaĵoj pri la burokrataj malŝparegoj en la kooperativoj. Tomsky, nun prezidanto de la konfederacio de la rusaj sindikatoj, diris en la 8a Kongreso de la sindikata Organizo:

«Kie oni ŝtelas?... Ĉie: en la komitatoj de fabrikoj, en la kasoj de reciproka helpo, en la rondoj, en la regionaj, departamentaj kaj distriktaj sekcioj; ĉie unuvorte. Eĉ ekzistas sekcio kun la titolo: «Nekonata», se io estas ŝtelita ie, sed ni ne scias kie. Kaj kiuj ŝtelas? Por pli granda honto de nia institucio, mi devas diri, ke la prezidantoj estas kapitalistoj. Kiel distribuas sin la ŝteloj de la politika vidpunkto?

Laŭ neegala maniero inter komunistoj kaj ankaŭ inter personoj, kies politika orientiĝo estas «nekonata». Por tio koncernanta la junularon, la situacio estas angorplena. La sindikata aktivularo enhavas en neniu nivelo pli ol la 9

procenton de la junuloj, sed koncerne ŝtelistojn atingas la 12,2 procenton.»

En novembro 1935 *Il Risveglio* de Ĝenevo publikigas la leteron de dungito de hotelo en kiu, inter aliaj aĵoj, oni legas:

«En marto 1925, dum la internacia foiro de Liono, mi troviĝis en la *Nouvel Hôtel*, kie la proprulo, ĝisfunde faŝista, akceptis per la respondaj honoroj la sovetian komisianaron. Ili okupis la plej bonajn ĉambrojn, kiujn la proprietulo pagigis po 120 frankoj por tago kaj persono, prezoj, kiuj en tiu epoko estis supermezuraj, sed ke la bolŝevikoj pagis sen disputo. Nu mi povis konstati, ke ili havis la samajn malvirtojn de la rusa nobelaro. Je la vespermanĝo, ĉetable, ili ebriiĝis per konjako, kaj nome de la diktatorado de la proletaro servigis al ili la plej bonajn vinojn de Bordozo.»

La «honorsento» kondukas al la luksaj kaj malvirtaj kutimoj, kaj tiuj kutimoj kondukas al la korupteco.

Pravda de la 16-a de oktobro 1935 denuncis du kazojn de burokrata korupteco indaj esti rimarkitaj:

«La "arbara Industrio", organo de la Komisararo de la Popolo por la Arbara Industrio, ricevis monon laŭ neleĝa maniero de la trusto *Ukrqiness*, de la Departamento pri Brulaĵoj de la Komisararo de Vojoj kaj Komunikiloj kaj de aliaj ekonomiaj organizoj. La "malpeza Industrio", samnoma organo de la Komisararo, ricevis monon, ĉiam neleĝan, de la administristaro de la loka industrio de Kievo, de la kotona departamento de la Komisararo de Terkulturo, de la trusto de la kotono kaj de la trusto de la ledo kaj la felo.»

La rusaj ĵurnaloj estas plenaj de novaĵoj rilataj al la korupteco de la burokrataro kaj de informoj pri «la elpurigo de la Partio». Efektive la elpurigo baziĝas sur la forigo de la uloj, kiuj «ne sekvas la linion». Jen iuj tipaj kazoj, eltiritaj de

Bolchevistskaya Pechat (numeroj 13-a kaj 14-a de 1935). Estis eksigita la redaktistestro de *Kommunist* de Seratov, sekretario de la loka sekcio de la komunista partio, ne ĉar -laŭ la ĵurnalo- sekvis «eraran politikan linion», sed ĉar la estro de dungitaro Davidovov donis pruvojn pri lia «kriminala neglektado», ĉar tiu dungis korektistojn kaj redaktistojn de ne proleta aŭ suspekta origino: Goverdovski, «kies gepatroj estis forpelitaj de Moskvo», la civitanino Znamenskaia «filino de blankula oficiro mortinta dum la enlanda milito», la civitanino Gonchareneva, forpelita de Moskvo, kiel kontraŭrevolucia, la literaturisto Lardi «forpelita de la Partio pro tuta malordo (laŭvorte), eksnobelo, kun onklino en Pollando», la fotisto Kruscinski forpelita de la Partio ĉar li estis en Latvio sen rajtigo kaj havante parencojn tiulande, la civitanino Runguis, parenco de virino kondamnita pro la partopreno en asocio de banditoj[50].

La iom sendependaj kaj la plej honestaj kaj kapablaj funkciuloj estas sisteme forigitaj, dum restas en siaj postenoj la oportunistoj preskaŭ ĉiuj subaĉeteblaj kaj nekompetentaj.

Eĉ la postenoj de la Partio iĝis stabilaj sinekuroj. La cirkulado de la estroj estas nuntempe nuligita. Dum la statutoj de la rusa komunista partio ordonis, ke ĉiujare ŝanĝiĝis la estroj de la partio, la sindikatoj kaj la sovetoj, iu Kajiani estis dum ok sinsekvaj jaroj sekretario de la Centra Komitato de la kartvela komunista partio[51].

Ĉiu ĉi aferstato favoras la plifirmigon de la burokrataro kaj la teknokratio, kiel klaso.

---

50 La karakterizaĵo de la “reala socialismo” estis ĉiam konsideri la parencojn kaj la intimajn amikojn de «malamikoj de la popolo», kiel eblajn malamikojn. Trajto pli religia ol scienca, kiun la okcidentaj marksistoj akceptis senkonteste en la granda plimulto de la okazoj. Noto de 2016.

51 Berneri ne indikas, ke la donitaĵo devenas de la Alvoko de Tarov-Manukian.

En sia libro *Vers l'autre flamme* [Al la alia flamo] publikigita en Parizo en 1929, Panait Istrati[52] elmontris per nombroj ĉi tiun situacion, priskribante la diversajn proporciojn per kiuj la diversaj klasoj de la rusa popolo ŝparis kaj deponis siajn ŝparaĵojn en la ŝparkasoj dum la jaro 1926: la 12 procento estis ŝparaĵoj de laboristoj; la 3,6 procento de kamparanoj, dum la funkciuloj kaj aliaj ne specifitaj kategorioj deponis la 56,7 procenton.

La nova kategorio de la laboristaj estroj kaj la specialigitaj «staĥanovistaj» laboristoj subtenas la novan teknika-burokratan burĝaron.

La ne specialigitaj laboristoj konsistigas la veran industrian proletaron. En 1935 la meza salajro de tiu kategorio, se oni konsideras la prezojn de la nutrado en tiu sama jaro estis salajro de malsato, ĉar estis inter 100 kaj 150 rubloj monate. En Moskvo ekzemple, kilogramo de blanka pano kostis de 2 ĝis 6 rubloj, la kilogramo da viando kostis de 10 ĝis 15 rubloj, kaj kilogramo de lardo de 28 ĝi 30 rubloj. Bileto de tramvojo de 10 ĝis 25 kopekoj (tio estas kvarono de rublo), kaj bileto de metrovojo 50 kopekoj (tio estas duona rublo).

Izvestia de la 9-a de majo 1935 anoncis, ke estro de manlaborejo de la altfornoj de Krivói Rog (Ukrainujo) ricevis

52 Libro tradukita al la hispana de Julián Gorkin kaj titolita 'Rusujo senvualigita'. Eldonejo Cenit, Madrido. (1930). Fakte, estis tri la aŭtoroj Panait Istrati, Victor Serge, Boris Souvarine. Vidu Frédérica Zéphir [http://revel.unice.fr/loxias/index.html?Iru=7351]. Oni konstatas, ke Berneri kolektis tre moderajn ekzemplojn, preterlasante faktojn kiel: «Tri membroj de la asocio de la «proletaj verkistoj» estis arestitaj, ĉar ili invitis al sia sidejo komunistan junulinon, ebriigis kaj seksperfortis ŝin; la viktimo memmortigis.» (*Rabochaya Gazeta*, 31-an de marto 1928) » *Vers l'autre flamme [*france, *Al la alia flamo]*, Parizo, Rieder, 1929, paĝo 288. La aŭtoroj informis, ke la kritikoj publikigitaj de la gazetaro en USSR restis ĉiam fragmentaj, neniam pridubante la reĝimon, paĝo 259. Noto de 2016.

salajron (monaton de aprilo) de 3.300 rubloj. *L'Humanité*, bolŝevikisma ĵurnalo de Parizo, en sia numero de la 16-a de decembro 1935 parolis pri laboristo, kiu enspezis 4.361 rublojn en 24 tagoj kaj pri manlaboristo, kiu ricevis po 233 por sola tago de laboro.

La 15-an de decembro 1935 *L'Humanité* anoncis, ke la ŝparkasoj de USSR havis rezervon de 4.256.000 rubloj pli alta ol tiu de la 1-a de decembro 1934. En 1936 (de la 1-a de januaro ĝis la 11-a de majo) la tuto de la ŝparaĵoj pliiĝis je 403 milionoj da rubloj kontraŭ 261 milionoj je la responda periodo de 1935. La sinjoroj Lewis kaj Abramson, kiuj estis en Rusujo senditaj de IOL (Internacia Organizo pri Laboro) de Ĝenevo, ĵus publikigis informon, kiu konfirmas la pliigon de la diferencado en la industriaj salajroj.

«Pri la metalurgia industrio oni informas, ke la skalo de salajroj pli ofte aplikita enhavas ok klasojn (aŭ kategoriojn). La kategorio de la malpli kvalifikita laboristo estas reprezentita de la koeficiento 1, kaj tiu de la sekva klaso de la koeficiento 1.15 kaj progresive 1.32, 1.52. 1.83, 2.17, 2.61 kaj fine 3.13.»

Laŭkvanta laboro, skalo de salajroj, sistemo de premioj: ĉio ĉi kreadas etburĝaron, kiu subtenas la teknika-burokratan mezburĝaron kaj prokrastas la «trian revolucion», defendita de la revolucia opinio, plifirmigante la diktatoradon de klano.

Ĉi tiu fenomeno de restarigo de la klasoj «per la ŝtato» estis antaŭvidita de ni kaj klare denuncita. La leninista opozicio ne sukcesas enprofundiĝi en la etiologian ekzamenon de la fenomeno kaj pro tio ne sukcesas revizii la leninistan pozicion antaŭ la problemo de la ŝtato kaj la revolucio.

Enhavtabelo

Enkonduko de la tradukinto.....3
SEPDEK TAGOJN EN RUSUJO. KION MI VIDIS.....8
1a Survoje al Rusujo kaj unuaj impresoj.....8
2a. Survoje. Du tagojn en Moksvo.....34
3a. Ekskurso sur Volgo.....51
4a. Ree en Moskvo.....70
5a. Akcepto, malfermo de la Kongreso, politikaj amaskunvenoj kaj aliaj festaĵoj.....79
6a. Kategorioj de salajroj kaj sindikata organizo.....88
7a. Granda festo kaj festeno.....108
8a. La problemo de la loĝejo.....118
9a. Publika instruado.....125
10a. En la Departemento pri la Terkulturo.....139
11a. Politiko pri provizadoj.....151
12a. En la Departemento de la Fervoja Transporto.....171
13a. En la Komisarejo pri la Laboro.....181
14a. La “komunismaj sabatoj”.....188
15a. Trajnoj kaj ŝipoj por propagando.....194
16a. En la Centra Oficejo de Kooperativoj.....200
17a. Aliaj vizitoj.....206
18a. Vizito al Kropotkin.....215
19a. Interparolo kun Lenino.....225
20a. La reveno al Hispanujo.....238
21a. Konkludo.....249
Aneksaĵo: kondiĉoj por la akcepto en la Komunista Internacio. 255
LENINO, ENTOMBIGINTO DE LA RUSA REVOLUCIO.....264
AKTIVULO DE NKL EN RUSUJO.....292
Dediĉo.....292
Enkonduko.....293
1a. Kiel kaj kial mi iris al Rusujo.....305
2a. Sur rusa teritorio.....309
3a. Moskvo.....315

4a. La vivo de la politikaj enmigrintoj.....321
5a. La Komitatoj de Fabriko kaj la Sindikatoj.....327
6a. La salajroj kaj la laborkondiĉoj en USSR.....333
7a. La ina salajro.....345
8a. La laborista moveco.....349
9a. La kolektivigo.....358
10a. La kooperativoj pri konsumo kaj la krizo de produktoj.....365
11a. La kooperativo pri konstruado kaj la disdono de loĝejoj....376
12a. La depruntoj de la Ŝtato.....384
13a. La karceroj de Rusujo.....388
14a. La malliberejoj.....394
15a. La kazerno kaj la deviga militista servo.....399
16a. La geedziĝo, la familio, la divorco, socialaj asekuroj, lernejo kaj prostituado.....402
17a. La persekuto de la libera penso en USSR.....422
18a. Panait Istrati.....435
LA ŜTATO KAJ LA KLASOJ.....440

Organiziĝu
Kleriĝu
Biblioteko
Mateo Morral
Agu
www.bmmorral.org
info@bmmorral.org